UNIVERSALA Esperanto METODO

DE DOKTORO BENSON

ENHAVANTA
KOMPLETAN REKTAN LERNOLIBRON.
AMPLEKSAN ILUSTRITAN LEGOLIBRON.
UNIVERSALAN MULTLINGVAN BILDVORTARON.

41 LINGVOJ.
11.000 BILDOJ.
100 LISTOJ DE SAMSPECAJ VORTOJ.
2 PLENPAĜAJ TABELOJ DE LA PRONONCADO DE LA ESPERANTO ALFABETO EN 36 LINGVOJ.
5 PLENPAĜAJ TABELOJ DE LA KORELATIVOJ EN 36 LINGVOJ.
KOMPLETA INDEKSO.

COPYRIGHT 1932
BY
DR. WM. S. BENSON
ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVITAJ

BENSON SCHOOL OF ESPERANTO
NEWARK, NEW JERSEY, U.S.A.

ENHAVO


UNUA PARTO

DUA PARTO

[Krestomatio]

TRIA PARTO

KVARA PARTO



La turo babilona

LA TURO BABILONA

EL FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Kial vi, patroj, en Babilono
Konstrui turon komencis
Kaj tre fiere ankaŭ je l' trono
Ĉiela regi intencis?

Ĉu jam senfina, vasta la tero
Al vi ne estis sufiĉe?
Vi ja trankvile kaj sen danĝero
Ĉirkaŭe vivis feliĉe.

Kien sin turnis viaj okuloj,
Havante lingvon komunan,
Trovis loĝejon vi, antaŭuloj,
Bonegan kaj oportunan!

Jen al vi plaĉis monto, jen valo,
Trankvila en Sinorujo,-
Ĉie potenco via egala
Kaj ĉie via patrujo.

Kial deziris vi do subite
De l' val' suriri ĉielon?
Vi per argilo, brikoj malsprite
Atingi pensis la celon?

Sed entrepreno via, ho, vana,
Senfrukta restis je l' fino;
Tuj ĝin detruis Dia la mano,
Kondukis vin al ruino.

Dum la konstruon vi diligente
Plialten levi rapidis,
Jen vian lingvon Dio momente
Je lingvoj mil disdividis!

Nun jam pri kio unu parolas,
Komprenas dua nenion,
Kaj ne sciante, kion li volas,
Al li venigas alion:

Unu por l'alta granda konstruo
Necese brikon bezonas,-
Ne komprenante lin, jen la dua
Argilon tuj al li donas.

Tuj malkonsento, poste batalo
Fariĝis inter la rondo;
Tuta l'homaro iris de l' valo
Diversajn landojn de l' mondo.

Kvankam jam pasis miloj da jaroj
De tiu puno de Dio,
Regas ankoraŭ inter homaroj
Malamo, senharmonio.


Vere la patroj kontraŭ la Dio
Multege tiam fieris;
Kial ĝis nun por peko ilia
Senkulpaj idoj suferis?

Sed ni esperas baldaŭ refondon
De l' lingvo ĉiunacia,
Kiel konsolis tutan la mondon
Jam la profet' Zefania.

Ĝoje l'espero nin jam karesas,
Proksiman celon montrante;
L'internacia lingvo progresas,
Amikojn ĉie trovante.

Novajn amikojn voku, amikoj,
La voko vana ne estos!
Floras jam flor', ne sole radikoj,
Je l' frukto baldaŭ ni festos.

M. Goldberg.


D-RO
L. L. ZAMENHOF
AŬTORO DE ESPERANTO
NASKIĜIS 15.12.1859
MORTIS 14.4.1917
Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco-
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

LA ALFABETO ESPERANTA.

(PRESLITEROJ.)

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ,
Dd, Ee, Ff, Gg,
Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii,
Jj, Ĵĵ, Kk, Ll,
Mm, Nn, Oo, Pp,
Rr, Ss, Ŝŝ, Tt,
Uu, Ŭŭ, Vv, Zz,



La Alfabeto Esperanta.

skribliteroj.

Aa A	Bb B	Cc C	Ĉĉ Ĉ
Dd D	Ee E	Ff F	Gg G
Ĝĝ Ĝ	Hh H	Ĥĥ Ĥ	Ii I
Jj J	Ĵĵ Ĵ	Kk K	Ll L
Mm M	Nn N	Oo O	Pp P
Rr R	Ss S	Ŝŝ Ŝ	Tt T
Uu U	Ŭŭ Ŭ	Vv V	Zz Z

EKZERCO DE LEGADO

Al Arbaro Adiaŭ Azeno Balai
Balo Bacilo Cento Colo Citrono
Celo Ĉar Ĉemizo Ĉikani Ĉielo
Dento Deino Domo Disŝiri En
Eĉ Ekzerci Eburo Estimi Evolui
Fabo Fajro Familiara Forta Filo
Fulmo Gaja Gento Gloro Grati
Ĝermo Ĝardeno Ĝentila Ĝoji Ĝi
Haro Helpi Historio Hieraŭ Hufo
Ĥoro Ĥemio Ĥirurgo Ĥimera Eĥo
Iam Ilumini Importi Instrukcio
Jam Januaro Juna Jes Jezuito
Ĵaketo Ĵeti Ĵurnalo Kaj Kajero
Ke Kolo Krajono Knabo Kutima
La Laca Lerta Lingvo Lojaleco
Maĉi Magazeno Modesta Muso
Nankeno Ne Nikotino Noto Nubo
Oficiro Obei Opinio Oksigeno Ol
Obstrukcio Oscedi Ofendi Ofta
Paĉulo Patro Peco Piro Perfekta
Preskaŭ Perdi Plumo Por Plaĉi
Rato Recenzi Religio Respubliko
Rilati Rigida Ronki Ruĝa Ruini
Sablo Saĝa Semajno Sceno Scio
Sento Signo Situacio Sono Suferi
Ŝafo Ŝelko Ŝpruci Ŝultro Ŝraŭbo
Tabelo Tamen Telero Tranĉi Teo
Tiri Tigro Toleri Triviala Turmenti
Ulcero Unika Universitato Utopio
Uragano Unu Urbo Umbiliko Urĝi
Vadi Vespero Viando Voli Vualo
Zebro Zibelo Zorgi Zingibro

Prononcado de la Esperanta alfabeto en 36 lingvoj.

ESPERANTO	ANGLA	FRANCA	HISPANA	ITALA	KATALUNA	PORTUGAL	RUMANA	GERMANA	HOLANDA	FLANDRA	DAN. NORV	SVEDA	HUNGARA	ISLANDA	ESTONA	FINA	LITOVA	LATVA
Aa	A FATHER	A PAPA	A AMADA	A PADRE	A MÁS	A GATO	A ALFABET	A ABEND	A ABSTRACT	A KAS	A RAND	A ADVOKAT	Á ÁRPÁD	A AMMA	A ALGAMA	A ARMAS	A AKYS	A LAMATAS
Bb	B BOARD	B BEBE	B BARBERO	B BENE	B BARBA	B BURRO	B BANCA	B BAHN	B BAD	B BOTER	B BAL	B BALLETT	B BAB	B BÚBÓT	B ABI	B BALLADI	B BADAS	B BANDA
Cc	TS TSAR. ITS	TS TSAR	TS TSAR	Z MARZO	TS CARATSOS	TS TSÉTSÉ	Ţ ŢIGAN	Z ZEHN	TS TSAAR	TS TSAAR	TS SATSEN	TS SATSER	C CICA	TS MATSELJA	TS KATSE	C CENSORI	C CUKRUS	C CIRCENIS
Ĉĉ	CH CHURCH	TCH TCHÈQUE	CH CHICHÓN	C CERA	TX BOTXA	TCH TCHECO	C CELEBRU	TSCH TSCHECHE	TSJ PLAATSJE	TSJ TSJIRPEN	TSJ RITSJ	TJ TJÄNA	CS CSACSI	ENSK.'CH' CHURCH	TŠ TŠEKK	ENG.'CH' CHURCH	Č ČIAUDULIS	Č ČIEKURS
Dd	D DOOR	D DODO	D DEDAL	D DADO	D DIDAL	D DENTE	D DANS	D DORT	D DONDER	D DAPPER	D DAG	D DIREKT	D DUDA	D DÓMUR	D AADE	D DAADELI	D DALYKAS	D DUNDAGA
Ee	E MET	É BÉBÉ	E ELEFANTE	E STELLA	E LLET	E CEDO	E ELEV	E ERDE	E ELLEND	E BED	E VEN	E EFFEKT	É ÉLÉNK	E ENNI	E EDENDAMA	E ESTE	E ERDVE	E EGLE
Ff	F FLOOR	F FIFRE	F FAMOSO	F FUNE	F FAVA	F FILHO	F FASOLE	F FEDER	F FLINK	F FLUITEN	F FIN	F FABEL	F FÉL	F FORFEDUR	F FLÖÖT	F FAKTORI	F FIZIKA	F FIGURA
Gg	G GOOD	G GANT	G GLOBO	G GALLO	G GUST	G GARFO	G GURA	G GEGEND	G GROOT	G GAST	G GLAD	G GLATT	G GAGOG	G GULGRAR	G GEOLOOG	G GUMMI	G GABUMAS	G GRANĀTS
Ĝĝ	G GENTLE	DJ ADJUDANT	FRANC.'DJ' ADJUDANT	G GELARE	TJ PLATJA	DJ ADJEKTIVO	GE GER	DSCH DSCHUNGEL	DZJ VEIDZJE	ENGL.'J' JOHN	DJ DJAERV	ENGL.'G' GENTLE	DZS DZSIDA	ENSK.'G' GENTLE	DŽ DŽENTLMEN	ENGL.'J' JOHN	DŽ DŽIAUGSMAS	DŽ DŽUKSTE
Hh	H HURT	H(HUR (ASPIRE)	H (ASPIR)	H (ASPIR)	H (ASPIR.)	H (ASPIR.)	H HOTEL	H HUND	H HARD	H HUIS	H HAKKE	H HAKE	H HA	H HERSIR	H HIRV	H HYMY	H HIMNAS	H HIGIENA
Ĥĥ	GER.'CH' ACH	H (GORGÉ)	J JUEVES	TEDES.CH ACH	H FORT.ASPIR	H FORT.ASPIR.	H HRANA	CH DACH	CH CHEMIE	CH LACHEN	CH TYSK. ACH	TYSK.'CH' HOCH	CH CHERUB	G SAGT	H NAHK	SAKS.'CH' RACHE	CH CHORAS	CH MECHANIKA
Ii	E ME	I CRI	I INCITAR	I VIA	I INSISTIR	I BRILHO	I INDIVID	I KIND	I BITTER	I MIN	I VIN	I INTILL	I IME	I ILLUR	I INIMENE	I ILO	I IŠKABA	I VISI
Jj	Y YES	Y YEUX	Y YEMA	J JOTA	Y LLEYDA	I MAIS	I STRAINI	J JAGEN	J JAAR	J JAAR	J JA	J JA	J JÓ	J JAEJA	J JUHT	J JA	J JAUNAS	J JURA
Ĵĵ	S MEASURE	J JOUR	COMO FR.'J' JOUR	COME FR.'J' JOUR	J DIJOUS	J JANTAR	J JALBA	J JOURNAL	J JOURNAAL	J JALAPE	SJ SJAL	FR. J JOUR	ZS ZSEB	ENSK.'S' 'VISION'	Ž ŽURNAAL	RANSK.'J' JOURNAL	Ž ŽMOGUS	Ž ŽURNALS
Kk	K KIND	C-K COKE	K KEPIS	C CAPO	QU QUILO	K KALIFA	K KILOGRAM	K KRANK	KI KRIK	K KAT	K KAR	K KALK	K KÉP	K KALDAKOL	K KILK	K KALA	K KULKA	K KAFIJA
Ll	L LOVE	L LILAS	L LILA	L SALA	L LELA	L LEITE	L LAPTE	L LIEBE	L LAND	L LEPEL	L LIV	L LUSTIG	L LAP	L ALILAMB	L LIILIA	L LAPSI	L LABAS	L LOLOT
Mm	M MAN	M MAMAN	M MANO	M MANO	M MAR	M MINHO	M MUNTE	M MARK	M MATRAS	M MAAT	M MAND	M MARTYR	M MERT	M MIÐMJÓR	M MALM	M MAKU	M MEDUS	M MAIGS
Nn	N NAME	N NONE	N NICHO	N PANE	N NENA	N NARIZ	N NOBIL	N NACHT	N NEK	N NAALD	N NEJ	N NICKEL	N NAP	N VÍNANDI	N ANI	N NAPPI	N NAMAS	N NONAKT
Oo	O FOR	O BOBO	O ORO	O SOLE	O TOS	O ODOR	O ORDIN	O OFEN	O OPEN	O ORGEL	O BOG	Å BÅT	O OKOS	O OFLOF	O OSA	O OPAS	O ORAS	O OZOLS
Pp	P PART	P PAPA	P PERLA	P PACE	P PARE	P PIPA	P PLOP	P PAPIER	P PEPER	P PAREL	P PAPIR	P PAPP	P POR	P PUND	P PAPPEL	P PETO	P PARTIJA	P PAPARDE
Rr	R RAT	R RIRA	R ROSA	R PARERE	R RARO	R RATO	R ROMAN	R RÖHRE	R ROND	R RATEL	RR VAERRE	R RAND	R ROZS	R REYR	R RAHU	R RAPU	R RATAS	R RIEKSTS
Ss	S SKIN	S SEIS	S SOIS	S FALSO	S SANTA	S SABÃO	S SOARE	S SUPPE	S SOEP	S SISSEN	S IS	S SNÖ	SZ SZÉP	S SÓLSKIN	S SOOMUS	S SALVA	S SAGUTĖ	S SLAPT
Ŝŝ	SH SHOW	CH CLOCHE	COME FR.'CH' CLOCHE	SC LISCIO	X GUIXA	CH CHAPÉO	Ş ŞOIM	SCH SCHULE	SJ SJOFEL	CH CHOCOLADE	SJ SJOV	SCH BROSCH	S SOK	ENSK.'SH' SHE	Š TUŠŠ	SAKS.'SCH' SCHÖN	Š ŠALTAS	Š ŠAUŠALAS
Tt	T TAKE	T TÂTER	T TOMATE	T TERRA	T TITELLA	T TATO	T TUTAN	T TAFEL	T TITEL	T TAFEL	T TAG	T TEATER	T TOK	T TILTØK	T TEMA	T TALVI	T TORTAS	T TITULS
Uu	U RULE	OU COU	U UNO	U UNO	U DISPUTAR	U BUCHO	U USCAT	U UHU	OE TOEN	OE DOEK	U KLUD	TUSK.'U' GUT	U LUD	Ú ÚÐI	U KUJU	U USKO	U UKININKAS	U UGNUS
Ŭŭ	OW NOW	OU (BREF)	EU EUPOPA	AU AUSTRIA	U BREU	AU CAUDA	U SAU	U BAUM	AU AAUW	UW LAUW	U EUROPA	U FAUST	U RÖVID'U'	U	U AUK	AU KAUNIS	U UBOGAS	V RAV, JAV
Vv	V VERY	V VIVE	V VIVO	V VINO	V VIVOR	V VIVO	V VAJ	W WORT	W WEDUWE	V LEVEN	V VAND	V VED	V VAJ	V VAÐA	V VAEV	V VALA	V VAKARAS	V VAVERE
Zz	Z ZONE	Z AZUR	COMO FR.'Z' AZUR	S ROSARIO	Z ZERO	Z ZEBRO	Z ZAB	S SAMEN	Z BEZEM	Z LEZER	S SUMMEN	TUSK.'S' SAGEN	Z ZAB	ENSK.'Z' ZONE	S PESEMA	SAKS.'S' SAGEN	Z ZIGZAGAS	Z ZVAIGZNE

Prononcado de la Esperanta alfabeto en 36 lingvoj.

ESPERANTO	RUSA	BULGARA	SERBA	UKRAINA	POLA	ĈEĤA	KROATA	SLOVAKA	ARMENA	GREKA	TURKA	ALBANA	JUDA	PERSA	ARABA	HEBREA	ĤINA	JAPANA
A a	А АЗБУКА	А АКТЪ	А АДРЕСА	А АКУРАТ	A ALTANA	A ALMUŽNA	A APARAT	A ZABÁVAT'	[illegible]	A ΑΓΕΛΑΣ	A ADEM	A ABAT	[illegible]	آ آب	[illegible]	[illegible]	ㅏ 紀	ア 雨
B b	Б БАБА	Б БАБА	Б БРЕЗА	Б БРАТ	B BABA	B BURSA	B BANDA	B BLYŠŤAŤ'	[illegible]	ΜΠ ΜΠΑΛΑΣ	B BANA	B BELBETU	[illegible]	[illegible]	ب بر	[illegible]	ㅂ 步	ブ 武士
C c	Ц ЦЕНА	Ц ЦАРЬ	Ц ЦЕНЗОР	Ц ЦИГАН	C CACKO	C CITOVATI	C CARSTVO	C CIGÁRA	[illegible]	ΤΣ ΤΣΕΠΗ	TS TSAR	C CIVIL	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ツ 月
Ĉ ĉ	Ч ЧЕЧЕВИЦА	Ч ЧИСТЪ	Ч ЧЕСТО	Ч ЧУДО	CZ CZAS	Č ČEPICE	Č ČUDO	Č ČAPICA	[illegible]	?	Ç ÇOK	Ç ÇARKU	[illegible]	چ چاه	[illegible]	[illegible]	[illegible]	チ 父
D d	Д ДЯДЯ	Д ДѢЛО	Д ДОБАР	Д ДЕРЕВО	D DAMA	D DŮM	D DAN	D DOM	[illegible]	ΝΤ ΝΤΗΜΑ	D DOUA	D DËNDUR	[illegible]	د دال	د دار	[illegible]	ㄷ 得	ド 土人
E e	Э ЭХМА	Е ЕДИНЪ	Е ЈЕЖ	Є ЄДВАБ	E ELEGJA	E EBEN	E ESTRADA	E EBEN	Է էջ	ΑΙ ΑΙΜΑ	E EMIR	E ETHE	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ㅔ 愛	エ 絵
F f	Ф ФИРМА	Ф ФОКУСЪ	Ф ФИГУРА	Ф ФЛЯШКА	F FURAŻ	F FLÉTNA	F FUNT	F FIGLÁR	[illegible]	Φ ΦΟΝΕΥΣ	F FAKIR	F FRESK	[illegible]	ف فارس	[illegible]	[illegible]	ㅍ 復	[illegible]
G g	Г ГРАФ	Г ГОРА	Г ГЛАВА	Г ГУСЬ	G GOŚĆ	G GRANAT	G GLADITI	G GUĽA	[illegible]	ΓΚ ΓΚΑΒΟΣ	G GUZEL	G GRURE	[illegible]	گ گندم	[illegible]	[illegible]	ㄱ 巨	ガ 瓦斯
Ĝ ĝ	ДЖ ДЖЕНТЕЛЬМЕН	ДЖ ДЖЕББ	ДЖ ДЖАМИЈА	ДЖ ДЖАГАН	DŻ DŻAŻDŻKA	DŽ DŽBAN	DŽ DŽAMIJA	DŽ DŽBAN	[illegible]	ΔΖ	C CIN	XH XHEHNEM	[illegible]	ج جوان	ج جرار	[illegible]	쥬 洲	ヂ 人民
H h	Г/Х БОГ	Г/Х ХОРА	Г/Х ГАЉИНА	Г/Х ГАРБУЗ	H HARFA	H HORA	H HUSAR	H HODINA	[illegible]	?	H HAVA	H HOTEL	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ㅎ 許	ハ 橋
Ĥ ĥ	Х ХОХОТ	Х ХОРЪ	Х ХРОМ	Х ХАТА	CH CHICHOT	CH CHOVATI	H HRBAT	CH CHÔR	[illegible]	Χ ΧΑΡΑ	H HABER	?	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ㅎ 華	(獨) ACH
I i	И ИГЛА	И ИГО	И ИСТИНА	І ІКРА	I IGLICA	I VLIV	I IGRA	I VLIV	[illegible]	Ι ΙΔΙΟΣ	I IMAM	I INSISTU	[illegible]	ای ایران	ای ایران	[illegible]	ㅣ 李	イ 意味
J j	Й ТАЙНЫЙ	Й МОЙ	Ј ЈАГОДА	Й ЙОЙКАТИ	J JAJKO	J JAN	J JARBOL	J JARMO	[illegible]	?	Y YÜZÜK	J JA	[illegible]	ی یار	ی یعقوب	[illegible]	ㅑ 儒	ヤ 山
Ĵ ĵ	Ж ЖАЛЬ	Ж ЖАБА	Ж ЖЕНА	Ж ЖАЖДА	Ż ŻITO	Ž ŽELEZO	Ž ŽALOCT	Ž ŽABA	[illegible]	?	J JURNAL	ZH ZHIVE	[illegible]	ژ ژاله	[illegible]	[illegible]	[illegible]	(仏) JE
K k	К КАК	К КАСА	К КРИСТАЛ	К КАЛИКА	K KAKOL	K KOLECKA	K KOMAD	K KUKUČKA	[illegible]	Κ ΚΕΦΑΣ	K KAR	K KANAPÉ	[illegible]	ک کاهو	ك كلب	[illegible]	ㅋ 柯	ク 首
L l	Л ЛАКЕЙ	Л ЛАВКА	Л ЛЕД	Л ЛАСКА	L LALKA	L LAMPA	L LOVAC	L LAK	[illegible]	Λ ΛΟΙΜΟΣ	L LAZIM	L LARDH	[illegible]	ل لاله	ل لون	[illegible]	ㄹ LOVE	ラ ランプ
M m	М МАСЛО	М МЕДЪ	М МЕДВЕД	М МАМКА	M MOŚĆ	M MOŘE	M MNOGO	M MUCHA	[illegible]	Μ ΜΕΡΟΣ	M MIRAS	M MUR	[illegible]	م مادر	م ماء	[illegible]	ㅁ 音	ム 虫
N n	Н НЯНЯ	Н НЕБЕ	Н НОВОСТ	Н НУЖДА	N NOS	N NAROD	N NUŽNO	N NIČ	[illegible]	Ν ΝΙΚΗ	N NASIB	N NATE	[illegible]	ن نان	ن نمر	[illegible]	ㄴ 銀	ノ 野
O o	О ОЛОВО	О ОКО	О ОБИЧАЈ	О ОБОРОТ	O OWOC	O OPROTI	O OTAC	O OKO	[illegible]	Ο ΟΛΟΝ	O ODUN	O OMBRELLË	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ㅗ 君	オ 大きい
P p	П ПАХАТЬ	П ПОПЪ	П ПЕПЕЛ	П ПІСНЯ	P PAPUGA	P PIPATI	P PAPAR	P PERO	[illegible]	Π ΠΕΡΝΩ	P PARA	P PIPË	[illegible]	پ پست	[illegible]	[illegible]	ㅍ 非	プ ポンプ
R r	Р РАЗМЕР	Р РАНО	Р РАЈ	Р РЕБРО	R RURA	R RÁNO	R RATAR	R REMEŇ	[illegible]	Ρ ΡΗΜΑ	R RAZI	R RIZ	[illegible]	ر راه	ر رب	[illegible]	[illegible]	ル 類
S s	С СОСНА	С СОЛЬ	С СЛАВА	С СЕРЦЕ	S SESJA	S SOBOTA	S SAPUN	S SÁM	[illegible]	Σ ΣΩΜΑ	S SANA	S SUPË	[illegible]	[illegible]	س سبع	[illegible]	ㅅ 示	ス 隅
Ŝ ŝ	Ш ШАШКА	Ш ШАЛЪ	Ш ШИЈА	Ш ШКОДА	SZ SZYSZKA	Š ŠROUB	Š ŠALA	Š ŠACH	[illegible]	?	Ş ŞAHIN	SH SHPINË	[illegible]	ش شاه	ش شهد	[illegible]	[illegible]	シ 趣味
T t	Т ТИТУЛ	Т ТОРБА	Т ТЕАТАР	Т ТАТО	T TATARAK	T TAK	T TITAN	T TANIER	[illegible]	Τ ΤΡΩΓΩ	T TAMIR	T TRYEZË	[illegible]	[illegible]	ت تمر	[illegible]	[illegible]	ト 徳
U u	У УЧИТЬ	У УСТА	У УСЛУГА	У УТОНУТИ	U UCZUCIE	U UTERÁK	U UKRAS	U UCHO	[illegible]	ΟΥ ΟΥΣ	U UŞAK	U UZURPU	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ㅜ 雨	ウ 運
Ŭ ŭ	АУ КАУЧУК	АУ ПАУЗА	АУ АУСТРИЈА	АУ ПАУТИНА	U PAUZA	U AUTORITA	U PAUČINA	U AUTORITA	[illegible]	ΑΟ ΑΟΡΟΝ	AV AVSTRIA	?	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ウ (英) COW
V v	В ВЕРЕВКА	В ВЕРНО	В ВОДА	В ВИВІРКА	W WINO	V VESNICE	V VELIKI	V VOSK	[illegible]	Β ΒΑΡΟΣ	V VAR	V VAGON	[illegible]	و وزیر	[illegible]	[illegible]	ㅂ 復	ヴ (英) VERY
Z z	З ЗИГЗАГ	З ЗАРАЗА	З ЗАМАК	З ЗАЗУЛЯ	Z ZAZDROSNY	Z ZÁMEK	Z ZEBRA	Z ZUB	[illegible]	Ζ ΖΟΥΜΗ	Z ZEMAN	Z ZOTNI	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	ㅈ 視	ズ 頭痛



ANTAŬPAROLO

Per ĉi tiu metodo ĉiu povas facile ellerni la internacian lingvon "Esperanto" en sia propra hejmo. La lernanto nur legas la subskribojn sub la bildetoj kaj tiuj jam mem kondukas lin tra la tuto de la lingvo en simpla kaj natura maniero.

Jam en la komenco li lernas, ne nur vortojn kaj diversajn kombinojn de vortoj, sed ankaŭ gramatikajn regulojn; kaj li aplikas tiujn lernitajn vortojn kaj regulojn dum sia propra verkado de frazoj.


La ideojn por verki la frazojn, li ĉerpas el la "Diktografo" troviĝanta je la fino de ĉiu leciono. La diktografo konsistas el grupo da bildetoj sen subskriboj. Ĉiu bildeto sugestas pretan ideon por verki almenaŭ unu frazon.


Trafoliumante tiamaniere la metodan parton de la verko, la lernanto estas preta komenci la duan parton de gradigitaj legaĵoj, kaj la klarigojn de la nekomprenataj vortoj li serĉas en la vortaro, la tria parto de la verko. La Aŭtoro.


UNIVERSALA ESPERANTO METODO.


UNUA PARTO.


LERNIGILO.


TABLO.


GLASO.


POMO.


LIBRO.


KRAJONO.



BIRDO.



KNABO.


KNABINO.


INFANO.


ŜUO.


HORLOĜO.


SEĜO.


MI.


VI.


LI.



MANĜAS.



TRINKAS.


SKRIBAS.



Mi manĝas.


Mi trinkas.


Mi skribas.


LEGAS.


TRANĈAS.


KUDRAS.




LI SKRIBAS. LI KUDRAS.


REĜO.


TAJLORO.


SOLDATO.

ESTAS.






ĈI TIO.


Ĉi tio estas telero.



Ĉi tio estas kulero.



Ĉi tio estas forko.


Ĉi tio estas tranĉilo.


Ĉi tio estas letero.


Ĉi tio estas vesto.


Ĉi tio estas pano.



Ĉi tio estas akvo.

PRONOMOJ.

MI, VI, LI, ŜI, ĜI, ILI, NI.




















AKUZATIVO. ⟶ N.



Mi kudras veston.


Vi tranĉas pomon.


Li skribas leteron.


Ŝi legas libron.


Ĝi trinkas akvon.


Ĝi manĝas panon.

NUMERALOJ


UNU ⟶ 1


DU ⟶ 2


TRI ⟶ 3.


KVAR ⟶ 4.



KVIN ⟶ 5.


SES ⟶ 6.



SEP ⟶ 7.


OK ⟶ 8.


NAŬ ⟶ 9.


NULO ⟶ 0.


DEK ⟶ 10.



1 & 1 = 2. 1 & 2
Unu kaj unu estas du. Unu kaj du
= 3. 1 & 3 = 4.
estas tri. Unu kaj tri estas kvar.
1 & 4 = 5. 1 &
Unu kaj kvar estas kvin. Unu kaj
5 = 6. 1 & 6 =
kvin estas ses. Unu kaj ses estas
7. 1 & 7 = 8. 1
sep. Unu kaj sep estas ok. Unu
& 8 = 9. 1 & 9
kaj ok estas naŭ. Unu kaj naŭ
= 10. 3 & 6 = 9.
estas dek. Tri kaj ses estas naŭ.


KNABO KAJ KNABINO.


INFANO KAJ BIRDO.


TABLO KAJ SEĜO.


LIBRO KAJ KRAJONO.


GLASO KAJ POMO.


TRANĈILO KAJ FORKO.


MANĜAS KAJ TRINKAS.


LEGAS KAJ SKRIBAS.

LA.


LA KNABO LEGAS LIBRON.


LA KNABINO SKRIBAS LETERON.


LA TAJLORO KUDRAS VESTON.


LA SOLDATO TRANĈAS PANON.


LA INFANO TRINKAS AKVON.


LA BIRDO MANĜAS POMON.

J — PLURALOJ.



BIRDO.


BIRDOJ.



INFANO.



INFANOJ.



PLUMO.


PLUMOJ.



DOMO.


DOMOJ.



LIBRO.


LIBROJ.


ARBO.


ARBOJ.


FLORO.


FLOROJ.


SEĜO.


SEĜOJ.

1 UNU POMO. 2 DU POMOJ. 3 TRI POMOJ.

1 UNU GLASO. 2 DU GLASOJ. 3 TRI GLASOJ.

1 & 1 = 2
UNU LIBRO KAJ UNU LIBRO ESTAS DU LIBROJ.



LI SKRIBAS LETERON.



ILI SKRIBAS LETEROJN.



ŜI SKRIBAS LETERON.



ILI MANĜAS POMOJN KAJ TRINKAS AKVON.


NI TRINKAS AKVON KAJ MANĜAS POMOJN.

FARAS. JN.


LI FARAS ŜUOJN.


LI FARAS HORLOĜOJN.


LI FARAS SEĜOJN.

La uzado de la sufikso "IL".



KOMBAS.


KOMBILO.


BALAAS.


BALAILO.


RAZAS.


RAZILO.


SEGAS.


SEGILO.


TRANĈAS.


TRANĈILO.


TONDAS.


TONDILO.


GLITAS.


GLITILO.


BATAS.


BATILO.

La uzado de la sufikso "IN".


REĜO.


REĜINO.



LEONO.


LEONINO.


KNABO.


KNABINO.


KOKO.


KOKINO.


BOVO.


BOVINO.


FIANĈO.


FIANĈINO.


KELNERO.


KELNERINO.


CERVO.



CERVINO.

La uzado de la sufikso "AĴ".


OVO.


OVAĴO.



PASTO.


PASTAĴO.


BALAAS.


BALAAĴO.


PAKAS.


PAKAĴO.



FOSAS.


FOSAĴO.


ĈASAS.


ĈASAĴO.


DESEGNAS.


DESEGNAĴO.



FOTOGRAFAS.


FOTOGRAFAĴO.

La uzado de la prefikso "MAL".


JUNA VIRO.


MALJUNA VIRO.


FORTA VIRO.


MALFORTA VIRO.



DIKA VIRO.



MALDIKA VIRO.


BELA VIRINO.



MALBELA VIRINO.


KOVRITA POTO.



MALKOVRITA POTO.



FERMITA PORDO.


MALFERMITA PORDO.


ŜLOSITA PORDO.


MALŜLOSITA PORDO.


PLENA KESTO.


MALPLENA KESTO.

KIO→? KION→?













KION→?



KION FARAS LA KNABO?

LA KNABO LEGAS LIBRON.



KION FARAS LA KNABINO?

LA KNABINO SKRIBAS LETERON.



KION FARAS LA TAJLORO?

LA TAJLORO KUDRAS VESTON.




KION FARAS LA INFANO?

LA INFANO TRINKAS AKVON.



KION FARAS LA SOLDATO?

LA SOLDATO TRANĈAS PANON.




KION FARAS LA BIRDO?

LA BIRDO MANĜAS POMON.

STARAS. KUSAS.









SIDAS IRAS KURAS



LA KNABO KUŜAS.



LA KNABO SIDAS.



LA KNABO STARAS.



LA KNABO IRAS.




LA KNABO KURAS.




SUR - SUB - EN - APUD.




LA KRAJONO KUŜAS SUR LA GLASO.



LA KRAJONO KUŜAS SUB LA GLASO.



LA KRAJONO KUŜAS EN LA GLASO.



LA KRAJONO KUŜAS APUD LA GLASO.




La glaso estas SUR la tablo.
SUR la tablo staras glaso.



La glaso estas SUB la tablo.
SUB la tablo staras glaso.



La krajono estas EN la libro.
EN la libro kuŝas krajono.




La pomo estas APUD la libro.
APUD la libro kuŝas pomo.




La glaso estas SUR la tablo,
kaj la libro estas SUB la tablo.


Unu pomo kuŝas EN la glaso, kaj unu pomo kuŝas APUD la glaso.


SUR la tablo kuŝas libro, glaso, pomo kaj krajono.


Tri glasoj staras SUR la tablo, kaj du glasoj staras SUB la tablo.


SUR la tablo estas libro, kaj SUR la libro estas krajono.


SUR la tablo kuŝas libro, kaj SUR la libro staras glaso.


SUB la tablo estas krajono kaj libro. Krajono kaj libro kuŝas SUB la tablo.


SUR la tablo estas glaso, pomo kaj libro. Pomo kaj libro kuŝas SUR la tablo.


La glaso kaj la pomo estas SUB la tablo. La libro kaj la krajono kuŝas SUR la tablo.


SUR la tablo kuŝas libro; SUR la libro staras glaso, kaj EN la glaso estas pomo kaj krajono.


La krajono estas SUR la tablo kaj SUB la libro. SUR la tablo kaj SUB la libro kuŝas krajono


Unu pomo estas SUR la glaso; unu pomo estas EN kaj SUB la glaso, kaj unu pomo kuŝas APUD la glaso.


LA KNABO SIDAS SUR LA SEĜO KAJ SKRIBAS LETERON.

LA KNABO SIDAS APUD LA TABLO KAJ SKRIBAS LETERON.

LA KNABO NE TRINKAS KAJ NE MANĜAS. LI SIDAS KAJ SKRIBAS.


LA KNABINO STARAS APUD LA TABLO KAJ LEGAS LIBRON

LA LIBRO KUŜAS SUR LA TABLO KAJ LA KNABINO LEGAS ĜIN.

LA KNABINO NE SKRIBAS LETERON. ŜI LEGAS LIBRON.


MI NE SIDAS KAJ MI NE STARAS. MI KUŜAS EN LA LITO.


MI KUŜAS EN LA LITO KAJ LA BIRDO STARAS SUB LA LITO.

APUD LA LITO STARAS TABLO KAJ SUR LA TABLO KUŜAS LIBRO.


LA KNABO TRINKAS AKVON, KAJ LA KNABINO MANĜAS PANON.


LA AKVO ESTAS EN LA GLASO, KAJ LA GLASO ESTAS EN LA MANO.

LA PANO ESTAS EN LA MANO, KAJ LA KNABINO ĜIN MANĜAS.


LA TAJLORO SIDAS SUR LA TABLO KAJ KUDRAS VESTON.


SUB LA TABLO SIDAS INFANO KAJ TRINKAS AKVON.

APUD LA INFANO STARAS BIRDO KAJ MANĜAS PANON.

Bona. Malbona.






































ĈI TIU. ĈI TIUJ.










































KIE. ?



KIE ESTAS LA TRI LIBROJ?
ILI KUŜAS SUR LA TABLO.


KIE ESTAS LA TRI POMOJ?
ILI KUŜAS EN LA GLASO.

KIE ESTAS LA KRAJONO?
ĜI KUŜAS EN LA LIBRO.

KIE STARAS LA DU GLASOJ?
ILI STARAS SUB LA TABLO.

KIE KUŜAS LA POMOJ, SUR LA TABLO AŬ SUB LA TABLO?
KVAR POMOJ KUŜASSUR LA TABLO, KAJ KVAR POMOJ KUŜAS SUB LA TABLO.

Pura. - Malpura.





EL - PRENAS - DE.




—HAVAS.—



VOLAS.



ODORO.




AMAS - KISAS.




ĈAR.



DIRAS.




MOLA·MALMOLA.



MONTRAS.





MI IRAS AL
LA PORDO.




MI MALFERMAS
LA PORDON.




MI ENIRAS
LA ĈAMBRON.



MI FERMAS
LA PORDON.



MI IRAS
AL LA TABLO.




SUR LA TABLO
KUŜAS PANO
KAJ TRANĈILO.




MI TRANĈAS
LA PANON.



MI MANĜAS
LA PANON.
LA PANO
ESTAS BONA.



MI VIDAS KRUĈON
KAJ GLASON
SUR LA FENESTRO.



MI IRAS
AL LA FENESTRO.



MI PRENAS
LA KRUĈON.



MI PRENAS
LA GLASON.



MI VERŜAS
LA AKVON
EL LA KRUĈO
EN LA GLASON.



MI METAS
LA KRUĈON
SUR LA FENESTRON.



MI TRINKAS
LA BONAN
KAJ PURAN
AKVON.



MI METAS
LA GLASON
SUR LA FENESTRON.



MI IRAS
AL LA PORDO.



MI MALFERMAS
LA PORDON.



MI ELIRAS.



MI FERMAS
LA PORDON.

La Uzado De La Sufikso "EG".

GLASO.	GLASEGO.	UNGO.	UNGEGO.
TAMBURO.	TAMBUREGO.	NAJLO.	NAJLEGO.
KULERO.	KULEREGO.	PORDO.	PORDEGO.
FORNO.	FORNEGO.	PAFILO.	PAFILEGO.

La Uzado De La Sufikso "ET".

BARELO.	BARELETO.	BARBO.	BARBETO.
DOMO.	DOMETO.	RIDO.	RIDETO.
MANO.	MANETO.	VOJO.	VOJETO.
BENKO.	BENKETO.	LORNO.	LORNETO.

LA UZADO DE LA PREFIKSO "EK".

BRULAS.	EKBRULAS.	FALAS.	EKFALAS.
PLUVAS.	EKPLUVAS.	RIGARDAS.	EKRIGARDAS.
KURAS.	EKKURAS.	SALTAS.	EKSALTAS.
FAJFAS.	EKFAJFAS.	FLUGAS.	EKFLUGAS.

PAROLAS.

LA VIRO PAROLAS AL SURDA VIRO.	LA VIRO PAROLAS AL LA VIRO EN LA DOMO.	LA PASTRO PAROLAS.

POVAS.

LI NE POVAS VIDI, ĈAR LI ESTAS BLINDA.	LI NE POVAS AÛDI, ĈAR LI ESTAS SURDA.	LI NE POVAS PAROLI, ĈAR LI ESTAS MUTA.
LI NE POVAS LABORI, ĈAR LI NE HAVAS MANOJN.	MI POVAS IRI PER MIAJ BRAKOJ.	MI POVAS STARI SUR MIA KAPO.

RUSA FABELO DE LA RAPETO.


PLANTAS AVETO RAPETON.


LA RAPETO KRESKAS GRANDA.


LA RAPETO KRESKAS GRANDEGA.


JEN TIRAS LA AVETO LA RAPETON:

TIRAS LI, EKTIRAS, ELTIRI NE POVAS.



VOKAS LA AVETO
LA AVINETON;
TIRAS LA AVINETO
LA AVETON,
LA AVETO—
LA RAPETON;

TIRAS ILI, EKTIRAS, ELTIRI NE POVAS.



VOKAS ILI
LA NEPINETON.
TIRAS LA NEPINETO
LA AVINETON,
LA AVINETO—
LA AVETON,
LA AVETO—
LA RAPETON;

TIRAS ILI, EKTIRAS, ELTIRI NE POVAS.




VOKAS ILI
LA HUNDETON.
JEN LA HUNDETO
TIRAS LA NEPINETON,
LA NEPINETO—
LA AVINETON,
LA AVINETO—
LA AVETON,
LA AVETO—
LA RAPETON;

TIRAS ILI, EKTIRAS, ELTIRI NE POVAS.




VOKAS ILI
LA KATETON.
JEN LA KATETO
TIRAS LA HUNDETON,
LA HUNDETO—
LA NEPINETON,
LA NEPINETO—
LA AVINETON,
LA AVINETO—
LA AVETON,
LA AVETO—
LA RAPETON;

TIRAS ILI, EKTIRAS, ELTIRI NE POVAS.







VOKAS ILI LA MUSETON. JEN LA MUSETO TIRAS LA KATETON, LA KATETO—LA HUNDETON, LA HUNDETO— LA NEPINETON, LA NEPINETO— LA AVINETON, LA AVINETO— LA AVETON, LA AVETO— LA RAPETON; TIRAS ILI, EKTIRAS, KAJ—JEN! ILI ELTIRAS LA RAPETON. ESPERANTIGIS I. SERIŜEV.

LA SUFIKSOJ "IG,-IĜ".



PLENA.


PLENIGAS.


PLENIĜAS.


MALPLENA.



MALPLENIGAS.


MALPLENIĜAS.


KUŜAS.


KUŜIGAS.


KUŜIĜAS.


PENDAS.


PENDIGAS.


PENDIĜAS.


SIDAS.


SIDIGAS.


SIDIĜAS.


MALSEKA.


MALSEKIGAS.


MALSEKIĜAS.


STARAS.


STARIGAS.


STARIĜAS.


FLUIDO.


FLUIDIGAS.


FLUIDIĜAS.

KARLO DORMAS.

LA VEKHORLOĜO EKSONORAS.

KARLO VEKIĜAS KAJ OSCEDAS.

LI RIGARDAS LA VEKHORLOĜON.

LI ELLITIĜAS.

LI SURMETAS LA ŜTRUMPOJN.

LI SURMETAS LA ŜUOJN.

LI SURMETAS LA PANTALONON.

LI SURMETAS LA BLUZON.

LI IRAS AL LA LAVUJO.

LI PRENAS LA SAPON.

LI LAVAS SIAJN MANOJN.

LI LAVAS SIAN VIZAĜON.

LI DEPRENAS LA VIŜTUKON.

LI VIŜAS SIAN VIZAĜON PER LA VIŜTUKO.

LI PRENAS LA KOMBILON.


LI KOMBAS SIAN HARON.


LI PRENAS LA ĈAPON DE LA HOKO.

LI METAS LA ĈAPON SUR LA KAPON.

LI MALFERMAS LA PORDON KAJ ELIRAS.

EL SUR - METAS.


LA HUNDO IRAS SUB LA TABLON.


LA HUNDO IRAS EL SUB LA TABLO.


MI METAS LA POMON SUR LA TABLON


MI PRENAS LA POMON DE SUR LA TABLO.

ĈIU. ĈIUJ. EL.




ĈIUJ TRI KNABOJ HAVAS TRI POMOJN. ĈIU KNABO HAVAS UNU POMON.





ĈIUJ TRI KNABINOJ HAVAS SES POMOJN. ĈIU KNABINO HAVAS DU POMOJN.










ĈIU EL LA KNABOJ HAVAS LIBRON, KAJ ĈIU EL LA KNABINOJ HAVAS FLORON.


ĈIU EL LA SES POMOJ ESTAS BONA.


ĈIUJ SES POMOJ ESTAS BONAJ


DU EL LA SES POMOJ ESTAS MALBONAJ.


FREŜA. — VARMA.




LA LAKTO ESTAS FREŜA KAJ VARMA.



LA OVO ESTAS FREŜA KAJ VARMA.



LA PANO ESTAS FREŜA KAJ VARMA.




LA PANO ESTAS MALFREŜA.


FREŜA OVO.


MALFREŜA OVO.



FREŜA LAKTO.



MALFREŜA LAKTO.


VIANDO.



MALFREŜA VIANDO.


VARMA AKVO.




MALVARMA AKVO.

SOIFA—SATA—MALSATA.



LA VIRO ESTAS SOIFA. (LI VOLAS TRINKI.)



LA VIRO ESTAS MALSATA (LI VOLAS MANĜI.)


SOIFA.


MALSATA.



MALSATA.


SATA.

FINO DE LA DUA LECIONO. DIKTOGRAFO.

VERKU ALMENAŬ UNU FRAZON EL ĈIU BILDO LAŬ VIA KOMPRENO.

TRIA LECIONO.

KARLO IRAS EN LA STRATO.

LI HALTAS ANTAŬ LA FENESTRO DE BAKEJO.

LI LEGAS LA VORTON "BAKEJO" SUR LA FENESTRO.

LI MALFERMAS LA PORDON,

KAJ ENIRAS EN LA BAKEJON.

LA BAKISTINO DEMANDAS, "KION VI VOLAS, BONA KNABO?" "MI VOLAS AĈETI PANON," KARLO RESPONDAS.

LA BAKISTINO DEPRENAS PANON DE SUR LA BRETO.

ŜI ENVOLVAS LA PANON EN PAPERON,

KAJ DONAS ĜIN AL KARLO.

KARLO PRENAS LA PANON EL LA MANO DE LA BAKISTINO,

KAJ METAS ĜIN SUB LA BRAKON.

LI METAS LA ALIAN MANON EN LA POŜON,

KAJ ELTIRAS MONERON.

LI DONAS LA MONERON AL LA BAKISTINO.

LA BAKISTINO PRENAS LA MONERON EL LA MANO DE KARLO,

KAJ METAS ĜIN EN LA SKATOLON, KIU STARAS SUR LA ŜRANKO.

KARLO KUN LA PANO SUB LA BRAKO IRAS AL LA PORDO.

LI MALFERMAS LA PORDON.

LI ELIRAS KAJ FERMAS LA PORDON.

NUN LI MARŜAS EN LA STRATO KUN LA PANO SUB LA BRAKO.

SUKERPRENILO
CITRONO
TEUJO
TEO.
TASO
SUBTASO.
SUKERO
SUKERUJO.

CITRONO.
BISKVITOJ.

PIPRO
SALO
SALUJO. PIPRUJO.

SALO
PIPRO.
OVAĴO
TELERO.

LA FAMILIO.

INFANO. INFANO. KNABO. KNABINO.

FRAŬLO. FRAŬLINO. FIANĈO. FIANĈINO.

EDZO. EDZINO. PATRO. PATRINO.

Edzo	Edzino
Avo	Avino
Nepo	Nepino
Patro	Patrin
Filo	Filino
Frato	Fratin
Kuzo	Kuzino
Onklo	Onklin
Nevo	Nevino

EDZO. ⟷ EDZINO.
AVO. AVINO.
PATRO. PATRINO.
FILO. FILINO.
FRATO. FRATINO.
ONKLO. ONKLINO.
NEPO. NEPINO.
FILO. PATRO. FILINO. PATRINO.
NEVO. NEVINO.
KUZO. ⟷ KUZINO.

DONAS - AL - RICEVAS - DE.

PETRO RICEVAS LETERON.
LI METAS LA LETERON SUR LA TABLON.
MARIO PRENAS LA LETERON DE SUR LA TABLO,
KAJ DONAS ĜIN AL LA PATRINO.

POŜO

PETRO RICEVAS POMON DE LA PATRO.
LI METAS LA POMON EN LA POŜON.
MARIO PRENAS LA POMON EL LA POŜO DE PETRO,
KAJ DONAS ĜIN AL LA PATRINO.

LA HOMO KAJ LA BESTA REGNO.

VIRO. VIRINO. KNABO. INFANO.
ĈIUJ ĈI TIUJ ESTAS HOMOJ.

HUNDO. KATO. LEONO. ĈEVALO.
ĈIUJ ĈI TIUJ ESTAS BESTOJ.

PASERO. KOKINO. STRIGO. ANSERO.
ĈIUJ ĈI TIUJ ESTAS BIRDOJ.

PLEŬRONEKTO. KARPO. ANGILO. POLPO AŬ DIABLFIŜO.
ĈIUJ ĈI TIUJ ESTAS FIŜOJ.

SERPENTO. TESTUDO. LACERTO. ALIGATORO.
ĈIUJ ĈI TIUJ ESTAS REPTILIOJ.

ARANEO. PAPILIO. MUŜO. LOKUSTO.
ĈIUJ ĈI TIUJ ESTAS INSEKTOJ.

KARLO ENIRAS LA ĈAMBRON.

LI DEPRENAS LA ĈAPELON.

LI PENDIGAS LA ĈAPELON SUR LA NAJLON APUD LA PORDO.

LI VIDAS PAPERON KAJ KRAJONON SUR LA TABLO.

LI IRAS AL LA TABLO.

LI SIDIĜAS SUR LA SEĜON.

LI PRENAS LA KRAJONON DE SUR LA TABLO.

LI SKRIBAS LETERON.

LI METAS LA KRAJONON SUR LA TABLON.

LI ELTIRAS LA TIRKESTON.

LI PRENAS KOVERTON EL LA TIRKESTO.

LI METAS LA LETERON EN LA KOVERTON.

LI PRENAS LA KRAJONON.

LI SKRIBAS LA ADRESON SUR LA KOVERTON.

LI EKSTARAS.

LI IRAS AL LA PORDO.

LI DEPRENAS LA ĈAPELON DE LA NAJLO.

LI METAS LA ĈAPELON SUR LA KAPON.

LI MALFERMAS LA PORDON.

LI ELIRAS.

LI FERMAS LA PORDON.

LI VIDAS LETERKESTON.

LI IRAS AL LA LETERKESTO.

LI METAS LA LETERON EN LA LETERKESTON.

NUN.—SED.—NEK.



① LA KNABO MANĜAS, ĈAR LI ESTAS MALSATA. ② LA KNABO NUN NE MANĜAS, SED TRINKAS AKVON, ĈAR LI NUN NE ESTAS MALSATA, SED SOIFA. ③ NUN LA KNABO NEK MANĜAS NEK TRINKAS, ĈAR NUN LI ESTAS NEK MALSATA NEK SOIFA, SED LI DORMAS APUD LA TABLO. ④ NUN LA KNABO NEK MANĜAS NEK TRINKAS AŬ DORMAS, SED LUDAS KUN LA HUNDO.

KARTO.—PILKO.—PER.



① LA PATRO LUDAS KARTOJN KUN LA PATRINO, KAJ LA KNABO LUDAS KUN LA HUNDO SUB LA TABLO, SED LA KNABINO DORMAS. ② LA KNABO NUN NE SIDAS SUB LA TABLO KUN LA HUNDO KAJ LA KNABINO NUN NE DORMAS, SED ILI ĈIUJ LUDAS PER LA PILKO. ③ LA PATRO MANĜAS, LA PATRINO MANĜAS, LA FILO MANĜAS KAJ LA FILINO MANĜAS. ILI ĈIUJ SIDAS APUD LA TABLO KAJ MANĜAS.

TIO. | ĈI TIO.





TIE. | ĈI TIE.





TIU. | ĈI TIU.





KIU-KIUJ.





LA KNABO, KIU SKRIBAS, ESTAS LA FILO DE LA VIRO, KIU LEGAS.

LA KNABO, KIU TRINKAS, ESTAS LA FRATO DE LA KNABO, KIU SKRIBAS.

LA VIRO, KIU LEGAS, ESTAS LA PATRO DE LA DU KNABOJ.

LA TRI POMOJ, KIUJ KUŜAS SUR LA TABLO, ESTAS BONAJ.

LA KVAR POMOJ, KIUJ KUŜAS SUB LA TABLO, ESTAS MALBONAJ.

LA POMO, KIU KUŜAS SUR LA SEĜO, ESTAS BONA, SED TIU, KIU KUŜAS SUR LA FENESTRO, NE ESTAS BONA.

KE.



KARLO DIRAS, KE LI ESTAS BONA KNABO. | LA PATRINO MONTRAS, KE LA INFANO DORMAS. | PETRO DIRAS AL MARIO, KE LI ŜIN AMAS.

JE.



PRENAS JE LA KOLO. | STARAS JE LA PORDO. | LEGAS JE LA LUMO DE LAMPO.

TAGO. NOKTO.



LUMO.—MALLUMO.—OMBRO.



BENSON SCHOOL OF ESPERANTO, NEWARK, NEW JERSEY, U. S. A.

SOFIO SIDAS APUD LA TABLO KAJ LEGAS LIBRON.

ŜI FERMAS LA LIBRON.

ŜI EKRIGARDAS LA HORLOĜON.

ŜI OSCEDAS.

ŜI EKRIGARDAS LA LITON.

ŜI EKSTARAS.

ŜI IRAS AL LA LITO.

ŜI DEPRENAS LA BLUZON.

ŜI METAS ĜIN SUR LA SEĜON.

SI DEPRENAS LA JUPON.

ŜI METAS ĜIN SUR LA SEĜON.

ŜI SIDIĜAS SUR LA LITON.

ŜI DEPRENAS LA ŜUOJN.

ŜI DEPRENAS LA ŜTRUMPOJN.

ŜI MALKOVRAS LA LITKOVRILON.

ŜI KUŜIĜAS EN LA LITON.

ŜI KOVRAS SIN PER LA LITKOVRILO.

ŜI ETENDAS LA MANON AL LA ELEKTRA BUTONO.

ŜI PUŜAS LA BUTONON PER SIA FINGRO.

MALLUMO, SILENTO, SOFIO DORMAS.

BENSON SCHOOL OF ESPERANTO, NEWARK, NEW JERSEY, U. S. A.

MARIO KUŜAS EN LA LITO, ĈAR ŜI ESTAS MALSANA.

LA PATRINO METAS MALSEKAN TUKON SUR LA FRUNTON DE MARIO.

LA PORDO MALFERMIĜAS KAJ DOKTORO BRUNO ENIRAS.

LI IRAS AL LA LITO.

LI PRENAS LA MANON DE MARIO,

KAJ ELTIRAS LA POŜHORLOĜETON EL SIA POŜO.

LI NUN EKZAMENAS LA PULSON DE MARIO KAJ RIGARDAS SIAN POŜHORLOĜETON.

LI REMETAS LA HORLOĜETON EN SIAN POŜON KAJ LA MANON DE MARIO SUR LA KUSENON.

LI NUN ELTIRAS TERMOMETRON EL SIA POŜO.

LI METAS ĜIN EN LA BUŜON DE MARIO.

LA DOKTORO PAROLAS AL LA PATRINO KAJ PETAS GLASON DA AKVO.

LA PATRINO IRAS AL LA PORDO.

LA DOKTORO RIGARDAS LA TERMOMETRON.

LA PATRINO REVENAS KUN GLASO DA AKVO.

LA DOKTORO METAS PULVORON EN LA GLASON DA AKVO.

LI METAS LA GLASON ANTAŬ LA BUŜON DE MARIO.


MARIO TRINKAS LA MEDIKAMENTON.

LA DOKTORO DONAS LA MALPLENAN GLASON AL LA PATRINO.

LI IRAS AL LA PORDO.

LI METAS SIAN ĈAPELON SUR LA KAPON KAJ FORIRAS.


NUKSO.—OVO.—ŜELO.—KERNO.




ANKAŬ.



DEMANDO.- SE.- RESPONDO.





DEVI.

SE NI VOLAS VIVI




KOMENCO. MEZO. FINO.
























LA HUNDO KAJ ĜIA REFLEKTO.

HUNDO PORTAS OSTON EN SIA BUŜO.

LA HUNDO EKVIDAS SIAN REFLEKTON EN LA KLARA AKVO DE LA RIVERETO.

LA HUNDO VOLAS ANKAŬ LA OSTON DE LA ALIA HUNDO.

JEN LA HUNDO MALFERMAS LA BUŜON POR EKKAPTI LA ALIAN OSTON.

HO, KIA SURPRIZO! ĜIA PROPRA OSTO ENFALAS EN LA RIVERETON.

LA HUNDO NUN MEDITAS, KE "UNU OSTO EN LA BUŜO ESTAS PLI BONA OL DU OSTOJ EN LA RIVERETO".

LA SUBSTANTIVO.

LA LITERO "O"

ĈE LA FINO DE VORTO

MONTRAS,

KE LA VORTO ESTAS

"SUBSTANTIVO."

EKZEMPLOJ:

TABLO, LUMO, ODORO.

ARBO.	BENKO.	KANDELO.
FAJRO.	CIGAREDO	MONO.
SUNO.	LUNO.	ĜARDENO.
PLUVO.	ĈAMBRO.	NEĜO.

LA ADJEKTIVO.

LA LITERO "A"

ĈE LA FINO DE VORTO

MONTRAS,

KE LA VORTO ESTAS

"ADJEKTIVO."

EKZEMPLOJ:


BONA, SOIFA, BLINDA.


BLINDA HOMO.


SURDA HOMO.


EBRIA HOMO.


RIGIDA HOMO.


LAMA HOMO.


KRUELA HOMO.


LERTA HOMO.


ĜIBA HOMO.


KOMIKA HOMO.


SOVAĜA HOMO.


AVARA HOMO.


FURIOZA HOMO.


NUDA HOMO.



LASTA HOMO.


FORTA HOMO.



LA ADVERBO.

LA LITERO "E"

ĈE LA FINO DE VORTO




MONTRAS,

KE LA VORTO ESTAS

"ADVERBO."

EKZEMPLOJ:

TAGE, RAPIDE, AME.

	LA LEPORO KURAS RAPIDE.	LA KELONIO RAMPAS MALRAPIDE.	
	LA VIRO IRAS LAME.	LA KNABO RIDAS KOMIKE	
	LA VIRO LUDAS LERTE.	LA PARO DANCAS BELE.	
	LA KNABO GRIMPAS KATE.	LA KNABO SALTAS HUNDE.	
	LA VIRO NAĜAS FIŜE.	LA VIRO KUŜAS RIGIDE.	
	LA SUNO LUMAS TAGE.	LA LUNO LUMAS NOKTE.	



LA VERBO.

LA SILABO "AS"

ĈE LA FINO DE VORTO


MONTRAS,

KE LA VORTO ESTAS

"VERBO."

EKZEMPLOJ:

ESTAS, SKRIBAS, TRINKAS.


LI PUŜAS.


LI TIRAS.



LI LEVAS.



KONJUGACIO DE VERBOJ.

MANĜI.



TRINKI.





SKRIBI.



RAZI.







I	OS	AS	IS	U	US
PAFI	MI PAFOS LA BIRDON	MI PAFAS LA BIRDON	MI PAFIS LA BIRDON	PAFU LA BIRDON!	SE MI PAFUS LA BIRDON MI ĈIN MANĜUS
AMI	AMOS	AMAS	AMIS	AMU	AMUS
DIRI	DIROS	DIRAS	DIRIS	DIRU	DIRUS
DONI	DONOS	DONAS	DONIS	DONU	DONUS
ESTI	ESTOS	ESTAS	ESTIS	ESTU	ESTUS
FALI	FALOS	FALAS	FALIS	FALU	FALUS
HAVI	HAVOS	HAVAS	NAVIS	NAVU	NAVUS
KURI	KUROS	KURAS	KURIS	KURU	KURUS
LUDI	LUDOS	LUDAS	LUDIS	LUDU	LUDUS
METI	METOS	METAS	METIS	METU	METUS
RIDI	RIDOS	RIDAS	RIDIS	RIDU	RIDUS
SIDI	SIDOS	SIDAS	SIDIS	SIDU	SIDUS
TENI	TENOS	TENAS	TENIS	TENU	TENUS
VOLI	VOLOS	VOLAS	VOLIS	VOLU	VOLUS

PREPOZICIOJ

AL



IRAS AL LA PATRINO.

ANSTATAŬ



ANSTATAŬ SUKERO, LI METAS SALON EN LA TEON.

ANTAŬ



LA HUNDO IRAS ANTAŬ LA KNABO.

APUD




LA HUNDO KUŜAS APUD LA SEĜO.

ĈE



ŜI SIDAS ĈE LA FONTO.

ĈIRKAŬ



ILI FLUGAS ĈIRKAŬ LA TURO.

DA



FUNTO DA SUKERO.

DE



IRAS DE LA PATRINO.

DUM



FORĜU FERON DUM ĜI ESTAS VARMEGA.

EKSTER



ĴETAS LA HUNDON EKSTER LA DOMON.

EL



LA INFANO FALAS EL LA LULILO.

EN



METAS SUKERON EN LA TEON.

ĜIS



LI ĴETAS LA HUFOFERON ĜIS LA ARBO.

INTER



LI TROVIĜAS INTER FAJRO KAJ AKVO.

JE



LI PRENAS LA KNABON JE LA NUKO.

KONTRAŬ



LI IRAS KONTRAŬ LA VENTON.

KROM



ĈIU FORKURAS KROM LA KNABO.

KUN




LA KNABO IRAS KUN LA HUNDO.

LAŬ



ILI KONSTRUAS LA DOMON LAŬ LA PLANO.

MALGRAŬ



MALGRAŬ LA PLUVO MI DEVAS FORIRI.

PER



BATAS LA TAPIŜON PER BATILO.

PO



ILI MARŜAS PO DU.

POR



LA PATRINO AĈETIS PUPON POR LA INFANO.

POST



LA HUNDO IRAS POST LA KNABO.

PRETER



LA PILKO PASAS PRETER LA KAPON.

PRI



ILI PAROLAS PRI LA INFANO.

PRO



ŜI PLORAS PRO LA PUPO.

SEN



EN LA DEZERTO SEN AKVO.

SUB




LA HUNDO KUŜAS SUB LA SEĜO.


SUPER




LA BALONO FLUGAS SUPER LA DOMO.



TRE.




PREFIKSA UZADO DE PREPOZICIOJ.




LOKA UZADO DE PREPOZICIOJ.









LA KVIN SENTOJ.



PERE DE LA SUFIKSO "IG" NI FARAS.

VERBOJN EL SUBSTANTIVOJ.	ODORO.	ODORIGI.
LUMO.	LUMIGI.	SANGO.
SANGIGI.	PINTO.	PINTIGI.
VERBOJN EL ADJEKTIVOJ.	KOLERA.	KOLERIGI.
BLINDA.	BLINDIGI.	NUDA.
NUDIGI.	PURA.	PURIGI.
VERBOJN EL VERBOJ.	BRULI.	BRULIGI
TIMI.	TIMIGI.	DRONI.
DRONIGI.	MORTI.	MORTIGI.

SANA. MALSANA.

SANA INFANO.	MALSANA INFANO.	MALSANA KNABO.

LA DOMO DE ĴAK'.

JEN ESTAS ĴAK'.

JEN ESTAS LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA GRENO, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA RATO, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA KATO, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA HUNDO, KIU MORDIS LA KATON, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA BOVINO, KIU SUPRENĴETIS LA HUNDON, KIU MORDIS LA KATON, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA KNABINO, KIU MELKIS LA BOVINON, KIU SUPRENĴETIS LA HUNDON, KIU MORDIS LA KATON, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA VIRO, KIU KISIS LA KNABINON, KIU MELKIS LA BOVINON, KIU SUPRENĴETIS LA HUNDON, KIU MORDIS LA KATON, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA PASTRO, KIU EDZIGIS LA VIRON, KIU KISIS LA KNABINON, KIU MELKIS LA BOVINON, KIU SUPRENĴETIS LA HUNDON, KIU MORDIS LA KATON, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA KOKO, KIU VEKIS LA PASTRON, KIU EDZIGIS LA VIRON, KIU KISIS LA KNABINON, KIU MELKIS LA BOVINON, KIU SUPRENĴETIS LA HUNDON, KIU MORDIS LA KATON, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

JEN ESTAS LA FARMISTO, KIU POSEDIS LA KOKON, KIU VEKIS LA PASTRON, KIU EDZIGIS LA VIRON, KIU KISIS LA KNABINON, KIU MELKIS LA BOVINON, KIU SUPRENĴETIS LA HUNDON, KIU MORDIS LA KATON, KIU MORTIGIS LA RATON, KIU MANĜIS LA GRENON, KIU KUŜIS EN LA DOMO, KIUN ĴAK' KONSTRUIS.

La uzado de la sufikso "EJ".

CIGARO.	CIGAREJO.	KOLOMBO.	KOLOMBEJO.
ĈEVALO.	ĈEVALEJO.	SOLDATO.	SOLDATEJO.
LIBRO.	LIBREJO.	TOMBO.	TOMBEJO.
HUNDO.	HUNDEJO.	DORMI.	DORMEJO.
KUIRI.	KUIREJO.	MANĜI.	MANĜEJO.
PREĜI.	PREĜEJO.	MALLIBERA.	MALLIBEREJO
KAFEJO.	BILARDEJO.	LERNEJO.	LUDEJO.
PAFEJO.	FORMIKEJO.	BARBIREJO.	FRENEZULEJO

SI, SIA, SIAN, SIAJ, SIAJN.


Li tenas lian ĉapelon en sia mano.


Li tenas sian ĉapelon en sia mano.


Ili tenas siajn ĉapelojn en siaj manoj.


Ŝi tenas lian manon en sia mano.


Vi tenas vian ĉapelon en via mano.


Mi tenas mian ĉapelon en mia mano.


Ili tenas siajn kaj iliajn ĉapelojn en siaj manoj.


Vi tenas viajn ĉapelojn en viaj manoj.


Ni tenas niajn ĉapelojn en niaj manoj.


Li tenas ŝian manon en sia mano.



Ili tenas ŝiajn manojn en siaj manoj.


Ĉiu tenas sian ĉapelon en sia mano.



1, Ŝi legas al si.


2, Ŝi legas al ŝi.

Dentoj, Stomako, Pulmoj.








La uzado de la sufikso "AD".


KRONO.


KRONADO


FUMO


FUMADO.


PAFAS.


PAFADAS.



SALTAS.


SALTADAS.


FALAS.


FALADAS.



GUTO.


GUTADO.


MARTELO.


MARTELADO.


MOVAS.


MOVIĜADAS.

La uzado de la sufikso "UJ".


POMO.



POMUJO.



PIRO.


PIRUJO.


CIGARO.


CIGARUJO.


VIOLONO.


VIOLONUJO.


ĈAPELO.


ĈAPELUJO.


ALUMETO.


ALUMETUJO.



TURKO.


TURKUJO.



JAPANO.


JAPANUJO.


LA SOIFA BIRDO.




SOIFA BIRDO VIDAS AKVON EN VITRA KRUĈO. ĜI FRAPAS PER SIA BEKO LA VITRAN KRUĈON POR ĜIN ROMPI AŬ FALIGI, SED LA KRUĈO NE FALAS NEK ROMPIĜAS. LA BIRDO NUN STARIĜAS SUR LA RANDO DE LA KRUĈO, SED ĜIA BEKO NE ATINGAS LA AKVON. KION FARI?




JEN LA BIRDO EKVIDAS ŜTONAJN GLOBETOJN SUR LA BRETO. ĜI FLUGAS AL LA BRETO. ĜI STARIĜAS SUR LA RANDO DE LA BRETO KAJ PRENAS GLOBETON PER LA BEKO.



ĜI FALIGAS LA GLOBETON EN LA KRUĈON, KAJ LA AKVO EN LA KRUĈO ALTIĜAS IOMETE. ĜI PRENAS ALIAN GLOBETON DE SUR LA BRETO PER SIA BEKO. ĜI FALIGAS ĜIN EN LA KRUĈON, KAJ LA AKVO EN LA KRUĈO ALTIĜAS PLIE.



KAJ TIEL LA SOIFA BIRDO FALIGAS GLOBETON POST GLOBETO KAJ LA AKVO EN LA KRUĈO ALTIĜAS KAJ ALTIĜAS ĜIS FINE ĜI ATINGAS LA RANDON DE LA KRUĈO.



KAJ NUN LA BIRDO TRINKAS LA AKVON KAJ SATIGAS SIAN SOIFON.

FINO.

MIN·VIN·ĜIN·ILIN·ŜIN·LIN·NIN.















SIN.






KELKE · MULTE.








LI PRENAS UNU MONERON. | LI PRENAS KELKE DA MONEROJ. | LI PRENAS MULTE DA MONEROJ.

FOJO · KUKOLO.



JEN ESTAS KUKOLHORLOĜO.
Je la unua horo la kukolo en la horloĝo diras "kuku" unu FOJON.
"KUKU".
Je la dua horo la kukolo diras "kuku" du FOJOJN
"KUKU, KUKU".
Je la tria horo la kukolo diras "kuku" tri FOJOJN.
"KUKU, KUKU, KUKU".
DEMANDO- Kiom da FOJOJ la kukolo diras kuku je la sesa horo?
RESPONDO- Ses FOJOJN.

GRADOJ DE KOMPARO.



JEN ESTAS KVAR FLOROJ.
La unua floro estas bela.
La dua floro estas PLI bela OL la unua.
La tria floro estas PLI bela OL la dua.
La kvara floro estas la PLEJ bela EL ĉiuj.



JEN ESTAS TRI POMOJ.
La unua pomo estas malbona.
La dua pomo estas PLI malbona OL la unua.
La tria estas la PLEJ malbona EL ĉiuj.

ĈI TIU POMO ESTAS TIEL GRANDA KIEL ĈI TIU.

ĈI TIU POMO ESTAS PLI GRANDA.

SED ĈI TIU POMO ESTAS LA PLEJ GRANDA EL ĈIUJ.

ĈI TIU POMO ESTAS TIEL MALGRANDA KIEL ĈI TIU.

ĈI TIU POMO ESTAS PLI MALGRANDA.


SED ĈI TIU POMO ESTAS LA PLEJ MALGRANDA EL ĈIUJ.

ĈI TIU KRAJONO ESTAS TIEL LONGA KIEL ĈI TIU.

ĈI TIU KRAJONO ESTAS PLI LONGA.

SED ĈI TIU KRAJONO ESTAS LA PLEJ LONGA.

FOJO · RONDO · PLI · PLEJ.



Johano, Petro kaj Karlo komencis RONDKURI la RONDON je la tria horo. Nun jam estas la kvara horo. En unu horo Johano RONDKURIS la RONDON dek FOJOJN; Petro, ok FOJOJN; kaj Karlo, dekunu FOJOJN. Nun la demando estas:- Kiu el la tri knaboj kuras la PLEJ rapide, kaj kiu el la tri knaboj kuras la MALPLEJ rapide?

RESPONDO:- Johano kuras PLI rapide OL Petro, sed MALPLI rapide OL Karlo. El la tri knaboj, Karlo kuras la PLEJ rapide, kaj Petro kuras la MALPLEJ rapide.


PLI. · PLEJ.



VIDI - AŬDI - FLARI.



SAKO.



LA VIRO PORTAS SAKON SUR LA DORSO.

SONOJ DE LA BESTA REGNO.

HOMO PAROLAS.

MI PAROLAS PRI LA SONOJ DE LA BESTA REGNO

HISSS! SERPENTO SIBLAS.		
HI! HI! HI! ĈEVALO HENAS.		
HUF! HUF! HUNDO BOJAS.		
KLU! KLU! KOKINO KLUKAS.	KKRIKUUU! KOKO KRIAS.	MEE! ŜAFO BAAS.
GRA-GRA! KORVO GRAKAS.	MIAUU! KATO MIAŬAS.	PIP-PIP! BIRDO PEPAS.
ĈIRP! LOKUSTO ĈIRPAS.	MEE! KAPRO BAAS.	BUZZZ! ABELO ZUMAS.
RANO KVAKAS.	MUUU! BOVO BLEKAS.	OJ-OJ! PORKO GRUNTAS.

LA MONATOJ DE LA JARO.

Januaro, Februaro, Marto,
Aprilo, Majo, Junio,
Julio, Aŭgusto, Septembro,
Oktobro, Novembro, Decembro.

LABORI.

FOSADO	KUDRADO	SKRIBADO	PENSADO
ESTAS LABORO	ESTAS LABORO	ESTAS LABORO	ESTAS LABORO
ABELOJ LABORAS.	ARANEO LABORAS.	BIRDO LABORAS.	BOVO LABORAS.

DIKTOGRAFO.

FINO DE LA KVINA LECIONO.
VERKU ALMENAŬ UNU FRAZON EL ĈIU BILDO LAŬ VIA KOMPRENO.

SESA LECIONO.


LA PATRO AĈETIS KAPRETON.



KAPRETO. KAPRETO.
LA PATRO AĈETIS
POR DU GULDENOJ
KAPRETON, KAPRETON.



VENAS LA HUNDETO
KAJ MORDAS LA KAPRETON,
KIUN LA PATRO
AĈETIS POR
DU GULDENOJ.




VENAS LA BASTONETO
KAJ BATAS LA HUNDETON,
KIU MORDIS LA KAPRETON,
KIUN LA PATRO
AĈETIS POR
DU GULDENOJ.



VENAS LA FAJRETO
KAJ BRULIGAS LA BASTONETON,
KIU BATIS LA HUNDETON,
KIU MORDIS LA KAPRETON,
KIUN LA PATRO
AĈETIS POR
DU GULDENOJ.



VENAS LA AKVETO
KAJ ESTINGAS LA FAJRETON,
KIU BRULIGIS LA BASTONETON,
KIU BATIS LA HUNDETON,
KIU MORDIS LA KAPRETON,
KIUN LA PATRO
AĈETIS POR
DU GULDENOJ



VENAS LA BOVINETO
KAJ TRINKAS LA AKVETON,
KIU ESTINGIS LA FAJRETON,
KIU BRULIGIS LA BASTONETON,
KIU BATIS LA HUNDETON,
KIU MORDIS LA KAPRETON,
KIUN LA PATRO
AĈETIS POR
DU GULDENOJ.



VENAS LA BUĈISTO
KAJ BUĈAS LA BOVINETON,
KIU TRINKIS LA AKVETON,
KIU ESTINGIS LA FAJRETON,
KIU BRULIGIS LA BASTONETON,
KIU BATIS LA HUNDETON,
KIU MORDIS LA KAPRETON,
KIUN LA PATRO
AĈETIS POR
DU GULDENOJ.



VENAS LA MORTANĜELO
KAJ MORTIGAS LA BUĈISTON,
KIU BUĈIS LA BOVINETON,
KIU TRINKIS LA AKVETON,
KIU ESTINGIS LA FAJRETON,
KIU BRULIGIS LA BASTONETON,
KIU BATIS LA HUNDETON,
KIU MORDIS LA KAPRETON,
KIUN LA PATRO
AĈETIS POR
DU GULDENOJ.

LA UZADO DE LA SUFIKSO "IST"


FLORO.


FLORISTO.


DENTO


DENTISTO.


VIOLONO.


VIOLONISTO.



DROGO.


DROGISTO.


MARO.


MARISTO.


BOTO.


BOTISTO.


MAŜINO.


MAŜINISTO.


TAMBURO.


TAMBURISTO.


POTO.


POTISTO.


HORLOĜO.


Horloĝisto.


HARPO.


HARPISTO.


BARELO.


BARELISTO.


ARTISTO.


Fotografisto



VITRISTO.


ŜTELISTO.


LAVISTINO.


Kudristino.


Kuiristino.


Floristino.

FELIĈA MIZERA.



FELIĈAJ INFANOJ.


MIZERAJ INFANOJ.

1925 FEBRUARO 1925.

1 DIMANĈO	8 DIMANĈO	15 DIMANĈO	22 DIMANĈO
2 LUNDO	9 LUNDO	16 LUNDO	23 LUNDO
3 MARDO	10 MARDO	17 MARDO	24 MARDO
4 MERKREDO	11 MERKREDO	18 MERKREDO	25 MERKREDO
5 ĴAŬDO	12 ĴAŬDO	19 ĴAŬDO	26 ĴAŬDO
6 VENDREDO	13 VENDREDO	20 VENDREDO	27 VENDREDO
7 SABATO	14 SABATO	21 SABATO	28 SABATO
SEMAJNO	SEMAJNO	SEMAJNO	SEMAJNO

MONATO




HORLOĜO


TEMPO.

Sesdek sekundoj
faras unu minuton.
Sesdek minutoj
faras unu horon.
Dudek kvar horoj
faras unu tagon.
Sep tagoj
faras unu semajnon.
Kvar semajnoj
faras unu monaton.
Dek du monatoj
faras unu jaron.


Kioma Horo Estas?


LA TRIA.

KVIN MINUTOJ POST LA TRIA



KVARONO POST LA TRIA.


DUONO POST LA TRIA.




KVARONO ANTAŬ LA KVARA

DEK MINUTOJ ANTAŬ LA KVARA.


EN LA LERNEJO.




KAJERO. LINILO


SKRIB-TABULO. GUM-SKRAPILO

Kia, Kial, Kie, Kies, Kio, Kiom, Kiu, Do

DEMANDO- KIO estas ĉi tio?
RESPONDO- Tio estas ĉapelo.
DEMANDO- KIE estas la ĉapelo?
RESPONDO- Ĝi estas en via mano.
DEMANDO- KIU havas la ĉapelon?
RESPONDO- Vi havas ĝin.
DEMANDO- KIES ĉapelo estas ĉi tio?
RESPONDO- Ĝi estas via.
DEMANDO- KIA ĉapelo estas ĉi tio?
RESPONDO- Ĝi estas mola kaj nigra.
DEMANDO- KIOM estas unu ĉapelo kaj du ĉapeloj?
RESPONDO- Unu ĉapelo kaj du ĉapeloj estas tri ĉapeloj.
DEMANDO- Tre bone, sed,se unu ĉapelo kaj du ĉapeloj estas tri ĉapeloj, kiom estas tri ĉapeloj kaj sep libroj?
RESPONDO- E-e?.. me-e?.. be-e?..
DEMANDO- KIAL vi ne respondas?
RESPONDO- Dek.
DEMANDO- Dek kio, ĉapeloj?
RESPONDO- Ne.
DEMANDO- KIO do, dek libroj?
RESPONDO- Ne.
DEMANDO- KIO do?
RESPONDO- KIA demando!- Tri ĉapeloj kaj sep libroj estas- sep libroj kaj tri ĉapeloj.


HISTORIO.—SAĜA.



La reĝo Salomono estis tre SAĜA homo. Ĉu vi aŭdis la HISTORION pri Salomono kaj la infano? Li ordonis tratranĉi ĝin, kaj doni la duonojn al la du patrinoj.

FIDELA.





Hundo estas la plej FIDELA besto.

LA MUELISTO KAJ LIA AZENO.



MUELISTO KAJ LIA FILO IRAS AL LA BAZARO POR VENDI SIAN AZENON.



PRETERIRAS VIRO KAJ DIRAS: "ĈU NE ESTUS PLI BONE, SE UNU EL VI RAJDUS LA AZENON?"



"TIO JA ESTUS PLI BONE," RESPONDAS LA MUELISTO, KAJ LI SIDIGAS SIAN FILON SUR LA DORSON DE LA AZENO.



JEN LA FILO DE LA MUELISTO RAJDAS LA AZENON, KAJ LA MUELISTO POSTSEKVAS.



SED JEN ALIA VIRO PRETERIRAS KAJ DIRAS: "TIO NE ESTAS ĜUSTA, BUBO, KE VI RAJDAS KAJ LASAS VIAN PATRON PIEDIRI."



"VI JA ESTAS PRAVA," DIRAS LA MUELISTO, KAJ DEAZENIGAS LA FILON.



LI MEM SIDIĜAS KAJ RAJDAS LA AZENON, DUM LA FILO PIEDIRAS.



KAJ JEN ILI RENKONTAS DU VIRINOJN. "ĈU VI NE HONTAS RAJDI LA AZENON DUM VIA BUBO LAME PIEDIRAS!" ILI DIRAS.



LA MUELISTO RUĜIĜAS DE HONTO. LI DESALTAS KAJ SIDIGAS LA FILON SUR LA DORSON DE LA AZENO.




LI MEM SURGRIMPAS LA DORSON.



KAJ JEN ILI AMBAŬ RAJDAS LA AZENON.




LA AZENO NUR FARAS KELKAJN PAŜOJN, KIAM ALIA VIRO DIRAS: "ĈU VI NE KOMPATAS LA MALFELIĈAN BESTON? ĜI JAM NE POVAS MARŜI."



LA MUELISTO PRIPENSAS KAJ DIRAS: "EBLE VI ESTAS PRAVA." LI DESALTAS MEM,




KAJ TIAM LI HELPAS SIAN FILON DEAZENIĜI.



LA PARO NUN KUNLIGAS LA ANTAŬAJN KAJ POSTAJN KRUROJN DE LA AZENO.



LA KNABO ALPORTAS FORTAN STANGON, KIUN LI TROVIS SUR LA VOJO.



ILI PENDIGAS LA AZENON SUR LA STANGON.



KAJ JEN LA MUELISTO KAJ LIA FILO PORTAS LA AZENON SUR SIAJ ŜULTROJ.



SED ĈIU, KIU EKVIDIS LA STRANGAN SPEKTAKLON RIDIS JE ILIA NAIVECO.



LA MUELISTO FINE EKKOMPRENIS, KE ONI NE POVAS KONTENTIGI ĈIUJN HOMOJN KAJ LI ĴETIS LA AZENON EN LA RIVERON.

FINO.

La uzado de la sufikso "UL".

FORTULO	EBRIULO.	RIĈULO.	ĜIBULO
KRIPLULO.	DIKULO.	MALSANULO	BLINDULO.
MALJUNULO	MALDIKULO	ALMOZULO.	KURAĜULO.
JUNULO.	UNU-MANULO	MALDEKSTRULO	SANKTULO

LA UZADO DE LA PREFIKSO "RE".

ĴETAS.	RESALTAS.	BRILAS.	REBRILAS.
FORIRAS.	REVENAS	SONAS.	RESONAS.
ELIRAS.	REIRAS	KUŜIGAS.	RESTARIĜAS.
FRAPAS.	REFRAPAS.	LEGAS.	RELEGAS.


LA UZADO DE LA PREFIKSO "DIS".

1 FALAS.	5 KURAS.	9 DONAS.
2 DISFALAS.	6 DISKURAS.	10 DISDONAS.
3 ŜIRAS.	7 FLUGAS.	11 ĴETAS.
4 DISŜIRAS.	8 DISFLUGAS.	12 DISĴETAS.

La Uzado De La Sufikso "AĈ".

1 VIRO.	5 DOMO.	9 ĈEVALO.
2 VIRAĈO.	6 DOMAĈO.	10 ĈEVALAĈO.
3 VIOLONISTO.	7 MANĜAS.	11 SKRIBAĴO
4 VIOLONISTAĈO.	8 MANĜAĈAS.	12 SKRIBAĈAĴO

LA HUFOFERO.



VILAĜANO KUN SIA FILO IRAS AL LA BAZARO, POR VENDI GRENON. SURVOJE LA VILAĜANO RIMARKAS HUFOFERON.



"EKLEVU ĜIN!" LI DIRAS AL SIA FILO. "HM," LA MALĜENTILA KNABO RESPONDAS. "TIU BAGATELO NE VALORAS LA PENON." LA VILAĜANO MEM KLINIĜAS KAJ LEVAS LA HUFOFERON.



"NU ATENDU," LI DIRAS AL SI, KAJ METAS LA HUFOFERON EN SIAN POŜON. LI TIAM PRENAS LA BRIDON KAJ DAŬRIGAS LA MARŜADON.




JEN ILI VENAS EN LA BAZARON, KAJ LA VILAĜANO VENDAS LA HUFOFERON AL LA URBA FORĜISTO POR KELKAJ CENDOJ.




LI TIAM AĈETAS PER LA MONO SAKETON DA ĈERIZOJ, KAJ METAS ĜIN EN LA POŜON.



LA VILAĜANO TIAM VENDAS SIAN GRENON KAJ ORDONAS LA FILON PRETIGI LA ĈEVALON POR IRI HEJMEN. LA FILO FORPRENAS LA SAKETON KUN MANĜAĴO DE LA ĈEVALO.




KAJ JEN NI VIDAS ILIN SUR LA VOJO AL LA VILAĜO. LA SUNO BRILAS KAJ ESTAS TRE VARME. LA KNABO PRESKAŬ NE POVAS PAŜI PRO SOIFO.



LI DEPRENAS SIAN ĈAPON KAJ VIŜAS LA ŜVITON DE LA FRUNTO. JEN JAM LA JAKETON DEPRENIS. LA SUNO BAKAS KIEL FORNO, KAJ NENIE EĈ DOMETO AŬ ARBETO ESTAS VIDEBLA.



LA VILAĜANO RIMARKAS LA SUFEROJN DE LA KNABO KAJ ELPOŜIGAS LA SAKETON KUN ĈERIZOJ. LI FALIGAS UNU ĈERIZON SUR LA VOJON.



LA KNABO EKVIDAS LA ĈERIZON. LI LEVAS ĜIN KAJ AVIDE METAS ĜIN EN LA BUŜON. LI TIAM DAŬRIGAS LA MARŜADON.



LA VILAĜANO LASAS FALI ALIAN ĈERIZON, KAJ LA FILO, KIEL ANTAŬE KLINIĜAS KAJ LEVAS ĜIN.



ILI DAŬRIGAS LA MARŜADON, KAJ LA VILAĜANO FALIGAS ALIAN ĈERIZON, POST KELKAJ PAŜOJ ALIAN KAJ ALIAN.



KAJ LA FILO ĈIAM KLINIĜAS POR LEVI ĈIUN ĈERIZON. KIAM LA KNABO ESTAS PRETA EKLEVI LA LASTAN ĈERIZON, LIA PATRO TURNAS SIN AL LI KAJ DIRAS:



"JEN PRIPENSU, PRO TIO, KE VI NE VOLIS VIN KLINI UNU FOJON POR EKLEVI LA HUFOFERON VI DEVIS VIN KLINI MULTAJN FOJOJN."

UNUIĜO ESTAS FORTO.



MALJUNA FARMISTO TREEGE ĈAGRENIĜAS PRO LA ĈIAMAJ *DISPUTOJ* KAJ INTERBATALOJ DE SIAJ KVIN FILOJ. FOJE LI ALVOKAS LA KVIN FILOJN KAJ DIRAS AL LA PLEJ JUNA: "IRU KAJ ALPORTU AL MI KVIN BASTONOJN."



LA KNABO OBEAS KAJ TROVAS LA BASTONOJN EN LA KORTO. JEN NI VIDAS LIN VENI KUN LA BASTONOJ, KIUJN LI DONAS AL LA PATRO.




LA PATRO DONAS LA KVIN BASTONOJN AL SIA PLEJ AĜA FILO KAJ DIRAS: "ROMPU ILIN!" JEN PETRO, LA PLEJ AĜA FILO *PENAS* KAJ *PENAS*, SED ROMPI ILIN NE POVAS. NUN LIA FRATO-JOZEFO, PROVAS KAJ KIEL PETRO NE POVAS ROMPI LA BASTONOJN.



LA TRI ALIAJ FRATOJ SEKVAS UNU POST LA ALIA, SED *NENIU* EL ILI SUKCESAS.




TIAM LA PATRO DONAS AL ĈIU KNABO NUR UNU BASTONON, KAJ DIRAS: "*NUN PROVU!*" KAJ JEN ĈIU EL LA KNABOJ ROMPAS LA BASTONON SENPENE.



LA PATRO TIAM DIRAS: "SE VI ĈIUJ VIVOS KUNE EN AMIKECO, VI ĈIAM ESTOS FORTAJ KAJ *NENIA* FORTO POVOS VIN ROMPI; SED SE VI *INTERBATALOS*, ĈIU VIN ROMPOS TIEL FACILE, KIEL VI ROMPIS LA BASTONOJN." LA FILOJ *PROMESAS* *NENIAM* PLU INTERBATALI.


SILENTI. VEKI.









FRAŬLO SINJORO


TIO ĈI ESTAS SINJORO SMITH.


TIO ĈI ESTAS SINJORINO SMITH.


SINJORO BRUNO ESTAS FRAŬLO.


SINJORINO BRUNO ESTAS FRAŬLINO.


SINJORO DAVIS NE ESTAS FRAŬLO, ĈAR LI HAVAS EDZINON.


SINJORINO DAVIS NE ESTAS FRAŬLINO, ĈAR ŜI HAVAS EDZON.


SINJORO YONG NE HAVAS EDZINON, TIAL LI ESTAS FRAŬLO.


SINJORINO YONG NE HAVAS EDZON, TIAL ŜI ESTAS FRAŬLINO.


SINJORO SMITH PAROLAS AL SINJORINO SMITH.


SINJORINO SMITH DONAS AL SINJORO SMITH LIAN ĈAPELON.


FRAŬLINO YONG PROMENADAS KUN SINJORO DAVIS.


LA FRAŬLOJ DANCADAS KUN LA FRAŬLINOJ.

LUDI · KANTI · AŬSKULTI.

Helenjo sidas ĉe la fortepiano kaj LUDAS. Mario staras antaŭ la fortepiano kaj KANTAS. Ĉiuj aliaj sidas kaj AŬSKULTAS atente.



APARTENAS. TIAL





OBEI · PUNI.

Petro ne obeis sian patron, kaj tial la patro nun punas lin.




Fraŭlo, Fraŭlino, Promeni, Perdi, Admiri, Tero.



1, Fraŭlo kaj fraŭlino promenadas en la strato.
2, La fraŭlino perdas unu el la belaj floroj, kiujn ŝi tenas
3, Mario iras domen el la lernejo kaj vidas la belan floron sur la tero.

Admiri, Kiel, Ĝojo, Agrabla.



4, Ŝi levas la floron de sur la tero, kaj admiras ĝin.
5, "Ho, kia bela floro, kaj kiel agrable ĝi odoras", ŝi diras al si, kaj flaras la floron.
6, Mario nun kuras domen kun ĝojo.

Rigardi, Trovi.




7, "Rigardu, patrino", ŝi diras, "kia bela floro"!
8, "Kiu donis ĝin al vi"? demandas la patrino, kaj prenas la floron el ŝia mano. "Mi trovis ĝin sur la tero", Mario respondas.
9, La patrino admiras la belan koloron, kaj flaras la agrablan odoron, kaj diras, "Ni metos ĝin en akvon".

Veni, Jen.




10, "Jes, patrino", Mario diras, kaj kuras al la pordo
11, Mario venas kun akvo. "Jen, patrino, jen estas akvo".
12, La patrino metas la floron en la akvon, kaj Mario rigardas kun ĝojo.

MERKURO KAJ LA ARBOHAKISTO.






ARBOHAKISTO TRAHAKAS ŜTIPON APUD LA RIVERO. LA HAKILO FALAS EN LA RIVERON.




MALGAJE LA ARBOHAKISTO SIDAS SUR LA ŜTIPO KAJ MEDITAS PRI SIA PERDO. SUBITE APERAS LA DIO MERKURO K[illegible]J DE[illegible]NDAS LA KAŬZON DE LIA ĈAGRENO.



LA ARBOHAKISTO RESPONDAS: "MIA HAKILO FALIS EN LA RIVERON". "NU ATENDU," DIRAS LA DIO MERKURO, KAJ SUBAKVIĜAS EN LA RIVERO.




BALDAŬ LA DIO REAPERAS KUN ORA HAKILO EN LA MANO. "ĈU ĈI TIU HAKILO ESTAS VIA?" "NE" RESPONDAS LA ARBOHAKISTO. LA DIO REE SUBAKVIĜAS.



KAJ REAPERAS KUN ARĜENTA HAKILO. "ĈU ĈI TIU HAKILO ESTAS VIA?" LI DEMANDAS. "NE, TIU ANKAŬ NE APARTENAS AL MI." LA ARBOHAKISTO RESPONDAS. LA DIO SUBAKVIĜAS LA TRIAN FOJON.



KAJ JEN LA DIO REAPERAS KUN LA FERA HAKILO. "ĈU ĈI TIU HAKILO ESTAS VIA?" LI DEMANDAS. "JES, TIU ESTAS MIA." LA ARBOHAKISTO ĜOJEGE EKKRIAS. "NU, ĈAR VI ESTAS TIEL HONESTA MI VIN REKOMPENCOS," DIRAS LA DIO MERKURO.




LI DENOVE SUBAKVIĜAS, KAJ ĈI TIUN FOJON REAPERAS KUN LA TRI HAKILOJ - LA ORAN, LA ARĜENTAN KAJ LA FERAN.



LI DONAS AL LA ARBOHAKISTO LA TRI HAKILOJN, KAJ FORŜVEBAS EN LA NUBOJN.



FELIĈA LA ARBOHAKISTO MARŜAS SUR LA VOJO HEJMEN, KAJ JEN LI RENKONTAS SIAN AMIKON EL LA SAMA VILAĜO. LI RAKONTAS AL LI, KIO OKAZIS AL LI.



JEN LA ĴALUZEMA AMIKO VOLAS FARI LA SAMON. LI INTENCE ĴETAS SIAN HAKILON EN LA RIVERON.



LI TIAM SIDIĜAS SUR LA ŜTIPON KAJ ATENDAS. KAJ JEN LA DIO MERKURO APERAS KAJ DEMANDAS PRO KIO LI ESTAS TIEL ĈAGRENA.



LA ĴALUZEMA AMIKO RESPONDAS, KE LIA HAKILO FALIS EN LA RIVERON. LA DIO, KIEL ANTAŬE SUBAKVIĜAS.




KAJ TUJ REAPERAS KUN ORA HAKILO. "ĈU ĈI TIU ESTAS VIA HAKILO?" LI DEMANDAS. "JES, JES!" LA MALHONESTULO AVIDE RESPONDAS, KAJ JAM ESTAS PRETA EKKAPTI LA ORAN HAKILON, SED LA DIO KOLERE ĴETAS LA HAKILON EN LA RIVERON KAJ DIRAS," IRU DO KAJ PRENU ĜIN.

SCII · CERTA.



(1) KARLO- "Ĉu vi SCIAS, kion mi havas en mia mano?"
(2) PETRO- "Ne, mi ne SCIAS."
(3) KARLO- "Ĉu vi SCIAS nun?"
(4) PETRO- "Jes, nun mi SCIAS. Tio estae MONERO."





Henriko ne scias sian lecionon, tial la instruanto lin punas.



Petro ankoraŭ ne scias ludi la violonon. Li nur komencas lerni.

HONESTA.



Ĉi tiu knabo estas HONESTA, ĉar li trovis monujon kaj li vokas la fraŭlinon, kiu perdis ĝin, por redoni ĝin al ŝi.

MALHONESTA.



Ĉi tiu knabo estas MALHONESTA. Li ankaŭ trovis monujon, sed anstataŭ redoni ĝin al la fraŭlino, kiu kuras post li, li forkuras kun ĝi.

NASKIĜO.

KRESKADO, MALJUNIĜADO, MORTO.



NASKIĜO. KRESKAS. MALJUNIĜAS. MORTAS.

ROMPI.

Henriko estas malbona knabo. Jen li ĵetis stonon en la fenestron kaj ROMPIS unu el la vitroj; kaj nun li jam ĵetas alian stonon.



JAM. ANKORAŬ.



KARLO!
Kion vi volas, patrino?
ĈU VI JAM TRINKIS LA TEON?
Ne, mi ankoraŭ ne trinkis.
KIAL, DO, VI NE TRINKAS?
Tial, ke la teo estas tre varma.



BALDAŬ. TUJ.



KARLO!
Kion vi volas, patrino?
ĈU VI JAM TRINKIS LA TEON?
Ne, mi ankoraŭ ne trinkis.
KIAL, DO, VI NE TRINKAS?
Mi trinkos baldaŭ, patrino.
TRINKU TUJ!- ĈU VI AŬDAS?
Jes, patrino, mi trinkos tuj.





KARLO!
Kion vi volas nun patrino?
ĈU VI JAM TRINKIS LA TEON?
Ne, patrino, sed mi ĝin trinkas nun.






ALIA. PLU.



KARLO!
Kio, patrino?
ĈU VI JAM TRINKIS LA TEON?
Jes, mi jam trinkis ĝin.
ĈU VI VOLAS ALIAN TASON?
Ne, patrino.
KIAL NE?
Tial, ke mi ne povas trinki plu.



AMBAŬ · GLOBO · FLANKO · AKRA.

 UNU VIRO SIDAS KAJ UNU VIRO KUŜAS.	 AMBAŬ VIROJ SIDAS.	 UNU VIRO SIDAS KAJ UNU VIRO STARAS.	 AMBAŬ VIROJ STARAS.
 UNU FINO HAVAS PINTON LA ALIA GLOBON.	 AMBAŬ FINOJ HAVAS PINTOJN.	 UNU FLANKO ESTAS AKRA LA ALIA MALAKRA.	 AMBAŬ FLANKOJ ESTAS AKRAJ.

LA ROMPITA BASTONO.



KARLO MONTRAS AL JOHANO LA BASTONON DE SIA PATRO KAJ DEMANDAS: "ĈU VI POVAS FARI DU BASTONOJN EL UNU?"
JOHANO RESPONDAS: "NE. ĈU VI?"





KARLO DIRAS: "CERTE, RIGARDU! JEN ESTAS LA BASTONO DE MIA PATRO. NUN MI PRENAS ĜIN PER MIAJ DU MANOJ,





KAJ METAS MIAN GENUON ĈE LA MEZO. NUN MI ROMPAS ĜIN EN DU PECOJ. ĈIU PECO NUN ESTAS BASTONO." SED JEN MONTRIĜAS LA PATRO DE KARLO ĈE LA PORDO. LI VIDAS, KION KARLO FARIS KUN LIA BASTONO, KAJ LI DIRAS AL KARLO:-

"ĈU VI POVAS FARI BRUNAN KOLORON EL BLANKA?"
KARLO RESPONDAS: "NE. ĈU VI?"
LA PATRO DIRAS: "CERTE. RIGARDU! JEN MI PRENAS, PER UNU MANO, PECON EL LA BASTONO, KIUN VI ROMPIS, KAJ PER LA DUA,






MI PRENAS VIN JE LA NUKO.
NUN MI SIDIĜAS SUR LA SEĜON.
MI METAS VIN SUR MIAN GENUON, KAJ MI BASTONADOS VIAN POSTAĴON ĜIS ĜI FARIĜOS BRUNA."


VOKAS.



FRAŬLINO YONG VOKAS LA KNABON.


SINJORINO DAVIS VOKAS LA HUNDON.

ORDONI·ŜOVI·OBSTINA·OBEI.



Henriko estas tre OBSTINA knabo. Ĉiun tagon lia patrino ORDONAS al li, ke li ne manĝu per la manoj, sed li ŝin ne OBEAS; ankaŭ nun ŝi diras al li:- "Ne manĝu per viaj manoj, jen estas forko!" sed li denove ne OBEAS kaj OBSTINE ENŜOVAS la manon en la teleron.

RAKONTI·AŬSKULTI·ATENTE.



La avino estas tre saĝa virino. Ŝi povas RAKONTI tre belajn historiojn. Ŝi nun sidas kun siaj nepoj kaj nepinoj kaj RAKONTAS al ili la historion pri la saĝa reĝo Salomono. Rigardu kiel la infanoj sidas ĉirkaŭ la avino kaj AŬSKULTADAS ATENTE la belan historion.

VENI·VERO·MENSOGI·HONESTE.



PATRO- Diru la VERON, kiu rompis la spegulon?
KARLO- Ne mi, patro.
PATRO- Kiu do?
KARLO- Mi ne scias.
PATRO- Vi MENSOGAS. Vi rompis ĝin.
KARLO- Ne, patro, mi ne MENSOGAS. Mi diras la VERON.
PATRO- Sed mi vidis vin teni la spegulon ĉi tiun matenon.
KARLO- Jes, patro, tio estas VERO, mi tenis ĝin, sed mi ĝin ne rompis. Ĝi falis el miaj manoj, kaj kiam mi ĝin levis, mi trovis, ke ĝi jam estis kiel nun. HONESTE, tio estas la VERO. Vi scias, ke mi ne MENSOGOS al vi.
PATRO- CERTE. Karlo, mi scias tion bone.

NOMO.



Maljunulino:- "Ho, knabo! Kio estas via NOMO?"
Knabo:- "Mia NOMO estas Henriko."
Maljunulino:- "Kaj kio estas la NOMO de via patro?"
Knabo:- "La NOMO de mia patro estas Petro. La NOMO de mia patrino estas Mario. La NOMO de mia hundo estas Hektor. Ĉu vi ankaŭ volas scii la NOMON de nia bruna kato?"

La uzado de la sufikso "ER".

ĈENO.	ĈENERO.	MONO.	MONERO.
BARELO.	BARELERO.	NEĜO.	NEĜERO.
FAJRO.	FAJRERO.	PAVIMO.	PAVIMERO.
HERBO.	HERBERO.	MAIZO.	MAIZERO.

La uzado de la sufikso "AR".

ARBO.	ARBARO.	ŜTUPO.	ŜTUPARO.
VAGONO.	VAGONARO.	VINBERO	VINBERARO.
DENTO.	DENTARO.	LUPO.	LUPARO.
OSTO.	OSTARO.	DENTRADO.	DENTRADARO.

La Uzado De La Sufikso "ID".

HUNDO.	HUNDIDO.	BIRDO.	BIRDIDO.
KOKO.	KOKIDO.	ĈEVALO.	ĈEVALIDO.
REĜO.	REĜIDO.	PORKO.	PORKIDO.
ARBO.	ARBIDO.	ELEFANTO.	ELEFANTIDO.

La Uzado De La Sufikso "ING".

GLAVO.	GLAVINGO.	FINGRO.	FINGRINGO.
CIGARO.	CIGARINGO.	KANDELO.	KANDELINGO.
PLUMO.	PLUMINGO.	FLAMO.	FLAMINGO.
OMBRELO.	OMBRELINGO.	PIEDO.	PIEDINGO.

VENĜO.



KNABO SUR INTERVILAĜA KAMPVOJO VIDAS DE MALPROKSIME, KE IU FREMDULO BATAS LIAN HUNDON, SED ANTAŬ OL LI VENAS AL LA LOKO,



LA HUNDO JAM ESTAS LAMA KAJ LA VIRAĈO ESTAS FOR. LA KNABO PUGNIGAS SIAN MANON, KAJ IRAS KUN LA HUNDO SERĈI AKVON POR BANI LA KRURON DE LA HUNDO.



LI TROVAS PUTON KAJ APLIKAS AKVON AL LA VUNDO. SUBITE LA KNABO EKVIDAS, KE TIU SAMA VIRAĈO ALPROKSIMIĜAS LA PUTON, KAJ LI DIRAS AL SI: "NUN MI KVITIĜOS KUN VI." LI KOVRAS LA HUNDON PER SIA JAKETO,



SIDIĜAS APUD LA PUTO KAJ ŜAJNE PLORAS.



"PRO KIO VI PLORAS?" DEMANDAS LA VIRAĈO. "LA ŜNURO DISŜIRIĜIS, KAJ LA ARĜENTA KRUĈO DE MIA PATRO ENFALIS EN LA PUTON." LA KNABO RESPONDAS KAJ MONTRAS AL LA VIRO LA ŜNURON. "ARĜENTA KRUĈO?" LI DIRAS," MI ĜIN TUJ ELTIROS."



LA VIRAĈO SENVESTIĜAS, KAJ ENGRIMPAS LA PUTON. LA KNABO RAPIDE LEVAS LA VESTOJN DE LA VIRO,



KAJ DIRAS: "NUN ELIRU KAJ BATU MIAN HUNDON." LA KNABO TIAM RAPIDE FORKURAS.

SENTI.



AMON NI SENTAS PER LA KORO.	LI SENTAS LA VARMON DE LA FAJRO.	LI SENTAS DOLORON EN LA KAPO.	LI SENTAS SIN LACA.



















La Uzado De La Sufikso "EBL".

Ŝtalo estas fleksebla.

Vitro estas travidebla kaj rompebla.

Ne ĉiu kreskaĵo estas manĝebla.

Gaso aŭ aero ne estas palpebla.

Nekredebla historio.

Enirebla loko, sed ne elirebla.

Sukero estas solvebla en akvo, sed kupro, ne.

Akvo ne estas bruligebla fluido, sed alkoholo, jes.

Ĉu vi amas vian patron? Kompreneble, mi lin amas.

La Uzado De La Sufikso "EM".

TIMEMA KNABO.

BATALEMA KNABO.

BONFAREMA VIRO.

MANĜEMA VIRO.

SPIONEMA VIRINO.

KAŜEMA VIRO.

AVAREMA VIRO.

BABILEMA BIRDO.

La Uzado De La Sufikso "IND".

LAŬDINDA AGO.

ADMIRINDA KONSTRUAĴ[O]

KOMPATINDA BIRDO.

RIDINDA SITUACIO.

TIMINDA DRAKO.

AMINDA INFANO.

MIRINDA FOSILIO.

FORĴETINDA VERKAĴO.

La Uzado De La Prepozicio "DA".

Pomo. Multe da pomoj.

Akvo. Glaso da akvo.

Pano. Peco da pano.

Sukero. Funto da sukero.


Libro. Nombro da libroj.

Forko. Dekduo da forkoj.


Drapo. Metro da drapo.

Birdo. Kelke da birdoj.


LA RUZA VULPO.




MALSATA VULPO SERĈAS MANĜAĴON. ĜI ENIRAS KOKIDKORTON, SED LA KOKIDOJ ESTAS EN LA KAĜO. ĜI PENAS TRARAMPI, SED LA MALFERMAĴOJ ESTAS TRO MALGRANDAJ.



SUBITE LA VULPO EKFLARAS FROMAĜON. ĜI SEKVAS LA ODORON PER SIA NAZO, KAJ JEN ĜI VIDAS, KE GRANDA NIGRA KORVO ENFLUGAS LA KORTON KAJ EKKAPTAS PER SIA BEKO GRANDAN PECON DA FROMAĜO EL LA RATKAPTILO, KIU STARAS APUD LA KAĜO.



LA KORVO TIAM RAPIDE FORFLUGAS KAJ SIDIĜAS SUR LA BRANĈON DE APUDA ARBO. LA VULPO ALPROKSIMIĜAS LA ARBON KAJ DIRAS:—"HO, KIAJ BELAJ PLUMOJ VIN ORNAMAS, KAJ VIAJ OKULOJ KIEL STELOJ BRILAS."



LA KORVO ESTAS TRE KONTENTA KAJ FIERE ELMONTRAS SIAJN PLUMOJN, SED FIRME TENAS LA FROMAĜON. LA VULPO DAŬRIGAS: "VI ESTAS LA PLEJ BELA BIRDO, KIUN MI IAM VIDIS. MI AŬDIS, KE VI ANKAŬ KANTAS TRE BELE. EKKANTU DO POR MI KANTETON." LA VANTA KORVO MALFERMIS LA BEKON POR EKKANTI KAJ LA FROMAĜO ELFALIS EL SIA BEKO KAJ FALIS EN LA BUŜON DE LA VULPO.

LA UZADO DE LA PREFIKSO "GE".


REĜO.


REĜINO


GEREĜOJ.


GEAVOJ.


KELNERO.


KELNERINO.


GEKELNEROJ


GEFILOJ.


FIANĈO.


FIANĈINO


GEFIANĈOJ.


GEEDZOJ.


BAKISTO.


BAKISTINO.


GEBAKISTOJ.


GEKNABOJ.

LA UZADO DE LA SUFIKSO "OBL".


TRIOBLA.


KVINOBLA.


NAŬOBLA.

2	X	2	=	4
DU	OBLE	DU	ESTAS	KVAR.
3	X	3	=	9
TRI	OBLE	TRI	ESTAS	NAŬ.

PROFUNDA. PROKSIMA.


PROKSIMA DOMO.


MALPROKSIMA DOMO


PROFUNDA RIVERO.


MALPROFUNDA RIVERO.

HIERAŬ · HODIAŬ · MORGAŬ.



INSTRUANTO.- Nun, Karlo, mi deziras klarigi al vi la signifojn de la vortoj- "HIERAŬ, HODIAŬ, MORGAŬ". Rigardu la "KALENDARON", kiun mi tenas en mia mano. La CIFERO "7" montras la DATON de la nuna tago (ĉi tiu tago). Kiam ni parolas pri la nuna tago ni diras- "HODIAŬ". Kiam ni parolas pri la tago, kiu estis antaŭ la nuna tago, ni diras "HIERAŬ"; kaj kiam ni parolas pri la tago, kiu estos post la nuna tago ni diras "MORGAŬ". En aliaj vortoj:
HODIAŬ ESTAS MERKREDO LA 7a DE OKTOBRO.
HIERAŬ ESTIS MARDO LA 6a DE OKTOBRO.
MORGAŬ ESTOS ĴAŬDO LA 8a DE OKTOBRO.
Nun, Karlo, donu ekzemplojn por montri, ke vi komprenas kion mi diris al vi.

KARLO:- Jen, HIERAŬ nokte mi iris dormi. Mi dormis la tutan nokton kaj vekiĝis HODIAŬ matene. HODIAŬ nokte mi iros dormi. Mi dormos la tutan nokton kaj vekiĝos MORGAŬ matene. Ĉu mi estas prava, Sinjoro?

INSTRUANTO:- Jes, Karlo, TUTE PRAVA.

KOMPRENI · LINGVO · AMBAŬ · TIAL.

Unu viro estas Ĥino kaj la alia estas Ruso. La Ĥino ne scias la Rusan lingvon, kaj la Ruso ne scias la Ĥinan lingvon. Ambaŭ ne scias la Esperantan lingvon. Ili tial ne komprenas unu la alian kaj estas malamikoj.



Unu viro estas Turko kaj la alia estas Franco. La Turko ne scias la Francan lingvon, kaj la Franco ne scias la Turkan lingvon; sed ili ambaŭ scias la Esperantan lingvon. Ili tial komprenas unu la alian, kaj estas amikoj kaj fratoj.




LARMOJ. RULI. FLUI.

La LARMOJ FLUADAS el la okuloj de la ploranta knabino, kaj RULIĜADAS sur ŝiaj vangoj.



KONI.

A- "Jen iras Sinjoro Bruno kun sia edzino. Ĉu vi konas lin?"
B- "Jes, mi konas Sinjoron Brunon tre bone."
A- "Ĉu vi ankaŭ konas lian edzinon?"
B- "Ne, ŝin mi ne konas. Mi eĉ ne sciis, ke li havas edzinon."



ATENTE – MUZIKO – TAMEN.

La maljuna Johano AŬSKULTAS ATENTE la FONOGRAFON, TAMEN li ne povas aŭdi la MUZIKON, ĉar li estas surda.
Petro tute ne AŬSKULTAS la FONOGRAFON, ĉar li legas sian libron, TAMEN li aŭdas la muzikon.



MOVI · FLUGI · NAĜI.



1. Homoj MOVIĜAS de loko al loko per la piedoj. HOMOJ PIEDIRAS.
2. Birdoj MOVIĜAS de loko al loko per la flugiloj. BIRDOJ FLUGAS.
3. Fiŝoj MOVIĜAS de loko al loko per la naĝiloj. FIŜOJ NAĜAS.

TERO · AERO · AKVO.



FLUIDO · SOLIDO (MALFLUIDO) · GASO.





Mi ne scias kion fari. Mi perdis mian monujon kaj nun mi ne havas eĉ unu cendon.
JOHANO - "Ĉu vi scias kiu estas tiu viro?"
STEFANO- "Certe, tio estas D-ro Bruno."



LA LEONO KAJ LA MUSO.



MUSETO KURADIS TIEN KAJ REEN SUB LA FOLIOJ KAJ DENSEJOJ DE ARBARO. SUBITE ĜI EKVIDIS GRANDAN LEONON, KIU DORMIS SUB LA ARBO. LA MUSETO ALPROKSIMIĜIS POR RIGARDI DE PROKSIME LA FAMAN REĜON DE LA ARBARO. KIAM LA MUSETO ESTIS SUFIĈE PROKSIME, LA LEONO SUBITE MALFERMIS SIAJN OKULOJN KAJ BUŜEGON.



KAJ ANTAŬ OL LA MUSETO EKPENSIS KURI, ĜI JAM TROVIĜIS INTER LA DENTOJ DE LA LEONO. LA MUSETO NE VOLIS MORTI, KAJ ĜI EKPAROLIS:- "BONA REĜO DE LA BESTOJ, ELLASU MIN. MI ESTAS TIEL ETA, KAJ MI NE POVAS VIN MALUTILI, KONTRAŬE, IAN TAGON MI EBLE POVOS VIN HELPI". LA LEONO EKRIDIS, KIAM LI AŬDIS, KE TIA ETA BESTETO LIN HELPOS, TAMEN LI ELLASIS LA MUSETON.




UNU TAGON ĈASISTOJ KAPTIS LA LEONON, KAJ LIGIS LIN PER DIKAJ ŜNUREGOJ. ILI SIDIĜIS KAJ MANĜIS ILIAN TAGMANĜON. KAJ JEN LA MUSETO KURADIS TIEN KAJ REEN SUB LA FOLIOJ KAJ DENSEJOJ.



KAJ EKVIDAS LA LEONON EN LA KAPTILO. "NUN ESTAS MIA OPORTUNO VIN HELPI", DIRAS LA MUSETO, KAJ TUJ KOMENCIS MORDETI LA DIKAJN ŜNUROJN. ĜI MORDETIS KAJ MORDETIS ĜIS LA LEONO POVIS SIN LIBERIĜI KAJ FORKURI.


AMASO.

La vorto "AMASO" signifas "granda nombro" da.



AMASO DA HOMOJ. AMASO DA BIRDOJ.

ALTA. MALALTA.




ALTA DOMO. MALALTA DOMO. FLUGAS ALTE SUPER LA DOMOJ. FLUGAS MALALTE SUPER LA DOMOJ.

RANGO. FORMO.




HOMO DE ALTA RANGO. HOMO DE MALALTA RANGO. FORMO. BELFORMA NAZO. MALBELFORMA NAZO.

MUSKOLO, NERVO, SISTEMO.



MUSKOLO. MUSKOLA SISTEMO. NERVO. NERVA SISTEMO.

MURO, ANONCI, GAZETO.



MURANONCO. GAZETANONCO. LI ANONCAS LA NOMON DE LA SEKVANTA PAROLANTO.

Homo. Kapo. Okulo.

Vizaĝo, Mampinto, Mamo, Talio, Kokso, Braceleto, Mano, Ungo, Fingro, Naztruo, Lipo, Buŝo, Dentoj, Lipo, Mentono, Kolo, Kolĉeno, Palpebro, Okulharoj, Okulglobo, Palpebro

Kapo, Orelo, Vangharoj, Lipharoj, Barbo, Kolo, Ŝultro, Brusto, Brako, Kubuto, Umbiliko, Ventro, Femuro, Haro, Frunto, Brovo, Okulo, Nazo, Orelo, Vango, Orelringo, Genuo, Kruro, Ma[illegible], Piedo, Piedfingro, Ungo, Plando, Kalkano

11 Dek unu	12 Dek du	13 Dek tri	14 Dek kvar
15 Dek kvin	16 Dek ses	17 Dek sep	18 Dek ok
19 Dek naŭ	20 Dudek	30 Tridek	40 Kvardek
50 Kvindek	60 Sesdek	70 Sepdek	80 Okdek
90 Naŭdek	100 Cent	21 Dudek unu	32 Tridek du
43 Kvardek tri	54 Kvindek kvar	65 Sesdek kvin	
76 Sepdek ses	87 Okdek sep	99 Naŭdek naŭ	

DIKTOGRAFO.

FINO DE LA OKA LECIONO. VERKU ALMENAŬ UNU FRAZON EL ĈIU BILDO. LAŬ VIA KOMPRENO.

NAŬA LECIONO.



ANEKDOTOJ.



La surdulo en la domo:- "Kien vi iras, fiŝkapti?"
La surdulo sur la strato:- "Ne. Mi iras fiŝkapti."
La surdulo en la domo:- "Ho, mi supozis, ke vi iras fiŝkapti."

— *Capper's Weekly*



Knabo:- Ĉu vi vidas la du bovinojn"?
Knabino:- Jes. Unu estas blanka kaj la dua bruna"
Knabo:- "El la blanka ni melkas lakton".
Knabino:- "Kaj el la bruna?"
Knabo:- "La bruna?..Kafon."

— *Butler's First Steps*



Patrino:- "Se vi batos la katon, mi batos vin; kaj se vi tiros ĝiajn orelojn, mi tiros viajn."
Knabino:- "Mi tiros ĝian voston, do."

— *Butler's First Steps*




Knabino:- "Ho, patrino, la telero estas malpura."
Patrino:- "Ŝŝ! Tio estas la supo."


— *Butler's First Steps*

DIFINI-PRAVA-ĜUSTA.

NEBULO · KLARA.




SIGNIFI · SUPOZI.




INSTRUANTO.- "Diru al mi, Karlo,- kio estas la vorto "NEBULO"?
KARLO:- "Mi ne scias, Sinjoro."
INSTR.- "Mi KLARIGOS al vi."
KARLO:- "Mi ankaŭ ne scias kio estas la vorto KLARIGI."
INSTR.- "Nu, mi ankaŭ diros al vi kio SIGNIFAS la vorto 'KLARIGI'."
KARLO:- "Sed mi eĉ ne scias kio estas la vorto 'SIGNIFI'."
INSTR.-"Aŭskultu do, Karlo, kaj ne interrompu min, kiam mi parolas."
KARLO:- "Bone, Sinjoro."
INSTR.- "SUPOZU, ke vi estas la instruanto kaj mi estas la lernanto, kaj vi demandas al mi 'KIO ESTAS LA VORTO PLUMO', kaj mi respondas- 'MI NE SCIAS, SINJORO' Kion vi farus?"
KARLO:- "Kion mi farus? Mi dirus al vi, ke 'PLUMO' estas ILO per kiu ni skribas."
INSTR.- "PRAVA, Karlo. Tio estas PRAVA respondo. La vortoj do,- 'ILO PER KIU NI SKRIBAS' KLARIGAS la SIGNIFON de la vorto PLUMO. Nun;- kiam vi ne scias la SIGNIFON de la vorto 'NEBULO, mi devas KLARIGI la vorton per alia vorto, kiun vi jam scias. Tiu alia vorto do, ja estas la 'SIGNIFO' aŭ DIFINAĴO, ĉar ĝi KLARIGAS aŭ DIFINAS la vorton kies SIGNIFON vi ne scias. Ĉu tio nun estas KLARA al vi?"
KARLO;- Jes, Sinjoro."
INSTR.- Nun rigardu, Karlo, la du bildojn de ŝipoj sur la maro. En unu bildo ni ne povas vidi la ŝipon klare, ĉar la NEBULO kaŝas ĝin antaŭ ni; kontraŭe, en la dua bildo la NEBULO jam estas for, kaj ni vidas, ne nur, la ŝipon, SED EĈ LA VIROJN KAJ VIRINOJN SUR ĜI."

PARTICIPOJ·ANTA·ATA.




INSTRUANTO:- "Hodiaŭ, Karlo, ni lernos pri PARTICIPOJ."
KARLO:- "PARTICIPOJ!" "Kio estas PARTICIPO?"
INSTRUANTO:- "Aŭskultu atente, Karlo, kaj mi tion klarigos al vi." Ĉu vi memoras, Karlo, kion ni lernis en la kvara leciono pri VERBOJ?"



KARLO:- "Jes, Sinjoro, unue- ke VERBOJ estas vortoj, kiuj esprimas AGOJN, kaj due- ke VERBOJ havas unu el la jenaj finiĝoj- I, U, AS, IS, OS, US."
INSTRUANTO:- "Ni ankaŭ lernis en la SAMA leciono, ke ADJEKTIVOJ estas vortoj, kiuj esprimas KVALITOJN, kaj ke ili finiĝas per la litero 'A'. Nun, PARTICIPOJ, Karlo, estas vortoj, kiuj esprimas AGOJN kaj KVALITOJN en la sama tempo. Rigardu la kvar bildojn.
BILDO (1) MONTRAS KNABON, KIU SKRIBAS.
BILDO (2) MONTRAS KNABON, KIU MANĜAS
BILDO (3) MONTRAS KNABON, KIUN LA PATRO PORTAS. BILDO (4) MONTRAS KNABON, KIUN LA PATRO BATAS. Se ni nun aldonas al la VERBOJ la finiĝojn- 'ANTA' aŭ 'ATA' anstataŭ la finiĝo- 'AS', la VERBOJ fariĝas PARTICIPOJ, kiuj tiam esprimas AGOJN kaj KVALITOJN en la sama tempo. VIDU LA SUBSKRIBOJN EN LA BILDOJ."
KARLO:- "Sed, Sinjoro Instruanto- Mi ne komprenas, kial en unu frazo la verbo havas la finiĝon 'ANTA', kaj en alia frazo la verbo finiĝas per 'ATA'."

AKTIVA · PASIVA·



INSTRUANTO:- "Jen kial, Karlo,- PARTICIPOJ povas esti aŭ AKTIVAJ aŭ PASIVAJ. AKTIVAJ PARTICIPOJ estas tiuj, kiuj esprimas la FARADON de la ago, dum PASIVAJ PARTICIPOJ estas tiuj, kiuj esprimas la RICEVON de la ago. Ekzamenu la supran bildon. De MALDEKSTRE DEKSTREN ni vidas, ke Stefano estas puŝANTA Antonon; Antono estas puŝANTA Johanon kaj Johano estas puŝANTA la veturilon. De DEKSTE MALDEKSTREN- la veturilo estas puŝATA de Johano; Johano estas puŝATA de Antono kaj Antono estas puŝATA de Stefano. Stefano, Antono kaj Johano estas la AGANTOJ, ĉar ili puŝas; tial la PARTICIPO estas AKTIVA kaj finiĝas per 'ANTA'. Kontraŭe- la veturilo, Johano kaj Antono ricevas la

agon, ĉar ili estas puŝataj; ili tial estas la AGATOJ, kaj la PARTICIPO tial estas PASIVA kaj finiĝas per 'ATA'. Ĉu vi bone komprenas, Karlo, kion mi klarigis al vi, aŭ ne?"

KARLO:- "Mi bedaŭras, Sinjoro Instruanto. Mi timas ke mi ne tute bone komprenas, sed mi pripensos pri kio vi parolis al mi."


INSTRUANTO:- "TRE BONE, KARLO, PRIPENSU, KAJ MORGAŬ VI RESPONDOS LA DEMANDON. NU, BONAN TAGON, KARLO! MI VIDOS VIN MORGAŬ MATENE."

KARLO:- "TRE BONE, SINJORO INSTRUANTO. BONAN TAGON."

PARTICIPOJ·ANTA·ATA.



LA VIRO ESTAS KONDUKANTA LA ĈEVALON. LA ĈEVALO ESTAS KONDUKATA DE LA VIRO.



LA KNABO ESTAS PAFANTA LA BIRDON. LA BIRDO ESTAS PAFATA DE LA KNABO.



LA KATO ESTAS KAPTANTA LA MUSON. LA MUSO ESTAS KAPTATA DE LA KATO.



LA SUNO ESTAS LUMIGANTA LA TERON. LA TERO ESTAS LUMIGATA DE LA SUNO.



LA KNABO ESTAS ROMPANTA LA VITROJN. LA VITROJ ESTAS ROMPATAJ DE LA KNABO.



LA VIRO ESTAS BRULIGANTA LA LETERON. LA LETERO ESTAS BRULIGATA DE LA VIRO. (DE LA FAJRO).

PARTICIPOJ.

ESTONTA TEMPO EN ESTANTA.



ESTAS ONTA. OTA.

POR ESPRIMI AGON, KIU BALDAŬ OKAZOS, SED ANKORAŬ NE KOMENCIĜIS.

ESTANTA TEMPO EN ESTANTA.



ESTAS ANTA. ATA.

POR ESPRIMI AGON, KIU OKAZAS NUN, KAJ ANKORAŬ NE FINIĜIS.

ESTINTA TEMPO EN ESTANTA.



ESTAS INTA. ITA.

POR ESPRIMI AGON, KIU JAM NE OKAZAS, KIU JAM ANTAŬ NUN FINIĜIS.

ESTONTA TEMPO EN ESTINTA.




AKTIVA.

HIERAŬ, KIAM MI ALVENIS LA BARBIREJON, LA BARBIRO ESTIS RAZONTA SINJORON BRUNON.

PASIVA.

HIERAŬ, KIAM MI ALVENIS LA BARBIREJON, SINJORO BRUNO ESTIS RAZOTA DE LA BARBIRO.

ESTANTA TEMPO EN ESTINTA.



AKTIVA.


HIERAŬ, KIAM MI ALVENIS LA BARBIREJON, LA BARBIRO ESTIS RAZANTA SINJORON BRUNON.

PASIVA.

HIERAŬ, KIAM MI ALVENIS LA BARBIREJON, SINJORO BRUNO ESTIS RAZATA DE LA BARBIRO.



ESTINTA TEMPO EN ESTINTA.



AKTIVA.


HIERAŬ, KIAM MI ALVENIS LA BARBIREJON, LA BARBIRO ESTIS RAZINTA SINJORON BRUNON.

PASIVA.

HIERAŬ, KIAM MI ALVENIS LA BARBIREJON, SINJORO BRUNO ESTIS RAZITA DE LA BARBIRO.



ESTONTA TEMPO EN ESTONTA



AKTIVA.


NE VENU AL LA BARBIREJO, MORGAŬ, JE LA TRIA HORO, ĈAR JE TIU HORO, LA BARBIRO ESTOS RAZONTA MIN.

PASIVA

NE VENU AL LA BARBIREJO, MORGAŬ JE LA TRIA HORO, ĈAR JE LA TRIA HORO, MI ESTOS RAZOTA DE LA BARBIRO.



ESTANTA TEMPO EN ESTONTA.




AKTIVA.

NE VENU AL LA BARBIREJO, MORGAŬ, JE KVIN MINUTOJ POST LA TRIA, ĈAR JE TIU HORO LA BARBIRO ESTOS RAZANTA MIN.

PASIVA.

NE VENU AL LA BARBIREJO, MORGAŬ, JE KVIN MINUTOJ POST LA TRIA, ĈAR JE TIU HORO MI ESTOS RAZATA DE LA BARBIRO.

ESTINTA TEMPO EN ESTONTA.



AKTIVA.

SED, SE VI VENOS AL LA BARBIREJO, MORGAŬ, JE DEK MINUTOJ POST LA TRIA, LA BARBIRO JAM ESTOS RAZINTA MIN.

PASIVA.

SED, SE VI VENOS AL LA BARBIREJO, MORGAŬ, JE DEK MINUTOJ POST LA TRIA, MI JAM ESTOS RAZITA DE LA BARBIRO.

ESTUS -ONTA -ANTA -INTA / -OTA -ATA -ITA.

ESTONTA KONDIĈA MODO.

AKTIVA.	PASIVA.
SE MI ESTUS RAZONTA VIN, MI ESTUS LA RAZONTO.	SE MI ESTUS RAZOTA DE VI, MI ESTUS LA RAZOTO.
ESTUS-ONTA.	ESTUS-OTA.

ESTANTA KONDIĈA MODO.

AKTIVA.	PASIVA.
SE MI ESTUS RAZANTA VIN, MI ESTUS LA RAZANTO.	SE MI ESTUS RAZATA DE VI, MI ESTUS LA RAZATO.
ESTUS-ANTA.	ESTUS-ATA.

ESTINTA KONDIĈA MODO.

AKTIVA.	PASIVA.
SE MI ESTUS RAZINTA VIN, MI ESTUS LA RAZINTO.	SE MI ESTUS RAZITA DE VI, MI ESTUS LA RAZITO.
ESTUS-INTA.	ESTUS-ITA.

REVUO.

AKTIVAJ.

Mi estas skribonta leteron.
Mi estos skribonta leteron.
Mi estis skribonta leteron.
Mi estus skribonta leteron.

PASIVAJ.

La letero estas skribota.
La letero estos skribota.
La letero estis skribota.
La letero estus skribota.

SKRIBONTA.



SKRIBOTA.

AKTIVAJ.
Mi estas skribanta leteron.
Mi estos skribanta leteron.
Mi estis skribanta leteron.
Mi estus skribanta leteron.
PASIVAJ.
La letero estas skribata.
La letero estos skribata.
La letero estis skribata.
La letero estus skribata.

SKRIBANTA.



SKRIBATA.

AKTIVAJ.
Mi estas skribinta leteron.
Mi estos skribinta leteron.
Mi estis skribinta leteron.
Mi estus skribinta leteron.
PASIVA.
La letero estas skribita.
La letero estos skribita.
La letero estis skribita.
La letero estus skribita.

SKRIBINTA.



SKRIBITA.



ĈI TIO OKAZIS HIERAŬ.

Hieraŭ, kiam la barbiro estis razONTA Sinjoron Brunon, li jam estis trinkINTA unu glason da vino kaj la dua estis trinkATA.





Dum li estis razANTA Sinjoron Brunon, du glasoj da vino JAM estis trinkitaj kaj li estis trinkONTA la trian.





Kaj kiam li estis razINTA Sinjoron Brunon, tri glasoj da vino jam estis trinkITAJ; li estis trinkANTA la kvaran, KAJ LA KVINA ESTIS TRINKOTA TUJ POST LA KVARA.

LA FEINO.



Unu vidvino havis du filinojn. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povas trovi.



Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj labori sen-ĉese. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen plenan grandan kruĉon.



En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki. "Tre volonte, mia bona," diris la bela knabino. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam sub-tenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune. Kiam la bona virino trankviligis sian soifon, ŝi diris al la knabino:



"Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel

honesta, ke mi devas fari al vi donacon" (ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino). "Mi faros al vi donacon," daŭrigis la feino, "ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono."



Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. "Pardonu al mi, patrino," diris la malfeliĉa knabino, "ke mi restis tiel longe". Kaj



kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj. "Kion mi vidas!" diris ŝia patrino kun grandega miro." Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj! De kio tio ĉi venas, mia filino?" (Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino.) La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj. "Se estas tiel," diris la patrino, mi devas tien sendi mian filinon. Marinjo, rigardu, kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi tian saman kapablon? Vi devas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile."

"Estus tre bele," respondis la filino malĝentile, "ke mi iru al la fonto!"—"Mi volas ke vi tien iru," diris la patrino, kaj iru tuj!" La filino iris, sed ĉiam murmurante. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo.



Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki (tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino). "Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, "por doni al vi trinki? Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por tio, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki."—"Vi tute ne estas ĝentila," diris la feino sen kolero. "Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano."



Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?" -- "Jes, patrino", respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon.--"Ho, ĉielo!" ekkriis la patrino, "kion mi vidas? Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi!" Kaj ŝi



tuj kuris bati ŝin. La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro.



La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj, vidante, ke ŝi estas tiel bela,



li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras. -- "Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo". --La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas. -- Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron. -- La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi. -- Sed pri ŝia fratino ni



povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro. (Fino.)



PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

1) **Artikolo** nedifinita ne ekzistas; **ekzistas** nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj **seksoj,** kazoj kaj nombroj.

Rimarko. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

2) La **substantivoj** havas la finiĝon **o.** Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon J. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo N. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per DE, la dativo per AL, la ablativo per PER aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

3) La **adjektivo** finiĝas per **a.** Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto PLI, la superlativo per **plej;** ĉe la komparativo oni uzas la konjunkcion **ol.**

4) La **numeraloj** fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: **unu, du, tri, kvar, kvin,** ses, **sep, ok, naŭ, dek, cent, mil.** La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo; por la multoblaj — la sufikson **obl,** por la nombronaj — **on,** por la kolektaj — **op,** por la disdividaj — **po.** Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj.

5) **Pronomoj** personaj: **mi, vi, li, ŝi, ĝi** (pri objekto aŭ besto), **si, ni, vi, ili, oni;** la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.

6) La **verbo** ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon **-as;** la tempo estinta **-is;** la tempo estonta **-os;** la modo kondiĉa **-us;** la modo ordona **-u;** la modo sendifina -i. Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba): aktiva estanta **-ant;** aktiva estinta **-int;** aktiva estonta **-ont;** pasiva estanta -at; pasiva estinta **-it;** pasiva estonta **-ot.** Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo esti kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas **de.**

7) La **adverboj** finiĝas per **e;** gradoj de komparado kiel ĉe la adjektivoj.

8) **Ĉiuj prepozicioj** postulas la nominativon.

9) Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

10) La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

11) Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

12) Ĉe alia nea vorto la vorto **ne** estas forlasata.


13) Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

14) Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion **je,** kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio **je,** oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

15) La tiel nomataj vortoj **fremdaj,** t.e. tiuj, kiujn la plimulto de lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

16) La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata de apostrofo.

FROMAĜO. KREDI.



FROMAĜO estas manĝaĵo farita el lakto. Se mi diras, ke mi havas dolaron en mia poŝo, vi tion povas aŭ KREDI aŭ ne, ĉar tio povas esti vero; sed se mi diras al vi, ke la luno estas farita el verda FROMAĜO, vi tion certe ne povas KREDI, ĉar vi bone scias, ke tio ne estas vero.

KREI. DIO. MONDO. EKZISTI.


DIO ESTAS KREANTA ADAMON

DIO estas tiu, kiu KREIS la tutan MONDON.

La vorto "KREI" signifas- fari ion el nenio, fari ion, kio ankoraŭ ne EKZISTIS antaŭe.

MONDO. UNIVERSO. EKZISTI.



La MONDO aŭ la UNIVERSO estas la tutaĵo de tio, kio EKZISTAS. Ekzemple:- la SUNO, LUNO STELOJ, TERO, HOMOJ, BESTOJ, BIRDOJ, FIŜOJ, kaj tiel plu.

TEMPLO.



TEMPLO estas loko aŭ konstruaĵo en kiu homoj, kiuj KREDAS en la EKZISTO de DIO, preĝas kaj OFERDONAS al li.

OFERI. DONACI.



OFERI aŭ DONACI signifas- doni ion al iu senmono. Jen Abrahamo volas OFERI sian filon, Izaakon, al DIO.

ALTARO. ANĜELO. DIABLO.


1

1. ALTARO ESTAS TABLO AŬ KONSTRUAĴO, EN LA TEMPLO, SUR KIU ESTAS FARATAJ LA RELIGIAJ OFEROJ. LA DISERVO, KTP.
2. ANĜELO, BONA ĈIELA SPIRITO.
3. DIABLO, MALBONA SPIRITO DE LA INFERO.



2 3


NE VIDU MALBONON.


NE AŬDU MALBONON.


NE PAROLU MALBONON.

TONO. MELODIO.




NAJTINGALO. PASERO.

La kanto de PASERO estas nur unu TONO- pip, pip, pip, sed la kanto de NAJTINGALO estas tuta MELODIO konsistanta el multaj DIVERSAJ TONOJ.





LA UZADO DE LA SUFIKSO "EC".



Hodiaŭ, Karlo, mi klarigos al vi la sufikson "EC" Bildo (1) montras pecon da glacio. Bildo (2) montras kiel la glacio fluidiĝas, kiam ĝi estas varmigita, kaj fariĝas akvo. Bildo (3) montras poton da akvo. Bildo (4) montras kiel la akvo vaporiĝas, kiam ĝi estas varmigita, kaj fariĝas vaporo aŭ gaso.

LA ECOJ do, aŭ KVALITOJ de AKVO estas, ke tiu SOLIDIĜAS de malvarmo kaj fariĝas GLACIO; kaj, VAPORIĜAS de varmo kaj fariĝas VAPORO aŭ GASO.

Nun rigardu kiel la sufikso "EC" estas uzita.

VARMECO VAPORIGAS AKVON. MALVARMECO SOLIDIGAS AKVON. LA SOLIDECO DE GLACIO ESTAS KAŬZITA DE MALVARMECO; KAJ LA GASECO DE VAPORO ESTAS KAŬZITA DE VARMECO. KONTENTECO ESTAS PLI BONA OL RIĈECO. ĈU VI NE AŬDIS PRI LA HEROECO DE LINDBERGH, LERTECO DE EDISON, KAJ SAĜECO DE LA REĜO SALOMONO? BELECO, BONECO, AMIKECO.

ATENDI. SOLA. LASI. TRO.



PATRINO:- ATENDU ĉi tie, Karlo, ĝis mi revenos.

KARLO:- Bone, patrino, sed ne forestu TRO longe, ĉar mi timas resti ĉi tie tute SOLA.

PATRINO:- Ne timu, Karlo, mi ne LASOS vin ATENDI TRO longe, nur unu minuteton.

ONI.



La vorto "ONI" estas OFTE uzata anstataŭ la vorto "ILI". Ekzemple:- ONI DIRAS, KE LA PLEJ BONA MENSOGO ESTAS LA VERO. LA DOMO, EN KIU ONI LERNAS, ESTAS LERNEJO, KAJ LA DOMO, EN KIU ONI PREĜAS, ESTAS PREĜEJO.. ONI ne ELVERŜAS la malpuran akvon ĝis ONI havas puran.

BRUTO. HEJMO.

BRUTOJ estas HEJMAJ kvarpiedaj bestoj.



BOVO. PORKO. ŜAFO. KAPRO. ĈEVALO.

KELKAJ METALOJ.



1 ORO. 2 ARĜENTO. 3 NIKELO.

(1) ORO estas flava kaj brila metalo. La Amerika kvin-dolar-monero estas farita el ORO.

(2) ARĜENTO estas blanka kaj brila metalo. La Amerika unu-dolar-monero estas farita el ARĜENTO.

(3) NIKELO estas blanka metalo SIMILA al arĝento. La Amerika kvin-cend-monero estas farita el NIKELO.



4 KUPRO. 5 HIDRARGO. 6 PLUMBO.

(4) KUPRO estas brune-ruĝa metalo. La Amerika unu-cend-monero estas farita el KUPRO.

(5) HIDRARGO estas blanka, brila kaj fluida metalo de arĝenta koloro. La metala fluido en termometroj estas HIDRARGO.

(6) PLUMBO estas bluete-griza kaj tre peza metalo. Kugloj aŭ plumbaĵoj estas faritaj el PLUMBO.




7 ZINKO. 8 LATUNO. 9 STANO.

(7) ZINKO estas bluete-blanka metalo. La metala bastoneto en baterioj estas farita el ZINKO.

(8) LATUNO estas flava metalo konsistanta el kupro kaj zinko. Trumpetoj estas faritaj el LATUNO.

(9) STANO estas arĝente-blanka metalo. La metala folieto, kiu ĉirkaŭas ĉokoladon estas farita el STANO.



10 FERO. 11 ŜTALO. 12 ALUMINIO.

(10) FERO estas grize-nigra metalo. Reloj estas faritaj el fero.

(11) ŜTALO estas metalo konsistanta el purigita fero. Raziloj estas faritaj el ŜTALO.

(12) ALUMINIO estas blue-blanka, tre malpeza metalo havanta multajn uzojn. Ekzemple por fari vazojn, kuirilojn kaj tiel plu.

LIGNO, FOSFORO, DETRUI, REZULTO. FROTI, PARTO, CINDRO, RESTI, ŜANĜI.

Alumeto konsistas el du PARTOJ. Nome.- La LIGNA bastoneto kaj FOSFORA kapeto. Kiam oni EKFROTAS (ek-froti) la FOSFORAN kapeton, tiu ekbruliĝas, kaj la fajro, la REZULTO de la brulo, ekbruligas la LIGNAN bastoneton. La FLAMO (fajro) DETRUAS la ECOJN de la FOSFORO kaj la LIGNO, ĉar tiuj dum la brulo ŜANĜIĜAS en CINDRON. En aliaj vortoj- la FOSFORA kapeto ne plu estas FOSFORO, kaj la LIGNA bastoneto ne plu estas LIGNO, ĉar post la forbrulo RESTAS nur CINDRO. La CINDRO do estas la REZULTO de la forbrulita alumeto. Ĉu vi bone komprenas la signifojn de la vortoj:- LIGNO, FOSFORO, ONI, FROTI, DETRUI, ECO, ŜANĜI, CINDRO, RESTI, REZULTO, PARTO?

LIGNA BASTONETO. FOSFORA KAPETO.
ALUMETO.
FROTAS LA FOSFORAN KAPETON.
LA FOSFORA KAPETO EKBRULIĜAS.
LA FAJRO EKBRULIGAS LA LIGNAN BASTONETON.
LIGNO. FAJRO. CINDRO.
REZULTO DE FORBRULIGITA ALUMETO.
CINDRO.



APARTA. AKORDO. HARMONIO.

En la bildo (1) ĉiu SONO estas APARTA, kaj estas ludata unu post la alia. La bildo (2) montras AKORDOJN. AKORDOJ estas kelke da SONOJ ludataj en la sama tempo. Se la SONOJ, APARTAJ aŭ AKORDOJ, estas agrablaj por la oreloj, ni havas HARMONIAN MELODION.

1


2


KONSTRUI. PRETA. MANKI.

Laboristoj estas KONSTRUANTAJ domon. La KONSTRUAĴO ankoraŭ ne estas PRETA, ĉar, kiel vi vidas en la bildo, tri el la fenestroj MANKAS.



PETI.

Ĉi tiu malriĉa viro estas PETANTA almozojn. La virino ĉe la pordo estas donanta al li pecon da pano.




KUTIMO.

Fumi cigaredojn same kiel drinki ebriigajn drinkaĵojn estas malbona KUTIMO.
1. Stefano KUTIME ĉiam tenas sian pipon en la buŝo, alie li ne povas labori.
2. Petro, laŭ KUTIMO, trinkas glason da vino antaŭ ol li enlitiĝas, alie li ne povas EKdormi.



OBJEKTO. OKUPI. EGALA.



OBJEKTO estas ĉio, kio estas VIDEBLA, aŭ ĉio, kio OKUPADAS lokon, tute EGALE ĉu tio estas sablero aŭ granda monto. Ĉiu SUBSTANTIVO estas OBJEKTO. Jen estas kelkaj OBJEKTOJ.

CIGNO. GLUTI.

CIGNO estas granda, blanka birdo, kun tre longa kolo. Rigardu, kiel la birdo ENGLUTADAS tutan pomon!



PERSONO. INDIVIDUO.

Ĉiu homo estas PERSONO aŭ INDIVIDUO. Ekzemple:- vi povas diri;- HOMO ESTAS ENIRANTA LA DOMON, aŭ PERSONO ESTAS ENIRANTA LA DOMON, aŭ tiel same;- INDIVIDUO ESTAS ENIRANTA LA DOMON.

TUŜI. TUKO.

Ne TUŜU viajn okulojn per viaj malpuraj manoj. Jen estas pura NAZTUKO.



TREMI. KORPO.

La knabo TREMAS per sia tuta KORPO, ĉar li timas la bojantan hundon.



VERŜI.

Petro VERŜAS vinon el botelo en glasetojn.
Karlo ELVERŜIS la inkon sur la tablo.



SALUTI. RENKONTI.

Petro jam de longe ne vidis Marion, sed jen li RENKONTAS ŝin en la strato, kaj la PARO ĝojege SALUTAS unu la alian.



FACILA.

La jena homo estas tiel forta, ke li FACILE levas kvin-cent KILOGRAMOJN per unu mano. Por ordinara homo tio estas ne nur MALFACILAĴO, sed tuta neeblaĵo.



KURACI. MEDICINO. RIMEDO

KURACISTO ESTAS DOKTORO DE MEDICINO. KURACISTO KURACAS MALSANULOJN. JEN LA KURACISTO ESTAS PREPARANTA MEDIKAMENTON POR LA MALSANULO. MEDIKAMENTO ESTAS KURACILO AŬ RIMEDO POR RESANIGI MALSANULOJN.



OKUPI. RESTI.

La tuta tablo estas OKUPATA de libroj, kaj eĉ loketo ne RESTAS kien starigi la glason da teo.



SONĜI.

MARIO FORTE DORMAS, KAJ DUM LA DORMO ŜI SONĜAS PRI SIA AMO AL PETRO, KUN KIU ŜI ESTAS IRANTA AL LA ALTARO.



ĈESI.

Johano KUTIME trinkas glason da vino ĉiu-matene, sed ĉi tiun matenon, KVANKAM li jam eltrinkis du botelojn da vino, li TAMEN ne ĈESAS trinki, ĉar jen la kelnero jam alportas al li la trian botelon.



PROVI. SUKCESI. PENI.

La unuan fojon, kiam Karlo PROVIS levi la pezan ŝtonon, li ne SUKCESIS. Sed la duan fojon Karlo PENIS per sia tuta forto, kaj kiel vi vidas, la PROVO estis SUKCESA.



DIVENI. SEKRETO. PROFETO.
PROVI. PROMESI. NU.


KARLO,- Ĉu vi povas DIVENI, kion mi havas en mia mano?
LUDOVIKO,- Ne, Mi ja ne estas PROFETO. Ĉu vi ne malkaŝos tion al mi?
KARLO,- Ne, tion mi ne povas, ĉar tio estas SEKRETO, sed se vi DIVENOS, mi PROMESAS doni la OBJEKTON al vi.
LUDOVIKO,- Ĉu vi vere PROMESAS tion?
KARLO,- Jes, honeste.
LUDOVIKO,- Nu bone. Mi PROVOS DIVENI la SEKRETON. Ĉu tio estas nukso?
KARLO,- Jes. Vi bone DIVENIS. La nukso estas via, kiel mi PROMESIS Jen.





SAMA. DIFERENCI. ERARI.

KARLO,- Ĉu vi vidis mian novan krajonon?
LUDOVIKO,- Tio tute ne estas nova krajono, ĉar vi montris al mi la saman krajonon hieraŭ.
KARLO,- Ne, Ludoviko, vi tute ERARAS. Ĉi tiu krajono ne estas la SAMA, kiun mi montris al vi hieraŭ. Ĝi estas tute alia, kaj ĝi DIFERENCAS de la hieraŭa en tio, ke tiu estis blua kaj ĉi tiu estas ruĝa.



ŜAJNI.

Petro:- "ŜAJNAS, ke baldaŭ ni havos ekpluvegon, ĉar la tuta ĉielo estas kovrita per DENSAJ nuboj."
JOHANO:- "ŜAJNAS? Mi estas certa pri tio. Jen rigardu, jam fulmas kaj tondras."



SOLA. ATINGI.

La SOLA celo de la nun fama Lindbergh estis Parizo, kaj li ne restis ĝis li ATINGIS sian celon.



CINDRULINO.



ESTIS FOJE TRE BELA KNABINO, KIU HAVIS TRE MALBONAN DUONPATRINON KAJ DU FIERAJN DUONFRATINOJN. LA DUONPATRINO DEVIGIS LA KNABINON LABORI EN LA KUIREJO, PURIGI LA ŜTUPAROJN, HEJTI LA KAMENON KAJ CETERAJN HUMILAJN LABOROJN. ŜIA RIPOZLOKO ESTIS EN ANGULO DE LA KAMENO APUD LA CINDROJ, KAJ PRO TIO ONI NOMIS ŜIN CINDRULINO



OKAZIS, KE LA PRINCO DONIS TRITAGAN BALON, KAJ LA DU DUONFRATINOJ DE CINDRULINO ESTIS INVITITAJ. MEMKOMPRENEBLE, KE TIO TRE OKUPIS ILIN.



SED TIO ANKAŬ PLIMULTIGIS LA LABOROJN DE CINDRULINO, ĈAR ŜI DEVIS LAVI KAJ GLADI ILIAN TOLAĴON, KOMBI KAJ FRIZI ILIAJN HAROJN, KAJ HELPI ILIN PLIBELIGI ILIAJN VIZAĜOJN.



FINE, KIAM LA DU FRATINOJ FORIRIS, CINDRULINO SIDIĜIS APUD LA KAMENO KAJ EKPLORIS.

SUBITE ŜI EKAŬDIS DOLĈAN VOĈON, KIU DEMANDIS: "KIAL VI PLORAS, CINDRULINO? ĈU VI VOLAS IRI AL LA BALO?"



LA KNABINO TURNIS LA KAPON, KAJ JEN ŜI EKVIDIS MALJUNAN VIRINETON KUN PINTA ĈAPETO SUR LA KAPO KAJ VERGO EN LA MANO. LA VIRINETO ESTIS FEINO.



"JES." LA KNABINO RESPONDIS," SED MI NE HAVAS BELAJN VESTOJN."

"BONE," DIRIS LA FEINO, "VI IROS, SED ANTAŬE, IRU KAJ ALPORTU AL MI KUKURBON."



CINDRULINO OBEIS KAJ TUJ KURIS EN LA ĜARDENON, KAJ TROVIS LA PLEJ GRANDAN KUKURBON KAJ ALPORTIS ĜIN AL LA FEINO



LA FEINO TUŜIS LA KUKURBON PER SIA VERGO KAJ ĜI TUJ TRANSFORMIĜIS EN BELAN ORAN KALEŜON.

"NUN," LA FEINO DIRIS, "VI TROVOS SUB LA ŜTUPARO MUSKAPTILON KUN SES MUSOJ, ALPORTU ILIN AL MI." LA KNABINO RAPIDE KURIS



KAJ KAPTIS LA MUSOJN. ŜI ALPORTIS ILIN AL LA FEINO KAJ LA FEINO TUJ



ALIFORMIGIS ILIN EN SES BELAJN, BLANKAJN ĈEVALOJN.

"NUN, CINDRULINO, NI BEZONAS KOĈERON, ĈU NE? IRU DO EN LA KELON, EBLE VI TROVOS RATON EN LA RATKAPTILO."



CINDRULINO NE HEZITIS MOMENTON KAJ TUJ TROVIS LA RATON.




LA FEINO NUR TUŜIS LA RATON PER LA VERGO KAJ ĜI FARIĜIS KOĈERO.

"NUN," DAŬRIGIS LA FEINO, "IRU EN LA ĜARDENON KAJ RIGARDU SUB LA ŜPRUCIGILO. VI TROVOS TIE SES LACERTOJN. ALPORTU ILIN AL MI.



CINDRULINO TUJ KURIS TIEN KAJ TROVIS LA LACERTOJN. ŜI ALPORTIS ILIN AL LA FEINO.



LA FEINO NUR TUŜIS ILIN PER LA VERGO KAJ ILI TUJ TRANSFORMIĜIS KAJ FARIĜIS LAKEOJ.



"NU, ĈU VI ESTAS KONTENTA?" LA FEINO DEMANDIS. "JES," CINDRULINO RESPONDIS MALGAJE, "SED MI NE HAVAS BELAJN VESTOJN."

SED EN TIU MOMENTO



LA FEINO TUŜIS LA KNABINON PER LA VERGO, KAJ SAMTEMPE ŜIAJ MALBELAJ VESTOJ ŜANĜIĜIS EN LA PLEJ MIRINDAJN SILKAJN VESTOJN PLEKTITAJN PER ORAJ KAJ ARĜENTAJ FADENOJ KAJ ORNAMITAJ PER MULTVALORAJ DIAMANTOJ KAJ BRILIANTOJ. KAJ SUR ŜIAJ PIEDOJ TROVIĜIS LA PLEJ BELEGAJ VITRAJ ŜUETOJ, KIUJN IU IAM VIDIS.



"NU ENIRU!" LA FEINO DIRIS, "SED MEMORU, FILINETO, KE VI NEPRE DEVAS FORLASI LA BALON ANTAŬ NOKTOMEZO, ALIE LA KALEŜO DENOVE FARIĜOS KUKURBO, LA ĈEVALOJ FARIĜOS MUSOJ, LA LAKEOJ REE TURNIĜOS EN LACERTOJN, TIU BELA KOĈERO IĜOS RATO, KAJ VIAJ SILKAJ VESTOJ- NUR CIFONOJ."



CINDRULINO PROMESIS OBEI, ENIRIS LA KALEŜON KAJ FORVETURIS, KIEL VERA PRINCINO.



KIAM ŜI ALVENIS AL LA BALO ĈIUJ KREDIS, KE ŜI ESTAS GRANDA PRINCINO. LA PRINCO MEM KURIS ŜIN AKCEPTI.



LI DANCIS NUR KUN ŜI

LA TUTAN VESPERON KAJ ĈIUJ ADMIRIS ŜIAN BELECON KAJ ŜIAJN BELAJN SILKAJN VESTOJN.



SED SUBITE CINDRULINO EKAŬDIS LA SONON DE LA HORLOĜO. JAM ESTIS TRI KVARONOJ DE LA DEKDUA. KAJ ŜI RAPIDE ELIRIS KAJ FORVETURIS.



KIAM ŜI VENIS HEJMEN, ŜI RAKONTIS AL LA FEINO ĈION, KIO OKAZIS KAJ ŜI ESPRIMIS LA DEZIRON IRI AL LA BALO LA SEKVONTAN VESPERON. LA FEINO PROMESIS AL ŜI TION.



LA DUAN VESPERON CINDRULINO ESTIS VESTITA PLI BELE OL LA UNUAN FOJON, KAJ LA PRINCO RESTIS KUN ŜI LA TUTAN VESPERON, KAJ SAME, KIEL ANTAŬE, ŜI RAPIDE FORKURIS ANTAŬ OL LA HORLOĜO SONORIS LA MEZNOKTON.



JE LA TRIA TAGO DE LA BALO CINDRULINO ESTIS VESTITA LA PLEJ BELE. LA PRINCO NE FORLASIS ŜIN EĈ MOMENTON, KAJ KIAM ILI DANCIS, ĈIUJ ĈESIS KAJ NUR ADMIRIS LA BELAN PARON.

CINDRULINO ESTIS TIEL RAVITA, KE ŜI TUTE FORGESIS SIAN PROMESON AL LA FEINO. ŜI EKMEMORIS TION NUR TIAM, KIAM ŜI EKAŬDIS LA SONORON DE NOKTOMEZO. ŜI RAPIDE FORKURIS, SED



EN ŜIA RAPIDIĜO ŜI PERDIS UNU EL ŜIAJ VITRAJ ŜUETOJ. LA PRINCO ŜIN POST-SEKVIS KAJ LEVIS LA PERDITAN ŜUETON.



SED SUBITE LA BELA PRINCINO MALAPERIS. LA PRINCO NUR TROVIS GRANDAN KUKURBON, KELKAJN MUSOJN, LACERTOJN KAJ KNABINON ĈIFONE VESTITAN.

LA SEKVANTAN MATENON LA PRINCO PUBLIKIGIS PER GRANDAJ AFIŜOJ, KE LI EDZIĜOS KUN TIU, KIES PIEDO ALMEZUROS LA VITRAN ŜUETON. LA SENDITOJ DE LA PRINCO PROVIS ĜIN SUR LA PIEDOJ DE PRINCINOJ KAJ ĈIUJ FRAŬLINOJ DE LA KORTO, SED VANE. LA SENDITOJ TIAM IRIS DE DOMO AL DOMO POR PROVI LA PIEDOJN DE ĈIU FRAŬLINO.



KAJ JEN LA SENDITO ENIRIS LA DOMON DE CINDRULINO. LA DU DUONFRATINOJ PROVIS SED SEN SUKCESO. CINDRULINO TIAM PETIS, KE LA SENDITO LASU ŜIN PROVI. LA DUONFRATINOJ EKRIDIS KAJ MOKIS ŜIN. TAMEN LA SENDITO SIDIGIS ŜIN, KAJ AL ILIA SURPRIZO LA PIEDO DE CINDRULINO FACILE ENGLITIS EN LA ŜUETON.



CINDRULINO EKRIDIS KAJ ELTIRIS EL SIA POŜO LA DUAN ŜUETON KAJ METIS ĜIN SUR LA DUA PIEDO. ŜIAJ DUONFRATINOJ PRESKAŬ SVENIS DE SURPRIZO, KIAM ILI REKONIS EN ŜI LA BELAN PRINCINON DE LA BALO. ILI SIN ĴETIS AL ŜIAJ PIEDOJ KAJ PETIS ŜIAN PARDONON.



EN TIU MOMENTO APERIS LA VIRINETO KUN LA PINTA ĈAPETO KAJ TUŜIS CINDRULINON PER SIA VERGETO, KAJ TUJ ŜIAJ ĈIFONOJ IĜIS LA PLEJ BELAJ VESTOJ.



LA SENDITO DE LA PRINCO TIAM FORKONDUKIS CINDRULINON AL LA KORTO KAJ LA PRINCO EDZIĜIS KUN ŜI EN GRANDA KORTEGA POMPO.

AKTORO. TEATRO. DESTINI. ĈEFA. ROLO.



Jen estas du fratoj. Ili ambaŭ estas AKTOROJ en la sama TEATRO. Unu ludas la ĈEFAN ROLON, ĉar li estas granda ARTISTO. La DESTINO de la dua jam estas tute alia, ĉar li ludas nur la plej malgrandajn ROLOJN.

VOĈO. ŜATI. TEDA. OSCEDI.



Fraŭlino X posedas tre malagrablan VOĈON, tamen, ŝi ĉiam ŜATAS kantadi. Jen ŝi jam delonge TEDAS kaj lacigas la aŭdantojn. Unu persono eĉ OSCEDAS antaŭ ŝia nazo, tamen ŝi daŭrigas kanti.

VERKI.



Jen estas la fama VERKISTO Tolstoj, kiu VERKIS la VERKON "Ana Karenina" konata tra la tuta mondo, ĉar estas dubo, oni povas diri, ĉu troviĝas iu persono, kiu ne legis tiun verkon.

ZORGI.



Ne nur la homo, sed ĉiuj bestoj, brutoj, birdoj kaj ĉiuj aliaj vivaĵoj ZORGAS pri siaj idoj. Jen rigardu la kokinon kun ĝiaj kokidetoj.

BARI.



La granda ŝtono BARAS la vojon de la fluanta akvo en la rivereto.



SENDI.

Petro ricevas leteron kun mono, kiun lia frato el Ameriko SENDIS al li.

— LA HUNDETO "BIMBI." —


POSEDI. PROPRA. NAJBARO. PAGI.
KOMUNA. INTERNA. KAŬZO. EGALE.
KONSCIO. EKSCITI. PEREI. AĈETI.
LOĜI. SAVI. OKAZI. LAŬTE. MOTIVO.



Petro POSEDAS sian PROPRAN dometon, kaj Johano ankaŭ POSEDAS sian PROPRAN dometon. Ĉar la du dometoj staras unu apud la alia, la du POSEDANTOJ, Petro kaj Johano, estas NAJBAROJ.



Jen estas hundeto, kies nomo estas BIMBI. Bimbi estas la KOMUNA POSEDAĴO de la du amikoj, la NAJBAROJ Petro kaj Johano, ĉar ili ambaŭ KOMUNE AĈETIS la hundeton Bimbi, kaj PAGIS por ĝi dek dolarojn.



Ĉar la hundeto Bimbi estis KOMUNA POSEDAĴO, tio estas- ĉar ĝi apartenis EGALE al ĉiu el la du NAJBAROJ, Bimbi havis du LOĜEJOJN. Unu tagon ĝi LOĜIS en la dometo de Petro, kaj la duan tagon ĝi LOĜIS en la dometo de Johano.



OKAZIS, ke unu nokton, dum la du NAJBAROJ dormis en siaj litoj, ĉiu en sia PROPRA dometo, la hundeto, Bimbi, en la dometo de Petro ekbojis tiel LAŬTE, ke Petro vekiĝis. "Kio OKAZIS?" li demandis la hundeton. Sed Bimbi ne ĉesis salti kaj boji, ĝis Petro ellitiĝis kaj sekvis la hundon, kiu tiris lin al la pordo.



Kiam Petro malfermis la pordon, li tuj ekvidis la MOTIVON (kaŭzon, kialon) de la EKSCITO de la hundo, ĉar la dometo de Johano estis tute en flamoj. Johano sin trovis INTERNE. Petro tuj sin ĵetis en la brulantan dometon por SAVI la vivon de lia amiko kaj NAJBARO Johano, kaj la hundeto Bimbi lin sekvis.




Jen ni vidas kiel la SENKONSCIA Johano estas elportata el la brulanta dometo, sed ho ve! La hundeto Bimbi jam ne povis sin SAVI, kaj li PEREIS kune kun la detruita dometo.

ALMENAŬ. GAJNI.



ALMOZULO:- "Se vi ne volas doni al mi dolaron, donu al mi ALMENAŬ unu cendon."

RIĈULO:- "Ne, Iru for! Mi ne donos al vi eĉ cendon, ĉar vi estas sufiĉe forta por labori kaj GAJNI vivrimedojn por vi mem."





DENSA. MALDENSA.



LA ĈIELO ESTAS KOVRITA PER DENSAJ NUBOJ.



DENSIGAS LA PASTON.



MALDENSIGAS LA PASTON.

LASI. MARŜI.



FORLASITA INFANETO



SOLDATOJ MARŜADAS TRA LA STRATO.

PLEZURO. ŜATI.



La PLEZURO de la unua viro estas MANĜI. Li ŜATAS manĝi. La PLEZURO de la dua viro estas LUDI KARTOJN. Li ŜATAS ludi kartojn. La PLEZURO de la tria viro estas MUZIKO. Li ŜATAS muzikon. La PLEZURO de la kvara viro estas MONO. Li ŜATAS monon.


KVANTO. KUBO. CENTIMETRO. GRAMO.



En la glaso sin trovas KVANTO da akvo. Se ni mezurus tiun KVANTON, ni trovus, ke la glaso enhavas ĝuste kvindek KUBAJN CENTIMETROJN.



En la sukerujo sin trovas KVANTO da sukero. Se ni mezurus tiun KVANTON, ni trovus, ke tie estas ĝuste kvindek gramoj.



En la sako sin trovas KVANTO da pomoj. Se ni nombrus la KVANTON, ni trovus, ke la sako enhavas ĝuste kvindek pomojn.

METODO.

La libro, kiun Karlo legas kun tia intereso, ne estas ia historio. Tio estas la plej nova METODO por lerni la Esperantan lingvon sen instruanto.



SKULPTI. MODELO. FIGURO.

Petro estas SKULPTISTO kaj Mario estas lia MODELO. En la bildo ni vidas, ke Petro estas SKULPTANTA la FIGURON de sia MODELO, Mario.



PAGI. VENDI. PROFITI.

Se Petro PAGIS por sia horloĝeto du dolarojn, kaj li VENDIS ĝin al Johano por tri dolaroj, li havas PROFITON de unu dolaro.



HALTAS. MAGAZENO. VENDI. SPECO.
AĈETI. SUFIĈA. BEZONI. NECESA.
OPINIO. PERFEKTA. ORDO. KVALITO.
KOSTI. TRO. EKZAMENI. VALORI.
PAGI. KARA. PREZO. KVITA.


Promenante la straton, Petro kaj Johano HALTAS ĉe la fenestro de VENDEJO (magazeno), kie oni VENDAS ĈIUSPECAJN horloĝojn kaj horloĝetojn.



"Mi AĈETUS horloĝeton se mi havus SUFIĈE da mono", diras Petro.

"Por kio vi BEZONAS horloĝeton?" Johano demandas.

"Por kio?— Horloĝeto estas NECESAĴO, kiun ĉiu persono BEZONAS en la nuna tempo", Petro respondas.



"Se vi tiel OPINIAS, mi VENDOS al vi mian horloĝeton. Ĉu vi ĝin volas AĈETI?"

"Jes. Se ĝi estas en PERFEKTA ordo, el bona KVALITO, kaj ne KOSTOS TRO multe."


"Jen, EKZAMENU ĝin". diras Johano, eltirante horloĝeton el sia poŝo, kaj montrante ĝin al Petro. "La VALORO de ĉi tiu horloĝeto" li daŭrigas "estas ne malpli ol dek dolaroj. Mi PAGIS por ĝi kvin dolarojn, sed ĉar vi estas mia amiko, mi ĝin VENDOS al vi tute MALKARE— nur tri dolarojn."



"Bone, via PREZO tute PLAĈAS al mi", diras Petro, "sed ĉar vi ŝuldas al mi du dolarojn, mi donos al vi unu dolaron, kaj ni estos KVITAJ".



STREĈI. ŜNURO.



MALSTREĈITA ŜNURO. | STREĈITA ŜNURO. | STREĈAS LA HORLOĜON.

MIRO. PLAĈI.




TAJLORO:- Ĉi tiu surtuto ĴUS estis finita. Ĉu ĝi PLAĈAS al vi?

SINJORO:- Jes, la surtuto treege PLAĈAS al mi. Ne estas MIRINDE; vi ja estas la plej bona tajloro en la urbo.

BUTONO. SIMPLA. ORNAMI.

La unua BUTONO estas SIMPLA (ordinara), sed la dua BUTONO jam ne estas SIMPLA, ĉar ĝi estas ORNAMITA per figuroj.



KVIETA. SURPRIZI. TERURA.
VULKANO. SPUTI. VANE. PEREI.



Dum meznokta KVIETO, la popolo de la malgranda urbeto X estis SURPRIZITAJ de TERURA TERTREMO. La VULKANO komencis fumi kaj SPUTI fajron kaj ŝtonojn. Ĉiuj elkuris el siaj dometoj, kaj pro teruro rapidis forkuri de la falintaj ŝtonoj, sed VANE, ĉar post kelkaj minutoj la tuta urbeto jam estis ENGLUTITA de flamoj. Ec ne unu persono savis sian vivon, kaj la tuta popolo PEREIS.

STRANGA. SPECO.



Jen estas STRANGA besteto. Ĝi apartenas al tute eksterordinara SPECO da bestoj, ĉar unue, ĝi havas nur unu okulon en la mezo de la frunto, kaj due, ĝi ne manĝas aŭ trinkas, sed vivas SOLE per aero.

BENI.



La pastro BENAS la preĝantojn. La maljunulo BENAS sian filon antaŭ sia morto.

SUPRA. SUMO. ALTA. JE.
ŜULDI. PRUNTI. AKIRI.



"KVANKAM ĉi tiu DIAMANTO KOSTAS al mi nur kvincent dolarojn ĝia valoro estas pli granda ol la SUPRE donita SUMO. Unue, ĉar ĝi POSEDAS la KVALITOJN de la plej perfektaj kaj MULTEKOSTAJ ŝtonoj, kaj due, ĉar ĝi vere KOSTAS al ĝia antaŭa POSEDANTO sepcent dolarojn.

"Kiel do, vi SUKCESIS AĈETI la ŝtonon JE tia MALALTA PREZO?" (tiel malkare).



"Kiel? Jen kiel.- La persono, de kiu mi AĈETIS la DIAMANTON, estis devigita ĝin VENDI pro NECESECO. Li BEZONIS monon por PAGI siajn ŜULDOJN, kaj ĉar li ne povis PRUNTE PRENI la NECESAN SUMON, li VENDIS kelkajn el siaj MULTEKOSTAJ ŝtonoj, kaj per la mono tiel AKIRITA li PAGIS ĉiujn siajn ŜULDOJN."

INSTIGI. IMPRESI. KVAZAŬ.



INSTIGITE de la LERTA parolanto, ĉiuj KVAZAŬ frenezaj komencis jeti ŝtonojn en la fenestrojn de la maljuna sinjoro X, sed kiam la nobla vizaĝo de la maljunulo aperis en unu el la rompitaj fenestroj, ĉiuj estis tiel IMPRESITAJ, ke ili foriris KVIETE.

VIZITI. STRANGA. RIMARKI.
PREZENTI. ĈAGRENO.



Dum tiu tempo mi VIZITIS Egiptujon. Egiptujo estis por mi tute STRANGA loko. La lingvon de la popolo mi ne komprenis. Nu, PREZENTU al vi mian ĈAGRENON, kiam mi subite RIMARKIS (ekvidis), ke mia monujo kun mia tuta posedaĵo estis ŝtelita for de mi.


INVITI. FESTO.



Hodiaŭ estas la naskotago de Karlo, kaj lia patrino INVITIS kelkajn el liaj amikoj al la FESTO.

EDZIĜO. CEREMONIO. FUNEBRO.


EDZIĜA CEREMONIO.


FUNEBRA CEREMONIO.

MIZERO. ĈAGRENI. FELIĈA.


Post la edziĝo ĉiuj estas FELIĈAJ (ĝojegaj).


Post la funebro ĉiuj estas MIZERAJ, kaj ĈAGRENITAJ.

Petro EDZIĜAS kun Mario, kaj li fariĝas EDZO. Mario EDZINIĜAS kun Petro, kaj ŝi fariĝas EDZINO. Antaŭ la EDZIĜA CEREMONIO Petro estis la FIANĈO de Mario, kaj Mario estis la FIANĈINO de Petro. Petro fianĉiĝis kun Mario, kaj Mario FIANĈINIĜIS kun Petro. Ili ambaŭ estis GEFIANĈOJ; dum ĉe la EDZIĜO ili fariĝis GEEDZOJ.

SCIENCO. FAKTO.




SCIENCO estas la tutaĵo, kiun la homa INTELEKTO scias pri NATURO. SCIENCO estas tio en NATURO, kio estis PRUVITA, kaj pri kio ni scias ke ĝi estas FAKTO aŭ vero. KREDO neniam estas FAKTO ĝis ni scias, sed tiam tio ne plu estas KREDO, ĉar ĝi fariĝas SCIENCO.

INTERESI. NAJBARO.



Petro estas tiel forte INTERESATA pri sia libro, ke li tute ne vidas, ke la NAJBARA domo brulas. La homoj en la strato kriadas, sed li eĉ ne aŭdas.


POSEDI.



Ĉi tiu homo estas tiel malriĉa, ke li eĉ ne POSEDAS ŝuojn aŭ ĉapelon. Lia tuta POSEDAĴO estas la peco da pano, kiun li nun manĝas.

SPACO. TEMPERATURO.

NATURO. MISTERO. INTELEKTO.



POR MEZURI TEMPON ONI UZAS HORLOĜON. (1)

POR MEZURI SPACON ONI UZAS METRON. (2)

POR MEZURI PEZECON ONI UZAS PESILON. (3)

POR MEZURI TEMPERATURON ONI UZAS TERMOMETRON. (4)

NATURO estas la tutaĵo de tio, kio ekzistas en la mondo.

MISTERO- Tio, kio ne estas komprenita de la homa INTELEKTO.

INTELEKTO- Tio en la homo, kio pensas.

SERVI.



La viro ĉe la tablo MENDIS por sia matenmanĝo du ovojn kaj glason da teo, kaj jen ni vidas, ke la SERVISTO SERVAS tiujn al li, sed ho ve! La glaso turniĝas kaj la tuta teo elversiĝas sur la kapon de la malfeliĉa viro.

TURNI. MOMENTO.



Karlo legas tiel rapide, ke li TURNAS novan paĝon en ĉiu minuto.

Ĉiu MINUTO havas sesdek SEKUNDOJN, kaj ĉiu SEKUNDO konsistas el senfina nombro da MOMENTOJ.

MEDALO. USONO. HONORI. ORNAMI.

HEROO. PREZIDANTO. FAMA.



Pro sia HEROECO la nun FAMA Lindbergh, kiu transflugis la maron, estas HONORATA de la USONA PREZIDANTO Coolidge (Kuliĝ). La PREZIDANTO nun estas ORNAMANTA lin per MEDALO.

Edison estas FAMA persono pro siaj eltrovaĵoj. Li eltrovis la fonografon. Aliaj FAMAJ personoj estas- Napoleon, Bethoven, Zamenhof, Markoni kaj aliaj.

KVANKAM. TAMEN.



KVANKAM Ludoviko jam formanĝis dekon da pomoj TAMEN li diras, ke li estas malsata, kaj ke li estas preta formanĝi DUAN dekon.

PARO.


GANTO.


PARO DA GANTOJ


BOTO.



PARO DA BOTOJ.

BIENO, PROFITI, MEDITI, DISPONI, SENDI, MANIERO, KONSIDERI, PENETRI, INVITI, DECIDI, AFERO, SUBITE, KVAZAŬ, IDEO, PLANO, RILATI, IMPRESI, KOMPLETA.


Ĉar la BIENO ne alportadas iajn PROFITOJN al sia posedanto, Petro, li ĉiam sidas kun fingro ĉe la frunto kaj meditas (profunde pensas) laŭ kia MANIERO li DISPONU la BIENON.


Post longa KONSIDERO, li DECIDAS sendi leteron al sia frato, kaj INVITI lin al lia BIENO.


Li tuj sidiĝas kaj skribas la leteron, kaj kelkajn minutojn poste li forsendas ĝin.

Kelkajn tagojn poste ni vidas la fraton de Petro, kiam li ricevas la leteron


Ni vidas lin traleganta la leteron kaj meditanta pri la AFERO. Subite li ekstaras, KVAZAŬ nova IDEO PENETRIS lian kapon. "JES", li diras al si, "Tio estas bona PLANO. Mi ĝuste BEZONAS tian BIENON, kaj mi povas ĝin aĉeti tute MALKARE."


Post kelkaj minutoj li jam estas sur la vojo al sia frato.


Kaj jen la du fratoj jam sidadas ĉe la tablo kaj priparoladas ĉion RILATE (koncerne) la AFERON de la BIENO. La PLANO IMPRESAS Petron, kaj post mallonga KONSIDERO la tuta AFERO estas KOMPLETIGITA, ĉar ni vidas Petron KALKULANTA la monon, kiun li ricevis de sia frato por la bieno.


TURNI, PRESKAŬ, MOMENTO.


Tiu malbona knabo ĵetis ŝtonon, kiu PRESKAŬ trafis min en mia kapo. Sed mi ekvidis la flugantan ŝtonon kaj TURNIS mian kapon SAMMOMENTE. (en la sama momento)

KOMPLETA, MANKI.


"Ĉu via domo jam estas KOMPLETIGITA?'
"Ne, ĉu vi ne vidas, ke la fenestroj ankoraŭ MANKAS? Sed ĝi estos tute finita post kelkaj tagoj."

FUNKCII, BEDAŬRI, MEDITI, MAŜINO.


Johano eltrovis strangan MAŜINON. Sed kiam ĝi estis KOMPLETIGITA, li BEDAŬRINDE ekvidis, ke ĝi ne FUNKCIAS. Vane li serĉis pri la kaŭzo. Li tiun ne povis trovi. Kaj jen ni vidas lin en PROFUNDA MEDITADO. Subite do, li eksaltas ĝojege, ĉar li pripensis novan IDEON. Li elprovadas tiun, kaj, Ho... la MAŜINO EKFUNKCIIS.


ORDINARA.


La grandeco de la unua pomo estas ORDINARA, sed la grandeco de la dua pomo ja estas EKSTERORDINARA. Ĉar ankoraŭ neniu iam vidis tian grandan pomon.

SUFERI, DOLORI.


La patrino de Karlo ĉiam SUFERAS kapdolorojn. Jen ŝi portas malsekan tukon sur sia frunto, sed la DOLORO ne ĉesiĝas.

INVITI. AKCEPTI, DANKI, AŬTOMOBILO.


Petro invitas fraŭlinon X, ke ŝi faru promenadon kun li en lia nova AŬTOMOBILO. Fraŭlino X AKCEPTAS la INVITON kaj DANKAS ĝojege.

RILATI. AFERO.


Kiam Karlo venis al la lernejo, li rakontis al ĉiuj knaboj kaj knabinoj RILATE la kvin cendojn, kiujn li ricevis de **sia** onklo, kiu estas tre riĉa Amerika AFERISTO.

PARDONI, DOLORI.


La fraŭlo surpaŝis la piedon de fraŭlino X, kaj nun li petas ŝian PARDONON. La fraŭlino X ridetas, sed la piedo tiel doloras, ke larmoj aperas en ŝiaj okuloj.

DISPONI, PLAĈI, DANKI.



Jen, Karlo, estas kvin cendoj, kiujn vi povas DISPONI laŭ via PLAĈO.
KARLO:— Grandan DANKON, onklo. Mi DANKAS al vi.

MEMORI·FORGESI·MEM.



Junulino:- "Jen venas Doktoro ee.. Mi FORGESIS lian nomon. Ĉu vi scias ?"
Junulo:- "Mi sciis,sed mi ankaŭ FORGESIS."
Junulino:- "Mi MEMORAS, ke lia nomo komenciĝas per la litero B."
Junulo:- "Ĉu ne Bruno?"
Junulino:- "Jes,jes,Bruno. Tio ja estas lia nomo. Mi nun MEMORAS bone. Ĉu vi MEMORAS la nomon de mia hundo?"
Junulo:- "Certe mi MEMORAS. Ĉu vi FORGESIS,ke mi mem nomis lin Hektor?"

PRAVA·DEZIRI.



POPOLO. LANDO. LIMO.


Ĉiuj Rusoj entute estas la RUSA POPOLO. Ĉiuj Francoj entute estas la FRANCA POPOLO. La loko,kie vivas la RUSA POPOLO, estas ilia LANDO, kaj estas nomata RUSUJO aŭ RUSLANDO. La loko,en kiu vivas la FRANCA POPOLO,estas ilia LANDO, kaj estas nomata FRANCUJO aŭ FRANCLANDO.



LA LINIO EN LA MEZO ESTAS LA LIMO, KIU DIVIDAS LA DU LANDOJN.



NE ENPUŜU VIAN NAZON.






LI NE POVAS STARI,ĈAR LI ESTAS EBRIA.

KORELATIVUJO.

LA LANDO DE NAŬ DIOJ.



INSTRUANTO:- Ĉu vi iam aŭdis pri KORELATIVOJ?
KARLO:- KORELATIVOJ? Ne, sinjoro. Pri tiuj mi neniam aŭdis; sed kio ili estas. Ĉu ia speco de insektoj?
INSTRUANTO:- Ne, tute ne insektoj. KORELATIVOJ estas la nomo de stranga popolo, kiu antaŭ longa tempo vivis en la lando nomata- KORELATIVUJO.
KARLO:- Strange, mi eĉ ne aŭdis pri tiu lando. Kie do ĝi troviĝas?
INSTRUANTO:- Nenie. Tiu lando jam ne plu ekzistas, ĉar ĝi estis detruita de la dioj. Okazis, ke la ĉefpastro de tiu lando, iu granda saĝulo, malkaŝis sekreton de la dioj al la reĝo kaj al liaj korteganoj. Tio tiel malplaĉis la dion, kies nomo estis "U", ke li kaŭzis teruran tertremon, kiu ne nur englutis la popolon, sed ankaŭ detruis la tutan landon.
KARLO:- Ĉu vi ne bonvolos, sinjoro instruanto, rakonti al mi tiun historion? Mi certe estas interesata.
INSTRUANTO:- Kun plezuro, Karlo, se vi nur promesos aŭskulti atente.
KARLO:- Mi tion promesas, sinjoro.
INSTRUANTO:- Bone. Aŭskultu do.



EN la lando "KORELATIVUJO", kiu iam troviĝis trans la montoj, kie la ĉielo tuŝas la teron, vivis granda kaj stranga popolo, kies nomo estis "KORELATIVOJ".

La KORELATIVOJ estis strangaj ne nur per siaj vestoj, kiel vi vidas el la aldonita bildo de Korelativa familio, sed ili estis strangaj ankaŭ per siaj kutimoj kaj kredoj.

Jen, por ekzemplo, estas Korelativa domo. Notu, ke ĝi havas naŭ fenestrojn kaj naŭ ŝtupojn por eniro. Vi sendube miras, ke nur naŭ kaj ne ok aŭ dek. Ĉu ne? Jen kial. La Korelativoj forte kredis, ke la mondo staras sur naŭ kolonoj; kaj ke tiuj kolonoj prezentas naŭ

ideojn, kiuj estis kreitaj de naŭ dioj en naŭ tagoj. La nombro naŭ tial estis por la Korelativoj sankta nombro. Suprenirante sian domon de ŝtupo al ŝtupo, ĉiu Korelativo elparolis la nomojn, unu post la alia, de la naŭ dioj. Pro tiu sama sankteco de la nombro naŭ, la Korelativa jaro konsistis el naŭ monatoj. Ĉiu monato havis naŭ semajnojn, kaj ĉiu semajno konsistis el naŭ tagoj. Post ĉiuj naŭ monatoj unu ekstra tago estis aldonita, kaj tiu tago estis granda festotago, same kiel nia novjara festotago. En tia maniero la Korelativa jaro konsistis el ĝuste duoble tiom da tagoj kiom nia jaro, nome:-730 anstataŭ 365. Dum tiu festo-tago la tuta Korelativa popolo kunvenis en grandega templo konstruita en la reĝa korto, por preĝi kaj oferdoni al la dioj kaj la reĝo, ĉar la Korelativoj forte kredis, ke la reĝo estas la filo de la dioj.

La naŭ dioj estis sidantaj en duonrondo sur oraj seĝoj ĉirkaŭ grandega altaro, sur kiu troviĝis oraj vazoj plenigitaj per fumanta incenso.

Dum la sankta religia ceremonio, la reĝo sidiĝis ĉe la piedoj de la dio "U", la kreinto de homoj kaj bestoj. Dum la reĝo sidiĝis, ĉiuj en la templo sin ĵetis sur la teron, kaj tuŝante la teron per siaj nazoj, ekkriis-, "ESTU BENATAJ, KAJ BENATAJ ESTU VIAJ SANKTAJ NOMOJ". La ĉefpastro tiam stariĝis sur sia kapo, kaj komencis preĝi.

Sed nun, Karlo, antaŭ ol mi daŭrigas la historion, estas necese, ke vi bone konatiĝu kun la naŭ dioj de Korelativujo, unue pro tio, ke la naŭ dioj ludas la ĉefan rolon en la historio, kaj due pro tio, ke tio ebligos al vi kompreni la historion pli bone. Tial mi unue donos al vi la nomojn de la dioj, por ke vi tiujn memorigu, kaj due mi desegnos la bildon de ĉiu el la naŭ dioj, por doni al vi la plej perfektan ideon de tio, kion ĉiu dio prezentas. La nomoj, do, de la naŭ dioj estis:-

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E,

KARLO:- Kiaj strangaj nomoj! Mi opinias, ke ostos tre malfacile memori tiajn nomojn.

INSTRUANTO:- Tute ne, Karlo, ĉar mi rakontos al vi historieton, kiu plifaciligos la memoron.

KARLO:- Historieto?.. Mi dubas ĉu historieto povas helpi tion.

INSTRUANTO:- Vi dubas? nu, vi baldaŭ ŝanĝos vian opinion. Auskultu!

En la lando Korelativujo, pri kiu mi jam parolis, vivis granda riĉulo. Lia nomo estis "IKITI". Memoru bone, Karlo, "IKITI". Nu, tiu Ikiti posedis, ne nur palacojn, grandajn bienojn kaj brutarojn, sed ankaŭ multajn kofrojn plenigitajn per oro kaj multekostaj juveloj. Sed tio ne estas la tuto, ĉar li posedis unu juvelon, kiun li taksis pli alte ol sian tutan riĉaĵon. Tiu juvelo estis lia sola filino-"OMELE". Omele havis okulojn, tiel bluajn, kiel la blua ĉielo, kaj pli belajn ol la steloj en klara nokto. Sed, ho ve! Tiuj belaj okuloj ne povis vidi, ĉar Omele estis tute blinda. Tamen, malgraŭ tio, la beleco de Omele estis tiel granda, ke ĉiu, kiu sin nur ekvidis, fariĝis ensorĉita. Ne estas miro, ke princoj el multaj malproksimaj landoj alvenis Korelativujon por peti la manon de la belulino "OMELE". Sed ĉiuj princoj, ensorĉitaj kaj kun dolorantaj koroj, devis reiri siajn landojn sen Omele, ĉar neniu el ili plaĉis al la blinda belulino.

En la sama urbo ankaŭ vivis virino, kies nomo estis "ĈINENI". Ĉineni estis malbenita de la dioj ne nur per tio, ke ŝi estis malriĉa kaj kripla, sed eĉ per sia sola posedaĵo:-nome-per sia sola filo "ESAU", ĉar Esau ne nur havis harojn sur sia tuta korpo, kiel Esav do la Biblio, sed ankaŭ estis tiel malbela, ke ĉiu, kiu lin ekvidis, malsaniĝis de teruro. Sed ĝuste, kiel ĉiu nubo havas sian arĝentan subaĵon, tiel same, Esau, kun sia terura vizaĝo, havis unu arĝentan econ. Tiu estis lia lerteco ludi la violonon. Oni diris, ke kiam Esau ekludas sian violonon, li povas veki mortintojn. Mi ne scias, kiom da vero estas en tiu diraĵo, sed vero estas, ke per sia ludado li igis la aŭdantojn jen plori, jen ridi aŭ danci laŭ lia plaĉo. Tamen, pro sia terura malbeleco, Esau neniam montriĝis sur la stratoj dum la tago. Nur dum la noktoj, Esau eliris kun sia violono kaj marŝadis de domo al domo, ludante sian violonon. La posedantoj de la domoj elĵetadis aŭ moneron aŭ pecon da pano al la malfeliĉulo. Sed, pro timo, neniu kuraĝis doni ion en lian manon. Laŭ tia maniero Esau gajnis la vivrimedojn por si kaj por sia kripla patrino, Ĉineni.

Nu, okazis, ke unu nokton, dum lia marŝado de domo al domo, Esau haltis antaŭ la domo de la riĉulo Ikiti, kaj komencis ludi sian violonon. Lia ludado tiel plaĉis al la bela Omele, ke ŝi ordonis envoki la ludiston. Ŝia servantino, vole-ne-vole, obeis, kaj envokinte la junulon, Esau, mem rapide forkuris, ĉar ŝi timis, ke ŝi eble ekvidos lian vizaĝon.

Esau eniris, kaj ekvidinte la anĝelan belecon de Omele, li sin ĵetis teren sur sia vizaĝo, por ke Omele ne ekvidu lian vizaĝon, ĉar li ne sciis, ke Omele, kvankam rigardante lin per siaj belaj, bluaj okuloj, nenion vidas.

Kaj tiel, kun lia vizaĝo sur la tero, li petegis ŝian pardonon.

Omele alproksimiĝis dirante- "Kial vi petas mian pardonon? vi ja nenian malbonon faris al mi. Ekstaru! Mi petas vin,

kaj ludu por mi. Eble vi forpelos miajn kordolorojn".

Kiam Esau ekaŭdis la dolĉan voĉon kaj vortojn de Omele, li komencis froti siajn okulojn, ĉar li kredis, ke tio estas nur sonĝo. Sed jen Omele metis sian manon sur lian kapon, kaj denove petegis, ke li ludu por ŝi.

Esau sin levis, kaj baldaŭ ekaudiĝis harmoniaj akordoj kaj dolĉaj sonoj, kiuj kunverŝiĝis en mirindan melodion. Esau ludis, kiel li neniam ludis antaŭe. Ŝajnis, ke ĉiu tono elirinta el la violono kvazaŭ estis viva aĵo, kiu tiris la koron de la bela Omele, ĉar ŝi rapide metis siajn manojn sur la koron por haltigi la rapidajn kaj fortajn batojn. Kaj jen du grandaj larmoj montriĝis en ŝiaj bluaj okuloj, kaj kiel perloj ruliĝis sur ŝiaj belaj vangoj.

Ŝajne ŝi estis tute ensorĉita de la mirinda melodio, kiu kvazaŭ levis ŝin super la nubojn, kaj translokis ŝin en Paradizon inter anĝeloj ludantaj harpojn kaj flutojn. Kaj kiam la dolĉaj tonoj kvietiĝis, Omele kvazaŭ vekiĝis el profunda dormo. Kaj ŝiaj lipoj nur murmuretis- "Ho sanktaj dioj".

Ŝi tiam petis la junulon, ke li sidiĝu kaj rakontu al ŝi, kiu li estas.

Esau nur nun divenis, ke Omele estas blinda. Li alproksimiĝis kaj ĵetis sin sur siajn genuojn antaŭ Omele, kaj kisinte ŝian elstreĉitan manon, rakontis al ŝi pri la suferoj kaj mizeroj de sia tuta vivo. Lia malĝoja historio kaj lia bela voĉo tiel kortuŝis la belulinon, Omele, ke ŝi premis la kapon de Esau al sia koro, kaj karesis lin, kiel patrino karesas sian solan amatan infanon. Esau, la malfeliĉulo, kiu neniam havis kareson dum sia tuta vivo, sentis sin la plej feliĉa homo en la mondo.

Kaj tiel, Esau, laŭ la peto de Omele, komencis viziti ŝin ĉiun tagon, ĝis la paro tiel enamiĝis, ke unu ne povis vivi sen la alia.

Sed kiam Ikiti, la patro de Omele, eksciis pri la ĉiutagaj vizitoj de Esau al Omele, li ordonis, ke oni kaptu kaj ĵetu la junulon en la malliberejon. Sed Esau ekaŭdis pri tio kaj forkuris en la najbaran arbaron. Omele ploris tagojn kaj noktojn, ŝi ĉesis manĝi kaj trinki, ĝis fine ŝi forte malsaniĝis kaj baldaŭ mortis pro ŝia granda amo al la ludisto Esau. Kaj per tio la historieto finiĝas.

KARLO:- Kaj Esau?- Kio okazis al la malfeliĉa Esau?

INSTRUANTO:- Esau neniam estis trovita. Eble li estis formanĝita de sovaĝaj bestoj en la arbaro. Sed nun, Karlo, ĉar vi jam scias, ke pro "AMO AL ESAU OMELE" mortis, diru al mi, ĉu vi bone memoras la historion?

KARLO:- Certe mi ĝin memoras.

INSTRUANTO:- Kaj kio pri la nomoj de la naŭ dioj? Ĉu vi tiujn memoras?

KARLO:- La nomojn de la naŭ dioj? Ho, pri tiuj mi tute forgesis. Mi ne memoras eĉ unu el la naŭ nomoj.

INSTRUANTO:- Ne, Karlo, vi eraras, ĉar vi memoras ĉiujn naŭ nomojn.

KARLO:- Kiu, mi?.. Ne..

INSTRUANTO:- Jen, ni vidu! La historieton vi memoras, ne vere?

KARLO:-Jes tiun mi bone memoras.

INSTRUANTO:- Diru do al mi. Kiu mortis?

KARLO:- OMELE.

INSTRUANTO:- Pro kio?

KARLO:- Pro AMO.

INSTRUANTO:- Al kiu?

KARLO:- Al ESAU.

INSTRUANTO:- Nu, kio do estis la nomoj de la naŭ dioj?

KARLO:- Tiujn mi tute forgesis, sinjoro.

INSTRUANTO:- Sed vi ĵus diris al mi la nomojn de ĉiuj naŭ dioj.

KARLO:- Kiu diris?,,, Mi diris?...

INSTRUANTO:- Certe,vi.

KARLO:- Ne, sinjoro... Mi ne... Ho... Mi komprenas... La historieto... Ŝi mortis... OMELE mortis... OMELE mortis pro AMO... De "AMO AL ESAU OMELE" mortis. de AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E, mortis. Tio ja estas mirindaĵo. Mi memoras la nomojn, kaj mi ne povas forgesi ilin, tamen mi eĉ ne komencis ilin lerni.

INSTRUANTO:- Kaj nun, Karlo, ĉar vi jam memoras la nomojn de la dioj, estas necese, ke vi memoru ankaŭ la signifojn de tiuj nomoj, ĉar la signifoj prezentas la naŭ kolonojn aŭ ideojn, sur kiuj la mondo staris, laŭ la kredo de la Korelativa popolo. Por plifaciligi la memorigon, mi nun desegnos la bildon de ĉiu el la naŭ dioj. Ĉiu bildo prezentas la ideon kaj samtempe la signifon de la nomo. Kiam vi tiujn komprenos kaj ellernos, mi daŭrigos la historion pri la lando Korelativujo kaj ĝia popolo. Antaŭe do ni ripetu- de AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E, mortis.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



"AM", do, estis la nomo de la unua dio. La vorto "AM" en la KORELATIVA lingvo signifas "TEMPO". La dio "AM" estis la kreinto de TEMPO. Por ke vi ne forgesu tion, ekzamenu bone la bildon de la dio "AM", kaj notu al vi en la memoro, ke la dio "AM" tenas SABLO-HORLOĜON en sia mano, per kiu li mezuras TEMPON.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la dua dio estis "O". La vorto "O" en la KORELATIVA lingvo signifas "OBJEKTO" (AĴO). La dio "O" estis la kreinto de ĉiuj OBJEKTOJ en la mondo. Por ke vi ne forgesu tion, ekzamenu la bildon de la dio "O". Li tenas misteran OBJEKTON en sia mano, kaj montras al tiu per la fingro de la dua mano.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la tria dio estis "AL". La vorto "AL" en la KORELATIVA lingvo signifas "KAŬZO" (KIALO aŭ MOTIVO). La dio "AL" estis la kreinto de ĉiuj KAŬZOJ en la mondo. Ekzamenu bone la bildon de la dio "AL", kaj ne forgesu, ke li tenas fingron ĉe la frunto, kvazaŭ meditante pri la misteroj de naturo.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la kvara dio estis "ES". La vorto "ES" en la KORELATIVA lingvo signifas "POSEDO". La dio "ES" estis tiu, kiu kreis la ideon de POSEDAĴO. La bildo de la dio "ES" montras tiun ideon per la avareco en lia vizaĝo, dum li tenas la sakon, plenigitan per oraj moneroj, per siaj du manoj.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la kvina dio estis "A". La vorto "A" en la KORELATIVA lingvo signifas "KVALITO" (ECO). La dio "A" estis tiu, kiu aldonis al ĉiu kreita AĴO ĝiajn KVALITOJN. Ekzamenu bone la bildon de la dio "A" kaj notu al vi en la memoro, ke la dio "A" tenas diamanton en la mano, kaj ekzamenadas ĝin per grandiga vitro.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la sesa dio estis "U". La vorto "U" en la KORELATIVA lingvo signifas "PERSONO" (INDIVIDUO). La dio "U" estis la kreinto de HOMOJ kaj BESTOJ. Ekzamenu bone la bildon de la dio "U", kaj notu al vi en la memoro, ke li tenas en siaj manoj la modelojn de HOMO kaj LEONO, laŭ kiuj li kreis tiujn individuojn.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la sepa dio estis "OM" La vorto "OM" en la KORELATIVA lingvo signifas "KVANTO" (MEZURO). La dio "OM" estis la kreinto de tiuj ideoj. Ekzamenu do la bildon de la dio "OM", kaj ne forgesu, ke li prezentas la ideojn de KVANTO kaj MEZURO. La pesilo en unu mano kaj la mezurilo en la dua tion montras

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la oka dio estis "EL". La vorto "EL" en la KORELATIVA lingvo signifas "MANIERO" (METODO). Ekzamenu la bildon de la dio "EL", kaj notu al vi en la memoro, ke la dio "EL" estis la kreinto de ĉiuj MANIEROJ kaj METODOJ en la mondo. Jen li montras al sia fileto la MANIERON, per kiu FAJRO estas farita.

AM, O, AL, ES, A, U, OM, EL, E.



La nomo de la naŭa dio estis "E". La vorto "E" en la KORELATIVA lingvo signifas "LOKO" (SPACO). La dio "E" estis la kreinto de la senlima SPACO. Ekzamenu bone la bildon de la dio "E", kaj notu al vi en la memoro, ke li tenas unu manon ĉe la okuloj, kvazaŭ rigardante la senliman SPACON.

Kaj nun, Karlo, mi daŭrigos la historion. Mi jam rakontis al vi pri la religia ceremonio dum la novjara festo-tago. Mi ankaŭ jam menciis, ke la Korelativoj forte kredis, ke la reĝo estas la filo de la dioj. Memkompreneble, ke la reĝo estis tre amata kaj honorata de la tuta popolo. Sed kvankam la reĝo havis la tutan riĉaĵon de la lando je sia dispono, kaj la amon de la tuta popolo, li tamen ĉiam estis malĝoja kaj ĉagrenita, ĉar li preĝis al la dioj de jaro al jaro, ke ili donu al li filon aŭ filinon. Sed jen li jam maljuniĝis kaj li havas nek filon nek filinon, kiu povus daŭrigi lian nomon. Do ĉar la novjara festo-tago jam alproksimiĝis, li decidis, ke ĉi tiun fojon li ne forlasos la diojn ĝis ili promesos al li filon.

Kaj jen venis la sankta festo-tago de la nova jaro. La Korelativoj jam kunvenis en la templo. La pastroj jam prepariĝis por la religia ceremonio, kaj nur atendis la alvenon de la sankta reĝo, la filo de la dioj, kiu ial malfruiĝis.

Sed jen fine ekaŭdiĝis la trumpetoj anoncantaj la alproksimiĝon de la reĝo kun liaj korteganoj kaj altranguloj. La tuta popolo falis teren, kiel estis la kutimo, kaj la reĝo sekvata de altranguloj aperis ĉe la pordego de la templo. Sed, ho ve! . . Anstataŭ porti la plej belajn vestojn ornamitajn per oro kaj multekostaj ŝtonoj, la reĝo kaj liaj korteganoj portis sakojn plenigitajn per cindro sur siaj kapoj. La reĝo tuj supreniris la altaron, kaj ĵetinte sin sur siajn genuojn antaŭ la piedoj de la dio "U" ekkriis- "HO SANKTA PATRO KAJ DIO "U"! JAM MULTAJN JAROJN MI PETEGAS AL VI, KE VI DONU AL MI FILON AŬ FILINON POR DAŬRIGI MIAN NOMON KAJ REGNON. NUN MI JAM MALJUNIĜIS, KAJ VI DONIS AL MI NEK FILON NEK FILINON. KIU DO SIDOS ĈE VIAJ PIEDOJ DUM LA SANKTA NOVJARA FESTO, KIAM MI MORTOS?"

En tiu momento ekaŭdiĝis terura tondro, kiu tremigis la tutan templon, kaj el la buŝo de la dio "U" eliris la jenaj vortoj:- "FILO DE LA DIOJ, REĜO DE LA KORELATIVOJ, JE LA FINO DE NAŬ MONATOJ NASKIĜOS AL VI KVAR FILOJ KAJ UNU FILINO, SED ĈAR VI MALSANKTIGIS LA SANKTEJON DE LA DIOJ DUM LA GRANDA FESTO-TAGO, VI MORTOS EN LA SAMA TAGO, EN KIU TIUJ NASKIĜOS". Dua forta tondro kaj tertremo sekvis la diajn vortojn, kaj ĉiuj en teruro forkuris el la templo.


Tagoj pasis, semajnoj kaj monatoj depost la okazintaĵo en la templo, kaj fine venis la tago, en kiu la dia profetaĵo devos okazi. La reĝo jam estis preta renkonti la mortanĝelon. La korteganoj kaj altranguloj kunvenis por diri "ADIAŬ" al la amata reĝo, kaj la tuta reĝa korto estis plenigita per la popolo de Korelativujo.













Kaj jen, korteganino enkuris kaj anoncis, ke la UNUA REĜIDO jam estis naskita Ĉiuj sin turnis en miro al la reĝo, kiu tuj ordonis alporti la infanon. La korteganino elkuris, kaj post kelkaj sekundoj revenis portanta la novnaskitan infanon en la brakoj Ĝiuj ekrigardis scivoleme al la infaneto, sed tuj SURPRIZITAJ ekrigardis unu la alian pro miro, ĉar la infano havis ian STRANGAN NAZON, kian neniu ankoraŭ iam vidis. Tamen ili ne havis sufiĉe da tempo por mediti, ĉar en la sama momento alia korteganino enkuris portanta la duan novnaskitan reĝidon. Ekrigardante la duan infanon. ĉiuj eĉ pli multe ekmiregis, ĉar la dua princeto HAVIS NAZON EN LA FORMO DE DEMANDSIGNO (?) Kaj jen jam enkuris la tria korteganino portanta alian infaneton. "SANKTAJ DIOJ! " Ĉiu el la altranguloj ekkriis: "Kion tio signifas?" LA TRIA NOVNASKITA REĜIDO havis nazon en la formo de MONTRASIGNO (↓) La reĝo, kiel ĉiuj aliaj, estis mirigita de la strangaj reĝidaj nazoj, kaj ordonis venigi la ĉefpastron "AJN"

Ajn, la ĉefpastro de KORELATIVUJO, estis la plej granda saĝulo de la lando. Li jam estis tre maljuna homo, kaj de multaj jaroj estis enŝlosita en sia domo, ĉiam preĝante al la dioj. Li estis konsiderata la profeto de KORELATIVUJO, kaj la KORELATIVA popolo forte kredis, ke li scias ĉiujn misterojn kaj sekretojn de la mondo.

Dume, antaŭ ol la saĝulo AJN estis venigita, alia princeto naskiĝis, kies nazo estis en la formo de STELO.(*) Kaj fine la kvina novnaskita infaneto estis alportata. Tiu estis knabineto. Sed, HO VE! ŜI TUTE NE HAVIS NAZON, nek eĉ ian signon de nazo.( )

Fine, la ĉefpastro "AJN" estis enportita, ĉar li jam estis tiel maljuna, ke li ne plu povis uzi siajn krurojn. Ĉiuj salutis lin, kaj la reĝo diris al li:-

"Sankta patro, vi sendube scias, ke estas destinite de la dioj, ke mi mortu hodiaŭ. Antaŭ mia morto mi almenaŭ deziras scii la misteron pri la nazoj de miaj ĵus naskitaj infanoj."

La maljunulo ekzamenis la kvin infanojn, dum ĉiuj en la granda salono atendis en miro. Fine la saĝulo levis sian grizan kapon, kaj per forta voĉo diris:-

"Sankta filo de la dioj, reĝo de Korelativujo, sinjoroj kaj sinjorinoj:- Nia ĉiopova dio "U" ne nur donacis al ni kvar reĝidojn kaj unu reĝidinon, kiuj dum ĉi tiu tago jam fariĝos la reĝoj de Korelativujo, sed li ankaŭ malkaŝis al ni grandan sekreton de naturo. Vi miras pri la reĝidaj nazoj, sed per tiuj nazoj la ĉiopova dio "U" montras al ni la tutan tragedion de la homa ekzistado. Jen antaŭ viaj okuloj kuŝadas la kvin novnaskitaj infanoj. Ili prezentas la kvin periodojn aŭ aktojn de la granda tragedio de la homa vivo.

"La nazo de la unue naskita reĝido prezentas la unuan aŭ infanan periodon, ĉar same, kiel lia nazo estas sendifina, tiel ankaŭ estas la infana intelekto. Tiu ne povas diferencigi inter lumo kaj mallumo, eco kaj aĵo, aŭ odoro kaj sono. Nenio ankoraŭ impresas ĝian intelekton. Tial, ĉar la vorto "I" en la Korelativa lingvo plej bone esprimas la ideon de nedifiniteco, la nomo de la unua reĝido kun la nedifina nazo estu "I".

"Nun rigardu la nazon de la due naskita infano. Ĝi estas en la formo de demanda signo (?). Vi sendube divenas, ke per tiu nazo la dio "U" malkaŝas al ni la duan periodon de homa ekzistado, kiam la intelekto de la kreskanta infano jam povas diferencigi inter ecoj kaj aĵoj. Dum tiu periodo la ĉiam novaj impresoj instigas la infanan intelekton pripensi kaj fari ĉiam aliajn demandojn pri la misteroj de naturo. Ĉar la vorto "KI" en la Korelativa lingvo plej bone esprimas la ideon de DEMANDO, tial la nomo de la due naskita reĝido kun la demandsigna nazo estu "KI".

"La tria periodo de homa ekzistado estas malkaŝita per la nazo de la trie naskita reĝido- MONTRA SIGNO (☞). Dum tiu periodo la kreskanta infano jam fariĝas perfekta homo. Li ne plu demandas, sed direktas kaj montras la vojon al tiuj, kies intelektoj ankoraŭ ne perfektiĝis. Kaj ĉar la vorto "TI" en la Korelativa lingvo plej bone esprimas la ideon de direkto aŭ montro, la nomo de la trie naskita reĝido estu "TI".

"La kvara periodo de homa ekzistado estas prezentita per la STELA nazo de la kvare naskita reĝido, kaj same, kiel la pintoj de la STELO (★) montras en multaj direktoj, tiel ankaŭ la aĝiĝinta (matura) intelekto de la aĝulo jam akiris, kaj bone komprenas multajn el la misteroj de la naturo. Kaj ĉar la vorto "ĈI" en la Korelativa lingvo plej bone esprimas la ideon de KOMUNECO (kolektiveco), tial la nomo de la kvare naskita reĝido kun la STELA nazo estu "ĈI".

"Kaj fine, sinjoroj kaj sinjorinoj, ni nun venas al la kvina periodo aŭ akto de la homa tragedio, kaj ho ve! Ekrigardu la kvine naskitan infanon. Ĝi tute ne havas nazon. Eĉ signo de nazo mankas. Tio ja montras al ni, ke la kvina periodo estas la morto mem. Nia intelekto (menso, spirito), kiu dum kvar periodoj de nia vivo lernis la misterojn de naturo, kaj amasigis ĉiuspecajn spertojn en multaj fakoj, subite malestiĝis. Ĝi ne plu pensas. Perceptoj ne plu registras. La vivanta maŝino ĉesis funkcii, kaj nenio ekzistas por ĝi plu. Nu,do, ĉar la vorto "NENI" en la Korelativa lingvo plej bone esprimas la ideon de MALESTO, NENIAĴO, tial la nomo de la sennaza kvina reĝidino estu "NENI".

En tiu momento ektondris tiel forte, ke la tuta palaco ektremis, kaj el la buŝo de la knabineto "NENI" eliris voĉo, kiu diris:- Ho vi mizerulo, vi malkaŝis la sekreton de la dioj, nun pagu per viaj vivoj. La saĝulo rapide metis sian manon sur la buŝo de la infaneto, sed jam estis tro malfrue, ĉar la tero ektremis, malfermiĝis, kaj englutis la tutan landon.

Kaj per tio finiĝas la historio pri la lando- KORELATIVUJO. Sed ĉu vi ne volas scii, kiel mi sciiĝis pri tiu historio?

KARLO:- Jes, sinjoro.

INSTRUANTO:- Jen kiel:- Kiam mi estis preparanta la lecionojn de la "Universala Esperantistigilo" por instrui la Esperantan lingvon al ĉiuj popoloj de la tero, ĉio venis glatege, ĝis mi subite renkontis grandegan barilon, kiun mi en nenia maniero povis trairi. Dum multaj tagoj kaj noktoj mi vane penis pripensi rimedon por neniigi la barilon, sed sen ia sukceso.

La barilo, Karlo, estis jena:-

En la Esperanta lingvo troviĝas 45 vortoj nomataj KORELATIVOJ. Tiuj 45 vortoj, pro ia rilateco, kaj pli aŭ malpli samsoneco, estas la plej malfacile lerneblaj. Nu, mi devis ne nur trovi rimedon por ebligi kaj plifaciligi la ellernadon de la Korelativaj vortoj al komencantoj, sed ankaŭ, mi devis elpensi metodon, per kiu mi povus klarigi la 45 vortojn al ĉiuj popoloj de la tero.

Estas tute facile, por ekzemplo, klarigi la vorton "Tablo" al alilingvanoj, ĉar mi desegnas tablon, kaj metas la vorton "TABLO" sube. Ĉiu persono el ĉiu lando tuj komprenos, kio estas la vortotablo. Sed klarigi 45 vortojn, kiel la

jenaj:-ia, kia, tia, ĉia; io, kio, tio, ĉio, kaj tiel plu, jam estas alia afero. Nu, mi pensadis kaj pensadis kaj pensadis denove, ĝis mi unu nokton fariĝis tiel laca, ke mi ekdormis ĉe la skribotablo. Nu, prezentu al vi, Karlo, ke dum la dormo mi sonĝis, ke D-ro Zamenhof, la kreinto de la lingvo Esperanto, alvenis kaj diras "Ĉu vi estas Doktoro Benson?" Kaj mi respondas- "Jes Doktoro Zamenhof", ĉar mi lin rekonis el la bildo, kiu staras sur mia skribotablo. "En tiu okazo", li diras, "mi venis por malkaŝi al vi la sekreton de la deveno de la Korelativaj vortoj. Eble tio helpos al vi en via laboro." "Mi estus tre dankema". Mi respondis ĝojege. La doktoro tuj sidiĝis kaj komencis jene:-

"Kiam mi verkis la lingvon Esperanto, mi renkontis la saman malfacilaĵon, kiun vi nun havas pri la Korelativoj. Tagon post tago, mi rompis al mi la kapon por eltrovi sistemon kaj la ĝustajn vortojn, sed ĉiuj miaj penoj kaj provoj ne havis sukceson. Unu matenon, por esti sola, por ke mi povu daŭrigi la pripensadon sen ia malhelpo, mi faris longan promenadon post la urbo. Mi transiris la grandajn montojn, kiuj troviĝas ĉirkaŭ la urbo, kaj tie sur herboriĉan kampon, mi kuŝiĝis, ĉar mi jam estis tute laca pro la longedaŭra marŝado. Subite, do, mi ekvidis parteton el grandega ŝtono, kiu (ŝajnis al mi) havas skulptitajn figurojn aŭ hieroglifojn. Tio ekinteresis min, kaj mi tuj komencis elfosi la ŝtonon. Tio ja estis malfacila laboro, ĉar mi ne havis fosilon, kaj mi devis uzi mian poŝtranĉilon. Tamen, post teda laboro, kiu f o r p r e n i s la tutan tagon, mi fine sukcesis. Kaj kiam mi tralegis la historion, mi saltis kiel infano pro ĝojo kaj feliĉo, ĉar tiu historio donis al mi kompletan ideon kaj sistemon por miaj Korelativaj vortoj. Nu, ĉar vi nun havas la saman malfacilaĵon, mi alportis la ŝtonon al vi. Jen ĝi estas."

Per tiuj vortoj la bona doktoro metis la skulptitan ŝtonon sur mian skribotablon, kaj mem malaperis. Mi eĉ ne havis tempon por danki al li. Estis malfacila laboro eltrovi la signifojn de la hieroglifoj; sed mi fine sukcesis. Kaj ĉar mi sciis, ke tio estas nur sonĝo, mi dum la dormo enskribis en mian kajeron la tutan historion, la saman, kiun mi ĵus rakontis al vi pri la lando Korelativujo.

Kaj nun, Karlo, vi certe demandos- en kia maniero la historio plifaciligos la ellernadon kaj memorigon de la 45 Korelativaj vortoj. Ne vere? Jen kiel:-

Unue, vi ja neniam forgesos la historion pri la malfeliĉa "OMELE", kiu mortis pro sia "AMO AL ESAU." Nu do, la frazo:- "De AMO AL ESAU OMELE mortis" donas al vi la nomojn de la naŭ dioj. La bildoj de la dioj klarigas la signifojn de tiuj nomoj. Nome:- "AM" tempo; "O" aĵo, objekto; "AL" kaŭzo, kialo, motivo; "ES" posedo; "A" kvalito; "U" persono, individuo; "OM" kvanto; "EL" metodo, maniero; "E" loko, spaco.

Due, tiel same vi ĉiam memoros pri la kvin infanoj kun strangaj nazoj, kiuj estis naskitaj al la reĝo de Korelativujo.

KARLO:- Pardonu al mi, sinjoro, sed mi jam forgesis la nomojn de la infanoj, kvankam mi bone memoras la signifojn de tiuj nomoj. Unue, pro la strangaj nazoj, kiujn la infanoj havis, kaj due, mi bone memoras kion la ĉefpastro klarigis pri la kvin periodoj de homa ekzistado.

INSTRUANTO:- En aliaj vortoj, vi nur ne memoras la nomojn de la infanoj.

KARLO:- Jes, sinjoro.

INSTRUANTO:- Ĉu vi memoras la nomon de la patro de OMELE?

KARLO:- La patro?.. Jes. Lia nomo estis IKITI... I, KI, TI, Kiel strange!

INSTRUANTO:- Kaj kio estis la nomo de la patrino de ESAU?

KARLO:- La patrino de ESAU?... IĈI... IĈINI... Ne, mi forgesis.

INSTRUANTO:- Ĉu ne ĈINENI?

KARLO:- Jes...Jes... ĈINENI...ĈI, NENI. Ho!... I, KI, TI, ĈI, NENI... Tiuj ja estas la nomoj de la kvin infanoj.

INSTRUANTO:- Tute prava, Karlo, sed por ke vi denove ne forgesu, penu memori la jenan PROVERBON:- "Ideo, KIu TImas LUmon, NENIam sukcesas." Ĉar ĝi enhavas la nomojn de la kvin infanoj- I, KI, TI, ĈI, NENI.

KARLO:- Ideo I, KIu KI, Timas TI, LUmon ĈI...LUmon ĈI... Kiel vi trovas ĈI en la vorto lumo?

INSTRUANTO:- Vi estas prava, Karlo, sed de kie venas lumo, de la tero, aŭ de la ĉielo?

KARLO:- De la ĉielo, certe.

INSTRUANTO:- Nu, simple ŝanĝu la vorton LUMO, kaj metu anstataŭe, la vorton ĈIELO. En aliaj vortoj, ŝanĝu la proverbon tiel:-

"Ideo, KIu TImas ĈIelon, NENIam atingas la celon."

La nomoj, do, IKITI kaj ĈINENI, la patro de OMELE kaj la patrino de ESAU, aŭ la frazo:-"Ideo, KIu TImas ĈIelon, NENIam atingas la celon," donas al vi la nomojn de la kvin infanoj. La strangaj nazoj de la infanoj kaj la klarigo de la ĉefpastro pri la kvin periodoj de homa ekzistado klarigas la signifojn de la kvin nomoj. Nome:- "I" Nedifiniteco, "KI" Demando, "TI" Montreco, "CI" Komuneco, kaj "NENI" Neaĵo.

Memorante la nomojn kaj iliajn signifojn, vi jam povas mem facile konstrui la 45 Korelativajn vortojn. Vi simple metas la nomon de unu el la kvin infanoj antaŭ la nomo de unu el la naŭ

dioj. La du nomoj kune rezultas en unu el la 45 Korelativaj vortoj, kies signifo estas tiu de la du nomoj kune. Jen ili estas:-

IAM, IO, IAL, IES, IA, IU, IOM, IEL, IE; KIAM, KIO, KIAL, KIES, KIA, KIU, KIOM, KIEL, KIE; TIAM, TIO, TIAL, TIES, TIA, TIU, TIOM, TIEL, TIE; ĈIAM, ĈIO, ĈIAL, ĈIES, ĈIA, ĈIU, ĈIOM, ĈIEL, ĈIE; NENIAM, NENIO, NENIAL, NENIES, NENIA, NENIU, NENIOM, NENIEL, NENIE.



LA LANDO DE NAŬ DIOJ



ANEKDOTOJ EL F.K.

MIRINDAJO.



Okaze kunvenie kvar sinjoroj,grandaj majstroj kaj amantoj de mensogado. Longan tempon ili sidis silente,fine unu diras:-Ĉu vi aŭdis, kian sukceson havis Aramburo? Mi mem vidis,ke en la teatro estis tiel malvaste,ke oni ne povis aplaŭdi en horizontala direkto,sed aplaŭdis en vertikala. - Tre povas esti, diris la dua; kaj mi unu fojon estis en teatro, kaj prezentu al vi, tie estis tiel plenege, ke oni ne povis ridi en horizontala direkto, sed ridis en vertikala....Ĉio ĉi estas malvera, diris la tria; sed jen mi,kiam mi estie en Afriko,vidis negron tiel nigran, ke oni bezonis, por lin rigardi, ekbruligi kandelon. - Nu, tio ĉi ankaŭ estas malvera, diris la kvara; sed jen mi, kiam mi estie en Anglujo, mi vidis tiel maldikan fraŭlinon,ke ŝi bezonis du fojojn eniri la ĉambron, por ke oni povu ŝin rimarki. (M.Solovjev.)

MALRIĈA SAĜULO.




Malriĉa saĝulo tagmanĝie ĉe avara riĉulo. La avarulo forŝovis la panon sur la tablo tiel malproksimen, ke la malriĉa gasto ne povis ĝin atingi. Ne estante ankoraŭ kontenta de tio ĉi kaj volante pli ĉagreni sian gaston, la avarulo turnis sin al li: -- Mi aŭdis, ke vi estas tre saĝa homo, sed mi vidas,ke vi estas nelaborema: vi volas, ke aliaj laboru, dum vi mem sidas sur ili kiel parazito kaj manĝas kaj vestas vin per fremda kosto. Se, kontraŭe, vi estus laborema, vi povus fariĝi io,ekzemple ĉe mi kaj miaj komercoj. - Ne, mia bonfarsma, respondis la saĝulo, kontraŭe: mi volus io fariĝi ĉe vi, sed vi ne permesas al mi...- Klarigu vin, diris la avarulo,ĉar mi vin ne komprenas.- Tute simple, kun sarkasma rideto sur la lipoj, respondie la saĝulo: mi volie ĉe vi fariĝi sata, sed vi ne permesas al mi. (N, Kuŝnir.)

ZORGO.



Z O R G O. Vi estas tiel malgaja, al vi kredeble faras zorgojn viaj kreditoroj? Jes, miaj kreditoroj ESTONTAJ, ĉar mi ĉiam zorgas,de kiu mi nun povas ankoraŭ prunti.

MALKOMPRENIĜO.



M A L K O M P R E N I Ĝ O. Prezentu al vi,amiko,mian ĉagrenon! mi forgesis en domo la monujon. Pruntu al mi dek dolarojn ĝis morgaŭ. Pardonu,mi ĝin ne povas,sed mi povas konsili al vi certan rimedon,por ricevi tiun ĉi monon. Ho, mi dankas vin, vi estas vera amiko... Jen kvin cendoj; prenu strat-vagonon kaj veturu hejmen, por preni la monujon. (I.Lojko.)

FINO.

LA KORELATIVOJ EN 36 LINGVOJ.

1 ANGLA	5 KATALUNA	9 HOLANDA	13 HUNGARA	17 LITOVA	21 SERBA	25 KROATA	29 TURKA	33 ARABA
2 FRANCA	6 PORTUGALA	10 FLANDRA	14 ISLANDA	18 LATVA	22 UKRAINA	26 SLOVAKA	30 ALBANA	34 HEBREA
3 HISPANA	7 RUMANA	11 DAN. NORV.	15 ESTONA	19 RUSA	23 POLA	27 ARMENA	31 JUDA	35 ĤINA
4 ITALA	8 GERMANA	12 SVEDA	16 FINA	20 BULGARA	24 ĈEĤA	28 GREKA	32 PERSA	36 JAPANA

Ia. NEDIFINA KVALITO	1 SOME (ANY) KIND	5 ALGUN QUALCUN	9 DE EEN OF ANDER	13 VALAMILYEN	17 KAŽKOKS	21 НЕКАКАВ	25 NEKAKAV	29 BIRNEV	33 نوعاما
	2 QUELCONQUE	6 QUALQUER	10 HET EEN OF ANDER	14 EINHVERS KONAR	18 KAUT KĀDS	22 ЯКИЙСЬ	26 BARSAKÝ	30 NDO NJI	34 [illegible]
	3 ALGUNO-A	7 DE UN FEL OARECARE	11 EN ELLER ANNEN SLAGS	15 MINGISUGUNE	19 КАКОЙ-НИБУДЬ	23 JAKIŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 一種
	4 QUALCHE	8 IRGENDWIE	12 NÅGON (SLAGS)	16 JONKUNLAINEN	20 НЕКАКЪВЪ	24 NĚJAKÝ	28 ΚΑΘΕ ΕΙΔΟΥΣ	32 نوعي	36 或種の
Ial. NEDIFINA KAŬZO	1 FOR SOME REASON	5 PER ALGUNA RAÚ	9 ERGENSOM	13 VALAMIERT	17 KAŽKODEL	21 РАДИ НЕЧЕГА	25 RADI NEČEGA	29 BIR SEBEBDEN	33 لسبب ما
	2 POUR UNE RAISON	6 POR QUALQUER RAZÃO	10 ERGENSOM	14 EINHVERS VEGNA	18 KAUT KĀDĒĻ	22 ЧОМУСЬ	26 PRE NIEČO	30 PER NDO NJISHKAK	34 [illegible]
	3 POR ALGO	7 P.VREUN MOTIV	11 AV EN ELLER ANNEN GRUNN	15 MILLEGI PÄRAST	19 ПОЧЕМУ-НИБУДЬ	23 DLACZEGOŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 有的為故
	4 PER QUALC. MOTIVO	8 AUS IRGEND EINEM GRUNDE	12 AV NÅGON ORSAK	16 JOSTAIN SYYSTA	20 ЗА НѢЩО	24 PRO NĚCO	28 ΔΙΑ ΚΑΠΟΙΑΝ ΑΙΤΙΑΝ	32 بعلتي	36 何かのわけて
Iam. NEDIFINA TEMPO	1 SOME (ANY) TIME	5 ALGUNA VEGADA	9 OOIT, EENS	13 VALAMIKOR	17 KAŽIN KADA	21 НЕКАДА	25 NEKADA	29 BIR VAKT	33 وقت ما
	2 JAMAIS	6 EM DIA, OUTRORA	10 EENS	14 EINHVERN TÍMA	18 KAUT KAD	22 КОЛИСЬ	26 NIEKEDY	30 NJI HERË	34 [illegible]
	3 UNA VEZ	7 CANDVA	11 NOGENSINNE	15 KUNAGI	19 КОГДА-НИБУДЬ	23 KIEDYŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 有的時候
	4 UNA VOLTA	8 IRGEND WANN	12 NÅGON GÅNG	16 JOSKUS	20 НѢКОГА	24 NĚKDY	28 ΚΑΠΟΤΕ	32 وقتي	36 或時
Ie. NEDIFINA LOKO	1 SOME (ANY) WHERE	5 EN ALGUN LLOC	9 ERGENS	13 VALAHOL	17 KAŽKUR	21 НЕГДЕ	25 NEGDJE	29 BIR YERDE	33 في مكان ما
	2 QUELQUE PART	6 ALGURES	10 ERGENS	14 EINHVERS STAÐAR	18 KAUT KUR	22 ДЕСЬ	26 NIEKDE	30 NË NDO NJI VENT	34 [illegible]
	3 EN ALGUN LUGAR	7 UNDEVA	11 NOGENSTEDS	15 KUSKIL	19 ГДЕ-НИБУДЬ	23 GDZIEŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 有的地方
	4 IN QUALC. LUOGO	8 IRGENDWO	12 NÅGON STÄDES	16 JOSSAKIN	20 НѢГДЕ	24 NĚKDE	28 ΚΑΠΟΥ	32 جائي	36 どこかに
Iel. NEDIFINA MANIERO	1 SOME (ANY) HOW	5 D'ALGUNA MANERA	9 OP DE EEN OF ANDERE WIJZE	13 VALAHOGYAN	17 KAŽKAIP	21 НЕКАКО	25 NEKAKO	29 BIR YOL ILE	33 على كل
	2 D'UNE MANIERE QUELCONQUE	6 POR QUALQUER FORMA	10 OP DE EENE WIJZE	14 EINHVERN VEGINN	18 KAUT KA	22 ЯКОСЬ	26 NEJAK	30 NË NDO NJI MËNYRE	34 [illegible]
	3 DE ALGÚN MODO	7 INTR'UN MUD OARECARE	11 PÅ EN ELLER ANNEN MÅTE	15 KUIDAGI	19 КАК-НИБУДЬ	23 JAKOŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 無論怎樣
	4 IN QUALCHE MODO	8 IRGEND WIE	12 PÅ NÅGOT SÄTT	16 JOLLAIN TAVALLA	20 НѢКАКЪ	24 NĚJAK	28 ΚΑΠΩΣ	32 طوري	36 どうかして
Ies. NEDIFINA POSEDO	1 SOMEONE'S	5 D'ALGÚ	9 JEMADS	13 VALAKIÉ	17 KAŽKIENO	21 НЕЧИЈ	25 NEČIJI	29 BIRININ	33 لاحد ما
	2 DE QUELQU'UN	6 DE ALGUEM	10 JEMANDS	14 EINHVERS	18 KAUT KAM PIEDEROŠS	22 ЧИЙСЬ	26 NIEKOHO	30 E NDONJIU'	34 [illegible]
	3 DE ALGUIEN	7 AL CUIVA	11 NOGENS	15 KELLEGI	19 ЧЕЙ-НИБУДЬ	23 CZYJŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 某人的
	4 DI QUALCUNO	8 IRGEND JEMANDES	12 NÅGONS	16 JONKUN	20 НѢЧИЙ	24 NĚČÍ	28 ΚΑΠΟΙΟΥ	32 مال كسي	36 誰かの
Io. NEDIFINA OBJEKTO	1 SOMETHING	5 QUELCOM	9 IETS	13 VALAMI	17 KAŽKAS	21 НЕШТО	25 NEŠTO	29 BIRŞEY	33 شيئا ما
	2 QUELQUE CHOSE	6 ALGUMA COISA	10 IETS	14 EITTHVAÐ	18 KAUT KAS	22 ЩОСЬ.	26 NIEČO	30 NDO NJI GJA	34 [illegible]
	3 ALGO	7 CEVA	11 NOGET	15 MISKI	19 ЧТО-НИБУДЬ	23 COŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 [illegible]事
	4 QUALCHE COSA	8 IRGEND ETWAS	12 NÅGONTING	16 JOKIN	20 НѢЩО	24 NĚCO	28 ΚΑΤΙ	32 چيزي	36 或事
Iom. NEDIFINA KVANTO	1 SOME, A LITTLE	5 UNA MICA	9 EEN WEINIG	13 VALAMELYES	17 ŠIEK TIEK	21 НЕКОЛИКО	25 NEKOLIKO	29 BIRAZ	33 بعض. قليل
	2 UN PEU	6 UM POUCO	10 EEN WEINIG	14 EITTHVAÐ DÁLITIÐ	18 KAUT CIK. DRUSKU	22 ТРОХИ	26 PONEKUD	30 PAKËZ	34 [illegible]
	3 ALGO UN POCO	7 CÂTVA	11 NOGET, LITT	15 NATUKE	19 СКОЛЬКО-НИБУДЬ	23 TROCHĘ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 多少
	4 ALQUANTO	8 EIN WENIG	12 NÅGOT. LITE	16 JONKUN VERRAN	20 НѢКОЛКО	24 PONĚKUD	28 ΟΛΙΓΟΝ	32 قدري	36 いくらか
Iu. NEDIFINA INDIVIDUO	1 SOMEONE, ANYONE	5 ALGÚ	9 IEMAND	13 VALAKI	17 KAI KURIS	21 НЕКО	25 NEKO	29 BIRISI	33 احد ما
	2 QUELQU'UN	6 ALGUEM	10 IEMAND	14 EINHVER	18 KAUT KURŠ	22 ХТОСЬ	26 NIEKTO	30 NDO NJI NJENI	34 [illegible]
	3 ALGUNO ALGUIEN	7 CINEVA	11 NOGEN	15 KEEGI MINGI	19 КТО-НИБУДЬ	23 KTOŚ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 有些人
	4 QUALCUNO	8 JEMAND	12 NÅGON	16 JOKU	20 НѢКОЙ	24 NĚKDO	28 ΚΑΠΟΙΟΣ	32 كسي	36 或人

BENSON SCHOOL OF ESPERANTO NEWARK NEW JERSEY U. S. A

LA KORELATIVOJ EN 36 LINGVOJ.

1 ANGLA	5 KATALUNA	9 HOLANDA	13 HUNGARA	17 LITOVA	21 SERBA	25 KROATA	29 TURKA	33 ARABA
2 FRANCA	6 PORTUGALA	10 FLANDRA	14 ISLANDA	18 LATVA	22 UKRAINA	26 SLOVAKA	30 ALBANA	34 HEBREA
3 HISPANA	7 RUMANA	11 DAN. NORV.	15 ESTONA	19 RUSA	23 POLA	27 ARMENA	31 JUDA	35 ĤINA
4 ITALA	8 GERMANA	12 SVEDA	16 FINA	20 BULGARA	24 ĈEĤA	28 GREKA	32 PERSA	36 JAPANA

Kia.	1 WHAT KIND?	5 QUAL	9 VAT VOOR EEN	13 MILYEN	17 KOKS	21 КОИ, КАКИ	25 KAKAV, -A, -O	29 NE CINS	33 اي نوع
	2 QUEL?	6 QUAL	10 WELK	14 HVAÐA HVÍLÍKUR	18 KĀDS KĀDA	22 ЯКИЙ	26 JAKÝ -É, -Á	30 CILA	34 איזה ?
DEMANDA	3 QUÉ, CUAL	7 CUM, CE FEL	11 HVORDAN	15 MISSUGUNE	19 КАКОЙ	23 JAKI	27 ինչ տեսակ	31 [illegible]	35 何種
KVALITO	4 QUALE	8 WAS FÜR EIN	12 HURUDAN	16 MIMMOINEN	20 КАКЪВЪ	24 JAKÝ	28 ΤΙ ΕΙΔΟΥΣ	32 چه نوع	36 どんな
Kial.	1 WHY?	5 PER QUÈ	9 WAAROM	13 MIÉRT	17 KODEL	21 ЗАШТО	25 ZAŠTO	29 NIÇIN	33 لماذا
	2 POURQUOI?	6 PORQUÉ	10 WAAROM	14 HVERS VEGNA	18 KĀDĒL KĀPĒC, KĀLAB	22 ЧОМУ ЗАЩО	26 PREČO	30 P(ER) SE	34 למה ?
DEMANDA	3 POR QUÉ	7 DE CE	11 HVORFOR	15 MIKS	19 ПОЧЕМУ	23 DLACZEGO	27 ինչու	31 [illegible]	35 何故
KAŬZO	4 PERCHÉ	8 WARUM	12 VARFOR	16 MIKSI	20 ЗАЩО	24 PROČ	28 ΔΙΑΤΙ	32 چرا	36 何故
Kiam.	1 WHEN?	5 QUAN	9 WANNEER	13 MIKOR	17 KUOMET KADA	21 КАДА	25 KADA, KAD	29 NE ZEMAN	33 متى
	2 QUAND	6 QUANDO	10 WANNEER	14 ÞEGAR HVENÆR	18 KAD	22 КОЛИ	26 KEDY	30 KUR	34 מתי ?
DEMANDA	3 CUÁNDO	7 CÂND	11 HVORNÅR	15 MILLAL KUI	19 КОГДА	23 KIEDY	27 երբ	31 [illegible]	35 何時
TEMPO	4 QUANDO	8 WANN	12 NÄR	16 MILLOIN	20 КОГА	24 KDY, KDYŽ	28 ΠΟΤΕ	32 چه وقت	36 何時
Kie.	1 WHERE	5 ON, AON	9 WAAR	13 HOL, HOVA	17 KUR	21 ГДЕ	25 GDJE	29 NERDE NEREYE	33 اين
	2 OU?	6 ONDE	10 WAAR	14 HVAR	18 KUR	22 ДЕ	26 GDE	30 KU	34 איפה ?
DEMANDA	3 DONDE	7 UNDE	11 HVOR	15 KUS	19 ГДЕ	23 GDZIE	27 ուր	31 [illegible]	35 何處
LOKO	4 DOVE	8 WO	12 VAREST	16 MISSÄ	20 ДЕ, ГДЕ	24 KDE	28 ΠΟΥ	32 کو	36 何處に
Kiel.	1 HOW? AS	5 COM	9 HOE	13 HOGYAN	17 KAIP	21 КАКО	25 KAKO, KAO	29 NASIL	33 كيف
	2 COMMENT	6 COMO	10 HOE	14 HVERNIG	18 KĀ	22 ЯК	26 AKO	30 SI	34 איך ?
DEMANDA	3 COMO	7 CUM, IN CE MOD	11 HVORLEDES	15 KUIDAS, NAGU KUI	19 КАК	23 JAK	27 ինչպէս	31 [illegible]	35 如何
MANIERO	4 COME	8 WIE	12 HURU	16 KUINKA MITEN	20 КАКЪ	24 JAK	28 ΠΩΣ	32 چطور	36 如何にして
Kies.	1 WHOSE?	5 DE QUI	9 WIENS	13 KIÉ	17 KIEK	21 ЧИЈ	25 ČIJI	29 KIMIN	33 لمن
	2 DONT, A QUI	6 CUJO -A, -OS, -AS	10 WIENS	14 HVERS	18 KĀ, KAM PIEDEROSS	22 ЧИЙ	26 KOHO	30 (I, E) KUJT	34 של מי ?
DEMANDA	3 DE QUIEN CUYO	7 AL CUI	11 HVIS	15 KELLE	19 ЧЕЙ	23 CZYJ	27 որու	31 [illegible]	35 誰
POSEDO	4 DI CHI	8 WESSEN	12 VARS, VILKENS	16 KENEN, MINKA	20 ЧИЙ	24 ČÍ	28 ΠΟΙΟΥ	32 مال کی	36 誰のか
Kio.	1 WHAT?	5 QUÈ, LO QUÈ	9 WAT	13 MI MICSODA	17 KAS	21 ШТО	25 ŠTO	29 NE	33 اي شيء
	2 QUOI?	6 O QUE	10 WAT	14 HVAÐ SEM	18 KAS	22 ЩО	26 ČO	30 CË, ÇAR	34 מה ?
DEMANDA	3 QUE QUE COSA	7 CE	11 HVAD	15 MIS	19 ЧТО	23 CO	27 ինչ	31 [illegible]	35 何
OBJEKTO	4 CIÒ CHE COSA	8 WAS	12 VAD	16 MIKÄ	20 ЩО, КАКВО	24 CO	28 ΤΙ	32 چه چیز	36 何
Kiom.	1 HOW MUCH?	5 QUANT	9 HOEVEEL	13 MENNYI	17 KIEL	21 КОЛИКО	25 KOLIKO	29 NE KADAR	33 كم
	2 COMBIEN	6 QUANTO	10 HOEVEEL	14 HVE MIKIÐ	18 CIK	22 КІЛЬКО	26 KOLKO	30 SA	34 כמה
DEMANDA	3 CUANTO	7 CÂT	11 HVOR MEGET	15 MITU, KUI PALJU	19 СКОЛЬКО	23 ILE	27 որչափ	31 [illegible]	35 幾多
KVANTO	4 QUANTO	8 WIEVIEL	12 HURU MYCKET	16 KUINKA PALJON	20 КОЛКО	24 KOLIK	28 ΠΟΣΟΝ	32 چقدر	36 何程
Kiu.	1 WHO?	5 QUI EL QUI	9 WIE, WAT WELKE	13 KI KICSODA	17 KAS	21 КО КОЈИ	25 KOJI, KO	29 KIM	33 من
	2 QUI LEQUEL	6 QUE QUEM	10 WIE, WAT WELKE	14 HVER SÁ SEM SEM	18 KURŠ, KURA	22 ХТО	26 KTO, KTORÝ	30 KUSH	34 מי ?
DEMANDA	3 QUIEN EL QUE	7 CINE CARE	11 HVEM, DER HVILKEN, SOM	15 KES, MIS MILLINE	19 КТО, КОТОРЫЙ	23 KTO	27 ով	31 [illegible]	35 誰
INDIVIDUO	4 CHI CHE QUALE	8 WER WELCHER-E	12 SOM VILKEN	16 KUKA, MIKÄ	20 КОЙ, КОЙТО	24 KDO KTERÝ	28 ΠΟΙΟΣ	32 که	36 誰どれ

LA KORELATIVOJ EN 36 LINGVOJ.

1 ANGLA	5 KATALUNA	9 HOLANDA	13 HUNGARA	17 LITOVA	21 SERBA	25 KROATA	29 TURKA	33 ARABA
2 FRANCA	6 PORTUGALA	10 FLANDRA	14 ISLANDA	18 LATVA	22 UKRAINA	26 SLOVAKA	30 ALBANA	34 HEBREA
3 HISPANA	7 RUMANA	11 DAN.-NORV.	15 ESTONA	19 RUSA	23 POLA	27 ARMENA	31 JUDA	35 ĤINA
4 ITALA	8 GERMANA	12 SVEDA	16 FINA	20 BULGARA	24 ĈEĤA	28 GREKA	32 PERSA	36 JAPANA

Tia. MONTRA KVALITO	1 SUCH(A)	5 TAL	9 ZULKEEN	13 OLYAN	17 TOKS	21 ТАКАВ	25 TAKAV	29 BOYLESI	33 ذلك. هكذا
	2 TEL	6 TAL	10 ZULKEEN	14 SLÍKUR	18 TĀDS TĀDA	22 ТАКИЙ	26 TAKOVÝ	30 KJO	34 כָּזֶה, כָּזֹאת
	3 TAL	7 ASTFEL	11 SÅDAN	15 NIISUGUNE	19 ТАКОЙ	23 TAKI	27 այսպիսի	31 אזא, אזעלכע, אזעלע	35 如此的
	4 TALE	8 SOLCHER	12 SÅDAN	16 SELLAINEN	20 ТАКЪВЪ	24 TAKOVÝ	28 TOIOUTOΣ	32 آن نوع	36 其様な
Tial. MONTRA KAŬZO	1 THEREFORE	5 PER AQUESTA RAÓ	9 DAAROM	13 AZÉRT	17 TODEL	21 ЗАТО	25 ZATO	29 BU SEBEPTEN	33 لذلك. لذا
	2 C'EST POURQUOI	6 POR ISSO	10 DAAROM	14 þess vegna	18 TĀDĒL, TĀPĒC	22 ЗАТО, ТОМУ	26 PRETO	30 PËR KËT	34 לָכֵן
	3 POR ESO	7 DEACEEA	11 DERFOR	15 SELLE-PARAST	19 ПОТОМУ	23 DLATEGO	27 ուստի	31 דעריבער, דערפֿאַר	35 所以
	4 PERCIÒ	8 DARUM	12 DÄRFÖR	16 SIKSI	20 ЗАТОВА	24 PROTO	28 ΔIOTI	32 بآن علت	36 其故
Tiam. MONTRA TEMPO	1 THEN	5 ALESHORES	9 TOEN	13 AKKOR	17 TADA. TUOMET	21 ТАДИ	25 TADA	29 IMDI. SONRA	33 ثم بعد
	2 ALORS	6 ENTÃO	10 DAN	14 þá	18 TAD	22 ТОДИ	26 VIEDY	30 AT-HERË	34 אָז
	3 ENTONCES	7 ATUNCI	11 DENGANG	15 SIIS	19 ТОГДА	23 WTEDY	27 [illegible]	31 דאן, דעמאלט	35 彼時
	4 ALLORA	8 DANN	12 DÅ	16 SILLOIN	20 ТОГАВА	24 TEHDY. POTOM	28 TOTE	32 آن وقت	36 其時
Tie. MONTRA LOKO	1 THERE	5 ALLÀ	9 DAAR	13 OTT	17 TEN	21 ТАМО	25 TAMO	29 ORADA	33 هناك
	2 LÀ LÀ-BAS	6 ALÍ	10 DAAR	14 þar. þarna	18 TUR	22 ТАМ	26 TAM	30 ATY	34 שָׁם
	3 ALLÍ. AHÍ	7 ACOLO	11 DER, HIST	15 SÄÄL	19 ТАМ	23 TAM	27 հոն	31 דאָרט	35 彼處
	4 LÀ	8 DORT	12 DÄR	16 TUOLLA	20 ТАМЪ	24 TAM	28 EKEI	32 آنجا	36 其處に
Tiel. MONTRA MANIERO	1 THUS, SO	5 AIXÍ	9 ZOO	13 ÚGY	17 TAIP	21 ТАКО	25 TAKO	29 BÖYLE ŞÖYLE	33 كذا
	2 AINSI	6 ASSIM	10 DUS	14 þannig	18 TĀ	22 ТАК	26 TAK	30 KËSHTU	34 כָּכָה
	3 ASÍ	7 ASTFEL	11 SÅLEDES	15 NII	19 ТАК	23 TAK	27 այսպէս	31 אזוי, אזוי	35 如此這樣
	4 COSÌ	8 SO	12 SÅLUNDA	16 NIIN	20 ТАКА	24 TAK	28 OUTΩΣ	32 آنطور	36 其様に
Ties. MONTRA POSEDO	1 THAT ONE'S	5 DE TAL PERSONA	9 DIENS	13 AZÉ	17 TO	21 ЊЕГОВО	25 NJEGOVO	29 ŞUNUN	33 لذلك الشخص
	2 CE LUI LÀ	6 DE AQUELLE	10 DIENS	14 þess	18 TĀ, TĀS	22 ТОГО	26 TOHO	30 (I.E) KËTIJ	34 שֶׁל הַהוּא
	3 DE TAL PERSONA	7 AL ACELUIA	11 DENS, DENNES	15 SELLE	19 ЕГО	23 TEGO	27 անոր	31 דעמס, זיינס	35 那人的
	4 DI QUELLO	8 DESSEN	12 DESS, DERAS	16 STA-LTA TUO	20 НА ТОГОВА	24 TEHO	28 EKEINOU	32 مال آن	36 其者の
Tio. MONTRA OBJEKTO	1 THAT (THING)	5 ALLO	9 DAT	13 AZ	17 TAS. TAI	21 ТО ОНО	25 TO.	29 ŞU	33 ذلك (الشيء)
	2 CELA, CE	6 ISSO	10 DAT	14 það	18 TAS	22 ТО	26 TO	30 KJO, KY	34 הַדָּבָר הַהוּא
	3 ESO. LO	7 ACEEA	11 DET. HINT	15 SEE. TOO	19 ТО ЭТО	23 TO	27 այդ բանը	31 דאָס, יענס	35 彼物
	4 CIÒ	8 DAS. JENES	12 DETTA	16 TUO	20 ТОВА ОНОВА	24 TO. ONO	28 AUTO	32 آن (چیز)	36 其
Tiom. MONTRA KVANTO	1 SO MUCH	5 TANT	9 ZOOVEEL	13 ANNYI	17 TIEK	21 ТОЛИКО	25 TOLIKO	29 BUKADAR	33 بقدر ذلك
	2 TANT. AUTANT	6 TANTO	10 ZOOVEEL	14 SVO MIKIÐ	18 TIK	22 ТІЛЬКО	26 TOLKO	30 AQ. KAQ	34 הַכַּמּוּת הַהִיא
	3 TANTO	7 ATÂT	11 SÅ MEGET	15 NII PALJU	19 СТОЛЬКО	23 TYLE	27 այդչափ	31 אזוי פֿיל	35 那大的
	4 TANTO	8 SOVIEL	12 SÅ MYCKET	16 NIIN PALJON	20 ТОЛКОВА	24 TOLIK	28 TOΣON	32 آنقدر	36 其丈け
Tiu. MONTRA INDIVIDUO	1 THAT	5 AQUELL	9 DIE. DAT	13 HÚZNI	17 TAS	21 ТАЈ ОНАЈ	25 TAJ	29 ŞO	33 ذلك
	2 CELUI-, CELLE.-LÀ	6 AQUELLE	10 DIE. DAT	14 SÁ, SÚ, ÞAÐ	18 TAS. TĀ	22 ТОЙ	26 TEN, TA, TO	30 AY. AJO	34 הַהוּא, הַהִיא
	3 ESE. AQUEL	7 ACELA. ACEEA	11 DEN, HIN	15 SEE. TOO	19 ТОТ	23 TEN	27 այդ մէկը	31 דער, יענער	35 彼物
	4 QUELLO. QUELLA	8 DER. JENER	12 DENNE	16 TUO	20 ОНЗИ	24 TEN. ONEN	28 EKEINOΣ	32 آن	36 その人 その物

BENSON SCHOOL OF ESPERANTO, NEWARK, NEW JERSEY, U. S. A.

LA KORELATIVOJ EN 36 LINGVOJ.

1 ANGLA	5 KATALUNA	9 HOLANDA	13 HUNGARA	17 LITOVA	21 SERBA	25 KROATA	29 TURKA	33 ARABA
2 FRANCA	6 PORTUGALA	10 FLANDRA	14 ISLANDA	18 LATVA	22 UKRAINA	26 SLOVAKA	30 ALBANA	34 HEBREA
3 HISPANA	7 RUMANA	11 DAN. NORV.	15 ESTONA	19 RUSA	23 POLA	27 ARMENA	31 JUDA	35 ĤINA
4 ITALA	8 GERMANA	12 SVEDA	16 FINA	20 BULGARA	24 ĈEĤA	28 GREKA	32 PERSA	36 JAPANA

Ĉia.	1 EVERY (KIND)	5 CADA	9 ELK IEDER	13 MINDENFÉLE	17 VISUKS	21 СВАКИ	25 SVAKAKAV	29 HER NEV	33 كل نوع
	2 CHAQUE	6 CADA	10 IEDER	14 ALLSKONAR	18 VISĀDS	22 ВСЯКІЙ	26 VŠAKÝ	30 Ç' DO	34 כָּל
KOMUNA KVALITO	3 CADA	7 DE TOT FELUL	11 ETHVERT SLAGS	15 IGASUGUNE	19 ВСЯКИЙ	23 WSZELKI	27 [illegible]	31 [illegible]	35 毎種
	4 DI OGNI SPECIE	8 JEDER	12 HVARJE SLAGS	16 KAIKENLAINEN	20 ВСѢКАКЪВ	24 VŠELIKÝ	28 ΚΑΘΕ ΕΙΔΟΥΣ	32 هر نوع	36 あらゆる
Ĉial.	1 FOR EVERY REASON	5 EN TOT CAS	9 OVERAL OM	13 MINDENÉRT	17 DEL VISKO	21 ЗА СВЕ	25 ZA SVE	29 HER SEBEBDEN	33 لكل سبب
	2 POUR TOUTE RAISON	6 EM TODA CAUSA	10 OVERAL OM	14 ALLS VEGNA	18 VISA DĒĻ	22 ІЗ ЗА ВСЕГО	26 Z KAŽDÉHO DÔVODU	30 PER Ç' DO SHKAK	34 [illegible]
KOMUNA KAŬZU	3 POR TODA RAZÓN	7 TOATE MOTIVELE	11 AV ENHVER GRUND	15 IGAL PÕHJUSEL	19 ЗА ВСЕ	23 Z KAŻDEJ PRZYCZYNY	27 [illegible]	31 [illegible]	35 無論如何
	4 DI OGNI CAUSA	8 AUS JEDEM GRUNDE	12 AV ALLA SKÄL	16 JOKA SYYSTÄ	20 ЗА ВСИЧКО	24 Z KAŽDÉHO DÔVODU	28 ΔΙΑ ΚΑΘΕ ΛΟΓΟΝ	32 [illegible]	36 色々なわけで
Ĉiam.	1 ALWAYS	5 SEMPRE	9 ALTIJD	13 MINDENKOR	17 VISADOS	21 УВЕК	25 UVIJEK	29 DAYMA	33 دائما
	2 TOUJOURS	6 SEMPRE	10 ALTIJD	14 ÁVALT	18 VIENMĒR	22 ВСЕ	26 VŽDY	30 KURDOHERË	34 תָּמִיד
KOMUNA TEMPO	3 SIEMPRE	7 TOTDEAUNA	11 ALTID	15 ALATI	19 ВСЕГДА	23 ZAWSZE	27 [illegible]	31 [illegible]	35 恒常
	4 SEMPRE	8 IMMER	12 ALTID	16 AINA	20 ВСѢКОГА	24 VŽDY	28 ΠΑΝΤΟΤΕ	32 همیشه	36 常に
Ĉie.	1 EVERYWHERE	5 A TOT ARREU	9 OVERAL	13 MINDENÜTT	17 VISUR	21 СВУДА	25 SVUDA	29 HER YERDE	33 في كل مكان
	2 PARTOUT	6 EM TODA A PARTE	10 OVERAL	14 ALLSSTAÐAR	18 VISUR	22 ВСЮДИ	26 VŠADE	30 KUDO	34 בְּכָל מָקוֹם
KOMUNA LOKO	3 EN TODAS PARTES	7 PRETUTINDENI	11 OVERALT	15 IGAL POOL	19 ПОВСЮДУ	23 WSZĘDZIE	27 [illegible]	31 [illegible]	35 不論何處
	4 OGNI DOVE	8 ÜBERALL	12 ÖFVERALLT	16 KAIKKIALLA	20 НА ВСѢДѢ	24 VŠUDE	28 ΠΑΝΤΟΥ	32 همه جا	36 到る處
Ĉiel.	1 IN EVERY WAY	5 A TOTA MANERA	9 OP ALLE WIJZEN	13 MINDENHOGY	17 VISAIP	21 СВАКОЈАК	25 SVAKOJAKO	29 HER SURETLE	33 بكل طريقة
	2 DE TOUTE MANIERE	6 DE TODAS AS FORMAS	10 OP ALLE WIJZEN	14 Á ALLAN HÁTT	18 VISĀDI	22 ВСЯКИМ СПОСОБОМ	26 KAŽDÝM SPÔSOBOM	30 NE Ç' DO MËNYRË	34 בְּכָל אֹפֶן
KOMUNA MANIERO	3 DE TODOS MODOS	7 IN TOATE MODURILE	11 PÅ ENHVER MÅTE	15 IGATI	19 ВСЯЧЕСКИ	23 W KAŻDY SPOSÓB	27 [illegible]	31 [illegible]	35 不論何様
	4 IN OGNI MODO	8 IN JEDER WEISE	12 PÅ ALLT SÄTT	16 KAIKIN TAVOIN	20 ВСѢКАКЪ	24 VŠELIJAK	28 ΠΑΝΤΟΙΟΤΡΟΠΩΣ	32 هر طور	36 色々と
Ĉies.	1 EVERYBODY'S	5 DE TOT HOM	9 VAN IEDEREEN	13 MINDENKIÉ	17 VISKO VISŲ	21 СВАЧИЈЕ	25 SVAČIJE	29 HERKESIN	33 لكل
	2 DE TOUT LE MONDE	6 DE TODOS	10 VAN IEDEREEN	14 SJERHVERS	18 KATRA, -AS	22 ВСІХ	26 KAŽDÉHO	30 (I, E) TË GJITHVE	34 [illegible]
KOMUNA POSEDO	3 DE TODOS	7 AL TUTUROR	11 ENHVERS	15 KÕIGI	19 ВСЕМ ПРИНАДЛЕЖАЩИЙ	23 KAŻDEGO	27 [illegible]	31 [illegible]	35 無論何人
	4 DI OGNUNO	8 EINES JEDEN	12 VARS OCH ENS	16 JOKAISEN	20 ВСѢЧИЙ	24 KAŽDÉHO	28 ΚΑΘΕΝΟΣ	32 مال هركس	36 各人の
Ĉio.	1 EVERYTHING	5 TOT	9 ALLES	13 MINDEN	17 VISKAS	21 СВЕ	25 SVE	29 HERŞEY	33 كل شيء
	2 TOUT	6 TUDO	10 AL	14 ALT SJERHVAÐ	18 VISS	22 ВСЕ	26 VŠETKO	30 Ç'DO GJÂ	34 [illegible]
KOMUNA OBJEKTO	3 TODO	7 TOT	11 ALT	15 KÕIK	19 ВСЕ	23 WSZYSTKO	27 [illegible]	31 [illegible]	35 全體
	4 TUTTO	8 ALLES	12 ALLT	16 KAIKKI	20 ВСИЧКО	24 VŠE	28 ΚΑΘΕ	32 همه چیز	36 總て
Ĉiom.	1 ALL OF IT	5 EL TOT	9 ALLES	13 MINDANNYI	17 VISKĄ	21 СВЕКОЛИКО	25 SVEKOLIKO	29 HEPISI	33 كل
	2 LE TOUT	6 O TODO	10 ALLES	14 ALT SAMAN	18 VISU	22 ВСЯКА КІЛЬКІСТЬ	26 VŠETKO	30 GJITHË	34 [illegible]
KOMUNA KVANTO	3 TODO	7 TOT ORICÂT	11 DET HELE	15 KÕIK	19 ВСЕ	23 WSZELKĄ ILOŚĆ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 全部
	4 IL TUTTO	8 ALLES	12 I ALLO	16 KAIKIN MÄÄRIN	20 ВСЪКОЛКО	24 VŠECEK	28 ΟΛΟΝ	32 تمامش	36 すっかり
Ĉiu.	1 EVERYONE EACH	5 CADASCÚ	9 IEDER	13 MINDENKI	17 KIEKVIENAS	21 СВАКИ	25 SVAKI	29 HERKES	33 كل احد
	2 CHACUN	6 CADA UM	10 IEDER	14 SJERHVER	18 KATRA KATRS	22 КОЖДИЙ	26 KAŽDÝ	30 KUSHDO	34 [illegible]
KOMUNA INDIVIDUO	3 TODOS. CADA UNO	7 FIECARE	11 ENHVER	15 IGAÜKS IGA	19 ВСЯКИЙ	23 KAŻDY	27 [illegible]	31 [illegible]	35 無論何人
	4 OGNUNO	8 JEDER	12 VARJE	16 JOKAINEN	20 ВСѢКИ	24 KAŽDÝ	28 ΚΑΘΕΙΣ	32 هركس	36 各. 皆

LA KORELATIVOJ EN 36 LINGVOJ.

1 ANGLA	5 KATALUNA	9 HOLANDA	13 HUNGARA	17 LITOVA	21 SERBA	25 KROATA	29 TURKA	33 ARABA
2 FRANCA	6 PORTUGALA	10 FLANDRA	14 ISLANDA	18 LATVA	22 UKRAINA	26 SLOVAKA	30 ALBANA	34 HEBREA
3 HISPANA	7 RUMANA	11 DAN. NORV.	15 ESTONA	19 RUSA	23 POLA	27 ARMENA	31 JUDA	35 ĤINA
4 ITALA	8 GERMANA	12 SVEDA	16 FINA	20 BULGARA	24 ĈEĤA	28 GREKA	32 PERSA	36 JAPANA

Nenia. NEA KVALITO	1 NO KIND	5 CAP	9 GEEN	13 SEMMIFÉLE	17 JOKS	21 НИКАКАВ	25 NIKAKAV	29 HIÇ BIR NEV	33 لا نوع
	2 AUCUN	6 NENHUM	10 GEEN	14 EINSKISKONAR	18 NEKĀDS	22 НІЯКИЙ	26 NIKTORAKÝ	30 AS NJI	34 שום
	3 NINGUN	7 DE NICI UNFEL	11 INGEN (SLAGS)	15 EI MINGISUGUNE	19 НИКАКОЙ	23 NIJAKI	27 ոչինչ	31 קיינער / קיין שום	35 不同
	4 NESSUNO	8 KEINERLEI	12 INGEN (SLAGS)	16 EI MINKÄÄNLAINEN	20 НИКАКЪВЪ	24 NIJAKÝ	28 ΟΥΔΕΝ ΕΙΔΟΣ	32 هيچنوع	36 どんな…も…ない
Nenial. NEA KAŬZO	1 FOR NO REASON	5 PER CAP RAO	9 NERGENS OM	13 SEMMIÉRT	17 NĖ DEL KO	21 ЗА НИШТА	25 NIŠTA ZA	29 BILA SEBEB	33 بلا سبب
	2 POUR AUCUNE RAISON	6 POR NENHUM MOTIVO	10 NERGENS OM	14 AF ENGRI ÁSTAEÐU	18 NEKĀDA IEMESLA DĒĻ	22 ЗА НИЩО	26 Z ŽIADNEHO DOVODU	30 PER AS NDONJI SHKAK	34 [illegible]
	3 POR NINGUN MOTIVO	7 PENTRU NICI UN MOTIV	11 AV INGEN GRUN	15 EI MILLEGIPÄRAST	19 ЗА НЕЧТО	23 Z ŻADNEJ PRZYCZYNY	27 առանց պատճառի	31 [illegible]	35 無理
	4 P. NESS. MOTIVO	8 AUS KEINEM GRUNDE	12 AV INGEN ORSAK	16 EI SYY	20 ЗА НИЩО	24 ŽIADNEHO DOVODU	28 ΔΙΑ ΚΑΜΙΑΝ ΑΙΤΙΑΝ	32 هيچطور	36 どうして…も…ない
Neniam. NEA TEMPO	1 NEVER	5 MAI	9 NOOIT	13 SEMMIKOR	17 NIEKADOS	21 НИКАДА	25 NIKADA	29 ASLA	33 ابداً
	2 NE-JAMAIS	6 NUNCA	10 NOOIT	14 ALDREI	18 NEKAD	22 НИКОЛИ	26 NIKEDY	30 AS KUR	34 [illegible]
	3 NUNCA	7 NICIODATĂ	11 INGENSINNE	15 EI IIALGI	19 НИКОГДА	23 NIGDY	27 երբեք	31 [illegible]	35 永不
	4 MAI	8 NIEMALS	12 ALDRIG	16 EI KOSKAAN	20 НИКОГА	24 NIKDY	28 ΠΟΤΕ	32 هيچوقت	36 決して…ない
Nenie. NEA LOKO	1 NOWHERE	5 EN LLOC	9 NERGENS	13 SEHOL	17 NIEKUR	21 НИГДЕ	25 NIGDJE	29 HIÇ BIR YERDE	33 لا مكان
	2 NULLE PART	6 EM PARTE ALGUMA	10 NERGENS	14 HVERGI	18 NEKUR	22 НІГДЕ	26 NIKDE	30 NË AS NJI VËNT	34 [illegible]
	3 EN NINGUN SITIO	7 NICĂIREA	11 INGENSTEDS	15 EI KUSKIL	19 НИГДЕ	23 NIGDZIE	27 [illegible]	31 [illegible]	35 無地
	4 IN NESS. LUOGO	8 NIRGENDS	12 INGENSTÄDES	16 EI MISSÄÄN	20 НИГДЕ	24 NIKDE	28 ΠΟΥΘΕΝΑ	32 هيچجا	36 どこに…も…ない
Neniel. NEA MANIERO	1 NOHOW	5 DE CAP MANERA	9 GEENSZINS	13 SEMMIKÉP	17 NIEKAIP	21 НИКАКО	25 NIKAKO	29 HIÇ BIR SURETLE	33 لا طريقة
	2 NULLEMENT	6 POR FORMA ALGUMA	10 GEENSZINS	14 ENGAN VEGINN	18 NEKĀDĀ VEIDĀ	22 НІЯКИМ СПОСОБОМ	26 ŽIADNÝM SPÔSOBOM	30 NË AS NJI MËNYRË	34 [illegible]
	3 EN NINGUN MODO	7 IN NICI UN MOD	11 INGENLUNDE	15 EI KUIDAGI	19 НИКАК	23 W ŻADEN SPOSÓB	27 [illegible]	31 [illegible]	35 不怎樣
	4 IN NESS. MODO	8 AUF KEINE ART	12 PÅ INTET SÄTT	16 EI MITENKÄÄN	20 НИКАКЪ	24 NIJAK	28 ΜΕ ΚΑΝΕΝΑ ΤΡΟΠΟΝ	32 هيچطور	36 どうして…も…ない
Nenies. NEA POSEDO	1 NOBODY'S	5 DE NINGÚ	9 NIEMANDS	13 SENKIÉ	17 NIEKIENO	21 НИЧИЈ	25 NIČIJI	29 HIÇ BIRININ	33 لا لأحد
	2 DE (A) PERSONNE	6 DE NINGUEM	10 NIEMANDS	14 EINSKIS	18 NEVIENAM	22 НИЧИЙ	26 NIKOHO	30 (I, E) ASNJIU	34 [illegible]
	3 DE NADIE	7 AL NIMĂNUI	11 INGENS	15 EI KELLEGI	19 НИЧЕЙ	23 NICZYJ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 無人的
	4 DI NESSUNO	8 NIEMANDES	12 INGENS	16 EI KENENKÄÄN	20 НИЧИЙ	24 NIČI	28 ΟΥΔΕΝΟΣ	32 مال هيچكس	36 誰の…も…ない
Nenio. NEA OBJEKTO	1 NOTHING	5 RES	9 NIETS	13 SEMMI	17 NIEKAS	21 НИШТА	25 NIŠTA	29 HIÇ BIR ŞEY	33 لا شيء
	2 RIEN	6 NADA	10 NIETS	14 EKKERT	18 NEKAS	22 НИЧО	26 NIČ	30 ASGJÂ	34 [illegible]
	3 NADA	7 NIMIC	11 INGENTING	15 EI MISKI	19 НИЧТО	23 NIC	27 ոչինչ	31 [illegible]	35 無
	4 NULLA	8 NICHTS	12 INGENTING	16 EI MITÄÄN	20 НИЩО	24 NIC	28 ΤΙΠΟΤΑ	32 هيچچيز	36 何も…ない
Neniom. NEA KVANTO	1 NOT A BIT	5 GENS	9 NIETS ERVAN	13 SEMENNYI	17 NĖ KIEK	21 НИЧ. НИШТА	25 NIKOLIKO	29 HIÇ BIRI	33 لا ولا
	2 RIEN D. TOUT	6 NADA ABSOLUTAMENTE	10 NIETS ERVAN	14 ALLS EKKERT	18 NEMAZ	22 НІЧО	26 NIČ	30 ASPAKË	34 [illegible]
	3 NADA	7 NIMIC	11 INGENTING	15 EI MIDAGI	19 НИСКОЛЬКО	23 ŻADNA ILOŚĆ	27 [illegible]	31 [illegible]	35 沒有
	4 NIENTE AFFATTO	8 NICHTS	12 ICKE DET MINSTA	16 EI MITÄÄN	20 НИКОЛКО	24 PRANIC	28 ΚΑΘΟΛΟΥ	32 هيچقدر	36 少しも…ない
Neniu. NEA INDIVIDUO	1 NOBODY	5 NINGÚ	9 NIEMAND	13 SENKI	17 NĖVIENAS	21 НИКО	25 NIKO	29 HIÇ BIRADEM	33 لا احد
	2 PERSONNE	6 NINGUEM	10 NIEMAND	14 ENGINN	18 NEVIENS	22 НІХТО	26 NIKTO	30 AS NJI ASKUSH	34 [illegible]
	3 NADIE NINGUNO	7 NIMENI	11 INGEN	15 EI KEEGI, EI MINGI	19 НИКТО	23 NIKT	27 ոչ ոք	31 קיינער	35 無人
	4 NESSUNO	8 NIEMAND	12 INGEN	16 EI KUKAAN	20 НИКОЙ	24 NIKDO	28 ΟΥΔΕΙΣ	32 هيچكس	36 誰も…ぬ

DUA PARTO


Krestomatio

DUA PARTO KRESTOMATIO

LA ĈEVALO KAJ LA VIRBOVO.

Fablo de Lessing.

EL "ESPERANTO JUNULARO"



Sur viglega ĉevalo riskema knabo fiere preterflugis. Sovaĝa virbovo ekvokis al ĝi: "Hontindege! al knabo mi ne permesas estri min!" "Sed mi", la ĉevalo respondis. "Ĉar kian honoron povus alporti al mi, se mi ĵetus teren knabon?"

Esperantigis Kurt Muller en Freital.




ANDROKLO KAJ LA LEONO.

EL "ESPERANTO JUNULARO"



Antaŭ 2000 jaroj riĉa viro en Romo traktis sian sklavon Androklo tiel kruele, ke tiu fine forkuris. Kiam en Afriko li volis kaŝi sin en kaverno, leono jam kuŝis interne. Androklo ektimegis kaj tremis; sed la leono ne alsaltis lin, sed malrapide sin levis, lamis al li kaj metis sian antaŭan piedegon en lian manon. Tiam Androklo vidis, ke en la piedego sidas dorno. Singarde li eltiris la dornon kaj lavis la vundon per akvo. Nun la leono dankeme lekis la manon de Androklo kaj lasis sin tuŝeti kaj karesi. Baldaŭ ambaŭ estis la plej intimaj amikoj. Ili loĝadis kune en la kaverno; Androklo kvietigis sian malsaton helpe de la bestoj, kiujn la leono mortigis kaj alportis.




Iunokte la leono foriris por ĉasi, sed ne revenis. Ne multe poste ankaŭ Androklo estis kaptata. Oni ligis kaj portis lin al lia estro en Romo. Por puni lian forkuron, tiu kondamnis lin al tio, batali kun sovaĝaj bestoj en cirko. La tago de la spektaklo alproksimiĝis. Oni enmanigis al Androklo glavon kaj lokis lin meze de la areno. Poste oni malfermis kaĝon, el kiu elsaltis grandega leono. Sed treege ekmiris la rigardantoj, kiam la bestego humile metis sin al la piedoj de Androklo, lekis liajn manojn, laŭte blekegis pro ĝojo kaj lasis sin karesi. Ĉiuj aplaŭdis per la manoj kaj volis sciiĝi, kiel tio estas ebla. Androklo rakontis sian travivaĵon. Per tio ĉiuj estis kortuŝataj tiamaniere, ke oni donacis al li la liberecon kaj la leonon krome. Prezentante la malsovaĝan beston, tiu de nun sin vivtenis.

Prof. Dr. Penndorf.



EL LA LERNEJO.

EL "ESPERANTO JUNULARO"



Friĉjo, venante el la lernejo: Hodiaŭ mi devis punstari en la angulo, ĉar mi estas priridinta nian instruiston.

Patrino: Sed, karulo mia, kiel vi povis priridi lin! Estas do tre malĝentile.

Friĉjo: Nu, aŭskultu, li volis kredigi al ni: la suno staras trankvile kaj la tero turniĝas ĉirkaŭ sin mem en dudek kvar horoj, kaj tiamaniere, li ankaŭ diris, estiĝas tagoj kaj noktoj, kaj kiam ni havas tagon, la amerikanoj havas nokton, kaj inverse.

Patrino: Sed en tio la instruisto estas tute prava, ĉar tio estas ja realaĵo!

Friĉjo: Tamen mi ne povas kredi ĝin, ĉar mi

pensas: se estus vere, nia Zeppelino ne estus bezoninta tiom da tempo por veturi Amerikon. Ĝi tie ĉi en Germanujo estus suprenirinta, kaj en la aero ĝi estus atendinta, ĝis la tero estus duone turniĝinta, kaj poste, super Ameriko, ĝi estus reveninta malsupren.


Tradukis M. Heinrich, Potsdam.




Avara riĉulo estas pli mizera ol malriĉulo.

(Fablo de L. Tolstoj.)

EL "ESPERANTO JUNULARO"



Vivis malriĉa homo. Foje li kuŝiĝis por dormi, sed neniel li povis ekdormi: ĉiam nur unu sola penso moviĝis en lia kapo: "Ho, se mi riĉulo estus! Bonege mi vivus kaj ankaŭ al aliaj helpus." "Ĉu vi volas esti riĉa," demandis lin iu el la angulo subite, "jen por vi monujo." Kaj kvazaŭ de la ĉielo monujo falis al la malriĉulo sur la benkon. "Ĝi ne estas simpla monujo," ree diris la voĉo el la angulo, "en ĝi troviĝas nur unu ora monero; kiam vi ĝin elprenos, tuj tie aperos alia; vi povas preni el ĝi, kiom ajn da moneroj vi volos, sed poste ĵetu la monujon en la riveron; atentu nur, antaŭ ol vi ne estos forĵetinta la monujon, timu elspezi eĉ unu moneron, alie ili ĉiuj iĝos ŝtonpecoj."



La malriĉulo preskaŭ sensaĝiĝis pro ĝojego. Ne tuj li plenkonsciiĝis kaj ekobservis la monujon. Kiam li fine elmonujigis la moneron tuj en la monujon ekmoviĝis alia. "Dum la nokto mi elprenos grandan aron da ormoneroj kaj morgaŭ mi estos riĉulo," pensis li, "poste mi ĵetos la monujon en la riveron kaj bone ekvivos." Sekvantan matenon li pensis alie. "Ĉu ne estas eble al mi havigi ankoraŭ similan aron da ormoneroj? Ĉu estos malfacile sidi super la monujo ankoraŭ unu tagon?" Jen li estas elpreninta duan aron da ormoneroj, kaj poste ankoraŭ li volas pli kaj plimultigi la monon sian, neniel li povas disiĝi sin de la monujo. Nur nigran panon li manĝas, la mizerulo, kaj ĉiam elprenadas la oron, dum noktoj longaj ne fermas eĉ unu okulon.



Tiamaniere forpasis jam unu semajno, kaj tuta monato, kaj tuta jaro; ĉiam li ne povas disiĝi sin de la monujo. Kaj ĉiam li vivas kiel mizerulo. Pripensiĝas li iafoje iri al la rivero por forĵeti la monujon, li denove hejmenvenas kun la monujo. Maljuniĝis li tute, flaviĝis mem kiel la oro, tamen la ormonerojn li ne ĉesas elmonujigi. Fine mortis li en mizero, sur sia benko, kun la monujo en la mano.

Rusaj Proverboj: 1. Por avarulo mono estas same kiel fojno por hundo: Ĝi kuŝante sur ĝi nek mem manĝas, nek al aliaj lasas. 2. Ŝafo lanon kreskigas, avarulo monon kolektas, sed ne por si. 3. Li jam en tombon rigardas, tamen pro kopeko ektremas.

El la rusa lingvo tradukis: J. Golubcov, Vladivostok.



LA MALJUNULO KAJ LA MORTO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Dum vintra tempo malriĉa kaj maljuna homo venis el la arbaro, portante faskon da ligno sur siaj ŝultroj. Malrapide li ŝancelpaŝis, kaj fine ĝemante li falis teren ĉe la vojo. "Ho kara Dio!" li ekkriis. "Kion mi profitas de la vivo krom ĉiama penego kaj turmentiĝo? Venu, ho Morto, kaj helpu min!"


Jen, subite voĉo eksonis de malantaŭ li. "Kion vi deziras? Vi ja vokis min; jen mi estas." Li turnis sin kaj—timigite ekvidis la Morton. "Ha!" li diris, "estas vi. Mi nur volis peti vin: ree meti la faskon sur mian ŝultron, por ke mi povu plu porti ĝin!"

Ridetante helpis la Morto, kaj kviete la maljunulo daŭrigis sian iradon, por ĝui plejeble longtempe sian penigan vivon.

Prof. Dr. Penndorf.

LA MUSETO KAJ LA PASERO.

DE VICTOR EFTIMIU.
EL "VERDA STELO"



—Fratineto, kiom mi amas vin! Vi estas same eta kiel mi, kaj vi estas samkolora. Kiam mi vidas vin venantan malsupren de sur la arbo, por greneroj, ŝajnas al mi, ke mi mem havas flugiletojn.

—Neniam vi havos flugilojn! respondis superece al ĝi la pasero. Mi ne estas via fratino, kaj mi petas, ne plu nomu min tiel. Tre povas esti, ke mi estas same eta kiel vi, ke mi manĝas la samajn grenerojn kaj estas samkolora; sed ne forgesu, ke mi flugas, dum vi restas sentaŭga museto! Nenio kunligas nin, eĉ ne proksimigas nin almenaŭ. Kaj ni neniam estos kune...

Edifo. Mi forgesis diri al vi, ke tiu ĉi diskuto okazis en la stomako de kato.

El la rumana originalo trad. Tiberio Morariu.



LA LIPOJ DE LA LEPORO.

LITOVA FABELO.
EL "ESPERANTO JUNULARO."



Leporo iris dronigi sin. Survoje ĝi renkontis pegon. La pego demandis ĝin: "Kial, frato, vi estas tiel malĝoja? Kien vi iras?" "Ĉu mi ne devas esti malĝoja?"respondis la leporo, "neniu min timas, sed mi devas timi ĉiujn. Ĉiuj pri mi ridas. Oni diras, ke eĉ folieto povas timigi min. Mi iros kaj dronigos min." "Ne estu malsaĝa", diris la pego, "se vi volas, ke iu timu vin, iru en arbetaĵon kaj atendu, ĝis kiam vi ekvidos ŝafojn paŝtatajn sur kampo. Tiam eksaltu el la arbetaĵo, kaj la ŝafoj certe ektimos vin kaj forkuros."

La leporo obeis la pegon, alvenis al la arbetaĵo kaj tie kaŝiĝis. Kiam la leporo ekvidis ŝafojn, ĝi saltis el la arbetaĵo, la ŝafoj ektimis kaj forkuris malproksimen. Tio ĝojigis la leporon kaj ĝi komencis ridi. Ĝi ridis tiel longe kaj forte, ke eĉ ĝiaj lipoj partiĝis.

Esperantigis J. Kutra.

LA PLEJ BELA MANO.

LEGENDO EL LA BOHEMA ARBARO
EL "VERDA STELO"



Antaŭ multaj, multaj jaroj vivis reĝo, al kiu tri filoj estis naskitaj en la sama horo. Sentinte, ke li mortos baldaŭ, li vokis la filojn al sia lito kaj diris: Vi scias, ke mi amas vin, vin ĉiujn sen diferenco. Sed vi scias ankaŭ, unueco devas regi en lando. Do venu al mi, kaj ĉiu donu al mi sian dekstran manon! Kiu havas la plej belan manon, estos reĝo post mi.

Nun la unua demetis sian ganton kaj donis venkocerte la dekstran manon al la patro. Ĝi estis blanka kaj maldika kaj bonodoris je mosko. Sed la maljuna reĝo skuis la kapon.—

La mano de la dua reĝido estis ornamita per multekostaj ringoj, kaj la ungo de la malgranda fingro lumetis kiel rozkolora ŝovelilo. Sed la maljuna reĝo skuis la kapon.—

La mano de la tria princo estis brunigita de la suno, kaj la reĝo sentis malmolajn kalojn. Ĉiuj korteganoj fortiris la buŝojn. Sed la maljuna reĝo kapbalancis ĝoje kaj donis al la tria princo la reĝan kronon.

Fr. Mimler.



LA PREĜEJA SONORILO.

EL "ESPERANTO JUNULARO"




La malamikoj venis por detrui la urbon. Oni ĵus akiris novan preĝejan sonorilon, kaj ĝin oni volonte savus. Iu proponis kaŝi ĝin en la tero: alia, ke oni ĝin enigu en la maron, kaj tion oni decidis. Kvin viroj luis boaton kaj veturis sur la maron kun la sonorilo. Oni ĝin faligis en la akvon. Viro demandis: "Kiel retrovi ĝin?" Alia viro respondis: "Ni per tranĉilo marku la boatrandon, kie ni faligis ĝin." "Jes tion ni faros!" Ili ne plu vidis la preĝejan sonorilon.

Laŭ memoro rakontis Holger Aersoe.

FABLO DE LA MUŜO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Bovo kun plugilo sin trenis penlaborante. Dume muŝo sur ĝiaj kornoj sidis ripozante. Survoje ili renkontis alian muŝon. Ĉi tiu demandis: "De kie vi venas, fratineto?" Kaj tiu, sidanta sur la kornoj, suprenlevinte la nazon, respondis: "De kie?...Ni plugis".

J. Seriŝev.



LA MALJUNA AVO KAJ LA NEPO.

DE FRATOJ GRIMM.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Estis iam maljunegulo, al kiu la okuloj estis malklariĝintaj, la oreloj surdiĝintaj, kaj liaj genuoj tremadis. Sidante ĉe la tablo kaj apenaŭ povante teni la kuleron, li disŝutis supon sur la tablotukon, kaj iom ankaŭ refluis el lia buŝo. Lia filo kaj ties edzino naŭziĝis pro tio, kaj tial la maljuna avo fine devis sidiĝi post la forno en la angulo, kaj ili donis al li lian manĝaĵon en argilan pladeton kaj eĉ ne sufiĉe; tiam li rigardis malĝoje al la tablo, kaj la okuloj al li malsekiĝis. Iam ajn liaj trememaj manoj ne povis firme teni la pladeton; ĝi falis teren kaj rompiĝis. La juna virino riproĉis, sed li diris nenion kaj nur ĝemis. Tiam ŝi aĉetis al li lignan pladeton por kelkaj heleroj; el ĝi li nun devis manĝi. Kelkajn tagojn poste, kiam ili estis sidantaj, la nepeto kvarjara kunportis lignaĵetojn sur la planko. "Kion vi faras?" demandis la patro. "Mi faras trogeton", respondis la infano, "el ĝi miaj gepatroj manĝu, kiam mi estos plenkreska". Viro kaj virino momenton alrigardis unu la alian, fine ili ekploris, venigis tuj la maljunan avon al la tablo kaj lasis lin de nun ĉiam manĝi kun si. Ili ankaŭ diris nenion, kiam li iomete disŝutis.

El la germana de P. Glockner.

LA KAMPARANO KAJ LA CIKONIO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Matenon kiam la kamparano ekstariĝis el la lito, li eliris en la korton por sciiĝi pri la vetero. Li rigardis sian kampon kun tre longpajla hordeo; kaj kion li vidas? tre grandan cikonion irantan en kaj sur la hordeo. Li vokis la du servistojn siajn, por ke ili forigu la cikonion. La unua volas eniri en la hordean kampon, sed la dua prenis lin je la brako kaj diris: "Ne eniru en la kampon, ĉar vi piedfrapos la hordeon". "Jes prave", diris la kamparano, "sed kion fari?" La servisto respondis: "Ni alvoku la kvar servistojn de la najbaro kaj ili helpu nin. Ni faru el ligno grandan platon, sur kiu ni ses viroj facile povas porti vian unuan serviston." Kiel priparolite, tiel farite. Bela longa vojo en la kampo estis la rezulto.

Laŭ memoro rakontis Holger Aersoe.



LA PAROLANTA URSO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."




En densa arbaro vivis granda urso. Du vojaĝantaj ĉasistoj aŭdis pri ĝi kaj diris: "Tiun ni baldaŭ kaptos!" Ĉiutage ili iris en la arbaron. Vespere ili revenis en la gastejon, kaj kvankam ili ne havis monon, ili trinkis la plej bonan vinon. "La urso", ili diris al la gasteja posedanto, "pagos niajn ŝuldojn per sia felo!" Iutage ili ekvidis la bestegon. Unu de la ĉasistoj, netrafante pro timo, grimpis sur arbon. La alia, kies pafilo ne funkciis, teren kuŝiĝis kaj ŝajnigis esti senviva, ĉar oni estis rakontinta al li, ke urso ne interesiĝas pri senvivuloj. La urso flaris je liaj buŝo, nazo kaj oreloj, kaj poste foriris. La ĉasisto, kiu estis grimpinta sur la arbon, malsupreniĝis kaj ŝercante diris al la alia: "Kion diris al vi la urso en la orelojn?" La alia respondis: "Li diris, ni ne devas vendi la ursan haŭton, antaŭ ol ni havas la urson!"

El la germana de A. Rumpf.

KVIN AŬ SEP.

EL "ESPERANTO JUNULARO"



La kamparano Homulo, aĉetinte en la urbo ses ĉevalojn, kondukis ilin hejmen. Survoje li sidiĝis sur unu el ili, kaj la ceteraj kvin kuris antaŭ li. Rajdante li kalkulis:

"Unu, du, tri, kvar, kvin—kio tio estas? Mi do ses ĉevalojn aĉetis kaj kial mi nur vidas kvin?" Ne kredante siajn proprajn okulojn, li kelkfoje trakalkulis la antaŭkurantajn ĉevalojn, kaj ĝuste la sesa ĉevalo perdiĝis. Rajdante li pensis pri la malbona ŝtelisto. Apud sia domo li haltis. La edzino aŭskultis la okazintaĵon, poste ŝi diris: "Trankviliĝu, mia saĝa edzo, vi vidas nur kvin ĉevalojn, kaj mi vidas sep."

Esperantigis Davido Glizer.

FESTENO ĈE LA ĈEFEKZISTAĴO.

DE I. S. TURGENIV.

EL "LINGVO INTERNACIA"



Unu fojon la Ĉefekzistaĵo ekpensis aranĝi grandan festenon en Lia ĉieleblua palaco.

Ĉiuj Virtoj estis de Li alvokitaj kiel gastinoj. Sole la Virtoj... la virojn Li ne invitis... sole virinojn.

Kolektis sin tre multe da ili—grandaj kaj malgrandaj. La malgrandaj Virtoj estis pli agrablaj kaj pli afablaj ol la grandaj; sed ĉiuj ŝajnis kontentaj—kaj ĝentile interparolis, kiel konvenas interparoli al proksimaj parencoj kaj konatoj.

Sed jen la Ĉefekzistaĵo rimarkis du belajn virinojn, kiuj, ŝajne, tute ne estis konataj unu kun la alia.

La Mastro prenis la manon de unu el tiuj ĉi virinoj kaj alkondukis ŝin al la alia.

"La Bonfareco!" diris Li, montrinte la unuan.

"La Dankemeco!" aldonis Li, montrinte la duan.


La ambaŭ Virtoj neesprimeble ekmiris: de tiu tempo, de kiam la mondo staris—kaj ĝi staris longe,—ili renkontis sin la unuan fojon.

Tradukis V. Halperin.

LA HOMO KAJ LIAJ VIVJAROJ.

LAŬ MALNOVA BRETONA LEGENDO.

EL LA GAZETO "ESPERANTO"



Kiam la Eternulo mediteme rigardis siajn kreitaĵojn li alvokis ilin—ankaŭ la homon—por decidi, kiamaniere ili vivu kaj kiom da jaroj ili restadu surtere. Alpaŝis la homo la Eternulon kaj Dio diris: "Vi, homo, estas la reĝo inter la kreaĵaro, vi ne rampu en la terpolvo, sed staru rekte. Vi posedu la donon de l' intelekto kaj parolon. Vi estru la bestojn de l' kampo, la birdojn de l' ĉielo, la vermojn de l' tero kaj ĉion en la akvo vivantan. Submetiĝu sub vi ĉiu vivantaĵo; la kreskaĵoj de l' ĝardeno kaj la fruktoj de l' arbo estu via propraĵo. Sur la tero vi vivu tridek jarojn!" — Malĝoje la homo flankestaris pensante: "Neeble, mi estros ĉion, ĝuos la belaĵojn de la mondo kaj vivos nur tridek jarojn? Pro kio nur tiom malmulte da jaroj?"—La azeno humile proksimiĝis al la Eternulo kaj Dio parolis: "Vi suferu penojn kaj toleru, ke oni multpeze ŝarĝos vian dorson. Vi spiregu kaj pro trenado laciĝu, vi tremu sub la batoj de l' kondukisto kaj ŝvitu malhavante ripozhorojn sufiĉantajn; via manĝaĵo estu dornoj kaj kardoj. Sur la tero vi vivu kvindek jarojn!"—Terenfalis la kompatinda besto ĝemkriante: "Kompatu min, Eternulo, ĉu mi suferegu kaj manĝaĉu dum kvindek jaroj? Forprenu dudek, estu kompatema!"—Kaj la homo, la vivavida, rapide genufleksis antaŭ Dio petante, ke Li donu do al li la restantajn dudek jarojn, kiujn la azeno malakceptis. Kardio ridetis kapjesante kaj plenumis la peton de l' homo.—Venis la hundo kaj la Eternulo ordonis: "Vi gardu la domon kaj kuŝu katenite sur la trezoroj. Vi malfidu eĉ la lunon kaj alboju ĉiun ombraĵon. Vi rodu ostojn kaj suĉu medolon. Sur la tero vi vivu kvardek jarojn!"—Plendkrietis la hundo vostvipante la aeron pro tio, ke li nun devos malhavi la liberecon kaj sklavece vivadi sub la jugo de l' homo kaj sin nutri per ostaĵoj kaj putra viando; li petegis Disinjoron, ke li mallongigu lian vivtempon je dudek jaroj.—Ree la homo brilokule petis, ke la Eternulo donu al li tiujn dudek jarojn. Ridetante Dio ilin bonvole donacis.—Fine saltetante alrapidis la simio, kaj parolis Kardio: "Vi nur aspektu homo, sed vi estu stulta, infanece stupida, senmensa, senracia kaj marŝu vizaĝaltere sur kvar piedoj kun dorso arkforme kurbigita. Vi estu ĝojigaĵo por infanoj kaj imitinda modelo por malsaĝuloj. Sur la tero vi vivu sesdek jarojn."—Polvenfalis la priplorinda simio balbutante, ke la Eternulo mildigu sian ordonon kaj permesu, ke tridek jaroj da vagado surtero estu sufiĉaj por tia mokinda estado.—Kaj ree la vivavida homo alpaŝis Dion kaj petpostulis la tridek jarojn de l' simio ne ŝatitajn. "Estu", respondis abrupte la Poten-



culo.—Tiel vivis la homo, la krono, la perlo inter ĉiuj estaĵoj, dum tridek jaroj, senzorge serene, feliĉe en sia juneco. Sed forflugis la junaĝo kaj—kio okazas nun? Inter la trideka kaj kvindeka jaroj zorgoj kaj penoj estas la sorto—la memelektita—de l' homo; li devas labori, laboradi ŝvitante kaj ofte eĉ ĝemplendante, toleri batojn, suferi malagrablaĵojn kaj streĉe kuneskrapi la necesan, la panon ĉiutagan. Sed—pro kio li plendas? Ĉu la Eternulo ne akurate plenumis liajn petojn, estingis la fajron de lia vivavido?—Tiuj dudek jaroj estas la azenjaroj de l' homo.—Se li ion kolektis ĝis sia jaro kvindeka li kuŝripozas sur la trezoroj, gardas la domon, fidas neniun, insultas la najbarojn kaj apenaŭ riskas manĝi nutrige pro ĵaluza envio kontraŭ si mem. Jen la hundojaroj de l' homo. Li tre ofte ĝisvivas la sepdekan jaron kaj de nun li perdas la prudenton, la intelekton, fariĝis kvazaŭ ruino, faras infanaĵojn, iras kun dorso kurbiĝinta tra la stratoj moke pririданta de petolemaj junuloj. O, la simijaroj de la homo!

Esperantigis M. Butin, L. K.



LA FORGESEMA KNABO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



La eta Menaĵo estis sovaĝa knabo. Li estis forgesema. Ĉiumatene post la leviĝo el la lito li komencis serĉadi la vestojn, librojn, kajerojn ktp., kaj neniel mem li povis trovi ilin, ĝis la patrino helpis lin. Kompreneble, ke li ĉiutage estis devigata stari malantaŭ la pordo de la lerneja ĉambro, ĉar li ĉiam malfruiĝis.

"Kion mi faru, ke mi plu ne malfruiĝu?" pensis Menaĵo. Foje enlitiĝinte por dormi, li prenis pecon da papero kaj skribis. "Miaj vestoj estas sur la seĝo, la ŝuoj sub la seĝo, mia kajero en la libro, la libro en la tornistro, la tornistro sub la skribotablo, la skribotablo en mia ĉambro, kaj mi mem en la lito." La indekson li kuŝigis sub la kusenon. Matene leviĝinte li tuj saltis el la lito teren, prenis la indekson kaj legis kun ĝojo: "Miaj vestoj estas sur la seĝo", jes, estas "miaj ŝuoj sub la seĝo"; vere, "mia kajero en la libro"; bone, "mia libro en la tornistro"; poveble, "la tornistro sub la skribotablo"; bonege, "la skribotablo en mia ĉambro"; ĝuste. "Kaj mi mem en la lito."

Menaĵo malfermas la okulojn, rigardas en la liton, sed ĝi estas malplena! "Dio mia!" ekkriis la eta Menaĵo ekmiriginte, "kaj kie do mi mem estas?"

Esperantigis Davido Glizer.



LA NOVA URSO.

EL LA GAZETO "ESPERANTO"



Jam de antikva tempo ursoj estis kaptitaj por servi kiel amuzantoj de la publiko. Ankoraŭ nun ciganoj dancigas urson en vilaĝoj, kaj gravaj ĉefurboj konservas vivantajn ursojn en apartaj fosejoj aŭ en zoologiaj ĝardenoj.

Kiu pripensas iam la malfacilan, tedan, kruelan sorton de tiuj kompatindaj bestoj, sopirantaj je sia arbaro kaj devigataj la tutan tagon starigi sur du kruroj kaj interbati manegojn por ricevi karotojn de rigardantoj?

Nu, en ukraina urbo, unu el la du publikaj ursoj mortis kaj la komunuma estraro ne havis monon por aĉeti novan. Unu vesperon, ĉe la urba laboroficejo alvenis malfeliĉa viro, eble intelektulo plendanta pri senlaboreco. La tutan tagon li serĉadis, nenion trovis kaj sentis sin jam senkuraĝa.

"Ne ploru," diris al li la laborkomisario, "ni ja trovos al vi okupon. Atendu momenteton." Kiam ĉiu alia petanto estis for kaj li per singarda ĉirkaŭrigardo konstatis ke neniu povas aŭskulti, la komisario demandis: "Ĉu vi kapablus funkciadi kiel urso?"—"Kiel urso?" respondis la malfeliĉa viro. "Ĉu mi ne parolis ĝentile?" Ĉu vi havas liberan oficon ĉe publika giĉeto?"—"Ne," respondis la komisario. "Temas pri vera urso en zoologia parko. Unu mortis kaj ni ne monpovas havigi novan, nuntempe. Se vi konsentus surmeti ĝian felon, manĝadi krudajn karotojn, interbati la manojn, k.t.p. vi ricevos la saman salajron kiel la gardisto kaj laboros nur sep horojn tage dum la parko estas malfermita al publiko."

"—Bone, bone," ekkriis la homo ĝoje, "mi provos lojale, nur ke mi ne mortu pro malsato!"

La metio estis efektive laciga. Al ĉiu infano, al ĉiu juna patrino kun bubo, al ĉiu maljuna vizitanto haltema, al ĉiu paro da naivaj gejunuloj alvenantaj, necesis imiti preĝon per manoj, kuri por serĉi falintajn karotojn, ilin manĝi, rekomenci, rekuri, restari k.t.p.

Vespere, post kiam li englutadis nekalkuleblan kvanton da karotoj, trinkadis botelojn, batadis manojn, balancadis kapon, k.t.p. ĝis plena laciĝo, li ĝojis vidante la gardiston sonorigi pri la fermo kaj svingi sian ŝlosilon alpaŝante la pordegojn.

Fine li povos kuŝiĝi kaj ripozi, eĉ sur pajlon. Li eniris la urŝan loĝejon... sed ho, ve! la pordo al najbara kajuto estis malfermita. La gardisto ĝin lasis tiel kaj jen, la alia urso turnis la kapon, lin ekvidis kaj ekpaŝis al li tute trankvile. Terure. Kion fari? Kun glaciiga timo, haltanta koro kaj febra ŝvito, li kuris al abio kaj ekgrimpis vundante la manojn per la pikantaj branĉoj de l' sav'arbo. Homa voĉo eksonis malsupre.



"He! Kamarado!" alvokis la dua urso, "ne timu tiom rapide! Ankaŭ mi estas senlaborulo kaj ni povas interfratiĝi." E. P.



ZEŬSO KAJ LA ŜAFO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



La ŝafo devis suferi multon de ĉiuj bestoj. Pro tio ĝi iris antaŭ Zeŭson kaj petis, ke li malpliigu ĝian mizeron.

Zeŭso ŝajnis esti helpema kaj diris al la ŝafo: "Mi ja vidas, mia pia kreitaĵo, mi kreis vin tro sendefenda. Nun elektu, kiamaniere mi devas korekti plej bone ĉi tiun malperfekton. Ĉu mi devas armi vian buŝon je teruraj dentoj kaj viajn piedojn je ungegoj?"

"Ho ne", la ŝafo diris; "mi ne volas havi ion komune kun la sovaĝaj bestoj".

"Aŭ", Zeŭso daŭrigis, "ĉu mi devas meti venenon en vian salivon?"

"Ho", la ŝafo kontraŭdiris; "la venenaj serpentoj ja estas tiom malamataj!"

"Nu, kion mi devas fari? Mi volas planti kornojn sur vian frunton kaj doni forton al via nuko."

"Ankaŭ ne, favorema patro; mi povus facile fariĝi same puŝema kiel la virŝafo."

"Kaj tamen", Zeŭso diris, "vi mem devas kapabli malutili, se aliaj devas zorgeviti malutili al vi."

"Ĉu mi devas tion!" la ŝafo ĝemis. "Ho, tiam lasu min, favorema patro, kia mi estas. Ĉar kapableco povi malutili estigas, mi timas, emon voli malutili; kaj estas pli bone suferi maljustaĵon ol fari maljustaĵon."

Zeŭso benis la pian ŝafon, kaj ĝi forgesis plendi de post tiu horo.

Laŭ Lessing.

LA MALMULTEKOSTA TAGMANĜO.

LAŬ P. HEBEL.

EL "ESPERANTO JUNULARO"



Restoracion de iu urbeto iam eniris gasto bone vestita. Li tuj altabliĝis sin kaj senplue postulis kuraĝe bonan supon "por sia mono". Poste li ordonis alporti ankaŭ sufiĉan porcion da legomaĵo kaj bovaĵo "por sia mono". Nun la mastro tute ĝentile demandis, ĉu ne ankaŭ glaso da vino plaĉas al li.—"Ho certe!" respondis la gasto. "Kial ne, se mi povas ekhavi bonan trinkaĵon por mia mono?" Tiamaniere kun bona apetito li ĉion manĝis kaj trinkis.

Fine li eltiris unu groŝon el sia poŝo, malnovan eluzitan moneron, kaj metis ĝin sur la tablon. "Jen, mastro, jen mia mono!"—"Kion vi pensas?", rediris la restoraciestro. "Vi ja ŝuldas al mi taleron."



"Mi ne mendis manĝaĵon por talero, sed por mia mono," respondis la kuraĝa gasto." "Jen estas mia mono. Pli multe mi ne havas. Se tro multe vi liveris por ĝi, estas via kulpo."

"Vi estas ruza fripono!" riproĉis la gastejestro. Sed ĉifoje mi pardonos al vi kaj donacos ne nur la tagmanĝon, sed krome kvingroŝan moneron, kondiĉe ke vi ne plu parolu pri la afero kaj tuj iru al mia najbaro, estro de l' hotelo Al Nigra Urso, kaj same petolu kontraŭ li!"

Senprokraste la ruza gasto ridetante ekkaptis la prezentitan monon per la unu mano, per la alia la pordfermilon, deziris bonan vesperon al la trompita mastro de l' gastejo Al Ora Leono kaj diris: "Mi bedaŭras; ĉe via najbaro, hotelestro Al Urso, mi jam estas gastiĝinta, kaj ĝuste tiu sendis min al vi."

Kiu faras truon al alia, ofte mem tien enfalas.

Prof. Dr. Penndorf.

FANFARONULO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Iam ĝardenisto kaj kaldronisto preteriris ĝardenon kun brasikoj. "Rigardu", diris la kaldronisto, "kiaj grandaj brasikoj". "Ne estas mirinde", respondis la ĝardenisto, "unufoje mi kreskigis brasikon grandan kiel domon".

"Ĉio povas okazi", diris la kaldronisto, "unufoje mi faris kaldronon grandan kiel preĝejon".

Ekridegis la ĝardenisto. "Kia fanfaronulo vi estas," diris li, "vi mensogas kaj ne ruĝiĝas! Mensogu, sed sciu mezuron. Nu diru: por kio oni bezonis tian grandan kaldronon?"

"Por kuiri vian grandan brasikon", respondis la kaldronisto.


El rusa esperantigis M. Dusanski.



LA LUPO SUR LA MORTLITO.

FABLO DE LESSING.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



La lupo agoniis kaj resendis kritikan rigardon en sian pasintan vivon. "Mi estas sendube pekulo", li diris, "sed tamen, mi esperas, ne unu el la plej grandaj. Mi faris malbonaĵojn; sed ankaŭ multon da bonaĵoj. Jam, mi memoras, blekanta ŝafido, kiu estis perdinta la ŝafaron, proksimiĝis al mi tiel, ke mi tre facile povis mortigi ĝin; kaj mi ne ektuŝis ĝin. En la sama periodo mi aŭskultis plej admirinde pasive la mokadojn kaj insultojn de ŝafo, kvankam mi ne bezonis timi gardantajn hundojn."


"Kaj mi povas atesti al vi ĉi ĉion," amiko vulpo, kiu helpis la agonianton, interrompis ĝin. "Ĉar mi memoras ankoraŭ tre bone pri ĉiuj detaloj. Estis en tiu sama periodo, kiam vi penadis vin tiel kompatinde por gluti la oston, kiun poste la bonkora gruo eltiris al vi el la gorĝo."

Esperantigis Kurt Muller, en Freital.

LA AZENO KAJ LA LUPO.

FABLO DE LESSING.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Azeno renkontis malsatan lupon. "Kompatu min", la tremanta azeno diris; "mi estas mizera malsana besto; rigardu nur, kian dornon mi irante enigis en mian piedon!"

"Vere, mi kompatas vin", la lupo respondis. "Kaj mia konscienco devigas min, ke mi liberigu vin de ĉi tiuj doloroj."

Tuj kiam la vortoj estis diritaj, la azeno estis disŝirata.

Esperantigis Kurt Muller, en Freital.



GRUO JA HAVAS NUR UNU KRURON.

EL "LA LERNANTO"



Iu itala sinjoro aranĝis grandan festenon, al kiu li invitis multajn konatulojn. Interalie dum la festeno oni devis manĝi rostitan gruon.

La manĝpretigisto de la sinjoro havis amatinon, kiu venis al li, kiam li estis rostanta la gruon. Ekvidinte la gruon, ŝi petis la manĝpretigiston doni al ŝi ĝian kruron. Li donis, ĉar li timis, ke en okazo de rifuzo ŝi ofendiĝos kaj ne plu amos lin.



Do, kiam venis la tempo de la festeno, li estis devigita doni unukruran gruon. La sinjoro tion rimarkis kaj atentigis la manĝpretigiston pri tio. "Sinjoro", diris li responde, "gruo ja havas nur unu kruron!" La sinjoro ruĝiĝis pro tia aroga mensogo, sed diris nenion.



La sekvantan tagon, la sinjoro prenis pafilon kaj ordonis al la manĝpretigisto sekvi lin, dirante ke li pruvos al li, ke gruo havas du krurojn, sed ne unu. Vole nevole, la manĝpretigisto devis obei la ordonon. Post kelka tempo ili venis al iu marĉo, kie multaj gruoj estis. Ili ĉiuj ŝajnis esti unukruaj, ĉar duan kruron ili alprenis sub sin.

"Jen, via moŝto," diris la manĝpretigisto, "vidu: gruoj havas po unu kruro!"

"Nu, mi pruvos al vi la malon", diris la sinjoro kaj li ekkriis: "U-u, u-u!" La gruoj ekflugis, kaj la dua kruro fariĝis bone videbla.

"Nu, ĉu vi fine estas konvinkita pri tio, ke gruo havas du krurojn?" demandis la sinjoro.



"Sed, via moŝto," protestis la manĝpretigisto, "vi ja ne kriis hieraŭ: U-u, u-u!"

La sinjoro tiom admiris la spritan respondon, ke li pardonis la manĝpretigiston.

Refarita laŭ Bokacio. 13.794.



LA PAVO KAJ LA KORNIKO.

Fablo de Lessing.

El "Esperanto Junularo."



Fieraĉa korniko ornamis sin per la elfalintaj plumoj de la koloraj pavoj, kaj intermiksis sin kuraĝe inter ĉi tiuj brilaj birdoj de Juno, post kiam ĝi kredis esti sufiĉe ornamita. Ĝi estis ekkonata, kaj rapide la pavoj atakis ĝin per tranĉpintaj bekoj por elŝiri el ĝi la trompan ornamon. "Ĉesu", ĝi fine ekkriis, "vi ĉiuj nun reposedas la vian." Sed la pavoj, kiuj estis rimarkintaj kelkajn proprajn brilajn svingplumojn de la korniko, kontraŭdiris: "Silentu, mizera malsaĝulo, ankaŭ ĉi tiuj ne povas aparteni al vi!"—kaj hakis plue.

Esperantigis Kurt Muller, en Freital.



LA TREZORFOSISTOJ.

Laŭ versaĵo de Aŭg. Bürger.

El "Esperanto Junularo."



Vinkulturisto, kiu estis mortonta, venigis siajn filojn al la lito kaj diris: "Ho, miaj karuloj, estu kvietaj! En nia vinberejo ja estas kaŝita granda trezoro. Nur fosu pro ĝi!"—"En kiu loko!" ĉiuj laŭte kriis al la patro. "Fosu, fosu!" ĉi tiu ripetis kaj—ho ve!—ekmortis.



Apenaŭ la maljunulo estis entombigita, kiam oni komencis fosi laŭ tutaj korpaj fortoj. La vinberejo estis trafosata ĉie kaj ĉiel per pioĉoj, hakiloj kaj fosiloj. Neniu terbulo restis netuŝita; oni ĵetis la teron eĉ tra kribrilo kaj poste tiris la rastilojn tien kaj ĉi tien, por esplori ĉiun ŝtoneton. Tamen oni ne rimarkis ian trezoron, kaj ĉiu sin sentis trompita.



Sed kiam alvenis la plej proksima jaro, tiam mirigite oni ekkonis, ke ĉiu vinberujo trioble produktis fruktojn. Nun ekprudentiĝis la filoj: do ili diligente fosadis kaj ekhavis ĉiujare pli da trezoro el sia vinberejo.

Prof. Dr. Penndorf.

PRI BAPTO.

EL "LA LERNANTO"



Dum foresto de laboristo, iun tagon, lia edzino baptigis ilian filon, sed grava afero, ŝi tute forgesis salajri la pastron.

Tiu ĉi, surstrate renkontinte la laboriston, petis de li pagon de la ŝuldo.

—Ho ve! Sinjoro pastro. Mi ne havas eĉ monereton por doni al vi!

—Malbona afero, respondis la pastro. Sed certe inter viaj konatuloj estas iu, kiu pruntos al vi la necesan monon.

—Tute ne!

—Sed vi havas fraton aŭ fratinon?

—Jes! mi havas fratinon, sed ŝi malbone kondutas!

—Kial do?

—Ŝi iĝis pastrino en monaĥinejo!

—Ne blasfemu, pekulo. Ŝi estas edzino de Dio!

—Ho! bona afero, diris la laboristo. Petu mian bofraton (Dion) pagi al vi mian ŝuldon!

K-do H. Heriot.



LA SAĜA KADIO.

(Araba Juĝisto.)

EL "ESPERANTO JUNULARO"



Iu Mahometano postlasis al siaj 3 filoj 19 kamelojn. Testamente li destinis, ke la bestoj ne estu vendataj, plue, ke la plej maljuna filo ricevu la duonon, la pli juna la kvaran parton, la plej juna la kvinan. Ĉar la filoj ne povis interkonsenti, ili petis la kadion, decidi la aferon.

Tiu diris: "Vi ja estas fratoj; do konkordiĝu pri la dividado laŭ la testamento! Sed se vi ne kapablos, revenu morgaŭ; tiam mi juĝos."—

La fratoj ne sciis solvi la problemon; sekve ili ree sin turnis al la juĝisto. La 19 kameloj staris apude. Nun la kadio igis alkonduki unu kamelon el sia posedaĵo kaj diris: "Jen estas multaĝa besto, kiu nenion plu valoras, al kiu mi havigas dumvivan nutraĵon pro la multjaraj fidelaj servoj faritaj al mi. Ĉi tiun kamelon mi aligas al via heredaĵo. Do staras 20 kameloj antaŭ vi. La plej maljuna frato nun ekprenu sian duonon!"

La unua forprenis 10 kamelojn. "La pli juna frato ekprenu la kvaran parton!"

La dua forprenis 5 kamelojn. "La plej juna frato ekprenu la kvinan!"

La tria forprenis 4 kamelojn. "Nun", diris la kadio, "mi reprenas mian multaĝan kamelon, kiun neniu el vi elektis. Via afero estas ordigita."

La juĝo de la saĝa kadio ĝenerale pro lia saĝaceco kaj justeco estis multe admirata.



RUZULINETO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



"Patrinjo", demandis la malgranda Gertrudo, "kio estas pli malbona, se, falante de sur la arbo, mi disŝiras mian veston, aŭ se mia brako rompiĝas?"—"Sed, mia infaneto, brakrompiĝo nature estas pli malbona".—"Ho, patrinjo", respondis nun Gertrudo, "jen, kiom vi povas ĝoji; ĉar feliĉe mi nur disŝiris mian veston".

Tradukis M. Heinrich.



APLOMBO.

EL "LA LERNANTO"



Maljuna soldato, kiu estis naiva kaj tre pia, nepre bezonis monon por sia multnombra familio. En sia naiveco li skribis leteron adresitan "Al la S-ro kara Dio", petante de li 100 frankojn. La poŝtistoj ne sciis, kion fari kun tiu ĉi letero. Sed ĉar ĝi venis de soldato, oni fine sendis ĝin al la generalstabo. Tie la oficiroj aranĝis monkolekton por

la malriĉulo kaj sendis al li 50 frankojn kun la noto: "De la kara Dio".

Sed ili estis tre surprizitaj, kiam ili post 8 tagoj denove ricevis leteron kun la adreso: "Al la S-ro kara Dio". La enhavo tekstis jene: "Mi tre dankas Vin pro tio ke Vi tiel rapide plenumis mian peton pri mono. Sed sekvantan fojon bonvolu ne sendi ĝin per la ĝeneralstabo, ĉar tiuj friponaj oficiroj ŝtelis 50 frankojn de la tuta sumo."

Elgermanigis W. Krey.



KAĈO.

Fabelo de M. E. Saltikov.
El "Lingvo Internacia"



La kuiristino kuiris kaĉon kaj metis sur la tablon. La sinjoroj formanĝis la kaĉon, diris dankon, kaj la infanoj ĉirkaulekis siajn fingrojn. Tre bona estis la kaĉo, ĝi plaĉis al ĉiuj kaj al ĉiuj faris plezuron. "Ha! kiel dolĉa estas la kaĉo! Ha! kiel mola estas la kaĉo! Bonega kaĉo!" tiel ĉiuj paroladis. "Kuiristino! kuiru ĉiun tagon tian kaĉon." La sinjoroj satiĝis, regalis ĝis la sato la gastojn kaj elmetis unu tason da kaĉo sur la strato por la preterirantoj. "Manĝu, bonaj homoj, iom da kaĉo! rigardu, kia ĝi estas! ĝi mem ensaltas en la buŝon. Manĝu pli, tio-ĉi plaĉas al ĝi." Kaj ĉiu aliradis, ŝovadis la kuleron en la kaĉon, manĝadis kaj viŝadis la buŝon.

La kaĉo estis tiel dividebla kaj mola, ke ne sentis eĉ la plej malgrandan maloportunecon esti manĝata. Kontraŭe, aŭskultante la laŭdojn de ĉiuj, ĝi eĉ fieriĝis. Ĝi staras sur la tablo kaj bloviĝas senĉese per la aerblovaĵoj. "Sendube, mi estas bona, se la sinjoroj min amas. Kuiristino! kial vi malrapidas? enversu ankoraŭ!"

Ĉu longan, ĉu mallongan tempon tio daŭris, sed la kaĉo iom post iom komencis malplaĉi al la sinjoroj. Ili fariĝis multe pli civilizitaj, ol antaŭe; eĉ tiuj sinjoroj, kiuj altiĝis el malnobla stato, komencis preferi gelatenojn kaj blanmanĝeojn.

"Pro Dio!" diris unu: "kia bonaĵo estas en tiu-ĉi kaĉo? Ĉu tio-ĉi estas manĝaĵo? Gustumu ĝin, kiel ĝi estas mola! kiel muka kaj dolĉa!"

"Fordonu ni tiun-ĉi kaĉon al porkoj!" daŭrigas alia, "kaj veturu al varmaj akvoj por la promenado! Ni promenu kiom ni volos, kaj poste, se estos necese, revenu domen por manĝi la kaĉon!"

Nu, bone! kial do ne? Al la kaĉo estas tute egale, de kia rango la persono ĝin manĝas, nur manĝu. La porko enŝovis sian buŝegon ĝis la oreloj en la kaĉon kaj komencis sonadi per makzeloj tiel laŭte, ke estis aŭdata en la tuta korto. Ĝi manĝas kaj krias: "mi kuŝigos, manĝinte la kaĉon de l' sinjoroj!" La malnobla porko ne scias la saton; se la kuiristino malrapidas, ĝi jam krias: "enversu ankoraŭ!" Se oni diras al ĝi: "jam la kaĉo estas formanĝita", ĝi komencas serĉi kaj fosi per la buŝo en ĉiuj anguloj kaj anguletoj kaj sub la sterko.

Manĝadis la porko, manĝadis kaj ĉion formanĝis la lasta guto. Promenadis la sinjoroj, promenadis kaj ĉion elspezis ĝis la lasta kopeko. Elspezis kaj diris unu al alia: "nu, ni ne havas plu da mono por niaj promenadoj; revenu domen por manĝi la kaĉon!"

La sinjoroj alveturis domen, prenis la kulerojn, rigardas — jen de la kaĉo nur sekaj restaĵoj! Kaj nun ĉiuj, kiel la sinjoroj, tiel ankaŭ la porkoj, krias per unu voĉo: "ni manĝis la kaĉon kaj ne konservis por la estonteco! Per kio ni kvietigos nian malsaton? Kie vi estas, kaĉo? Revoku!"

Tradukis V. Laskin.



SED NUR POR GERMANOJ.

El la gazeto "Esperanto"



Kuraĝa juna metiisto germana migris laŭ bona malnova kutimo kaj venis ankaŭ al Malaga en Suda Hispanio. Tie lin kaptis la malsano de l' fremda lando: akuta febro. Kiam fine kuracisto sin okupis pri li, li trovis la kazon sen espero. Li ne mankis tion komuniki per sekaj vortoj al la malsanulo. La germano rezignacie akceptis tiun informon. Sed por adiaŭi de tiu-ĉi mondo li ankoraŭ volis sin bone regali. Li petis la hospitalestron, ke oni servu al li la ŝatatan manĝon: Acida brasiko, pizoj kaj porka viando.

Oni havis kompaton kun la fremda migranto kaj oni prenis plenumi ties lastan deziron. Sed kie trovi en Hispanio la tute nekonatan manĝaĵon? La kuireja junulo konsilis. En la haveno troviĝis hazarde germana ŝipo. La maristoj bonkore donis por la samlandano eĉ duoblan kvanton. La malsanulo manĝis bonapetite kaj endormiĝis profunde. Post tri tagoj li revekiĝis, sana kiel fiŝo en la akvo. Ĝoje li hejmenmigris.

La hispana kuracisto mire konstatis tiun efikon resanigan de la germana nacia mangaĵo. Li notis en sian libreton: Plej bona rimedo kontraŭ febro estas porka viando kun pizoj kaj acida brasiko.

Iom poste li devis okupiĝi pri hispano kiu estis en sama stato kiel antaŭe la germano. La kuracisto certigis lin pri baldaŭa resaniĝo kaj ordonis la novan miraklan rimedon, kion li ricevis kiel an-


taŭe de germana ŝipo. La hispano kun preskaŭa abomeno englutis tiun strangan medikamenton kaj endormiĝis. Kiam la kuracisto lin revidis alian tagon li trovis lin mortinta. Tiam li reprenis la notlibron kaj aldonis post la indiko—Porka viando kun pizoj kaj acida brasiko la vortojn: sed nur por germanoj.

Mitropa ĵurnalo N-ro 190.



MENSOGOJ.

EL "LA LERNANTO"



Du homoj vetas, kiu mensogi povas la plej nekredeblaĵon. La unua komencas: "Mi havis amikon, kiu tranaĝis la Danubon glaciplenan." "Ho nenio! Mia amiko tranaĝis jam foje la La Manche-kanalon", diras la dua.

"Ho," interrompas ilin ĉeestanta tria, "foje mi spertis ion interesan. Ekveturinte per vaporŝipo al Ameriko, bruna dikulo saltas en la maron kaj eknaĝis. Ĉiu serĉo estis vana; ni jam ne trovis lin. Sed mirige, alvenante Nov-Jorkon ni ekvidas la dikulon sur la bordo atendanta nin. Li alvenis du tagojn antaŭ ni."—"Ĉu vi kredas tion?" demandas la unua la duan. "Ho ja, mi povas diri nenion," respondis la demandito, "ĉar mi estis tiu dikulo."


El hungara Tradukis Ujpestano.



LA LUPO.

LITOVA FABLO.

EL "ESPERANTO JUNULARO"




Leono volis rekompenci la lupon, kiu fidele estis servanta al ĝi.

Ĝi diris: "Mi donos al vi, lupeto, iom da tero, vi povos ĝin plugi, semi sur ĝi". Sed la lupo tuj demandis: "Ĉu mi ĝin jam povos manĝi?" "Ne, ankoraŭ ne, lupeto. Unue grenoj ekĝermos, elkreskos, maturiĝos, tiam vi rikoltos ilin". "Ĉu tiam mi jam povos manĝi?" "Ne, ankoraŭ ne! Poste vi ilin ligos je garboj; elsekiĝos ili, poste ili venos en garbejon."

Sed la lupo ree kriis: "Ĉu tiam mi jam povos manĝi?" "Ne, ankoraŭ ne! Tiam vi devos ilin draŝi, veturigi al muelejo, por ke ili estu muelataj." Lupo, nepovante atendi, kiam ĝi povos manĝi, ekpensis rifuzi la teron.

"Do vi ne volas?" demandis la leono. "Ne, mi ne volas."

"Se vi volas manĝi tuj, iru en paŝtejon: vi tie trovos ĉevalinon kun ĉevalido, tiun ĉevalidon formanĝu."




Iris la lupo al tiu ĉevalino. La ĉevalido tuj kaŝiĝis sub sia patrino, kaj la ĉevalino kuraĝe atakis la lupon. La lupo tiel forte estas forpuŝita, ke ĝi estas ĵetita supren. Li provis salti sur la ĉevalinon, sed neniel povis venki kaj manĝi.

La lupo reiris al la leono kaj plendis, ke li ne sukcesis.

Diris la leono: "Iru en la herbejon, tie ŝafoj paŝtadas: elektu la plej grandan virŝafon kaj formanĝu ĝin."

La lupo iris al la plej granda virŝafo kaj diris al ĝi: "Nu, ŝafeto, la leono ordonis al mi formanĝi cin". Ne kontraŭstaris la virŝafo, sed nur komencis afable peti: "Lupeto, frateto, ne dispecigu min, ne disŝiru mian feleton. Estas pli bone por ci, se ci iras al la barilo, apogas cin kaj malfermas la buŝegon: Mi per forta salto ensaltos vian buŝegon."



La lupo reiris kelkajn paŝojn, apogis sin kaj malfermis la buŝegon. La virŝafo ankaŭ iom reiris, tiam rapidegis antaŭen kaj frapegis la lupan vizaĝegon per siaj kornoj tiel forte, ke la lupo nur post du horoj rekonsciiĝis. Dum la lupo ŝvendormis, la virŝafo forkuris.

La vekiĝinta lupo kaŭris.

Kaŭrante ĝi turnadis la kapon, rigardadis ĉirkaŭen kaj murmuris: "Ĉu mi ĝin formanĝis, ĉu ne?... Eble mi ĝin formanĝis..."

Esperantigis J. Kutra.



LA PLEJ GRANDAJ ŜIPOJ.

EL "LA LERNANTO"



Tri maristoj, diverslandanoj, disputis pri tio, kiu nacio havas la plej grandajn ŝipojn. La unua maristo diris:

—Ĉe ni la ŝipoj estas tiel grandaj, ke la kapitano devas veturi per motorbiciklo sur la komandoran ponton por disdoni la ordonojn.

Diris la dua:—Tio estas nenio. Ĉe ni la hejtisto veturigas per ŝarĝaŭtomobilo la karbojn en la fornojn.

Opiniis la tria:—Ankaŭ tio estas nenio. Ĉe ni la ŝipoj estas tiel grandaj, ke la kuiristo veturas per submar-boato en la kuirpoton por vidi, ĉu la terpomoj jam estas finkuiritaj.

J. Walter, 15.336.



KIEL DIABLO KRESKIGIS VINBEROJN

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Antikvatempe, kiel fabelo diras, nia prapatro Adamo enigis en teron vinberĝermon. Jen kaj diablo vostumigas. "Atendu, Adamĉjo! vi vidos, kiel mi donos al via ĝermo miran povon". Li tiun ĝermon malsekigis per pava sango kaj, kiam aperis branĉeto, li ĝin fortigis per simia sango. Kreskiĝintajn berojn li malsekigis per leona sango kaj, kiam ili honfariĝis, li ŝmiris per porkgraso. Nun li tiun berkreskaĵon malbenis kaj foriris inferen.

Kaj kiaj miraĵoj! Kiam iu trinkas unu glason da vino, li paŝas kiel pavo: brusto antaŭigita, lipharoj blovigitaj—vera nobelo. Ankoraŭ unu verŝiĝas—restas gaja, ŝerca kvazaŭ simio. Se li ankoraŭ du da glasoj trinkas, li honoriĝas kiel leono —altiĝas, kvazaŭ ĉielon nazo tuŝas. Tamen verŝu ankoraŭ unu, du glasetojn da vino kaj vi troviĝas sub la benko, kvazaŭ . . . porko!

Esperantigis J. Navikas.

LA ĈEFO DE LA DOMO.

EL "LA LERNANTO"



Laŭ prahinda fabelo iam juna edzo turnis sin al sia patro, demandante, kiu estas la ĉefo en la domo: edzo aŭ edzino. Ridetante la patro diris: "Jen, mia filo, estas cent kokinoj kaj veturilo kun du ĉevaloj. Forveturu, kaj kie ajn vi trovos geedzojn, esploru, kiu estas la ĉefo en la domo. Se estas la edzino, donu kokinon, se estas la edzo, tiam donu unu el viaj ĉevaloj."

Donacinte jam 99 kokinojn, la filo venis al simpla domo kaj demandis kiel kutime: "Kiu estas la ĉefo en via domo?"

"Memkompreneble mi!" fiere respondis la edzo.

"Ĉu vi povas pruvi tion?"

Vokis la viro sian edzinon, kaj ŝi atestis la aserton.

"Elektu unu el miaj ĉevaloj!" kontente diris la vizitanto.

"Mi deziras la brunan."

"Prenu ĝin!"

Sed la edzino tiris flanken la edzon, kaj post longa dialogo la lasta diris: "Mi prefere prenos la blankan."

"Neniun el ambaŭ . . . vi ricevos kokinon", parolis la vizitanto kaj hejmen veturigis sian malplenan veturilon tiratan de la du ĉevaloj.

Tradukis 1222.



BONA RESPONDO.

EL "LA LERNANTO"



Simpla bulgara vilaĝano foje iris tra urba strato kaj serĉ-okule rigardadis al ambaŭ flankoj. Ĝuante la vidaĵon, li rimarkis elmontritan tra fenestro kapon kaj nesciante, ke ĝi apartenas al distrikta advokato, li naive lin demandis:

—Kion vi vendas, onklo?

—Ŝafinajn kapojn, mokŝerce klarigas la advokato.

—Ho, tre bone, ŝajnas al mi, ke progresas via afero—jen al vi restas nur unu kapo!—respondis la sprita vilaĝano.

BONA KONSILISTO.

EL HEBREA LINGVO.



Al riĉulo, kiu havis multe da grandaj aferoj, alvenis lia malriĉa parenco por peti servon.

—"Kian postenon vi povas okupi?"—demandis la riĉulo.—"Ĉu vi povas esti librotenanto?"—

—"Ne, ĉi tion mi ne povas."—

—"Kion vi povas fari?"—

—"Ĉar vi havas multe da aferoj", respondis la malriĉa parenco kun dolĉa rideto,—"vi bezonas havi ĉiaman konsiliston; kaj mi povas min laŭdi, ke mi estas bona konsilisto".

—"Tiel", respondis la riĉulo,—"donu konsilon, kiel mi foririgas vin".


EL "ESPERANTO JUNULARO." Tradukis M. Duŝanski.



LA ALMOZULO.

DE J. S. TURGENEV.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Mi iris sur la strato... min haltigis almozpetanto, malforta, kaduka maljunulo.

Brulumaj, larmantaj okuloj, bluiĝintaj lipoj, dissiritaj ĉifonoj, malpuraj vundoj... Ho, kiel abomene la malriĉeco elmordetis ĉi tiun malfeliĉan estajon!

Li etendis al mi sian ruĝan, ŝvelintan, malpuran manon... Li ĝemis, kriis petante helpon.

Mi traserĉis ĉiujn poŝojn. Nek monujon, nek horloĝon, nek eĉ poŝtukon... Nenion mi estis preninta kun mi.

Kaj la almozulo atendadis... kaj lia etendita mano malforte balanciĝis kaj tremetis.

Konfuzite, ĝenite, mi forte premis ĉi tiun malpuran tremantan manon.

"Ne koleru, frato; nenion mi havas ĉe mi frateto."

La almozulo fiksis sur min sian bruluman okulparon, la bluaj lipoj ekridetis — kaj li siaflanke premis miajn malvarmiĝintajn fingrojn.

"Eh, frato", li ekflustris, "eĉ pro tio mi dankas — eĉ tiu estas donaco, frato."

Mi komprenis, ke ankaŭ mi ricevis almozdonacon de mia frato.

El rusa lingvo, trad. Asen Grigorov.



ZEUSO KAJ LA ĈEVALO.

FABLO DE LESSING.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



"Patro de la bestoj kaj homoj", diris la ĉevalo kaj proksimiĝis al la trono de Zeŭso; "oni diradas, ke mi estas unu el la plej belaj kreitaĵoj, kaj mia sinamo kredigas tion al mi. Sed ĉu tamen ne estas plibonigeblaj diversaj el miaj ecoj?"

"Kaj kiuj el viaj ecoj estas plibonigeblaj laŭ via opinio? Diru; mi akceptos instruon", diris la bona dio kaj ridetis.

"Eble", la ĉevalo diris, "mi estus pli rapida, se miaj kruroj estus pli altaj kaj pli maldikaj; longa cigna kolo ne malbeligus min; larĝa brusto plu plimultigus mian forton; kaj ĉar vi ja destinis min por porti vian karulon, la homon, vi ankaŭ eble povus kreskigi al mi selon, kian metas sur min bonfarema rajdisto."

"Bone", Zeŭso respondis, "atendu momenton!" Zeŭso seriozmiene parolis la vorton de la kreado. Tuj vivo fluis en la polvon, tuj kunligiĝis organizita materio, kaj subite antaŭ la trono staris — la malbela kamelo.



La ĉevalo ekvidis, eknaŭzis kaj tremiĝis pro teruranta abomeno.

"Jen vi havas pli altajn kaj pli maldikajn krurojn", diris Zeŭso, "jen longan cignan kolon, jen pli larĝan bruston, jen selo nature kreskintan! Ĉu vi volas, ĉevalo, ke mi tiel aliformigu vin?"

La ĉevalo ankoraŭ tremis.

"Foriru", nun diris Zeŭso, "ĉi-foje estu instruita senpune. Sed por ke vi memoru de temp' al tempo

pentplene pri via impertinenteco, restu tia, nova kreitaĵo" — Zeuso ĵetis konservantan ekvidon al la kamelo — — "kaj la ĉevalo neniam rigardu vin sen tremo!"

El germana, trad. Kurt Levy.



CIKONIO.

Blankrusa legendo.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Tio ĉi okazis antaŭ longe. Homoj eĉ proksimume ne memoras, kiam ĝi okazis.

Unufoje la kreinto de la mondo, por liberigi la teron de serpentoj, ranoj, lacertoj kaj ĉio, kio vekas per si en homoj timon kaj malŝatecon, kolektis ĉiujn ĉi kreitaĵojn en unu sako, peneme ligis ĝin kaj ordonis al iu homo:

— Portu kaj dronigu en rivero tiun ĉi sakon, sed nur ne kuraĝu rigardi en ĝin!

Kaj la homo ekportis la sakon. Li iras al rivero kaj, ju pli proksime li venas, des pli forte li volas sciiĝi, kio estas en la sako. La homo sentas, ke io viva sidas en ĝi kaj lia scivolemo ĉiam kreskas.

Longe iris la homo, longe li portis sian pezan sakon, — kaj, fine, li atingis la bordon de la rivero, Li haltis super la akvo, kaj jam volis ĵeti ĝin de la alteco de l' bordo, sed scivoleco malhelpis lin. Li ekpensis:

— Mi nur iom ekrigardos en la sakon per unu okulo kaj tuj mi ree ligos ĝin kaj ĵetos ĝin en la riveron. Mi ja faros nenion malbonan.



La homo decidis kaj malligis la sakon, sed li ne havis tempon por enrigardi en ĝin, kiam ĉio, kio estis en la sako, rapideme elsaltis for. La homo timiĝis: en la sako ja estis ĉiuj rampobestoj de la tero, ĉiuj abomenaj kreitaĵoj. Kiam la homo rekonsciiĝis kaj volis ree ligi la sakon, ĝi jam estis malplena: la serpentoj, ranoj, lacertoj forrampis tra la tero. La homo penis kapti la rampobestojn, kiujn li liberigis, sed liaj penoj estis vanaj. La



kreinto, vidante, ke la homo ne obeis, diris al li:

— Ĉar vi ne obeis kaj ree liberigis la rampobestojn, vi kaptu kaj kolektu ilin tra la tuta tero ĝis fino de la mondo. Vi estu cikonio!

Kaj fariĝis tiu homo — cikonio. Kaj de tiam li kaj tuta lia idaro iradas kaj vagadas tra marĉoj, kaptante abomenindajn rampobestojn kaj ranojn.

Tiel la homo fariĝis cikonio, tiel cikonio iam estis homo!


El rusa lingvo trad. J. Sirjaev.



LA FORMIKO KAJ LA URSO.

Indiana fablo.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



La formiko kaj la urso iam disputis inter si. La urso diris: "Mi deziras, ke estu ĉiujare dum ses monatoj nokto kaj dum ses monatoj tago." Ĝi havis ĉi tiun deziron, — tiel oni diras — ĉar ĝi restas dum la tuta vintro dome kaj promenas nur dum la somero. La formiko diris: "Mi deziras, ke estu ĉiam tago kaj nokto, kiel estas hodiaŭ." Tial ili faris veton, por ke decidigu, kies deziro plenumiĝos. Komeneante la granda urso kontinue diris: "Tago kaj nokto estu dum po ses monatoj, tago kaj nokto estu dum po ses monatoj!" Kaj la formiko diris: "Ĉiam tago kaj nokto, ĉiam tago kaj nokto!" Oni diris, ke tiu estu venkonto, kiu elparolus sian deziron plej ofte dum unu semajno. La formiko saltante senĉese alten kaj malalten ripetis sian deziron. Sed la urso ripetinte sian deziron dum certa tempo foriris por manĝegi. Kontraŭe la formiko nenion manĝis, tiel ke ĝi tre malgrandiĝis kaj malgrasiĝis. Nun la urson ekkaptis maltrankvilo kaj ĝi ĉesis deziri kaj per tio la formiko gajnis la veton. Oni diras, ke la formiko estas samtiom granda kiom la urso, kiam ambaŭ komencis disputi, kaj ke ĝi poste tiom malgrandiĝis. Oni ankaŭ diras, ke la ursoj ĉiam formanĝegas la formikojn, se ĉi-tiuj renkontas ilin.

Tial, ke la formiko gajnis la veton, ni havas nun tagon kaj nokton.

Trad. Ch. Heinrich.

LA PIRARBO KAJ LA KOLPORTISTO.

De Georges Avril.

El la gazeto "Esperanto"



Iam hebrea migranta vendisto, portante sian tutan komercaĵon sur sia dorso, trairis vastan ebenaĵon. La somera suno blindige ardis en la ĉielo, kruele lumigis kaj varmigis la teron. La vasta, senlima ebenaĵo ŝajnis pro l'amasego de la flavaj grenherboj vera maro da fandita oro. Ŝvitante, penante, iom lamante, la kompatinda kolportisto plejeble rapidis, sed li ne multe progresis.

—Ha! li ĝemis; kia varmego! Kiel forte mi soifas! Kiom mi deziras trinki! Dio de Hebreoj, Dio de miaj praavoj, mi ne preĝas Vin rekomenci por mi, mizerulo, la miraklon, kiun Vi iam konsentis al Moseo, kiam Vi permesis lin sprucigi freŝan fonton el la ŝtonego, kiun lia bastono frapis. Ne, mi ne postulas favoron tian,kian al Profeto Vi malavare donacis. Tamen, se Vi volus bonanime ekrigardi Vian humilan serviston, Vi ordonus ke fruktarbo, se eble pirarbo, subite aperu...

La lacega, soifanta kolportisto pene kelkajn paŝojn paŝis kaj, mirigate, li ekkriis:

—Ha, plenpotenca Dio! Kiel granda estas Via dia boneco! Mi vidas arbon sur tiu varmegigita ebenaĵo. Nu, se tiu arbo estus pirarbo, Vian Sanktan Nomon mi glorus ĝis la fino de mia mizera vivo. Plie mi volonte oferus cent frankojn!

Vigligita de l'espero li ree paŝis. Iom post iom, paŝon post paŝo, la arbon li alproksimiĝis. Miraklo! la arbo estas pirarbo kaj pendante de la plej alta branĉeto, unu belega piro, matura, alloganta balanciĝis.

—Dankon, dankon, kompatanta Dio! Tio estas ja mirakla piro! Se nur mi povus ĝisgrimpi, korĝoje por Via Sanktejo mi donus... kvindek frankojn!

Tiam de siaj kontuzitaj sultroj li formetis sian pezan pakegon kaj ĝin kuŝigis sub la arbon. Tuj poste, li alkroĉiĝis al la trunko per siaj manoj kaj piedoj, kaj komencis la grimpadon. Malfacile kaj malrapide li supreniris. Supre, la piro ĉiam balanciĝis.

Alveninte al mezo de la trunko li petegis:


—Dio! se Vi permesus min grimpi ĝis la supro,



nepre mi donus... dudek kvin frankojn!

Jam li trafis la celon; jam, streĉante la brakon, la dezirindan piron preskaŭ li tuŝis...

—Nun, triumfe li kriis, nun mi nenion donos!



Aj! en la sama momento la branĉo al kiu li estis alkroĉiĝinta krakis, rompiĝis kaj peze li falis teren.

—Ho ve! severa Dio! li diris ekĝemetante, kiel vi rapidiĝas! Ian ajn monon eble mi estus doninta!



LA LABORCEVALO.

El "Heroldo de Esperanto"



"Ho, sinjoro direktoro", diris sinjoro Maier, "ĉar vi meritas tiom da mono, vi do povus doni al mi malgrandan salajran plialtiĝon!"

"Ĉu vi laboras multe, sinjoro Maier?"

"Mi? Jes! Mi laboras kiel ĉevalo!"

"Lasu vidi. La pasinta jaro havis 366 tagojn, ĉu ne?"

"Jes, certe."

"Kaj vi dormas ok horojn potage, ĉu ne?"

"Jes"

"Tio estas triono de la jaro, 122 tagoj. Restas 244 tagoj."

"Jes"

"Ok horojn potage vi estas libera, tio signifas ankoraŭ 122 tagojn. Restas 122 tagoj."

"Tre ĝuste."

"Dimanĉe vi same ne laboras, estas 52 tagoj, restas 70."

"Hm... jes."

"Sabate vi nur duonon de la tago laboras, eliĝas 26 tagoj kaj 44 restas."

"Jes, jes, jes, certe."

"Dekkvar tagojn vi havis libertempon, ne?"

"Jes, mi havis ilin."

"Restas 30 tagoj; ekzistas 9 festtagoj en la jaro, ke nur 21 tagoj restas."

"Ah, hm, je... e.. es."

"Kvin tagojn vi estis malsana. Restas 16 tagoj, ĉu ne?"

"Je... es."

"Ĉiutage vi havas tagmezpaŭzon de unu horo, entute 15 tagojn. Restas nur unu tago, kaj tiu estis la unua de majo, kiam vi estis libera. Vi havas feliĉon, sinjoro Maier, ke pasinta jaro havis 366 tagojn, alie estus mankinta unu tago!"


Maier retiris sian peton pro salajro-plialtigo.

Trad. el germana lingvo R. Masko, Linz a D., Aŭstrio.



POETO KAJ REĜO.


EL "VERDA STELO"



La sveda reĝo Gustavo 3-a tre ŝatis la poeton Karlo Michaelo Bellman. Pro lia saĝeco la reĝo lin faris kortega konsilanto. Lian konsilon li petis kaj sekvis en ĉiuj malfacilaj kaj komplikitaj ŝtataj aferoj.

Foje la poeto troete akre respondis al la reĝo, pro tio perdis lian bonvolon, kaj la reĝo malpermesis al li la kortegon. Sed ĉiujn gravajn skribaĵojn, kies respondo aŭ decido necesigis saĝan kapon, oni sendis al li en la loĝejon. Tiu ĉi solvo de la afereto gajigis kaj samtempe koleretigis la poeton.

Foje Bellman sciiĝis, ke la reĝo preterrajdos lian domon, kaj li decidis ludi al la regnestro strangan scenon. Je la horo, je kiu la reĝo estis anoncita, li forte sapumis siajn vangojn kaj rigardis de la unua etaĝo straten el la malfermita fenestro. De la strato estis apudmetita al la fenestro alta ŝtupetaro, je kies supro staris razisto, razanta la poeton kun la plej serioza mieno.



La alproksimiĝanta reĝo kelkan tempon rigardis la strangan stratscenon kaj, veninte al la domo, haltigis la ĉevalon kaj mirigite demandis: „Je diablo, kion signifas tiu ĉi komedio?"

Trankvile respondis la poeto: „Mia razisto, reĝa moŝto, perdis mian bonvolon, kaj mi malpermesis al li la eniron en mian domon. Sed ĉar mi mem ne povas helpi al mi sen tiu ĉi fripono, mi aranĝis la aferon ĉi-maniere."

La reĝon tiom ridigis la sprita respondo, ke li preskaŭ terenfalis de la ĉevalo. Depost tiu tempo la poeto estis bonvena ĉe la korto kiel antaŭe.

P. Kilian.



UNU HORO DA DORMO.

EL LINGVO PORTUGALA.

EL "LINGVO INTERNACIA"



En bela somera tago kuŝigis knabeto sur herbo, proksime de l' rando de l' vojo, sub ombro de unu maljuna kaŝtanujo.

Post mallonga tempo pasis veturilo laŭ la vojo, kiu estis klinega kaj plena je ombro. Unu riĉa komercisto deiris de l' veturilo kun sia edzino kaj, por doni movon al la kruroj, ambaŭ sekvadis piedire la veturilon, dum la ĉevaloj ĝin trenadis malrapide.

— Bela infano, diris la virino, kiel li bone dormas! Liaj haroj, en bukloj, tiel ĝentile ornamas tiun frunton, ankoraŭ ne ombrigitan de ia malpura penso... Pro la vesto li ŝajnas al mi ido de malriĉulo. Ni havas nenian infanon... ĉu vi volas, ke ni eduku tiun ĉi knabeton?

— Li estas efektive bela, respondis la edzo, kaj mi donus niajn bienojn prefere al li ol al niaj parencoj. Sed li estas tre juna, kaj ni komencas jam maljuniĝi; eble ni eĉ ne vidos lin, kiam li atingos plenaĝon. Krom tio, estus necese veki lin por scii, kie loĝas liaj gepatroj, serĉi ilin kaj trakti kun ili. Ĉio tio devigus nin elspezi multe da tempo, kaj kiel vi scias, ni devas rapidi.

La edzino ĵetis al la knabeto malgajan rigardon.

— Estu laŭ via volo..., diris ŝi, profunde sopirante.



Poste pasis knabino blanke vestita, la haroj al vento. Nenio ankoraŭ maltrankviligis ŝiajn naivajn sonĝojn; ŝian zonon ĉirkaŭadis blua rubando.

Ŝi aŭskultadis birdon, kiu kantis starante sur branĉo, kaj ne sciis, kial la notoj de l' flugila kan-

tisto, malicaj kaj mokantaj, impresadis ŝian koron!

Ŝi haltis kaj murmuris:

— Bela infano, kiel trankvile kaj senzorge vi dormas! Vi estas bela kaj la venteto karesas vin. Pli malfrue vi devos kontraŭstari al la homoj; via tiel blanka vango fariĝos iom nigreta. Tabako difektos vian voĉon kaj nigrigos viajn dentojn; tondiloj falĉos la buklojn de viaj haroj; zorgoj pleniĝos vian frunton per sulkoj, kaj aĝo kurbigos vian talion. Kaj tiam, kiel mi estos ankaŭ? Ho! Se vi povus min ami, kiel bela estus nia estonteco!

Kaj, ĉirkaŭrigardinte timeme, ŝi kliniĝis, kisis la lipojn de l' knabeto kaj forkuris, tre rozkolorita kaj kvazaŭ miregita pro tia kuraĝo.



Tiam el proksima arbaro eliris du rabistoj; atakinte kaj rabinte la veturilon, ili komencis fari la dividon.

— Ho! — diris unu el ili; — tiu knabo povas denunci pri ni.

Kaj li sin preparis por mortigi la malfeliĉan infanon, celante jam per ponardo lian bruston, kiam la alia detenis la brakon de l' mortiganto.

— Rimarku, ke li dormas, nenion vidis. Ni permesu, ke li vivu.

Kaj ambaŭ rabistoj reiris en la profundaĵojn de l' arbaro.

La knabeto vekiĝis ridetante. Li dormis nur unu horon, sed tiu horo resumis la tutan homan ekzistadon, ĉar la sorto kunligis en ĝi la amon, la riĉecon kaj la morton. Tradukis Costa e Almeida.



LA VERMOJ.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Pastro iam faris paroladon kontraŭ alkoholon. Dum la parolado li ankaŭ montris per praktika ekzemplo al la aŭskultantaro, ke la alkoholo estas veneno. Nome la pastro havis antaŭ si, sur la tablo, du glasojn; unu kun freŝa kaj klara akvo kaj la alia kun brando. La pastro metis vermon en la glason enhavanta la akvon. La vermo longiĝis kaj moviĝis en la akvo klara kaj la pastro diris, ke ĝi estas signo, ke la vermo sentas sin sana en la akvo. Poste la pastro prenis la vermon el la glaso kun la akvo kaj metis ĝin en glason kun brando. La vermo nun ne plu moviĝis kaj mortis baldaŭ. La pastro nun diris al la ĉeestantoj, ke la alkoholo estas por la homo la sama mortiga veneno kiel por la vermo. El la angulo de la salonego vokis nun vagulo: Pastro, donu al mi la brandon por ke mi trinku ĝin kaj per ĝi mortigu miajn vermojn!

El germana lingvo de O. S.



RAKONTOJ DE ŜU UEN ĈEN.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"

Antaŭrimarko. S-ro Ŝu Uen Ĉen estas ŝatata popola persono. Li vivis antaŭ 300 jaroj kaj estis tre saĝa, elokventa kaj sprita. Malsukcesinte en bona kariero li ekmalamis la potenculojn. Pli kaj pli li malprogresis laŭ la vidpunkto de bonedukita societo. Li eĉ fariĝis drinkemulo. Sed la popolo tre ŝatas aŭdi kaj rakonti spritaĵojn de Ŝu. I. Seriĉev.



Iutage s-ro Ŝu promenis kun sia amiko en la laŭbo. De malproksime venis vilaĝano, kiu sur sia ŝultro portis klinitan ombrelon, je kiu pendis botelo da oleo. Estis videble, ke li vizitis la urbon por aĉeti oleon kaj nun iris hejmen.

S-ro Ŝu diris al sia amiko: "Ĉu vi kredas aŭ ne? Mi povos efiki, ke tiu homo mem rompu sian olebotelon."

La amiko respondis: "Kiel vi povus? Se vi efektive tion faros, ni iru drinki bonan vinon, kaj mi pagos."

Apenaŭ li finis tiun frazon, kiam la vilaĝano jam alproksimiĝis la laŭbon.

S-ro Ŝu salutis lin tre ĝentile per mansaluto. La vilaĝano respondis al li ankaŭ tre profunde je la sama maniero. Sed ĉar tio ĉi okazis subitege, la olebotelo pendigita je la ombreltenilo defalis teren kaj disrompiĝis.



Iu filo estis tre malbona kaj malafabla kontraŭ siaj gepatroj. Foje, li faligis per pugnobato unu denton de sia patro, kiu kolerigite vizitis la oficejon de l' guberniestro por juĝigi la malbonan filon.

La filo timegis kaj iris al s-ro Ŝu por peti lian konsilon. S-ro Ŝu, forte ekmordinte lian orelon, diris: "Timu nenion! Via orelo estas vundita, kaj vi ne ricevos punon en la juĝejo. Se la juĝisto vin demandos, kial vi elbatis la denton de via patro,



respondu: Ĉar mia patro mordis mian orelon, mi subite pro dolorego eklevis la kapon, kiu nevole forfrapis la denton; sed ĉi tion mi tute ne intencis fari."

Jen la filo iris al la juĝejo kun vango malpurigita de sango. La juĝisto vidis la vunditan orelon kaj tute ne punis lin.



S-ro Ŝu kaj iu guberniestro ofte vizitadis unu la alian. La estro havis longan blankan barbon, kiun li senĉese karesis per la mano. Tio multe tedis s-ron Ŝu.

Iam la guberniestro ekhavis la deziron je juna kundormulino. Sed malfeliĉe lia barbo estis tro blanka por edziĝi je junulino, kaj li plendis tion al s-ro Ŝu.

Ĉi tiu respondis: "Mi havas tre efikan kuracilon, kiu certe povos nigrigi vian barbon."

Tio multe plaĉis al la estro, kaj li decidis ordoni al sia servisto, ke li iru la venontan tagon por preni la kuracilon.

Alveninte hejmen, s-ro Ŝu metis botelon da ne finfabrikita lako en la murniĉon. Li diris al sia familio: "Se morgaŭ iu servisto venos petante kuracilon, donu al li la botelon metitan en la murniĉon!"

Tre frue en la morgaŭa tago il eliris promenadi.

La estro rapide ordonis al sia homo iri al la domo de s-ro Ŝu por preni la kuracilon, kaj trempis sian barbon en ĝin. Post iom da tempo la barbo fariĝis tute malmola.



Jen s-ro Ŝu alkuris kun ŝajne timigita kaj malkvieta mieno kaj, renkontinte la estron, demandis: "Oni prenis neĝustan kuracilon! Ĉu vi ĝin jam uzis?"

"Ho, jes! Sed kial la barbo fariĝis tiel malmola? La buŝo doloras severe dum parolado! Kion—kion ni faros en tiu ĉi kazo?"

"Ne ekzistas pli bona rimedo, ol fortondi kaj forrazi vian barbon!" respondis s-ro Ŝu.

La guberniestro malkontente lin obeis.

El ĥina lingvo, trad. **Ĉan Ŝito.**

LA OMBRO DE L'AZENO.

EL "LA LERNANTO"



Iun tagon, kiam Demosteno, de la alto de l'tribuno, provis altiri la atenton de l' atena popolo al gravaj demandoj, li ne sukcesis aŭskultigi sin. Li havis tiam la ideon komenci la sekvantan reciton:



Junulo estis luinta azenon por iri de Ateno al Megaro. Estis somera tago; ĉirkaŭ tagmezo, kiam la suno brulis per sia plena forto, la mastro de l' azeno kaj la vojaĝanto haltis kaj disputis pri tio, kiu profitus el la ombro, kiun donis la korpo de l' besto.

—Mi luigis al vi mian azenon kaj ne ĝian ombron, diris la unu.

—Ne, kontraŭrespondis la alia, mi faris negocon pri la tuta besto...

En tiu momento Demosteno interrompis sin, kaj la amaso, vive interesita, postulis per laŭtaj krioj la daŭrigon kaj la finon de l' historio.

—Nu, kio! ekkriis tiam Demosteno,—la ombro de azeno interesas vin tiagrade, kaj kiam mi parolas al vi pri viaj plej karaj interesoj, vi apenaŭ konsentas min aŭskulti!

La Atenanoj komprenis la lecionon, sed neniam eksciis la finon de l' historieto! M.



MALJUNAJ LIPOJ KAJ JUNA KISO.

RAKONTO DE CATULLE MENDEZ

EL "LINGVO INTERNACIA"




Maljuna, malafabla, per ĉifonoj apenaŭ kovrita malriĉulo petis almozon sur rando de granda

vojo. Preter li iris la popolo. Jen preteriris riĉegulo, kiun akompanis lakeoj, vestitaj en livreoj kun ornamitaj pasamentoj. — Donu pro Kristo! Iam mi ankaŭ havis kestojn, plenigitajn de oro kaj juveloj... Nun mi ne havas eĉ centimon... Donu pro Kristo! —

La preteriranta riĉulo estis tuŝita per la parolo de la malriĉegulo kaj donis al li oran moneron.

— Savu vin Dio, bona sinjoro! Kun tiu ĉi monero en la manoj mi rememoros la pasintaĵon. Vi renovigis al mi la iluzion pri la senredonote perditaj riĉaĵoj...



En brilanta uniformo iris laŭ la vojo oficiro. Taĉmento da soldatoj kaj muzikantoj sekvis lin, en dekstra mano la oficiro tenis laŭrajn branĉojn, — emblemon de gloro. — Pro Kristo donu, pro Kristo! Iam min ankaŭ oni renkontadis ĉe tondro de ĝojaj krioj, en sorĉa triumfo; standardoj disvolviĝadis alte super mia kapo!...

La de gloro kronita militisto donis al la malriĉulo laŭran folion.

— Mi dankas, mia glora sinjoro!... Kun tiu ĉi laŭrfolieto mi sonĝos pri la venkoj de la pasintaĵo... Vi revenigis al mi la iluzion pri la forgesitaj bataloj...



Iris juna, bela kaj feliĉa amanta knabino kun sia karulo. La malriĉegulo, balancante la kapon, sin turnis al ŝi.

— Iam mi ankaŭ estis amata de junaj, belaj virinoj, de tiom same karaj, kia vi estas, mia infano! Iliaj lipetoj ankaŭ estis tiel samaj, kiel la viaj. Nun mi, kaduka, ne scias, kio estas la bonodoro de kiso.—Sed tiun ĉi fojon li ne aldonis peton pri almozo.

La enamiĝinta knabino estis tuŝita per la vortoj de l' malriĉulo. "Post la permeso de mia amiko, ŝi diris al la malriĉegulo, mi povas proponi al vi modestan almozon — la junan kison". —Ŝia amiko konsentis, sed la malriĉulo interrompis ilian paroladon:

— Ne, ne! Mi ne volas tuŝi viajn lipetojn, infano! La ora monero kaj la laŭra folio povas revenigi la iluzion pri la pasintaj riĉaĵoj kaj gloraj venkoj, sed juna kiso por maljunaj lipoj—ho, ĝi ne redonos la amon. La estingiĝintaj koroj estas mortintoj, kiuj neniam reviviĝos. Ho, foriru, foriru pli rapide, geamataj infanoj!... Mi ne volas aŭdi viajn delikatajn voĉojn, vian junan ridon. Por malvivulo, dormanta sur velkinta herbo, ekzistas ja nenio pli kruela, ol la murmurado de du kolombetoj sur la cipreso, apud lia ĉerkujo!...

Tradukis A. Dimer.



DU RIĈULOJ.

DE J. S. TURGENIV.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Kiam oni trogloras la riĉulon Rothschild, kiu el siaj grandegaj enspezoj destinis milojn da moneroj por edukado de infanoj, kuracado de malsanuloj, flegado de maljunuloj — tio tuŝas mian koron kaj mi lin laŭdas. Sed kvankam mi laŭdas lin kaj kortuŝiĝas, tamen mi ne povas ne memori pri malriĉega familio vilaĝana, kiu akceptis en sian kadukan kabanon orfnepinon.

"Se ni alprenos Hanjon", la virino diris, "nian lastan monon ni elspezos pro ŝi, — ni ne havos per kio aĉeti salon, por sali nian supon..."

"Ni ĝin manĝos eĉ nesalita", respondis la vilaĝano al sia edzino.

Kiom malproksime staras Rothschild de tiu vilaĝano!

El rusa lingvo, trad. Asen Grigorov.



TRO MULTE.

EL "LA LERNANTO"



Usona oficiro promesis dolaron por ĉiu germano, kiu estos mortigita dum postbatala paŭzo. Tial oni komencis amase vizitadi batalkampon. Kelkaj soldatoj alportis kapojn aŭ brakojn de l' hieraŭ mortigitaj germanoj, aliaj penadis sentrompe laborenspezi la dolaron.

Du negroj-soldatoj ankaŭ postsekvis la aliajn por serĉi eblon enspezi dolaron. Ili sin kaŝis en

forlasita tranĉeo kaj komencis atendi germanojn.

Unu el ili ekdormis, la dua restis gardobservanta.

—Oni iras! — ekflustris la gardanto, vekante per puŝoj la dormantan kamaradon.

—Kiom da ili?—demandis tiu vekiĝante.

—Kvin mil proksimume.

—Ni ankoraŭ iom kuŝu kaj atendu aliajn. Ja por kio ni bezonas tiom da mono?

Esperantigis H. Ponjatovskij.

LA KRAĈANTOJ.

EL "ESPERANTO JUNULARO"



Iam mi sencele promenis en urbego. Jen du knaboj havantaj apenaŭ ses jarojn frapis miajn okulojn, ĉar meze de strato ili kuŝis ventre sur la pavimo. Je tiu spektaklo mi tre multe ektimis, ĉar aŭtobuso povas ja alveni, kaj superveturi ilin. Por malebligi akcidenton, mi kuras al la du nesingardaj buboj. Sed antaŭ ol mi komencas riproĉi kaj forpeli ilin, mi volas scii kion ili faras. Jen, ambaŭ havas pecon da kaŭstika kalko, sur kiun ili kraĉas alternante, kaj ĉiufoje kiam la kalkstono siblas, kaj blanka nubeto leviĝas, ili ravite baraktas per la kruroj. Subite la pli granda de la du naturesploristoj, ekvidante min, ruzmiene ridas al mi, dirante: "Domaĝe, mi ne havas plu kraĉaĵon, pro tio vi kraĉu foje!" Kaj mi, ĉu mi devas konfesi ĝin, kaŭras min apude kaj kraĉas ankaŭ!—Kiu ĵetos sur min la unuan ŝtonon?

Tradukis M. Heinrich, Potsdam.

BONULO KAJ SENTAŬGULO.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Abdulla-Rahim rajdis sur azeno en urbon kaj senzorge, monotone kantis. Li jam forgesis pri hieraŭa malĝojo. Ankoraŭ hieraŭ li, starante sur genuoj kaj klininte la kapon ĝis la tero, preĝis al Mahomet, ĉefa Dia profeto. Li petis plenigi per akvo kanalon, el kiu li prenadis ĝin por akvumadi sian kampon. Sekigita tero kune kun varmegaj sunradioj preskaŭ bruligis rizan grenkampon. Proksimiĝis danĝero de mizero pro manko de produktaĵoj. Li estos devigata vendi ŝafojn por aĉeti grenon.

Sed hodiaŭ Abdulla-Rahim kantis flegme, pri ĉio, kion li vidis: pri arbetoj kreskantaj flanke de l'vojo, pri aglo naĝanta en aero, pri sablo sur la vojo kaj aliaj vidataj objektoj. Li eĉ ne havis determinitan celon de sia vojaĝo konvinkiĝinte, ke la celo dum necesa momento aperos mem.

Post duhora rajdado Abdulla-Rahim ekvidis urbon. Li traveturis nur dek-kilometran distancon, ĉar la azenoj neniam galopas kaj trotas, sed ĉiam paŝas. En ĉi tiu parto de l'urbo, tiel nomata "Malnova urbo", kiun Abdulla-Rahim enrajdis, li sentis sin tute libere, ĉar en ĝi estis preskaŭ ĉio simila al lia loĝloka vilaĝo. Sed li timis eniri la "Novan urbon", kie tramvagonoj, aŭtomobiloj, motorbicikloj, veturigistoj ĉiam faras bruegon kaj krome tie li ĉiam riskas subiĝi sub tramon aŭ aŭtomobilon. Do kion fari, kien iri plue? Tial li ekĝojis, kiam li subite ekaŭdis:



"Oj, aka, Abdulla-Rahim!" (Ho, frato, Abdulla-Rahim!)

La vokinto kaŭris sub larĝa branĉaro de silkraŭpa arbo sur bela tapiŝo, dissternita sur la tero inter trotuaro kaj ŝtrato apud malgranda kanalo, kaj trinkis teon el taseto.

Abdulla-Rahim haltigis la azenon kaj proksimiĝis al la konato. Ili grave ambaŭmane salutis unu la alian kaj glatigis siajn barbojn (laŭ ĉi-tiea moro). Post kelkaj minutoj ili ambaŭ kaŭris sur la tapiŝo, gaje parolante pri diversaj vivaferoj.



"Mi konis vian patron, Karimbaj", subite ŝanĝis la temon Abdulla-Rahim, "li estis bonega homo; en la tuta urbo, li estis unika saĝulo kaj bonulo... Kaj mia patro konis vian avon, kiu estis ankaŭ fama kunsentulo; lin konis la tuta regiono."

Karimbaj plezure glatigis sian barbon, rigardante la ĉielon.

"Sed vi", daŭrigis Abdulla-Rahim, "vi... dek viaj patroj kune kun dek avoj ne povus anstataŭi vian koran bonecon. Vin konas preskaŭ la tuta mahometana mondo..."

Karimbaj, ebriigita per la laŭdegoj, kortuŝite levis la manojn supren kaj diris: "Tiel volas Allah!"

"Jes, tiel volas Allah. Li volas, ke vi estu bonkora kaj... riĉa. Vi havas propran butikon, kiu ne bezonas akvon. Mia kampo ne povas profiti sen akvo. Sed via koro anstataŭos al mi akvon. Mi kredas, ke vi... pruntos al mi monon."

Karimbaj komence jetis mireg-rigardon al Abdulla-Rahim, poste li eligis el sub sia silka zono tabakujon, surŝutis iomete da maĉtabako sur manplaton, metis ĝin en la buŝon kaj post mallonga pripenso demandis:

"Do kiom da mono vi bezonas?"

"Kiom vi povas", respondis Abdulla-Rahim.

"Mi ne povas prunti al vi; mi povas nur donaci al vi la hodiaŭan profiton de vendado. Sed krom vi neniu devas scii pri mia boneco. Al ĉiu vi diru, ke miaj patro kaj avo estis famaj bonuloj, sed Karimbaj estas fama sentaŭgulo kaj fripono."

I. Kovalevski, Taŝkent, (Turkestano).



PORTRETO DE EDZINO.

De Emanuel Lesehrad.
EL LA GAZETO "ESPERANTO"



Iu pentrartisto havis belan edzinon, sed neseriozan; ŝi lin tute ne komprenis kaj ŝatis la arton nur kiel bonan metion, kiun oni eventuale povas kun profito monigi. La artisto, malgraŭ tiom da doloroj kaj senreviĝoj ne povis sin forigi de la virino: eble ŝin al li aljuĝis la sorto. Okazis iam, ke li pentris portreton de sia edzino. Verkon majstran kaj mirindan. Finante la laboron, li ekmeditis antaŭ la bildo, en kiun li estis ensorĉinta sian tutan arton. Senĉese al li ŝajnis, ke en la portreto mankas io, kion li ne povis esprimi. Du tagojn dum tutaj horoj li staradis antaŭ la bildo, kaj nur la trian tagon, turmentite de pensado, sidante en niĉo de la laborejo, li divenis tion.—La portreto de lia edzino en la plidensiganta mallumo ŝanĝiĝis je demona aperaĵo: okuloj, sangavidaj okuloj, lipoj senkompataj, brusto kiel du flugiloj de vampiro. Sangon bezonis la bildo, tion li subite elkomprenis, homan, varman sangon de artisto, per kiu povus sin satigi la vampiro. Poste la portreto de tiu virino estus perfekta. Kaj senhezite li elprenis el tirkesto de la tablo revolveron kaj mortepafis sin antaŭ la bildo de sia edzino, makulante la tolon per sango de sia koro. Kaj mortante li kontente ridetis, ĉar li finis sian plej bonan verkon: la portreton de l' edzino.

El la ĉeĥa, Miloŝ Lukaŝ.

KIO ESTAS KRIMULO.

EL "LA LERNANTO"



Diogeno promenante unu vesperon tra strato de granda urbo, rigardis soldaton, kiu kuris al li kaj demandis la filizofon:

—Ĉu vi vidis viron kuranta antaŭ mi?

—Ne... Kial vi lin persekutas?

—Li estas krimulo.

—Krimulo? Kio estas krimulo?

—Viro, kiu mortigas.

—La buĉisto...

—Ne. Viro, kiu mortigas alian.

—Jes, mi komprenas. Soldato.

—Ankaŭ ne; estas viro, kiu mortigas alian en paca tempo.

—Tiam ekzekutisto?

—Idioto! Viro, kiu mortigas alian en la hejmo.

—Nun mi bone komprenas: estas kuracisto.

El hispana trad. E. Brnjac.

ĈASO.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Revante li kuŝis en la alta herbaro. Senfine verdaj herbarebenoj etendiĝis ĉirkaŭ li. Trunketoj kaj floroj afable albalancis al li. Nelaciĝante zumis abeloj kaj muŝetoj unutonajn melodiojn. Meditante li rigardis en la vastaĵon, kvazaŭ li estus serĉanta ion — en ĉielblua malproksimo.

Jen preterflirtis en ŝanceliĝanta flugo papilio de stranga kolorbrilego. Preskaŭ tuŝis lin la delikataj flugiloj. Eke li saltis kaj ĉasis la multkoloran papilion — —.

Estis freneza ĉaso. — Febre ekbrilis liaj okuloj, kiam li kredis fine ekkapti ĝin. Sed ĉiam vane. — Do li ne lasis la sovaĝan kurĉason, — kaj li ne vidis, ke li dispremis per la piedoj multajn belajn florojn — —.

Kaj kiam la sangruĝa sunglobo malleviĝis en la okcidento, li kuŝis ree en la alta herbaro — larmplena — kaj funebris pri la floroj, kiujn li dispremis dum sensenca ĉaso.

Ili estis nur al li florintaj kaj bonodorintaj.

De Herman Petermann.

ORIENTA RAKONTO.

EL "VERDA STELO"



Rabisto kondamnita je morto, estante ankoraŭ en la malliberejo, antaŭ la plenumo de la kondamno, subite ekpensis pri plano, kiu eble lin savos de la morto. Li venigis al si la malliberejan gardiston kaj diris al li, ke li havas ian sekreton komunikotan al la reĝo, per kiu sekreto Lia Reĝa Moŝto povus akiri abundan riĉaĵon; sed li komunikus ĝin nur ĉe persona renkontiĝo kun la reĝo.



Post multaj komplimentoj kaj genufleksoj, la malliberigito diris al la reĝo, ke li posedas la sekreton kreskigi oron sur arbo, kiel frukton; kaj li proponis al la reĝo tuj fari la provon.

La reĝo, nature, deziris profiti la scion de la homo kaj, aprobante la provofaron, kunprenis la unuan ministron, la ĉefepiskopon kaj kelkajn el siaj plej dignaj korteganoj, post kio li iris kun la rabisto ekster la urban muregon.

La rabisto elektis malgrandan lokon kaj, eltirinte el siaj ĉifonvestoj ormoneron, diris: „Se tiu ĉi monero estos plantata sur tiu ĉi loko, elkreskos arbo, kies branĉoj naskos ormonerarojn densajn kiel la vinberaroj sur la vinberujo. Tamen estas unu kondiĉo necesa: ĝi devas esti plantata per la mano de homo, kiu neniam estis kulpa pri malhonesta faro. Miaj manoj ne estas puraj, tial mi transdonas la moneron en la manojn de Via Moŝto."

La reĝo prenis la moneron kaj tenis ĝin nerve kelkajn sekundojn en sia mano; poste, transdonante ĝin al sia ĉefministro, li diris: „Mi memoras, ke, kiam mi estis juna, mi ŝtelis iom da mono el la



kaso de mia patro, kaj tial mi opinias, ke la ĉefministro devas ĝin planti!"

La ministro kun granda singardemo diris: „Via Moŝto, mi ne ŝatus, ke tiu ĉi plej grava provo estu elmetita al ebla malsukceso per iu mia malataĵo; tial ke mi akceptas la impostojn de la popolo kaj mi mem estas elmetita al tiom da tentoj, estas eble, ke miaj manoj ne estas tute puraj; pro tio, kun via reĝa permeso, mi transdonos ĝin al la ĉefkomandanto de la armeo."

Sed la generalo tute ne volis sin ligi kun la provo, kaj kun militista vigleco li diris: „Ne, ne; mi tenas la monon por la armeo en mia mano, mi aĉetas la necesaĵojn kaj pagas al la oficiroj; donu ĝin al la ĉefepiskopo!"

Tamen ankaŭ la lasta ne estis preta akcepti la respondecon, kaj diris: „Vi forgesas, ke mi kolektas la dekonon kaj difinas la oferaĵojn; mi ne povas transpreni la moneron."



„Via Moŝto," tiam sin aŭdigis la rabisto, „kial oni devas pendigi min kiel rabiston, kiam el la kvar plej altrangaj personoj en la reĝlando eĉ ne unu subtenas sian honestecon?"

La reĝo valorigis la klarigon kaj pardonis la rabiston.

Tradukis I. H. K.



MALGRANDA PRINCIDINO.

SERBE VERKIS J. DUČIĆ.
EL "VERDA STELO"



Malgranda princidino, kies haroj havis koloron de la luna lumo, kies okuloj estis bluaj, kaj kies voĉo havis odoron de flavaj rozoj,—malgranda princidino estis laca de l' vivo, kaj ŝi estis malgaja.

Ŝi, sur siaj larĝaj marmoraj terasoj super la maro, apud grandegaj vazoj, en kiuj kviete mortadis siaj krizantemoj, ploris tute kaŝe dum malhelaj vesperoj. Ŝia necerta nostalgio kaj nekonata malĝojo lacigadis ŝian sangon kaj ŝian korpon, kiuj estis tute similaj al sango kaj korpo de la lilioj.

Kaj dum la varmaj noktoj, kiam la aero estas plena de l' stelara polvo, kaj dum sur mallumaj muroj dormas kvietemaj pavoj, kaj ĉiuj floroj malfermadas siajn korojn, malfermis sin ankaŭ la koro de la malgranda princidino. Tial tiuj noktoj estis tiel plenaj de malgajeco kaj de varmo.

Kiam ŝi mortis neaŭdata kaj silenta same kiel ŝiaj krizantemoj, longe batis la malnovaj sonoriloj de la katedralo, kaj ilia voĉo estis kvieta kaj solena kvazaŭ voĉoj de longe mortintaj pastroj.

Tradukis Rud. Sigl. Daruvar.



LA KVAR GRILOJ DE LA PANVENDISTINO.

EL "LA LERNANTO"



Mia amiko Ĵak eniris iam ĉe panvendisto por aĉeti bulkon kiu logis lin pasantan.

Dum li atendis ke oni redonu al li moneretojn, malriĉe sed pure vestita ses aŭ sepjara knabo eniris la vendejon.

—"Sinjorino," li diris al la panvendistino, "mia patrino sendis min por serĉi panbulon."

La panvendistino prenis el la panbulofako la plej belan bulon, kiun ŝi povis trovi kaj metis ĝin sur la brakojn de la knabeto.

Mia amiko Ĵak rimarkis tiam la malgrasan kaj kvazaŭ mediteman vizaĝon de la aĉetanteto. Ĝi kontrastis kun la malkaŝema kaj ŝvela mieno de la dika panbulo per kiu li estis ŝarĝita.

—"Ĉu vi havas monon?" diris al la infano la panvendistino.

La okuloj de la knabeto malgajiĝis.

—"Ne, sinjorino," li respondis premante pli forte sian bulon sur sian kitelon, "sed, mia patrino diris, ke ŝi venos paroli kun vi pri tio morgaŭ."

—"Nu," diris la bona vendistino, "kunportu vian panon, mia infano."

—"Dankon, sinjorino", diris la knabeto.

Mia amiko Ĵus ricevis sian monon. Li estis tuj elironta kiam li retrovis senmovan post li, la knabon, kiun li kredis jam malproksimiĝanta.

—"Kion vi do faras ĉi-tie?" diris la panvendistino al la knabeto. "Ĉu vi ne estas kontenta pri via pano?"

"Ho! ja jes! sinjorino, ĝi estas tre bela!"

—"Nu, iru porti ĝin al via patrino, mia amiko. Se vi prokrastas, ŝi kredas ke vi amuziĝas sur la vojo kaj vi estos admonita."

La infano ŝajnis ne estis aŭdinta. Io ŝajnis alien altiri lian tutan atenton.

La panvendistino alproksimiĝis:

—"Pro kio vi pensas anstataŭ rapidi?" ŝi demandis.

—"Sinjorino, kiu kantas tie ĉi?" diris la infano.

—"Neniu kantas", respondis la panvendistino.

—"Jes ja," diris la malgranduleto, "ĉu vi aŭdas: krik, krik, krik?"



La panvendistino kaj mia amiko Ĵak atente ekaŭskultis, kaj ili aŭdis nenion, krom la kantaĵon de kelkaj griloj, kutimaj gastoj de domoj en kiuj estas panfabrikistoj.

"Ĉu estas birdo," diris la hometo, "aŭ ĉu estas la pano kiu kantas kuiriĝante kiel la pomoj?"

"Ne, naivuleto," diris la panvendistino, "tio estas la griloj. Ili kantas en la panfabrikejo, ĉar oni ĵus ekbruligis la panfornon, kaj la vido de la flamo ĝojigas ilin."

—"La griloj?" diris la knabeto; "ĉu estas tiuj bestoj, kiujn oni nomas ankaŭ 'kri-kri'oj?"

—"Jes", respondis komplezeme la panvendistino.

La vizaĝo de la knabeto animiĝis.

—"Sinjorino", li diris ruĝiĝante pro la maltimo de sia demando, "mi estus tre kontenta se vi volus doni al mi kri-kri'on."

—Kri-kri'on?" diris ridante la vendistino, "kion vi volas fari el kri-kri'o, mia kara malgranduleto? Nu, se mi povus doni al vi ĉiujn kiuj trairadas la domon, tio estus baldaŭ farita."

—"Ho! Sinjorino, donu al mi unu, nur unu, se vi volas!" diris la infano kunigante siajn palajn maldikajn manojn super la dika panbulo. "Oni diris al mi ke la kri-krioj havigas bonŝancon en la domoj; eble se estus unu hejme, mia patrino, kiu havas tiom da ĉagreno, plorus neniam plu."

Mia amiko Ĵak rigardis la panvendistinon.

Ŝi sekigis siajn okulojn per la refaldo de sia antaŭtuko. Se mia amiko Ĵak estus havinta antaŭtukon li estus farinta la samon.

—"Kial ploras via malfeliĉa patrino?" demandis mia amiko Ĵak.

—"Pro la fakturoj," diris la malgrandulo. "Mia patro estas mortinta, kaj kiom ajn mia patrino laboregas, ni ne povas ĉiujn pagi."

Mia amiko Ĵak prenis la infanon, kaj kun la in-



fano la panon en siajn brakojn, kaj mi kredas ke li kisis ilin ambaŭ.

Intertempe la panvendistino malsupreniris en sian panfabrikejon kaj petis sian edzon, ke li kaptu por ŝi kelkajn grilojn.

Li tuj kaptis kvar grilojn kaj metis ilin en skatoleton kun truoj sur la kovrilo, por ke ili povu spiri, poste ŝi donis la skatoleton al la knabeto kiu ĝoje forkuris.

—"Kompatinda bonuleto!" ili diris kune.

La panvendistino prenis tiam sian kalkulolibron; ŝi malfermis ĝin je la paĝo sur kiu troviĝis la kalkulo de la patrino de l' knabeto, faris grandan strekon sur tiu paĝo ĉar la kalkulo estis longa, kaj ŝi skribis malsupre: **"pagita".**

Dum tiu tempo mia amiko Jak estis metinta en paperon la tutan monon el siaj poŝoj kie feliĉe troviĝis multe da ĝi tiun tagon.

Poste li petis la panvendiston sendi ĝin rapide al la patrino de la infano posedanta la kri-kri'ojn, kun la kvitancita fakturo kaj letereto en kiu oni diris al ŝi ke ŝi havas infanon kiu estos iam ŝia ĝojo kaj ŝia konsolo.

Oni donis ĉion al panisthelpanto kiu havis grandajn krurojn kaj petis lin ke li iru rapide.



La infano kun sia dika panbulo, siaj griloj kaj siaj malgrandaj kruroj ne iris tiel rapide kiel la panisthelpanto. Ĉar kiam li reeniris, li unuafoje de longatempe trovis sian patrinon kun okuloj levitaj el sia laboro kaj rideto sur la lipoj.

Li kredis ke estis la alveno de la kvar nigraj bestetoj kiu kaŭzis tiun miraklon, kaj laŭ mia opinio li ne estis malprava.

Ĉu tiu feliĉa ŝanĝo estus okazinta en la sorto de lia patrino sen la kri-kri'oj kaj lia bona koro?

Tradukis G. Hugot-Raison.



LA RUZA VOJAĜISTO.

EL "ESPERANTO JUNULARO."



Dum flueganta pluvo vojaĝisto frosttremante kaj tute malsekigite venis en gastejon. Volonte li ekposedus sidlokon apud la varma forno, por varmigi sin kaj sekigi siajn vestaĵojn. Sed la tuta ĉeforna benko jam estis dense okupita de aliaj gastoj. Por tamen atingi sian celon, post mallonga meditado li diris al la mastro: "Alportu al mia ĉevalo dekduon da ostroj!" Mirigite tiu alrigardis lin, ĝis kiam la vojaĝisto ripetis sian strangan mendon.



Fine la mastro foriris kaj faris, kion la fremdulo postulis; sed ankaŭ la aliaj gastoj unu post alia eliris la ĉambron, por vidi, ĉu la ĉevalo vere manĝus la ostrojn. Tion nur volis kaŭzi la ruza lastalveninto. Ĉar nun li tuj serĉis al si la plej oportunan sidlokon apud la forno neĝenate. Baldaŭ la scivolemaj gastoj ree envenis kaj ekkonis laŭ la ruzmiena vizaĝo de la fremdulo, kion ĉi tiu estis intencinta per la stranga postulo.




Fine ankaŭ la mastro alproksimiĝis kaj diris, ke la ĉevalo tute ne volis manĝi la ostrojn. "Ĉu ne?" respondis la vojaĝisto ridetante; "tiam eble mi mem devas manĝi ilin".

Prof. Dr. Penndorf.



LA RABENO KAJ LA RIĈULO.

EL LA GAZETO "ESPERANTO"



Foje al Rabeno alvenis Riĉulo-fiulo, sed li estis granda avarulo. La Rabeno ekprenis lin ĉe la mano, alkondukis lin al la fenestro kaj diris: "Rigardu! kion vi vidas?" La Riĉulo respondis, ke li vidas homojn. Poste la Rabeno reekprenis lin ĉe la

mano, alkondukis lin al la spegulo kaj diris: "Rigardu! kion vi vidas nun?" "Nun", respondis la Riĉulo: "Mi vidas nur min mem." Tiam la Rabeno diris al li: "Komprenu, en la fenestro estas vitro sed la vitro de la spegulo estas iomete kovrita de arĝento, kaj kiam nur io estas iomete arĝentumita, tiam oni ĉesas vidi homojn kaj komencas vidi nur sin mem..."

El la hebrea tradukis Jozefo Tajĉ.



LA RABISTO.

Laŭ rememoro de la poemo el la jaro 1857.
el "Heroldo de Esperanto"



Estis malluma nokto. En la arbaro, malproksime de urba vivado, staris la kabano de ermito.

La pia homo ne nur kutimis preĝi; sed la tutan tagon li ankaŭ laboris, serĉante ĉiuspecajn kuracajn herbojn por malsanuloj kaj manĝeblajn berojn kaj fungojn, kiujn li sekigis, por havi nutraĵon dum la vintra neĝvetero. Ankaŭ je ligno li devis provizi sin.

Somero, kiu feliĉigas kaj dolĉigas la vivon al ĉiu malriĉulo, ŝajnis ankaŭ al li la plej agrabla sezono. Tiam ofte alvenis homoj el la najbara vilaĝo por viziti lin: viroj kaj virinoj, sanuloj kaj malsanuloj, riĉuloj kaj malriĉuloj, kaj gepatroj alkondukantaj siajn infanojn al li. Ili ĉiuj deziris aŭdi liajn saĝecajn konsilojn aŭ aŭskulti la bonajn parolojn kaj piegajn preĝojn, kiuj fluis de la lipoj de l' sperta sanktulo.

Ankaŭ hodiaŭ ĉiu vizitinto estis kortuŝite forlasinta la kabanon kaj dankeme doninta ian donacon al la dezertulo, ekzemple farunon, terpomojn, ŝelfruktojn, panon ktp.

Nun laca kaj dormema li ŝlosis la pordon post la lasta elirinto kaj kuŝiĝis, balbutante pian preĝon.



Apenaŭ li estis ekdorminta, kiam forta frapado kontraŭ la pordo lin vekis. Tuj li leviĝis de sia



malmola kuŝejo kaj tremantamane ekbruligis rezinan lignon por lumigi. Sed, malferminte la pordon, kion li vidis? Homon de terura aspekto! Kvazaŭ li estus ĵus forkurinta el la mano de l' polico.

"Kion vi deziras?" demandis la ermito.



"Vian monakan robon mi deziras—la robon kune kun la ŝnuro!" respondis la malfrua vizitanto.

"Neeble! Vi postulas la solan veston, kiu kovras la nudecon de mia korpo. Ĉu vi ne timas la punon de Dio?"



"Ne paroladu tiel longe! For, for el tiu via sako! Ĝi multe plaĉas al mi."


"Malfeliĉulo vi! Do denove vi malpurigis vian manon per homa sango, kvankam ĝi ankoraŭ fumas de la antaŭa mortigo?"

"Ah! tiom vi scias pri miaj aferoj, vi naŭzega korvo de la dezerto? Bone. Prenu nun kun vi la sekreton en la profundaĵon de l' tombo!"

Kaj rapide li faligis fortajn batojn sur kapon kaj bruston de la senkulpa homo, ĝis kiam tiu ĉi, mortigite, cedis sian monakan robon.


Alivestiĝinte sin, la rabisto kure forlasis la lokon de la krimo, trarapidante la arbaron, evitante la vojojn uzatajn de la vilaĝanoj. Li transmarŝis kampojn kaj herbejojn kaj transsaltis ŝtonegojn, ĝis kiam li atingis la marbordon.

Tie staris granda velŝipo preta por forveturi. Rapide li enŝipiĝis.



— Tagiĝis. Belega estis la vetero kaj agrabla la veturado. Sed baldaŭ nigraj nuboj vidiĝis sur la blua rondo de l' ĉielo. Ventego maltrankviligis la maron, poste fariĝante uragano. La tuta ŝipo krakis terure. Fulmbriloj iluminis la malhelan ĉielon. Sekvis ilin fortega bruo de tondro.

La uragano ne ĉesis, sed furiozis ĉiam pli sovaĝe. Nun la maristoj kaj la pasaĝeroj petis la monakon, ke li aŭskultu ilian konfeson. La krimulo plenumis la petojn kaj donis la absolvon al ĉiuj.



Intertempe la uragano daŭradis eĉ kun pligrandiĝinta furiozo. La maristoj diris inter si: "Kompreneble! La uragano ne ĉesos. Niaj pekoj troviĝas ankoraŭ sur la ŝipo, en la persono de la monako. Por liberigi nin kaj la ŝipon de tiom da pekoj, ni ĵetu lin en la maron!" Kaj ili ekkaptis la pseŭdo-monakon, kaj la krimulo trovis la justan punon en la ondoj de la furioza maro.

Baldaŭ poste, sur plej trankvila marsupraĵo, la ŝipo veladis en direkto al haveno.

Rakontis Viktoria Iker, **Fiume.**



ORIENTA LEGENDO.

De I. S. Turgeniev.

EL "LINGVO INTERNACIA"



Kiu en Bagdado ne konas la grandan Ĝiafaron, la sunon de l' universo?

Unu fojon—antaŭ multaj jaroj—li estis tiam ankoraŭ junulo—promenis Ĝiafaro en la ĉirkaŭaĵo de Bagdado.

Subite lian aŭdon alflugis raŭka krio: iu malespere vokadis helpon.

Ĝiafaro distingiĝis inter siaj egalaĝuloj per prudenteco kaj pensemeco; sed la koron havis li kompateman kaj li esperis sian forton.

Li ekkuris kontraŭ la krio kaj ekvidis kadukan maljunulon, alpremitan al la muro de l' urbo de du rabistoj, kiuj lin rabis.



Ĝiafaro ekprenis sian glavon kaj atakis la krimulojn: la unuan 'li mortigis, la alian forpelis.

La liberigita maljunulo alfalis al la piedoj de sia liberiginto kaj, kisinte la randon de lia vestaĵo, ekkriis: "Kuraĝa junulo, Via grandanimo ne restos sen rekompenco. Laŭ la ekstero mi estas malriĉa almozisto, sed sole laŭ la ekstero. Mi estas homo ne simpla.—Venu morgaŭ, frue matene, sur la ĉefbazaron; mi atendos vin ĉe la fontano—kaj vi konvinkiĝos je la vereco de miaj vortoj.

Ĝiafaro ekpensis: "Efektive, laŭ la ekstero, tiu ĉi homo estas almozulo; tamen ĉio povas okazi. Kial ne ekprovi?"—kaj respondis: "bone, patro mia, mi venos".

La maljunulo ekrigardis en liajn okulojn kaj foriĝis.

La sekvantan matenon, apenaŭ eklumetis la lumo, Ĝiafaro iris sur la bazaron. La maljunulo jam atendis lin, apoginte sin sur marmoran kalikon de l' fontano.

Silente prenis li la manon de Ĝiafaro kaj alkondukis lin en negrandan ĝardenon, de ĉiuj flankoj ĉirkaŭitan de altaj muroj.

En la mezo mem de tiu ĉi ĝardeno, sur verda herbejeto kreskis arbo de vido neordinara.

Ĝi estis simila al la cipreso; nur la foliaro estis sur ĝi de blua koloro.



Tri fruktoj—tri pomoj—pendis sur la maldikaj, supren fleksitaj branĉetoj: unu, de meza grandeco, longforma, lakte blanka; la alia—granda, ronda, helruĝa; la tria — malgranda, sulkigita, flaveta.

La tuta arbo mallaŭte bruis, kvankam ne estis vento. Ĝi sonoris mallaŭte kaj plende, kvazaŭ ĝi estis vitra; ŝajne, ĝi sentis alproksimiĝon de Ĝiafaro.

"Junulo!"—diris la maljunulo,—"Deŝiru kiun vi volas el tiuj ĉi fruktoj kaj sciu: se vi deŝiros kaj ekmanĝos la blankan—vi estos la plej saĝa el ĉiuj homoj; se vi deŝiros kaj ekmanĝos la ruĝan—vi estos riĉa, kiel Rotŝild; se vi deŝiros kaj manĝos la flavan—vi plaĉos al maljunaj virinoj. Decidu! ... kaj ne malrapidu. Post unu horo la fruktoj velkos, kaj la arbo mem eniros en la mutan profundaĵon de la tero!"

Ĝiafaro mallevis la kapon kaj ekpensiĝis. — "Kiel en tiu ĉi okazo agi?" diris li duonvoĉe, kvazaŭ konsiliĝante kun si mem.—"Se vi fariĝos tro saĝa—vi eble ne volos vivi; se vi fariĝos pli riĉa, ol ĉiuj homoj—vin ĉiuj envios; pli bone, sekve, mi deŝiros kaj manĝos la trian, sulkigitan, pomon!"

Kaj tiel li faris; sed la maljunulo ekridis per la sendenta rido kaj diris: "Ho, la plej saĝa junulo! Vi elektis la bonan parton! Por kio estas al vi la blanka pomo? Vi sen tio ĉi estas pli saĝa ol Salomono.—La ruĝa pomo estas ankaŭ al vi nebezona ... kaj sen ĝi vi estas riĉa. Sed la riĉecon vian neniu envios".

—"Rakontu al mi, maljunulo", diris, ektreminte, Ĝiafaro, "kie loĝas la estiminda patrino de nia de Dio gardata kalifo?"

La maljunulo salutis ĝis la tero—kaj montris al la junulo la vojon.

Kiu en Bagdado ne konas la sunon de l' universo, la grandan, la gloran Ĝiafaron?

Tradukis V. Halperin.



VIVORISKOJ.

EL "ESPERANTO JUNULARO."




Juna kamparano iam ekskursis kaj renkontis ŝipanon. Promenante ili babilis pri ĉiuspecaj aferoj, kiel kutime faras migrantaj gajuloj. Dume ili ekmemoris pri siaj familianoj, kaj la ŝipisto interalie diris: "En ĉi tiu jaro mia frato dronis en la maro kaj antaŭ kvin jaroj mia patro dronis". La alia tion bedaŭris kaj plue demandis: "Kiamaniere mortis viaj avo kaj praavo?" La ŝipisto kvietanime respondis: "Ĉi ĉiuj dronis". Timigite la kamparano elvokis: "Je tia stato mi ne plu restus maristo. Ĉu vi tute ne timas, ke ankaŭ vi, estante en la ŝipo, pli-mal-pli frue dronos?" La ŝipisto rediris: "Nu, kiamaniere via patro mortis?"—"Li mortis laŭ la naturo en sia lito." Tiam ridetante parolis la ŝipisto. "Do, ĉu vi ne timas, kiam vi enlitigas vin, ke vi ankaŭ tie povas morti? Ni ja ĉiam kaj ĉie povas morti".

Prof. Dr. Penndorf.

SULTANO KAJ SAĜEGULO.

TURKA FABELO DE HABUN-BEJO.

EL "LINGVO INTERNACIA"



Por ĉiuj, aŭskultantaj la vorton de l' Profeto, estas tute kredinde, ke kiam la granda Ejub-Sal-Edin ombrigis el Al-Kairo la mondon per la standardo de l' kredo, farinte tiun ĉi urbon la radiluma centro de vero, lumo kaj gloro, — tiam la Ĉefanĝelo Gabrielo transŝovis la ĉielon, superpendintan ĝis tiu tempo la Mekkon, kaj fortikigis ĝin super la nova ĉefurbo de la Islamo.

La havantaj okulojn por vidi respektege rigardas ĝis nun en tiu ĉi ĉielo la vojon de l' Profeto sur la ĉevalo El-Borak, kiu veturigis la Profeton en superojn, dume la anĝeloj surŝutadis la vojon per eterne-blankaj nepereemaj rozoj de la paradizo. En la mallume-blua ĉielo la hele-brulantaj steloj estas disĵetitaj kiel misteraj arĝentaj monogramoj kaj ĉifroj, enhavantaj la nomojn de Dio kaj la sentencojn el la Korano, kiuj kvietigas sovaĝajn bestojn kaj malbonulojn.

Oni ne miru, ke sub tia ĉielo la pia kaj saĝa, grandanima kaj kuraĝa, potenca kaj justa sultano Sal-Edin ne devis timi noktajn aventurojn en mallarĝaj stratoj de l' urbo malnova, se eĉ lia animo estus atingebla por la timo. Kontraŭe, la sultano, ŝanĝinte tiel la vestaron, ke neniu lin ekkonadis, serĉis aventurojn kaj reciprokan proksimiĝon kun homoj, por kontroli siajn registojn, por senpere ekkonadi la bezonojn kaj mizeron de la popolo, por trovadi la saĝulojn kaj honestulojn, kiujn li povus proksimigi al la trono por utilo de la popolo.

La popola famo montris al Sal-Edin en malgranda domo en rando de l' urbo saĝegulon, kiu pasigis tagojn kaj noktojn apud siaj libroj sed tamen ne evitadis homojn. Kuracante korpojn kaj animojn, Abu-Amran helpadis al la homoj per saĝaj konsiloj en malfeliĉaj okazoj de la vivo.

La ordonanto de la ĝustreligianoj sciis, ke kristala freŝiganta fonto ofte estas kaŝita en forlasita puto, kiun abomenas la nesaĝaj migrantoj. La sultano do ĉie serĉadis la bonon kaj veron.

Dum unu el siaj noktaj migradoj Sal-Edin ekfrapis la pordon de Abu-Amran kaj estis tuj enlasita.

"Mi deturnas vin de piaj instruaj laboroj", diris la sultano post la kutima saluto.

— Se mi povas iel helpi, tiam ĝi nin ne haltigu. La plej sanktajn rajtojn havas la bezono. Rapidanto por la komuna preĝo ne riskas malfrui, se li devas haltiĝi en la vojo por doni ion al proksimulo.

La sultano rakontis pri unu el siaj embarasoj, kaŝinte, kompreneble, kiu li estas, kaj restis tre kontenta je la respondo. De tiu ĉi tempo Sal-Edin ofte alvenadis por interparoladi kun la saĝegulo



kaj, proksimiĝinte kun li, ne ĉesadis miri lian profundan saĝon kaj detalan scion pri homoj.

Dum unu vespero la sultano trovis, ke lia saĝa konsilisto sidas sur la tero en disŝirita vesto.

"Kio okazis kun vi, ho saĝegulo?" demandis la sultano.

— La plej granda malĝojo sur la tero: mi perdis mian maljunan patrinon.

"Ĝi estas, kompreneble, ŝarĝa perdo por la filo, diris la sultano; sed via saĝeco kaj via kredo devas vin defendi de la malespero."

— Per la amo, kiun nature havas la kreinto al sia kreitaĵo, la mondo estas kreita kaj teksita, respondis la saĝegulo. Perdi amatan kaj amantan ekzistaĵon, — tio ĉi signifas eksenti la frapon en la plej vivplenajn ligojn kaj kune seniĝi la plej efektivan kaj la plej kostan bonon.

"Sed la kredo diras, ke la perdo estas tempa: en la estonta vivo ni trovos ree la karajn por nia koro."

— En la estonta vivo, diris la saĝegulo, la atingintoj senmortecon estas ligitaj per la eterna kaj por ĉiuj komuna frata amo. Tie forestas la gepatroj, infanoj, edzoj kaj edzinoj; forestas, sekve, tiu amo, kiu apartigas por ni la ekzistaĵon amatan, kiel ion plej karan en la tuta mondo, — kaj la rabito de la morto estas ĉiel rabita senredonote. — Jen estas nun la unua nokto, kiun mi ne pasigas kun la libro post tia tempo, kiam la libro fariĝis mia plej kara amiko. La ordinaran malĝojon oni povas venki per la laboro, sed ekzistas ankaŭ malĝojo, de kiu fortiri sin estas la plej terure por la suferanto. Kiam la anima vundo estas ankoraŭ freŝa, tiam mem la penso, ke vi estos iam malpli sentema por tiu ĉi malĝojo, estas neesprimeble turmentanta.

Vidante, ke Abu-Amran ne evitas tamen la interparoladon, kaj esperante lin distri, la sultano komencis paroli pri aliaj objektoj.

"Antaŭnelonge, li diris, mi aĉetis sklavon. Li estas rimarkinda belulo kaj mi sentas grandan favoron al li. Mi dezirus fari tiun ĉi sklavon la domestro, sed la homoj diras: ne kredu al la ekstero. Ĉu efektive la agrabla ekstero postulas pli grandan singardemecon? Kial ĝi estas?"

—La ekstero, rediris la saĝegulo, faras impreson sur la imago kaj ĝenas la agadon de l' prudento. La imago do nur per Dia helpo povas diveni la veron aŭ alkonduki al feliĉa eltrovo; sen tiu ĉi helpo la imago ne povas doni garantion, ke ĝi kondukas al la vero. La okulo, ĉiam delogata de l' ekstero, estas la plej nebona konsilisto por juĝi pri la homoj, ĉar tiu ĉi organo de sento plej forte, se eĉ ne escepte, efikas la imagon.

"Laŭ viaj vortoj, rimarkis la sultano, oni devas kun fermitaj okuloj juĝi pri la homoj."

— Se vi povas eksciadi entute la homojn, tiam, liberante sin de la delogado per la ekstero, vi, kompreneble, riskas malpli. Oni ekscias homon pli bone, aŭskultante liajn paroladojn, se nur oni scias legi en ili liajn pensojn. Publika situacio, speco de okupadoj, saĝo kaj scioj, moro kaj karaktero — ĉio regule refleksiĝas en maniero de homo agadi rilate aliajn homojn kaj en liaj juĝadoj pri diversaj objektoj.

Pasis kelke da novaj lunoj. En daŭro de tiu ĉi tempo la sultano vizitis ankoraŭ unufoje Abu-Amran'on kaj ekvidis, ke li rekomencis jam sian kutiman manieron de vivado.

Unu fojon matene al la mirigita Abu-Amran venis la estro de l' palacaj korpogardistoj kaj ordonis al la saĝegulo iri en la palacon.

Tie ĉi oni diris al li:

"La sultanon atingis la famo pri via neordinara saĝeco. Oni tre laŭdis antaŭ li vian spritecon kaj



fariĝis granda veto, ke vi kun kovritaj okuloj trovos la sultanon en lia palaco inter la korteganoj. Kun kovrilo sur la okuloj vi povos penetri ĉien en la palaco; serĉu la sultanon, kaj se vi lin trovos antaŭ la suna malleviĝo, tiam via feliĉo sur la tero estos firmigita, ĉar sur vin elverŝiĝos la favoroj de la sultano."

Abu-Amran komprenis, ke restas por li nenio pli, ol peni plenumi la volon de l' sultano.



Kaj jen la saĝegulo devigita infane blindludi, komencis eraradi en la luksaj ĉambroj, altirante komunan atenton.

En unu loko kelke da homoj ekvolis ŝerci kaj moki lin; la aliaj estis rilate lin pli-malpli atentaj kaj ĝentilaj.

Migrante en la labirinto da ĉambroj, li venis en ĉambron, kie li eksentis fortan malsobrigantan odoron. Estis facile diveneble, ke la loĝanto en la ĉambro bone konas la haŝiŝon (narkotika preparaĵo el la folioj de la hinda kanabo) kaj la opion kaj la fortan kafon, kaj, eble, eĉ la drinkaĵojn, senkondiĉe malpermesitajn de la Korano.

"Ha, tio ĉi estas vi, la blindita saĝegulo!" elpa-

rolis maldelikata voĉo: — "vi posedas enviindan sorton, ĉar vi facile povas aperigi por vi la pluvon da favoroj de l' sultano."

"Mi volonte cedus al vi mian lokon", rediris Abu-Amran.

"Rakontu tion ĉi al iu alia! Vi kune kun necesaj helpantoj artiste komprenis aranĝi komedion kaj eksciti la scivolon de l' sultano. Sed vi ne eliros de tie ĉi, se vi ne promesos dividi kun mi la unuan donacon, kiun vi ricevos hodiaŭ de l' sultano."

"Mi volonte promesas."

"Ne, ĝi ne sufiĉas. Vi devas ĵuri, ke la promeso estos plenumita, kaj vi devas restigi tie ĉi vian zonon kiel signo de via ĵuro. Se vi ne plenumos la ĵuron, tiam vi estos pendigita per tiu ĉi zono inter la paradizo kaj la infero; de supre estos alportataj al vi la bonodoroj de l' paradizaj manĝaĵoj, tiklante vian flaron, de malsupre do vi estos fumadata de la bolanta infera sulfuro."

Abu-Amran restigis sian zonon kiel signon de l' ĵuro kaj feliĉe eliris.



Daŭrigante siajn serĉadojn, Abu-Amran dekliniĝis en unu el la flankaj ĉambroj. Li eksentis sub siaj piedoj molan smirnan tapiŝon kaj estis ĉirkaŭblovita per malvarmeto; la aero estis tie ĉi saturita de bonodoraĵoj kaj penetrita per delikataj ŝprucoj de freŝiganta malsekaĵo; la okulkovrilo de Abu-Amran tralasis agrablan lumon, penetrantan en la ĉambron tra koloraj vitroj.

"Mi salutas vin, ho saĝegulo! Vi venis ĝustatempe, ĉar mi enuas", eksonis melodia virina voĉo.

"Kiel do mi povus vin distri?" demandis Abu-Amran.

"Ha! Vi certe scias legi la sorton de l' homo sur lia manplato. Kvankam vi ne devas forpreni la kovrilon, en miaj ĉambroj vi povas sendanĝere ĝin fari: neniu ekscios. Se do ni ekkonos unu la alian pli detale, vi mem diros, ke pro mi estas eble iam flankigi viajn severajn regulojn."

"Ne ĉio ebla estas nur tial permesita, ke ĝi estas ebla. Malbono ofte estas distingebla nur per tio, ke ĝi estas pli facile farebla, ol bono. Krom tio mi eĉ ne povus tralegi vian sorton."

"Kiel? Vi tiel instruita kaj saĝa persono, ne scias legi tion, kio estas notita de l' anĝelo-gardisto sur la manplato de la homo antaŭ lia naskiĝo?"

"Tion ĉi scias nur trompistoj, kiuj, vere, ne estas ĉiuj malsaĝuloj, sed ĉiujn malsaĝigas."

"Ĉu vi scias laŭ la steloj antaŭdiri al la homo, kio atendas lin en estonteco? Ĉio ja dependas de la steloj, ĉu ne vere?"

"La Sinjoro antaŭdifinis la stelojn ne por ke ili aranĝu la homan sorton kaj ankoraŭ malpli por ke laŭ ili la homo ekkonadu sian sorton. La scio, atingebla por la homo, havas tri fontojn: personan prudenton de l' homo, nutrantan sin per la sperto de l' vivo; komunan prudenton, kolektitan kiel mielo per laboroj de l' saĝuloj kaj esprimantan sin en la scienco, kaj, fine, dian prudenton, esprimitan en la Revelacio. Pri la influo de l' steloj je la homa sorto oni nenion povas ĉerpi el tiuj ĉi fontoj."

Jam en la komenco de sia parolado Abu-Amran ekaŭdis la sonojn de liuto, — komence unu akordon, poste mallaŭtan sorĉantan melodion, kiu aliformiĝis en pasian kanton, supersonintan liajn vortojn.

Estis klare, ke oni ne aŭskultas la saĝegulon. Li komprenis, ke oni lin tie ĉi ne bezonas, kaj de neniu detenata eliris el la ĉambro.

Longe ankoraŭ eraradis Abu-Amran, ĝis li fine sin trovis en unu salono, kie liaj paŝoj sur la marmora planko laŭte resonadis en alta arkaĵo. Palpante la murojn, li eksciis, ke li sin trovas en loĝejo, sur kies muroj ĉie pendas armoj.

Perdinta la fortojn Abu-Amran mallevis sin sur malmolan kanapon, kiu estis apenaŭ pli alta, ol la planko.

Enirante la saĝegulo aŭdis voĉojn de kelkaj homoj, vive traktantaj pri io. La voĉoj komence eksilentis ĉe lia alproksimiĝo, poste unu el la apudestantoj sin turnis al Abu-Amran.

"Videble malfacilan problemon donis al vi la sultano. Mi eĉ dubas, ĉu ĝi estas solvebla."

"La suno jam estas proksima al subiro, — vi certe ne havos sufiĉe da tempo ĝis la limtempo", aldonis la alia.

"Mi mem ankaŭ malesperas, respondis Abu-Amran; mi estas tamen certigita, ke mi ne havis ankoraŭ la feliĉon renkonti la sultanon. Mi eble ne ekscios lin ekkoni, se mi lin renkontos; sed en nombro de tiuj, kiujn mi renkontadis, la sultano forestis, — mi estas certigita".

"Kion do fari? La sultano devas konvinkiĝi je via fervoro, se eĉ al vi ne prosperos solvi la problemon — diris la tria. Donu al li freŝigantan trinkaĵon. Malfeliĉa homo, kiom vi estas lacigita!"

Kiam servanto estis alportanta la trinkaĵon al Abu-Amran, la unua voĉo ree eksonis:

"Oni tre multe paroladis pri vi al la regnestro deiluziita kaj malĝojigita de via malsukceso".

"Mi pensas pli bone pri la sultano", rediris tiu, kiu ordonis doni la trinkaĵon al Abu-Amran. La regnestro eltiros el tiu ĉi okazo la edifon, ke io superiĝanta la homajn fortojn estas postulebla de neniu".



"Mi ĵuras, mi aŭdas mian Potenculon", ekkriis Abu-Amran, rapide leviĝinte de la kanapo kaj falinte sur la teron antaŭ la parolanto. "Permesu, ho regnestro, forigi la okulkovrilon kaj lasu min ekvidi vian klaran vizaĝon!"



La sultano levis Abu-Amran'on, forigis la okulkovrilon kaj kisis la saĝegulon.

"Rakontu al mi, kiun vi ekkonadis en la vojo kaj kiel vi divenis, ke mi estas antaŭ vi", — scivole demandis la sultano.

"Komence mi renkontadis homojn el la plej malalta servantaro.

"Laŭ la moro distinganta tiujn, kiuj apartenas aŭ devas aparteni al tiu ĉi klaso, ili mokis la homon pro lia sendefenda situacio.

"Mi estis ĉe mulla (Turka pastro) kaj ekkonis lin, ĉar li minacis min per tio, kion li mem ne kredas: la tre ofta alproksimiĝo al la sanktaĵo malpligrandigas ĉe la homoj de tiu klaso la respektegon antaŭ la sanktajo kaj siavice naskas senkredon.

"Mi estis ĉe virino kaj mi estas konvinkita, ke ŝi estas bela:

"ĉar tiu ĉi virino celis ekscii sian sorton; tia scivolo estas nur ĉe belaj virinoj. Nebela nenion atendas de l' sorto;

"por tiu ĉi virino estus agrable, se viro rompus por ŝi sian devon; — el la certa tono estis klare, ke la persono, pri kiu mi parolas, kutimis havi sukceson sur tiu ĉi areno kaj ke, sekve, ŝi havas rimedojn por tia venko; la plej efektiva rimedo de virino por atingi tian celon estas ŝia beleco, kiun la virino malofte uzas por pli bonaj celoj;

"tiu ĉi virino proponadis demandojn kaj ne aŭskultis la respondojn: —jen estas tria trajto, distinganta belajn virinojn, kiuj ordinare estas pli okupitaj de si mem, ol de la tuta ĉirkauaĵo.

"Entute mi distingadis la homojn en via palaco laŭ tiu senerara signo, ke ju pli alta estas la rango, la stato kaj la ofico de l' homo, des malpli li penas sin montri grava kaj des pli simpla estas lia agado.

"Vin, ho granda regnestro, mi ekkonis per tio, ke vi montris vin la plej favora!"

La sultano aŭskultadis la saĝegulon kun videbla plezuro.

"Mi estas feliĉa, trovinte en mia lando tian homon, kia vi estas", diris li al Abu-Amran. "Vi devas fari por mi oferon kaj resti en mia palaco kiel kuracisto, konsilisto kaj amiko. Petu de mi ian ajn favoron aŭ donacon.

— "Ho, regnestro! se la unuan vi nomas ofero, tiam mi petas kiel favoron, ke vi min lasu por fini la sciencan laboron en mian solecon por kvardek tagoj kaj ordonu,ke tiun ĉi favoron dividu kun mi la kortega mulla, ĉar tiel mi promesis al li. Kompreneble en daŭro de tiu ĉi tempo li ne havos la eblon kontentigi iajn kutimojn, sed la piaj interparoladoj kaj konsideroj en mia ĉambreto turnos lin eble al la vera kredo, — almenaŭ duone."

La sultano ridante permesis.

Estas dubeble, ĉu kun precipe granda plezuro akceptis la mulla la dividon de la sultana favoro, honeste plenumitan de Abu-Amran; sed post kvardek tagoj Abu-Amran kaj la mulla revenis en la palacon.

Abu-Amran ne sole fariĝis proksimulo de la sultano, sed ankaŭ la gloro de liaj scioj ĉirkaŭiris la tutan mondon. De ĉiuj flankoj de l' mondo oni turnadis sin al li por konsiloj kaj solvoj de la plej diversaj demandoj, la malsanuloj do kunfluadis de la tuta Oriento al la antaŭpordo de lia domo.

Estus bone por tiu el la viroj de l' leĝo kaj scienco, kiu povas en la batalo de l' vivo sekvi la instruon de Abu-Amran. Por tiu malfermos sin la pordo de l' paradizo preter la purigejo, kvazaŭ por militisto, kiu falis en batalo por gloro de Allaho.

El la lingvo rusa tradukis V. Gernet.



HINDA RAKONTO.

De Eça de Queiroz.

EL "LINGVO INTERNACIA"




Estis iam unu reĝo, juna kaj kuraĝa, estro en unu regno, plena da urboj kaj fruktoportaj kampoj; li foriris por bataladi en malproksimaj landoj, lasinte solan kaj malkontentan sian reĝinon kaj fileton, kiu ankoraŭ vivadis en sia lulilo, ĉirkaŭvolvita per tolaĵetoj.

Komencis malgrandiĝi la plenluno, kiu lin vidis marŝi, ravitan de lia sonĝo pri almilito kaj pri gloro, kiam aperis unu el liaj kavaliroj, rompitaj la bataliloj, nigrigita de l' seksango kaj de l' polvo de la vojoj, alportante maldolĉan sciigon; la perdon de unu batalo kaj la morton de l' reĝo, trapikita per sep ponardegoj ĉe l' bordo de unu riverego inter liaj nobeloj la plej elektitaj.

La reĝino ploris estre la reĝon. Ŝi ploris ankaŭ ĉagrene la edzon, kiu estis gaja kaj bela. Sed precipe ŝi ploris turmente la patron, kiu tiel lasis la fileton senhelpan inter tiom da malamikoj de lia malforta vivo kaj de l' regno, kiu devus aparteni al li, sen ia brako por lin defendi, potenca per la forto kaj potenca per la amo.

El tiuj malamikoj la plej timinda estis lia onklo, la frato bastarda de l' reĝo, diboĉa kaj sovaĝa homo, ema al envio malpura, deziranta la regnestriĝon nur pro trezoroj de l' regno; li de kelkaj jaroj loĝadis en unu kastelo sur la montoj, kun bando da ribeluloj, kvazaŭ unu lupo, kiu atendas la kaptaĵon inter sia anaro. Ve! la kaptaĵo nun estis tiu infaneto, la amata reĝo, estro de tiom da provincoj, kiu estis dormanta en sia lulilo, kun ora sonorludilo, premita en la mano!




Flanko ĉe flanko alia infano dormadis en alia lulilo. Sed tiu ĉi estis sklavuleto, ido de l' bela kaj fortika sklavulino, kiu nutradis la princon. Ili ambaŭ naskiĝis dum la sama somera nokto. La sama brusto ilin nutradis. Kiam la reĝino, antaŭ ol ekdormi, iris kisi la princeton, kiu havis blondajn kaj maldikajn harojn, ŝi kisis pro la amo ankaŭ la sklavuleton, kiu havis nigrajn kaj krispajn harojn. La okuloj de ambaŭ brilis kiel multekostaj ŝtonoj. Nur la lulilo de unu estis riĉega, el elefanta osto kaj puntoj—kaj la lulilo de l' alia estis malriĉa kaj el kanoj. La fidela sklavulino tamen flegadis ilin ambaŭ per egalaj karesoj, ĉar, se unu estis ŝia infano,—la alia estis ŝia reĝo.


Naskita en tiu reĝa domo, ŝi havis la pasion, la religion pri siaj geestroj. Neniajn larmojn oni verŝis pli sentemajn, ol la ŝiaj pro la reĝo, mortigita ĉe l' bordo de l' riverego. Ŝi apartenis tamen al la gento, kiu kredas, ke la vivo tera daŭras en la ĉielo. La reĝo, ŝia estro, certe jam estas nun reganta alian regnon, trans la nuboj, egale plenan da urboj kaj fruktoportaj kampoj. Lia batala ĉevalo, liaj bataliloj, liaj paĝioj estis suprenirintaj kun li en altaĵojn. Liaj regatoj, kiuj mortus baldaŭ, reprenus ilian regatecon ĉirkaŭ li en tiu ĉiela regno. Kaj ŝi, unu tagon, siavice supreniros per ia luma radio reloĝi la palacon de ŝia estro kaj denove ŝpini la tolon por liaj tunikoj kaj ekbruligi iafoje la vazon de liaj parfumoj; ŝi estos en la ĉielo, kiel ŝi estis sur la tero, kaj estos feliĉa en sia servuto.

Sed ŝi ankaŭ ofte tremis pro sia princeto! Kiom da fojoj, donante al li la mamon, ŝi pensis pri lia malforteco, pri lia longa infaneco, pri la malrapidaj jaroj, kiuj pasus antaŭ ol li estus almenaŭ tiel granda, kiel unu glavo,—kaj pri tiu onklo kruela, kies vizaĝo estas pli malluma ol nokto, kaj kies koro estas pli malluma ol la vizaĝo, kiu envias la tronon kaj spionas de l' supro de sia ŝtonego, inter la glavoj de sia bando! Malfeliĉa princeto! Kun pli granda flego ŝi lin alpremadis tiam inter la brakoj. Sed se ŝia filo balbutis apud ŝi—ŝiaj brakoj etendiĝis al li kun varmamo pli feliĉa. Tiu, en lia malriĉeco, nenion devas timi de l' vivo. Malfeliĉoj, bataloj de l' malbona sorto neniam povus lin restigi pli senigita de l' gloro kaj de l' bienoj de la mondo, ol li jam estis tie, en la lulilo, sub la tola blanka kurteneto, kiu ŝirmadis lian nudaĵon. La vivo ŝajnas por li vere pli kara kaj konservinda, ol por lia princo, ĉar nenia el la klopodaj zorgoj, per kiuj ĝi nigrigas la animon de l' estroj, atingos lian liberan kaj simplan animon de sklavulo. Kaj, kvazaŭ amante lin pli pro tiu feliĉa humileco, ŝi kovradis lian grasan korpeton per kisoj pezaj kaj varmegaj,—kisoj, kiujn ŝi faradis malpezaj sur la manoj de sia princo.

Dume granda teruro vastiĝis en la palaco, kie nun regnas virino inter viroj. La bastardulo, la homo enviema, kiu vagadis en la supro de l' montegoj, estis veninta al la ebenaĵo kun sia bando, kaj jam restigis post si, tra domoj kaj vilaĝoj feliĉaj, sulkon da mortigo kaj ruinoj. La pordegoj de l' urbo estis refortikigitaj per ĉenoj pli fortikaj, sur la turoj brilis lumoj pli altaj, sed por la defendo mankis vira disciplino. Ŝpinilo ne guvernas kiel glavo. La tuta nobelularo fidela pereis en la granda batalo, kaj la malfeliĉa reĝino nur sciis alkuri ĉiumomente ĉe la lulilon de sia fileto kaj plori super li sian malfortecon de vidvino. Nur la fidela nutristino ŝajnis trankvila; kvazaŭ la brakoj, kiuj ame vartadis ŝian princon, estus muregoj de ia fortikaĵo, kiujn nenia kuraĝo povus venki.



Jen en unu nokto, nokto silenta kaj malluma, kiam ŝi estis ekdormonta kaj jam senvestita en ŝia lito, inter la du infanoj, ŝi pli divenis ol sentis mallongan tintadon de fero kaj bruon de batalo, malproksime, ĉe la eniro de la reĝaj fruktokampoj. Envolvinte sin rapide en mantelon, ĵetante malantaŭen siajn harojn, ŝi aŭskultis turmente. Sur la tero, kovrita de sablo, inter la jasmenujoj resonadis ies pezaj kaj malgraciaj paŝoj. Poste eksonis ia ĝemo, ies korpo falis mole sur la ŝtonojn, kiel pakaĵo. Ŝi fortege malfermis la kurtenon ... kaj tie, en la fino de l' galerio ekvidis homojn, lumon de lanternoj, brilon de bataliloj ... Unumomente ŝi komprenis ĉion—la palacon almilititan, la kruelan bastardon, kiu venis por preni, mortigi ŝian princon! Tiam rapidege, sen ia ŝanceliĝo, sen ia dubo



ŝi forprenis la princon el la elefantosta lulilo, ĵetis lin sur la malriĉan kanan lulilon kaj, preminte sian filon el la simpla lulilo, kun senesperaj kisoj lin kuŝigis en la reĝan lulilon, kiun ŝi kovris per puntoj.

Subite ia grandega homo, la vangoj flamantaj, portanta nigran mantelon sur sia armaĵo, aperis ĉe l' pordo de la ĉambro, inter aliaj homoj, kiuj altigadis lanternojn. Li ĉirkaŭrigardis, alkuris al la elefantosta lulilo, kie briladis la puntoj, fortiris la



infanon, kiel oni fortiras saketon, plenan da oro, kaj, sufokante liajn kriojn sub la mantelo, foriris furioze.

La princo dormis en sia nova lulilo. La nutristino restis senmova en silento kaj mallumo.

Sed subite trasonis krioj en la palaco. Post la vitroj pasis la longa flamo de l' torĉoj. La kortoj resonis pro la frapado de l' bataliloj. Kaj, la haroj malordigitaj, preskaŭ nuda, la reĝino eniris en la ĉambron inter siaj korteganinoj krivokante sian filon. Ekvidinte la elefantostan lulilon, la tolaĵojn malordigitajn, malplenan, ŝi falis sur la plankon, plorante en malespero. Tiam, silenta, tre malrapide, tre pala, la nutristino malkovris la malriĉan lulilon el kanoj... La princo tie sin trovis kvieta, dormanta, en sonĝo, kiu ridetigadis lin kaj iluminadis lian tutan vizaĝon, ĉirkaŭitan de l' oraj haroj. La patrino falis sur la lulilon kun sopiro, kiel falas mortinta korpo.




Kaj en tiu momento alia bruo skuis la marmoran galerion. Ĝi estis la kapitano de l' gvardio kun sia fidela anaro. En iliaj krioj oni sentis tamen pli da malĝojo, ol da triumfo. La bastardo estis mortigita! Kaptita, kiam li forkuris, inter la palaco kaj la fortikaĵo, frakasita de l' forta legio da soldatoj, li pereis kun dudek de lia bando. Lia korpo tie restis, trapikita per sagoj, en la flanko, sur grandamaso da sango. Sed tie! Sennoma doloro! La korpeto mola de la princo tie ankaŭ restis, envolvita en la mantelon, jam malvarma, ruĝe nigra ankoraŭ dank' al manoj kruelaj, kiuj mortige premis lian gorĝon!... Tiel, tumulte, la militistoj ĵetadis la kruelan sciigon, kiam la reĝino, kvazaŭ freneza, jen plorante, jen ridante, altiĝis sur la brakoj, por montri al ili la princon vekiĝintan.

Ĝi estis mirindaĵo, estis varmega saluto. Kiu lin savis? Kiu...? Tie staris muta kaj rigida apud la malplena elefantosta lulilo tiu, kiu lin savis! Servantino eksterordinare fidela! Estis ŝi, kiu por konservi la vivon al sia princo sendis sian filon al morto... Tiam, nur tiam la feliĉa patrino, elirante el sia ĝojo, ĉirkaŭprenis pasie la doloran patrinon kaj kisis ŝin, nomante ŝin fratino el sia koro... Kaj el tiu popolamaso, kiu sin premadis en la galerio, eliris nova varmega saluto kun petegoj, ke oni rekompencu kiel eble plej malavare la mirindan servantinon, kiu savis la reĝon kaj la regnon.

Sed kiel? Kiom da oro povas pagi unu filon? Tiam unu maljunulo el nobela gento opiniis, ke ŝi estu kondukata en la reĝan trezorejon kaj elektu inter tiuj riĉaĵoj, kiuj estis la plej grandaj en tuta la Hindujo, ĉiujn, kiujn ŝi povus deziri...

La reĝino prenis la manon de l' servantino, kaj, ne forlasante la rigidecon de sia marmora vizaĝo, marŝanta kiel mortinto, kvazaŭ en sonĝo, ŝi estis tiel kondukata al la ĉambro de la trezoroj. Estroj, korteganinoj, militistoj sekvis ilin kun la respekto tiel sincera, ke oni apenaŭ povis aŭdi la bruon de l' ŝuoj sur la glatŝtonoj. La dika pordo de l' trezorejo malfermiĝis malrapide. Kaj kiam unu servanto forigis la barojn de la fenestroj, la antaŭmatena lumo, jam hela kaj rozkolora, eniranta tra la kradoj el fero, ekbruligis mireĝindan kaj fajrantan bruliĝon el oro kaj multekostaj ŝtonoj. De la ŝtona planko ĝis la mallumaj arkaĵoj, en la tuta ĉambro relumadis, brilegadis la bataliloj ornamitaj, la amasoj da diamantoj, la multego da oraj moneroj, la longaj fadenoj el perloj,—ĉiuj riĉaĵoj de tiu regno, amasitaj de cent reĝoj dum dudek cent jaroj. Unu longa ha!, malrapida kaj mireganta, pasis inter la popolamaso, kiu mutiĝis. Poste estis scivolega silento. Kaj en la mezo de l' ĉambro, envolvita de l' multekosta brilego, staris senmove la nutristino... Nur ŝiaj okuloj, brilantaj kaj sekaj, sin turnis al la ĉielo, kiu trans la kradoj fariĝis rozkolora kaj ora. Tie, en tiu ĉielo, freŝa pro l' antaŭmateno, sin trovadis nun ŝia infano. Tie li estis, kaj jam la suno iris supren, kaj estis malfrue, kaj ŝia infano ploris, serĉante ŝian mamon!... Tiam la nutristino ridetis kaj etendis la manon. Ĉiuj sekvis, ne spirante, tiun malrapidan movadon de ŝia malfermita mano. Kian mireĝindan juvelon, fadenon el diamantoj, manplenon da rubenoj estas ŝi elektonta?





La nutristino etendis la manon—kaj sur unu breto ĉe flanko, inter amaso da bataliloj, ŝi prenis ponardon. Estis ponardo de unu maljuna reĝo, tute ornamita per smeraldoj, kiu povus pagi unu provincon.

Ŝi prenis la ponardon kaj ĝin premante forte en la mano, celante al ĉielo, kie aperis la unuaj radioj de l' suno, ekrigardis la reĝinon, la popolamason kaj ekkriis:

—Mi savis mian princon, kaj nun—mi iras doni la mamon al mia filo!

Kaj ŝi trapikis per la ponardo sian koron...

Tradukis Costa e **Almeida.**



LA UNUA PREĜO.

EL "IRENE," ALBUMO ILUSTRITA, 1875.

EL "LINGVO INTERNACIA"



La brilantaj pordegoj de l' Edeno ĵus fermiĝis post la elpelitaj. La unua peko estis farita, la paradizo perdita—kaj tie ekstere en la malĝoja, vasta dezerto sidis la unuaj geedzoj, fleksitaj per senvorta malespero. Malluma kaj nebula nokto malleviĝis ĉirkaŭ ili; multepezaj tondronuboj pendis super iliaj kapoj kaj neniu amika stelo dolĉigis la teruran dezertecon. Nur malproksime brilis lumstrio — tien la malfeliĉuloj ne kuraĝis turni la okulojn: estis la flamanta glavo de l' anĝelo, de l' gardisto ĉe la pordegoj de l' paradizo. — Kaj la nokto pasis sian malrapidan, sensonan iradon. Kiel longtempe la elĵetitaj estis tiel sidantaj en konscia letargio? Ili ne sciis. La malĝojo ne kalkulas horojn kaj minutojn; ili estas unu por ĝi.

Fine altiĝis profunda ĝemo antaŭen el la brusto de Eva, kaj terure sonis la ĝemo en la silento de l' nokto. "Ve al mi!" ŝi plendis, "kion mi faris!"

"Ve al mi!" eksonis kiel eĥo el la lipoj de Adam.

"Mia estas la kulpo", murmuretis Eva. "Vian malfeliĉon mi preparis. Ho kial ne sufiĉis, ke mi sola estu punita?"

"La peko estis mia", diris Adam per voĉo pli forta. "Kial mi ne tiris la delogan frukton el via mano kaj ne forkuris kun vi malproksimen de la deloganta serpento!"

"Pardonu al mi!" sonis la reciproka brulanta peto de iliaj lipoj. Iliaj rigardoj renkontiĝis—ili estis malklarigitaj per larmoj, sed fidela amo eliris antaŭen de ili kiel dolĉa lumradio. La forta fluado de l'malespero dronigis ĉion en iliaj koroj, krom la reciproka amo—sed ĝi ankaŭ en tiu senespera momento nur sciis elveni per tremanta: "pardonu!"

Kaj ĝemante ĉirkaŭprenis Adam sian edzinon, kaj ŝi apogis la larmitan vizaĝon al lia ŝultro.

Tiam ĉirkaufluis ilin varma venteto. El la malproksimo ili aŭdis la murmuron de l' fontoj en la ĝardeno de l' paradizo kaj dolĉa florodoro el la tieaj rozoj de l' eterneco flugetis for al la elpelitaj en dezerton. Kaj malespero cedis kiel ombro antaŭ lumo. Mira sento de espero, melankolia kaj tiel dolĉega, trankvile altiĝis en iliaj brustoj, kaj senvole ili etendis siajn brakojn al la perdita paradizo.

"Ĉu vi aŭdas la fontojn tie", murmuretis Eva. "Ĉu ili ne murmuras kvazaŭ vokante 'revenu'! Ĉu vi ne sentas en tiuj ĉi florodoroj, kiuj ĉirkaŭas nin, la vokon de la dolĉega lando al returno. Apud la pordoj de l' vivo gardas l' anĝelo, sed unufoje apud la ponto de l' morto nin renkontos neniu flamanta glavo. La promeso estis, ke la ido de l' virino frakasos la kapon de l' serpento!"

Ho! Certe la virino estis l' unua kiu cedis por la voĉo de l' tentanto, sed la eterna, pardonanta amo ankaŭ estis unue sentita de ŝia animo.

Sed super la vizaĝo de Adam fluis malluma nubeto de malĝojo. La malkredo eniĝis en lian koron. "Tro longa estas la vojo kaj la malhelpaĵoj tro multaj", li respondis kun sensonora voĉo. "Ni neniam reatingos nian perditan Edenon."



Sed tuj genuis Eva apud lia flanko, kaj la unua preĝo altiĝis, brulanta kaj esperanta, el homaj lipoj. Kaj la mallumaj nuboj sur la ĉielo iris for. Per helaj flugiloj mallevis sin anĝelo al la tero. Hela kiel vespera nubeto estis lia mantelo, kaj ĉirkaŭ lia alta frunto estis krono da dolĉe lumiĝantaj steloj.



"Mi estas sendita al vi, infanoj de l' polvo por afabligi viajn penojn. La duono de via tenteca tempo aliformiĝos en ripozon kaj reviviĝon."

Pro honto Adam estis mallevinta la okulojn al la tero, sed ĉe tiu ĉi voĉo, dolĉa kiel la paco de l' konscienco, en lian animon venis mira trankvila ĝojo kaj en humila pento li fleksis siajn genuojn al preĝo.

"En ĉiu vespero, kiam vi post diligenta laboro eniros en vian dometon", parolis ree l' anĝelo, "mi proksimiĝos al vi en bona paco kaj lulilos la enuantajn korojn. Sed se vi returniĝos al la vojo de l' malboneco, tiam la nokto fariĝu timego por vi, kaj en senhelpa malespero vi preĝegos al mi—se mi venos, mi venos por puno kaj murmuretos en viajn orelojn timigantajn vortojn."

Kaj iom post iom fermiĝis nerimarkeble la lacaj homokuloj—ĉiam kaj ĉiam la eksteraĵoj fariĝis pli nevideblaj al ili kaj—kiel antaŭe, ili ree iradis, mano en mano, en la ĝardeno de l' paradizo. Pli dolĉe ol antaŭe odoris la miraj floroj, pli melodie ol antaŭe bruadis la palmoj, kaj la arbo de l' scio fleksis mem siajn fruktportantajn branĉojn al la revenintaj forkurintuloj.

La belega revo estis finita. En la dezerto revekiĝis Adam kaj lia edzino, sed lumigita de l' suno estis antaŭ ili la ŝtonplena vojo, kaj en ĝoja espero ili komencis sian iradon—ili nun sciis, ke la vojo tra la dezerto iam ree eniros en la belegan ĝardenon de l' paradizo.


C. W. v. Sydow.



GOLEM.

(El "Staré pověsti české" De Alois Jirasek.)

EL LA GAZETO "ESPERANTO"



Dum la regado de Rudolfo II-a vivis en hebrea kvartalo en Praha rabeno Jehuda Lev-Ben-Bezalel viro tre instruita kaj sperta. Li estis altstatura kaj tial oni nomis lin "la granda rabeno". Bonege li konis ne nur Talmudon kaj Kabalon, sed ankaŭ matematikon kaj astronomion. Multaj sekretoj de la naturo, misteraj por homoj, estis al li konataj, kaj li trafis tiajn agojn, ke la homoj admiris lian magian povon.


La famo pri li disvastiĝis malproksimen tra la mondo, kaj penetris eĉ supren en la kastelon de sankta Venceslavo, al kortego de la reĝo Rudolfo. Lia kortega astronomo Tycho de Brahe tre estimis la instruitan Jehuda'n.

Sed la plej granda miraklo estis Golem, lia servisto. La potenca rabeno mem kreis lin el argilo; poste li vivigis lin metinte en lian buŝon "semon". (Hebrea magia skribaĵo.)

Golem laboris tiom, kiom du homoj. Li servadis, alportadis akvon, hakadis lignon, balaadis kaj entute li faradis ĉiujn maldelikatajn laborojn. Sciu, ke li ne manĝis, ne trinkis, kaj ne bezonis ripozon nek respiron. Sed ĉiufoje, kiam komenciĝis hebrea sabatfesto, jam vendrede vespere, kiam devis ĉesi ĉia laboro, la rabeno prenis la semon el lia buŝo; Golem subite rigidiĝis, ne plu movis sin kaj staris en angulo kiel figuro, senviva argilo, kiu post la sabato reviviĝis tuj, kiam la rabeno metis en lian buŝon la magian "semon".

Sed unufoje Jehuda, ironte en malnovan sinagogon eksanktigi la sabatfeston, forgesis pri Golem, kaj ne eligis la semon el lia buŝo. Sed apenaŭ la rabeno eniris en la preĝejon, apenaŭ li komencis la psalmon, jam alkuris al li homoj el lia domo kaj el la ĉirkaŭaĵo, ĉiuj timkonsternitaj, kun teruro, interrompante unu la alian, ili anoncis kriante: "Kio okazas, kio okazis, Golem furiozas hejme, neniu kuraĝas proksimiĝi al li, ĉar li mortigus ĉiun."

La rabeno hezitis momenton; venis ja la sabatfesto, la psalmo komenciĝis jam. Ĉia laboro, ĉia eĉ plej malgranda penado estis peko de post tiu momento. Li tamen ankoraŭ ne findiris la psalmon, per kiu sanktiĝas la sabatfesto, ankoraŭ ne venis la vera momento de l' festo. Li leviĝis kaj rapidis al sia domo. Ankoraŭ li ne ĝisiris kiam li jam ekaŭdis surdigan bruon, barelsonantajn frapegojn. Li enpaŝis, dum la aliaj pro la timo marŝis iom malantaŭ li, kaj li ekvidis teruran detruitaĵon: disfrapitan vazaron, depecigitajn renversitajn tablojn, seĝojn, kestojn kaj benkojn, disĵetitajn librojn. Ĉi tie Golem estis jam fininta sian verkon de detruo. En tiu momento li laboris en la korto, kie



kuŝis jam kokinoj, kokidoj, kato kaj hundo, ĉiuj mortigitaj, kaj kie li ĵus ektiradis el la tero tilion je dika trunko. Li estis tute ruĝa, la nigraj bukloj flirtis ĉirkaŭ la frunto kaj vangoj, kiam li elradikigis la arbon kvazaŭ iun palison el barilo.

La rabeno iris rekte al li; li rigardis lin fikse, havante la manojn etenditajn al li. Golem ekskuiĝis, li malfermegis la okulojn, kiam la majstro lin tuŝis, kaj rigardis mirkonsternite en liajn okulojn, kvazaŭ li estus enkatenita de lia potenca vidsento. Kaj en tiu momento Jehuda etendis la manon al liaj dentoj kaj per unu manmovo elŝiris el lia buŝo la magian "semon".



Golem'on kvazaŭ iu sube hakis. Subite li falis kaj kuŝis sen movkapablo, jam nur kiel argila figuro, senviva materio.

Ĉirkaŭe ĉiuj hebreoj, junaj kaj maljunaj, ĝoje ekkriis kaj plenaj de kuraĝo alpaŝis al falinta Golemo, ridis kaj insultis lin. Sed la rabeno, profunde elspirinte, ne elparolis eĉ unu vorton, ekpaŝis denove al la sinagogo, kie li en la lumo de lampoj denove komencis diri la psalmon kaj eksanktigis la sabatfeston.

La sankta sabata tago pasis, sed Jehuda ne plu metis la semon en la buŝon de Golem. Kaj tial Golem ne levis sin, ĝi restis argila figuro; poste ĝi estis transportita al subtegmento de la malnova sinagogo, kie ĝi disfalis peco post peco.

El la ĉeĥa, Rudolf Fridrich.



LA LUNO RAKONTAS.

DE ICĤAK PEREC.

EL LA GAZETO "ESPERANTO"



Laca de l' rigardado malsupren, sur la blankan marmoron kaj gaslumon, mi deturniĝis, kaj ekrigardis enflankan strateton.

El kurbigita kaduka dometo eliras nudpieda knabo, malbone vestita (la ĉifonoj sin apenaŭ tenas sur li), kaj el kontraŭstaranta alia domo, preskaŭ ruino, eliras ankaŭ tia knabo.

Alproksimiĝis unu al la alia, kaj mi jam ne povis diferencigi ilin: ambaŭ terure malgrasaj kun flamaj okuloj, ambaŭ tremas de malvarmo kaj verŝajne ankaŭ de malsato...

Mi, aŭskultante ilian interparoladon, aŭdas:

—Ĉu preta? — Kaj vi? — Ankaŭ. — Vi manĝis? — Ne... paĉjo ne alportis.

—kaj la mia — malsana; la patrino ploras...

—ni iru? — Ni kuru... malvarme. — Nu!

Ili kuras rapidege urben. Mi postrigardas ilin. Apud unu el la plej belaj domoj ili haltas.



—Vidu! La domo de mia onklo! — unu el ili diras fiere. La alia montras kontraŭstarantan domon.

—Ĉi tiu estas de mia onklo!—

—Sed al mia onklo oni alvenigis araban ĉevaleton por 16 mil.—

—Kaj mia havas kaleŝegon kun kvar ĉevaloj kiel leonoj.—

—Mia, posedas eble mil vilaĝojn! — Mia, eble cent urbojn!

—Malsaĝulo! Ĉe mia onklo estas la mebloj oraj.

—Azeno! Ĉe mia onklo, el brilantoj sole.—

—Sed mia onklino kun ŝiaj parfumoj! La nazon ili disŝiras.

—O va! Mia onklino iras ĉiutage al teatro.

—Kaj—, se mia onklo kartludas ĉiunokte—ha?

Ili longe kaj malpace diskutadis kaj preskaŭ ekkomencis sin bati reciproke. Unu tamen interrompis.

—Estas malvarme — li diris tremante. Lia kamarado ankaŭ ĉesis.

—Mi estas tre malsata, li diras, en mia koro io suĉadas... Eksonorigu ĉe via onklo!...

—Ne! tiu respondas ektimigite. — Li ordonis sian pordiston, ke li rompu al mi la krurojn kaj la manojn.—

—Mia onklo tiel same, — respondis la alia. Malĝoje ambaŭ klinas la kapojn.

—Ni iru? — Pli bone ni kuru! — Kaj survoje:

—Morgaŭ nokte refoje...

—Jes... Trakur... Mi donos signalon... Mi ekkrios kiel koko...

—... Mi respondos per miaŭo de kato.—

—Bone...

Ili malaperis de antaŭ miaj okuloj.


El la hebrea trad. Mordĥaj Ĥejruti.



LA SERVO-SOLDATO.

EL GUY DE MAUPASSANT.

EL "LINGVO INTERNACIA"



La tombejo, plenigata de oficiroj, elvidis kiel floranta kampo. Ruĝaj kepoj kaj pantalonoj, oraj galonoj kaj butonoj, glavoj, ŝultrorubandoj de oficiroj de la ĉefa stabo, ŝevronoj de pafistoj kaj de husaroj briletis inter la tomboj, kies blankaj kaj nigraj krucoj etendis siajn malgajajn, ferajn, marmorajn aŭ lignajn manojn super la morta loĝanaro de l' tombejo.

Oni ĵus enterigis la edzinon de regimentestro Limuzen. Ŝi dronis, dum baniĝo antaŭ du tagoj.

L' enterigiro estis finita. La pastraro foriris, sed la regimentestro, subtenata de du oficiroj, staris antaŭ la kavo, en kies profundaĵo li vidis ankoraŭ la ĉerkon, kaŝintan la jam dismetiĝintan korpon de lia juna edzino.

Preskaŭ jam maljunulo, altkreska, maldika, kun blankaj lipharoj, li edziĝis antaŭ tri jaroj kun orfino, filino de lia mortinta amiko, regimentestro Sortis'.

Kapitano kaj leŭtenanto, sur kiuj la vidvo sin apogis, penis forkonduki lin. Sed li ne volis foriri.

Kun okuloj, plenaj de detenataj per penego larmoj, li mallaŭte murmuretis:

— Ne, ne, ankoraŭ iomete.

Li daŭrigis stari kun tremantaj piedoj sur la rando de tiu ĉi kavo, kiu ŝajnis al li senfundaĵo, en kiun enfalis lia koro kaj vivo, ĉio, kion li havis en la mondo.

Subite aliris la generalo Ormon', prenis la regimentestron per lia mano kaj, fortirante lin preskaŭ perforte, diris:

— Sufiĉe, sufiĉe, mia fidela amiko, ne estas bone stari tie ĉi.

La regimentestro obeis kaj iris domen.

Malferminte la pordojn de sia kabineto, li ekvidis sur sia skribtablo leteron. Li prenis ĝin en manon, kaj estis preta ekfali pro mirego kaj maltrankvilo: li rekonis la skribadon de sia edzino. Sur la letero estis poŝta sigelo kun tia sama tagdato. Li formetis la koverton kaj eklegis:

"Patro! Permesu al mi ankoraŭ unu fojon nomi vin patro, kiel antaŭe. Kiam vi ricevos tiun ĉi



leteron mi estos mortinta kaj sub la tero. Tiam vi eble povos pardoni min.

Mi volas nek moligi vian koron, nek pligrandigi mian kulpon. Mi volas per tuta sincereco de virino, kiu post unu horo mortigos sin, diri al vi la tutan kaj malfalsan veron.

Kiam vi edziĝis kun mi pro grandanimeco, mi donis al vi mian koron pro dankemeco kaj amis vin per mia tuta infana animo. Mi amis vin preskaŭ tiel same, kiel mian patron, preskaŭ tiom same. Unufoje, kiam mi sidis sur viaj genuoj kaj vi kisis min, mi nevole eldiris la nomon: patro! Tio ĉi estis neatendita, senpera ekkrio de mia koro. Kaj efektive, vi estis por mi patro, sole patro. Vi ekridis kaj diris al mi:

—Nomu min tiel ĉiam, mia infano, tio ĉi plaĉas al mi.

Poste ni venis en tiun ĉi urbon kaj — pardonu min, patro — mi enamiĝis. Ho, mi longe bataladis, preskaŭ du jarojn, poste cedis, fariĝis kulpa kaj malĉasta.

Kiu estis li? Vi ne divenos. En tiu ĉi punkto mi estas tute trankvila, ĉar ĉirkaŭ mi ĉiam estis dekduo da oficiroj kiujn vi nomis miaj stelaroj.

Patro, ne penu sciiĝi lian nomon, kaj ne malestimu lin. Li faris tion, kion farus ĉiu en lia situacio kaj krom tio, mi estas certa, li amis min per tuta koro.

—Atentu: unufoje ni aranĝis kunvidon sur la insuloj de Skolopoj, la konata de vi insuleto post la muelilo. Estis necese al mi atingi ĝin naĝante, kaj li promesis atendi min inter l' arbetaĵoj kaj poste resti tie ĝis la vesperveno, ke oni lin ne vidu. Apenaŭ ni kunvenis, subite l' arbetaĵoj dismetiĝas kaj



ni vidas Filipon, vian servosoldaton, kiu gardis nin. Mi sentis ke ni estas pereigita kaj ekkriis. Tiam li — mia amiko — diris al mi:

— Naĝu trankvile domen, mia kara, kaj lasu min kun tiu ĉi homo.

Mi fornaĝis sed estis tiel maltrankviligita ke mi estis en danĝero droni. Mi venis domen, atendanta ian teruraĵon.



Post unu horo Filipo renkontinte min en koridoro murmuretis al mi:

— Sinjorino, mi estas preta al vi servi, se vi bezonos transdoni leteron.

Mi ekkomprenis ke li estis subaĉetita de mia amiko.

Mi efektive donadis al li leterojn — ĉiajn miajn leterojn. Li forportis ilin kaj alportis respondojn.

Tio ĉi daŭris ĉirkaŭ du monatojn. Ni konfidis al li tiel same kiel vi.

Kaj jen kio okazis unufoje. Mi alvenis al tiu sama insuleto, tute sola, kaj renkontis tie vian servosoldaton. Li atendis min kaj anoncis, ke li denuncos al vi ĉion kaj donos al vi la leterojn, ŝtelitajn de ni, se mi ne donos min al li.



Ho, mia patro! Min atakis timo, terura, malnobla, malinda timo, kaj precipe antaŭ vi, mia kara kaj bona, kiun mi trompadis, kaj ankaŭ timo pro li, ĉar vi lin mortigus, eble ankaŭ pro mi mem — ĉu mi scias? Mi estis kiel freneza, mi volis resubaĉeti tiun ĉi friponon, kiu ankaŭ amis min — kia malhonoro!

Ni virinoj, estas tiel malfortaj, ke ni perdas la kapon multe pli rapide ol viroj. Kaj poste, unu fojon falinte, oni falas ĉiam pli malsupre. Ĉu mi sciis, kion mi faris? Mi komprenis nur tion, ke unu el vi kaj ankaŭ mi devas morti — kaj mi donis min al tiu ĉi bruto.

Vi vidas, parto, ke mi ne penas senkulpigi min.

Tiam, tiam... tiam okazis la atendeblo. Li min bontigis ree kaj ree, kiam li volis per lia minacado. Li ankaŭ estis mia amanto, tiel same kiel la alia — ĉiun tagon. Ĉu tio ĉi ne estas terura? Ho, kia puno, patro!

Tiam mi diris al mi: estas necese morti. En vivstato mi ne povus konfesi al vi tian krimon; mortinta — mi timas nenion. Mi ne povis ne morti: nenio forlavus de mi la koton. Mi ne povis jam ami kaj esti amata. Al mi ŝajnis, ke mi kotigis ĉiujn, nur donante la manon.

Baldaŭ mi iros min bani kaj ne revenos.

Tiu ĉi letero, difinita al vi, estos donita al mia amanto. Li ricevos ĝin post mia morto kaj, nenion komprenante, donos ĝin al vi, plenumante mian lastan deziron, kaj vi tralegos ĝin, reveninte de la tombejo.

Adiaŭ, patro! Al mi restas nenion diri al vi. Agu kiel vi volas kaj pardonu min."

La regimentestro forviŝis la ŝviton, elirintan sur lia frunto. La trankvileco, kiu distingis lin en tagoj de bataloj, revenis al li.

Li eksonoris. La servanto eniris.

— Venigu Filipon — li diris.

Poste li malfermis la keston de la tablo.

La servosoldato eniris preskaŭ tuj.

Tio ĉi estis altkreska soldato kun flavruĝaj lipharoj, ruza vizaĝo kaj malicaj okuloj.

La regimentestro rigardis rekte en lian vizaĝon.

— Tuj vi diros la nomon de mia edzinamanto.

— Via regimentestra...

Li prenis el la malfermita kesto pistoleton.



— Rapide, vi scias, ke mi ne amas ŝerci.

— Regimentestro, tio ĉi estas... la kapitano Sent-Alber'.

Apenaŭ li eldiris la nomon, flamo ekbrilis antaŭ liaj okuloj, kaj li falis teren, kun kuglo en la frunto.

Trad. A. Kofman.



MONAĤINO.

Skizo de A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko.

el "Lingvo Internacia"



En trankvila monaĥeja tombejo, kiu kuŝis sur bordo de malgranda lago, en unu bela somera tagmezo sidis juna beleta monaĥino. Ŝi profunde enpensiĝis; antaŭ ŝiaj grandaj malgajaj okuloj staras alia lago, tie, en ŝia parenca vilaĝo. Sur tiu lago, en belega suda nokto, ŝi ekaŭdis unu fojon vortojn de amo, donis unuan kison... Kaj multajn tiajn feliĉajn scenojn rigardadis la arĝenta lago kaj la maljunaj revaj salikoj. Rememoras ŝi ankaŭ malgajan tagon de disiĝo, tian teruran tagon, en kiu ŝi diris al li "adiaŭ!" por ĉiam... Ili ambaŭ estis neriĉaj kaj lia patro, por plibonigi siajn financajn aferojn, ordonis al filo edziĝi je riĉega konata fraŭlino. Li ne volis, li kontraŭparolis, petegis, sed nenio helpis kaj eĉ ŝi mem, kaŝante en la koro suferon, admonis lin sekvi la konsilon de l' patro. Kaj li obeis...

Post kelka tempo, kiam ŝia patro mortis, ŝi restis tute sola en la mondo. Vere, ŝi havis malgrandan filinon, sed kun malvarma teruro ŝi pensis, ke, kiam tiu ĉi filino fariĝos grandaĝa, ŝi povas kun malestimo kaj abomeno deturni sin de la patrino. Ne, ne, pli bone, ke la knabino neniam konu sian patrinon, pli bone ŝi supozu, ke ŝi estas orfino. Kaj jen ŝi metis infanon al unu bonkora maljuna vidvino kaj mem foriris tien ĉi, en malgrandan modestan monaĥejon.

Tri jaroj pasis nerimarkite, trankvile, kiel dormo sen sonĝoj... Nur hodiaŭ ŝi kvazaŭ vekiĝis; ia sopiro, ia nekomprenebla ekscito ĉirkaŭkaptis sin kaj kvazaŭ ia nevidebla forto igis ŝin veni tien ĉi, en trankvilan monaĥejan tombejon... Kaj jen ŝi sidas, tiel profunde enpensiĝinte, ke eĉ ne rimarkas, ke la tagmeza julia suno haltiĝis super ŝia kapo kaj surverŝas ŝin per sia blindiganta lumo kaj neelportebla varmego...



— Bonan tagon, fratino! — ekaŭdis ŝi subite junan viran voĉon.

La monaĥino ektremis kaj timeme ekrigardis.

Kio estas ĝi? Sonĝo? Fantomo? aŭ efektive antaŭ ŝiaj okuloj staras tiu sama homo, pri kiu ŝi ĵus pensis?... Jes, efektive li! Tiu sama altkreska figuro, tiu sama nebela, sed bona simpatia vizaĝo, oraj bukloj de haroj, saĝa alta frunto, bonaj brunaj okuloj... Jes, jes, efektive li! Kun teruro, per larĝe malfermitaj okuloj rigardas lin la monaĥino kaj en ŝia kapo turmente kuradas la penso: "ĉu li ekkonis min?"

— Vi permesas al mi sidiĝi? — ĝentile demandis la sinjoro.

La monaĥino jesigis silente, ne havante forton rifuzi, nek foriri, kaj nur en tiu ĉi momento ŝi rimarkis, ke li tenis la maneton de malgranda bela knabino, kiu tre volonte sidiĝis sur la genuojn de la monaĥino.

Iom post iom komenciĝis interparolo kaj li nevole rakontis al tiu ĉi ĉarma simpatia monaĥino pri lia malĝoja vivo. Ne, li ne estis feliĉa kun sia riĉega edzino, kiel supozis ŝi tiam, kiam ŝi admonis lin edziĝi pro mono, kontraŭe, li estis multe malfeliĉa. Lia sola konsolo estis tiu ĉi knabino, filino de lia amato Anno, kiu sciigis lin pri la naskiĝo de l' infano kaj pri ĝia adreso, sed ŝi mem perdiĝis sen postsignoj.

La monaĥino ree ektremis kaj paliĝis. Sekve tiu ĉi ĉarma knabineto, kiu tiel dolĉe dormetas nun sur ŝiaj brakoj, estas ŝia filino? Ho, kia turmento — teni sian infanon kaj ne havi rajton diri: "mi estas via patrino". Kia turmento — rigardi amatan homon, kiu iam estis tia proksima, amanta, kaj nun eĉ ne rekonis ŝin, kaj ne povi diri al li: "mi estas via edzino".

Kaj li daŭrigas sian malgajan rakonton. Lia edzino estis malbona, senkora, kaprica virino, aroganta, fiera. Ŝi povis okupadi sin nur per ornamoj, baloj, vizitoj. Al la edzo ŝi rilatis kiel al necesa apartenaĵo en ŝia riĉa luksa domo, li ne estis por ŝi edzo, ne estis eĉ simple homo. Kaj tia terura por li vivo daŭris dum kvar jaroj, post kio la edzino malsaniĝis kaj mortis.

— Kaj de tiu momento en mia kapo estas nur unu penso — trovi mian amatan Anjon, patrinon de mia kara filino. Mi serĉadis jam, sed vane. Ĉu mi trovos ŝin, ĉu ekvidos? — tiel finis li sian rakonton.

La monaĥino rapide sin levis... Ankoraŭ unu momento, kaj ŝi ne eltenus, ekkrius al li: "ja mi estas via Anjo, kiun vi tiel pasie serĉas!"

— Mi devas iri al nia abatino, pardonu, — diris ŝi, penante esti trankvila: — jam estas malfrue.

— Efektive? Ni ankaŭ devas veturi stacion, ja ni venis vian monaĥejon veturante preter ĝi. Nun mi ree veturas serĉadi mian Anjon.



— Pli bone ne serĉu: eble renkonto kun ŝi alportus al vi ambaŭ ankoraŭ pli grandan malĝojon, —mallaŭte diris la monaĥino, — Adiaŭ, feliĉan vojon! Atendu, infano, prenu jen tiun ĉi rozarion, portadu ĝin ĉiam sur la kolo, ne perdu. Nu iru, iru, adiaŭ!

Ili foriris... Kun malespero en animo rigardas post ilin la pala monaĥino: en la dua fojo ŝi perdas sian feliĉon, sed tiam ŝi memvole forpuŝis ĝin, kaj nun la severa devo postulas de ŝi tian agon.

— Adiaŭ, karaj, adiaŭ!.. — murmuras ŝi per palaj lipoj, irante al ŝia modesta ĉambreto.

— "Kiel li povis ne rekoni min?" — pensas ŝi, kuŝante sur lito. — "Pli ol unu horon ni sidis kune, eĉ mia vizaĝo ekŝajnis al li iom konata, sed li ne konjektis... Tamen li ankoraŭ amas min, serĉas. Kion li dirus, se li ekscius ke lia Anno estas monaĥino? Malfacile estus al li... Malfeliĉa, kia malgaja estis lia vivo... mi estas kulpa... mi forlasis lin, forlasis malgrandetan filinon... Ha, sed ankoraŭ ne estas malfrue, eble ili ankoraŭ ne forveturis... Kuri al ili, diri al li: "mi estas via Anjo" ekkapti kaj alpremi al la brusto sian filinon.. Forveturi kun ili malproksimen... malproksimen kaj tie ekvivi per trankvila, feliĉa vivo... Jes, kuri, pli rapide... pli rapide..."

Ŝi rapide eksaltis de lito kaj alkuris al la pordo, sed en tiu ĉi momento ŝia rigardo falis sur ŝian monaĥinan veston, kies severa vido memorigis al ŝi pri tiuj promesoj kaj rifuzoj, kiujn ŝi donis antaŭ la altaro, memorigis, ke ŝi estas nelibera, ke la monda feliĉo ne ekzistas por ŝi, ĉar ŝi mem, laŭ la propra volo, rifuzis ĝin.



— Ho, Dio, pardonu min! — fleksigis ŝi genuojn antaŭ Krucumo, pendanta super la lito. — Pardonu min, Dio! Donu al mi forton batali kun tentoj, helpu al mi venki mian pekan mondan senton!

Pasie fluas la vortoj de l' preĝo, malalte kliniĝis la peka kapo, la varmaj larmoj kovras okulojn kaj gutas sur la preĝeme kunmetitajn manojn... Kaj la koro doloras kaj celas al tiu malluma pina arbaro, kie nun rapidaj ĉevaloj forportas de ŝi por eterne du plej karajn personojn. Kaj en la unua fojo ekkomprenis la monaĥino, kian teruran eraron ŝi faris, foririnte monaĥejon sen vera religiema sento, sole tial, ke ŝi ne sciis kien sin meti en la mondo.

Sur la monaĥeja turo oni eksonoris al la preĝo.

Malrapide leviĝis de genuoj la monaĥino, sopire ĉirkaŭrigardis la ĉambreton kaj subite kun malespero ekrompis siajn manojn. La tutan vivon, longan, longan vivon devas ŝi pasigi en tiu ĉi malgrandeta monaĥa ĉambreto, la tutan vivon, ĝis tia tempo, kiam ĝin anstataŭigos alia, ankoraŭ pli malvasta kaj la monaĥejaj sonoriloj eksonoros por ŝi "eternan memoron"...

SIRINGO.

De E. Ĉirikov.

El "Verda Stelo"



Ah, kiel bonege odoras siringo en printempa frumateno, kiam la suno ankoraŭ ne forpelis la noktan malvarmeton kaj la roson ankoraŭ ne eltrinkis de ĝiaj floroj kaj folioj!

Iam, estante ankoraŭ juna, mi revenis de eksterurba promenado kun aminda, bela knabino. Simile al gajaj birdoj ni estis eliĝintaj el la boato kaj dividintaj nin po du kaj disirintaj tra la urbo por akompani unu la alian.

La suno nun estis leviĝanta super la urbo, ekbruligante orajn fajrojn sur la preĝejaj kupoloj, krucoj kaj en la fenestroj de altaj domoj. La stratoj ankoraŭ estis malvarmaj kaj senbruaj, kurtenoj kovris la fenestrojn de la domoj. Tie, post la fenestroj, ĉiuj ankoraŭ dormis. Niaj piedfrapoj sone aŭdiĝis tra la silento de l' frumateno. Ah, kiel bonege odoras siringo en printempa frumateno, kiam vi estas dudekjara junulo kaj kiam apud vi, ĝoje ektremetante dum ĉiu renkontiĝo de la rigardoj kaj ridetoj, iras ĉarma, aminda knabino!

—Deŝiru al mi branĉon de siringo!

—Blankan?

—Jes... Ne, violan!

Ni haltis. La barilo estis alta kaj glata, kaj najloj estis batitaj en ĝin. La provo fleksi siringarbuston finiĝis per bela malsukceso: pluvsimile superŝutis nin la siringo per aromaj gutoj da roso.

—Almenaŭ unu branĉon!

Maltimeme mi ekrampis la barilon por ŝteleti siringon por la bela, amata knabino. Rusta najlo vundis mian manon, sed mi ne rimarkis tion, ĉar nenian doloron mi eksentis. La kapo turniĝis de dolĉa bonodoro, siringbranĉoj kraketis sub mia mano, kaj de ili saltadis rekte en la vizaĝon gutoj da roso. Ĝoje ridis la knabino, sur kiun mi deskuis la aroman pluvon de la matenroso.

Mi estis preta rompi por ŝi ĉiujn florantajn siringojn en la mondo, ĉiujn blankajn kaj ĉiujn violajn.

—Sufiĉas!



Mi heroe desaltis de la barilo. Ĝojaj, gajaj, amantaj okuloj brilis silentan dankemon.

—Tio estas por vi... je memoro...

Ŝi eksilentis kaj, ruĝiĝante, kaŝis la vizaĝon en la siringon.

—Je memoro... pri kio?

—Pri tiu ĉi promeno, pri tiu ĉi mateno... pri la siringo... pri tio, kiel bonege ĝi aromas frumatene..., diris la knabino kaj proksimigis al mia vizaĝo la malseketan siringbukedon.

—Kio okazis al via mano? Sango!?

Nur nun mi vidis la sangantan vundon sur mia mano.

—Ĉu ĝi doloras?

—Ne... tio ankaŭ estos memoraĵo.

La knabino donis al mi malgrandan silkan tuketon, mi ĉirkaŭis per ĝi la manon kaj iris, simile al heroo, ricevinta vundon dum batalo je honoro de amata knabino. Kiam ni haltis por adiaŭi, la knabino deprenis la tuketon.


—Donacu ĝin al mi!

—Ne, mi prenos ĝin... kiel memoraĵon!

Mi donis ĝin, ja la tuko estis ruĝigita de mia sango.

Sed jen—abomena prozo de l' vivo... Ĝi ĉiam sin enmiksas kaj deŝiras la flugilojn de ni en la momento, kiam ni sentas nin pretaj suprenflugi al la blua alteco de malproksimaj ĉieloj.

Kun sopiro kaj feliĉo mi tenis la delikatan, tremetantan maneton de l' knabino kaj ne ellasis ĝin, dezirante malproksimigi la disiĝon ankoraŭ je kelkaj sekundoj. Mi rigardis la ardantan knabinan vizaĝon, duone kaŝitan de la siringa bukedo, kaj ebriiĝis ne sciante, ĉu de la bonodoro de l' siringo aŭ de la ardantaj vangoj aŭ hontemaj rigardoj... Eliris kun balailo dormema, mallaborema kortisto, ekgratis la nukon kaj diris:



—Malbone, sinjoro, malbone! Vi disŝiris vian pantalonon!

Mi turnis min. La knabino eltiris sian maneton kaj forkuris, sone ridante, en la korton. Forkuris... kial?

—Kion vi diris, kortisto? Kiel vi rajtis?



La kortisto klarigis al mi, kio okazis. Mi rigardis mian vestaĵon kaj ruĝiĝis de honto, indigno, ofendo. Kvazaŭ oni surkraĉis mian branĉon da blanka siringo. Malrapide mi iris al mia hejmo. Sonoris sonorilegoj al frua diservo, ruliĝis sur la pavimo ankoraŭ maloftaj veturiloj, krakis malfermataj pordoj. La vivo komenciĝis.

Ĝis nun mi memoras la printempan fruan matenon, la barilon kun najloj, la siringarbuston kun dependantaj branĉoj, la aromajn roskaskadojn, la honteman knabinvizaĝeton elrigardantan el post la bukedo de blankaj kaj violaj siringoj.

Kaj ĝis nun mi aŭdas la maldelikatan voĉon de la kortisto, kiu fortimigis la sorĉajn songojn kaj la bonodoron de l' printempa mateno.

Ah, kiel bonege aromas siringo en printempa frumateno, kiam la suno ankoraŭ ne eltrinkis ĝian roson, kiam vi estas nur dudekjara kaj kiam apud vi estas ĉarma amata knabino!

El rusa lingvo tradukis I. Dratwer.



LA UNUA AMIKO.

LEGENDO DE G. DE LA LANDELLE (El "L'Obole des Conteurs")
EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Kiam Adamo kaj Evo estis pelataj el la surtera paradizo, ĉiuj bestoj disiĝis tien kaj tien ĉi.

La serpento glitis sub la morusdornojn kaj malaperis.

La ŝafoviroj, la ŝafpatrinoj, la cervino foriĝis kun timego.

La sovaĝa bovoviro, kvazaŭ antaŭsentante la jugon, foriris blekegante.

La ĉevalo, pli timema, ekkuris rapide.

La leono returniĝis por montri obstineeon al la homo per la rigardo.

La tigro, la lupo, ĉiuj sovaĝaj bestoj tuj ekhaltis, grincigis la dentojn, elpuŝis kriojn pro malamo kaj poste sin ĵetegis sur aliajn rabaĵojn.

Jam la aglo kaj la vulturo ekatakis la kolombojn.

Sangero falanta el la nuboj miksiĝis kun la larmoj de Evo.

Adamo tiam diris ĉagrenite:

"Hieraŭ ĉi tiuj bestoj estis submetitaj al mi kaj amis min; nuntempe unuj foriras de l' homo kun timego, aliaj kuraĝas lin ataki. Ĉu do ĉiuj estaĵoj el la kreaĵaro estas niaj malamikoj?"

La homo paroladis ankoraŭ, kiam li eksentis lekita sian manon kaj ekvidis la hundon je siaj piedoj.

La bedaŭrinda besto estis lin sekvinta paŝon post paŝo; ĝi ŝajnis partopreni la dolorojn de sia estro: ĝiaj okuloj estis malsekaj, kvazaŭ plorus ankaŭ ĝi.

Adamo pasigis la manon sur ĝia kapo; Evo forviŝis ĝiajn larmojn, por ĝin karesi.

La hundo pruvis sian subecon kaj sian dankemon. Ĝi leviĝis, eksaltis, bojis pro ĝojo, ruliĝis ankoraŭ, je la piedoj de Adamo kaj Evo; fine ĝi fiksis sur ilin sian rigardon malkaŝeman kaj fidelan.

Adamo tiam diris kun voĉo kormovita:

"La Eternulo ne ĉion forprenis de ni, ĉar li lasas al ni amikon."


Tiel de post la unua tago la hundo estis nomata amiko de la homo.

Kaino kaj Abelo estis jam junuloj.

Tiam en la ombro de densfolia arbo Adamo ripozis post la matenaj laboroj; Evo, sidante apud li, ŝpinis silente; la hundo kuŝis je iliaj piedoj.

Subite la besto ekrektiĝas, entrinketas la aeron kaj elpuŝas plendan ploregadon.

Adamo vekite ektremas; neniam lia fidela hundo ploregis tiamaniere:



Ne tiel ĝi bojas je la alproksimiĝo de l'sovaĝaj bestoj; ne tiel ĝi bojas gardante la brutarojn, eĉ ne persekutante la ĉasaĵon de la arbaro.


La hundo ĝemas levante la kapon ĉielen; ĝiaj ploregoj nekonataj rigidigas la korojn de Adamo kaj Evo.

Ĝi estas turninta sur ilin malĝojajn rigardojn, ĝi lekas iliajn piedojn, ĝi flaras la teron, ĝi serĉas postsignon.

Adamo kaj Evo ĝin sekvas kun timego.

La hundo, ilin kondukante, ĝemadas konstante.

Ĝi ilin kondukas tiel ĝis tiu loko, kie kuŝas la sanganta kadavro de Abelo; ĝiaj funebraj ploregoj daŭradas, dum ke Adamo kaj Evo eksingultas kvazaŭ korŝirante.



La kampo de l' morto estis dezerta, la brutaroj forkurintaj; ne unu besto restis ĉe la senanimigita korpo de la juna paŝtisto.

Nur la serpento glitis sub la morusdornojn kaj aŭdigis sian akran sibladon.

Malproksime en la mallumaj nuboj la voĉo de la Eternulo malbenis Kainon, la mortiginton de sia frato.

Adamo tiam diris ĉagrenite:

"Ni havis du filojn, du filojn kiujn ni amis; sed ĉi tiu estas mortinta, kaj la alia, malbenita de Dio, ne plu ekzistas por ni!"

La hundo, ĉesante ploregi, timeme lekis la manojn de Adamo kaj Evo.

Kiam la tero estis rekovrinta la restaĵojn de Abelo, Adamo kaj Evo komencis malrapide reiri



al sia loĝejo; la hundo ilin sekvis paŝon post paŝo; li partoprenis ilian doloron; ĝiaj okuloj estis malsekaj, kvazaŭ plorus ankaŭ ĝi.

Adamo haltis sur la sojlo kaj diris kun voĉo kormovita:

"La Eternulo ne ĉion forprenis de ni, ĉar li lasas al ni amikon."

Kiam la virino estis naskinta trian filon, Adamo donis al li la nomon Seto kaj, tenante en siaj brakoj la infanon ĵus estigitan, faris gloradon al la Eternulo.

Ĝojaj eksplodoj komenciĝis en la loĝejo de l' unua homo.

Lia fidela hundo estis maljuna. Ĝi ne plu povis partopreni la ĉasadon, eĉ ne gardi la brutarojn; ĝiaj membroj estis perdintaj siajn fortojn.

Tamen ĝi rektigis la kapon kaj bojis malakre; ĝi partoprenis la feliĉon de sia estro; ĝiaj okuloj estis malsekaj, kvazaŭ plorus ankaŭ ĝi.

Ĝi faris lastan penon, treniĝis al Adamo kaj lekis liajn piedojn.

Adamo pasigis la manon sur ĝia kapo; Evo, por ĝin karesi, forvisis ĝiajn larmojn proĝojajn.



La hundo bojis ankoraŭ, volis eksalti, sed refalis senviva.

Adamo tiam diris kun voĉo kormovita:

"La Eternulo ĉiam kompatis nin; ĝis la horo de l' konsolo li al ni lasis nian amikon."

Tiel mortis la unua amiko de la homo.

El franca tradukis Arnold Starke.



LA PETOLEMA VETURIGISTO.

ORIGINALE VERKITA DE GEORGES AVRIL
EL LA GAZETO "ESPERANTO"



Hela, radia, brulvarma la somera suno rostis la polvokovritajn herbojn randantajn la vojon. Sub la ŝirmtuko de la malnova duondifektita omnibuso, same kiel en forno ni bakiĝis.

Gaje la veturigisto alparolis iun ajn, kiu marŝis, rajdis, veturis aŭ staris sur la vojo. Al la junulinoj li ridetis kaj okulumadis; al la junuloj ŝercon kriis; al la maljunuloj diris "bonan tagon, avo," "avino" laŭokaze; al la geknaboj vipbaton tromphatis; al ĉiuj ridis, ridetis aŭ ridegis.

Kiam sur la vojo neniun li vidis, tiam li sin turnis al la veturigatoj, kaj laŭvice kun ĉiu el ili babilis. Familiare kaj ruze li demandis tiun ĉi pri la celo de lia vojaĝo, tiun pri lia metio aŭ profesio, kaj la knabego estis tiel simpatia ke ĉiam oni lin respondis. Tiamaniere li estis sciigita: la pala fraŭlino iris la montlandon por resaniĝi; la ruĝa apopleksiema viro, kies dika korpo du sidlokojn okupis, veturis vilaĝon por mendi fojnon, pajlon, ĉar li estis "armea liveranto"; mi ankaŭ estis devigita klarigi la kaŭzon de mia veturado, kaj la paroĥestro, kiu de tempo al tempo ekdormetis, konigis ke li estis baptonta infaneton en paroĥo, kies pastro subite malsaniĝis.

Unu sola el la vojaĝantoj, nigre vestita kaj portanta volumenan plenegan paperujegon, ankoraŭ ne diris eĉ unu vorton. La interparoladon li ne aŭskultis kaj la pejzaĝon li admiris—aŭ ŝajnigis admiri. Fine pro scivolemego lin pikanta, la veturigisto eksplodis:

—Kaj vi, Sinjoro, kion vi faras? Kien vi iras? Kial vi veturas?

La silenta veturigato turnis la kapon al la trudiĝemulo kaj malrapide ekparolis:

—Amiko, mi estas tiu, kiun vi ne konas; mi veturas tien, kie vi ne scias; kaj mi faros tion, kion vi ne pensas.

Tuj poste li silentis. Silentis same la scivolemulo, sed tre baldaŭ li sin klinis ĝis mia orelo. Tiam, mallaŭte sed sufiĉe laŭte por ke ĉiuj aŭdu:

—Mi tre bone scias, li diris; tiu homaĉo estas leĝa persekutisto, kiu pretiĝas por juĝe preni la ĉifonaĵojn de iu malriĉulo...

La persekutisto—ĉar efektive la sekretema vojaĝanto estas persekutisto—aŭdante tiujn malagrablajn parolojn, tute ne koleris. Male, li afable, iom moke, ridetis kaj tre ĝentile sciigis:

—Ne, amiko mia, ne! Mi ne estas persekutisto: dank' al Dio mi nur estas la ekzekutisto.

Ĝis la fino de la veturado ne petolis plu la petolema veturigisto.

Mi devas aldoni ke tiun rakonteton iam rakontis al mi la plej kredinda el ĉiuj Marsejanoj.

LA FONTO DE JUNECO

Originala Noveleto

Di D-ro Wm S. Benson



Dum la meznokta kvieto, homo, vestita en vasta, nigra, supervesto, ŝteliĝante marŝadis tra la strato Roener en Hamburg. Laŭ liaj movoj estis evidente, ke li forte penadis kaŝi sian identecon al okazaj preterirantoj, ĉar post ĉiuj kelkaj paŝoj li turnis sian kapon malantaŭen, kvazaŭ sin certigante, ke neniu lin postiras. Subite li haltis antaŭ izolita, duetaĝa dometo, kaj ĵetante ĉirkaŭrigardon en ĉiujn direktojn, rapide surgrimpis la duan etaĝon, kie li haltis momenton kaj atente subaŭskultis antaŭ malhele lumigita fenestro.



En la sama tempo, Salva, la juna edzino de Anton Hoefner, estis dormanta kun sia novnaskita infaneto en sia riĉe meblita buduaro. Ŝi tute ne suspektis, ke ŝia edzo, kiu ĵus forkuris el la privata frenezulejo, kie li estis metita pro siaj kelkfojaj provoj ŝin mortigi dum paroksismoj de ĵaluzo, nun troviĝas aliflanke de la fenestro, farante preparojn por eniro.



La fenestro malrapide malfermiĝis kaj la kapo de la nokta vizitanto aperis. Li paŭzis momenton, tiam, kiel kato trarampis la fenestron. Ĉirkaŭrigardante la ĉambron, li senbrue kaj sur la pintoj de siaj piedfingroj alproksimiĝis al la pordo. Ŝlosante ĝin de interne, li sin direktis al la tualeta tablo lumigita per elektra lampeto. Post mallonga esploro inter la objektoj sur la tablo, liaj okuloj altiriĝis al malfermita koverto adresita al



Salva Hoefner. Per tremantaj manoj li eltiris la leteron, kaj dum li legis, lia vizaĝo fariĝis kvazaŭ demona. Liaj okuloj pligrandiĝis kaj pleniĝis per sango, kaj liaj dentoj ekgrincis en lia buŝo. Subite li forte ĵetis la leteron sur la tablon, kaj kun kurbigitaj fingroj de siaj tremantaj manoj alproksimiĝis al la lito, kie Salva estis dormanta. Freneza fajro de pasio aperis en liaj penetremaj okuloj, kiam li rigardis la neĝblankan malkovritan sinon




de sia edzino. Liaj fingroj forte kurbiĝis kaj malrapide alproksimiĝis al la kolo de la malfeliĉulino. Jen liaj fingroj jam estis pretaj por enfosi sin en ŝia gorĝo, kiam lia rigardego subite fiksiĝis al la infaneto dormanta sur ŝia brako. Liaj fingroj malrigidiĝis, kaj kun miro li rigardadis la infaneton kvazaŭ ne kredante siajn proprajn okulojn. Tuj do lia vizaĝo kovriĝis per diabla rido. Ŝajnis, ke nova ideo sin ellaboris en lia kapo. Li zorgeme malkovris la infaneton, kaj levante ĝin de la brako de Salva, metis ĝin sub sian vastan superveston.



En tiu momento Salva vekiĝis. Ŝiaj okuloj sin vaste malfermis kaj senmove rigardis kvazaŭ paralizitaj. Subite do ŝia vizaĝo fariĝis mortpala rekonante la entrudulon. Terurigite kaj per sufokita voĉo ŝi ekkriis:—"Antono"!...

La entrudulo rapidege metis sian manon sur ŝian buŝon. Lia vizaĝo monstre distordiĝis, kaj kun okuloj kvazaŭ ŝprucantaj fajrerojn li elsiblis tra siaj grineantaj dentoj:—

"Ne ekkriu, aŭ mi premsufokos vian bastardon!"



Dirante tion li faris movon kvazaŭ pretà efektivigi sian minacon, kaj per malrapidaj paŝoj sin direktis al la malfermita fenestro.

Salva, panikfrapite, etendis siajn brakojn por sia infaneto, kaj tremante per sia tuta korpo petegis, preskaŭ sufokite de la larmoj en sia gorĝo.

"Ne, ne!.. Antono!.. Mia infaneto!.. Donu al



mi!... Ho ve!.. Antono!.. Dio mia!.. Kion vi faras!.. Tio estas via infano!.. Mi ĵuras!.. Mi estis fidela al vi!.. Ho, Dio!.. Antono!.. Antono!.."



Ŝi elsaltis el la lito kaj sin ĵetis sur siajn genuojn, daŭrigante petegi. Ŝi rampis post la foriranta Antono, kaj, kiam ŝi ekvidis la teruregan demonan grimacon sur lia vizaĝo dum li tragrimpis la fenestron, ŝi jam ne povis sin kontroli pli longe, kaj ekkriante, falis sur la plankon senkonscia.



La ekkrio vekis la flegistinon dormantan en la apuda ĉambro, kaj ŝi en teruro rapidegis al la pordo de la buduaro, sed trovante ĝin ŝlosita, ŝi vokis por helpo. Baldaŭ la servantoj aperis kaj perforte malfermis la pordon.

Ĉiuj rapidegis al la svenanta mastrino por ŝin rekonsciigi. Kiam Salva malfermis la okulojn, ŝi tuj ekkriis:—


"La infano!.. Mia infaneto!.."

Ĉiuj ekrigardis la liton kaj la malfermitan fenestron. Unu el la servantoj tuj trasaltis la fenestron dum la aliaj penis rekonsciigi la denove svenantan mastrinon.




Tuj poste la policо estis sciigita pri la okazintaĵo, sed post daŭra serĉado kaj esplorado nenia postsigno estis trovita, nek de la frenezulo, nek de la infano.

Post kelkaj monatoj Salva vendis ĉiujn siajn proprajojn kaj decidis forveturi Amerikon por serĉi sian infaneton.



En la tago, kiam la vaporŝipo "Roland" estis forironta, juna viro, malriĉe vestita, kondukanta kvinjaran knabeton ĉe la mano, ŝteliĝante eniris kajuton de la unua klaso. Li maltrankvile ĉirkaŭrigardis la ĉambreton por momento, tiam premante la knabeton al sia koro, diris al li, dum du larmoj ruliĝis sur liaj vangoj.

"Edvino, estu bona knabo kaj ne ploru. Ni nun iras Amerikon, sed mi estas tre malriĉa. Vi devas subgrimpi la liton kaj esti kvieta dum la ŝipo foriras, alie la soldatoj vin ĵetos en la maron. Kiam ni alvenos Amerikon, mi prenos vin kun mi. Iru, mia karulo!"



La malriĉulo forte kisis sian knabeton kaj helpis lin subgrimpi. Kiam la knabo estis bone kaŝita,



la malriĉulo rapide eliris nerimarkite.

La vaporŝipo jam estis preta foriri. La pasaĝeroj rapidigataj de la atendantoj adiaŭis kun siaj geparencoj kaj geamikoj. Aliaj estis kondukataj de atendantoj al siaj kajutoj. Inter tiuj ankaŭ estis Salva.



En la sama vespero, kiam Salva, en sia kajuto, estis pretiĝanta enlitiĝi, ŝi estis surprizita de stranga sono, kvazaŭ ĝemo de infano. Mirigite ŝi turnis sian kapon al la direkto de kie la sono venis. Ŝi preskaŭ svenis de teruro, kiam ŝi ekvidis maneton elpuŝitan el sub la lito. Baldaŭ do ŝi kuraĝiĝis kaj alproksimiĝante al la lito, kliniĝis por rigardi suben. Al sia miro ŝi ekvidis dormantan knabon.




Ŝi tuj vekis lin kaj ordonis, ke li elrampu el sub la lito. La knabeto tuj obeis, kaj frotante la okulojn per siaj manoj ekploris. Salva altiris lin al si, kaj al ŝiaj demandoj pri la kaŭzo, ke li sin trovas sub la lito, kaj kiu li estas, la knabeto plorante respondis, ke li estas Edvino, kaj ke lia patro igis lin subrampi la liton. Ekvidante karteton pinglefiksitan al la disŝirita bluzo de la knabo, ŝi ĝin disigis, kaj legis:

"Bonvolu kompati tiun ĉi orfeton, kiu ĵus perdis sian patrinon.


Malriĉa kaj malfeliĉa patro,
Paul Gerber."

Salva, kortuŝite, ĉirkaŭprenis la knabeton, kaj elviŝante la larmojn el liaj okuloj, donis al li manĝaĵon, kaj tiam endormigis lin en sia lito.

Dum la nokto, kiam la vaporŝipo alvenis New Yorkon, Paul Gerber, la patro de la knabeto Edvino, eliris el sia kaŝejo, kie li sin trovis dum la tuta vojaĝo, kaj nerimarkite de iu, desaltis el sur la



ŝipo, kaj sukcese tranaĝis ĝis la bordo. En la mateno, li iris al la haveno, kie li esperis renkonti sian fileton, sed ho ve, li eltrovis, ke la sinjorino, kiu havis la knabeton, jam forlasis la ŝipon.



Dudek jaroj trapasis depost la priskribitaj okazintaĵoj. Antono Hoefner, nun konata sub la nomo Doktoro Roden, kaj profesoro de patologio en la Thorndona Medicina Kolegio, estis tre okupata en sia hejma laboratorio. Li staris apud longa labortablo, antaŭ brulanta Bunzena varmigilo, sur kiu sin trovis ia bolanta fluidaĵo en kupra ujo. Okaze li engutis en la ujon ian malhelan fluidaĵon el vitra gutigilo, kiun li tenis en unu mano, dum li vigle kirlis la preparaĵon per vitra bastoneto tenata en la dua.

La ĉirkaŭaĵo de la ĉambro estis iom stranga kaj mistera, precipe la diversaj aparatoj, instrumentoj kaj ujoj troviĝintaj amase ĉie. La impreso de mistero estis pligrandigita per la ĉeesto de Doktoro Roden mem.

Patriarko ĉirkaŭ sepdekjara vestita en blanka vasta robo kaj kun ruĝaj kaŭĉukaj gantoj sur la manoj. La longaj baroj de lia kapo kaj barbo estis neĝblankaj, kaj el sub liaj longaj densaj brovoj du okuloj, ĉiam movemaj, maltrankvile kaj kun iom fanatika aŭ mania rigardego observadis tra peze enkadrigitaj okulvitroj la enhavaĵon de la kupra ujo.




Subite li ektremis kvazaŭ vekite el profunda dormo. Li turnis sian kapon al la muro, kie pendis kukolhorloĝo. Estis la oka horo matene. La kukolo montris sian kapeton tra la pordeto ekkriante, kuku, kuku. Ĉe la oka fojo la pordeto sin fermis. Doktoro Roden rapidege ekkirlis la preparaĵon en la ujo, kaj ekzamenante la ekstremon de la vitra bastoneto, murmuris ion en aprobo dum lia vizaĝo esprimis ĝuegon.

Deprenante la ujon de sur la varmigilo, li enverŝis ĝian enhavaĵon en filtraparaton, kaj lasis la miksaĵon filtriĝi.

Li tiam deprenis la kaŭĉukajn gantojn kaj la blankan robon, kaj rapidegis al la apuda ĉambro, kie li plenigis pleton per diversaj manĝaĵoj, kaj returniĝante al la laboratorio, eltiris tirkeston el granda tirkestaro, el kiu li elprenis boteleton markitan "Glandekstrakto No. 14". Skuante la boteleton kelkfoje, li ĝin malŝtopis kaj zorgeme enigis



dek gutojn en la glason da lakto staranta sur la pleto. Remetante la boteleton en sian lokon kaj fermante la tirkeston, li alproksimiĝis al la muro, kie li deprenis kupran vazon el sur la murbreto. En tiu sama momento sekreta pordo en la muro malfermiĝis, kaj li eniris portante la pleton en siaj




manoj. Trairante longan subteran koridoron, lumigatan per elektraj lampoj, li fine haltis, kaj metante sian orelon al la muro, aŭskultadis.

En brilege lumigata ĉambro, kiu aperis eĉ pli stranga kaj mistera ol la laboratorio, junulino, ĉirkaŭ dudekjara, tute senvesta kaj nudpieda staris antaŭ ekzercaparato kaj ekzercadis sian korpon. Ŝiaj longaj densaj haroj, lukse disĵetitaj super sia korpo, etendis kaj preskaŭ tuŝis la plankon. La haŭto de ŝia korpo estis tiel klara kaj blanka, kiel ĵus falinta neĝo, kaj la bluaj okuloj elrigardis el ŝia bela ronda vizaĝo kun tia naiveco, kvazaŭ ili apartenus al kvinjara knabino.


La ĉambro ne havis iajn fenestrojn, nek videblajn pordojn. La lumo venis el kvin grandegaj elektraj lampoj pendantaj el la plafono, po unu en ĉiu angulo, kaj unu, la plej granda, en la mezo. La meblaro de la ĉambro estis diversa, kaj estis aranĝita en maniero, ke la ĉambro dividiĝis en kelkajn partojn, kvankam ne dividita per dividiloj. Tie estis dormoĉambro, manĝoĉambro, salono, kaj eĉ parto prezentanta banĉambron kaj gimnastikejon.



La junulino subite ĵetis la tenilojn de la ekzercaparato, kaj turnante la kapon direktis sian rigardon al parto de la muro dum ŝia vizaĝo ekbrilis per gaja infana rideto. En tiu momento sekreta pordo sin glitiĝis al unu flanko, kaj Doktoro Roden aperis portanta la pleton da manĝaĵoj. Li ĵetis rapidan penetreman rigardon al la junulino, kaj tuj eniris metante la pleton sur la tablon.




La junulino ĝoje sin ĵetis al la manĝaĵo, tute ignorante la doktoron aŭ hontiĝante pri sia nudeco. Dum ŝi avide manĝis, la doktoro forprenis alian pleton, verŝajne lasitan la antaŭan tagon kun manĝaĵo, kaj sen vorto eliris el la ĉambro. La pordo tuj reglitiĝis, ne lasante eĉ signon de pordo.



Kiam la doktoro reiris la laboratorion, li tuj remetis la kupran vazon al ĝia loko sur la murbreton, kaj la pordo fermiĝis. Li tiam alproksimiĝis al la labortablo kaj kliniĝante puŝis butonon sur la planko. Alia pordo sin leviĝis el la planko. La vizaĝo de la doktoro kovriĝis per diabla rideto, kiam li ĝoje ekkriis:—

"Bonan matenon, mia kara doktoro, kiel vi fartas ĉi tiun matenon?"

Tra la malfermaĵo estis vidata kelo, malhele lumigata per elektra lampeto. En la mezo de la kelo, apud malgranda tablo, sidis viro, ŝajne en profunda meditado. De la longaj haroj de liaj kapo kaj



barbo estis evidente, ke la malfeliĉulo estis malliberigita en la kelo longan tempon. Ekaŭdante la matensaluton de Doktoro Roden, la malliberulo levis la kapon kaj respondis:—



"Mi ankoraŭ estas viva, malbenita maniulo, kaj esperas vivi sufiĉe longe por vidi vin ŝlosita en kaĝo kune kun aliaj sovaĝaj bestoj."

Doktoro Roden mallevis kruĉon da akvo, kaj ridante diris:—


"Nu, mia kara doktoro, vi ja estas malprava, ĉar post kelkaj tagoj la nomo Roden trasonoros la tutan mondon. Junuloj, maljunuloj, eĉ infanoj benos la nomon de la eminenta profesoro, kiu eltrovis la plej grandan eltrovaĵon por la homaro."

La homo en la kelo leviĝis kaj etendante siajn brakojn, abomene elkriis:—

"Jes, la nomo de la plej furioza kaj plej kruela besto, kiu iam vivis sur ĉi tiu globo."

"Nu, doktoro", diris Doktoro Roden, "ĉar vi estas tiel kompleza, mi punos vin. Vi restos sen manĝo kaj sen lumo la tutan tagon." Dirante tion, li puŝis butonon ĉe la flanko de la malfermaĵo, kaj la lumo tuj estingiĝis. Tuŝante la duan butonon, la pordo malleviĝis kaj enŝlosis la malfeliĉulon en lia tombo.

*** *** ***



Dum tiu sama mateno, sed en alia domo, ni trovas ĉe la manĝotablo niajn jam konatajn Salvan kaj Edvinon. Salva ege maljuniĝis dum la pasintaj dudek jaroj, kaj la kvinjara knabeto Edvino, kiun Salva trovis sub la lito dum sia vojaĝo Amerikon, kaj kiun ŝi adoptis, elkreskis kaj fariĝis bela, forta dudekkvinjara junulo.

Fininte la matenmanĝon, Edvino sin levis, kaj paŝante al Salva, li ŝin kisis kaj ĝojege ekkriis:—


"Patrino, ĉi tiu tago estas la plej feliĉa el ĉiuj aliaj tagoj de mia tuta vivo. Hodiaŭ, panjo, mi fariĝos doktoro de medicino."

Kortuŝite, Salva lin ĉirkaŭprenis kaj patrinece respondis liajn kisojn, dum du larmgutoj aperis en ŝiaj okuloj.


Subite Edvino ekmemoris, ke li devas foriri. Li eltiris sian horloĝeton, kaj rigardante ĝin, li delikate forpuŝis sian patrinon. "Sufiĉe, panjo, mi devas rapidi al la kolegio", li eldiris, kaj kuris por sia mantelo.



Dume Salva metis lian robon kaj ĉapon en la valizon kaj akompanis lin ĝis la pordo. Kiam li atingis la kolegion, jam estis iom malfrue. La studentoj, vestitaj en roboj kaj kvarangulaj ĉapetoj, sidis en la granda aŭditorio kaj aŭskultis la paroladon de profesoro sur la estrado. Malantaŭe sur




la estrado sidis kelkaj aliaj profesoroj kaj gastoj, inter kiuj ankaŭ estis Doktoro Roden. Kiam la profesoro finis sian paroladon, li estis aplaŭdita de



la tuta ĉeestantaro. La fakultatestro tiam prezentis Doktoron Roden. Kiam la doktoro alproksimiĝis la podion, li estis varme akceptita. Li komencis sian paroladon per gratuloj al la studentaro. Tiam li pritraktis la vastan progreson en la scienca kaj arta fakoj. Li parolis pri la grandaj eltrovaĵoj en


la pasinta jarcento, pri la revoluciigaj rezultoj de vaporo kaj elektro. Li menciis vaporŝipojn, fervojojn, la telefonon, telegrafon, aerŝipojn kaj aeroplanojn, la fonografon, kinematagrafon, linotipon, radion, la progreson de televidado k.t.p. Kaj dum li parolis, li iĝis pli kaj pli entuziasma. Ŝajnis, ke li estis ĉarmita de liaj propraj vortoj. La vizio de granda kaj mirinda estonto kvazaŭ ravis lin. La aŭdantaro avide aŭskultis liajn vortojn kaj observadis lian ĉiun movon, kvazaŭ infektita per lia entuziasmo. Jen li paŭzis momenton kaj rigardante la aŭdantaron per fiksitaj okuloj, li subite ekkriis per sonora voĉo, kiu tremigis la aeron en la granda aŭditorio kaj la korojn de la aŭdantoj:



"Sed kion ni faris por pligrandigi la longecon de nia vivo! Nenion! Nenion! Nenion, sinjoroj! Rigardu, sinjoroj!" li denove ekkriis post momenta paŭzo, ekkaptante per tremantaj fingroj sian longan grizan barbon. Lia vizaĝo distordiĝis pro interna agitiĝo. Liaj okuloj flagretis per stranga kvazaŭ freneza fajro. Lia kapo falis sur lian bruston en agonio, kiam li eldiretis la vortojn, kiuj estis apenaŭ aŭdeblaj, "Maljuneco, morto."

Li faris kelkajn paŝojn sur la estrado kaj subite haltis antaŭ unu el la profesoroj. Rigardante lin kelkmomente kaj ekvidante grizan haron sur lia kapo, li subite eltiris ĝin. "Jen," li daŭrigis, "jen via unua averto! La unua voko de la mortanĝelo, la unua invito al la ĉielo."

Kun klinita kapo li revenis al la rando de la podio kaj daŭrigis:




"Sinjoroj, antaŭ dudek jaroj mi konis maljunan biologon. Laŭdire li estis freneza kaj estis enkarcerigita en frenezulejo. Antaŭ sia morto li deziris, ke mi venu al li. Kiam mi venis, li jam estis batalanta kun la morto.

"Ekvidante min, li ekkaptis mian manon kaj altiris min al si. El liaj grimacoj mi komprenis, ke li volas ion diri al mi. Subite en sia lasta agonio li iomete leviĝis kaj elprenis de sub la kapkuseno grandan sigelitan koverton kaj apenaŭ aŭdeble diris: 'Daŭrigu mian laboron por la bono de la homaro.' Li enpuŝis la koverton en mian manon kaj falis reen senviva.

"Dudek du jaroj trapasis, kaj mi ankoraŭ laboradas laŭ la planoj trovitaj en tiu koverto. Mi jam estas maljuna kaj malforta. La morto jam vokas min."

Li subite haltis kaj grimacante kaptis sin je sia koro, sed tuj obstine rektiĝis kaj ekkriis: "Sed mi ne devas morti! Mi volas vivi! Mi devas vivi! Mi volas rekomenciĝi!" Denove li kaptis sin je sia koro. Malvarmaj ŝvitgutoj ruliĝis sur lia vizaĝo, kiu distordiĝis per dolorgrimacoj. Tamen li freneze daŭrigis:

"Jen, sinjoroj, mi eltrovis la fonton de juneco la fonton...de juneco...la fonton..."




Dum la lastaj vortoj lin venkis kapturniĝo. Liaj vizaĝmuskoloj videble tordiĝis en spasma danco dum liaj okuloj fermiĝis kaj malfermiĝis por vidi la aŭdantaron, kiu kvazaŭ malaperis en nebulan aŭ senfinan abismon. Liaj brakoj kaj kruroj tremis en superforta penado por teni kaj ekvilibrigi la pezon de lia korpo, sed ili fine disfalis, kaj lia korpo malrigide malleviĝis sur la plankon. Tamen li ne ĉesis batali, kaj farante la lastan penon, li eltiris sigelitan koverton el la brustpoŝo kaj falis sur la plankon senkonscia.




Ĉi tiu okazintaĵo kaŭzis tumulton inter la aŭdantaro. La profesoroj sur la estrado ekkuris al la falinta doktoro kaj penis lin rekonsciigi. Dume la fakultatestro elprenis el la mano de la senkonscia doktoro la koverton, sur kiu li legis la jenon:

"Se io okazos al mi, mi petas transdoni ĉi tiun koverton al mia amiko Doktoro Paul Gerber."



La nomo de Doktoro Gerber estis forstrekita, kaj sube estis skribita la nomo de Edvino Hoefner, studento de la Thorndona Kolegio.

La fakultatestro montris la koverton al kelkaj el la profesoroj, kiuj mirege ĝin rigardis. Dume la kuracisto zorganta pri la senkonscia Doktoro Roden alproksimiĝis la fakultatestron kaj sciigis lin pri la stato de la malsanulo. La fakultatestro antaŭeniris al la rando de la podio, levis la manon kaj sciigis, ke Doktoro Roden resaniĝos en kelkaj tagoj. Li venigis Edvinon Hoefner sur la estradon kaj transdonis al li la koverton.




Surprizite Edvino malfermis la koverton kaj legis la enhavon de la letero. Tiu nur havis la jenajn kelkajn vortojn:

"Prenu miajn ŝlosilojn kaj rapidu al mia domo. En la supra tirkesto de ŝranko en mia laboratorio, kiu havas la surskribon, 'Tujaj instrukcioj,' vi trovos klarigojn. D-ro. Roden."

Edvino montris la leteron al la fakultatestro, kiu el la poso de Doktoro Roden elprenis la ŝlosilojn kaj donis ilin al Edvino. Edvino rapide forlasis la aŭditorion.


Dume oni enportis brankardon kaj forportis la senkonscian Doktoron Roden al la alkonstruita malsanulejo.



Atinginte la domon de Doktoro Roden, Edvino eniris la laboratorion. Li ĉirkaŭrigardis kelkajn momentojn kaj ekvidis la tirkeston kun la surskribo, "Tujaj instrukcioj." Li ĝin malfermis kaj elprenis sigelitan koverton, kiu havis la jenan surskribon:


"Ĉi tiu enhavas la planon kaj instrukciojn, kiujn vi devas obei. Ne demandu kialon! Obeu nur la ordonon, kaj memoru, ke ĉio, kio estas ordonita ke vi faru, estas por la bono de la homaro kaj estontaj generacioj."

Malfermante la koverton, Edvino trovis diagramon de la laboratorio, liston de la detalaj instrukcioj kaj krome sigelitan koverton, sur kiu estis skribita: "Ĉi tiu koverto enhavas la ŝlosilon por la apuda tirkesto, kiun oni devas malfermi nur post mia morto."



Legante ĉi tiujn strangajn instrukciojn, la vizaĝo de Edvino montris miron kaj surprizon. Kelkfoje li tiris sian fingron laŭ la linioj de la diagramo, kaj rigardadis la murojn de la laboratorio, por konstati, ĉu ĉio estas laŭ la plano.


Fine tralegînte la tuton, li konjektis, ĉu ĉio ĉi tio estas verajo aŭ nur sonĝo. Denove li legis la instrukciojn, ekzamenis la planon, kaj tiam iris al la muro, kie sur breto troviĝis la granda kupra vazo.



Li rigardis ĝin kelkmomente, kaj hezitante ĝin deprenis. En tiu sama momento li ekvidis la malfermiĝantan sekretan pordon kaj ŝtuparon, kiu kondukis en subteran irejon lumigitan per elektraj lampetoj.

Li remetis la vazon sur ĝian lokon, kaj la pordo tuj fermiĝis. Li denove tralegis la instrukciojn kaj ekrigardante sian poŝhorloĝon, subite turniĝis kaj iris en la apudan ĉambron.


Li pretigis manĝaĵojn laŭ la instrukcioj kaj reiris en la laboratorion. Li metis la pleton kun manĝaĵoj sur la tablon kaj denove legis la instrukciojn. Li tiam prenis el la ŝranko la boteleton kun la surskribo, "Glandekstrakto N-o 14", kaj faligis dek gutojn en la glason da lakto. Ree li deprenis la kupran vazon. La sekreta pordo malfermiĝis, kaj



li eniris kun la pleto en la manoj en la subteran irejon.

En la subtera ĉambro la junulino Estelle sidis ĉe la piano kaj ludis. Subite ŝi ekrigardis la muron, kie troviĝis la sekreta pordo. La pordo malfermiĝis, kaj Edvino aperis. Li haltis momente kva-

zaŭ blindiĝita de la brilega lumo en la ĉambro.




Estelle ektimiĝis kaj forkuris en angulon, rigardante Edvinon per larĝe malfermitaj okuloj. Edvino ekzamenis la ĉambron kaj aŭtomate iris al la tablo, metante sur ĝin la pleton kun manĝajoj. Subite li ekvidis la knabinon kaj komencis froti siajn okulojn. Li ne povis kredi, ke tio, kion li vidas, estas verajo. Dume Estelle duone mirigite kaj timigite alproksimiĝis kaj fikse lin rigardadis. Edvino ne sciis kion fari; liaj okuloj nevole malleviĝis pro honto, Subite li ekmemoris la instrukcion, kiu diras: "Memoru, vi ne devas paroli kun ŝi, nek eligi eĉ unu sonon." Li tial nur montris per sia fingro la pleton. Tio ŝajne efikis, ĉar Estelle




tuj sidiĝis. Singardeme ŝi penis tuŝi lian manon per unu fingro. Edvino ne formovis la manon, kaj Estelle fideme levis sian manon al lia vizaĝo, scivoleme karesante al li la vangon kaj mentonon. Ŝin mirigis lia nigreta hararo, kiun ŝi ameme karesis.


Kelktempe Edvino permesis al ŝi tiun ĝuon, sed fine montris la pleton per la fingro. Estelle prenis pecon da pano kaj manĝis. Subite ŝi ekrigardis lin kaj puŝis la panon al lia buŝo. Momente distrite, Edvino forgesis la instrukciojn kaj eldiris




"Ne!" Estelle eksaltis de surprizo pro la nekonata sono kaj rediris plurfoje la vorton "ne". Ŝi metis la glason da lakto antaŭ lian buŝon, sed Edvino nun estis singardema kaj nur flankenturnis la kapon. Ŝi provis denove per la pano, sed ne ricevante respondon, fine manĝis la nutraĵon, redirante kiel papago la vorton "ne, ne." Edvino dumtempe rigardis la ĉambron, kaj liaj okuloj haltis, kiam li ekvidis la pianon. La okuloj de Estelle postsekvis tiujn de Edvino, kaj kiam ŝi rimarkis, ke li rigardas la pianon, ŝi rapide ekstaris kaj kuris tien. Ŝi sidiĝis, kaj baldaŭ ŝiaj fingroj moviĝadis gracie sur la klavaro.



Edvino rigardadis ŝiajn blankajn manojn kaj pintajn fingrojn, kaj lin ekkaptis deziro tuŝi kaj kisi ĉi tiujn belegajn fingretojn. Li penis perforte kontraŭstari tiun deziron, sed ne povis venki ĝin. Li fine ekkaptis ŝian manon kaj kisis ĝin. Estelle



lin rigardis surprize, kaj ekzamenis la lokon, kie la kiso estis stampita. Kun infana naiveco ŝi prezentis al li la duan manon. Edvino prenis ŝiajn ambaŭ manojn kaj pasie ilin kisis. Estelle ekstaris, ŝajnis, ke ŝi spertis strangan kaj novan senton, kiun ŝi neniam antaŭe spertis. Ĝoje ŝi observis Edvinon, kiel li kisas ŝiajn fingropintojn, manplatojn kaj brakojn, kaj fine, venkita de la pasio, ĉirkaŭprenis



ŝin kaj premis longan kison sur ŝiajn lipojn. Estelle rave fermis la okulojn kaj ĝuis liajn ebriigajn karesojn. Edvino forgesis la celon, por kiu li venis, kaj premis al sia koro la delikatan varman korpon de la knabino. Li rigardis ameme en ŝiajn duone malfermitajn bluajn okulojn kaj murmuris emocie: "Kial? Kial mi ne devas paroli al vi?"

Estelle ektremis kaj larĝe malfermis la okulojn, dum ŝia vizaĝo esprimis novan surprizon. Ŝi penis rediri la vortojn, sed ne sukcesis. Edvino ŝin rigardis mirigite, dum ŝi provis imiti la vortojn,

kaj li fine komprenis la kialon. Li ekkomprenis, ke ŝi ne povas paroli; ke ŝi neniam aŭdis homan voĉon escepte sian propran; ke ŝi tute malkonas la mondon. Por konstati tion, li denove kisis ŝin, dirante, "Kiso".


Estelle miris kaj imitis lin, dirante, "Kiso". Li montris la pianon per la fingro kaj diris, "Piano". Ŝi rediris, "Piano". Ŝiaj vizaĝo kaj okuloj esprimis, ke ŝi bone komprenis. "Jes", Edvino diris al si, "oni kaŝis antaŭ ŝi ĉion, sed kial!" Subite do li ekmemoris sian rolon kaj la instrukcion: "Ne demandu la kialon! Ne serĉu la kaŭzon! Obeu nur la ordonon! Memoru, ke ĉio estas por la bono de la homaro kaj estontaj generacioj". Li subite liberiĝis kaj kuris al la pordo.

Surprizite Estelle postkuris lin, sed Edvino bonanime kontraŭstaris ŝin.




Kiam ŝi vidis lin ĉe la pordo preta por eliri, larmoj aperis en ŝiaj okuloj, kaj ŝi ekkriis, "Kiso". Edvino ŝin ĉirkaŭprenis kaj kisis. Tiam delikate forpuŝante ŝin, li trairis la sojlon. Kiam la kaŝita pordo subite fermiĝis, Estelle vane frapegis la pordon kaj senĉese vokis, "Kiso, kiso, kiso", sed aŭdis nenian respondon. Kaj klinante la kapon en malespero ŝi reiris al la piano. Momenton ŝi rigardis ĝin, kiam feliĉa rideto aperis sur ŝiaj lipoj. Ŝi tuŝis la pianon per la fingro kaj ĝoje eldiris, "Piano". Ŝi sidiĝis, kaj movante la fingrojn sur la klavaro, ŝi kantis la unuan kanton kun vortoj, kiun ŝi iam lernis:

"Kiso, kiso, piano, piano, kiso, kiso", kaj tiam aldonis, "Ne, ne."



Edvino eniris la laboratorion, restarigis la vazon, kaj tuj la pordo de la subtera enirejo fermiĝis. Li tiam penseme sidiĝis. Subite li ektremis. Ŝajnis al li, ke li aŭdis ekĝemon. Li ekstaris kaj ĉirkaŭrigardante la ĉambron, li haltis la spiron kaj aŭskultis. Li paŝis kelkfoje la ĉambron kaj ree aŭskultis, sed fine forpelis la ideon, kredante, ke li nur imagis tion. Li ne sciis, ke alia malliberulo malsata kaj soifa troviĝas en malluma kelo rekte sub liaj piedoj. Veninte hejmen, li rakontis al sia patrino la tutan okazintajon kaj sian aventuron kun Estelle.




Salva aŭskultis treege interesate, dum ŝia vizaĝo esprimis miregon. "La plej stranga estas", Edvino daŭrigis, "ke mi kvazaŭ vidis la knabinon iaoke, iatempe, sed mi ne povas rememori kie kaj kiam."

Kiam li finis, Salva ekstaris, kaj metante sian manon sur lian ŝultron, diris:

"Mia kompatinda knabo, mi timas, ke vi enamiĝis." Ŝi premis lian kapon al sia koro kaj aldonis: "Sed vi ja ne volas forgesi vian patrinon!"


Edvino ŝin ĉirkaŭprenis kaj regardis ŝin kvazaŭ riproĉante al ŝi tian penson. "Ho patrino", li eldiris, tiam rapide aldonis, "sed, panjo, mi devas tuj foriri, ĉar jam estas malfrue."



"Bone, mia knabo", la patrino diris, kaj akompanis lin ĝis la pordo.

Revenante al la laboratorio, Edvino tuj preparis la vespermanĝon por Estelle laŭ la instrukcioj kaj kiel antaŭe eniris la subteran irejon.

Pro longtempa kutimo Estelle jam sciis la manĝotempon. Ĉi tiun fojon ŝi malpacience atendis ĉe la muro, kie la pordo malfermiĝis, kaj en la momento kiam Edvino aperis, ŝi gaje ekkriis, "Kiso, kiso," kaj antaŭ ol Edvino transpaŝis la sojlon, ŝi



jam ĉirkaŭprenis lin. Li kisis ŝin kaj per sia libera brako ĉirkaŭprenis ŝian talion. Li kondukis ŝin al la tablo, metis sur ĝin la pleton kaj ameme sidigis ŝin. Tamen Estelle tute ne interesiĝis pri la nutrajo, sed papageme daŭrigis diradi, "Kiso, kiso." Edvino prenis iom da nutrajo, metis ĝin antaŭ ŝian buŝon kaj diris, "Manĝu!" Ŝi rigardis lin kaj la

manĝaĵon en lia mano, kaj ŝajne komprenante, diris, "Manĝu." Ŝia vizaĝo subite heliĝis, kvazaŭ frapita de grava ideo, kaj ŝi diris, "Kiso, manĝu." Edvino kisis ŝin, kaj ŝi permesis al li meti peceton da nutraĵo en ŝian buŝon. Li metis la glason da lakto antaŭ ŝian buŝon kaj diris, "Trinku!" Ŝi enrigardis liajn okulojn kaj diris, "Kiso, trinku." Li kisis ŝin, kaj ŝi iomete trinkis. Lerninte tion, ŝi ne volis manĝi nek trinki, se ŝi ne ricevis kison kun ĉiu plenbuŝo, ripetante ĉiufoje, "Kiso, manĝu; kiso, trinku."

Kiam ŝi finis la manĝon, ŝi altiris lin al la piano, dirante, "Piano, kiso." Edvino miregis pro ŝia memoro. Li denove ĉirkaŭprenis ŝin, kaj premante siajn lipojn al ŝiaj, li ekkriis, "Vi mirinda knabino!" Li rigardis ameme en ŝiajn okulojn, kaj kisante ŝin, li murmuris, "Mi amas vin." Ŝajnis, ke ŝi tuj komprenis la signifon de tiuj strangaj vortoj, kaj ŝi ripetis, "Mi amas vin; mi amas vin." kaj kiam li sidigis ŝin ĉe la piano, ŝi premis sian kapon al lia brusto. Fine ŝi ekfrapis la klavojn kaj kantis kiel ŝi neniam antaŭe kantis, kaj la vortoj de la plej mirinda kanto estis:

"Mi amas vin;
Mi amas vin.
Kiso, manĝu, trinku.
Mi amas vin."

Kiam ŝi finis la mirindan kanton, ŝi stariĝis, ekkaptis lian brakon kaj kondukis lin al la fonografo, staranta en alia parto de la ĉambro. Ŝi haltis, kvazaŭ pensante pri ĝia nomo, kaj ne trovante pli taŭgan nomon, ŝi diris, "Piano." Edvino ridis, kaj montrante la fonografon, diris, "Fonografo." Tiu vorto jam estis iomete malfacila, sed post kelkaj provoj ŝi eldiris ĝin bonege, "Fonografo." kaj tuj aldonis, "Kiso." Ridante, Edvino kisis ŝin, kaj elektante el la diskoj valson, surmetis ĝin. Melodiaj sonoj de orkestro tuj plenigis la ĉambron, kai dum ŝi staris kaj aŭskultis, li ĉirkaŭprenis ŝian tal-



ion dirante: "Dancu," kaj baldaŭ ili ekdancis. Ĉi tiu nova sperto videble faris la plej fortan impreson sur ŝin, ĉar kiam la muziko ĉesis, ŝi rapide kuris al la fonografo kaj refunkciigis ĝin, murmurante, "Dancu, dancu." Ili dancis denove kaj denove.


Fine do li montris al la pordo. Ŝi tuj komprenis, kaj neniam okazis pli kortuŝa disiĝo de du geamantoj. Ŝi premis sian vizaĝon kontraŭ lian, senĉese kisis lin kaj murmuretis la plej belajn vortojn, "Mi amas vin; mi amas vin."

Kiam fine la pordo fermiĝis antaŭ ŝi, ŝi kalkulis sur la fingroj sian novan vortareton: "Kiso, mi amas vin, piano, fonografo, dancu, manĝu, trinku, ne."

La sekvantan tagon Edvino iris al la mansanulejo por sciiĝi pri la stato de Doktoro Roden. La



doktoro kuŝis kun glacikompresoj ĉirkaŭ la kapo, kaj la ĉeestanta kuracisto sciigis al li, ke la doktoro baldaŭ resaniĝos de la malgranda malsaneto. Kiam Doktoro Roden ekvidis Edvinon, li volis ellitiĝi, sed la kuracisto malpermesis. Edvino konsolis la malsanulon, dirante, ke ĉio estas farita laŭ lia ordono. La okuloj de Doktoro Roden esprimis kontenton kaj ĝojon. Edvino tiam adiaŭis kaj foriris.



Kelkaj tagoj forpasis. Doktoro Roden sidis en la lito kaj manĝis. Kiam Edvino eniris, la doktoro ĝoje salutis lin kaj tuj demandis pri Estelle. Edvino sidiĝis apud la lito kaj raportis ĉion pri Estelle, escepte tion, ke li enamiĝis en ŝi. Fine li hezitante aldonis: "Sed pro kio la tuta mistero, kaj kial ŝi tute nenion scias pri la ekstera mondo?"

Doktoro Roden lin rigardis suspekteme dum kelkaj momentoj kaj penis per siaj okuloj penetri la animon de Edvino. Ne povante eltrovi ion, li ekkaptis la manon de Edvino kaj rigardis lin kelkajn momentojn per flamaj okuloj. Tiam li ĉirkaŭrigardis por certiĝi, ke neniu lin aŭdas krom Edvino. Li diris:

"Morgaŭ mi forlasos la malsanulejon, kaj per via helpo mi faros je ŝi la plej mirindan operacion."

Edvino iĝis kvazaŭ paralizita de surprizo, ekaŭdante tiujn vortojn. Li ne povis kredi, ke li aŭdis bone. Kun larĝe malfermitaj okuloj, li rigardis en la okulojn de la doktoro, kaj sin demandis ĉu ĉi tiu homo estas sana aŭ simple frenezulo. Fine li ekdiris: "Operacio je ŝi! Kial—kion vi volas diri? Mi kredas, ke ŝi estas tute sana."

Doktoro Roden feliĉege rikanis kaj diris:

"Kompreneble. Mi treege zorgis, ke ŝi estu tia. Ŝi neniam malsaniĝis eĉ por unu minuto. Jam estas dudek jaroj, de kiam mi gardas ŝin kaj preparas ŝin por ĉi tiu operacio! Nun la tempo venis. Mi jam estas tro maljuna, kaj mi bezonas ŝian junecon, kiun mi morgaŭ injektos en miajn proprajn vejnojn."

Aŭdante tion, Edvino tute konfuziĝis kaj fine ekkriis: "Sinjoro, vi mortigos ŝin!"

Doktoro Roden metis sian manon sur la buŝon de Edvino, kaj rigardante lin suspekteme, diris: "Silentu! Tio estas necesa por la scienco, por la estonto de la homaro. Ŝi tute ne scias la mondon. La vivo nenion signifas al ŝi."


Edvino eksaltis de la seĝo kvazaŭ lin mordis freneza hundo. Timigite kaj naŭzite, li kun abomeno rigardis Doktoron Roden. Li nun estis certa, ke li parolas kun frenezulo. Doktoro Roden per iom aparte stranga maniero faris signon al li, kaj per la fingro montris al li la seĝon.

Edvino hezitis momenton kaj sidiĝis. La doktoro tiam daŭrigis:

"Jam estas dudek jaroj de kiam ŝi estas nutrata per specialaj glandekstraktoj el junaj perfekte sanaj kunikloj por evoluigi en ŝi superfluon de la juneca principo. Ĉi tiu principo amasiĝis en ŝia korpo kaj sufiĉos por rejunigi mil maljunulojn. Unu guto injektita en la vejnojn de iu maljunulo tuj restarigos lian junecon. Nun aŭskultu min bone. Morgaŭ ni ambaŭ faros tiun operacion; kaj vi estos tiu, kiu injektos la guton en miajn vejnojn. Vi estos la unua, kiu vidos ĉi tiun miraklon. Ĉi tiu blanka barbo fariĝos nigra, ĉi tiuj sulkoj de maljuneco malaperos. Antaŭ viaj okuloj okazos tiu transformiĝo, kaj vi ekvidos viron kun forto kaj vireco same kiel vi estas."


Edvino ŝajne aŭskultis, sed liaj pensoj estis tie, tie en la subtera ĉambro, tie ĉe lia amata malfeliĉa Estelle, kiu kiel ŝafeto devas esti mortigita de frenezulo por la scienco, por la bono de la homaro. Li pensis nur pri la savo de sia amata knabino de la minacanta danĝero. Subite lia vizaĝo heliĝis. Plano aperis en lia kapo; plano por savi la knabinon. Li decidis indulgi la doktoron. Li ŝajnigis, ke li interesiĝas kaj promesis helpi lin.

Kiam Edvino estis preta forlasi la ĉambron, Doktoro Roden premis lian manon kaj ne rimarkis la grandan agitiĝon de Edvino, sed tuj kiam li eliris, la doktoro maltrankviliĝis. Timante, ke Edvino malbonigos liajn planojn, li decidis iri hejmen. Li vokis la ĉeestantan kuraciston, kaj diris al li, ke li devas tuj foriri. La kuracisto tion malpermesis kaj konsilis al li atendi ĝis morgaŭ,sed vidante, ke la maljunulo insistas, li diris al li, ke li klopodos pri tio, sed dume li atendu ĝis li konsultos kun la ĉefkuracisto. Doktoro Roden tiam atakis




la kuraciston, ŝtopis lian buŝon kaj ligis liajn manojn kaj piedojn per ŝnuro farita el la litotuko. Li tiam surmetis la vestojn de la kuracisto kaj nerimarkite eliris.

Kiam Edvino forlasis la malsanulejon, li tuj luis fiakron kaj rapidis al Estelle. Enirante la subteran ĉambron, li kuris al Estelle, kiu sin ĵetis en liajn brakojn. Edvino penis klarigi al ŝi, ke ŝi es-




tas en granda danĝero. Estelle ne sciis, kion li diras al ŝi, sed pro lia vizaĝesprimo komprenis, ke li diras ion tre gravan. Tio treege timigis ŝin, kaj larmoj aperis en ŝiaj okuloj, eble la unuaj larmoj en ŝia tuta vivo. Edvino ĉirkaŭprenis ŝin kaj per sia poŝtuko forviŝis la larmojn. Li kisis ŝin kelkfoje kaj diris, ke li nur iras hejmen por preni vestojn por ŝi, kaj rapidis al la pordo. Estelle lasis lin foriri, dum gutoj da larmoj ruliĝis sur ŝiaj vangoj.

Edvino eniris la laboratorion, kaj jam estis preta foriri, kiam lia rigardo fiksiĝis sur la ŝrankon. Li pensis nur momenton kaj iris al ĝi. La karteto "Tujaj instrukcioj" allogis lin. Li tuj malfermis la tirkeston kaj elprenis la malgrandan koverton, kiu havis la surskribon, "Ĉi tiu koverto enhavas la ŝlosilon de la apuda tirkesto, kiun oni devas malfermi nur post mia morto." Firme decidiĝante, Edvino eltiris la sloŝilon kaj malfermis la apudan tirkeston. Li eltiris el ĝi paketon. Malfermante ĝin, li trovis, ke tio estis la biografio de Doktoro Roden. Tie ankaŭ estis fotografaĵo de juna viri-




no, kiu iomete similis al Estelle kaj al lia patrino Salva. Li turnis ĝin kaj legis sur la alia flanko: "Al mia amata Antono. Via finanĉino Salva."

Edvino estis mirigita kaj jam volis legi la biografion, sed en tiu momento li denove ekaŭdis la strangan ĝeman sonon. Surprizite, li turnis la kapon kaj ĉirkaŭrigardis, kaj jen denove la ĝemo eksonis kvazaŭ sub liaj piedoj. Li ekrigardis la plankon kaj ekvidis klappordon sub la labortablo.



Li metis sian orelon sur la pordon kaj aŭskultis kelkajn momentojn. La ĝemo ekaŭdiĝis denove. Li nun estis certa, ke iu estas tie, kaj perforte malfermis la ŝlositan pordon. Li tiam kliniĝis al la malfermaĵo kaj vokis, "Kiu estas tie?" Ne aŭdante respondon, li ekbruligis alumeton kaj vokis denove. Sed jen li rimarkis la elektran butonon. Li ĝin premis, kaj la kelo iomete lumiĝis. En la sama momento li ekvidis ombron de homo kun levitaj manoj, kaj ekaŭdis sufokitan sonon por helpo. Post mallongaj klopodoj li sukcesis liberigi la viron kaj forkonduki lin kun si. Kiam li venis hejmen, li kaj Salva zorgis pri li kaj donis al li manĝaĵon. Dum la viro manĝis, Edvino rakontis al sia



patrino pri Doktoro Roden, kaj ke Estelle troviĝas en granda danĝero, se ŝi ne estos savita tuj. Li elpoŝigis la paketon kaj fotografaĵon, kiujn li trovis en la tirkesto kaj montris ilin al Salva. Tuj kiam Salva ekvidis la fotografaĵon, ŝi kaptis sin



je sia koro kaj ekkriis: "Granda Dio! Kie vi trovis ĝin?" Ŝi eltiris el la manoj de Edvino la manuskripton kaj eklegis la titolan paĝon. Ĉio sajnis malheliĝi antaŭ ŝi, kaj ekkriante "Antono!" ŝi malleviĝis planken svenante.



Edvino, ektimigite, kaptis ŝin, kaj vokante, penis ŝin rekonsciigi. Salva malfermis la okulojn kaj ĉirkaŭrigardis konfuzite, sed tuj rememoris la okazintaĵon kaj ekkriis kvazaŭ freneza: "Estelle—mia infaneto—mia filineto!"

Preskaŭ frenezigita per la penso, ke Estelle, ŝia filineto, kiun ŝi serĉadis dum dudek jaroj, nun estas en danĝero, donis al ŝi superhoman forton; ŝi liberiĝis kaj kuris al la pordo. Sed Edvino ektimigita, kaptis ŝin kaj perforte sidigis ŝin sur la seĝon, kriante: "Panjo, trankviliĝu! Kio okazis? Kion vi diris?"

Salva trankviliĝis iomete kaj rakontis al li en kelkaj vortoj la okazintaĵon antaŭ dudek jaroj, pri la forkuro de Doktoro Roden kun ŝia infano.

Kiam ŝi finis, Edvino surprizite ekkriis: "Ŝi estas do mia fratino!"

Salva ekrigardis lin, kaj divenante liajn pensojn, diris:

"Kompatinda knabo, vi amas ŝin." Ŝi ekkaptis per siaj manoj lian kapon kaj premis ĝin al sia koro. Tiam kovrante lian vizaĝon per kisoj, ŝi daŭrigis:

"Kara knabo, mi ne forprenos vian amatinon. Ŝi ne estas via fratino. Vi povas ŝin havi."

Edvino eksaltis de surprizo kaj per larĝe malfermitaj okuloj rigardis sian patrinon, tute ne komprenante ŝin. Salva tiam rakontis al li la okazintaĵon sur la vaporŝipo "Roland," kiam ŝi trovis la knabeton sub sia lito.



En tiu momento la viro, kiun Edvino savis el la kelo, esprimis grandan agitiĝon; li avide aŭskultis ĉiun vorton. Fine Salva diris: "Vi do ne estas mia filo. Via vera nomo estas Edvino Gerber."

La viro eksaltis kaj agitite ekkriis: "Edvino Gerber, mia knabo, mia filo!"

Edvino kaj Salva sin turnis kaj konsternite rigardis la viron, kiu etendis la brakojn al Edvino. Ili alproksimiĝis al li, kaj li klarigis, ke li estas Paul Gerber, la viro, kiu lasis la knabon sub la lito. Li tiam rakontis kiel li forkuris de la ŝipo, kaj kiel li serĉadis sian knabon ĉie, sed ne povis lin trovi.



La patro kaj filo sin ĉirkaŭprenis, kaj Edvino tiam demandis, "Sed kial vi estis malliberigita de la frenezulo, Doktoro Roden?"


"Mi, kiel vi nun, havis la malfeliĉon scii lian sekreton," Paul respondis, "kaj ĉar mi rifuzis partopreni en tia krimo, kaj diris al li, ke mi sciigos la policon, li eltiris revolveron kaj devigis min eniri



en la kelon, el kiu vi min savis." Kiam la viro finis sian rakonton, li diris: "Sed rapidiĝu por savi la knabinon, aŭ estos tro malfrue. Vi ne konas tiun demonon, kiel mi konas lin."

Salva rapide elektis vestojn el sia vestaro kaj foriris kun Edvino.



Intertempe Doktoro Roden venis al sia hejmo. Li tuj ekvidis, ke la pordo de la kelo estas rompita, ankaŭ ke la manuskripto mankis en la dua tirkesto de la ŝranko. Memkompreneble, ke li rapide kuris al la ĉambro de Estelle.

Kiam li eniris, Estelle ektimigita forkuris, sed la maniulo sin kaptis post mallonga kurado post ŝi. Li malfermis sekretan pordon kaj perforte entiris ŝin en alian ĉambron. Post interbatalo, kiu daŭris kelkajn minutojn, li metis ŝin sur la ĥirurgian tablon kaj per ŝnuroj ligis ŝiajn brakojn kaj krurojn al la tablo. Li rapide elektis kelkajn operaciilojn kaj metis ilin sur malgrandan emajlitan tableton.

Li tiam prepariĝis por la danĝera operacio, dum la knabino kuŝis sur la tablo senmova kun tuko en sia buŝo por ke ŝi ne ekkriu.




Kiam Salva kaj Edvino eniris la subteran ĉambron, ili estis terurigitaj, ĉar Estelle jam ne estis tie. Salva ekploris, dum Edvino vokis, "Estelle, Estelle, kie vi estis?" Tiam, kvazaŭ ekmemorinte, li kriis: "Mi amas vin, mi amas vin, kiso," sed nenia respondo aŭdiĝis. Salva kuradis kiel freneza, kriante, "Granda Dio, li mortigas ŝin! Estelle, Estelle, filino mia!" Ŝi daŭrigis kaj frapis per la pugnoj la murojn.

Subite la vizaĝo de Edvino ekheliĝis, kaj li ra-



pidis al la pordo, dirante, "Mi telefonos al mia patro. Li eble scias, kie troviĝas la operacia ĉambro."

Doktoro Roden observis ĉion, kio okazis en la ĉambro tra kaŝita aperturo. Kiam li vidis Edvinon elkuri, lia vizaĝo distordiĝis en demona rido. Li alproksimiĝis la kaŝitan pordon kaj iomete ĝin malfermis. Li tiam prenis litotukon kaj atendis,



dum li diable rikanis. Salva, rimarkinte la kaŝitan pordon, tuj kuris tien, sed Doktoro Roden rapide ĵetis la tukon super ŝian kapon kaj baldaŭ ligis ŝiajn manojn kaj piedojn kaj ŝtopis ŝian buŝon per tualeta tuketo. Doktoro Roden tiam malfermis klappordon, kiu troviĝis antaŭ la kaŝita pordo, kaj estingis la lumon. Li denove malfermis iomete la pordon kaj ree stariĝis je la kaŝita aperturo por observi. Li vidis kiel Edvino envenis kaj surprize ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Li aŭdis lin voki, "Patrino! Panjo! Kie vi estas?"







Ankaŭ Salva aŭdis la ekkriojn de Edvino kaj malespere batalis por liberiĝi, sed vane. Dume Edvino ekvidis la malfermitan pordon kaj ekkuris, sed tuj enfalis en la kaptilon.



Doktoro Roden ree lumigis la ĉambron, surmetis blankan operacian veston kaj kaŭĉukajn gantojn, kaj alproksimiĝante al Estelle, li kovris ŝian vizaĝon per anesteza masko. Estelle forte kontraŭbatalis, sed fine ŝiaj movoj ĉesis. Doktoro Roden, tenante la operacian tranĉilon, atendis la rezulton de la anestezo. En tiu momento ekaŭdiĝis voĉoj en la apuda ĉambro. Doktoro Roden ektremis pro la bruo kaj frapado sur la sekretan pordon. Li tuj estingis la lumon kaj ree malfermis la klappordon de la planko.



Edvino, ekaŭdinte la frapadon kaj sciante, ke tio estas lia patro kun policanoj, ekkriis, "Gardu vin! Gardu vin! Estas kaptilo antaŭ la pordo."



La policistoj disrompis la pordon kaj per manlumigiloj lumigis la ĉambron. Singardeme ili trapaŝis la kaptilon kaj fine kaptis la doktoron. Dume Salva estis malligita de unu policano, kaj alia helpis Edvinon eliri el la kelo. La patro de Edvino forprenis la anestezan maskon de la vizaĝo de Estelle kaj malligis ŝin. Li kaj Edvino tiam enportis la knabinon en ŝian ĉambron kaj kuŝigis ŝin en la





liton. Salva sidiĝis sur la randon de la lito, kaj rigardante ŝian filineton, ŝi ploris pro feliĉo kaj alvokis ŝin, "Mia knabino—mia filineto—Estelle—karulineto mia!" Ŝi karesis kaj per kisoj kovris al ŝi la vizaĝon.


Ankaŭ Edvino sur siaj genuoj frotis ŝiajn manojn kaj diretis, "Mi amas vin, mia Estelle, mia kara."

Doktoro Roden dume batalis freneze kun la policanoj. Lia vizaĝo, kvazaŭ en la lasta agonio, la okuloj pleniĝis per sango, kaj el la buŝo falis blanka ŝaŭmo. Li kriegis sovaĝe:

"Perfiduloj—la fonto de juneco! Ĝi estas mia—mi eltrovis ĝin—juneco—donu ĝin al mi! Mi ne volas morti! Donu al mi mian junecon—mian junecon!"



Agoniante, li malleviĝis sur la plankon, atakita de apopleksio. Paul, la patro de Edvino, alproksimiĝis kaj aŭskultante lian koron, konstatis, ke Doktoro Roden estas mortinta.



Iom post iom Estelle malfermis siajn okulojn. Ŝi vidis, kvazaŭ en sonĝo, kiel Salva ploras kaj kisas al ŝi la manojn. Iom poste ŝi ekvidis Edvinon, kaj rideto aperis sur ŝia vizaĝo, kaj kvazaŭ aŭdeble, ŝi eldiris, "Mi amas vin, kiso, dancu, manĝu, ne."




SEP BONAJ JAROJ.

POPOLRAKONTO DE I. L. PEREC.
EL "HERALDO DE ESPERANTO"



En iu urbo vivis iam pak-portisto. Tobja li nomiĝis kaj estis granda malriĉulo. Unu fojon, ĵaŭde, li staras sur la vendoplaco, la baskoj de l' vesto enigitaj en la ŝnuroj ĉirkaŭ la lumboj, kaj ĉirkaŭrigardas, de kie venos lia helpo laborgajni por la sabat-elspezoj.[1]) Kaj jen ĉi tie la butikoj estas senhomaj, neniu en- kaj elvenas, neniu aĉetas portotaĵon. Levas li, la bedaŭrindulo, la okulojn al la ĉielo petante, ke li, Dio gardu, ne havu malĝojan sabaton, kaj lia edzino Serel kun la infanoj, Dio ŝirmu, ne malsatu en la sankta tago.



Tiel preĝinte, li eksentas, ke iu ektiris lian baskon. Li rigardas malantaŭen kaj ekvidas antaŭ si hometon, vestitan kiel ĉasisto en arharo, kun plumo sur la ĉapeleto kaj en verda surtuto. Salutas lin la hometo kaj ekparolas jene:

— Aŭskultu, Tobja, al vi estas destinitaj sep bonaj jaroj, sep jaroj de feliĉo kaj bonŝanco, kaj montrezoroj. Dependas nur de vi, kiam vi volas ĝui la bonajn jarojn. Se vi volas, eklumos via feliĉo ankoraŭ en la hodiaŭa tago, kaj antaŭ ol la suno estos subirinta, vi povas aĉeti la urbon kun la ĉirkaŭaĵo, sed post la sep jaroj vi reestiĝos malriĉulo, kia vi estas nun. Kaj se vi volas — la bona kaj benata tempo venos ĉe la finiĝo de viaj vivjaroj, kaj vi foriros de la mondo la plej granda riĉulo.

La hometo estis, kiel pli poste evidentiĝis la profeto Alija, kiu prenis sur sin, laŭkutime, formon de uleto.[2]) Sed Tobja pensis, ke li estas simpla sorĉisto, do li respondas:

— Mia amata hometo, lasu min en paco, ĉar mi estas (ne pri vi estu dirite[3])!) grandega mizerulo kaj senhavulo, mi eĉ ne havas por la sabat-elspezoj, kaj ne povos al vi pagi por la konsiloj kaj penoj.

Kiam tamen la uleto persistis kaj ripetis siajn vortojn unu fojon, du fojojn, tri fojojn, Tobja encerbiĝis kaj respondas:

— Se vi, amata hometo, estas serioza kaj ne mokemulo, kaj se vi demandas min vere, mi devas al vi diri, ke mi kutimas, pri ĉiu afero, min koncernanta, konsultiĝi kun mia edzino Serel kaj sen ŝi mi ne povas doni al vi klaran respondon.

Diras la hometo, ke estas tre bele konsultiĝi kun edzino kaj konsilas al li ŝin demandi, dume li, la uleto, ĉi tie staros kaj estos atendanta respondon.



Tobja ĉirkaŭrigardas refoje, okazon laborgajni li ne vidas; pensas li do, ke nenion li ja perdos hejmenirante. Malsuprenlasas li la baskojn kaj eliras ekster la urbon, kie li loĝas, preskaŭ jam sur la kamparo, en argila kabaneto, priparoli la aferon kun ŝia edzino Serel.

La edzino, lin ekvidinte tra la malfermita pordo, kuris al li renkonte kun granda ĝojo; ŝi pensis, li alportis laborgajnon por ekprepari necesaĵojn al la sabatfesto. Sed li diras:

— Ne, Serel, Dio ne jam okazigis laborgajnon, sed tial venis al mi hometo...


Kaj li rakontas al ŝi, ke la uleto diras, ke estas al li destinitaj sep bonaj jaroj; dependas nur de li, kiam komenciĝu la bonaj jaroj, nun aŭ antaŭ la vivofino. Demandas li ŝin: kiam?...

Serel ekmeditas kaj respondas:

—Iru, mia amata edzo, kaj diru al la hometo, ke vi volas la sep bonajn jarojn ĉi-momente!...

— Kial, Serel? — demandas Tobja mirigita. — Post la sep jaroj ni remalriĉiĝos, kaj al malriĉigito estas ja pli malbone ol al ordinara malriĉulo...

— Ne prizorgu, mia amiko, la mondon. Dume prenu, kion oni al vi donas, precipe kiam oni devas senprokraste pagi ĥeder-monon[4]) por la infanoj. Oni resendis ilin hodiaŭ hemjen. Jen vidu, ili ludas en la sablo!



Tio sufiĉis, ke Tobja rekuru al la hometo kun klara respondo, ke li volas la sep bonajn jarojn tuj, dumparole.

Diras la uleto:

— Pripensu, Tobja, hodiaŭ vi estas homo plenforta kaj povas laborgajni, fojon pli, fojon malpli... Sed kio estos poste, kiam vi maljuniĝos kaj malriĉiĝos, kaj forton labori vi ankaŭ ne havos?

Respondas Tohja:

— Aŭdu, hometo, mia edzino Serel deziras tuj. Unue, ŝi diras, ni ne prizorgu la postan tempon, kaj due, oni hejmensendis la infanojn el la ĥedero.


— Se tiel, — respondas la uleto, — iru hejmen, kaj antaŭ ol vi enkahaniĝos, vi estos riĉiĝinta!

Volas li demandi lin pri post la sep jaroj, sed la uleto dume malaperis.



Iras li, Tobja hejmen. Li loĝis, kiel dirite, ekster la urbo, preskaŭ jam sur la libera kamparo. Alvenas li al la kabano, ekrimarkas la infanojn ludantajn malantaŭ la dometo en sablo. Li aliras, ekvidas, ke ili elfosas el kaveto ne sablon, sed oron, puran oron... Kompreneble, ke tio sufiĉis; jam estis komenciĝintaj la sep jaroj, la sep feliĉaj jaroj...

Kuras la tempo kiel sago el arko, kaj sep jaroj forpasas rapide. Venas post la difinita tempo la hometo al Tobja, sciigi, ke la sep jaroj forpasis, kaj ke hodiaŭ vespere malaperos la oro en la kavo, la oro en la ĉambro kaj eĉ la oro kaŝita ĉe fremdaj homoj...



Renkontas li Tobjan, staranta sur la vendoplaco, kiel antaŭ sep jaroj, kaj atendanta laborgajnon. Diras li: Aŭskultu, Tobja, la sep jaroj estas finiĝintaj!

Respondas Tohja: Iru, sciigu al mia edzino Serel; ĉar la riĉaĵo la tutan tempon estis en ŝiaj manoj.

Eliras ambaŭ ekster la urbon, alvenas al la sama argila kabaneto sur la kampo kaj renkontas Serel antaŭ la pordo. Ankaŭ ŝi estas malriĉe



vestita, tamen ŝia vizaĝo ridetas.

Diras al ŝi la uleto la samajn vortojn, la sep bonaj jaroj estas finiĝintaj!

Respondas ŝi, ke ili entute ne jam ĝuis bonan tempon, ke ili neniam opiniis la oron kiel propraĵon, ĉar, kion homo laborgajnas per siaj dek fingroj, estas lia, kaj riĉaĵo devenanta sen ŝvito kaj penego estas nur garantiaĵo, kiun Dio lasas ĉe homoj en la manoj por malriĉuloj... Ŝi nur prenis el la oro por pagi instru-salajron. La instruo estas de Dio, kaj por Lia instruo decas pagi per Lia oro, plu ne! Kaj se Dio de nun havas pli bonan kaj pli indan garantiaĵ-tenanton por la oro, Li forprenu kaj transdonu al aliulo!

La profeto Alija aŭskultis kaj malaperis. Li raportis tion al la Ĉiela Juĝejo, kaj la Ĉiela Juĝistaro verdiktis, ke malestas pli bona garantiaĵ-tenanto, kaj la sep jaroj ne finiĝis, dum vivis Tobja kun sia edzino Serel.

El la juda, tradukis J. Jurysta.

Rim. de la trad.: 1) Jam ĵaude la judoj preparas festajn manĝaĵojn por sabato, kio kaŭzas pli multe da elspezoj kaj sekve ankaŭ zorgojn por la malriĉularo. 2) Tre ofte, en la popolrakontoj, aperas helpe laŭ diversaj formoj la profeto Alija, kiu estas la patrono de malriĉuloj kaj malfeliĉuloj. 3) Juda parolturno. 4) Ĥedero — malnovsistema lernejo, kie oni lernas nur sanktajn librojn.



LA HEBREINO.

EL "LINGVO INTERNACIA"



—Venĝon, patro! Venĝon! Ĉu tiuj ĉi fieraj blondulinoj povos ĉiam senpune min moki, insulti, malestimi?

Tuta la fajra, blindiganta deksepjarulino tremis pro kolero.

—Estu trankvila, mia filino! Vi estas el malbenita gento. La hebreoj estas malestimataj, sed ilia venĝo trafas certe, malkompate.

—Kaj mi, kiu tiel amas lin!... ĉu sekve ankaŭ mi iam triumfos?

—Jes, mia infano.

—Mi furiozos tiam kontraŭ ili, kiel leono.

—Plibone kiel kobro.

—La piko de tiu ĉi maltrompe mortigas. Sed, patro, leono frakasas, turmentegas ĝismorte sian ĉasaĵon.

—Nu?

—Mi elektas la rolon de l' leono.

* * *



—Sinjoro la barono! Vi deziras prunti monon?

La maljuna hebreo eklevis sian akran rigardon el siaj libroj de kalkulo kaj mediteme ĉirkaŭglitis per la mano sian longan blankan barbon.

—Jen kial mi venis!

—Kiom?

—50,000 frankojn.

—Estas granda sumo.

—Mi devas provizi ĝin, interjetis nerve la juna viro.

—Ĉu ia tiel nomata prohonora ŝuldo?

La barono fiere rektiĝis sin.

—Kion do tio ĉi rilatas al la afero?

—Nu. Kaj la garantio?

—Mia bieno. Ĉu ĝi ne sufiĉas?

—Ne.

—Kial?

—Vi pruntis per la garantio de via bieno pli multe ol ĝia kosto.

—Mi iros do al alia procentegisto.

—Perdita peno, juna viro. Ĉiu el ili konas la aferon.

La barono ekrepaŝetis.—En tia okazo mi estas perdita.

—Ne bezone! Mia filino vin amas.

La barono faris unu paŝon malantaŭen.—Ĉu la hebreo estis freneza? Lia parolo estis tiel stranga.

—Mi venis tien ĉi por negoco, li diris fiere.

—Pri ĝi estas la demando.

—Ĉu vi volas diri?

—Vi bezonas 50,000 frankojn.

—Al viaj fratinoj tamen plaĉas senĉese moki kaj insulti ŝin, la mizeran, enviatan hebreinon.

—Mi al ili diros...

—Aŭskultu, juna viro! Mi havas filinon.

—Veran dolĉulineton, laŭ tio kion mi aŭdis.

—Jes.

—Kie vi prenos ilin?

—Mi havas nenian esperon krom je vi, kiu helpis al mi antaŭe.

Tiu ĉi konfeso videble ĝenis la fieran nobelon.

—Vi ricevos ilin.

—Pro la oferita garantio?

—Ne; kiel doton.

—Ah!

Sveneturniĝis ĉio antaŭ la okuloj de l' barono. Tio estus videbla skandalo. La hebreo sendube estis freneza.

—Kaj via filino...

Oni aŭdis mallaŭtan frapadon sur unu interna pordo.

—Ŝi jam alestas.

Brilanta brunetulino aperis sur la sojlo.

Ekvidinte la junan viron, kiu staris tie rigardante ŝin, ŝia dolĉebela vizaĝo surverŝiĝis per pura ruĝeco, kaj ŝi mallevis konfuze la okulojn.

—Venu tien ĉi, mia infano. La barono Vultur de Laoro petas vian manon.

* * *



—Mia patro!

—Kiel?...

—Nenian vorton, juna viro. Kisu la frunton de via fianĉino kaj iru!

La juna viro meĥanike faris unu paŝon antaŭen, prenis la veluremolan manon, premis unu malpezetan kison sur la pureca frunto, sentis kvazaŭ elektran fajron trakuri sin kaj rapidis tra la pordo.

—Mia patro?

—Vi deziras klarigon, Rebeka?

—Jes.

—La venĝo proksimiĝas.

—Kiel?

—Vi fariĝos baronino Vultur de Laoro kaj triumfos. Ĉu tio ĉi ne sufiĉas?

—Jes; sed kiel li povis...

—Li bezonis 50,000 frankojn.

Akra fulmo elkuris el la brilaj okuloj.

—Ĉu vi vendis min, patro?

—Nenian babilon, mia infano. Vi triumfados; ĉu tio ĉi ne sufiĉas?

—Jes, tio ĉi sufiĉas. Mi triumfados.

Ŝia voĉo sonis surda kaj disrompita.

* * *

—Vi venas pri la mono, barono?

—Ne.

—Kial do ne?

—Mi prosperis trovi ĝin en alia loko.

—Ah!

—Mi venas nun por peti en vero la manon de via filino.

—Kiel?

—Mi amas ŝin per tuta mia animo; jes, mi amas ŝin tiel alte, ke la skandalo, kiun ĝi vekos, havos por mi malpli da graveco ol nenio. Post ke mi



vidis ŝin hieraŭ, ŝia figuro estas...

—Sufiĉas. Mi venigas ŝin.

* * *

—Dio de Izraelo, konsolu min! Mi apartenas al la morto.

La maljuna hebreo svene falis antaŭ la piedoj de l' juna viro. Lia mortanta okulo direktis sin al la alta ĉielo.



Senkonscie la juna nobelo elkuris el la ĉambro kaj supren laŭ la ŝtuparo.

Li envenis en ĉarman buduaron.

Sed tie li haltis, paralizita per teruro.

Korŝiranta sceno!


Rozoj, disŝiritaj... silko... puntoj... kaj sub tio ĉi malviva korpo... apud ponardo... la juna sango gutadis el vundo en la ŝvelronda brusto!

Tradukis el la sveda lingvo P. Nylén.



MARŜADO SUR BRULRUĜAJ ŜTONOJ.

LA MIRINDA SEKRETO DE LA FIĜIANOJ.
El "T. P's. & Cassell's Weekly"
EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



En la Pacifika Oceano kuŝas la insuleto Bega, ne malproksime for de Suva, ĉefurbo de Fiĝio. Ĉi tie vivas la genta familio, kiu sole posedas la sekreton ebligantan al ĝiaj anoj, sur brulruĝaj ŝtonoj marŝi sen ia vundo sur la piedoj aŭ sen suferado de ia ajn ĝeno.

Oni varmigas nombron da grandaj ŝtonoj, ordigante ilin laŭ linio longa ĉirkaŭ 6—7 metrojn, kiel speco de forno nefermita, kaj kiam ili tiel brulruĝiĝas, ke neniu ordinara homo povas ilin tuŝi, unu aŭ plimultaj anoj de ĉi tiu unika familio malrapide marŝas nudpiedaj super ili sen iom da hezito.

Iliaj piedoj, kvankam laŭŝajne ili ne malsimilas al tiuj de aliaj indiĝenoj, tamen suferas nenian difekton pro brulado aŭ bruletigo.

Marŝinte duonon de la vojo, ili metas kelkajn foliojn sur la varmegaj ŝtonoj, trankvile sidiĝas sur ili dum kelkaj minutoj, poste leviĝas kaj finas sian promenadon, kaj neniu povas iel vidi iajn difektojn. Vere mirinda prezentado, kiun ankoraŭ neniu sciencisto aŭ medicinisto klarigis.

Kiel oni ĝin faras? Ilia karno ne bruliĝas aŭ eĉ bruletiĝas, kaj neniu veziketo sin levas, tial ne estas afero sole de nesentado de doloro.

La fiĝianoj havas la sekvantan legendon pri ĉi tio:



En la antikvaj tagoj de la fiĝianoj estis ilia kutimo, dumnokte ĉirkaŭ la fajro sidi kaj rakonti historietojn. Bona rakontisto estis tre favorita kaj ricevis donacojn. Post speciale interesa nokto tiel pasigita, kaj kiam oni estis ĝuinta feston "magiti", la reĝo de rakontistoj sin estis superinta. La superulo estis promesinta al li donacon unikan por la sekvonta mateno. Ĉe sunsubiro je la sekvanta nokto ĉi tiu superulo iris al la bordoj de rivero kie, li sciis, loĝis granda serpento. Tiu ĉi, pensis li, estos bona donaco por la rakontisto. Li ĉirkaŭrigardadis kaj kaptis la serpenton per la vosto, laŭ modo indiĝena. La serpento sin turnis kaj tiel al la superulo parolis: "Kion vi faros kun mi?" La superulo ĝin informis. La serpento insiste protestis kaj petis, ke li lasu ĝin libera dirante: "Se vi min liberigos, mi donos al vi grandan riĉaĵon; vi estos riĉa, ĉar mi scias, kie estas kaŝita trezoro."



La superulo respondis: "Ne, nenio al mi mankas. Mi havas ĝardenojn plenajn je taro, ignamoj, sufiĉan ka-ka (nutraĵon); vi devas veni kun mi."

"Sed", protestis la serpento, "mi faros pli por vi. Se vi sparos al mi la vivon, mi igos ĉiujn virinojn ami vin."

"Ne, ne!" respondis la superulo. "Mi jam havas kvar edzinojn. Mi ne deziras novajn. Ĉesu vi marĉandi!"

Tamen hezitis la serpento kaj denove sin turnis al la superulo kaj anoneis: "Mi igos vin kaj viajn idojn fari ion, kion neniu iam povos fari. Vi kaj via familio povos marŝi super brulruĝaj ŝtonoj kaj vi ne bruligos la piedojn. Ĉi tio estas mirindaĵo, kiun la tuta mondo ne povos elfari. Nur liberigu min — kaj vi vidos!"

Ĉi tiu mirinda, nepriaŭdita elfaro allogis al la superulo; li deziras fari ion, kion neniu alia povus, kaj li konsentis doni al la serpento ŝancon.

La fiĝianoj diris, ke la serpento plenumis sian promeson, kaj tial estas la idoj de la superulo fajromarŝantoj.

Trad. L. E. Thomas.

LA OMARO.

De W. V. Rummel.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"




Juna studento ricevis je sia naskiĝtago de riĉa onklo grandan monsumon kaj decidis elspezi parton por festi la tagon en la plej bona restoracio de la urbo. Enirante li elektis hejmecan, iom krepuskantan angulan lokon, demandis botelon da Rejnvino kaj tiam studadis la manĝokarton. Freŝa omaro estus bonega manĝaĵo, precipe ĉar tiuj ĝuajoj ne estis haveblaj dummilite. Kaj li mendis omaron.

Nura demando okupis lin cetere kelkajn sekundojn. Ĉar li ankoraŭ neniam manĝis omaron, li ne ĝuste sciis kiel konduti sin. Sed jam la unua glaso da Rejnvino forpelis ĉiujn zorgojn. Li klarigis sin, ke li estas sola je la tablo kaj sidas en malhela angulo. Neniu povus rigardi lin. Kaj jam baldaŭ la skarlatkolora pompa omaro estis prezentata.



Dum lia scivola atendado sinjoro kaj sinjorino venis al la tablo, demandis ĉu ankoraŭ estas liberaj seĝoj kaj, aŭdinte jes, ekokupis lokojn kontraŭe de la studento. Li nun estas forte kolerigata kaj ruĝiĝis preskaŭ kiel la omaro. Ne, ĉar la fremduloj ne plaĉis al li, certe ne, estis beletaj homoj, verŝajne junaj geedzoj, kiuj faris la geedziĝvojaĝon, bone aspektanta sinjoro kaj juna, eleganta sinjorino bela, vere bela. Ili ankaŭ observis bonajn manierojn, kune parolis nur mallaŭte, ne trudeme laŭte, ke oni povus kompreni ilin en la tuta restoracio. Mem li, sidinte tiel proksime de ili, ne povis diveni tion kion ili ambaŭ parolis. Ne, li certe ne bezonis kritiki ion. La entruduloj en lia regno nur tial estis malagrablaj al li, ĉar ili nun vidis ĉiujn liajn manuzojn, ĉiujn liajn malspertojn; ĉar sendube la juna paro ne unuafoje kontraŭsidis omaron kiel li.

La studento meditis. Ĉu resendi la omaron, aŭ papere envolvigi kaj kunpreni hejmen por manĝi ĝin tie malvarme? Aŭ ĉu li devas iri al la ĉefkelnero por ke tiu instruu lin kontraŭ modesta kompenso pri la omaro-manĝado? Ambaŭ solvoj ŝajnis malperfektaj al li kaj kun rapida decido, furiozigite, li energie atakis la ruĝan fiomaron centfoje malbeninte ĝin.



Sukcesis pli bone ol li riskis esperi. Precipe kun la vosto li havis feliĉon. Tiu baldaŭ estis rompita kaj rekompencis la laboron. Pli malfacile jam estis kun la tondiloj. Tio estis turmentaĵo, ekĝemado! Splitis kaj ŝprucis. Gutis same kiel plensuka, tropika frukto. Ŝajnis, ke la okuloj de la paro kontraŭen pligrandiĝis. Sed helpis nenion, nun li devis finiĝi la malagrablan aferon.. Kaj li ne persistis, kvankam omarsaŭco kovris liajn manojn. Kun la ruĝaj gamboj li pli bone sukcesis, eltiris kaj elsuĉis ilin senpene. Sed la internaĵo de la fibesto igis denove al li penplenan laboron. Kelkparte ĝi estis manĝebla, kaj ofte li malgustumis kaj diskrete disigis eron en la buŝo. Lia vizaĝo pli kaj pli ruĝiĝis. Fine, mordante ion amaran, verŝajne la galon, li ekfinis tiam laboraĉon, zorgeme purigis la manojn, ekŝovis la pladon flanken kaj englutis glason da vino per unu tiro. Fiere kaj bonhumore li ĉirkaŭrigardis, feliĉiĝinta per la fino de la vana laboro.



La juna paro ĝis nun daŭre rigardis la gustemulon, forgesinte pro la spektakla manĝado sin mem kaj ilian malsaton. Sed nun estis tempo priparoli la dezirojn rilate al la propra manĝaĵo. Mallaŭte ili parolis tiel, ke la studento komprenis ĉiun vorton. "Lolo," diris karese la edzo, "nun ni vidadis kiamaniere oni manĝas omaron, certe ni ankaŭ povas fari tion nun. Ĉu vi deziras, ke mi mendu?" "Pro Dio, ne, Arthur", ektimigite ŝi respondis. "Por mi jam sufiĉas la rigardo. Estas ja terure, sennome. Omara manĝaĵo devus esti

police malpermesata en ĉiu publika restoracio."

El germana, de Theo. Hollenbeck.



EL LA LIBRO DE MIAJ FABLOJ.

EL "LINGVO INTERNACIA"



En Egiptujo, en tempoj de tebaj Faraonoj, ia transveturanta juna fakiro aranĝis al la loĝantoj amuzadon... En valo, pli belega ol la valoj de Eŭfrato, li faris per ia sorĉo lagon, plenan je larmoj de mizeruloj kaj malliberuloj, je larmoj de maljunuloj kaj infanoj, je larmoj de vidvinoj kaj orfoj... Kaj, pleniginte tiun ĉi lagon ĝis la bordoj, la fakiro restigis ĝin por mirigo de saĝuloj...

Sur tiu ĉi lago, ĉe brilo de luno, ĉe sonoj de harpoj kaj lumo de multkoloraj fajroj, en ĉiu festo la ŝipetoj de Faraonoj naĝadis kiel blankaj cignoj. La ĥoroj de najtingaloj, disĝemataj per ameca kanto, traplenigadis per sonetoj la aeron, plenan je bonodoro kaj varmeto... Malsobrigitaj per sorĉo de belegaj noktoj, la kapoj de l' egiptanoj alkliniĝadis al la revoj pri la superteraj landoj de beleco kaj poezio, de feliĉo kaj volupto... La luksaj ŝipetoj naĝadis trankvile kaj majeste sur la vitra maso, sur la bruetanta kaj murmuranta kristala ondo, tiel mallaŭta kiel respiro de mizerulo, kiel tombo de homa feliĉo.

Tie kaj ie la mano de petolanta infano ĵetadis en tiun ĉi akvon belegajn rozojn; la rozoj tuj paliĝadis... Kiam iu trempadis okaze la randon de sia multekosta vesto en la lagon — sur la vesto restadis makulo... Virino, varmigita per narkotikoj de ĉirkaŭprenoj, volis estingi la soifon de la flamanta buŝo per la fluidaĵo de l' lago, sed vane...

Tio ĉi fine ekkolerigis la Faraonojn, incitis la homojn, kiuj deziris malsobron. Oni alvokis alian maljunan fakiron, por ke li elsekigu la sorĉan lagon.

"Ekzistas nur unu rimedo necerta, — diris li, klinante humile la kapon, oni povas elsekigi la lagon sole per oro!"

Kaj alvenadis multehavantaj riĉuloj kaj ĉiu ĵetadis en la lagon pecon da oro...

Kaj alvenadis pli malriĉaj kaj du aŭ tri el ili kolektadis unu moneron...

La lago restis.

Tiam el la tuta Egiptujo oni alvokis amasojn da popolo kaj ĉiu, kiu povis, ĵetadis oron en la lagon.

Sed la larma lago ne sekiĝadis.

Kontraŭe. Ju pli da oro oni ĵetadis en ĝin, des pli leviĝadis la nivelo de l' lago, ĝis fine la akvo eliris super la bordoj, superverŝante la valojn de la tuta Egiptujo.

Kaj de malproksimo rigardis tion la sfinkso, ŝtona, malvarma kaj senmova. Kvankam ĝi ĉiam estis silentanta kaj plena de enigmo, — nun tamen ĝi diris:

"La elverŝitajn larmojn neniu viŝos neniam!".

Tiun ĉi fablon nuntempaj homoj tradukis en siajn lingvojn kaj — strange — ĉiuj donis al ĝi la saman titolon: filantropio.

Mirinde!... **Jozef Wasniewski.**



LA VIVO.

EL "VERDA STELO"



Mi renkontis knabinon; ŝiaj nigraj haroj brilis kiel lako japana, miozotbluaj okuloj demandis: „Ĉu vi venas kun mi?"


„Mi ne povas," mi flustris, „pardonu, mi ne povas. En la montoj estas printempo, kaj mi devas admiri la florantan naturon. Mia animo kantos la plej belajn kantaĵojn, vidante la fumantajn valojn kaj la leviĝantan sunon. Mia animo estas gracia kaj deziras kantadi la solecon. Pardonu, mi ne povas!"



La tempo pasis ... Kaj denove mi renkontis belan knabinon; ŝiaj brunaj haroj posedis la koloron de kaŝtanoj; la okuloj, kiuj promesis grandegan amon, logis: „Venu, venu kun mi!"

„Pardonu," mi ĝemis, „mi ne povas. Mi havas hejme multegajn, dikajn librojn kaj mi ankoraŭ ne scias, kio estas en ili. Oni diras, ke oni povas trovi en ili multe da saĝeco kaj beleco. Tre volonte mi volus akompani vin tra la vivo, tre volonte; sed mi devas legi hejme la dikajn librojn ... "

La tempo pasis... Mia animo ne kantis plu melodiojn al printempo, ĝi fariĝis muta... Hejme mi ne havis plu dikajn librojn legotajn, mi jam delonge finlegis ilin. En mia animo regis soleco, hejme kriis en ĉiuj anguloj la malpleno; mia vivo estis malĝoja, malgaja kaj soleca.



Ankaŭ nun mi renkontis belan knabinon; ŝia kapo estis pli kliniĝema ol la kolo de l' cigno, la okuloj estis nigraj simile al la malhelega nokto la haroj memorigis pri la plumaro de l' korvoj.

„Venu kun mi!" mi petis. „Plibeligu mian vivon!"

„Pardonu, mi ne kuniros," ŝi respondis, „vi jam estas maljuna."

Esperantigis Fr. Mimler.



AMO.

El pola poeto Kazimierz Tetmajer.
el "Lingvo Internacia"



Ŝajnis al mi, ke mi vidis ĉiujn horojn, kiujn mi havas ankoraŭ transvivi, flugantajn malrapide antaŭ miaj okuloj, kiel amaso da laroj (Larus, lat.) en la momento de foriro de l' suno, kiam la tago estas varmega...

Komence la blankaj flugiloj de ĉiuj horoj de mia vivo estis makulitaj per sango, per mia propra sango; sole unu, la lasta, havis flugilojn blankajn kaj purajn.

Tiam mi ekpensis, ke mi havos almenaŭ la morton dolĉan kaj trankvilan...

Jen subite alvenis ŝi, tiu ĉi virino, kiun mi amas, kaj ekvidinte horojn, kiujn mi havas ankoraŭ transvivi, ke ili estis ĉiuj sangitaj kaj nur la lasta estis blanka kaj pura, — ŝi diris:

— Mi volas, ke tiu ĉi estu ankaŭ tia, kiel la aliaj.

Mi ne demandis ŝin: kial?

Kaj poste ŝi diris:

— Sed el kie preni la sangon?...

Tiam mi montris al ŝi mian koron kaj donante al ŝi ponardon, mi diris:

— Ekbatu!

Kiam ŝi levis la manon por ekbati, mi pensis nur, ĉu mi scios sufoki ĝemon por ne ektimegigi ŝin, kaj kiam ŝi ekbatis, kvankam la doloro estis freneza, mi ne ekĝemis.

La sango, kiu elŝprucis el mia koro, ekmakulis la flugilojn de la lasta horo de mia vivo, flugilojn blankajn kaj purajn. Tiam mi ekpensis, ke mi havos ankaŭ eĉ morton maldolĉan kaj teruran, sed mi ne demandis, kial tiu ĉi virino tiel faris al mi.

Ŝi volis tiel — kaj mi amas ŝin... Trad. J. W.



LA SANKTEJO DE LA SCIO.

El Lingvo Svida.
el "Lingvo Internacia"



Sur senfina ebenaĵo, norde limigita de alta monto, aperis juna viro, rapide migranta antaŭen en la unuaj radioj de l' matena suno.

El la arbetaĵoj, kiuj staris surŝutitaj per neĝfalo de blankaj floroj, el la arboj, sur kies branĉoj tremadis la unuaj delikataj folioj, alvenis al li odoro de floroj kaj kantado de birdoj.

Sed la juna viro estis indiferenta al la beleco de l' tero kaj rapidigis sian iron, firme direktante ĉiam la rigardon al la celo antaŭ li.

Iam post iam li murmuris: "Ne, mi ne trompas min; tie supre estas la sanktejo de l' scio".

Li iris antaŭen tra vilaĝoj, kie la vilaĝanoj vivadis sian simplan vivon; li iris tra popolriĉaj urboj en la tempo, kiam la laboristo rekomencas sian bataladon pro la pano, sed li nenie restis.

Li migris antaŭen inter homaj loĝejoj, kie loĝas nekonataj estaĵoj, li iris antaŭen sen permesi haltigi sin de la alvokantaj malfeliĉuloj. Li ne retenis sian rigardon ĉe la ĝojo de la homoj pli, ol ĉe iliaj malĝojoj, kaj liaj lipoj ripetadis: "Supren, supren!"

Kiam li venis trans la vasta ebenaĵo, la monto, kontraŭ kiun li estis migranta, leviĝis alta kaj superpotenca antaŭ li, kaj ĝia supro malaperis en malluma nubo.

En tiu momento lia vojo estis krucata de maljunulo, kiu tiregis al sia pajlo-tegmenta dometo faskon da hejtaĵo, tro multepezan por lia klinita dorso. La maljunulo apogis sin al ŝtona muro por repreni la spiron kaj lia frunto, malseka pro ŝvito, rakontis pri longa vivo da ĉagrenoj.

Li tre deziris komenci interparolon kun la migranto, sed tiu ne respondis lian humilan saluton. Li eĉ ne rimarkis lin. Lia rigardo estis direktita al la altaĵo.

Kaj li ĉiam ripetadis: "Supren, supren!"

Kiam li atingis la piedon de l' monto, li ekhaltis por ĉirkaŭrigardi. Intencante ekdaŭrigi sian migradon, li ekvidis fonton, kiu elfluadis inter du ŝtonegoj. Juna knabino staris apude, atendante ĝis ŝia poto pleniĝos. Ŝi mallaŭte kantis, kaj ŝia klara

voĉo miksiĝis kun la boletado de l' akvo. Li petis trinkaĵon. La bela knabino transdonis al li la poton per siaj blankaj manoj. Dum li trinkis, ŝi diris: "Ripozu ĉe mi. Mi por vi kantos".

Sed li ekleviĝis, severe dirante: "Mi iras al la sanktejo de l' scio, supren, supren!" Kaj li rekomencis la malfacilan suprenpaŝadon. Jaroj pasadis, kaj ju pli li iris supren, des pli la monto fariĝis nuda. Ĝi nun estis surŝutita per disaj ŝtonoj, kiuj ruliĝis kontraŭ la ŝtonegoj.

Poste sekvis la glacio, la neĝo eterna, la mortiganta nebulo...

Sed la migranto estis persistanta. Li maljuniĝis, kaj li sentis, ke la vivo kun ĝia celo baldaŭ forkuros de li. Liaj manoj kaj genuoj sangis, li tremis pro malvarmo, li apenaŭ povis spiri en la aero maldensa. La suno estis baldaŭ subironta, sed li ĉiam ripetadis: "Supren, supren!"

Fine do li estis supre. Tute malgranda plato formis la supron de la monto. Dum li ĉiuflanken rigardis, serĉante la sanktejon de l' scio, tiun sanktejon brilantan, kiun ĉe l' ekstrema horizonto li tiel ofte rigardis de malsupre, tiam viro kun longaj blankaj haroj duone sin levis de ŝtonego, sur kiu li kuŝadis, dirante per sensonora voĉo al la migranto:

"Malsaĝulo! Vi[illegible] mi, volis atingi la sanktejon de l' scio. Ne [illegible]as io tiela, aŭ, pli ĝuste, ekzistas tielaj sennombraj, kaj vi preteriris ilin. La sanktejoj de l' scio estas malsupre, sur la ebenaĵo, kiun vi forlasis. Ĝi estas la loĝejo de l' homoj."

Sed la migranto ne estis konvinkita.

"Kaj la senco de l' vivo?" li demandis.

"Ĝi enhaviĝas en la vivo", respondis la maljunulo. "Amu kaj suferu, kaj vi lernos ekkoni ĝin."

"Kaj Dio?"

"Li troviĝas tie malsupre en la amaso, ĉie, kie brilas la fajrero de la bono kaj flamas la sankta flamo de la memrifuziĝo. Returniĝu tien, de kie vi venis, se ankoraŭ por tio estas tempo. Mi estas tro maljuna. Mi restadas tie ĉi por averti viajn fratojn."

Kaj sufokante ĝemon, la migranto kun mallevita kapo komencis depaŝi la monton. Ĉe gia piedo li denove renkontis la junan knabinon, ĉiam egale sanan, ridetantan. Sed dum ŝi konservadis sian junecon, li perdis la sian, kaj ŝi ne petis lin aŭskulti ŝian kantadon.

Nur la maljunulo, kun la dorso kurbita sub la portaĵo, rimarkis la migranton kaj ree salutis lin.

Tiun ĉi fojon li ekhaltis.

"Aŭdu, — li diris, — mi helpos vin".

Kaj li deprenis la multepezan portaĵon de la dorso de l' maljunulo.

En la sama momento, kiam li levis ĝin, malfermiĝis liaj okuloj. Li ekkomprenis la sencon de l' vivo, ekkonis la scion kaj ektrovis Dion.


Tradukis P. Nylén.



KONTENTA HOMO.

De I. S. Turgenev.

EL "LINGVO INTERNACIA"



Laŭ la strato de la ĉefurbo rapide iras saltetante juna ankoraŭ homo. Liaj korpomovoj estas gajaj, vivaj; la okuloj brilas, la lipoj ridetas, la ravita vizaĝo agrable purpuriĝas... Li la tuta estas kontento kaj ĝojo.

Kio okazis kun li? Ĉu li ricevis heredon? Ĉu oni plialtigis lian rangon? Ĉu li rapidas al la renkonto kun sia amantino? Aŭ, simple, li bone matenmanĝis, kaj la sento de l' sano, sento de l' sata forto komencis ludi en ĉiuj liaj membroj? Ĉu, eble, oni metis sur lian kolon vian belan okangulan krucon, ho pola reĝo Stanislavo? (Rusa ordeno).

Ne. Li elpensis kalumnion pri la konato, vastigis ĝin peneme, ekaŭdis ĝin, tiun ĉi saman kalumnion, el la buŝo de alia konato—kaj li mem ĝin **ekkredis.**

Ho, kiom kontenta, kiom eĉ bona estas en tiu ĉi momento tiu ĉi aminda, esperinda junulo!

Tradukis V. Halperin.



VIVO EN MORTO.

De Mathilda Roos.

EL "LINGVO INTERNACIA"



Silenta, silenta estis arbaro, tiel silenta, ke mem la nemovo fariĝis mistera ekzistaĵo, kiu ĉirkaŭis migranton sur la mallarĝaj, glitaj vojetoj. Nur el profundo de l' arbaro, kiun kovris per sia krepusko la mallumа novembra tago, eliris iam post iam malcertaj sonoj, ia mallaŭta bruo inter l' arbetaro, ia murmureto tra la branĉoj de l' arboj, miraj, sopirantaj sonoj, similaj al melankoliaj sonĝoj de l' naturo en aŭtuna mallumeto... Inter senfoliaj branĉetoj de l' betuloj faladis flokeroj de neĝo, grandaj, malpezaj, kaj malrapide ili kovris la fundon per sia blanka, mola, aera kovrilo. Tie kaj alie aperis tra la nudaj arbkronoj peceto

de ĉielo, tiel mallume plumbgriza, ke neĝflokoj kontraŭ ĝi ŝajnis preskaŭ brile blankaj. Sed sur branĉoj de l' abioj kuŝiĝis neĝo firme, kaj tiris blankajn strekojn sur mallumeta verdaĵo...

Estis la unua neĝo, kiu falis; estis la vintro, kiu migris super kampo kaj arbaro por preni la posedon de sia regno; estis premanta malkonscio, kiu alproksimiĝis al l' naturo por kovri ĝin per ripozo kaj morto...

Estis tempo de mallumo kaj silento, kiu komencis; estis longaj vintraj noktoj kun tombsimila trankvilo tie, kie antaŭe ĉarma vivo de printempa nokto iam bruis, estis la nebulaj tagoj, kiam l' arbaro silentas — estis tiu fabelo de l' pereo, kiun la unua neĝo ŝajnis rakonti en malbela novembra vespero.

Sed dum mi staris kaj per rigardo penseme sekvis la flokojn de neĝo kaj dum la melankolio de l' arbaro plenigis mian animon per penso pri fino kaj morto de ĉio, — tiam subite mi ekaŭdis en apuda arbo sonon de pepanta birdo. Mi eksaltetis, levis la kapon kaj aŭskultis. La eta birda pepado sonis mallaŭte kaj malcerte, sed ripetiĝis fojo post fojo senlace kaj eĉ leviĝis iam ĝis alta, klara tono.

Longan momenton mi restis senmova, aŭskultante kantiston super mia kapo; iom post iom disiĝis la melankoliaj pensoj, kiuj ĵus plenigis mian animon, kaj aliaj sentoj, aliaj imagoj, naskitaj per birda pepado tie supre, nun komencis vekiĝi ĉe mi.

Estis mesango*), kiu pepis, la mesango, la plej frua de niaj arbaj kantistetoj, kiu jam en novembro komencas sian printempan kantadon. Estis printempa ĝojo meze en vintra melankolio, estis sonĝoj el longaj lumaj noktoj kun amasoj da migrantbirdoj super florantaj pomujoj, sonĝoj el verdaj arbaretoj, el odorantaj kampoj, kiuj nun flugadis ĉirkaŭ mi, dum falis la unua neĝo, dum krepusko grandiĝis, dum vento kuris frosta super defalĉigitaj kampoj...

Ia mira, forta sento de ĝojo min trakuris; mi derompis branĉeton el betulo, en kiu sidis pepanta la birdeto, kaj je ekmalaperanta taglumo mi vidis, ke estis jam ornamita la branĉeto per grandaj svelantaj "pendaĵoj"**)... Kaj kiam mi disrompis unu el tiuj pendaĵoj, renkontis mian rigardon viva, suka verdaĵo, freŝa, forta, printempa ĝermo, kiu vivis kaj kresketis en vintra nekonscio!

Kiel nedireble granda kaj mira! Kiam naturo kuŝas en plej profunda trankvilo, en sia **morto,** kiel ni diras, tiam ekbolas jam la fortoj de l' vivo, tiam ekburĝonas la printempo, kaj malpaciencaj, sopirantaj voĉoj ĝojege kantas printempan kanton pri suno kaj floroj!...

Tiaj imagoj min prenegis; mi havis la samtempe liberantan kaj paralizantan senton, kiu nin prenas kiam io, ofte nur eta okazaĵo, nin movas per venteto, tiel diri, de eterna profundo el la grandaj misteroj de vivo. Kiel solena murmureto bruis tra mia animo en tiu ĉi momento **la mistero de l' reviviĝo.** Mi komprenis, ke en vero ia morto ne ekzistas, ke ĝi nur estas nomo de ia okaza formo, ke en tomba silento kaj sub neĝa kovrilo nur estas **trankvilo,** ne morto, ke tio ĉio nur estas tributo al la leĝo pri la ŝanĝado de l' fortoj, dum la semoj de vivo ĝermas kaj la korpo pretiĝas por la mateno de printempo kaj reviviĝo.

Kaj dum la neĝo falis pli kaj pli dense, dum krepusko profundiĝis, dum sopiroj de l' vento tremis en supraĵoj de l' arboj kaj la morto de l' naturo fariĝis pli kaj pli vera por miaj eksternaj sentoj, dum tio mi tamen sentis en mia animo ke ĉio vivis meze en la morto, ke potencaj kaj bolantaj fortoj jam laboris en kaŝita laborejo de l' vivo, por ke ili preparu la naturon al la granda tempo de renoviĝado!... Kaj per la sentoj de mia animo mi vidis la grandan neŝanĝeblan, belan iradon de l' vivo, mi aŭdis en silenta novembra krepusko kvazaŭ eĥon de l' kanto de centjaroj pri nemortebleco, eĥon de la himno, neniam interrompita, kiun kantadas la naturo al **Li,** li kiu en sia mano tenas ĉiun fadenon en la senfina teksaĵo de l' mondĉio.

—t.

*) *Parus major.* Rimarko de l'red.

**) La floraro de betulo. Rim. de l' red



LA MALSAĜULO.

De J S. Turgenev.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Estis iam malsaĝulo. Longe li vivis gaje kaj senzorge; sed iom post iom liajn orelojn atingis la famo, ke oni lin ĉie konsideras sencerba malsaĝulo.

Konfuziĝis la malsaĝulo kaj komencis pripensi, kiamaniere haltigi tiun malagrablan famon.

Fine subita ideo lumigis lian malluman intelekton... kaj, ne perdante tempon, li realigis ĝin.

Lin renkontis surstrate konato—kaj komencis laŭdi faman pentriston...

"Tiu pentristo jam delonge malmoderniĝis. Ĉu vi tion vere ne scias? Mi ne atendis tion de vi... Vi estas tre malprogresema."

La konato ektimis — kaj tuj konsentis kun la malsaĝulo.

"Kian belan libron mi hodiaŭ legis!" alia konato al li diris.

"Kion vi babilas!" la malsaĝulo ekkriis. "Ĉu vi ne hontas? Nenion valoras tiu ĉi libro. — Ĉu vi vere tion ne scias? — Vi restis tro malantaŭe."

Ankaŭ ĉi tiu konato ektimis kaj konsentis kun la malsaĝulo.

"Kia bonega homo estas mia amiko N. N.!" tria konato diris al la malsaĝulo. "Jen vere nobla animo!"

"Kion vi babilas!" la malsaĝulo ekkriis. "N. N. estas ĉiekonata malnoblulo! Li rabumis sian tutan familion. Ĉiu scias tion. Vi restis tro malantaŭe."

Same la tria konato ektimis kaj konsentis kun la malsaĝulo kaj sin deturnis de sia amiko. Kaj kiun — kaj kion ajn oni laŭdis antaŭ la malsaĝulo —, por ĉio li havis la saman respondon.

Nur de tempo al tempo li riproĉe aldonis: "Ĉu vi ankoraŭ kredas je aŭtoritatoj?"

"Malica! Gala!" la konatoj komeneis diri pri la malsaĝulo. "Sed kia cerbo!"

"Kaj kia parolo!" aliaj aldonis. "Ho jes, li estas talenta!"

La afero finiĝis per tio, ke eldonanto de gazeto invitis la malsaĝulon redakti la kritikan fakon.

Kaj la malsaĝulo komeneis kritikadi ĉion kaj ĉiujn, ne ŝanĝante sian manieron, nek siajn interjekciojn.

Nun, iam kondamninte la aŭtoritatojn, li mem estas aŭtoritato, kaj la junuloj admiras lin — kaj lin timas.

Kaj kion alian ja faru la kompatindaj junuloj? — Kvankam oni ĝenerale ne devas admiri, tamen en ĉi tiu okazo, se vi kuraĝas, vi ne admiru lin: vi tuj troviĝos inter la malprogresintoj.

Al la malsaĝuloj oportune estas inter timantoj.

El rusa lingvo, trad. Asen Grigorov.



LA PASERO.

DE I. S TURGENEV.

EL "LINGVO INTERNACIA"



Mi estis revenanta el ĉaso kaj iris tra l' aleo de la ĝardeno. La hundo kuris antaŭe.

Subite ĝi malgrandigis siajn paŝojn kaj komencis ŝteliĝi, kvazaŭ eksentinte antaŭ si ĉasaĵon.

Mi ekrigardis laŭlonge la aleon kaj ekvidis junan paseron kun flavaĵo ĉe l' beko kaj kun lanugo sur la kapo. Ĝi falis el la nesto (la vento forte balancadis la betulojn de l' aleo) kaj sidis senmove, disstariginte senhelpe la flugiletojn, kiuj apenaŭ elkreskis.

Mia hundo malrapide proksimiĝis ĝin, kiam subite, ĵetinte sin el la proksima arbo, maljuna nigrobrusta pasero falis kiel ŝtono antau la vizaĝego mem de l' hundo,—kaj, malordiginte la plumojn, aliigita, kun malespera kaj mizera pepado saltis du fojojn kontraŭ la dentita malfermita buŝego.

Ĝi ĵetis sin por savi, ĝi kovris per si mem sian idon... sed la tuta malgranda ĝia korpo tremis pro teruro, la voĉeto sovaĝiĝis kaj raŭkiĝis, ĝi perdis fortojn, ĝi sin oferis!

Kiom grandega monstro devis ŝajni al ĝi la hundo! Kaj tamen ĝi ne povis resti sur sia alta, sendanĝera branĉeto ..La forto, pli potenca ol ĝia volo, ĝin ĵetis de tie.

Mia Trezoro ekhaltis, reiris... Ŝajne tiu ĉi ankaŭ konfesis tiun forton.

Mi rapidis devoki la konfuzitan hundon—kaj foriris, estimegante.

Jes, ne ridu. Mi estimegis tiun malgrandan heroan birdon, ĝian aman atencon.

La amo, mi pensis, estas pli forta ol morto, ol timo je l' morto. Sole de ĝi, de la amo, estas tenata kaj movata la vivo.

Tradukis V. Halperin.



LA OKULOJ DE LA VINKO.

ORIGINALA FABELO DE LUCY DOKMAN.

EL LA GAZETO "ESPERANTO"


Ho, tiuj okuloj de la vinko!

Sufiĉas rigardi ilian ĉielan lazuron, por ke oni divenu tutan profundon de la animo, kiu en ili spegulas. Kaj kiam la palpebroj karese mallevas sin sur tiuj okuloj, oni vidas ankoraŭ, inter la okulharoj, luman kaj karesan radion kvazaŭ la suno trairas blankan nubon.

Se ili ploris, se ili verŝis maldolĉajn larmojn, estis nur por refreŝiĝi, por ke ilia ĉiela lazuro iĝu pli brilega.

Ho, tiuj okuloj de la vinko!

Mi devas nur fermi la miajn, kaj mi sentas ilian rigardon plenan de amemo, mi devas nur teni en miaj manoj tiujn malgrandajn florojn, kaj tuj en mia koro kantas maljuna legendo, kiun mi neniam aŭdis, sed kies sekretan ritmon mi povis ekkapti, kiam mi renkontis sur mia vojo tiujn okulojn de la vinko!



Estis iam, antaŭ longe, tre longe, juna princino, kiu loĝis en bela kastelo. Ŝi havis nigrajn okulojn, kaj nigrajn harojn, ŝia nomo estis Eleno, kaj ŝi estis pli bela ol Amoro. Tuta ŝia vivo estis kvazaŭ mirteatraĵo:—kion ajn ŝi volis, ŝi ĝin havis tuj.

Ŝia kastelo estis granda, pli blanka ol neĝo, en la ĝardeno kreskis mirindaj maloftaj floroj. Ĉiuj tagoj, oni inventis por ŝi novajn distraĵojn kaj novajn plezurojn, malfrue, en la nokto, belaj princoj venis sub ŝian fenestron kaj kantis amajn poemojn.

Tamen, la princino Eleno ne estis feliĉa. Ofte el ŝiaj nigraj okuloj elfalis maldolĉaj larmoj, ĉar ŝia koro estis anĝela koro kaj suferis pro la homara mizero. Ŝi volis foroferi sian vivon por la tutmonda feliĉo.

Ofte ŝi forkuris el la kastelo, kaj iris de domo al domo, donante al la malriĉuloj kaj al la malsanuloj monon kaj florojn. Ĉie ŝi postlasis ĝojan memoron, ĉie, ŝia nomo estis benata. Kaj tio daŭris longe, tre longe.

Ho ve, venis tago, kiam la princino Eleno havis nenion por doni; ŝi elspezis ĝis la lasta monero kaj derompis ĝis la lasta floro de sia ĝardeno.

Tiam ŝi iris al la preĝejo kaj komencis preĝi Dion.

"Dio", petegis ŝi, "donu al mi multe, multe da oro, ne por mi, sed por aĉeti panon al la malriĉuloj. Donu al mi multe, multe da floroj, ne por mi, sed por doni ilin al la malsanuloj."

Dum ŝi preĝis surgenue antaŭ la altaro, anĝelo blankvestita aperis al ŝi.

"Eleno", diris li, "Dio aŭdis vian preĝon, kaj ĝi estos plenumita. Malnodu vian nigrajn harojn, ili alikoloriĝos en oraj haroj; ridetu, viaj okuloj fariĝos bluaj, kaj el ĉiu de viaj ridetoj du vinkoj aperos. Tiel vi ĉiam havos oron kaj florojn, ĉar via koro estas bona."



La anĝelo malaperis. Kiam la princino Eleno foriris el la preĝejo, ŝiaj haroj estis pura oro kaj ŝiaj okuloj estis bluaj. Denove ŝi povis helpi al la malriĉuloj: ŝi eltiregis la harojn unu post la alia, kaj aliaj haroj anstataŭis tuj. Ŝi ridetis, kaj du vinkoj falis el ŝiaj okuloj.

Nun ŝi estis feliĉa, ĉar vere la sola feliĉeco estas fari la aliajn feliĉaj.

Tio okazis antaŭ tre longa tempo, kaj tio estas nur fabelo.

....

Unu tagon, sur mia malhela vojo, sub la ĉielo plena de ventego kaj minaco, mi renkontis alian princinon Eleno, kaj sondante tutan profundon, tutan senliman bonecon de ŝia animo, kiun spegulas ŝiaj vinkaj okuloj, mi sentas, kiom ajn forta estas la ventego, kiu minacas nin, la suno tamen fine trairos la nubon, kaj, kiam oni vidas nur dornarbustojn, oni subite rimarkas malgrandan kaj helan vinkon, kiu estas kreskanta ĉe la bordo de la abismo...

DU NAJBAROJ.

KAŬKAZA RAKONTO.
EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Estis du najbaroj — unu riĉa, alia malriĉa. Foje la lasta venis al la unua kaj petis doni al li unu el liaj grandaj kaldronoj: tiu sulkiĝis sed donis. Post iom da tempo la malriĉa kamparano alportis al la riĉa lian grandan kaldronon kaj krom ĝi ankoraŭ malgrandan. — "Kio estas tio?" demandis la riĉa homo. — "Via granda kaldrono naskis tiun ĉi malgrandan", modeste respondis la malriĉa najbaro, "tio estas ido de la granda kaldrono kaj sekve ankaŭ apartenas al vi, kiel ĝia patro."



La riĉa homo ekmiris pro la naiveco kaj malsaĝeco de sia malriĉa najbaro, sed ne diskutis kaj prenis ambaŭ kaldronojn.

Poste la malriĉa najbaro duan fojon venis al la riĉulo kaj petis denove la grandan kaldronon. La riĉulo jam ne sulkiĝis kaj volonte donis ĝin, esperante poste ricevi du kaldronojn anstataŭ unu. Lia espero efektiviĝis kaj post ioma tempo li denove ricevis la patron — grandan kaldronon kaj ties idon — la malgrandan...

Kompreneble li tuj kaj kun granda plezuro donis al sia malsaĝa najbaro la saman grandan kaldronon, kiam li petis ĝin trian fojon. Sed pasis kelke da tagoj; pasis unu, du semajnoj, tamen la malsaĝulo ne venis kaj ne portis la kaldronon al ĝia posedanto. Tiam la riĉulo mem iris al li kaj postulis redoni lian propraĵon. La malsaĝulo aplaŭdis per la manoj kaj malĝoje ekkriis: "Ho, kia malfeliĉo! ĝi ja mortis!" — "Ne ŝercu, malsaĝulo!" ekkoleris la riĉulo: "Kiel la kaldrono povas morti?" — "Kial do ne?" respondis la malsaĝulo, "vi ja kredis du fojojn, ke ĝi naskis idojn! Kial do nun vi ne kredas, kiam mi diras, ke ĝi mortis?!" respondis kun rideto la malriĉulo...

A. P. Andrejev. Tiflis.

LA TERURO.

MINIATURO DE V. A. TIĤONOV.
EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Min persekutis iuj timigaj monstroj, grizaj, longharaj kaj senformaj. Ili kaptadis min per la longaj manegoj, penadis subpremi min sub sin, kaj mi ne povis forkuri... Miaj piedoj dronis en

io mola, la manoj estis kunvolvitaj. Mi penis ruliĝi, min turnis de unu flanko sur alian flankon; la bruston io premis, la spirado senĉese interrompiĝis. Griza mola krepusko ĉirkauis min. Mankis aero... Kaj la monstroj plialproksimiĝis, plipremis.

Mi konsciis, ke tio estas nur sonĝo; sed estis terure — terure pro tio, ke mi ne povis vekiĝi. Mi deziris ekkrii kaj ne povis. Mi volis movi la manojn; sed, kunvolvitaj per la litkovrilo, ili ne estis moveblaj. Mi komencis stertori, streĉis la muskolojn kaj... vekiĝis.

La unua afero estis ekspiri. Sed mi ne povis fari tion tuj. La spirado interrompiĝis, sur la brusto kuŝis io multpeza. Fine mi min turnis sur la flankon kaj etendis la tremantan manon al la noktotablo, por trovi alumetojn. La fingroj palpadis en la mallumo, kunpuŝiĝante kun horlogo, kun glaso da akvo, sed alumetskatoleton ne trovis. Kaj mi plu ne povis elteni la mallumegon, min ĉirkaŭantan.

Sed jen sub la fingroj eksusuris la skatolo. Mi prenis ĝin, supreniĝis je la kubuto, elprenis la alumeton, frotis... La alumeto ekbrulis. Mi aŭdis, ke ĝi brulas, mi sentis tion, sed... lumo ne estis. Mi sentis per la fingrekstremaĵoj la varmeeon, jen — jen, ŝajnis al mi, la fajro bruligos ilin, kaj tamen la mallumo ne malaperis. Teruriga penso trapikis la cerbon: Mi blindiĝis!

Terurego kaptis min. Malvarmo tremigis mian korpon, io premis la tempiojn, mi faris la penegon por salti for de la lito kaj... vekiĝis.

Mi ekspiris. Dankon al Dio, tio estis nur sonĝo! Sed kiel terura ĝi estis! Kiel ĝi disbatis min tute. La ŝultroj kaj piedoj doloris... Sed tamen mi spiras, mi estas vivanta!... Plej rapide forpeli la mallumon de l' nokto! Mi kliniĝis super la noktotablo kaj preskaŭ tuj trovis la alumetskatolon. Mi frotis unu el la alumetoj, — la kapeto forrompiĝis kaj ne ekbrulis. Mi frotis duan, trian, fine kvara ekflamiĝis. Sed... lumo ne ekestis!

— Ha-a-a! eliĝis gemo el la brusto. — Do, mi efektive blindiĝis!... Mi blindiĝis!... Blindiĝis! Kaj la alumeto brulis sen lumo!

Ne, mi seiis, ke ĝi lumas, nur mi ne vidis tion! La lumo estis sirmita de mi per la terura kurteno de l' blindeco. Kaj la alumeto tamen brulis! Mi sentis en la mano, kiel ŝanceliĝas ĝia malgranda flamo. Mi atendis, kiam ĝi bruligos la fingrekstremaĵojn... Ho, jen ĝi bruligis! Kvazaŭ cent ardigitaj pikiloj eniĝis sub la ungojn. Mi svingis per la mano, ĵetis la alumeton kaj... vekiĝis en densa mallumo.

Mi ŝajnis senti, ke mi efektive vekiĝis; sonĝo ne estis, sed la haŭto sur la kapo estis malseka kaj la hararo ŝajnis moviĝi. Al mi terure estis etendi nun la manon, terure estis ekbruligi la alumeton.

— Ho, se, maldorme, mi ankaŭ ne ekvidos la lumon!? Se mi efektive blindiĝis... kaj la terura sonĝo avertis min pri tio?!

Tamen la nokta mallumo premegis min, malhelpis spiradon... kaj mi decidiĝis.

Mi longan tempon palpis sur la tablo kaj renversis la glason kun akvo. Mi aŭdis, kiel akvo fluis sur la plankon. Mi ekrapidis, timante, ke ĝi malsekigos la kuŝantajn sur la tablo revolveron kaj alumetojn. Sed jen estas la skatoleto. Bruligi aŭ ne?... Estas terure... terure... Mi frotis la alumeton kaj — kvazaŭ mortis pro terurego — lumo ne estis!

Al mi ŝajnis, ke jam ĉio por mi mortis, ĉio! La vivo ĉesas. Ĝi ankoraŭ bruletas, kiel la alumeto sen lumo. La teruraĵo okazis — mi blindiĝis...

Mi ĵetis la skatolon kaj trovis la revolveron. Mi prenis ĝin el la ingo kaj streĉis la ĉanon. Timige ĝi ekkrakis.

Kaj subite aperis la penso:

— Eble, en la trapafita cerbo ankoraŭ eklumos la lumradio... la lasta radio!

Mi metis la revolvertubon al la tempio kaj premis la ĉanon... Audiĝis tondro, io ektremis en mi, en la okuloj ekbrilis ruĝa lumo kaj mi... vekiĝis.

La ĉambron plenigis lumo: la suno rigardis tra la fenestro. Mi forgesis hieraŭ mallevi la kurtenojn.

Mi kuŝis, kvazaŭ disbatita, en la lito... Sed ho, kia feliĉego! Mi estas ankoraŭ vivanta kaj ankaŭ vidanta!... Ho, kia feliĉo!

Mi volis ridi kaj... mi ĝoje ekploris...

El rusa tradukis De Sonoa.



SUR KAZBEKO.

KAŬKAZA RAKONTO.

EL "HEROLDO DE ESPERANTO"



Iam, en malnova tempo, apud surpraĵo de fama kaŭkaza monto Kazbeko, ĉe limo de eternaj glaciaroj, loĝis en kavernoj sep monaĥoj — dezertuloj. Unu el ili distingiĝis per speciala sankteco kaj seiis precipe komplezi Dion. Pro tio Ĉiopova esprimis al li sian precipan favoron kaj interalie, kiam la maljunulo matene komencadis preĝi, li havis povon pendigi siajn sanktajn librojn sur sunajn radiojn, enpenetrantajn en lian kavernon.

Al la aliaj dezertuloj fariĝis tre enviiga tiu ĉi speciala favoro de Dio al ilia kamarado, kaj ili decidis pereigi lin.

Jen iafoje vespere al la kaverno de la sankta monaĥo venis ia juna virino mirinde bela kaj gracia. Ŝi komencis peti la monaĥon enlasi ŝin en sian ĉelon, ĉar estis jam mallume kaj tre malvarme. La maljunulo longe ne cedis, tamen larmoj de la belulino fine cedigis lin... Sed en la ĉelo estis egale malvarme kiel ekstere, kaj la belulino venis pli proksime al la monaĥo por varmigi sin per lia varmeco. La maljunulo forpuŝis ŝin, sed poste cedis ankaŭ al tiu ĉi peto de la belulino... Kaj poste... poste la sama eterna historio, kiu ripetiĝas de la kreo de la mondo!...

Sekvantan matenon la maljunulo vekiĝis tre frue... La belulino rigardis lin per moka okulo ...Ankoraŭ unu momento, kaj ŝi elflugis el la ĉelo kaj kun laŭta rido kaj kanto ekkuris laŭ la deklivo de l' monto...

La saman momenton unua radio de la suno englitiĝis en la ĉelon de la maljunulo. Li rapide ekkaptis sian saketon kun sanktaj libroj kaj volis pendigi ĝin sur la radion, kiel li faris tion antaŭe. Sed — ho ve! — la radio jam ne obeis lin kaj la libroj ruliĝis kun bruo sur la plankon...

La dezertulo ekkomprenis sian grandan kulpon kaj malespere foriris el la monaĥejo, oni ne scias kien... Post li forlasis la kavernojn ankaŭ la monaĥoj, pereigintaj sian kamaradon. La monaĥejo malpleniĝis por ĉiam...

A. P. Andrejev. Tiflis.





NOVA VORTARO.

Serioza kaj humora.

EL "LINGVO INTERNACIA"



AKTORO. Stranga ekzistaĵo: jen simio, jen cigano, jen maljuna virino, jen heroo, jen kriplulo, jen saĝulo, jen malsaĝulo, jen tio, jen alia, sed perfekta homo—neniam.

ALTAĴO. De tie oni povas fali kaj rompi la kapon; sed malgraŭ ke ĝi estas tre danĝera loko, la homoj tamen rampas tien, metante sian vivon en danĝeron.

AMO—malvera kalkulilo: du ĝi kalkulas por unu.

BIFSTEKO. Por la dentoj de malriĉulo ĝi estas tro malmola.

BOPATRINO. La plej bona bopatrino ne egalas la patrinon.

CIGANOJ. Popolo, kiu dancas en malsato.

CIRKO—loko, kie ĉevaloj akiras monon de homoj.

ĈEVALOJ. Per ilia forto la homoj fariĝis civilizitaj, kaj ili mem ĝis nun restis ĉevaloj.

DOLĈE—ordinare finiĝas maldolĉe.

DONI—tre malfacila laboro, kiun ne ĉiuj povas fari.

EDZIĜO—komedio, kiu ordinare finiĝas per tragedio.

ESPERO—infana ludilo. Oni ludas kun ĝi, ĝis ĝi rompiĝas aŭ disŝiriĝas.

FELIĈO. Multaj homoj sonĝas pri feliĉo ĝis ili ekdormiĝas.

FILO. Unu patro povas nutri dek filojn, kaj dek filoj eĉ unu patron ne povas nutri.

FLORO. Se eĉ ĝi estas bela kiel la tuta mondo, ĝia radiko devas esti en la tero.

FRATO. Frato povas esti ĉiu, kiu havas monon.

FLATAĴO—ŝlosilo al ĉiuj koroj.

HARINGO—manĝaĵo, kiu donas apetiton al riĉuloj kaj satigas malriĉulojn.

HONESTO—antikva komercaĵo; en la nunaj vendejoj ĝi estas malofta.

KARTOJ—rabisto, formanĝanta monon, tempon, sanon kaj honoron.

KORTO—loko por la malriĉuloj, ne havantaj loĝejon.

LOMBARDUJO—returnita mondo: somero estas tie vintro kaj vintro—somero.

MALSATO—severa kaj terura koleremulo, pelanta en la randon de la mondo.

MI signifas: krom mi ne ekzistas alia en la tuta mondo, mi povas ĉion, mi bezonas ĉion, al mi estas ĉio permesita, kaj mi estas nome mi.

NENIO—materialo, el kiu Dio kreis la mondon.

NULO utilas por la alia sed ne por si mem.

PETROLO—fluidaĵo, lumiganta alion, kaj ĝi mem mallumas.

PLUMO. La plumoj ankaŭ havas sian sorton: kiam ili venas en la manojn de malsaĝulo—ili skribas sensencaĵojn, ĉe saĝulo—saĝaĵojn; iafoje ĝi povas veni al tiu, kiu per unu guto da inko povas tumultigi tutan Europon. La plej danĝere estas rakonti al ĝi sekreton.

REDAKCIO—mensogofabriko.

SEKRETO. Virinoj transdonas ĝin unu al la alia.


SPEGULO. Similan feliĉon havas nenia objekto en la mondo: ĉiu virino ne povas sufiĉe rigardi en ĝin.

TERO—dormoĉambro por ĉiuj vivuloj.

VERO—malfeliĉa ekzistaĵo; preskaŭ la tuta mondo malamas ĝin.

LA SEP MONDMIRINDAĴOJ.


Joh. Hartog.



PIRAMIDO DE ĤEOPS.

Kiel preskaŭ ĉiu scias, ekzistas sep mondmirindaĵoj.

La unua mondmirindaĵo estas la PIRAMIDO DE ĤEOPS. Tiu grandega tombo originale havis altecon de 145 metroj, sed dum la Mezepoko, ĝi perdis sian supron, ĉar la Turkoj uzis ĝin kiel celtabulon por militekzercoj. Nuntempe la alteco havas 137 metrojn. La bazo estas kvadrato, kies lateroj ĉiu havas longecon de 232 metroj. Komence la piramido estis kovrita per glata kalktavolo, sed la




PENDANTAJ ĜARDENOJ DE BABILONO.

"dento de l' tempo" jam delonge tiun ĉi forprenis. Herodoto, antikva historiisto (ĉ. 450 A.K.) rakontas, ke centmilo da laboristoj konstruis la piramidon dum dudek jaroj antaŭ ol ĝi estis finita. La laboristoj ne estis sklavoj, sed senlaboruloj; ĉar la rivero Nilo elbordiĝis, multaj ne povis trovi laboron, kaj tiam la faraono decidis, ke ili konstruu por li tombon, kiu iam estos la plej granda sur la tero. Tiu reĝo estis Faraono Ĥeops (ĉ. 2600 A.K.), kaj jam dum lia vivo oni komencis konstrui. Interne en la piramido, kies dimensioj estas direblaj per seriozaj matematikaj formuloj, oni ŝparis aron da galerioj kaj irejoj kaj ĉambroj, destinitaj por la balzamita korpo de la mortinta reĝo kaj ĉio kion li kunportis en sian tombon. La enhavo de tiu piramido havas proksimume 2,637,000 kubikajn metrojn kaj ĝia pezo estas 6,329,700,000 kg. aŭ 6,329,700 tunojn. Sed neniu povas kompreni tiujn nombrojn. Jen klarigo: Oni ŝarĝu la tutan mason en normalajn vagonojn de po 15 tunoj; tiuokaze por la tuto estus necesaj . . . 421,980 vagonoj, kaj la longeco de tiu trajno havus 3,798 km., t.e. de Kairo ĝis Londono.



La dua mondmirindaĵo estas la PENDANTAJ ĜARDENOJ DE BABILONO. La nomo "pendanta" esprimas (devas esprimi almenaŭ) la saman kiel la greka "kremastos" kaj la latina "pensilis". Per tio oni celas 4 aŭ 5 seriojn da "balkonoj" unu super la alia. Tiuj ĉi estas konstruitaj unu flanke de la alia kaj tiamaniere ili formas longajn galeriojn, kiuj estis plantitaj per la plej belaj floroj, plantoj kaj fruktoj de la Oriento, meze de belege skulptitaj fontanoj, kiuj servis kiel ŝprucigiloj. Marmoraj ŝtuparoj kondukas de la galerioj kun la intimaj ĉambretoj al superombrataj lokoj. Ne antaŭ 1908 estas malkovrite kie ili precizloke estis, nome nordoriente de la Palaco de Nebukadnecar. Ankaŭ ili estas nomataj la pendantaj ĝardenoj de Semiramis. Semiramis estis la mita reĝino de Asirio, kiu post la morto de sia edzo Nimus, estus fondinta Babilonon. Herodoto rakontas ke ili troviĝis sur la muregoj ĉirkaŭ la urbo, kiu havis altecon de 100 metroj kaj larĝecon de 25 metroj.






La TEMPLO DE DIANO EN EFESO, konstruita el purblanka marmoro, estas la tria mond-

mirindaĵo. Ĝia longeco havis proksimume 133 metrojn kaj ĝia larĝeco 69 metrojn. Ĉirkaŭe de la templo staris 128 ionaj kolonoj kun alteco de po 19 metroj. Originale ĝi estis konstruita de reĝo Krojsos de Lidujo. En la jaro 356 A.K., en la nokto en kiu naskiĝis Aleksandro la Granda, Herostratos ekbruligis ĝin por akiri ĉiaman famon (kaj li sukcesis!). Post la mortpuno de Herostratos oni komencis rekonstrui ĝin, kaj ĉirkaŭ 323 A.K. ĝi duafoje estis finita. La romana imperiestro Nerono (ĉ. 60 P.K.) prirabis ĝin de ĝiaj trezoroj. En la jaro 266 la Gotoj denove ĝin detruis, kaj ĝi ne estis rekonstruata. En 1870 anglaj esploristoj estas trovintaj la lokon, kie iam la tria mondmirindaĵo troviĝis.






La kvara mondmirindaĵo estis la ZEŬSO-STATUO EN OLIMPIO. (antikva urbo sur la duoninsulo Peloponeso) Ĝi estis konstruita de la skulptisto Fidias (vivjaroj: 490-432 A.K.) Zeŭso sidis sur sia trono kaj ĝia kapo atingis la 18 m. altan plafonon de la templo. Ĝi estis konstruita el oro kaj eburo. De la statuo nenio postrestis, sed laŭ monerbildoj oni sufiĉe detale scias, kiel ĝi elrigardis. Reĝo Calligula (ĉ. 40 P.K.) iatempe estus planinta transportigi tiun ĉi statuon al Romo por loki ĝin sur la Kapitolon. Sed li intencis anstataŭigi la Zeŭs-kapon per kapo de si mem. Liaj laboristoj tamen ekfuĝis pro la akra, tranĉa mokridado kiu sonis, kiam ili tuŝis la tronon de Zeŭso. Poste ilian ŝipon trafis la fulmo kaj ĝi pereis.



La MAŬZOLEO EN HALIKARNASO (nuntempe Budrum en Malgrand'-Azio) estas la kvina mondmirindaĵo. La reĝino Artemisia konstruigis tiun ĉi tombegon por sia edzo Maŭsollus, kiu de 387 ĝis 353 A.K. estis satrapo super Kario. La monumento havis amplekson de 129 metroj kaj altecon de 44 metroj. Reĝino Artemisia venigis la famajn grekajn arkitektojn Satiron kaj Pition por projekti la monumenton, kaj ŝi komisiis la laboron al Skopas, Timoteo, Briakso, Leokaro



k.a., do la plej famkonataj konstruistoj el tiu tempo. Oni kronis la konstruaĵon per skulptita aro, bildanta Maŭsollus kaj lian edzinon en ĉaro kun 4 ĉevaloj. Fragmentojn oni retrovis, i.a. ĉevalkapon kun brido. En la jaro 1482 la kavaliroj de S. Johano venkokupis la urbon kaj tie konstruis sian kastelon de S. Petro. Por akiri la necesajn konstrumaterialojn, ili malkonstruis la maŭzoleon. En 1492 ĝi jam estis ruino kaj en 1522 pro militistaj konsideradoj oni tute ebenigis ĝin, kiam la sultano preparis sian grandan militon por forpeli la kavalirojn el Azio kaj de la insulo Rodeso.






La KOLOSO DE RODESO estis la sesa mondmirindaĵo. Ĝi estis kupra statuo, dediĉita al Helios (t.e. la sundio). Ĝi staris apud la enirejo de la haveno kaj la ŝipoj veturis sub ĝiajn krurojn kun plenaj veloj. La statuo, konstruita de Karo ĉirkaŭ la 290a jaro A.K., havis altecon de 32 metroj. En

233 A.K., tertremo ĝin renversis kaj ĝi frakasiĝe falis kontraŭ la rokojn. La Romanoj tamen ĝin riparis. En 672 P.K. la Sarakenoj vendis la pecojn da kupro al juda marĉandisto, kiu ŝarĝis 900 kamelojn per ili (entute 330,000 kg. da bronzo). Ĝi estis navigaciilo, pere de kiu la ŝipistoj povis teni la direkton, sed same trofeo, starigita promemore de la liberiĝo el la regado de Makedonujo.





La LUMTURO APUD ALEKSANDRIO estis la sepa mondmirindaĵo. La insuleto Faro, sur kiu ĝi staris, estis ligita kun la urbo per artefarita digo, kaj sur la orienta ekstremo staris la lumturo. Oni konstruis pri ĝi 19 jarojn (280-299 A.K.) sub reĝo Ptolemeo Filadelfo. La arkitekto estis iu Sostrato. Ĝia alteco estis alta 110 metrojn kaj ĝia lumo ankoraŭ estis videbla en distanco de 40 km. Kelkiuj diras, ke oni jam uzis konkavan spegulon. Bedaŭrinde tiu ĉi grandioza turo estis detruita de tertremo en la jaro 1375.



LA ETERNA PACO EN IE-LANDO.

De I. L. Perec.

EL "LITERATURA MONDO"

Diras la rakonteto pri Ie-lando tiel:

En Ie-lando troviĝas tre alta, grandega monto. Vivas sur la montpinto la plej grandaj agloj, fajfas sur la montsupro la plej fortaj ventoj; — muĝas la ventegoj kaj interbaraktas.

Vidas la montpinto ankaŭ la plej grandan ĉielspacon el la firmamento de super Ie-lando, kaj la plej belan sunleviĝon en Ie-lando ĉiumatene.

Banas sin la montpinto en la plej hela, plej pura lumo. Ĝi ja estas la plej alta supraĵo en Ie-lando: Nenio malheligas al ĝi la sunlumon, de nenie falas ombro...

Fortega estas la monto: Rokoj estas ĝiaj membroj, kupro kaj oro — ĝiaj vejnoj... Ĉi tion plej bone scias la sovaĝa kapro, kiu saltadas super ĝia dorsego...

Diris la rakonteto tiele.

Ekaŭdis patrinoj la rakonteton, verkis laŭ ĝi lulkanton kaj dormigas infanojn per la kanto pri Ie-lando, pri la alta grandega monto en Ie-regno.

Plenkreskas la infano kaj forgesas la lulkanton; ĝi forgesiĝas dum lernado kaj ludado, poste en la vivo, amo kaj suferoj... en la mondbruo.

Tamen ie, en kaŝita anguleto de l' koro, tremetas ankoraŭ kordeto mallaŭte, kaj sonas la kanteto, la lulkanto pri la montpinto en Ie-lando, — sed torentas ĉirkaŭe la brueganta, bolanta vivo kaj subpremas la kordosonon...

Forpasas jaroj kaj tempoj.

Okazas iufoje!

Ŝpinas junulo sian oran viv-fadenon, etendiĝas la mano de la sorto kaj traŝiras la fadenojn. Foriras la junulo el la vivo en solecon... Eksentas li subite en la soleco, ke en lia koro, en kaŝita anguleto de l'koro, tremetas kaj sonas io... Haltas la junulo kaj enaŭdiĝas...

Kantas iufoje junulo sian feliĉan amkanton sur sia ora junecharpo. Ekaŭdas la malbonsorto, ŝtelaliras, etendas la ostan manon kaj disŝiras perforte kordon post kordo. Mutiĝas la harpo kaj silentiĝas terure en la koro... Eksonas subite la lulkanto en la silento, la lulkanto pri Ie-lando, pri la alta grandega monto en Ie-lando...

Iame ĝi venas al oniulo en sonĝo. En trankvila lunnokto ĝi ekflustras al la orelo kaj vekiĝas la oniulo.

Okazas, ke dum enpensiĝo vekiĝas ĉe homoj la sopiro, kiu pelas al Ie-lando, al la alta grandega monto en Ie-regno...

Forte logas Ie-lando kaj altiras migrantojn...

En ĉiuj tempoj, sur diversaj vojoj, kaj de ĉiuj mondpartoj oni migradas al Ie-lando...

Migrante, oni erarvagadas...

Skeletoj signas la vojojn kaj vojetojn al Ie-lando...

Kelkiuj tamen trovas la ĝustan vojon kaj atingas sian celon.

Sur solecaj vojoj ili iras, el diversaj mondpartoj ili venas kaj neniam renkontas unu la alian...

Ŝpinas sin kaj daŭre ŝpiniĝadas la rakonteto..

Ĝi ŝpiniĝadas el lunradioj en kvieta lunnokto..

Diras la rakonteto plue:

Malsupre, ĉe la alta monto en Ie-lando, etendiĝas liberaj, fruktodonaj kaj nigroteraj kampoj, kreskas densaj arbaroj, fluas lagoj kaj riveroj kaj ĉirkaŭas la grandegan altan monton...

Alvenas la migruloj — unuope, duope, aŭ familiare — atingas la monton en Ie-lando kaj sidlokiĝas malsupre ĉirkaŭ la monto...

Iras ĉasisto kun sago kaj arko arbaron; vidiĝas fiŝisto kun reto kaj fiŝkaptilo ĉe la klara riverbordo; plugas kampulo la teron; pelas paŝtisto ŝafaron al herbejo; — estiĝas post tempo kolonioj..

Sed grandega estas la malsupro de l' monto, ne renkontiĝas pro tio la kolonianoj de diversaj sidlokoj kaj unu kolonio ne scias pri ekzisto de alia.

Vivas ĉiu sian propran vivon, aranĝas ĉiu sian "solan" vivmanieron, konstruas ĉiu sanktejon por sia "sola" Dio, kaj ĉiu kolonio adoras sian

"Solulon"...

Oni vivas kaj mortas laŭ la destino kaj leĝo de Dio la sola...

Preĝas kaj parolas ĉiu per sia "unusola" homa lingvo...

Oni laboras, plimultiĝas kaj iom post iom suprenleviĝas sur la dorso de la deziregata kaj alta monto...

Malrapide — kun tritiko, aveno kaj greno suriras la terkulturisto; evitas tiun la vinberisto; pli alten saltas la paŝtisto, tra ŝtonoj kaj rokoj, post la sovaĝa kapro; la metalan vejnon laŭiras la ministo...

Kelkiuj supreniras ankoraŭ pli alten...

Ili estas tiuj, kiuj neniel povis trankviliĝi...

Iliaj sopirantaj animoj aspiras la alton, la supran alton; ĉar en iliaj koroj sonas pli forte la lulkanto...

Formetas tiuj iafoje reton, sagon, arkon kaj iras el arbaro kaj for de la riverbordo... Faligas el la manoj iafoje falĉilon kaj fosilon la kampulo kaj forlasas la plugon... Perdinte tranĉilon kaj branĉtondilon elvenas la vinberkulturisto el la vinberejo... Forĵetas hakilon kaj rigardas de sub la metala vejno en la helan lumon la ministo... Forlasas kapraron la paŝtisto kaj supreniras...

Tiele tiras la montpinto...

Estas en ĉiu kolonio, en kelkaj eĉ multaj, kiuj supreniras...

Ju pli alten, despli maldika estas la dorso de l' monto kaj okazas, ke interrenkontiĝas la erarvagantoj.

Sed renkontinte...

Malĝojega kaj terura fariĝas la rakonteto parolante pri tio...

Malĝojegaj okazintaĵoj; sangaj interluktoj...

Ŝpinas sin kaj daŭre ŝpiniĝadas la rakonteto tiele:

Estas en ĉiu kolonio sopirulo, en kelkaj eĉ multaj...

Al la montpinto ili sopiras...

Al la fortaj ventegoj, al la grandaj agloj, al la senlima libera ĉielo, al la plej hela lumo, al la plej bela sunleviĝo ili sopiregas...

Logas ilin la montpinto...

Unuope ili eliras el kamparlimoj, elvenas el vinberĝardenoj... ŝtonegojn kaj rokojn transsaltas, ĉe randoj de metalaj vejnoj ili supreniras...

Ili erarvagadas rigardante la altan supron per sopiremaj okuloj, aŭskultante la bruojn de l' supro per aŭdemaj oreloj...

Okazas, ke iufoje renkontiĝas la sopiruloj...

Kaj renkontinte — ili ektimiĝas.

Malkonfide kaj mirigite ili rigardas unu la alian, haltante:

El diversaj lokoj ili venis, tra malsamaj vojoj iradis — alie vestitaj kaj malsimilaj laŭ aspekto kaj eksteraĵo...

Oni balbutas intersalutante kaj ekparolas:

"Estu bonvenanta!"

Salutas ĉiu en sia lingvo, en sia "unusola" lingvo... ĝi sonas en la orelo de aliulo fremde, malmole, nehome, malamike... ĉiu pensas, ke la alia minacas.

"Li malrespektas min kaj insultas," — murmuras ĉiu.

Stariĝas unu kontraŭ alia kaj demandas:

"Ĉu vi estas homo, ĉu vi kredas al..."

Kaj vokita estas la nomo de Dio, de la "Solulo".

En du lingvoj estas vokitaj du nomoj de Dio; kaj ĉiu pensas pri la alia:

— "Li ne parolas kiel homo kaj ne kredas je Dio"...

Oni prepariĝas bataladi...

Petas ĉiu sian Dion pri helpo antaŭ la batalo..

En diversaj lingvoj ili paroladas, per malsamaj lingvoj ili vokas dinomojn...

Diras ĉiu: Li mokas min kaj malbenas mian Dion!

Aŭ: Li adoras alian Dion ol mi, idolon, diaĉon!

Ekflamas la malamo kaj eksplodas la batalo je morto aŭ vivo...

Venkas unu homo kaj lia sola Dio...

Kaj la venkito, malglorinte aŭ beninte sian Dion, mortfalas...

Malsuprenruliĝas la korpo de la venkito kaj signas per sango la vojon tra l'monto, tra la dorso de l'alta, grandega monto...

Kaj la venkinto dankpreĝinte en sia lingvo al sia Dio pli kaj pli alten supreniras...

La nombro de l'sopirantoj en la kolonioj, kaj la nombro de l'renkontintoj interbatalantaj sur la dorso de l'monto, kreskas de tago al tago...

Plikreskas la sopiro, kiu ĉiam peladas supren.. pligrandiĝas la kolerego kontraŭ la sovaĝulo, kiun oni renkontas survoje; kontraŭ la sovaĝa besto, kiu ne kredas je Dio, adoras idolon kaj balbutas per nehoma lingvo...

Suriras ĉiam pli alten la homo kaj ju pli alten li supreniras, despli multiĝas bataloj kaj interluktoj.

Oni bataladas ĉiam pli kaj pli proksime al la montpinto...

La korpoj de venkitoj malsuprenruliĝas de l' monto ĉiam pli ofte, kaj ĉiam de pli alta supro... Ruliĝante ili diskarniĝas ĉe pintoj de ŝtonegoj kaj rokoj je sangaj ĉifonoj kaj fadenoj. La sango ĉiam pli ofte malsuprenfluas, torentas, disverŝiĝas kaj ruĝigas la dorson de l'monto...

Dank' al la malsuprenrulitaj, diskarnitaj di-insultintoj, la tero ĉe l'malsupro de l'monto ĉiam pli kaj pli fertiliĝas; pli plena kaj pli benita estas la spiko de tritiko kaj greno; pli plena kaj pli suka la vinbero, pli dolĉa ĝia vino... pli nutra estas la herbo, kiu ekburĝonas sub la piedoj de l'sovaĝa kaprino, kaj ĉiam pli grasa kaj multa la lakto, kiun ĝi donas al la paŝtisto...

Kaj la sopirantaj venkintoj dankglorante Dion supreniras...

Diradas la rakonteto daŭre:

Plimultiĝas kaj ĉiam pli fruktodonaj estas la kolonioj malsupre de l'alta grandega monto, kaj kreskas ankaŭ la nombro de l'sopirantoj, kiuj jam suriras multope kune...

Danĝerega, de tago al tago pli danĝera fariĝas la vojo al la grandaj agloj, al la liberaj ventoj, al la sunleviĝo, al la larĝaj ĉieloj supre...

Ĉiam pli kaj pli da balbutantoj kaj diinsultantoj suriras la dorson de l'monto. Ili jam supreniras armite...

Renkontiĝas ĉiam pli ofte taĉmentoj de armituloj, ĉe ĉiu renkonto oni sange interbatalas — en nomo de Dio, de la "Solulo"!...

Ekaŭdas la kolonianoj batalkriojn supre, survenas ili kun helpo...

Eliras paŝtisto el tendo, ministo el minejo, el vinberpremejo surkuras vinisto, rapidas de plugo kampulo, fiŝisto el riverbordo kaj ĉasisto el profunda arbaro... Estas ĉiuj armitaj; la ministo ja preparis por ĉiuj armilojn....

Ĉiam pli ofta kaj ĉiam pli pereiga fariĝas la batalo...

Tondras la monto pro l'eterna militado, pro hero-kriadoj, pro armilsonado kaj pro la dinomo, kiu estas vokata en diversaj lingvoj... Amase malsuprenruliĝas kadavroj kaj diskarniĝas ĉe ŝtonegoj kaj rokoj, tra vojoj kaj vojetoj.. Sangriveroj malsuprenfluas, bolas kaj torentas.

Malsupre estiĝas la tero ĉiam pli fertila, pli plena la spiko de tritiko, aveno kaj greno, pli granda kaj dolĉa la vinbero, kaj pli sate nutriĝas la sovaĝa kaprino kaj donas pli grasan kaj pli multan lakton...

Sed foje — diras la rakonteto — dum furioza batalado, du malamikoj postkuris unu la alian tiel alten, ĝis ili subite ekatingis la altan montpinton kaj eniĝis en abundegan lumtorenton de la plej helriĉa lumo de l'montsupro...

Kaj jen, subite per unu fojo elŝiriĝas el ambaŭ buŝoj tute nova lingvo! Ĝi estis la lingvo de l'supro, la luma lingvo, la radilingvo... Subite unu ekkomprenis la alian, unu ekkonis en la alia homon, ekaŭdis la saman nomon de Dio — kaj ili amike ĉirkaŭbrakis sin.

Post tiuj venis aliaj, kiuj eniĝis en lumon, kaj post ili ceteraj, kaj ĉiuj komencis paroli per la sole-homa radilingvo...

Estis ĝojego!

Ekaŭdis ili subite de malsupre batalkriojn, armilsonadon de ĉiuj flankoj de l'monto... Sube okazis, kio devis okazi... Kiel supre la unuopaj sopiruloj, tiel malsupre la kolonioj renkontiĝis...

Plimultiĝis dumtempe, pliobliĝis kaj disvastiĝis la kolonioj, kaj ĉiam pli mallarĝaj fariĝis la liberaj kampoj kaj arbaroj... Renkontis ĉasisto ĉasiston, kampulo kampulon, paŝtisto paŝtiston kaj ministo ministon — sub la tero...

— Fremduloj nin invadis kaj plugas nian teron, malamikoj fiŝkaptas en niaj riveroj! balbutuloj sen lingvo disloĝiĝas sur nia tero! diinsultantoj okupis niajn vinberĝardenojn!... idoladorantoj kaptis niajn kaprinojn! — tiele oni diris.

Kaj ekflamis sur ĉiuj limoj la batalo... Malsuprenkuras de l'monto la sopiruloj:

— Paciĝu! For la batalilojn! Ĉiuj estas egaluloj! Ekzistas unu sole-homa radilingvo!...

Kaj tio — diras la rakonteto — estis la komenco...

La komenco de l'eterna paco... de l'eterna paco en Ie-lando, malsupre ĉe l'alta grandega monto.

Dirinte pri tio, disradiiĝas la rakonteto, kaj dolĉmilde ridetas...

Kiel la orienta matenruĝo vidita de l'pinto, de l'alta montpinto en Ie-lando...

Scias la rakonteto, ke ĝi fariĝos kanto, lulkanto; kantos ĝin patrinoj super plej amata lulilo...

Kaj sonos la kanto en la infana koreto, kaj iĝos sopiro...

Sopiro al Ie-lando, al la alta montego en Ie-lando, al la paclando kun la radilingvo, la sole-homa.

En sopirkoro — sopirdoloro!...

El la juda J. Jurysta.



LA RAKONTO DE KURACISTO.

DE GEORGI P. STAMATOV.

EL LA "BULGARA ANTOLOGIO"

Neniam mi ĉeestis plenumon de morta puno, unue ĉar mi ne havis similan deziron, due ĉar la estraro nun faras tiujn aferojn tiel sekrete, kiel fariĝas ankaŭ la krimoj mem, kvazaŭ ili ankaŭ timus juĝon. Mi falis en la malliberejon kiel kuracisto, por konstati, ke la estraro plenumis, kiel decas, sian juran operacion; mi ne memoras ĝis nun pli abomenan senton, kiam mi diris al la prokuroro, ke mi venos matene en la malliberejon. Al mi ŝajnis, ke mi promesis fari ion malnoblan.

La sekvintan tagon, kiam mi eniris en la korton de la malliberejo, ĉio estis preskaŭ preta, policanoj kun pafiloj formis malgrandan rondon, en kies centro estis starigita subite farita pendigilo; inter du fostoj estis videbla vinbarelo, dolĉiganta iam homajn korojn kaj destinata nun je la plej terura momento en la vivo de l'homo. Apud la pendigilo aranĝadis ion maljuna kurbiĝinta hometo kun tia indiferenteco, kvazaŭ li preparus triumfarkaĵon; montriĝis, ke li estas unu el la malliberigitoj, kondamnita iam je morto kaj amnestiita je eternaj katenoj. La sama prokuroro, eble, kiu antaŭ jaroj sendis fulmotondrojn sur lian kapon pro atenco kontraŭ homa vivo, nun mem invitis lin pendigi sian proksimulon. Ĉu la amnestiita krimulo opiniis per sia fervoro nun elaĉeti sian pekon aŭ li nenion pensis, oni malfacile povus diri... 10 jarojn li jam pasigis en la malliberejo, restas — eterneco. Kiajn pensojn ĝi povas naski? Apud li staris pastro; ne pli facile povus esti difinita la esprimo de lia vizaĝo; — mi lin vidis ankaŭ alifoje, je edziĝfesto — ĝi estis la sama. Sed oni ordonis venigi la kondamniton; montriĝis alta, sana junulo, ankoraŭ juna, tute juna, verŝajne apenaŭ havanta la belajn, sed terurajn nun 21 jarojn.

Oni legis la kondamnon, la leganto tiel prononcis la vortojn, kvazaŭ la vivo de ĉiuj ĉeestantoj dependus de li. La juĝeja estraro nun finzorgis pri la kondamnito, nur la ekzekutisto malpacience atendis la finon de tiu ĉi historio. La pastro alpaŝis al la junulo.

— Filo mia, — li komencis, — vi nun baldaŭ forlasos tiun ĉi pekoplenan mondon kaj transiros en la eternan vivon de Dio, ne timu, fileto, por vi ne ĉio estas jam finita... tie — diris la pastro, montrante la ĉielon — tie...

La malfeliĉulo ekrigardis supren kaj vidis la pendigilon.

— Tiu ĉi ŝnuro... pastra moŝto... tiu ĉi ŝnuro... ekmurmuris li malesperigita kaj tremanta.

Vane la pastro parolis al li pri diversaj promesoj rilate la alian mondon, la junulo ne ĉesis krii, premante la manon de la pastro! „tiu ĉi ŝnuro... tiu ĉi ŝnuro... pastra moŝto..."

Kaj en tiuj ĉi mallongaj vortoj estis aŭdebla la tuta teruro de liaj suferoj; sed la estraro rapidis kaj post nelonge du personoj, helpantoj de la ekzekutisto, proksimiĝis al la kondamnito, por lin

preni, — la malfeliĉulo ekpremis sin al la vestoj de la pastro.

— Filo mia... murmuris la pastro, penante liberigi siajn vestojn de liaj manoj, filo mia...

—Tiu ĉi ŝnuro... tiu ĉi ŝnuro... daŭrigis murmuri la kondamnito.

Fine oni fortiris lin de la konsolanta pastro...

La kuracisto eksilentis momente kaj ree daŭrigis:

„Multajn mortojn mi vidis dum mia vivo, mi sekvis minuton post minuto la iom-post-ioman estingiĝon de organismo, sed tie mi staris apud homo, kiu, malgraŭ la tuta helpo de la scienco, ne povas esti savata, kaj, kiel kuracisto, mi trankvile atendis la neeviteblan morton de mia paciento... sed tiu ĉi morto, kiu estis preparota post nelonge antaŭ mi, ribeligis ĉiun mian nervon. Tie ni uzas rimedojn, amasigitajn per laboro dum centoj da jaroj, por subteni almenaŭ unu minuton pli longe la vivon, kaj tie ĉi: sana forta organismo, kapabla eble transvivi tutan jarcenton, kaj vi devas rigardi, kiel en unu minuto ĝi estos perforte detruata, observi artevokatan morton...kaj ĉio ĉi okazos antaŭ mi, kuracisto, kiun oni ĝenerale vokas por helpo... Fine oni sukcesis lin suprenigi sur la barelon, de kiu li kun idiota esprimo en la okuloj penegis sin movi al la pastro. Kaj jen, la prokuroro, kiu staris apud mi, triumfe kriis: „Lia Majesto donacas al vi la vivon!" Kiaj estas tiuj donacoj en nia jarcento, pensis mi kaj rigardis mirigite la prokuroron. Li similis al Kristo, vokanta Lazaron el la tombo. „Kriu hura, kriu vivu Lia Majesto!", puŝis la policanoj la kondamniton kaj, Dio scias, pro kiuj kaŭzoj, ili mem ekkriegis: vivu Lia Majesto! La ekzekutistoj, ankaŭ mirigitaj, sin retiris, tamen ili kriegis nek hura, nek ke vivu iu, kaj la kondamnito, duonkaŭrinta sur la barelo, daŭrigis rigardi la ĉirkŭantojn per stulta, senpensa rigardo kaj murmuri „tiu ĉi ŝnuro... tiu ĉi ŝnuro ... pastra moŝto..." Li ne plu estis por malliberejo, sed por frenezulejo.

—Kion signifis ĉio ĉi, — demandis mi poste la prokuroron.

—Nenio, nenio, — respondis li al mi ridetante, jam hieraŭ ni ricevis la telegramon, ke li estas amnestiita, sed ni volis lin timigi por starigi ekzemplon.

—Tamen li freneziĝis?...

—Por kia diablo li bezonas saĝon, diris kun rideto la prokuroro, forirante.

La kuracisto finis. Ĉiuj ĉirkaŭ li silentis; nur unu el la ĉeestanoj subite ekparolis: „Ĉiuokaze la prokuroro estis prava, por kia diablo li bezonas saĝon nun".

Tradukis Ivan H. Krestanov.



EN LA ALIA MONDO.

Elin Pelin.
El "Literatura Mondo"

Kiam disvastiĝis tra la vilaĝo la sciigo, ke avo Matejko mortis, neniu kredis, ke tio estas vero, ĉar li emis ŝerci kaj krome, antaŭe neniam okazis al li tiaspeca afero. Sed kiam avino Jova rakontis lian lastan horon, ĉiuj konvinkiĝis, ke tiun ĉi fojon li ne ŝercas. La homo revenis de la arbaro, malŝarĝis sian azeneton, ligis ĝin, donis al ĝi fojnon kaj tuj kiam li eniris la domon kaj sidiĝis ĉe la fajro por bruligi sian pipon, io lin tratranĉis duone tra la lumbo. li kuŝiĝis, ekĝemis kaj...

Kunvenis najbaroj, iris ankaŭ avino Jova. Li ja estis malriĉulo, solulo, li kaj lia malsovaĝa azenineto, griza kiel kolombeto, obeema kaj kvieta kiel monaĥino. Iris avino Jova, sed ne estas ja haltigebla la animo, kiel ŝi haltigus ĝin? "Nur — rakontas ŝi — mi diris al li, ke li krucosignu, kaj li kvazaŭ penas, sed ne povas eĉ ekmoviĝi. Oni alportis al li botelon da brando. Li ĝin prenis, ekridetis tiel, ke liaj okuloj ekbrilis kaj... mortis." Li mortis kun rideto. Ĉu, ĉar lia animo en tiu momento eniris la paradizon aŭ, ĉar li vidis la brandon — tion neniu povis diri certe.

Ekirinte al la alia mondo, la bedaŭrinda avo Matejko unue haltis ĉe la vojkruciĝo, kie estis multaj vojaĝantoj — tiaj samaj kiel li.

— Bonan atingon — li salutis ilin kaj sen longa pripensado li demandis:

— He, onkloj, tra kie oni iras inferon?

Ĉiuj lin ekrigardis mirigite.

— Al infero, al la infero, kiu vojo kondukas? — klarigis laŭtvoĉe avo Matejko.

Oni ĝin montris al li kaj li direktis sin tien.

— Certe tien oni min metos, pensis li, mi atingu do ĝustatempe! Ne taŭgas por paradizo mi, malriĉa homo... la paradizo estas farita por la nobeloj. Kun ĉi tiuj ĉifonaĵoj kaj la krevetinta haŭto de la manoj ĉu oni permesos al mi iri tien! Okdek jarojn mi suferis kiel hundo kaj ĉu nun mi trovos ripozon? Vere, mi penis vivi laŭ la Diordonoj, sed kiun interesas ĉio ĉi? ĉu Dio tenus konton pri homoj similaj al mi? Oni min enskribis en la diabla kajero jam ĉe mia naskiĝo. Eĉ se mi estus nepekema, tamen mi estas pekinta almenaŭ unu fojon dum mia ebrieco!... Kaj mi drinkis! Pro sufero kaj ĉagreno ja mi drinkis, vere, sed mi drinkis. Ĉiuokaze bonvivo mankas, pensis mi — do almenaŭ drinku!...

— Drinku kaj estu kio estos! Mi bone preparis min por la infero. Nun tien mi iras. Se iu volas droni, li dronu almenaŭ en profunda akvo.

Longan vojon tramarŝis avo Matejko, profundiĝinte en siaj pensoj kaj jen, anĝelo neatendite ektiris lian pelton de malantaŭe.

— Haltu, he, homo, kien vi iras?

— Inferon mi ja iras — respondis la maljunulo.

— Inferon? Vi eraris pri la vojo, avo!

— He, mi ne eraris, mi iras la ĝustan vojon. Scias mi, kien mi devas iri, kvankam mi estas malklera homo.

— Sed vi estas enregistrita por la paradizo.

— Nu, knabo, iru vian vojon, ne moku maljunajn homojn, ĉar tio estas peko.

La anĝelo, kompreninte, ke per boneco oni ne povas konvinki lin, ĉirkaŭprenis la maljunulon, kaj ekflugis alten al la lumaj ĉielaj spacoj, kie odoris je mirinda Smirn'a incenso kaj kie traflugis po grupe lumaj anĝeloj kun basiliko en la manoj kaj kantis ĝis sinforgeso: "Sankta, sankta, sankta Dio Sabaoth!"

— Kien vi portas min, knabo, la mastroj tie ekkoleros je vi, ĉu vi ne rimarkas, ke mi malbonodoras je brando, — krias avo Matejko kaj sin tiras por forkuri, sed la anĝelo ĉiam pli kaj pli rapide flugas kaj portas lin pli alten al la pli luma spaco,

ĝis ili atingas la paradizan pordon. Ĝi estis farita el oro kaj el multekostaj briliantoj kaj lumis kiel hela suno. Antaŭ ĝi staris sankta Petro kun arĝenta ŝlosilo en la mano kaj kun dika kajero sub la brako.

— De kiu vilaĝo vi estas? — sin turnis li al avo Matejko, kaj komencis trafoliumi la kajeron.

Avo Matejko havis nenian eblon por elturniĝi. Hm, hm...

— He, nu, de Podnene mi estas...

— De Po...?

— De Podnene! — ekkriis laŭte avo Matejko, kredante, ke sankta Petro ne bone aŭdis.

— Po... Po... Po... trafoliumas la kajeron sankta Petro — Podnene... Bone... Senpeka.

— Ne povas esti... Vi eraras sankta Petro!

— Kiel erari?... Tio ĉi ne estas brasika kuko, sed kajero numerita, tralaĉita kaj surstampita de Dia mano — koleriĝis je li sankta Petro.

— Bone, sed poste vi ja ne pripentu — respondis avo Matejko

— Kial?

— He, he, homo, mi estas multe drinkinta kaj mi ne kredas, ke mi estas senpeka.

— Multe vi drinkis, sed ankaŭ multe vi suferis, kaj al vi estas ĉio pardonita — respondis al li sankta Petro kaj malfermis la pordon.

— He, sankta Petro, ĉu ne estus eble, ke mi enkonduku mian azenineton?... komencis peti avo Matejko, sed la anĝelo lin puŝis en la paradizon kaj li, konsternite de mirego, ne povis findiri sian parolon.

Tuj kiam avo Matejko eniris la paradizon li rememoris pri sia edzino, kiu estis forlasinta la pekoplenan teron jam longe antaŭ li.

— Se oni lasis min ĉi tien, kiu drinkis, kaj ŝin batis, oni verŝajne metis ŝin en la paradizan mezon. Ŝi estis pli malsevera ol kokcinelo kaj pardonadis ĉion... Eh, kio estus okazinta al mi se ŝi mankus? kaj li sin turnis al anĝeleto.

— Hej, fluguleto, ĉu estas tie ĉi iu avino Mateica, propranome Trena?

— De kiu vilaĝo? — demandis la anĝeleto.

— De Podnene...

— Estas, estas — diris la anĝeleto kaj kondukis plu la maljunulon tra la paradizo.

— Ho, kia beleco, kiaj mirindaĵoj — miris avo Matejko, rigardante tiujn ĉi ĝlorindajn paradizajn belecojn, kiujn vidos nur la senpekuloj.

— Ĉu mi vidos ankaŭ pastron Nikolaj? — li komencis demandi la malgrandan anĝeleton.

— Kiun?

— Pastron Nikolaj de la malgranda preĝejo, kiu pruntedonis monon kun procentoj. Mi hontas lin renkonti. Mi ŝuldis al li, li mortis kaj mia ŝuldo same mortis.

— Pastro Nikolaj estas en la gudro, avo.

— Kion vi diras, ĉu estas eble?

— Honoran vorton!

— Sed li ja estis pastro?...

—Tute egale — Tie ĉi neniu demandas pri tio — al ĉiu laŭ liaj agoj; li estis pastro, sed pekadis. La episkopo, kvankam li estas tiarangulo, same estas en la infero.

— Ho, ne parolu tion!

— Kaj li estas punita, avo... Li estis episkopo, sed li estis fiera pro sia rango, kaj nur la nobelojn li rigardis kiel homojn, la malriĉulojn li eĉ ne ekrigardis, naŭziĝis pri ili kaj se li donis al ili almozon, li donis ĝin kun malestimo, penante pli baldaŭ liberiĝi de ili. Li sin vestis pompe kaj ĉiam tromanĝis, instruis tamen la homojn je sindeteno... Ĉu tio ne estas peko?

Avo Matejko frotis per la mano sian frunton kaj diris:

— Mi ja ne scias, ĉu estas peko, aŭ ne. Mi estas malklerulo, mi ne komprenas. — Lasu tion, sed alkonduku min en la drinkejon por ke mi trinku glason da brando, ĉar mia gorĝo brulas kiel karbo.

— Eh, avo, tie ĉi ne estas drinkejoj — diris la anĝeleto.

— Ah ĉu ne estas?

— Pro Dio, ne estas!

— Ho, kiaj simpluloj vi estas, ho! — ĉu estas eble ĉe tiuj ĉi belecoj, ke drinkejoj manku? Sed kie oni haltos por ripozi, trinki glason da brando kaj plifortiĝi? Ekrigardu min, de la tero mi venas. laea mi estas... Tie la pastro diris al ni, ke en la paradizo sin trovas ĉio, kion la animo ekdeziras kaj jen... Estus pli bone, se mi estus irinta en la inferon. Ĉu tie estas drinkejoj?

— Tie estas.

— Konduku min tien, mi vin petas, kia utilo de tiu ĉi kontenteco, se ne estas guto da brando! En la infero, vere, estas malbone, sed mi estas kutimiĝinta: mi suferos, kaj en bona horo mi drinkos kaj al mi fariĝos pli bone.

— Ne eblas, avo!

— Eh, — ĝemspiris la maljunulo — tio ĉi similas malliberejon! Ne povas oni iri kien oni deziras!

— Vi kutimiĝos, avo — provis lin konsoli la anĝeleto.

— Eh, ĉu ankoraŭ mi devas lerni? — ĝemspiris ree avo Matejko kaj komencis ruze.

— Aŭdu knabo, — li diris al la anĝeleto — bone estus se vi malfermus drinkejon tie ĉi — se mi renkontus la bonan Dion — rekte antaŭ liaj okuloj mi dirus al li ke estus bone... Unue ne estas loko kie haltu kaj ripozu la impostkolektisto, ni preterlasu ĉion alian!...

— Tie ĉi ne estas impostkolektistoj, avo.

— Ah, ĉu ne estas?

— Ne, ne estas.

— Oh, Sankta Dipatrino, vere, tie ĉi mi libere vivos — ekkriis pro ĝojo avo Matejko kaj krucosignante aldonis.

— Eh, tio ĉi al mi pleje plaĉas!

Kaj li ekiris rapide serĉi sian maljunan edzinon.

El la bulgara: Georgi Donĉev.



LA KOBOLDO.

(mallongigita)

De Konstantin Veliĉkov.

EL LA "BULGARA ANTOLOGIO"

I.

Estis tlaka'o (labora vesperkunveno de gejunuloj) ĉe Baj Petko Altano.

Baj Petko estis la plej riĉa homo en Seitovo. Kiam la patro mortis, li postlasis al sia filo nur unu altan'on (ormoneron). Per tiu ĉi altano, kun Dia helpo, li gajnis kaj riĉiĝis. Pro tio restis al li la nomo Petko Altano.

La granda domo de Baj Petko apenaŭ entenis la aron venintan. Estis kunvenintaj ĉiuj gejunuloj de la vilaĝo. Cvetana, filino de Baj Petko, helpadis al ĉiuj, gaja kiel suno maja, kaj al ĉiu ŝi donacis po unu dolĉa rideto, al ĉiu diris po unu afabla vorto.

La tlaka'o fariĝis de minuto al minuto pli vigla. La ridoj kaj paroloj ne ĉesis: ili silentiĝis, kiam iu knabino ekkantis, kaj ree ili eksplodis bruaj, gajaj, kaj la laboraĵo elfalis el nenies mano.

Subite ĉiuj eksilentis kaj turnis siajn okulojn al la pordo, kie estis aperinta junulo, bela, kun apenaŭ montriĝintaj lipharoj, fortika, gracia bravulo. Ĉiuj komencis intermurmuradi: „Nikola, la soldato." Li eniris.

Nikola estis prenita kiel soldato antaŭ du jaroj. Li finis sian militservadon kun rango de serĝento kaj antaŭ tri semajnoj revenis en la vilaĝon.

Li estis la unua kantisto en Seitovo. Neniu muzikis per kavalo (nacia blovinstrumento) tiel bele, kiel li. Vin ravus lin rigardi, kiam li ekkondukis la dancrondon. Liaj piedoj ne tuŝis la teron. Por raĉenica (nacia danco bulgara) li ne havis konkuranton. Kaj li sin ornamvestis, kvazaŭ ironte al edziĝfesto.

Nikola estis gaja kaj parolema. Li rakontadis diversajn okazintaĵojn el la vivo de l'soldatoj, incitis la junulojn, faris ŝercojn al la knabinoj kaj elvokis komunan gajon kaj ridon.

Iu knabino, venkante sian hontemon, lin invitis kanti.

Nikola ne atendis, ke oni lin invitu ree. Li kantis du soldatajn kantojn kaj post ili unu vilaĝan. Ĉu voĉoj ĝi estis, ĉu kantoj ĝi estis? Kaj la voĉo, kaj la vortoj falis rekte en la koron.

II.

Ĵus li estis fininta, apud li komenciĝis vigla interparolado inter iuj el la gastoj. Oni parolis pri la koboldo, kiu de kelkaj tagoj komencis aperadi ĉe la fonto apud la tombejo.

Iu rakontis, ke Koljo la karbisto ĝin vidis antaŭ ses tagoj, revenante el la arbaro.

— Kial vi bezonas ses tagojn? aldonis alia.— Antaŭhieraŭ ĝin vidis la bovpaŝtistetoj, irantaj por serĉi perditan bovidon. Ili pasis preter la fonto kaj rimarkis, ke io nigras apud ĝi. Ili ekrigardas — kaj kion ili vidas? La koboldo ekstarinta, alta du homstaturojn, svingas la manojn. Ilin vidinte, ĝi eniĝis en la fonton, kaj nur ĝia kapo restis ekstere. Ĝiaj okuloj turniĝis kvarflanken kaj brilis kvazaŭ tiuj de kato. La bovpaŝtistetoj eligis siajn langojn pro timo, ilia galo estis diskrevonta; sed jen unu el ili ekpensis kaj krucsignis, kaj la kapo malaperis en la fonton. La bovido ĝis nun mankas.

Tria rakontis kion li aŭdis de avino Iva.

Avino Iva komprenis ĉion. Ŝi okupiĝis pri magioj kaj havis kuracilojn por ĉiuj malsanoj. Se vi ekserĉus de kokido lakton, vi trovus ĝin ĉe ŝi. De tre malproksime oni venis por peti de ŝi amigilojn por naskopoveco. Kiam avino Iva diris ion, ĝi estis dirita, kaj oni ne diskutis pri ĝi.

Avino Iva estis rakontinta ankaŭ, ke la koboldo estis neniu alia ol avo Georgi la gajdisto (gajdo estas nacia muzikilo el ŝafledo en formo de sakfajfilo) Kiam mortis avo Georgi, kato lin transsaltis, kaj tial li koboldiĝis. Kiam vesperiĝas, li aŭdas en sia tombo, ke kato miaŭas, kaj li eliras por ĝin persekuti, sed pli malproksimen, ol ĝis la fonto li ne povas iri.

Ĉiu havis ion por diri pri la koboldo.

III.

Nikola estis lacetiĝinta pro kantado, kaj komence ne atentis la interparoladon; sed poste li ekaŭdis kaj kiam ĉiuj rakontis kion ili sciis, li diris:

— Kaj nun vi kredas, ke ekzistas koboldo?

Ĉiuj ĉirkaŭ li interrigardis mirege.

— Ĉu iu venus kun mi, komencis Nikola, — por ke vi vidu, ke estas nek koboldo, nek diablo?

Ĉiuj eksilentis kaj lin rigardis mirigite. Multaj ekpensis, ke li freneziĝis.

— Ĉu neniu venos? diris ankoraŭ unu fojon Nikola. — Kiu venos, tiu ne timu. Se estos koboldo, mi eliros kontraŭ ĝi, kaj li prenu siajn piedojn sub la brakon kaj forkuru.

Neniu respondis.

El unu angulo aŭdiĝis voĉo:

— Restu sur via loko, se vi amas vian sanon kaj junecon!

Nikola stariĝis, prenis brandujon, pendantan sur la muro, kaj diris:

— Se neniu volas, mi iros sola. Se vi morgaŭ ne trovos, ke la brandujo pendas sur la muro, diru, ke por la vento mi manĝis dum du tutaj jaroj soldatan panon.

Iuj volis eĉ perforte lin haltigi, sed la decideco, kun kiu li parolis, haltigis ilin.

IV.

La gastoj parolis pri Nikola, kaj Petko, kiu ĝis tiam silentis, diris:

—Heroa knabo li estas.

Ĉiuj estis mirigitaj, kiam post iom da tempo ili vidis Nikola'n, ke li revenas kondukante kun si ciganon.

Li estis kaptinta la ciganon je lia zono kaj, lin puŝinte antaŭ la gastojn, ekkriis:

— Jen al vi la koboldo!

— Ĉi tiu estas Lalo, la kribrilisto, diris kelkaj.

Ĉe Lalo animo ne estis restinta. Nigra, malgrasa, duonnuda, li tremis en la tuta korpo.

— Ĉu li do estis ĉe la fonto? demandis vilaĝano.

— Al li tedis vendadi kribrilojn, respondis Nikola, — kaj li decidis fariĝi koboldo. Iun vesperon la bovpaŝtistetoj lasis siajn sakojn apud la fonto; li preterpasis tie, vidis ilin, malsatis, kaj prenis ilin. Revenas la bovpaŝtistetoj por ilin serĉi, li ekrulas siajn okulegojn, eksvingas siajn brakojn, kaj ili forkuregis. De tiam li kutimis venadi kelkfoje al la fonto, kaj tie li dormis ankaŭ.

— Ĉu li prenis la bovidon de l'bovpaŝtistetoj? interrompis unu vilaĝano.

— Kiu alia do ĝin estus preninta? respondis Nikola.

— Jen vidu, vidu, kaj avino Iva mensogas, kaj ni kredas, diris kelkaj.

— Koljo'n la karbiston li timigis, diris alia.

— Ĉu vi vidas, Lalo, kiel vi estas timiga? diris Nikola. — Nun foriru kaj alifoje ne ekplaĉu al vi fariĝi koboldo, ĉar neniu vin savos.

Lalo ekiris eksteren.

— Sed la bovido? ekkriis kelkaj.

— Mi scias kie ĝi estas, kaj morgaŭ prenu ĝin

de mi, respondis Nikola. — Lasu la homon foriri, ĉar lin ekkaptis trijara febro.

Ĉi tiu okazo gajigis ĉiujn, sed el ĉiuj plej gaja estis Baj Petko. Sin turnante al la gastoj, li diris:

— Se mi havus filon, mi volus, ke li fariĝu kiel ci. Dio filon al mi ne donis. Ĉu ci fariĝus mia bofilo?

Nikola ne povis paroli pro emocio. Li apenaŭ elparolis kelkajn vortojn. Neniu aŭdis, sed ĉiu komprenis.

Kaj Cvetana, kiu estis elirinta, revenis ĝuste en tiu ĉi momento. Ŝi preskaŭ dronis sub la teron. Ŝia vizaĝo flamis.

— Mi komprenis, aldonis Baj Petko. — Venu, kisu manon. Malhonoron al tiu, kiu diros, ke vi ne estas unu por la alia. Kaj poste sin turnante al la knabinoj, li diris: — Nun lasu la laboraĵon, kaj venu por ke ni estu gajaj!

Ĉiuj gastoj ekstariĝis, la gajdo ekludis kaj en la larĝa korto de l'domo de Baj Petko ekskuiĝis gaja dancrondo.

Tradukis Ivan H. Krestanov.



LA GRANDA ARBO.

De Apel.lis Mestres.

EL LA "KATALUNA ANTOLOGIO"

I

Proksime de la vojo staras altega arbo, kiu tute ŝajnas enigi sian supraĵon en la bluon de la firmamento.

Apud la piedo de l' arbo pasis homo kiu, mire ĝin rigardinte, ekkriis:

"Ĝi estas belega arbo!"

Kaj li daŭrigis sian interrompitan marŝadon.

Poste pasis dua trairanto kaj tiu ĉi ankaŭ pensis ke la arbo estas belega, sed ne malferminte la lipojn por tion diri, pasis ne haltinte.

Pli malfrue pasis tria marŝanto kaj tiu ĉi eĉ ne atentiĝis pri la estado de l' arbo.

II

Fine alvenis du frenezuloj. Unu el ili intencis grimpi ĝin; sed apenaŭ li atingis la unuajn branĉojn falis teren kaj rompiĝis lia kapo. Tiam oni vidis ke li havis nenion en ĝi.

Lia kunulo intencis same grimpi; sed, per pli da ruzo aŭ da fortoj ol sia antaŭulo, sukcesis atingi la supraĵon kaj de tie li povis atente rigardi la mondon — malgrandan, tre malgrandetan! — kuŝantan sub liaj plandoj.

Kaj la mondo proklamis lin Geniulo.

III

Kaj daŭris pasante homoj kaj homoj kiuj, kiel tiu unua, haltis momenton por admiri la Geniulon, kaj ekkriis:

"Eble la frenezulo kiu falis estis tia Geniulo kia tiu ĉi... sed la sorto ne favoris lin."

Tiuj ĉi estis la inteligentuloj.

Kaj pasis pli multaj homoj kiaj la dua, kaj nek ion dirante nek haltante, ili sin komplezis pensante:

"Eble tiu ĉi kiu atingis la supraĵon estis tiel freneza kiel tiu kiu falis.. sed favoris lin la sorto."

Tiuj ĉi estis la saĝaj personoj.

Kaj pasis pli multaj homoj—ho, multegaj pli! —, kiuj, kiel la tria, daŭris en sia marŝado nenion pensinte eĉ nek suspektinte la ekzistadon de la frenezulo, nek tiun de la Geniulo.

Kaj tiuj ĉi estas la grandega plimulto, kiuj nomas sin mem preskaŭ ĉiuj. — Kaj tiuj ĉi estas kiuj faras kaj malfaras ĉar la tero estas ilia.

Trad. Estanislau Pellicer.



LA STACIESTRO!

A. De Herz.

EL "LITERATURA MONDO"

La vagonaro malvigle iradis, trapasante la kampojn rostiĝantajn en la bakforno de la julia suno. Ĝi klopodis, spiregis kiel dikulo kuranta post tramveturilo por ĝin eniri, kiam la tramoj estas plenaj kaj la varmo grandega.

Malgranda difekto de la vapor-pumpilo devigis la mekanikiston iri per malpli granda rapideco.

Sed la vojaĝantoj estas duonmortaj. Multaj homoj iris Constanta-n,[2] la vagonfakoj estis plenaj kaj ankaŭ la koridoroj tiel plenaj, ke la cirkulado estis neebla.

Mallongan tempon la vagonaro iris per la kutima rapideco, freŝiga blovo eniris tra la malfermitaj fenestroj, sed nun pro tiu "difekto" la varmo de sur la kampo eniris en fajraj ondoj tra ĉiu fendo de la vagono. Estis tute neeble fari iom da trablovo. Maljuna virino protestis, kiam oni volis ŝanĝi la aeron de la kupeo, ĝis kiam fine ŝi ĉesis diskuti kaj kontentiĝis per la levo de la fenestro, kiam oni malfermis la pordon, aŭ per la fermo de la pordo, kiam oni mallevis la fenestron.

En la koridoro sinjoro ventumis sin per pajla ĉapelo. Kelkaj impertinentaj infanoj, malpuraj de ĉokolado, iradis tra la amaso por paŝi de unu kupeo al la alia, malpurigante la fremdajn vestojn per ĉokolado. Tedite, oficiro kriegis al ili: "Trankviliĝu, aŭ mi elĵetos vin el la vagonaro!" — La minaco efikis por kvaronhoro, poste unu el ili, volante tamen trairi, ion flustris al la patrina orelo kaj la patrino, prenante lian manon, ŝovis lin tra la amaso kaj petis pardonon, ke la knabo bezonas ien iri.

Ĉe la fenestro, Vasile Bucŝan[3] babiladis kun la doktoro de banloko Tekirghiol. Dika, ruĝvizaĝa, kun la poŝtuko ligita sur la kolo, Bucŝan[3] ŝajnis bonhumora homo post manĝo, kie oni multe trinkis. Ili babiladis pri la banloko, pri la kareco de la hoteloj, kiam jen eniras la konduktoro por peti la biletojn por la venonta stacio.

La konduktoro ŝajnis tre honesta homo, serĉante iun, kun kiu li povus babili.

— Kien ni alvenas, amiko?—demandis Bucŝan.

— En Feteŝti. La biletojn por Feteŝti! Kiu eliros?

— Jen Feteŝti! Brave! Ni ja bone iradas! — Kaj Bucŝan komencas ridi.

— Bone, malbone, kion fari? Ni malfruiĝis du horojn, tiu maŝinaĉo estas kulpa.

— Kial oni ne ŝanĝas ĝin, amiko? — enmiksiĝis la doktoro.

— Oni parolas pri ŝanĝo en Feteŝti. Oni jam telefonis.

— Do bone, ke oni ĝin ŝanĝos, — diris Bucŝan. — Bona homo estas tiu Anghelescu. Ĉu li estas ankoraŭ staciestro en Feteŝti?

La konduktoro malfermegis la okulojn:

— Anghelescu? Neniam ia Anghelescu estis staciestro en Feteŝti?

— Ne diru, mi ja estas bona amiko kun Anghelescu el Feteŝti. — Kaj li klarigis ion per okulfermo al la doktoro, kiu ne komprenis la sencon de la interparolo.

— Ne estas, sinjoro, se mi diras. Ĉu mi ne pasas tie trifoje ĉiusemajne? Tie ĉi sinjoro Jonescu estas staciestro, Andreo Jonescu.

— Vi pravas, tiel estas! Mi konfuzis lin per alia.

— Andreo Jonescu, homo alta, bruneta.

— Sinjoro Jonescu estas mallonga, dika.

— Mi konas lin, mi konas lin? Tiel li aspektas! Mi rememoras Andreon Jonescu.

Kaj signante al la doktoro, ke li tute ne konas Andreon Jonescu, li daŭrigis la esploradon.

— Kiel li fartas? Ĉu li edziĝis? Mi konas lin kiel vivkapablan junulon.

— Oho, li estas edziĝinta antaŭ 20 jaroj! Li havas ankaŭ infanojn, knabon kaj knabinon. Fraŭlinon Margareton li edzinigas kun leŭtenanto el Ĉernavoda. Kaj lia knabo jus finis la liceon.

— Ĉu vere? Li edzinigas Margareton? Li devas esti tre kontenta!

— Certe! Alvenis ankaŭ lia bopatrino. Malfeliĉa virino, nun, dum la maljuneco okazis al ŝi malfeliĉo! Ŝia piedo rompiĝis kaj ŝi iradas kun bastono, ĉar ŝi lamas. Kion fari? Verŝajne dum la maljuneco la osto putriĝas kaj ne plu saniĝas. Sed malgraŭ sia stato, dum la tuta tago ŝi ordigas en la ĉambro kaj en la korto ĉion.

Ĉar la bopatrino ne plu interesis lin, li ŝanĝis la temon de l' diskuto.

— Sed kiel nomiĝas la knabo?

— Joĉjo! Li malsanis: havante skarlatinon; li saviĝis. Li ankoraŭ estas malgrasa, oni lin irigis Constanta-n. Li volas fariĝi inĝeniero. Li ŝatas la kalkulojn.

— La biletojn sinjoroj, kiu eliros en Feteŝti? — La konduktoro lerte glitas tra la vojaĝantaro, kaj malproksimiĝas. Dume la doktoro demandas Bucŝanon:

— Diru al mi, ĉu vi konas aŭ ne la staciestron en Feteŝti?

— En mia vivo mi neniam vidis lin.

— Do tiam?

— Mi babiladis por ne enui tie ĉi. Ĉu vi ne rimarkis lian babilemon? — Li ne finis la parolon, kiam la konduktoro revenis, kvazaŭ li estus forgesinta ion.

— Mi forgesis diri: amaso nun estas ĉe la sinjoro staciestro. Alvenis liaj kuzinoj por helpi en la kudrado, kaj ankaŭ la fianĉo, kiu havas libertempon...

Li ne povis finparoli, ĉar longa fajfo anoncis la eniron en la stacion. La vagonaro rapide iras, ĝi haltas sur la unua linio, antaŭ la perono.

Sciante, ke pro la maŝinŝanĝo okazos malfruiĝo, la vojaĝantoj eliris por aĉeti ian manĝaĵon.

Tra la amaso, la staciestro, Andreo Jonescu, kuradis por ŝanĝi la maŝinon. Post tri-kvaronhora haltado, dum kiu tempo Bucŝan kaj la doktoro interesiĝeme sekvis lin, la staciestro ordonis la preparojn por la ekiro. Estis ankoraŭ kelkaj minutoj antaŭ la ekiro kaj Andreo Jonescu rigardis la vagonaron ekirontan, kiel amema patro la forirontan infanon. — Subite Bucŝan klinas sin eksteren kaj ekkrias:

— Andreo!

— Jes!

Kaj la staciestro levis la okulojn, ravite, ke li trovas konaton.

— Andreo! Kiel vi fartas, Andreo?

— Bone! Kie vi estas? Kiu min vokas?

Li bone vidis, ke Bucŝan vokis lin, sed ne konante lin, li kredis, ke estis nur ŝajno.

— Tie ĉi! Tie ĉi! Ĉe la fenestro! Do kiel vi fartas?

—Bone, sinjoro, sed kiu vi estas?

— Ĉu vi ne plu konas min? Ho ve! Tian staton vi atingis?!

Andreo Jonescu malfermegis la okulojn por rekoni lin, sed vane. Tiam li pensis, ke la sinjoro ĉe la fenestro eble konfuzis lin kun alia kaj ĝentile ridetante li turnas sin al li:

— Sinjoro, vi eraras. Eble alia Andreo estas, kiun vi konas? Mi tute ne konas vin!

— Ho ve, Andreo, junulo! Ĉu vi ne rekonas min? — Kaj rememorante ĉion, kion la konduktoro diris al li, li komencas rakonti:

— Do mi gratulas. Vi edzinigos Margareton. Bona knabo prenos ŝin. Mi aŭdis, ke li fariĝos kapitano!

La staciestro paliĝis. Tiuj ĉi vortoj falis sur lian kapon kiel piŝto-puŝo. Do ili konas unu la alian. Ne okazis eraro. Kaj tamen li ne sukcesas rememori la homon parolantan ĉe la fenestro.

— Kiu vi estas, sinjoro?

— Nur tio mankas! Kiu mi estas? Nu, divenu!

La doktoro preskaŭ mortis pro la rido malantaŭ Bucŝan, kiu daŭrigis:

— Saluton al via bopatrino! Mi aŭdis, ke ŝi estas tie ĉi por la edziĝfesto. Mi kompatas ŝin pro la pied-malsano. Do kion fari, je ŝia aĝo ŝi povas iri kun bastono. Sed diru, ke ŝi lasu la ordigon en la ĉambro! Nun estas la vico de Margareto.

— Kiu vi estas sinj... volis ankoraŭ diri Andreo Jonescu, sed estis maleble, Bucŝan daŭrigis kiel malnova konato, kiu ĉion scias. Tiuj detaloj frenezigis Andreon.

— Mi iras Constanta-n. Mi vidos Joĉjon. La malfeliĉulo, — bone, ke li saviĝis. Tiuj skarlatinoj estas tre danĝeraj.

— Kiu vi estas, sinjoro? — malespere demandis la staciestro penante rememori pri la interkonatiĝo. Bonvolu diri, kiu vi estas kaj kie ni interkonatiĝis?

— Verŝajne li bedaŭras, ke li ankaŭ ne ĉeestas kun la kuzinoj kaj kun la bofilo ricevinta libertempon.

Mallonga fajfo, trumpeta sono kaj longa, elnaza: "preta" ekirigis la vagonaron. Unu momenton la staciestro pensis pri la haltigo de la vagonaro, sed la penso pri la respondeco ne lasis lin.

— Kiu vi estas, sinjoro, de kie vi konas min tiel bone?

— Dio helpu vin! Andreo, junulo, ĉu vi tiom

stultiĝis? — Kaj la vagonaro ekmoviĝis.

— Sinjoro!...

— Vi stultiĝis? Vi stultiĝis! — kriis Bucŝan el la fenestro.

Andreo Jonescu, kun la ruĝa ĉapo en unu mano, kaj per la alia viŝante la ŝviton de sur la vizaĝo pli ruĝa ol la ĉapo,[4] komencis kuregi post la vagonaro, petegante Bucŝanon, ke li diru sian nomon. Tamen ĉio estis vana. Je la plezuro de la vojaĝantoj de la doktoro, la vagonaro ekrapidis. Andreo restis malantaŭe, kvazaŭ fulmtrafita, rigardante la poŝtukon malproksimiĝantan simile al papilio.

La stacidomo restis malgaja, dezerta. Servisto balais la peronon. Monotone frapetis la telegrafilo. De tempo al tempo sonis la nigra sonorilo apud la horloĝo por sciigi preterpason de vagonaro, kaj ĉiufoje ŝajnis al Andreo, ke iu trapikas najlon tra lia koro. La vagonaro ĝi estis kun la nekonato, kiu tiel bone konis lin kaj pri kiu li ne povas rememori.

Nerve li iradis, penante rememori ĉiujn lokojn, kiujn li vizitis, ĉiujn homojn, kiujn li konis, laŭvice li pensis pri oficejoj, vendejoj, kie li ion aĉetis, sed vane. Li ne povis trovi la vizaĝon de tiu nekonato.

Post kelkaj tagoj, tagoj de suferado kaj ekscitiĝo, li forgesis la vizaĝon de la nekonata homo en la vagonaro. Dika nebulo lokiĝis sur ties vizaĝon kaj ĝi malaperis ĉiuminute; por refreŝigi la memoron, li iris tien, kie okazis la okazintaĵo kaj levante la okulojn supren, li kredis, ke ili ankoraŭ interparolas.

Iom post iom la figuro de Bucŝan tute viŝiĝis el la suferanta menso de la staciestro kaj ĝi malaperis, kiel malaperis la vagonaro ĉe la vala kurbiĝo, irante al la Danubo.

Ĉiutage li atendas la vagonarojn venantajn de malsupre, eble li retrovos lin, kaj li ĵuras, ke tiun fojon li ne ekirigos la vagonaron antaŭ ol li eksciis, kiu li estas.

Nokte li terure turmentiĝas por rememori la figuron de tiu, kiu tiel bone lin konas. Multfoje, sonĝante, uragane li ĵetas sin en la estintecon, li ekprenas iun, alportas lin al klara lumo, rigardas lin, sed apenaŭ rekonante lin, li vekiĝas kaj en la matena lumo, kiu disigas lian lastan esperon, li aŭdas voĉon, kiu mallaŭte flustradas de malproksime:

— Andreo, junulo, vi stultiĝis, vi stultiĝis!...

[1] El rumana literatura revuo "Adeverul Literar"
[2] Konstanca, apudmara banloko.
[3] Elparolu: Bukŝan.
[4] En Rumanio la fervojisto portas ruĝan ĉapon.

El la rumana: S. P.



LA GLACI-MALVARMULO.

MOJŜE TAJĈ.

EL "LITERATURA MONDO"

Kiam ŝi konvinkiĝis, ke li neniam atentas ŝiajn nigrajn brilantajn okulojn, nek ŝiajn marmorajn, kvazaŭ de artisto skulptitajn, duonnudajn brakojn, ŝi foje haltigis lin ĉe kruciĝo de du bruantaj stratoj, kaj alparolis:

— Pala homo, via korpo estas malgrasa, viaj okuloj brulas kaj la vestoj sur vi estas ĉifonitaj... Mi amas vin, kiel mian vivon, kunprenu min en vian loĝeon — servistino via mi estos.

— Bela infano — li ekturnis sian brulan rigardon al ŝi — tro alta estas mia loĝejo por vi... Turniĝos via kapo kaj ekdoloros la piedetoj... Kion mi faros kun vi en la supro?

— Pala homo, eĉ se via loĝejo estos sub la nuboj, mi pretas vin sekvi... Kaj se ekdoloros la piedoj, mi iros sur la manoj; mi volas vivi kun vi en la supro.

— Bela infano, malgranda estas mia ĉambro, kaj malordo regas en ĝi... Mi havas tie plenan ĉielon sed malmulte da pano... Ne penetras tien la bruado de la veturilradoj, la tumulto de la marĉandado, kaj la homoj aspektas de malsupre kiel pigmeoj, kaj la domoj, kiel malliberejoj.

— Pala homo, mi volas vivi kun vi en la supro, eĉ se tio kostus mian vivon.

Kaj respondis je tio la palulo kun la brulantaj okuloj:

— Se via deziro estas tiel granda kaj forta, mi permesas al vi sekvi min.

Ĉirkaŭe vidiĝis nur tegmentoj de malsupre kaj ĉielo de supre — tutaj pecoj de blua ĉielo pendis kiel kurtenoj, kaj pli malproksime estis senlimaĵo. La pala homo sidadis ĉe la tablo, tenis la plumon inter la fingroj, la kapon apogis sur la manon kaj liaj okuloj brulis... Kaj ŝi, la belulino, la suferantino staris malproksime kaj obeis lian plej bagatelan ekdeziron, atentis lian plej malgrandan ekmovon. Ŝi riparis liajn vestojn, kaj kisis liajn brulantajn okulojn kaj li ĉiam sidadis kaj skribadis. La skribitaĵon ŝi kutimis porti malsupren, al la homoj, kaj interŝanĝadis ĝin je pano kaj sukero, kaj per tio servicigis la tablon.

Kaj malsupre lia nomo famiĝis tra urboj kaj regnoj. Sed pri tio li ne sciis, aŭ ne volis scii...

Kaj kiam alvenis la aŭtuno, kaj la klara ĉielo kovriĝis per grizplumbaj nuboj kaj pluveto ekgutis, ektiklis ŝia koro kaj ŝi ekparolis al la amato:

— Kien malaperis nia ĉielo? Mi vidas ĉirkaŭe nur grizan nubaron.

— Mi portas mian ĉielon en la kapo — li respondis.

— Kaj mi volas ĝin porti en mia koro — apenaŭ elflustris ŝiaj lipoj.

Sed li plu ne atentis ŝiajn parolojn kaj ŝin ne komprenis.

Ŝi estis silentanta dum la tuta aŭtuno.

Kaj kiam venis la vintro, kaj ŝi frostotremis, en bela stelradia nokto ŝi ekplendis:

— Estas al mi malvarme... baldaŭ mi estos frostiĝanta...

Kaj ŝiaj dentoj klakadis pro malvarmo.

Tiam li respondis en la frosta stelluma nokto:

— Viaj dentoj klakadas, kaj vi malhelpas mian laboradon. Kaj mia laboro estas granda kaj grava: mi kolektas sur la papero la orajn stelojn de la frosta stelplena ĉielo por la estontaj generacioj.

Kunpremis ŝi la dentojn kaj kunmordis la lipojn, por ke ŝi ne malhelpu lian laboradon eĉ per susuro. Kaj ŝi tiam ne malamis lin en sia koro — male... la amo pligrandiĝis ĉiutage...

La printempon ŝi travivis kiel birdeto, kaj disvolviĝis, kiel floro.

En unu de la belaj amplenaj vesperoj ŝi malkaŝis al li sekreton:

— Mia plejamato, la printempo respegulas sin en la aero kiel klarpura fonto, kaj mia koro ŝiriĝas el la bordoj, kiel la rivereto en la valo: mi volas havi de vi idon...

Kaj li respondis al ŝi:

— Bonulino kaj fidelulino, la suferoj de naskantino estas tre grandaj. Vi krios pro doloroj kaj erarigos mian laboron kaj malbonfaros al la mondo...

Ŝi diris:

— Se la suferoj estos grandaj, mi kunpremos la lipojn kaj ne eligos ĝemspiron kaj ne malhelpos vin en via utila laborado... Mi volas havi de vi idon...

Kaj ŝi havis de li infanon.

Forpasis semajnoj kaj monatoj kaj tiam ŝi refoje sin turnis al li:

— Mia amato, ĝis nun mi ankoraŭ ne scias vian nomon, kaj mi ne scias, kiu vi estas... Mi sentas, ke vi estas granda. Mi volas scii, kion mi diru al mia filo, kiam li plenkreskos kaj min demandos, kiu estis lia patro.

— Mian malnovan nomon mi forgesis... Erarvaginte en la monddezertoj mi perdis ĝin... Kaj mia nova nomo sonos fremde en via orelo kaj nenion diros al via koro...

— Kaj tamen mi volas scii vian nomon... La tuta mondo scias ĝin, sole al mi — al la patrino de nia ido — ĝi estu nekonata?...

— Mia nomo estas — la glaci-malvarmulo. Vi ektremis? Vi, malfortulino!...

— Mi plifortigos min... mi plifortigos min...

Kaj tutajn monatojn ŝi plifortigadis sin, sed ŝia forto pli kaj plimalgrandiĝis. Io ŝin ofte estis timiganta kaj la koro komencis frostiĝi... Ĉiutage plikreskis la timo kaj ŝi ree alparolis la palulon:

— Mia pala edzo, via nomo sonoras tra multe da mondoj, ĉiuj parolas pri vi kaj ĉiuj — mi aŭdis — admiras vin... Laŭtlegu ion, pri kio vi skribas por la mondo.

Kaj la palulo legis de la loko, kie li estis haltinta: "... Kaj vidiĝis verdaj kampoj, arĝentaj riveroj, kampoj kun matura greno, kaj restis nur unuopuloj sur la mondo, kaj la unuopuloj loĝis en la supro kaj ĉiuj ceteraj estis sklavoj... Ili falĉadis la grenon kaj muelis la tritikon, kaj glutis ĉiun vorton de la homoj loĝantaj en la supro..."

— Vi, pala patro de mia infano, mi ne komprenas vin... Per kio mi valoras malpli ol tiuj, loĝantaj tie, malsupre?...

— La subuloj ankaŭ ne komprenas min — respondis la glaci-malvarmulo kaj lia vizaĝo ankoraŭ plipaliĝis — ili eraras...

— Por kiu do vi vivas? ŝi apenaŭ kuraĝis demandi.

— Por la estontaj generacioj, alvenontaj... Kaj post momento li aldonis:

— Malfortulino, vi malhelpas min en la laborado per viaj demandoj!...

— Ankoraŭ demandon, mia estro, kaj mi mutiĝos.

— Demandu, mi pretas vin respondi.

— Kion vi faros kun mia infano postkiam mi estos mortinta?

Kaj ŝia voĉo tremis.

Sed lia voĉtono sonoris firme kaj decide:

— Mi portos lin malsupren, por ke li tie vivu.. Se li havos sufiĉe da forto, li mem leviĝos supren; se ne — li restos inter la sklavoj...

Senforte ŝi falis sur la liton:

— Ho, vi amata, vi, glaci-malvarmulo!...

Kaj ŝi grave malsaniĝis. Ŝi kunpremis la lipojn kaj ne eligis eĉ unu ĝemkrion, por ke ŝi ne malhelpu lin en la laborado. La infanon ŝi mamnutris per sia malsana venena lakto kaj murmuretis:

— Tro malvarma estas por vi la mondo, mia animeto... iru kun mi.

Kaj ambaŭ ili mortis ĉirkaŭpreniĝintaj. Eĉ spiro ne aŭdiĝis en la supro, sole en la anguletoj de l'ĉambro crarvagis sono, kvazaŭ birdeto elpepus el la malvarmaj lipoj:

"Ho, la glaci-malvarmulo!"

Kaj li... li sidis turninta sian dorson al la mortintoj kaj rapidis priskribi por la venontaj mondoj, kiel mortas malfortaj infanoj, kiuj spiras la acron de l'supro...

El la juda J. Jurysta.



EN LA GASTEJO.

De Konstantin Veličkov.

el la "Bulgara Antologio"

Mi estis irinta en la gastejon. Tion ĉi mi faris ne malofte, post fino de laboro, unue por spiri iom da freŝa aero kaj due, por troviĝi kelkan tempon en soleco, bezono, kiun kredeble sentas ĉiuj, kiuj portas ian societan ŝarĝon.

La vetero estis malvarma, kaj mi eniris en la kafejon. Ĝi estis senhoma. Nur en la fundo sur seĝo estis vilaĝano, kiu manĝis. La kafejestro dormetis malantaŭ sia tablo. Aŭdinte, ke eniras homo, li stariĝis kaj rekoninte min, li ekriverenceis al mi kun afabla rideto, kiu, se ne estus lia ŝopi-mantelo, povus vin igi lin rigardi kiel Vienan kelneron. Li sciis mian kutimon kaj, antaŭ ol mi sidiĝis, li konjektis mian deziron.

— Kafon, sinjoro, ĉu ne? Tuj.

Mi fiksis la rigardon nevole sur la vilaĝano, la sola krom mi gasto tiutempe en la kafejo. Mi rigardis kaj preskaŭ ne levis la okulojn de li dum la tuta tempo de mia restado tie ĉi. Por ne maltrankviligi lin per mia scivolemo, mi turnis min flanken nur, kiam dum sia manĝado li vole aŭ nevole ĵetis rigardon al mi.

Ne estis scivolemo, kiu min puŝis rigardi lin. Mi vidis antaŭ mi homojn, kiuj manĝante, prezentas al li veran feliĉon, tamen neniam restis en mi tia forta impreso.

La bildo eĉ ĝis nun staras antaŭ miaj okuloj. Al mi ŝajnas, ke se mi ekprenus la penikon, mi povus tuj pentri lin.

La kafejestro alportis al mi la kafon kaj volis ankaŭ ekparoli kun mi, kiel li ordinare faris, kiam ne estis aliaj klientoj krom mi, sed mi nekonscie interrompis lian deziron paroli, ne volante fortirigi mian atenton de la vilaĝano.

El tio, kion mi vidis, mi povis facile konkludi, ke la vilaĝano estas ĉi tie de sufiĉe longa tempo. Li manĝis tiel malrapide, kredeble ĉar li havis apetiton. Almenaŭ mi volis tiel pensi.

Sur la nuda tablo estis apud li granda peco da pano, nigra, el sekalo, kiun li verŝajne kunportis.

Mi vidis nenian sakon apud li, sed tie ĉi estis, ŝajnis al mi, nur blanka pano, kian povis ricevi la ordinaraj vizitantoj de la kafejo. Antaŭ li blankis trunketo da poreo ŝelita, kies verdaj finoj estis fortranĉitaj. Je malgranda distanco estis videbla amaseto da papriko, elŝutita rekte sur la tablon. Tio ĉi estis lia tuta manĝaĵo, kaj kiel manĝilaron li havis tranĉileton de Kostenec, kiu, pro la maniero laŭ kiu ĝi plenumis sian servon, supozeble estis bone akrigita.

Li rajte amis sian tranĉileton kaj ĝin bone prizorgis. Ĝi estis elemento de lia feliĉo.

Li prenadis sian tranĉileton en la dekstran manon kaj premante per du fingroj de sia maldekstra mano la poreon, detranĉis maldikan tranĉaĵon, poste lasis la tranĉileton, prenis per du fingroj la detranĉaĵon de la poreo, trempis ĝin delikate en la paprikon kaj ĝin metis en sian buŝon. Post tio li prenis denove la tranĉileton, tranĉis de la pano manĝopecon kaj samceremonie metis ankaŭ ĝin en sian buŝon, komencante post tio malrapide kaj dolĉe maĉi.

Tio ĉi daŭris tutajn minutojn kaj kiam li finis je unu manĝopeco, li detranĉis ree sammaniere unu rondan tranĉaĵon da poreo, trempis ĝin en la paprikon kaj, metante ĝin en la buŝon, detranĉis pecon da pano, kiun li faldis en sia mano kaj metis ankaŭ ĝin tien.

Tiel agrable, dolĉe kaj malrapide maĉas la bestoj, kiam ili havas la okazon krakmordeti la delikatan herbeton aŭ la bonodoran fojneton.

Ĉu estas bezone diri al vi, ke tiu ĉi similigo estas tute sincera, sen ombro de ofenda penso? Mi ne scias kiel pli ĝuste mi povus prezenti la feliĉon de tiu homo.

La kafejestro estis denove dormetanta malantaŭ sia tablo. Mi delonge estis eltrinkinta mian kafon, sed mi ne povis foriĝi de tiu ĉi vidaĵo.

La vilaĝano daŭrigis manĝi, tranĉis al si delikatajn tranĉaĵetojn el la poreo, trempis ilin en la paprikon kaj aldonis post ĉiu tranĉaĵo po unu manĝopeco da pano, ĉiam tiel zorgeme detranĉitan per la tranĉileto de Kostenec. Mi povus kalkuli liajn manĝopecojn. Apenaŭ rimarkeble malgrandiĝis la poretrunketo kaj la panpeco. Ju pli li proksimiĝis al la fino, des pli malrapida ŝajnis al mi lia maĉado kaj tranĉado de novaj manĝopecoj, kvazaŭ li volus intence daŭrigi sian ĝuon.

Mia rigardo al li ne povis satiĝi kaj nevole mi demandis min ĉu tiuj, kiuj revas pri bonstata vivo kaj bazas la feliĉon sur la ebleco havi sur sia manĝotablo pli multajn kaj pli luksajn kaj majstre preparitajn manĝaĵojn, ĉu ili havas unu momenton, pri kiu ili povus diri, ke ili manĝis tiel bonguste, kiel manĝis antaŭ mi tiu vilaĝano.

Ĉu li konis sian feliĉon? Aŭ ĉu ankaŭ la feliĉo, la vera feliĉo, estas kiel la sano? Kiam ni havas ĝin, ni ne pensas pri ĝi.

Mi ne scias kiel longe daŭris la manĝado, sed, kiam restis nenio de la pano, nek de la poreo, li kolektis zorgeme la panerojn de la tablo en sian manon, iom premis ilin en sia manplato, kvazaŭ por formi manĝopecon kaj, levinte iom sian kapon, li elŝutis ilin en la buŝon. Li faris tion tiamaniere, ke kredeble eĉ unu panereto ne falis teren. Post tio, restinte iom sidanta, li stariĝis, iris al la tablo, kaj el karafo, kiu estis tie, li verŝis al si glason da akvo kaj ĝin brueltrinkis tiel bonguste, kiel bonguste li manĝis.

La kafejestro turnis la kapon al li, li apogis sin per unu el la manoj sur la tablo kaj inter ili komenciĝis la interparolo, kiun mi ne bone aŭdis.

La interparolo daŭris sufiĉe da tempo. Mi ne ĉesis rigardi la vilaĝanon kaj pensi pri lia manĝado, kiun mi senintence ĉeestis. Verŝajne li estis el iu de la proksimaj vilaĝoj, estis konato de la kafejestro kaj ili interparolis pri aferoj, kiuj interesis ilin.

Post la interparolo, la vilaĝano iris denove sur sian lokon kaj ekŝajnis al mi, ke li sin delasis al ia dolĉa meditado. Min ektiklis deziro ekparoli al li, sed mi ektimis ne detrui la belan impreson, kiun li estis lasinta al mi per sia manĝado, mi pagis kaj riverencante respekte al la kafejestro kaj al li, mi ekiris en la urbon.

La sceno ne eliĝis el mia memoro kaj neniam eliĝos. Mi ofte rememoras ĝin, kaj precipe, kiam mi aŭdas paroli ĉirkaŭ mi pri feliĉo pri feliĉaj homoj.

Tradukis Ivan H. Krestanov.

LA PORDISTO.

Teo. Kilian.

El "Literatura Mondo"

Ĉiu provinca urbeto havas tipan viron, konatan kaj primokatan de ĉiu samurbano, precipe de la infanoj. Ankaŭ nia urbeto havis tian. Sed kontraŭ ĉiu kutimo eĉ la plej grandaj fiknaboj ne kuraĝis lin moki aŭ postkrii laŭ knabaĉkutimo, kvankam la altkreskuloj, parolante pri li, trovis nur vortojn, kiujn ili akompanis per milda, pardonema rideto. Estimon ĝi certe ne signifis. Tamen ni buboj sentis en la proksimo ian strangan, preskaŭ misteran respekton. Tio sentiĝis ankaŭ ĉe la altkreskuloj, sed malagrable, ĉar ĝi estis nekomprenebla. Kontraŭ tiu malagrableco, oni opiniis plej bona rimedo la mokridon — je distanco. Laŭ lia eluzita surtuto, kiun li portis eĉ somere, li estis jam de malproksime rekonebla. Pri liaj vivrimedoj cirkulis la plej diversaj opinioj kaj asertoj. Ion certan neniu sciis. Stranga, kiel lia estaĵo, estis ankaŭ lia nomo, sub kiu lin ĉiu konis: Pordisto. Lian veran nomon sciis neniu, eble eĉ li mem ne, tiel li jam kutimiĝis al sia pseŭdonimo.

Ĉie, kie kunvenadas multaj homoj, li estis trovebla. Tial li plej volonte restadis en la atendejo de stacidomo. Li sidis ĉiam apud la pordo kaj ŝajnis nenion vidi kaj aŭdi. Sed li nur ŝajnis. Ĉar jen: belkreska, riĉvestita sinjorino, kun vangoj ruĝiĝintaj pro la ekstera malvarmeco, envenis, lasante la pordon malfermita. Tuj liaj okuloj ekbrilis, liaj trajtoj streĉiĝis, lia tuta korpo ricevis energion. Li prezentiĝis kiel tute alia.

—"Pardonu, sinjorina moŝto, sed vi forgesis fermi la pordon..."

Malestima rigardo trafis nian Pordiston, sed sen embaraso li daŭrigis..."kaj mi petas, fermu ĝin!"

En lia vizaĝo kaj voĉo estis io deviga kaj, kvazaŭ senkonscie, reiris la sinjorino kaj fermis. Liaj trajtoj mildiĝis, liaj okuloj eĉ ekridetis kaj, por pacigi la embarasitan sinjorinon, li aldonis: — Estus ĉi tie tro malvarme.

Sed jam eniris knabo lasante la pordon malfermita.

—"Ho, knabo, vi ja volas varmiĝi ĉi tie, tial fermu la pordon, por ke la vintro ne englutu nian varmon."

Tio ne estis ordono incitanta al obstino, kaj, ferminte la pordon, la knabo sidiĝis en angulo, rigardante simpatie kaj scivoleme la viron.

Maljuna, malforta virineto, kun peza dorssako kaj grandaj pakaĵoj en la manoj, enŝoviĝis tra tro mallarĝa pordeto kaj sensukcese provis fermi la pordon. Tuj nia Pordisto alsaltis.

—"Ne penu, mia bona, mi jam fermos."— Kore ŝi dankis, sed vane ŝi serĉis sidlokon por ripozi; ĉiuj estis okupitaj.

—"Sidiĝu ĉi tie sur mian lokon, mia kara."— La sendenta buŝo de la maljunulino ĝoje ekridetis. Elkore ŝi superŝutis lin per danko sincera. Pordisto iom ruĝiĝis. Ĉu pro ĝojo? Ĉu pro embaraso? Jes, pro embaraso.

El ĉi tiu malagrabla stato lin savis viro eniranta. Kvankam li malsuprenpremis la anson, la pordo restis tamen malfermita. Li volis jam foriri.

—"Malfacile estas fermebla ĉi tiu pordeto, mia sinjoro, sed se vi ĝin antaŭe forte alpremos, vi sukcesos."— ... Kaj li sukcesis.

La malatentemuloj estis ĉiuj fremduloj — la samurbanoj de Pordisto jam kutimiĝis al ordo por eviti la malagrablan atentigon. Pordisto estis severa kaj persista instruisto!

La vagonaro alvenis. Ĉiuj vojaĝantoj amasiĝis ĉe la pordo kaj la maljuna virineto kun la pakaĵoj malespere ĉirkaŭrigardis.

—"Ne maltrankviliĝu, mia kara, mi helpos vin" — kaj li deprenis ĉion de ŝi, por ke ŝi havu manojn liberajn. Ĝis en la vagonon li ŝin akompanis: — Kaj nun feliĉan vojaĝon! — Ho, vi estas bona homo, pli multe li jam ne aŭdis.

Malrapide li reiris en la atendejon. Sola li estis kaj meditis. Sokrato estis bonega instruanto kaj edukanto, sed li tamen eraris. Li klarigis al siaj disĉiploj, kio estas bona kaj opiniis, ke tio sufiĉas, por ke ili ankaŭ agu bone. Li konjektis kaj kredis, ke la homoj nur tial ne agas bone, ĉar ili ne scias, kio estas bona. Tiu ĉi lia kredo estas ja pruvo de lia ĝisfunde nobla karaktero, sed tiu ĉi kredo tamen estis eraro. Ne, la sola scio, kio estas bona, efikas preskaŭ nenion, se ne aliĝas ekzerco, kutimo fari bonon. Post ĉiu oni devas iri, ĉu knabo, ĉu viro kaj devas morale helpi ilin realigi la scion. Ĉi tiu praktiko komenciĝas ĉe la fermado de la pordo, kiu estas la 2X2=4 de la socia bonfarado. Malfacila estas tiu realigo.

Tial la plej multaj moralistoj uzas la oportunan frazon: — Ne atentu miajn agojn, sed miajn vortojn. — Sed tia moraleco lamas...

Li ankoraŭ longe filozofis.

Antaŭ kelkaj tagoj Pordisto mortis. Nur kelkaj maljunaj virinoj kaj mi lin akompanis. Irante post la modesta ĉerko,pensoj diversaj trairis mian kapon. En la ĉielo li certe daŭrigos sian teran okupon kiel helpanto de l' sankta Petro. Anĝeleto ruĝvanga alparolanta vin: "Mia bona, vi forgesis fermi la ĉielpordon" — certe estos li. Tial atentu!



DU MORTINTOJ.

Poemo en prozo.

El "Literatura Mondo"

Sonĝon mi vidis nokte, teruran sonĝon kaj mian afliktitan animon konsolis nur la vekiĝo. Mortis la Penso... La plej potenca fenomeno de l' vivo kuŝis forgesite en la putranta koto de la hombestaj inklinoj... Stranga egaleco regis la Teron kaj la Homo egaliĝis je la bestoj... Mortis la Penso, sed la Vivo plu pasis sur la vojo de l' tempo kaj vivi estis nek feliĉe, nek turmente — ĉar restis la "ĝuo de l' minuto", sed la Homo — ho ve — sciis nenion pri tio!...

Kaj nun reviviĝis la Penso kaj mortigis la efemeran "ĝuon de l' minuto"... Mortis la amo! Ĉe la enterigo de la potenca senkorpa kadavro parolis la Penso al la funebranta homamaso pri la pureco de la spirita vivado,... sed vane, ĉar kun la Amo mortis la Vivo mem kaj restis sole — la Tempo...

La amo estas vivo kaj la nura spirita ekzisto estas iom-post-ioma forperdigado de la Vivo mem.

De Julio Baghy.



DONACO.

De Kiril Hristov.

El la "Bulgara Antologio"

Estas sunbrila maja tago, kiu kvazaŭ volis esti pli serena ol ĉiuj aliaj tagoj. Ĉirkaŭe, proksime kaj malproksime, aro da montoj estas ronde dancanta. Arbarodoro onde disvastiĝas, kaj plenplena je aromoj estas la kvieta montarventeto. Bela lago de Macedonio per giganta blua okulo rigardas al la ĉielo. Sur montdeklivo staras malgranda aro da dometoj kun ruĝaj kaj grizaj tegmentetoj, kvazaŭ iu nur en luda kaprico estus ilin tiel ordiginta; areto da etaj herbejoj kaj grenkampoj kuŝas intermiksite. Pli supre ŝtonaroj kaj rokoj garde staras simile al grandegaj blankaj ranoj.

Laŭlonge de la bordo de la lago banas sin senvestiĝintaj soldatoj. La suno superŝutas per siaj radioj centojn da bronzkoloraj korpoj en plej diversaj pozoj kaj movoj. Unuj, ĵus senvestiĝintaj, postkuras unu la alian kaj interluktas sur la sablokovrita lagbordo; sur iliaj brakoj kaj kruroj fortaj muskoloj ekŝvelas kaj tremas jen sur unu korpoparto, jen sur alia. Aliaj ŝovas sin en malprofundajn lokojn, ŝprucigas sin reciproke kaj pro plezuro kriegas kiel infanoj. Kaj tiuj, kiuj povas naĝi, jam estas fornaĝintaj malproksimen sur la bluan vastaĵon de l'akvo.

La tuta roto, en kiu servis la „Instruitulo", estis ŝovinta sin en la akvon. La Instruitulo estis naskita en la regiono apuda al la Nigra Maro kaj li naĝis tiel bone, kiel malnova pramisto. Subite de la lagbordo unue kelkaj, poste pli multaj, poste centoj da personoj komencis kriadi:

Instruitulo! Instruitulo! La voĉoj estis tiel klare forportataj laŭ la ebena trankvila akvosupraĵo, ke la Instruitulo kvazaŭ testudo tuj levis la kapon. Li eĉ distingis la voĉon de unu el siaj proksimaj amikoj kaj aŭdis ĉiun apartan vorton de lia kriparolo:

— Instruitulo, venu, ĉar por vi estas paketo! Dimo ĝin alportis!

Dimo, samrotano kaj samurbano de la Instruitulo, antaŭ unu monato estis vundita. Tre rapide resanigita, li estis irinta hejmen por viziti la siulojn kaj nun li estis reveninta. La Instruitulo ekĝojis pro la reveno de Dimo, kaj ankaŭ pro la sendaĵo, kvankam li ofte ricevadis paketojn kaj leterojn de sia juna edzino, kiun li devis forlasi kelke da semajnoj post la geedziĝo.

Li kuŝigis sin dorsen kaj rapide eknaĝis al la bordo. Super li la ĉielo brilis kiel blua silkaĵo. Alte en la suna aero kolomboj flugis tien kaj reen kaj al li estis tiel agrable ilin rigardi! Sed jen ili malaperis kaj li turnis la kapon por ilin serĉi. Lia atento estis altirita de la kapelo, kiu de monteto rigardis la malsupre dissemitajn domojn de l'vilaĝo. Ĝi ridetas kiel blanka fianĉino, flanke, en la sama loko du cipresoj leviĝas ĉielen kvazaŭ densa nigra fumo, kaj sur la najbara monteto florkovritaj arbetoj rigardetis, kvazaŭ malgrandaj perlokoloraj nubetoj.

De sur la bordo ree eksonis:

— Instruitulo, rapidu, ĉar alie ni malpakos ĝin.

—La Instruitulo, kies nomon neniu uzis, estis ŝatata de ĉiuj rotanoj, kaj ĉiuj konstante plej sincere partoprenis liajn malgrandajn ĝojojn. Li estis tia granda bonulo, ke jam en la komenco ĉiuj — estroj kaj soldatoj, fariĝis amikoj al li. En batalo li ĉiam staris kune kun la plej bravaj, dum ripozo li estis dolĉparola kaj ŝercema kunulo, en mizero, en malvarmo, en malsato — neprotestema kaj vigla. Por ĉiu li havis bonan parolon kaj al neniu trudis sian superecon. Eĉ se li estus plej okupata, se oni ekpetus lin pri kiu ajn komplezo, ĉu skribi pli klare adreson, ĉu verki pli bonstile tutan leteron, tuj li lasus sian okupon kaj plenumus la peton. Homo, kiu estas preta eĉ la panpecon el sia buŝo eligi por ĝin oferi al la aliuloj, kiel oni diras.

La Instruitulo, jam ripoziganta siajn brakojn tenante ilin kunplektitajn sur la brusto kaj naĝante nur per la piedoj, nun turnis sin brusten kaj ankoraŭ pli rapide eknaĝis. Alte en la aeron li ĵetis jen unu, jen la alian manon kaj ĉe tio diamantsimilaj gutoĉenetoj ekbrilis en la sunradiaro. Kiam la Instruitulo atingis la malprofundan lokon, li stariĝis kaj ekkuregis al la bordo, ŝprucigante akvon ĉiuflanken. Jus paŝintan sur la bordo, la freŝa spiro de la maja tero kvazaŭ fajrego lin blovumis. Kaj ŝajnis al li, ke unuafoje li estis vidanta la mondon — tiel forta kaj vigla li estis.

Voĉoj, unu la alian antaŭkurantaj, renkontis lin:

— Pli rapide do, Instruitulo!

— Verŝajne de la junedzino, ĉu ne?

— Estas malpezeta, tial ŝajne ne multe da manĝindaĵoj ŝi entenas.

— Kiel vi fartas, Dimo! — li turnis sin al sia ĵus reveninta en la roton vundita samurbano kaj kun sincera movo etendis al li sian malsekan manon.

— Ĉu vi permesas al mi malpaki la sendaĵon? — tirante lin demandis unu soldato.

— Silenton! — ekkomandis kvazaŭ kolerigite la Instruitulo.

La soldatoj, vestitaj en la uniformo de Adamo, tuj starigis sin en du vicojn kaj unuvoĉe ekkriis:

— Laŭ via volo, Instruitulo!

— Libere! — aldiris li kaj kaptis la paketon.

Ĉiuj gaje saltetante ĉirkaŭis lin. La plej senpacienca donis al li tranĉilon. La kovrilo de la paketo estis disŝirita. Sed jen alia paketo zorgeme envolvita en papero kaj ĉirkaŭligita per kanabŝnureto. Sur la papero estis grandlitere skribite: „Atente malpaku!"

— Malrapide, Instruitulo!

— La ovojn vi dispremos!

— La sukero de l'dolĉkuko disŝutiĝos!

La Instruitulo distranĉis la ŝnureton, malvolvis la supran paperon, poste ankoraŭ kelkajn ĵurnalojn, kiuj pruviĝis pli novaj ol la laste legitaj en la roto kaj tial ili tuj zorgeme estis kunfalditaj kaj flankenmetitaj. Jen ree blanka volvilo ankaŭ fikse ĉirkaŭligita per kanabŝnureto. Kaj ree mistera surskribo: „Supra kovrilo!"

— Mirinde! Diabla afero!

— Ne klinigu ĝin!

— Rekte ĝin tenu!

Tiu ŝnureto ankaŭ estis distranĉita kaj tiu volvilo ankaŭ forigita — kaj ree ĵurnaloj, ree ŝnureto kaj volvilo kun la surskribo: „Ne rapidu, por ne difekti ion!" Poste — ree ĵurnaloj kaj ree alia paketo kun la surskribo: „Iomete da pacienco!" Sur la sekvanta volvilo estis skribite: „Ju pli bela estas iu afero, des pli kaŝita ĝi estas!" Senĉese svarmis ruzelpensitaj ŝercoj kaj rimarkoj. Ree ŝnureto estis distranĉita, ree ĵurnaloj — malvolvitaj kaj ree aperis paketo kun surskribo: „Se vi jam laciĝis, ripozu iomete!" La soldatoj ridis kaj paŝetis sur la sama loko kun muskoloj brilantaj en la radiaro de la maja suno. Ĉiam pli malgrandaj kaj pli malgrandaj la paketoj komencis aperi. Sur unu estis skribite: „Proksime ĝi jam estas!" Sur alia: „Ne malesperiĝu!" Sur tria: „Ne fumaĵita femuraĵo estas interne, sed ankaŭ ne malgranda afero: tuta vivanta porkido!"

— Ne eble! Sensencaĵo!

— Vivanta porkido! Tie ĉi eĉ la kapo de vivanta porkido ne povas esti enpakita — konsideris alia.

Kaj ĉiuj, nudaj kaj belaj, ĝojis kiel infanoj.

La Instruitulo atente laboris. Li ĵetis rigardon al ĉiu el la ĵurnaloj, inter kiuj estis ankaŭ fremdlandaj ilustraĵoj kaj li pensis: „Tiuj ankaŭ estas novaj, poste ni legos ilin", kaj senĉese li distranĉadis la ŝnuretojn. Sur plua paketo estis skribite: „Multo pasis". Sur alia estis legebla la enigma frazo: „Ne pensu, ke tiu, kiu sendas la paketon al vi, per malpli grandaj penoj sukcesis aperigi la kaŝitan en ĝi aferon!" La Instruitulo meditis, sed nenion komprenis. Neniu el la ĉirkaŭantoj komprenis la signifon de la frazo, tiel strange kunmetita. Dume la paketo fariĝis tute malgranda, preskaŭ kiom tabakskatolo. Jen nun ĝi estis ĉirkaŭligita per blua rubando kaj portis la surskribon: „Dankon al Dio!" Kun emocio, kiu tuŝis ankaŭ la aliajn kaj finiĝis per trankviliĝo, la Instruitulo malligis la rubandon. Sub la lasta volvilo aperis ordinara kartonskatoleto. Li malfermis ĝin kaj — antaŭe genufleksanta sur la sablo — subite li stariĝis.

En la skatoleto kuŝis simpleta medalioneto volvita en rozkolora paperpeco. Ĝi konsistis el du dikaj vitropecoj kunligitaj per firma ora ringokadro. Sub unu el la vitroj la Instruitulo vidis la

bildon de tute malgranda infaneto, diketa kiel vera porkideto. Ĝiaj okuloj — kvazaŭ karbetoj. Sub la alia vitro estis tufeto da infanaj haroj, nigraj kaj tiel brilantaj kiel peĉo. Sur blanka kartonpeceto, kuŝanta en la fundo de l'skatolo estis skribite: „Gratulon pro la filo!"

La juna patro tute ruĝiĝis pro ekscitiĝo kaj nenion povis diri.

La medalioneto kune kun la ĉeneto ekiris de manoj al manoj kaj la ĵus trankviliĝintaj soldatoj gaje komencis kriadi:

— Miajn gratulojn!

— Mirinde ruza Instruituledzino!

— Gratulon, Instruitulo!

— Gratulon! Bona estas la friponeto!

— Porkideto! Vera porkideto!

— Do longan vivon al ĝi mi deziras!

La Instruitulo, ekreginte sian emocion, metis la medalioneton ĉirkaŭ la kolon kvazaŭ talismanon kaj diris:

— Sed nun mi instruu tiun filetaĉon naĝi, ĉar Bulgarujo nuntempe ja havas multajn marojn kaj lagojn.

Liaj kamaradoj ekkriis „hura" kaj sin ĵetis al la lago, ĉar la forta sunbrilo kaj la arda sablo bruligis ilin. Tuj la rando de la blua akvospegulo estis disrompita. Inter miloj da gutoĉenoj en viglegaj kaj belaj movoj estis videblaj la fortikaj kaj sunbruligitaj korpoj de l'soldatoj.

Kiam ĉiuj enŝovis sin en la akvon kaj la kriado momente ĉesis, aŭdiĝis sin malproksimaj pafoj de kanonoj, kiuj bruis ie en sudo.

Tradukis Ivan H. Krestanov.



KIAM LA ANIMO DEMANDAS.

POEMO EN PROZO.

EL "LITERATURA MONDO"

Kial vi esperas de la vivo tion, kion ĝi ne povas doni? Kial vi volas rikolti fruktojn, kiujn vi ne semis? Kial vi kredas je la alia mondo, kiam eĉ la teraĵoj trompas vin? Kial vi parolas pri Dio, kiam eĉ la vivon mem vi ne konas? Kaj kial naskas la patrinoj, se la idoj ne povas fariĝi aliaj ol nur homoj kaj ... kial ili ekzistas, se ili ne povas vere homiĝi?

En silenta horo de l' soleco uragane atakas min la animo per amaso da demandoj kaj dolore turmentas sin per malespera meditado. Ĝi esploras ĉion ĉirkaŭ si, observante ankaŭ sin mem ĝi postulas ĝemplore respondon de mi pri la kialo de sia ekzistado.

— Vivi estas abomene kaj la homoj estas pli trivialaj, ol la bestoj. Korvo ne elpikas okulojn de sia korvofrato, dum la homa vivo konsistas el senĉesa batalo unu kontraŭ alia ... Kio estas la Homo? Kio estas la celo de la Homo?

Respondon ĝi petegas de mi kaj mi estas devigata — mensogi ... Tiel mensogi, kiel patro al sia demandema fileto pri afero eĉ de li mem ne konata.

La Homo estas materio, miksita el karno kaj sango, el aro da pasioj, en kiu vivas ia prainstinkto ... aŭ ... ĝi estas ludilo de iu mistera forto kaj imagas sin krono de ĉiuj kreitaĵoj.

— Krono de ĉiuj kreitaĵoj, kiu ne konas, kiu seninterrompe nur serĉas la kialon de la vivo kaj dum la vana esplorado enprofundiĝas en putraĵon de teorioj, perdas sin en la devioj de la vivlabirinto? Hahaha! Krono de ĉiuj kreitaĵoj ... Sed kio estas la celo?

Mensogi estas la celo de Vivo. Kiel eble plej bele ornami la ekzistadon per kolorriĉaj mensogaĵoj. Mensogi dolorojn kaj plezurojn, mensogi dezirojn kaj celojn; vivi por malveraĵoj kaj morti pro falsaj dioj; jen estas la celo de la vivo. Kiu plej bone konas la arton de l' mensogado, tiu fiere povos diri ĉe la pordego de la morto: — Mi vivis! ... Ne serĉu la kialon de la vivo, sed mensogu al vi mem, ke vi jam estas trovinta ĝin, por ke vi neniam afliktiĝu ... Tiu arto, kiu donas la vivon mem, ne estas tiel alloge brilanta, kiel tiu, kiu kovras ĝin per la vualo de l' konekteco. Amu la artojn, ĉar ili mensogas. Lernu de la artistoj, ĉar ili povas sorĉe survesti eĉ la abomenaĵojn per diaj ĉifonoj de iluzio.

Vidu la vivon bela, akceptu ĝin tia, kia ĝi estas kaj se por momento vi rekonas vin en iu homa monstro; se vi ektremas pro naŭzo: mensogu al vi mem, ke la spegulo montrita de la hazarda minuto, estas kurba kaj mensoga. Kaj nun, animo mia, kriu: "la vivo estas vantaĵo" kaj ebriiĝu sovaĝe per la vino de l' senkonscio ... ekdormu por ne mediti pri vanaĵoj .. neniam, neniam plu! .. Dormu! ... Ne sentu la dolorojn, kiujn la nevola observado de la homa vivo kaŭzas al vi ... kaŝu vin for de la vizaĝo de l' ĉiutaga vivbatalo kaj via narkoto estu profunda, sensonĝa ... ne havanta celojn neatingeblajn ...

Silento ... Subite en la muta silento iu ekridegas kaj, mokante min, ĵetas rekte al miaj okuloj: Oni plej mirinde mensogas, se oni sincere volas interpreti pervorte la sentojn! ... kaj mi rekonas kun malgaja rezigno la voĉon de — mia animo.

De Julio Baghy.



LA ŜLOSILISTO DE L'PARADIZO.

DE PETKO J. TODOROV.

EL LA "BULGARA ANTOLOGIO"

Simile al kandelo estingiĝonta en soleco, ŝia vivo apenaŭ lumetis en la domo. Ĉiuvespere, tuj kiam la knabinoj pendigis akvoportilojn sur siajn ŝultrojn, oni vidis ŝin sidanta sur la sojlo antaŭ la lago, ŝajne por aŭskulti pri la dormiga brueto de l'ondoj. Malrapide, kvazaŭ en sonĝo, dum tiuj vesperoj aŭtunaj, ĉio pasinta reviviĝis en ŝia memoro. En mizero kaj malriĉo ŝi ne ĝuis junecon kaj ne povis ripozi eĉ dum la jaroj de l'maljuneco. Ŝia edzo ŝin lasis kun sep infanoj, grade unu malpli aĝa ol la alia. Ŝi nek manĝis sufiĉe, nek dormis sufiĉe, dum ŝi ilin edukis ... Ŝia plej aĝa filo, Petro, plenkreskis kaj tuj, kiam li estis kapabla laborgajni panon por si mem, ankaŭ li foriris eksterlanden; do, ŝi ne povis ricevi helpon de li. Kaj kiam oni komencis persekuti lin, ŝi ne havis trankvilon pro la neceso lin kaŝi kaj konstante zorgi por li. Tio ne sufiĉis, kaj parencoj kaj najbaroj, unu post la alia, kunvenis en la drinkejo, por ŝin riproĉi ĉiutage.

—Malprosperantan filon vi naskis, diris iuj.

—Li venis en la mondon, por ribeli, renversi la registaron, — mallaŭdis aliaj.

Por sin liberigi kaj por ke lia patrino havu trankvilon, li — nenion dirante kaj ne montrante sin al ŝi — forkuris malproksimen kaj ne revenis plu. Tamen unu post alia alvenis sciigoj, laŭ unu oni persekutis lin per ŝtonoj kaj preskaŭ lin mortigis: laŭ alia kamparanoj lin renkontis ie kiel vagantan mizerulon, — fine je l'noktmezo migranto, hazarde veninta en la drinkejon, per terura sciigo rompis ŝian koron. En malproksima lando latina, reĝanoj kaptis Petron kaj kune kun ĉiuj liaj kamaradoj krucumis lin viva... — Kion li komprenis de l'vivo, ne ĝuinte junecon, ne havinte trankvilon?

...Ŝi ĝemspiris kaj direktis siajn rigardojn malproksimen, ŝajne aŭskultante la murmureton de l'aŭtuno.

Knabinoj revenis de l'puto, malproksimaj ombroj ekaperis ĉirkaŭe, for el Jerusalemo treniĝis karavano da muloj, preta por longa vojo, kaj ŝi, enpensiĝinte sur la sojlo, forgesis stariĝi. Kaj kelkaj el la karavanuloj haltis ĉe ŝi sur la sojlo, por konsoli ŝin mallaŭte:

— Tiuj, kiuj dum la vivo persekutis kaj malbenis lin, formortis; eĉ rememoro pri ili ne postrestis; kaj vian filon oni nomis sanktulo, kaj Dio en la ĉielo donis al li la ŝlosilojn de l'paradizo...

— Ke almenaŭ en la alia mondo li havu trankvilon... ŝi diris elreviĝante.

Kaj nur kiam ĉio ĉirkaŭe malaperis, la patrino de Petroferminte la pordon de l'fiŝista kabano, eniris la domon. Dum la nokto falis malvarmeta pluvo aŭtuna, la vento, kiel malfruiĝinta vojaĝanto, ekfrapis fenestrojn kaj pordojn; ŝi sidiĝis sola ĉe la fajrejo, kaj nur unu afero konsolis ŝin. Ĉar ŝia filo okupas en la paradizo tiel gravan postenon, ankaŭ ŝi ne restos forgesita... Iafoje ŝi eĉ deziris en pensoj, ke baldaŭ Dio prenu ŝian animon, por ke ŝi pli frue kuniĝu kun sia filo...

Sed dum vintra nokto, sentante, ke proksimiĝas ŝia lasta horo, kaj la malvarmeto de l'morto ekrampis sur ŝia korpo, ŝi denove ekamis la terajn turmentojn kaj, farinte krucosignon, ekpreĝis — ke Dio plilongigu ŝiajn tagojn, almenaŭ ĝis Pasko. Longe ŝi tremadis, longe ŝi baraktis por konservi la vivon en siaj sekiĝintaj muskoloj, sed ĉiuj penoj estis vanaj. Ĉe malhela krepuskiĝo, ŝi trovis sin antaŭ la pordego de l'paradizo.

Ankoraŭ brilis la plenluno, sur la ĉielo klinis siajn kapojn dormemaj steletoj, kun voĉo mallaŭta torento murmuretis preter la paradizaj muroj.

Ŝi aŭskultis.

— Oni profunde dormas, sed li pardonu: mi ne povas atendi ĝis tagiĝo... Mi vekos lin! — Kaj ŝi ekfrapis sur la pordegon.

Nerevekeble dormas la senpekuloj. Nenio vekas ilin el ilia trankvilo. — Ŝi ĉirkaŭturnetis sin tien kaj aliflanken; neniu respondas. Kaj ŝi ekfrapis ankoraŭ pli forte.

„He, kia trudema gasto venis! Kial li frapas? Ŝajnas, ke li ne povas plu iomete atendi..."

Leviĝis fine Sankta Petro kaj frotis siajn dormemajn okulojn.

— Kiu deziras eniri je tiu tempo? Li enigis la ŝlosilon en la pordegan seruron:

— Ne koleru, Petro! Estas mi, mi... Ĉu vi ne rekonas min? Via patrino!... ekstere ŝi diris spiregante.

— Ĉu vi patrino? — La sanktulo kuntiris la brovojn kaj haltis sur sia loko senmove. Ekbrulis fajro el li, kvazaŭ ekbrogante lian volon. Sed li kolektis sian viran forton. Kio do, se tio estas lia patrino? Dio lin ja faris gardisto de l'paradizo, ke li indulgu nek parencojn, nek proksimulojn!

— Mankas loko ĉe Dio! li respondis mallaŭte.

— Kio! Ĉu mankas loko por mi? ekmiris la patrino, ne fidante al siaj oreloj.

— Kion vi faris surtere, tion vi ankaŭ trovos en la ĉielo! Treege vi kolerigis Dion. Kiom da mizeruloj vi forpelis de la pordo, kiom da proksimuloj vi forsendis — nenio instigis vian koron helpi al malriĉuloj...

— Ĉu ankaŭ ĉi tie vi komencus pri la malriĉuloj!

Ŝi interrompis lin, kaj malĝojo sufokis ŝian gorĝon.

La sanktulo firme daŭrigis: Kiam ni havis drinkejon ĉe la krucvojo, se venis komercistoj, vi per plena pokalo regalis ilin: se malriĉuloj volis aĉeti buteron, vi vendis ĝin al ili mankakvante. La ruĝan pipron vi vendis al ĉiuj vilaĝanoj; miksitan per brikaĵo; en la farunon vi miksis polvon, en la lakton akvon. El fremdaj fiŝkaptejoj nokte vi forprenis la fiŝojn, kaj tamen vi grumblis...

— Ĉu tio estas miaj pezaj pekoj, pro kiuj vi ne volas enlasi min? — Ŝi paŝis antaŭen kaj metis siajn manojn sur la bruston, unu sur la alian. Mi opiniis, ke ĉar Dio vin lasis ĉe tia posteno, almenaŭ vi plisaĝiĝis kaj tamen, jen... Ĉiam la sama! ...Vi komencis citi miajn pekojn... Ĉu vi edukis infanon, ĉu vi restis hejme, por scii kiel edukiĝas kaj plenkreskas etaj infanoj?... Ĉu vi venis eĉ nur unufoje, por alporti ligneron, aŭ iel anstataŭi miajn manojn...? Ĉu restis al mi, ŝarĝita per sinokupoj, tempo por ekpensi iomete pri mia animo?! Kiam vi, vagemulo, estis forkurinta, kiu endomigis vin, kiu ree sin ekpendis al mia kolo?... Vi fordonis ĉemizon de via propra dorso al aliaj, — ĉar mi ŝpinis ĝin kaj vestis vin. — Sed ĉu mi aŭdis aproban diron de vi sur la tero? Kaj nun, en la ĉielo, ĉu mi klopodu argumenti...? Se vi ne enlasas min, mi ne petos. Mi estas hardita kontraŭ suferoj.

Svingante la manon ŝi ekiris sola al la malluma nokto de la infero, kiu bolegis tie.

Petro restis konsternita sur sia loko. — Ĉu ankaŭ ĉi tie Dio preparas terurajn provojn por li?— Li ŝanĝis iomete sian lokon kaj fleksis siajn kruron, por sidiĝi en la larĝa niĉo enigita interne en la muro apud la pordego. Li apenaŭ memoras sian patron, kiam per ŝipo li kondukis lin observi fiŝkaptilojn: La patrino lin nutris kaj edukis kaj ĉiam esperis, ke li altkreskinte helpos al la malpli aĝaj gefratoj. Kaj kiam foje li riparis la patran ŝipon, kiam li diris, ke li daŭrigos lian metion, ĉiuj pleniĝis je ĝojo. Tamen tiam la Majstro venis en la vilaĝon kaj komencis fari miraklojn. Postiris lin junaj kaj maljunaj homoj. Oferis sin ankaŭ li: ĉar en li estis la vero kaj la lumo.

— Mi ankaŭ mortos, diris lia patrino. Ĉu vi opinias, ke ĉi tiu mondo estas iom kara al mi? Se temus nur pri la morto! Sed jen: al kiu lasi tiujn infanojn, kiu zorgos iomete pri ili...?

Petro malatentis tion. Li ekiris prediki la parolon de la Majstro kaj pro tio li suferis ĉie ripro-

ĉojn kaj mizeron. Kiomfoje li revenis nuda, malsata, al sia patrino! Kaj ŝi, vidante lin tiel kompatinda, ekploris kaj denove lin enhejmigis. Tiam lia koro moliĝis, li ekkompatis sian patrinon kaj multfoje li ekdeziris, resti hejme... Sed la Majstro ja ofte diris: „Kiu amas siajn gepatrojn, tiu ne sekvu min..."

Frua matena aŭroro purigis la ĉielon. Unu post la alia, blindaj kaj lamaj, senfortaj kaj palaj, ili ekiris por lavi sin en la torento, karesanta la apudbordajn florojn de l'paradizo, kiu kaŝe fortrenis iliajn karesojn malsupren... Jen aŭdiĝis ankaŭ pia preĝo matena, de tie ĉi kaj de tie aperis kredantoj, kaj ĉiuj miris, ne povante kompreni, kio konfuzis la sanktulon, ĉar li klinis sian kapon kiel pekulo.

„Ĉi tie Dio mem ja donis al li la plej gravan postenon. Ĉu povas tio okazi..."

„Kian zorgon li povus havi?" diris flanke la paŝtistaĉo al epitropo.

— Sed, — ekĝemis profunde Petro, levante la kapon — se Dio vin allasis ĉi tien, se ĉiuj vin konas kaj scias pri vi, kaj tiam vi nur sentas, ke vi estas peka?...

Li mallevis la okulojn, ŝajne, por kaŝi ĉion en si, kaj por ne ĝeni la spiriton de l'benitoj. Ĉiuj ĉirkaŭe reciproke ekrigardis unu la alian, levis la ŝultrojn, neniu ion komprenis.

— Mi forsendis mian patrinon tiun nokton de la paradiza pordo... Li provis venki sin mem kaj aldonis meditante: Dum sia tuta vivo por mi ŝi klopodis kaj filtris siajn okulojn, por ke mi estu tie ĉi, kaj ŝi...

Sed dum li finis sian parolon, antaŭ li aperis nuda ciganino kaj formetis sian mantelon:

— Mi vin instruos, Sankta Petro. Atendu! Vian patrinon mi iam petegis ke ŝi donacu al mi tiun ĉi mantelon: „Jen ĝi estas, ŝi diris, mi havas filon migrantan fremdlande, — por lia sano — prenu ĝin. „Nun vi prenu ĝin kaj iru por eltreni ŝin el la infero. Se ĝi estis al ŝi kara, kiam ŝi donis ĝin al mi, ĝi ne disŝiriĝos..."

Kaj la sanktulo prenis la mantelon kaj ekiris al la infero. Tie jam de malproksime resonis laŭtaj paroladoj de sorĉistoj kaj maljunuloj, malkvietaj disputoj bolis inter instruistoj kaj saĝuloj kaj sufokiĝintaj krioj aŭdiĝis inter la sonoro de hakiloj kaj glavoj...

Tradukis Ivan H. Krestanov.



LA DIAMANTO.

De I. L. Perec.

El "Literatura Mondo"

Iam—rakontis la maljuna Rabi Ŝlojme en Bet-Hamidraŝ[1] — vivis koloniisto.

Fremdulo li estis en la vilaĝo, kie li loĝis; li kun neniu kaj neniu kun li interrilatis.

Li parolis alian lingvon ol liaj samvilaĝanoj; do neniu lin komprenis, nek eĉ volis kompreni.

Unu fojon la koloniisto trovis diamanton.

Kio ĝi estas, li ĝuste ne komprenis, tamen li ankaŭ ne estis malsaĝa kiel ŝtipo por ŝanĝi ĝin je mezuro da tritiko.

La diamanto lumbrilas kaj radias: "Ĝi estas kiel malgranda suno!" pensas la koloniisto. "La ŝtono certe valoras trezoron".

Sed inter fremdaj homoj kun tiu multvalora ŝtono li ne estas sendanĝera pri la vivo.

Se ili ekscios, oni tuj la unuan nokton atakos lin, disrompos la fenestrojn kaj forprenos la trezoron kune kun lia vivo.

Do li nepre devas kaŝi la ŝtonon.

Al la edzino li eĉ vorton ne diros pri la diamanto. Li amas ŝin, tamen virino laŭ la proverbo: "malmulta prudento, sed multe da sento", ne povos sin deteni kaj ne gardos la sekreton.

La koloniisto revenas hejmen, enterigas la diamanton en la legomĝardeno, antaŭ sia domo. Kiel rimarksignon li metas sur ĉi tiun lokon ŝtonon, grandan silikŝtonon, por ke li rekonu la kaŝejon. Kiam alvenos pli bonaj tempoj, sen envio kaj malamo inter najbaroj kaj precipe al fremduloj, tiam li scios kie serĉi kaj trovi la trezoron. Tiam lumbrilu kaj radiu la diamanto en hela tago!

Foje la juna edzino ekrimarkis la ŝtonon. Ŝi domaĝas la terspacon, kiun okupas la silikŝtono; sur tiu loko ja povas kreski bulbo aŭ kukumo... estas vere domaĝe!

Mem ŝi ne povas forruli la ŝtonon; do ŝi vokas la edzon por helpo.

Li ektimas.

— Dio gardu — li diras — ne tuŝu la ŝtonon!

— Kial?

— Ĝi estas feliĉodona ŝtono! Ĝi donas al ni feliĉon kaj benon!

— Ĝi ja estas ordinara silikŝtono?!

— Tamen, vi vidas! Tian sorĉon ĝi jam havas!

Ŝi rigardas la ŝtonon kaj ne scias, ĉu la edzo parolas serioze aŭ mokas.

Ŝi rigardas en liajn okulojn kaj vidas, ke ili estas seriozaj, preskaŭ koleremaj, sen ero de mokemo.

La edzon ŝi amas, ŝi opinias lin saĝa kaj honesta. Plie, ŝi ja estas virino; kaj virino ĉiam kontentas, kiam ŝi povas ion kredi: sorĉon aŭ ĉielsignon... Cetere ŝi ne havas multan tempon por pripensado; la legomĝardeno postulas tempon kaj zorgon. Do ŝi obeas kaj faras sian laboron.

La sekvintan tagon ekrimarkas la koloniisto du ŝtonojn en la ĝardeno.

— Kio estas tio? Kiu metis ĉi tien la duan ŝtonon? — li demandas.

La juna edzino ridetas.

Ĝuste la pasintan nokton ŝi neniel povis ekdormi. La luno tiel mirinde enradiis tra la fenestrokovriloj... Ŝi sopiris, ho kiel sopiris ŝia koro ...ŝi ion timis...

La edzon ŝi ne volis veki. Fine ŝi decidis, elŝtiĝis, kuris en la ĝardenon kaj alrulis duan ŝtonon..

Kaj tio trankviligis ŝin!

— Du ŝtonoj — ŝi ridetas — efikas duoble.

Kaj kion li faru, la koloniisto? Kiu edzo koleras edzinon, kiam ŝi tiel infan-dolĉe ridetas, ĉirkaŭbrakas lin per mallarĝaj blankaj manoj kaj almetas la alabastroblankan frunton al lia bruŝo?..

La blankan frunton li kisas kun plezuro kaj en la bluaj okuloj li serĉas respondon je tio, kial ŝi estas nokte tiel maltrankvila... kaj silentas!

La juna edzino opinias la kison rekompenco por sia boneco kaj pieco. Kaj ĉiufoje, kiam ŝi

deziras kison sur la frunton, ŝi alrulas ŝtonon... Se li foje ne kisas ŝin, montriĝas larmoj en ŝiaj okuloj.

Al la junaj geedzoj naskiĝis du infanoj: knabo kaj knabino.

La knabinon ne mirigas la ŝtonoj, ŝi nenion demandas pri ili, sed faras la samon kiel la patrino.

La patrino almetas grandajn ŝtonojn, la malgranda filineto — ŝtonetojn; ju pli ŝi aĝas, des pli grandajn ŝtonojn ŝi alrulas.

La saĝa filo jam demandas: kion signifas la ŝtonoj?

— Ŝtonoj — respondas la patrino, fiere, ke ŝi tion scias — estas feliĉodonaj!

— Kiamaniere? — miras la malgrandulo — kaj kion signifas: ili estas feliĉodonaj? Ĉu oni iafoje havas pli multe ol oni akiras per laboro?

Tion ĉi la patrino jam ne komprenas.

— Demandu la patron — ŝi diras.

— Kiam vi estos pli aĝa — respondas la patro — vi scios ankaŭ tion.

Kaj kiam la junulo plenkreskis, la patro diris al li la sekreton pri la diamanto.

Kaj same okazis en longa vico de generacioj.

Ĉiu patro transdonis la sekreton pri la diamanto al sia plej aĝa filo.

En ĉiu generacio nur unu sciis pri la diamanto kaj la aliaj kredis, ke silikŝtonoj estas feliĉodonaj; ju pli multe da ili, des pli bone. Kaj ĉiu generacio alruladis ŝtonojn.

Najbaroj rigardas kaj miregas.

Unuj ridas, aliaj, male, ŝatas la malnovajn morojn, kiujn ili estis trovintaj, post sia naskiĝo, kiel malnovaj.

Ne malmultaj pensis, ke la moroj devenas ankoraŭ de l'tempo, kiam anĝeloj per ŝtuparo malsupreniradis el la ĉielo kaj homoj estis ilin vidantaj.

Multaj najbaroj, por montri al la familio sian amikecon kaj simpation, levis ŝtonojn de la vojo kaj, pro amo, ĵetis ilin en la ĝardenon...

En la familio mem la ŝtonĵetado fariĝis jam de longe kulto, sankta kutimo, speco de diservado.

Junuloj kontraŭbatalas la malnovajn morojn; maljunuloj koleras kaj minacas per ostaj pugnoj.

La junularo paroladas kontraŭ la ŝtonrulado kaj la maljunuloj diras:

— La kutimojn de niaj patroj kaj prapatroj ni sekvos...

— Niaj prapatroj estis pli saĝaj ol ni kaj ĵetadis ŝtonojn, — evidente devas tiel esti!

— Ne ni kreis la mondon, por ke ni ĝin pliboniĝu, aliformigu. Bona ĉevalo laŭiras la relon kaj ne rompas la piedojn sur novaj vojoj!

Tiajn kaj similajn saĝaĵojn kaj proverbojn ili citis, dank'al kiuj staras la mondo, t. e., nia homa mondo...

Kaj se junulo volis kontraŭagi, minacis la maljunuloj, ke ili "disrompos la ovojn, kiuj volas esti pli saĝaj ol la kokinoj!"

Jar-jare forlasas junuloj kun larmoj en la okuloj la malnovan domon, foriĝas de la antikva familio kaj migras por serĉi laborenspezojn eksterhejme, manĝi panon el fremdaj bakejoj kaj nokti sub malpropraj tegmentoj. Ili devas formigri, ĉar hejme jam estas ne eble vivi:

La ŝtonar-monto kreskas de tago al tago. Unuopaj ŝtonoj malsuprenruliĝas kaj ĉiam pli alproksimiĝas al la domo. Post tempo la sanktaj ŝtonoj ĉirkaŭbaris pordon kaj fenestrojn.

—Ne domaĝas, ne gravas—diris la maljunuloj.

Oni starigas ŝtuparon kaj eniĝas tra la kamentubo. Ekmankis aero en la ĉambro: ankaŭ ne malfeliĉo! Kiam oni malmulte manĝas kaj mallonge vivas, oni bezonas malmulte da aero. Finiĝis la vivrimedoj. Mankas loko por plugado kaj semado, ĉie ŝtonoj, ĉiuloke nur ŝtonaro.

— Permesu almenaŭ — petegas la junularo — kunamasigi la ŝtonojn; atingu la ŝtonarmonto la ĉielon, sed malmulte da spaco ĝi okupu sur la tero! Estu loko kie plugadi kaj semi.

—Sendiuloj! — krias la maljunuloj. — Nur tra niaj kadavroj vi alproksimiĝos al la ŝtonoj...

Rabi Ŝlojme enpensiĝas momenton kaj ekflaras naztabakon.

Ni, junuloj, atente aŭskultintaj la rakonton, ekspiras nun profunde kaj unu demandas:

— Kaj kial silentas tiu, kiu scias la sekreton pri la diamanto kaj ne interpacigas la junularon kun la maljunuloj?

— Jen estas la malfeliĉo — respondas Rabi Ŝlojme kun ĝemo — ke dumtempe oni tute forgesis pri la diamanto.

Ĉu iu subite mortis, kaj ne havis tempon por transdoni la sekreton al sia filo?...

Ĉu iu al sia propra patro ne kredis kaj sian infanon ne volis trompi?...

Sufiĉe — ke la diamanton oni forgesis kaj neniu scias pri ĝi. Nun malpacas kaj batalas junularo kun maljunuloj pri ŝtonoj!...

Rabi Ŝlojme finis.

Kaj ni volas diveni kaj demandas: Kion simbolas la diamanto?

— La judan animon?...

— La unuan diordonon?...

— "Amu vian proksimulon kiel vin mem"?...

Sed Rabi Ŝlojme ne respondas, mistero vagas sur lia vizaĝo.

— Junulaĉoj — li ekdiras — nun iru for hejmen, jam tagiĝas!

[1] Bet-Hamidraŝ estas preĝejo kaj samtempe lernejo, kie la piaj judoj studas sanktajn librojn kaj la Talmudon.

El la juda: J. Jurysta.



LA MORFINULO.

De Santiago Rossinyol.

EL LA "KATALUNA ANTOLOGIO"

Laŭlonge kuŝanta sur lito Imperio-stila, kun la manoj falintaj kaj malfermitaj kaj la kapo supren turnita, ŝajnis, ke li dormas.

Ŝajnis, ke li dormas, sed li dormis iel strange, preskaŭ senspire, flaviĝinta, kun la palpebroj duonmalfermitaj, kvazaŭ li ne havus forton por ilin fermi.

De tempo al tempo li movis la fingrojn kaj frotis ilin iom sur la littuko; li havis tremetadon ĉe la piedoj kaj denove restis en la peza dormemo.

Ŝtelire, servisto levis la pordan tapiŝon, kaj li, sen moviĝo, signis al li, ke li fermu iom pli la kurtenojn, kaj ĉe tiu duonheleco, kiun donis la blankaj muroj kaj la blankaj mebloj, iom oritaj kun bluaj ombroj, li denove restis inter du sonĝoj.

Li estis maldormanta kaj sonĝis, kaj li sonĝis kun klareco kompleta. Li pensadis, kaj li pensadis sen ia malhelpo, sen vibradoj, eĉ sen pulsa ĝeno. "Mi ja ne volis morfinon—diktis al li la penso—Pro tio ke mi ĝin tiom deziradis, mi ĝin ne voladis; sed la neŭralgio, la senenergia kuracisto, mi senenergia, inter la turmento hodiaŭa kaj la turmentego morgaŭa, mi prokrastis al mi la turmentegon! Mi estas perdiĝinta, mi ja ĝin scias, sed mi dormu, ĉar la morto ja venos ĝiahore."

Li volis dormi, sed neeble: ne estis dormemo por dormi, tia dormemo: tio estis la neniigo de la materio, lasante la spiriton je duonlumo, sed je ia lumo travidebla; tio estis, kio estas la dormo de la fakiroj, la ekstazo mistera de la morto, la heleco fluganta, lumigante la penson, ne tuŝante la karnon nek la ostojn. "Mi timis tiun morfinon—diradis al li la lumo—mi ĝin timis kiel la viro malforta timas la virinon kiu lin enamigas kaj lin elĉerpas; kiel la floroj sendube timas printempon kiu ilin malfermigas kaj ilin sekigas; kiel la papilio la parfumon, kiu donas al ĝi vivon kaj ĝin mortigas. Ĉiam mankis al mi energio, kaj tiu mistera eliksiro, kiu devas ĝin doni al mi, portante ĝin al mi estas mortigonta ĝin. Mi estas tridek-jara. Kion mi faris? Flari la verkojn de la grandaj majstroj, ebriiĝi en ĉiaj literaturoj, gustumi ĉiujn fontojn de la plej pura arto kaj gustumi ĉiujn venenojn. Mi eniris ĉiujn novajn templojn, mi adoris ĉiujn ruinaĵojn, mi atentis ĉiujn religiojn, kaj ne faris nur tion, kion mi devis fari: produkti, paroli, krei, kio estas la sola afero bona, kiu restas sur la tero. Mi ne povis: mankis al mi antaŭenpuŝo; mi vidis la verkon kiel la frukton sur la arbo kaj mankis al mi entuziasmo por grimpi al ĝi; mi vidis la sunon kaj ĝi brilvundis min; mi revis kaj mi ne povis ĉirkaŭpreni la revon..."

Kaj pensante, pensante, kiel tiu, kiu vidas preterpasantan vizion, ŝvitguto ruliĝadis sur lia vizaĝo malsupren, kaj li sentis ĝian malvarmecon kaj ne havis forton por ĝin forigi.

"Sed, ci ĝin donos al mi, morfino, la forton! Tute negrave, ke ci min mortigos poste. Hodiaŭ mem ni laborados! Mi metos en tio la penson kaj ci subtenos la manon, se ĝi volos fali, ĉar ci havas la kuraĝon, kiu al mi mankas. Kaj kian verkon ni faros, morfino! Kian filon havos ni ambaŭ! Kian belaĵon! Ĝi estos la verko de tridekjara atendado, de dezirado cin havi kaj neebleco cin posedi! Mi rakontos ĝin al ci linion post linio kaj ci movos la volon kaj ĉiu kiso cia estos strofo, kaj tute negrave ke ci min venenos: se la frukto estos bela, venenu min! Mortigu la floron, ĉar por tio estas la floroj: por odori kaj por senfoliiĝi. Jes: por senfoliiĝi" li diradis. Kaj la revo fariĝadis pli dolĉa, kaj, fine, ne plu estis revo tio, kion li havis: ĝi estis la ĉirkaŭpreno al la idealo, la elĉerpiĝo sen doloro, la regado de la netuŝeblo.

En tiu stato li jam povis direkti la revon: li regis ĝin, li kondukis ĝin, li gvidis ĝin. Se ĝi prezentiĝis en malgaja vesto, li malfermetis la okulojn kaj forkuris: se ĝi estis bela, li retenadis ĝin kun si kaj ame luladis ĝin kaj devigis ĝin disvolvadi ĉiujn iluziojn, kiujn li volis. Dum momento li estis mastro de tio, kio foriras, de tio, kio glitas, de tio nebula, de tio nepalpebla; kaj ĉirkaŭprenante kion oni ne povas teni, li dormiĝis... pro dormado, ĝis la morgaŭa tagiĝo, ĝis la reala heleco lin revenigis al nia vivo.

Li rektigis sin sur la lito kaj la kapturniĝo klinigis al li la kapon; li viŝis al si la ŝviton, li sidiĝis kaj rigardante sur la tableton li ektremis. Ŝi! La tentulino! La malvirtulino! La ame malvirta estis tie! Tie apud li! Tute proksime, gardobservante lin! Kion li faros? Ĉu li lasos ŝin? Ĉu li estos volpova lasi ŝin? Mi redonos—li diris al si mem—redonos ĝin al la doktoro. Ĝi ne estas mia. Mi ĝin abomenas, li aldonis prenante ĝin.—Kaj ŝvitante, malvarma, li alproksimigis ĝin al si iom post iom, kaj subite, dum la sango alfluis al la okuloj, li resaltigis ĝin sur la plankon, ĵetante ĝin kun la sama bedaŭro kun kiu oni ĵetas la velkintajn florojn, kiujn oni trovas en libro, de virino falsa kaj malbenita.

"Ne! Mi volas esti sola! Sola mi laboros, sola mi iros, kien mi devos iri! Ci ne regos min! Mi ĵuras tion al ci! Mi ne lasos min regi! Mi zorgos mian volon, kaj ĝi estos mia helpanto, ĉar ĉiam estis la volo, komprenu ĝin, kiu faris la fortajn verkojn! Mi foriras — li diradis al si. — Jes... Mi foriras... — Kaj li ne moviĝis. — Mi ne povas resti en tiu medio de malsano. Mi ne povas..." Kaj li ne moviĝis; li ne povis moviĝi. Estis al li neeble moviĝi! Ŝajnis ja, ke mistera magneto tenas lin tie alnajlita; ke ia tento nekonata lin haltigas; ke la infero estas trovinta novan povon por detrui la intencojn de la homo. Ok fojojn li iris de la pordo al la tablo, de la tablo al la balkono, de la balkono al la pordo, nekuraĝante krii helpon pro timo ke oni helpos lin; nekuraĝante rigardi sur la plankon, sur tiun tapiŝangulon, kie estas kaŝita la vipuro, timante ĝin, volante ĝin, tremante, serĉante kion li ne perdis; ĝis fine li ĵetis sin sur la liton, kaj, de la lito, pli ol iam la rigardo fiksiĝis sur tiun vitran pecon, kiu briladis tie kuntiriĝinta, per koloroj de venena floro, per reflektoj de salamandro, per ĉielarkkoloroj kaj briloj de koleoptero; kaj stariĝante, per unu salto kaptis la serpenton de sur la planko kaj forkuris rigardante posten kvazaŭ li estus ŝtelinta ĝin...

La morgaŭon li skribadis kaj skribadis sola, sen morfino, propravole. Duhora skribado senpripensa, pleniganta pli kaj pli da manuskriptaj folioj, ne polurante ilin, ne stiligante ilin, plumflue, kvazaŭ li ne volus scii kion li skribas, kaj antaŭenirante tra la blankeco de la papero, kvazaŭ ĝi estus glacia dezerto kies transiron li estus decidinta, trairante la dezertlokojn kaj rigardante nur transen. Ŝajnis, ke li ne povas halti, ke li ne volas rigardi la horloĝon, ke li atendas kaj timas proksimiĝantan horon, ke li deziras ĝin, timante ĝin; dum la hormontrilo ĉirkaŭiras, ŝajnis, ke la deziro ĉirkaŭiras kun la montrilo; li estus volinta ĝin haltigi kaj li estus volinta ĝin rapidigi; li volus, ke ĝi mem haltu; ke la tempo estus la haltinto; kaj ĉar la tempo ne haltas, li volis senpripensigi sin skribante, skribante tiel rapide kiel li povis. Venis momento, dum kiu la plumo skribadis sola, kvazaŭ spirito ĝin gvidus, la spirito de la volo, la animo amika, batalante kontraŭ la animo de la horloĝo; sed tiu ĉi daŭris nekortuŝebla kaj la korpo malfortiĝadis. Ju pli li vojiradis, des malpli lin sekvis la mano; kaj kiam li transiris tiun horon tiel deziratan kiel timatan, la tempo ekpaŝis pli

rapide ol iam kaj la mano falis elĉerpita.

Malespera, ekscita, malkvieta, "ne povas esti —li diris. — Neeble!" Kaj li eltiris la ameman vespon kaj donis al si la pikon.

Vivflamo ekfluis tra la vejnoj, suprenirante, suprenirante ĝis la tempioj, kaj rava bano de kvieteco lasis lin serena, kvieta, certa pri si mem, kvazaŭ la ĉielarko estus lokiĝinta sur la tempioj. Li legis kion li skribis, kaj unu post alia, farante la kritikon pri sia verko, li disŝiradis la manuskriptojn. Li, la homo rafinita, la verkisto bongusta, kiu kunigadis en unu paĝo la mistikecon de Verlaine kun la vibreco de Mallarmé kaj la forto de Baudelaire, estis verkinta tridek foliojn de prozo felietona, vulgara, eĉ malinda. Sed nun kun la amantino malbonkora, kun la sireno malvirta, kun la dolĉa amatino, trompema, li skribos unu paĝon, unu solan, sed skribos ĝin ili ambaŭ, rigardante unu la alian en la okulojn, kisante sin, venenante sin, malvirtigante unu la alian. Kaj gvidata de la sireno li verkis paĝon senpekan, brilan kaj serenan, sed ĝi kostis al li dek jarojn de vivo.

Post la reviglîĝo venis denove la enreviĝo, kaj, kuŝante sur la lito, kiel ĉiam, li turnis folion en la libro de siaj revoj kaj daŭrigis la legadon: "Mi jam ne forlasos cin, morfino: mi jam estas tute cia; ci jam havas min cia; jam, se eĉ mi volus, mi ne povus. Mi ja scias, ke ci estas mortigonta min, ke ci mortigos min iom post iom; sed, kaj la konsoloj, kiujn ci donos al mi, kiujn mi ne pagus mortante cent fojojn, mil fojojn en ciaj brakoj, se mil fojojn ci povus mortigi min? Ci suferigos min multe, mi ja tion scias, sed mi mortos kisante cin, adorante cin, amegante cin. Kaj ju pli ci doloriĝos min, des malpli mi povos vivi sen ci; ju pli proksimen al la morto ci min portos, des pli mi volos cin apud mi; ju pli ci lasos min sen vivo, des pli da vivo mi venos al ci peti, ĉar ci havos la mian kaj restos kun ĝi kiam ci volos" diris la paĝo, kiun li legis. Kaj tiun fojon li fermis la libron, sen batalo, fordonita, venkita, ne volante fari plian klopodon por liberigi sin de la ĉarma vipuro, nur petante al ĝi unu aferon: ke ĝi helpu lin fini la verkon.

De unu piko li iris al dua; de dua al tria, al kvara, al nekalkulo, al libereco piki lin kiam ĝi volos. Kiel li antaŭvidis, ju pli da veneno des pli da konsolo, kaj por pli da konsolo, pli da veneno. Ju pli li fordonis sin al ĝi, des pli bezonis ĝin; ju pli ĝi sufokadis lin, des pli li voladis esti sufokita; ju pli li trinkis, des pli da soifo; ĝi estis la morto, kiu finigadis lin vivigante lin.

Venis momento, en kiu ŝi estis laca de li; en kiu li jam estis ŝia; en kiu la kisoj, kiujn ŝi donis al li, estis malvarmaj; kaj en kiu li volis pli da veneno kaj ŝi deflankigis la lipojn. La verko estis nur duonfarita kaj la morto multe pli ol en la vojmezo. Malgrasa kaj kun koloro de bakita tero, kun la okuloj vitrecaj kaj kavaj, li nur atendis la momenton ŝin posedi por denove atendi alian momenton; kaj ĉiam alian, sen ripozo kaj sen moderigo, kun la eterna avidego neniam kvietigi siajn dezirojn. Li havis jam la korpon duonmortinta kaj nur vibradis en li la spirito, eklumiĝante kaj estingiĝante kun korpremoj neniam kontentigitaj. De unu paĝo, kiun li skribadis ĉiutage, li transiris al skribado de unu sola strofo, kaj de unu strofo al unu linio. Jam la terura kunulino nur gvidadis lin momenton, momenton por karesi al li la harojn kaj tempiojn, kaj por forkuri kiam li plej multe ŝin deziris.

Li atingis la staton senti sin freneza, vidi sin enprofundiĝanta, vidi ke la racio lin forlasas kaj ne havis konscion ĝin voki, kaj perdante la forton . . . de la forto; li venis al stato lasi sin konduki de la kuracistoj kaj de la amikoj al la supera klopodo por sin savi: lasi sin enfermi en sian ĉambron, sola, sen ŝi, sen tio, ke ŝi eniru se li eĉ mortus vokante ŝin.

Kio okazis al li post la enfermiĝo, oni devus skribi per nigra galo kaj ne per inko. Ĉiuj turmentoj de la mezepoko, ĉiuj doloroj, kiujn elsendas la infero por elprovi la esperantojn; ĉiuj maltrankvilecoj de agonio, kiu, estante agonio, neniam finiĝas, estus palaj por tion klarigi. Ŝajnis al li, ke oni ĵetas lin en la maran mezon, kaj ke li ne scias naĝi; ke li devas malsupreniri en fosaĵon de grandega kaj glitiga turo, sin subtenante per la ungoj; ke oni pendigis lin super granda abismo, kaj ke li devas teni la ŝnuron per la buŝo, se li ne volas enabismiĝi. Unue la ŝvito; de la ŝvito al la febro: ia malvarma febro, kiu pulsigis la tempiojn lin frostigante; de la febro al la soifo: ia soifo, kiu revigis lin pri lagoj de putriĝanta akvo por trinki ĉe ĝi; poste la hepato ŝvelante kaj resaltante kvazaŭ ĝi volus liberiĝi el la korpo; kaj laste, la tremetado, tremetado de la haroj, okuloj, fingroj, dentoj; tremetado taga kaj nokta; tremetado pri kiu li sciis, ke ĝi daŭros monatojn senhalte, kaj ĉiuhore, kaj ĉiam! "Venu — li kriadis al la morfino — Venu mortigi min! Se ci estis kruela, estu kompatema! Mortigu min! Mi petegas cin! Mi petas cin! Mi pli preferas morti kun ci ol vivi! Malfermu al mi, pro Dio, ke mi ne volas resaniĝi! Malfermu al mi! Malfermu al mi!" Kaj kriegante kiel kondamnito, li volis sin ĵetegi kontraŭ la murojn, kaj kriadis, kaj petadis helpon kaj oni ne volis lin aŭskulti, kaj li kriadis, kaj la muroj estis kvazaŭ surdaj; kaj li deŝiradis la murpaperon per la ungoj kaj la ungoj fleksiĝadis al li; kaj li rondiradis kiel leono . . . . . seiante, ĉiela Dio, ke per unu piko, per unu sola piko de la malbenita virgulino, li trovus konsolon kaj kvieton; kaj nek li povis posedi ŝin, infera fulmo, nek mortigi sin.

Dum momento, kvazaŭ falus al li radio de espero, kolektante ĉiujn fortojn, li stariĝis, alkuris la libroŝrankon, elprenis libron, malfermis ĝin, kaj tremante kiel hidrargo, tie en angulo, li trovis pakaĵon da morfino. Neniam la suno, falante sur ruinojn, portis tiom da ora lumo, kiom falis al li sur la vizaĝon! neniam la ĉielo havis tiom da heleco. Ĝin tutan li englutis, ĝis la lasta peceto, ĝis la lasta ero: kaj, kiam revenis al li la forto, kun la tuta puŝo de fulmo kaj la tuta energio de frenezulo, per unu frapo de malesperanto, li renversis la pordon kaj forkuris de tiu malliberejo.

Li forkuris, sed li devis reveni baldaŭ al ĝi, devis reveni al ĝi. . . por morti.

Plena de ŝveloj, plena de vundoj, kaj ne trovante jam en sia korpo tra kie enigi al si la morton, tra la samaj vundoj li ĝin enigis en sin.

Li dormis jam, mortante de dormado; li jam ne

havis volon krom por ne havi ĝin; kaj, dum li estis neniiĝanta malrapide, iom post iom, la verko, lia verko, servis tie sur la tablo por envolvi morfinon.

Trad. S. Alberich-Jofre.



RAKONTO PRI KIŜ.

JACK LONDON.

EL "LITERATURA MONDO"

Kiŝ vivadis antaŭ longe apud la bordo de l' polusa maro. Li estis ĉefulo en sia vilaĝo, kaj mortinte, li estis honorata, kaj lia nomo restis sur la lipoj de la homoj. Li vivis en tiel malproksima tempo, ke nur la maljunuloj memoris lian nomon kaj la rakonton, kiujn la prapatroj postlasis al ili. Ankaŭ la venontaj maljunuloj, siavice, same faros al siaj idoj ĝis la tempfino. Kaj estis dum la vintra mallumo, kiam la nordvento blovegas tra la glaciebenaĵo kaj la aero pleniĝas per fluganta blankaĵo tiel, ke neniu kuraĝas eliri, kiam oni rakontis, kiamaniere Kiŝ sukcesis sin levi el la plej humila "igluo" (Loĝejo) de la vilaĝo, ĝis fine li fariĝis la ĉefulo super ĉiuj.

Oni diras, ke li estis inteligenta knabo, sana kaj forta, kaj estis vidinta dektri sunojn. Tiamaniere oni mezuris la tempon tiutempe, ĉar dum ĉiu vintro la suno forlasas la landon, kaj en la venonta jaro aperas nova suno por ke la homoj povu ree varmiĝi kaj rigardi reciproke la vizaĝojn. La patro de Kiŝ estis tre kuraĝa viro, sed li mortis dum tempo de malsatego, kiam li penis subteni la vivon de siaj kunuloj per mortigo de granda polusa urso. Pro tiu forta deziro li ekluktis kontraŭ ĝi, kaj liaj ostoj frakasiĝis. Sed la urso havis multe da karno, kaj la homoj estis savitaj. Kiŝ estis lia sola filo, kaj post la morto de l' patro, Kiŝ kaj la patrino loĝis kune. Sed la homoj estis forgesemaj kaj forgesis la heroaĵojn de l' patro; kaj ĉar Kiŝ estis nur knabo kaj la patrino estis nur vidvino, ili ankaŭ estis forgesitaj, kaj baldaŭ loĝis en la plej humila el la "igluoj".

Iun nokton, kiam la konsilantaro kunsidis en la granda "igluo" de la ĉefulo Kloŝ-Kŭan, Kiŝ montris, kia sango trafluis siajn vejnojn kaj kiajn virajn kvalitojn li posedas. Kun kvazaŭ plenaĝula digno li leviĝis kaj atendis la ĉeson de la babilado.

— Estas vere, ke la viando estas porciita al mi kaj mia patrino, — li diris — sed ofte ĝi estas maljuna kaj malmola, kaj krome ĝi enhavas ekstreman kvanton da ostoj.

Ĉiuj ĉasistoj, grizharaj same kiel junaj, konsterniĝis. Neniam antaŭe aŭdiĝis io simila: knabo, kiu parolas kvazaŭ plenaĝulo kaj eldiras severaĵojn rekte al ili. Sed firme kaj serioze daŭrigis Kiŝ:

— Ĉar mi scias, ke mia patro Bok estis eminenta ĉasisto, tial mi parolas tiel. Oni diras, ke Bok havigis pli da viando ol du plej bonaj ĉasistoj; ke per siaj propraj manoj li disporciis ĝin; ke per siaj propraj okuloj li atentis, ke eĉ la plej humila maljunulo kaj maljunulino ricevu justan porcion.

— Na, na! — ekkris la viroj — for la infanon! Enlitigu lin! Li ne estas viro, kiu rajtas paroli al viroj kaj grizbarbuloj!

Trankvile li atendis la ĉeson de la bruego.

— Vi havas edzinon, Ugh-Gluk, — li diris — kaj pro ŝi vi parolas. Kaj vi, Massuk, havas edzinon kaj patrinon, kaj pro ili vi parolas. Mia patrino havas neniun krom mi; pro tio mi parolas. Kiel mi antaŭe diris, kvankam mortis Bok, pro tio ke li ĉasis tro bone, tamen estas juste, ke mi, lia filo, kaj Ikiga, lia vidvino kaj mia patrino, havu sufiĉe da viando, kondiĉe, ke la gento havas abundan provizon... Mi, Kiŝ, filo de Bok, estas parolinta!

Li sidiĝis kaj aŭskultis vigle la fluegon de protesto kaj indigno, kiujn vekis liaj vortoj.

— Knabo parolas en konsilejo! — konsterne murmuris la maljuna Ugh-Gluk.

— Ĉu la infanetoj diras al ni, plenaĝuloj, kion ni devas fari? — demandis Massuk laŭtvoĉe. — Ĉu mi, plenaĝulo, estu mokata de ĉiu infano, kiu petaĉas viandon?

La kolero bolis treege. Ili ordonis, ke li enlitiĝu, minacis, ke li havos nenian viandon, ke li estos batata pro lia aroganteco. La okuloj de Kiŝ ekbrilis kaj la sango ekpulsis sub lia haŭto. Dum ili riproĉis kaj mallaŭdis lin, li ekleviĝis.

— Aŭskultu min, vi, viroj — li kriis. — Mi ne parolos plu en tiu ĉi konsilejo, ĝis kiam la plenaĝuloj venos al mi kaj diros: "Estas ĝuste, Kiŝ, ke vi parolu; estas ĝuste, kaj ni tion volas." Jen al vi, plenaĝuloj, mia lasta vorto. Bok, mia patro, estis eminenta ĉasisto. Ankaŭ mi, lia filo, iros kaj ĉasos la viandon, kiun mi manĝos. Kaj sciu, ke tio, kion mi kaptos estos juste disporciita, kaj nek vidvino, nek malfortulo ploros nokte pro tio, ke mankas manĝaĵo, dum la fortuloj ĝemas dolore pro la trosateco. Kaj en la venontaj tagoj hontos la fortuloj, kiuj estas tro multe manĝintaj. Mi, Kiŝ diris ĉi tion.

Mokoj kaj ridaĉoj sekvis lin, sed kun neŝanceleblа volo li foriris, sin turnante nek dekstren, nek maldekstren.

La sekvintan tagon li iris laŭlonge de la bordo, kie renkontiĝas la tero kaj la glacio. Tiuj, kiuj rigardis lin dum lia foriro, vidis, ke li kunportas sian pafarkon kaj sufiĉe grandan provizon da ostpintaj sagoj. Ili ankaŭ vidis, ke surŝultre li portas la longan ĉaslancon de sia patro. Estis ridado kaj multe da babilado pri la neniam antaŭe vidita okazo. Neniam knaboj tiel junaj foriris por ĉasi; kaj ĉi tiu iris sola! Kaj ili kapbalancis kaj murmuris kvazaŭ profete, kaj la virinoj kompate rigardis Ikiga'n, kaj la vizaĝo de Ikiga estis serioza kaj malĝoja.

— Li revenos post nelonga tempo — ili diris kuraĝige.

— Li iru; per tio li havos bonan lecionon, — diris la ĉasistoj — kaj li revenos baldaŭ kaj li fariĝos humila kaj malfanfarona por ĉiam.

Sed pasis tago; pasis du tagoj. Kaj je la tria blovis ventego, kaj Kiŝ ankoraŭ forestis. Ikiga ŝiris al si la harojn kaj sur la vizaĝon ŝi ŝmiris fulgon de fokoleo por montri sian ĉagrenon. Kaj la virinoj riproĉis la virojn per maldolĉaj vortoj pro tio, ke ili estis malbontraktintaj la knabon kaj kaŭzis per tio lian morton. Kaj la viroj nenion respondis sed intencis serĉi la kadavron, post kiam la ventego trankviliĝos.

Tamen, la sekvintan tagon, frumatene, marŝis Kiŝ en la vilaĝon. Sed ne honteme li venis. Surŝultre li portis ŝarĝon da viando ĵus akirita. Kaj

fiere li marŝis, kaj arogante li parolis.

— Iru vi, plenaĝuloj, kun hundoj kaj glitveturiloj, kaj laŭiru la vojon, kiun mi tramarŝis dum preskaŭ unu tago — li diris. — Estas sur la glacio multe da viando, ursino kaj du duonkreskintaj ursidoj.

Ikiga treege ĝojis, sed per virsimila mieno li akceptis ŝiajn karesojn, dirante:

— Venu, Ikiga, ni manĝu. Kaj poste mi dormos, ĉar mi laciĝis.

Tion dirante, li eniris la "igluon" kaj manĝis ĝis sato, kaj dormis dudek horojn.

Tiam estiĝis granda dubo — dubo kaj diskutado. Mortigi polusan urson estas faro tre danĝera, sed multoble pli danĝere estas mortigi ursinon kun idoj. La plenaĝuloj ne povis kredi, ke la knabo, tute sola, povis fari tian mirindaĵon. Sed la virinoj atestis pri la freŝa viando, kiun li alportis surdorse, kaj ĉi tiu estis nerefutebla aserto. Fine do ili foriris, plendante, ke tre kredeble, eĉ li vere mortigis la urson, li certe ne distranĉis la kadavron. En la nordlando estas tre necese, ke tio okazu tuj post mortigo. Alie la karno tiel frostiĝas, ke, provante tranĉi, oni difektas la plej akran tranĉilon, kaj urson pezan je tricent funtoj oni ne facile metas sur glitveturilon por ĝin treni tra la malebena glaciaĵo. Sed veninte al la loko, ili trovis ne nur la kadavron (pri kiu ili dubis), sed ankaŭ tion, ke Kiŝ estis distranĉinta la korpon laŭ la maniero de lerta ĉasisto, kaj formetis la internaĵon. Tiel komenciĝis la mistero pri Kiŝ — mistero kiu konstante pliprofundiĝis. Je la dua ĉasiro, li mortigis junan urson, preskaŭ plenkreskan, kaj je la tria, grandan virurson kaj ties kunulinon. Ĝenerale li forestis tri-kvar tagojn, sed kelkfoje li estis for dum tuta semajno sur la glacikampo. Ĉiuokaze li rifuzis akompanantojn, kaj la homoj miregis.

— Kiel li faras tion? — ili demandis sin. — Li eĉ ne kunhavas hundon, kaj hundo certe helpus lin.

— Kial vi ĉasas nenion krom ursoj? — foje demandis lin Kloŝ-Kŭan.

Kaj Kiŝ taŭge respondis:

— Estas konata afero, ke urso havas la plej grandan kvanton da viando.

Sed oni parolis en la vilaĝo ankaŭ pri sorĉarto.

— Per la helpo de malbonaj spiritoj li ĉasas, — diris kelkaj — tial lia ĉasado sukcesas. Kiel ĝi ja sukcesus, se tio ne estus?

Aliaj diris:

— Eble tiuj spiritoj ne estas malbonaj. Oni scias, ke lia patro estis lerta ĉasisto. Ĉu ne estas eble, ke tiu helpas lin, por ke li fariĝu lerta, pacienca kaj vigla? Kiu scias?

Spite de ĉio, li daŭre sukcesis, kaj la malpli lertaj ĉasistoj ofte estis okupitaj per la alporto de la viando; kaj li disporciis ĝin laŭ justa maniero, kiel lia patro faris iam, antaŭe, tiel li ordonis, ke la plej humilaj maljunuloj kaj maljunulinoj ricevu justajn porciojn, kaj prenis por si mem nur tiom, kiom li bezonis. Kaj pro tiu justaĵo, kaj ĉar li estis tre lerta ĉasisto, oni rigardis lin kun respekto, eĉ kun solena timo. Oni ankaŭ proponis, ke li fariĝu ĉefulo post kiam la maljuna Kloŝ-Kŭan eksiĝos je la ofico. Pro liaj faroj la plenaĝuloj atendis lin reaperi en la konsilejo, sed li venis neniam plu, kaj ili hontis demandi pri tio.

— Mi pensas, ke mi konstruos por mi igluon, — iun tagon li diris al Kloŝ-Kŭan kaj kelkaj aliaj ĉasistoj. — Ĝi estos granda igluo, en kiu Ikiga kaj mi povos loĝi komforte. Ili kapjesis serioze.

— Sed al mi mankas la tempo. Mia afero estas la ĉasado, kaj per tiu laboro mi estas ĉiam okupita. Do estas juste, ke la vilaĝanoj, kiuj manĝas mian viandon, konstruu mian igluon.

Do la igluo estis konstruata laŭ grandaj mezuroj — laŭ pli grandaj ol la loĝejo de Kloŝ-Kŭan. Kiŝ kaj lia patrino translokiĝis en ĝin. Ĝis tiu tempo, depost la morto de Bok, Ikiga ĝuis nenian komforton. Kaj ne nur materian utilon ŝi havis; pro la alta stato, kiun ŝi atingis kaŭze de la mirindaĵoj de sia filo, oni rigardis ŝin la ĉefa virino en la tuta vilaĝo. Kaj la virinoj vizitis ŝin por peti ŝian konsilon, kaj poste citis ŝiajn saĝajn vortojn, kiam okazis disputoj inter ili aŭ kun la viroj.

Sed la mistero pri la mirinda ĉasado de Kiŝ precipe okupis la mensojn de la vilaĝanoj. Kaj iun tagon Ugh-Gluk rekte akuzis lin pri sorĉarto.

— Oni asertas, — diris Ugh-Gluk, laŭ impona maniero — ke per la helpo de malbonaj spiritoj vi ĉasadas; per tio vi sukcesas.

— Ĉu la viando ne estas bona? — respondis Kiŝ — ĉu iu vilaĝano malsaniĝis post manĝo? Kiel vi scias, ke mi uzas la sorĉarton? Aŭ ĉu vi fariĝis kvazaŭ blinda pro la envio, kiu vin konsumas?

Kaj Ugh-Gluk retiris sin venkita, kaj la virinoj mokis lin. Sed iun nokton en la konsilejo, post longa diskutado, oni decidis spioni lin, kiam li foriros ĉasi, por ke oni sciu liajn metodojn. Do, je la sekvanta ĉasiro, Bim kaj Bon, du el la plej lertaj ĉasistoj, sekrete sekvis lin. Post kvin tagoj ili revenis kun okuloj alŝvelintaj kaj langoj tremantaj, kaj rakontis, kion ili vidis. La konsilantaro rapide kunvenis en la loĝejo de Kloŝ-Kŭan, kaj Bim komencis rakonti:

— Fratoj, kiel vi ordonis, ni marŝis malantaŭ Kiŝ, marŝis kaŝe por ke li ne sciu, kaj je la mezo de la unua tago li renkontis grandan virurson. Estis tre granda urso.

— Ne estas iu pli granda — Bon konfirmis kaj daŭrigis. — Sed la urso ne montris sin batalema, ĉar ĝi flankenturnis sin kaj iris malrapide tra la glaciaĵo. Tion ni vidis de la rokoj ĉe la marbordo, kaj la urso proksimiĝis al ni, kaj malantaŭ ĝi marŝis Kiŝ, tute sentime, kaj li kriis laŭtvoĉe, kaj svingis la brakojn kaj faris grandan bruon. Tiam la urso koleriĝis kaj ekstaris rekte sur la malantaŭaj kruroj kaj murmuregis. Sed Kiŝ marŝis ĝis li venis proksimen al la urso.

— Jes, — daŭrigis Bim — rekte ĝis la urso li marŝis, kaj la urso minacis lin kaj Kiŝ forkuris. Sed, kurante, li lasis fali etan pilkon sur la glacion. Kaj la urso haltis kaj flaris. Kaj poste englutis ĝin. Kaj Kiŝ konstante kuris kaj faligis pilketojn, kaj la urso englutis ĉiujn.

La aŭskultantoj ekkriis kun dubo, kaj Ugh-Gluk malkaŝe esprimis sian malkredon.

— Per niaj propraj okuloj ni vidis tion — asertis Bim.

Kaj konfirmis Bon:

— Jes, per niaj propraj okuloj. Kaj tio daŭris, ĝis kiam la urso rekte ekstaris kaj blekegis pro doloro kaj freneze batadis per siaj antaŭaj piedoj. Kaj Kiŝ konstante kuris, ĝis kiam li atingis sendanĝeran lokon. Sed la urso malatentis lin, ĉar

ĝin okupis la turmento kiun kaŭzis al ĝi la pilketoj en ĝia interno.

— Jes, ĝia interno, — interrompis Bim — ĉar ĝi sin gratis kaj ĉirkaŭsaltis kiel ludema hundido; sed per ĝiaj krioj oni povus diveni, ke ĝi ne ludas, sed suferas. Neniam mi vidis tian spektaklon!

— Ne, neniam oni vidis tian, — daŭrigis Bon — kaj krome ĝi estis tiel granda urso!

— Sorĉarto — Ugh-Gluk supozis.

— Mi ne scias, — Bon respondis — mi rakontas nur tion, kion mi vidis. Kaj post mallonga tempo la urso malfortiĝis kaj laciĝis, ĉar ĝi estis tre peza, kaj estis saltinta tre forte, kaj ĝi iris for tra la glaciajo, balancante la kapon alflanke kaj multfoje sidiĝante por bleki kaj krii. Kaj Kiŝ postsekvis la urson, kaj ni postsekvis Kiŝ, dum tiu tago kaj ankoraŭ dum tri tagoj ni sekvis lin. La urso malfortiĝis kaj senĉese blekis pro doloro.

— Ĝi estis ensorĉita! — ekkriis Ugh-Gluk. — Certe ĝi estis ensorĉita!

— Verŝajne.

Kaj Bim transprenis la parolon de Bon:

— La urso vagadis jen tien, jen ĉi tien, ĉirkaŭirante kaj reirante sian antaŭan vojon tiel, ke fine ĝi troviĝis tie, kie Kiŝ je la komenco renkontis ĝin. Nun la urso jam estis tute malsana kaj ne povis iri plu. Tial alproksimiĝis Kiŝ kaj mortpikis ĝin.

— Kaj poste? — demandis Kloŝ-Kŭan.

— Tiam ni forvenis, dum Kiŝ senhaŭtigis la urson, kaj ni kuris rapide al vi, por ke vi sciu pri la mortigo.

Kaj tiun tagon, posttagmeze, la virinoj hejmentrenis la viandon, dum la viroj kunsidis en la konsilejo. Kiam alvenis Kiŝ, ili invitis lin veni al la konsilejo, sed li respondis dirante, ke li malsatas kaj estas laca. Li ankaŭ diris, ke lia igluo estas granda kaj komforta kaj povas enhavi multajn homojn. Kaj tiel forte ili volis scii pri la okazintajoj, ke iris al la igluo de Kiŝ la tuta konsilantaro kun Kloŝ-Kŭan antaŭe. Kiŝ estis manĝanta, sed akceptis ilin laŭ ilia rango. Ikiga montriĝis jen fiera, jen embarasita, sed Kiŝ estis tute trankvila. Kloŝ-Kŭan rerakontis la sciojn kiujn alportis al li Bim kaj Bon.

— Do ni deziras klarigon, ho Kiŝ, pri la maniero de via ĉasado. Ĉu vi uzas la sorĉarton?

Kiŝ levis la vizaĝon kaj ridetis.

— Ne, ho Kloŝ-Kŭan, ne konvenas, ke mi nura knabo, sciu ion pri sorĉistinoj, kaj pri tiuj mi nenion scias. Mi nur eltrovis rimedon, per kiu mi povas facile mortigi la glaciurson, Jen ĉio! Tio estas "cerbarto", ne "sorĉarto".

— Kaj ĉu povas fari tion ĉiu homo?

— Ĉiu homo.

Estis longa silento. La viroj rigardis la vizaĝojn reciproke, kaj Kiŝ daŭrigis la manĝadon.

— Kaj . . . kaj . . . ĉu vi sciigos nin, ho Kiŝ? — fine demandis Kloŝ-Kŭan per tremanta voĉo.

— Jes, mi sciigos vin.

Kiŝ, suĉinte oston, leviĝis.

— Estas tute facile. Jen!

Li prenis maldikan pecon da balenosto kaj montris ĝin al ili. La pintoj estas tiel akraj kiel la kudriloj. Li zorge faldis la pecon da osto tiel, ke ĝi kaŝiĝis en lia mano. Tiam, subite, li lasis ĝin refleksiĝi. Li prenis pecon da graso.

— Jen! — li diris. — Oni prenas peceton da graso kaj faras en ĝi kavaĵon. Nun en la kavaĵon oni enmetas la balenoston rigide falditan kaj fiksas ĝin per alia peceto da graso. Poste, oni metas ĝin ekster la domon, kaj ĝi frostiĝas kiel pilko. La urso englutas la pilketon, la graso fluidiĝas, kaj la osto kun akraj pintoj streĉiĝas rekta. La urso malsaniĝas, kaj kiam la urso estas tre malsana, oni mortpikas ĝin. Estas tute simple.

Kaj Ugh-Gluk diris: "Oh!" Kaj Kloŝ-Kuan diris: "Ah!" Kaj ĉiu diris ion laŭ sia propramaniero, kaj ĉiu komprenis.

Kaj tio estas la rakonto pri Kiŝ, kiu vivadis antaŭ longe sur la bordo de l' polusa maro. Ĉar li uzis "cerbarton" kaj ne sorĉarton, li levis sin el la plej humila igluo, ĝis fine li fariĝis la ĉefulo de la vilaĝanoj, kaj, dum sia tuta vivo — oni diras — la gento prosperis, kaj nek vidvino, nek malfortulo laŭtploris dum la nokto pro manko de viando.

El la angla: E. H. Collison.



"REZERVITA KUPEO."

Viktoro Rákoŝi.

Antaŭ nelonge okazis fervoja elreliĝo, pro kio feliĉe nur kvar bovoj estis mortigitaj. Dimanĉe nokte nur mi sola estis en la redaktejo, kiam alvenis la telegramo pri tio. Jus mi volis verki artikolon pri la malpermeso de oranĝimporto (ĉar mi havis la vicon por verki artikolon). Sed la telegramo donis alian direkton al miaj pensoj. Pli ĝuste estos ataki la trafikministron, kaj defendi la fervojan personaron, kiu estas tro ŝarĝata de laboroj, kaj tiel laciĝinta, ke kun prudento oni ne povas respondecigi ilin pro akcidentoj.

La artikolo aperis, kaj kiuj legis ĝin, tiuj tre miris, ke pro kvar bovoj de aliulo, oni faras tiel grandan bruon.

La mirantoj forgesis tiun ĵurnalistan principon, ke hodiaŭ estas pli bone kvar bovoj ol morgaŭ unu otardo. (Hungara proverbo)

La artikolo faris efikon ankaŭ al la oficialaj rondoj, ĉar dum la antaŭjuĝa esploro ĉiuj estis senkulpigitaj el inter la personaro.

Jam delonge mi forgesis la aferon, kiam venis al mi fervoja konduktoro kaj demandis min, ĉu mi verkis tiun artikolon?

—Jes, — mi respondis.

—Akceptu sinjoro mian dankemon. Mi estis la ĉefakuzato, kaj pro la efiko de via artikolo oni senkulpigis min.

—Mi gratulas vin. Kion vi volas?

—Mi volas esprimi mian dankemon.

—Per kio?

—Mi alportis ŝlosilon, kiu malŝlosas ĉiujn kupeojn. Certe vi jam rimarkis, ke sur la vagonaroj estas multaj kupeoj kun la jena surskribo: **Oficiala kupeo aŭ rezervita kupeo.** Nu mi diras al vi, ke ili plej ofte estas malplenaj.

—Ne diru.

—Sed mi diras. Kaj se vi volas veturi komforte, tute simple vi malŝlosos tian kupeon, okupos ĝin, ŝlosos la pordon, kaj plu eĉ la diablo ne embarasos vin.

Kompreneble, la donacon mi akceptis, kun la plej granda ĝojo.

Matene la alian tagon mi estis veturonta al

Pozsony por partopreni geedziĝfestenon. Kun valizo en la mano, promenante en la perono de la okcidenta stacidomo, mi serĉis konvenan kupeon inter la amaso de vojaĝontoj. Fine mi rimarkis unu rezervitan **kupeon**. Trankvile mi malfermis kaj eniris ĝin.

Iu sinjoro kuŝis tie kaj dormis. Pro la ekbruo de la pordo li vekiĝis, salutis min kaj diris:

—Se mi havus dek-milionojn da pengoj mi aĉetus nutraĵon por liveri al la armeo.

—Ĝuste vi farus tion, — mi respondis indiferente.

Dume li rimarkis, ke la pordo estas malfermita, li salutis min kaj subite saltis el la kupeo. Mi bone ridis. Certe li tute same akiris la ŝlosilon kiel mi, kaj nun li forkuris, pensante, ke mi estas la rajta rezervinto de la kupeo.

Zorge mi ŝlosis la pordon, la kurtenon mi malsuprentiris kaj ĝuis la bruon de la perono, la kriojn de centoj da homoj pro kupeo.

La vagonaro ekiris. Ĝis Vacz ĝi ne haltis. Tie je mia miro, malfermiĝis la pordo kaj mi ekvidis nigre vestitan sinjoron kun du viroj aspektantaj kiel servistoj.

—Bonvolu elvagoniĝi, — li diris afable.

Mi konjektis malbonon. Mi elvagoniĝis.

—Ĉu vi estas fervojisto? — mi demandis maltrankvile.

—Ĉu mi? Jes, — li respondis post ioma hezito.

—Ĉu mi devas pagi punmonon?

—Oh, ne, sed estu bonvola veni kun ni.

—Kien?

—Al mi.

—Ĉu pro pridemando? Sed tiam mi malfruos la vagonaron.

—Sed post unu horo venos alia.

—Ni lasu tiun multan superfluaĵon. Mi diros miajn nomon kaj adreson kaj faru proceson kontraŭ mi, pro tio mia ĉeesto ne estos hezonata.

—Sed estos bezonata. Kion fari? leĝo estas leĝo.

Tiam ni jam atingis la antaŭon de la stacidomo. Strangforma ŝlosebla veturilo staris tie.

—Bonvolu enveturiliĝi.

—Mil inferoj, kien ni iros? Tio estas absurdo.

Antaŭ kiam mi estus povinta malhelpi, la du servistoj ekkaptis min kaj metis en la veturilon. Ili sidiĝis apud mi, la nigre vestito kontraŭ mi.

Miaj pensoj fulmrapide flugadis en mia cerbo. Se ni estus en la deksepa jarcento, mi pensus, ke la vidvina grafino, kiu adoras min, forrabigas min, aŭ iu monarho tiel kolektas sian armeon. Sed en la nuna jarcento tio ne povas okazi, ke en Vacz matene je la naŭa horo virino pro amo forrabigu iun, eĉ se li estus la plej bela inter ĉiuj beluloj.

Mi ekmeditis. Mi malsaĝulo lasis forkuri frenezulon el la kupeo, kiu veturis ĉi tien. Teruro trairis min. Oni opinias, ke mi estas la frenezulo. Kiel mi liberiĝos el tiu ĉi afero.

Mi bonkondutis.

—Ĉu vi kondukos min en frenezulejon? — mi demandis la nigran sinjoron.

—Ne. En privatan sanatorion de Fuchs.

—Sed tie estas frenezuloj, ĉu ne?

—Ne, nur nervmalsanuloj kaj simplaj imagemuloj.

—Kien oni envicigas min?

La nigra sinjoro hezite rigardis min.

—Laŭ sciigo vi apartenas al la imagemuloj.

—Kaj kio estas mia monomanio?

—Tio, ke vi estas Rothschild.

—Vidu, tio ne estus malsaĝaĵo. Pli freneza estus Rothschild, se lia monomanio estus, ke li estas mi.

La nigra sinjoro ne ridetis. Eĉ pli grandajn frenezaĵojn li jam aŭdis.

Sur la teraso de la sanatorio, sinjoro Fuchs jam atendis nin. Surprize mi rigardis lin.

—Miŝka, ĉu vi estas?

Li estis mia kunlernanto.

—Ho, vi estas Kazimero Fuzessy, — ekkriis li ankaŭ pro surprizo.

—Vere, korpe-anime.

—Ĉu vi akompanis mian pacienton? Kvankam ni tiel sciis, ke sola li veturos en rezervita kupeo.

Verŝajne malantaŭ mi la nigra sinjoro mansignadis, ĉar la mieno de Fuchs subite ŝanĝiĝis.

—Ĉu tiel? — li murmuris, — venu en mian ĉambron.

Li mansignis al la aliaj, ke ili restu ekstere, kaj ni paŝis en lian ĉambron. Subite li turnis sin al mi kaj diris:

—Barona moŝto! Kiom mi vendu el la brazilaj biloj en la pariza bilborso?

Esplore li rigardis min, sed mi pli esplore rigardis lin.

—Bonvolu diri barona moŝto, ĉu ni ne aĉetu bagdad-fervojajn bilojn? Oni povus per ĝi gajni multon.

Ĉu li freneziĝis? Mi ĉirkaŭrigardis, se li furioziĝos, per kio mi povus defendi min.

—Barona moŝto, mi havas la honoron transdoni al vi la etaton pri la rio-tintoa orminejo.

Kaj malplenan paperpecon li metis antaŭ min. Subite klariĝis al mi, ke li volas veki en mi la monomanion de Rothschild. Mi ekridis.

—Bone, bone, mia knabo. Vane vi admonas min, mi ne estas tiu, kiun vi pensas.

Kaj mi rakontis al li la tutan aferon, tiel, kiel ĝi okazis de la komenco. Lia mieno pli kaj pli malsereniĝis, fine jam la plej grandan senesperiĝon mi rimarkis ĉe li.

—En bela embaraso mi troviĝas. Vi liberigis mian frenezulon, kaj la lokaj kuracistoj estas en la apuda ĉambro por kuracesplori lin.

Maltrankvile li tien-reen iris en la ĉambro.

—Kion mi faru? Mi ne povas konfesi, ke la frenezulo forkuris. Oni farus pri mi tian malbonan famon, ke certe bankrotus mia instituto. Kion mi faru, kion mi faru?

Subite li haltis apud mi.

—Nur vi povas helpi min. Ŝajnigu vin freneza.

—Mi ne estas freneza.

—Komprenu. Nur dum la tempo de la kuracista konsultiĝo.

—Ĉu valoras al vi ion la opinio de la kuracistoj pri mi? Mi ne estas tiu, kiun vi atendis.

—Tio faras nenion. Se alvenos la forkurinta paciento, certe mi kuracesplorigos lin.

—Diru al ili, ke ne alvenis la malsanulo.

—Ili jam scias, ke vi alvenis.

—Sed mi estas sana.

—**Tio ne estas grava. Fine vi faris tiun ĉi embarason, nun estas via devo helpi min.**

Mi spiregis. Bone.

—Nur estu saĝa. Ne forgesu la Rothschild-monomanion.

Post kvin minutoj jam mi troviĝis inter la kuracistoj, kiujn Fuchs prezentis al mi kiel konsilantoj de la pariza hilhorso.

—Ah, ĉu vi estas parizano?

Kaj mi komencis paroli kun ili france. Ĉiujn iliajn demandojn mi respondis france, kaj ili nur kapbalancis. Post unuhora esplorado kiam mi jam komencis furioziĝi kaj e s k s c i t i ĝ i, ili forkuris. Fuchs tuj raportis al mi, ke per du voĉoj kontraŭ unu ili deklaris min neresanigebla frenezulo. La tria pro mia rigardo, opiniis min idioto.

Post kiam mi kaj mia amiko Fuchs manĝis iom, mi rapide reiris al la stacidomo, por ke mi veturu hejmen al Budapeŝto. Guste tiam la vagonaro staris tie, mi envagoniĝis kaj okupis lokon en kupeo kie nur unu viro dormis.

La vagonaro ekiris. La dormanto vekiĝis kaj sidiĝis. Sankta Dio! Kie mi jam vidis tiun ĉi viron? Ĉielo — li estas mia frenezulo, kiun matene mi liberigis.

—Ĉu vi estis en Vacz? — mi demandis embarasite.

—Jes — respondis li tute trankvile.

—Kion vi faris en Vacz?

—Mi aĉetis la episkopan kastelon.

—Ĉu tiel riĉa vi estas?

La kompatindulo ridis feliĉe.

—Ĉu vi ne konjektas, kun kiu vi parolas?

Tuj mi ekmeditis.

—Ĉu ne al barona moŝto Rothschild mi havas la honoron?

—Jes mi estas tiu. Ĉu vi estas malriĉa?

—Sufiĉe.

—Akceptu ĝin.

Kaj li transdonis al mi iun malplenan paperpecon.

—Ĉi tio estas asignilo pri kvincentmil pengoj.

Mi transprenis ĝin. En tiu minuto la pordon malfermis iu ĉasisto, li enrigardis de la koridoro, kaj ekkriis:

—Hej, ĉi tie estas preskaŭ malplena kupeo.

Kaj sen saluto li okupis lokon. La vizaĝo de mia homo komencis ŝanĝiĝi. Fine li turnis sin al la ĉasisto kaj diris:

—Deprenu vian ĉapelon, mi estas barono.

—Min tute ne interesas, eĉ se vi estas mem la mikado de Japanujo,

Pro tio mia homo ekstaris kaj deĵetis la ĉapelon de la ĉasisto, sur la plankon. La ĉasisto pro kolero ekkaptis lin. Mia homo grincigis siajn dentojn, . . . mi ektiras la danĝerbremson, la vagonaro kun terura grincado ekhaltas, la pasaĝeroj saltas el la vagonoj, la pasaĝeroj de la apuda kupeo krias por kuracisto, ĉar ĉi tie estas frenezulo.

Dume mi stariĝas sur la ĉasiston kaj mian homon, kiuj falis pro la subita ekhalto de la vagonaro, por ke ili ne povu stariĝi.

Tiam en la pordo de la kupeo aperas. **Unu el la Vacz-aj kuracistoj,** kiu deklaris min neresanigebla frenezulo. Li mansignis kaj du fortikaj konduktoroj envenis la kupeon, ili ekprenis kaj ligis min per rimenoj. Ju pli mi kriadis kaj baraktis des pli ili kuntiris la rimenojn. Mi jam preskaŭ svenis pro la kolerego kaj doloro.

Tiel mi atingis Budapeŝton. Tie klariĝis la eraro, antaŭ kiam oni estus reekspedinta min al Fuchs.

El ĉio ĉi tio, ho miaj homfratoj, vi povas lerni, ke nur tiam ni veturu en rezervita kupeo, se ni pagis por ĝi, aŭ se ni estas frenezaj.

El la hungara: L. Rereips.



VIRO EN MARON!

Vincent Blasco Ibanez.

EL "LITERATURA MONDO"

Vespere forveturis de **Torrevella** la velŝipo **Sant Rafel,** plenŝarĝita per salo, al Gibraltar.

La holdo estis tute plena kaj sur la ferdeko la sakoj amasiĝis formante veran monton ĉirkaŭantan la ĉefmaston.

Por trapaŝi de la antaŭo al la malantaŭo de l' ŝipo, la ŝipanoj estis devigataj paŝi sur la bordoj kun danĝera ekvilibrado.

La nokto estis bona; nokto somera, kun steloj plenigantaj la tutan firmamenton kaj kun venteto freŝa, iom neregula, kiu jen plenblovis la grandan velon latinan ĝis ĝemigo de l' masto, jen ekhaltis svene, faligante la grandegan tolon kun flugilsimila hrubatado.

La ŝipanaro, kvin viroj kaj unu junulo, vespermanĝis post la ekvetura marlaboro kaj jam puriginte per pano la kaldronon, en kiun de la ŝipestro ĝis la lasta metilernanto ĉiuj enŝovis pecojn da **rollo**[1] kun marista frateco, malaperis tra la plankpordo ĉiuj ŝipanoj dejorliberaj por ripozigi sur la malmola matraceto la ventrojn plenplenajn de vino kaj melonsuko.

Ĉe la direktilo restis onklo[2] **Chispes,** sendenta skvalo, kiu akceptis kun senpaciencaj gruntoj la lastajn ordonojn de la ŝipestro, kaj apud onklo **Chispes** sidis Johano, metilernanto, kiu faris en **Sant Rafel** sian unuan vojaĝon . . . **kaj li estis tre dankema al la onklo,** ĉar dank' al li oni akceptis **lin en la ŝipanaron,** sufokante tiamaniere lian **malsaton,** kiu ne estis malgranda.

La **mizera** velŝipo ŝajnis al Johano ia admirala **militŝipo,** ia ensorĉita barko naviganta tra la maro de la abundeco. La vespermanĝo de tiu nokto estis la unua vespermanĝo serioza, kiun li ĝuis dum sia vivo.

Li estis deknaŭjara, malsata kaj nuda kvazaŭ sovaĝulo. Li dormadis en ruiniĝinta barko, kie ĝemetis kaj preĝadis lia avo senmova pro reŭ**matismo;** dumtage li helpis albordigi barkojn, de**ŝarĝi korbojn** da fiŝo, li iris, kiel parazito, en tiajn ŝipojn, kiuj persekutas la tonfiŝon kaj la sardinon, por porti **hejmen** plenmanon da ili. Sed nun, dank' al onklo **Chispes,** kiun li tre amis pro tio, ke li estis **konanta** lian patron, li estis vera maristo, li jam **estis survoje** por fariĝi taŭga homo, li povis **kun plena rajto** enŝovi la brakon en la kaldronon, kaj **li eĉ** uzis ŝuojn! . . . la unuajn dum sia vivo . . . ili **estis du** grandaj ekzempleroj kapablaj navigadi **same kiel** fregato . . . rigardante ilin li eniĝis en **maron de** admirado. Kaj oni parolaĉis ankoraŭ, **ke la maro!** . . . Nu . . . se tia, ĝi estas la plejbona **metio en la mondo!**

Onklo Chispes, ne forigante la rigardon de la

ŝipantaŭo, nek la manojn de sur la direktilo, kurbigante sin por esplori la mallumon inter la velo kaj la amaso da sakoj, aŭskultis lin kun bonkora rideto.

— Jes, vi ne elektis malbonan metion. Sed ĝi havas bankrotojn. Vi vidos ilin... kiam vi havos mian aĝon... Sed via loko ne estas ĉi tie: iru al la ŝipantaŭo kaj avizu, se vi vidas antaŭ ni ian ŝipon.

Kaj Johĉjo kuris sur la bordo kun la memfida trankvilo de marborda vagulo.

— Zorge, he, zorge!

Sed li jam estis en la ŝipantaŭo kaj sidiĝis sur la busprito, esplorante la nigran surfacon de la maro, kie reflektiĝis kiel serpentoj la lumfadenoj de la steloj.

Tiu vojaĝo al la urbo estis la revo de la riĉa kamparanineto; la revo kovita dum tuta jaro. De kiam ŝi atingis la vilaĝon, reveninte el Barcelono, ĉiutage ŝi raviĝis rigardante la irojn kaj reirojn de la vagonaroj, ĉiam kun la sama deziregо,ke ili forkonduku ŝin malproksimen, en tiun urbon tiel belan, kie ĉio estas movo kaj ĝojo. Ĉiun fojon kiam la vagonaro revenigis ŝin hejmen, ŝi diris "ĝis revido" al la urbo per la samaj vortoj: ĝis venonta jaro! Kaj ŝi diris tion tute malgaja, kaj por ŝi pasadis malgaje semajnoj kaj monatoj. Kiom longa estis por Rozo la somero! Ĉiuj Barcelonanoj venintaj en la vilaĝon nur rememorigis al ŝi la sopiratan urbon, kaj ĉar ili estis tiel proksime, ŝajnis al ŝi,ke Barcelono estas pli malproksime, ŝajnis al ŝi ke, kiel tiuj aliurbanoj, la maŝinoj povos iri al la vilaĝo, kaj la patro de Rozo ŝparos vojaĝojn, kaj ŝi ne povos reiri tien, kie ĉiam estas plej granda festo. Kiel malfruis Kristnasko! Kia malvarmo en la vilaĝo dum la malgajaj monatoj! En Barcelono sendube neniam estis malvarme kun tiom da lampoj ĉiam brulantaj, kaj kun tiom da domoj haltigantaj la blovojn de okcidento: sendube neniu sidis kuntirite apud la fajro, ĉiuj promenis certe en la strato sub la suno, tiu suno tiel sinjora,kiu ne brunigis,kiel la vilaĝa.

La suno! Rozo rigardadis malafable la vintran sunon, kvazaŭ riproĉe tial ke ĝi leviĝis malfrue. Kaj kiam ĝi ekestis pli fruema, kaj Rozo lumblindiĝis rigardante ĝin, ŝiaj okuloj plenĝojis, kaj ŝi iradis kaj reiradis al la fruktarbaro kaj petis al la migdalarboj ke ili rapidu ekflori.

Kaj kiam la branĉaro de migdalujoj ŝajnis bukedo de jasmenoj greftita je rozo, la knabino pasigis multe da tempo sub la florintaj arboj; kaj dum ŝi revadis nur al la sopirata urbo, la suno, ludetante, eniĝis de l' branĉaro. Kaj sunmakulo falis sur Rozon, kaj ŝi, blindigita, fermis la okulojn. Havis la vizaĝon lentuga kaj la harojn ruĝaj la kamparana knabino; kun fermitaj okuloj, plenbanita de l' suno, kaj apud la florinta migdalarbo, Rozo aspektis kiel kupra idolo sub flora baldakeno.

Kaj kiam, en la vagonaro, Laŭrenco kaj lia filino pasis sur tiu sulko, kiun en la bieno faris la lokomotivo,—la granda plugisto,—la knabino ne estis jam tiel kontenta kiel antaŭan tagon, ŝi pensis jam al malgajeco de la reveno. Sed, alveninte Barcelonon, tiu malĝojo malaperis, kaj la plezuro esti ĉe la granda urbo forviŝis eĉ la rememoron pri antaŭaj nostalgioj.

Ho, la urbo! Granda homamaso ĉie, la veturiloj kurante kvazaŭ spiritposeditoj, muzikistoj en la stratoj, sonorilbruo ĉiuhore, surdiganta kriado, bruado,kiu ne permesis aŭdi la malsilenton de la maro, de tiu senfina voĉo da ondoj venantaj el malproksime, tre malproksime, el tie,kie la ĉielo kliniĝas por donadi al ĝi kisojn. Nenia malĝojo estis en la urbo, ĉar ĉiu rapidis kun okuloj brilantaj kaj firma paŝado, ĉar oni vidis ĉie signojn de festo, kaj la promenejaj arboj larmis ligaĵojn de rubandoj el senkolorigita papero,—ĉifonoj de antaŭjara gajeco,—kaj en stratoj kaj placoj regis nova ĝojo. Ĉiu estis riĉa en la urbo: mono abundegis, veluron kaj silkon oni vestis ĉiutage, kaj en la montrejoj de juvelistoj neniam oni revidis la samajn juvelojn de antaŭ jaro. Ĉiu amis en la urbo, ĉar sufiĉe diris tion la rigardoj de tiuj altrangaj virinoj promenantaj sur nekovritaj veturiloj, tirataj de du ĉevaloj kun floroj ĉe l' jungaĵoj. Ĉiu estis amata en Barcelono, eĉ la knabinoj kun lentuga vizaĝo, eĉ tiuj kun ruĝaj haroj.

Kaj kiam vesperiĝis kaj oni bruligis tiun belan lumilaron, kaj la tempo reveni vilaĝon estis jam proksime, kiel belaj Rozo trovis la ridojn de la homoj kaj la juvelojn de la elmontrejoj, kaj la virinojn rigardantajn kun amaj okuloj! Ho! Se ŝi povus nur pasigi unu nokton en la urbo, en tiu urbo,kie oni sonĝis tiel belajn aferojn, kiel tiuj klarigitaj en amrakonto! Se ŝi povus scii kiel parolas pri amo, en la urbo, tiuj kiuj amas la knabinojn kun lentuga vizaĝo kaj ruĝaj haroj!

La urboj estas bonaj nur por nelonga tempo,— Laŭrenco diris al sia filino, revenante sian vilaĝon.

Trad. Marian Sola, L. K.



LA PLEJ JUSTA JUĜO.

LAŬ HINDA FABELO.

EL "LITERATURA MONDO"

Ramigan, la granda skeptikulo, kies sentencoj kaj juĝoj estis famaj de la Flava Maro ĝis la Tigro kaj Eŭfrato, sidis trankvile kaj bonhumore inter siaj disĉiploj.

"Saĝulo granda" — diris unu el ili — "via saĝo lumas kiel la torĉo en la nokto de l' densejo. Niaj animoj soifas ĝian lumon, ĵetu al ni radion el ĝi".

La Majstro, kiu post bonaj kaj abundaj vespermanĝoj kutime rakontis ion al siaj disĉiploj — ĉar la rakontado favore influas la digestadon — diris afable:

"Bone, mi rakontos al vi mian plej justan juĝon. Aŭskultu atente!

En hinda vilaĝo vivis bramano. Li ne estis tro

riĉa, sed tamen li havis grandan trezoron: filinon kiu estis pli bela ol la matenruĝo, pli graeia ol la lotusfloro tremanta en la arĝentaj radioj de la luno. Ŝia korpo estis pli freŝa ol la ŝaŭmo de la printempa torento; en ŝiaj okuloj brulis misteraj flamoj kaj inter ŝiaj haroj abundaj kaŝis sin dolĉa animo de jasmenfloroj. Oni diris, ke Kamadeva flugadas ĉiam ĉirkaŭ ŝi, kaj ĵetas el sia flora pafarko sagon al ĉiu viro, kiu kuraĝas al ŝi proksimiĝi. Oni nomis ŝin Madhupamanjari, ĉar kiel la flora branĉo la abelojn, ŝi allogis ĉiujn virojn per sia dolĉa altirforto.

Kvar junuloj svatis pri ŝia mano. Sed ŝi ne povis elekti. Ŝia koro, kiel la kano en la vento, kliniĝis jen al unu, jen al la alia.

Foje, kiam ŝi dormis en la ĝardeno, venena serpento mordis ŝin. Kaj ŝi mortis.

Neeldirebla doloro kaptis ĉiujn. La patro mortis pro la terura korturmento. La amantoj ploris kaj veis.

La unua ne povis elporti la vivon sen ŝi. Kiam oni, laŭ la sanktaj kutimoj, bruligis ŝian kadavron, li ĵetis sin en la flamojn, kaj pereis. Liaj cindroj miksiĝis kun la cindroj de la adorata knabino.

La dua faris sanktan promeson, ke ĝis la fino de sia vivo li ne formoviĝos de la kara tombo, li gardos fidele ŝiajn cindrojn.

La tria ektiris siajn ŝultrojn, kaj trankvile, kvazaŭ nenio estus okazinta, li reiris en sian vilaĝon.

La kvara serĉis forgeson per vagado tra la mondo.

Ĉi tiu lasta do vagis migrante dum longa, longa tempo. Foje, malfruan vesperon, li venis al dometo, kaj laca li petis tie noktan ripozlokon. La mastro akceptis lin gastame kaj regalis lin per bona vespermanĝo. Sed jen, la filo de la mastro, petolema infano, kiu kuradis ĉirkaŭ la tablo, ekfalinte kaptis al la rando de la tablotuko kaj ĵetis ĉiujn vazojn al la tero. Pro rompiĝo de la vazoj la patro forte ekkoleris, kaj en sia subita furoro li kaptis sian filon, kaj ĵetis lin en la fajron. Vidante la kruelan morton de la infano forte indigniĝis nia migranto. "Kia kruelo, kia abomeno! Eĉ momenton mi ne restos plu en la domo de tia homo!" — li kriis kaj volis foriri. "Trankvilon, kara!" — diris la mastro — "okazis ja nenio grava". Kaj li prenis libron, legis el ĝi sep sorĉajn vortojn kaj jen, la infano saltis vive, gaje el la cindro.

Senpacience atendis nia migranto la nokton. Kiam ĝi alvenis, li prenis al si la libron kaj ŝtele foriris el la domo, kaj tage-nokte, senripoze li rapidis, la batoj de lia koro, kvazaŭ instigantaj vipofrapoj pelis lin al la hejmo, al la tombo de la adorata Madhupamanjari.

Veninte al la tombo, li legis el la libro la sep sorĉajn vortojn, kaj jen, kiel Ŝri, la diino de l' amo el maraj ondoj, leviĝis Madhupamanjari el la cindroj vive, ridetante, en centobla beleco.

Sed kun ŝi leviĝis ankaŭ la junulo, kiu ĵetis sin en la flamojn.

Kaj ĝojkriante saltleviĝis, etendante siajn rigidajn membrojn, la ĝis nun senmova gardanto de la tombo.

Kaj la rapide disvastiĝinta famo pri la miraklo baldaŭ alvenigis ankaŭ la kvaran junulon.

Do denove kvar junuloj svatis pri la mano de Madhupamanjari. Kaj ŝia koro restis, kiel la kano en la vento. Ŝi ne povis decidi.

Fine ŝi diris: "Tiu havu min, kiu pleje min meritas". Kaj ili venis al mi por peti mian juĝon.

"Kaj vi? Al kiu vi juĝis ŝin?" demandis scivole la disĉiploj.

"Mia saĝo eldiris la juĝon jene:

Kiu revivigis la knabinon, tiu meritas, ke li estu ŝia patro, ĉar li donis vivon al ŝi.


Kiu ĵetis sin en la flamojn, tiu meritas, ke li estu ŝia frato, ĉar li estis tiel oferema.

Kiu gardis fidele la cindrojn, tiu meritas, ke li estu ŝia sklavo servema por ĉiam.

Kaj kiu ektiris la ŝultrojn, kaj trankvile hejmeniris, tiu meritas, ke li estu ŝia edzo. Li havu la knabinon."

"Granda vi estas majstro!" Kriis la disĉiploj unuanime.

Teo Melas.



Giordano Bruno—martiro de l' libera penso.

EL "SENNACIULO"

Ne decas, ŝajnas al ni, malatenti per silento en "S-ulo" pri memordato, iom malproksima en la pasinto, sed malgraŭ tio ne malpli emociiga kaj instrua por ni. En ĉiuj jarcentoj mortis herezuloj por siaj ideoj, kiam ili malkaŝe elpaŝis kontraŭ dogmoj kaj kontraŭ la institucioj, kiuj predikas kaj disvastigas dogmojn. Bruno estas nur unu el multaj, sed unu el la plej admirindaj. RED.

Kiel admonanta flamsignalo por ĉiuj liberaj spiritoj lumas el la pasinto en nian ankoraŭ ĉiam tiel malluman tempon la lignoŝtiparo de Giordano Bruno, kiu estis bruligata je 17. februaro 1600 laŭ la ordono de l' katolika eklezio. Unu el la plej bonaj, plej liberaj kaj plej kuraĝaj viroj ĉesis vivi antaŭ 330 jaroj sub la manoj de l' ekleziaj ekzekutistoj. Kiel bando da sangavidaj lupoj la altranga pastraro ĵetis sin sur tiun ĉi viron, kies korpon ĝi povis detrui, sen ke ĝi sukcesis ekstermi liajn pensojn.

Hodiaŭ ni apenaŭ povas imagi, ke la doktrino de Koperniko, kiu aperas al ni ĉiuj tiom memkomprenebla, iam plej akre ekscitis la spiritojn, ĉar ĝi ja renversis ĉion malnoviĝintan kaj forpuŝis la homon el lia pozicio kiel centro de l' universo kaj fincelo de l' kreado. La sango de multaj martiroj gluas je la nova doktrino, ĉar tenis supervenki gigantan malamikon, arkaiĝintan mondkoncepton, kiu intime estis kunligita kun la plej granda politika potenco de l' epoko, kun la potenco de l' eklezio, kiu timis nenian rimedon por ekstermi siajn kontraŭulojn. Sed la novaj ideoj estis pli fortaj ol la reakcio.

Unu el la plej grandaj kaj entuziasmaj batalantoj estis Giordano Bruno, kiu en la jaro 1548

naskiĝis en Nola. Lia deveno ne estis tre nobla, ĉar lia familio estis malriĉa. En la 15. vivjaro li eniris kiel novico la monaĥejon de l' sankta Dominiko en Napoli, tre verŝajne, por povi dediĉi sin malgraŭ sia malriĉo al la sciencoj. En tiu ĉi monaĥejo li pasigis 13 jarojn. Estas kompreneble, ke tiel liber-ama genio jam frutempe devis ribeliĝi kontraŭ la spirita devigo de l' monaĥeja vivo. Baldaŭ ekokazas interpuŝiĝoj kun la estroj. Tro malvasta kaj tro malgranda fariĝis la mondo de l' mezepoko, "kiam la admonanta vorto de Koperniko frapis al la pordo de lia junula animo". Per liberaj opiniesprimoj kaj per la legado de malpermesitaj libroj il fariĝis suspektata. En la jaro 1575 la provinca estro de lia kongregacio prezentis gravan akuzon kontraŭ li pro herezo. Ĉi tiu aperis al Bruno kune kun personaj malamikaĵoj de malbonintencaj kunkongregacianoj tiel danĝera, ke li forkuris de Neapolo al Romo, por sin mem defendi ĉe la prokuroro de l' kongregacio. Sed malbonaj sciigoj sekvas lin; malpermesita libro estas trovita, kiun li estis ĵetinta antaŭ la forkuro en sekretejon de la monaĥejo. Li nun demetis la monaĥan kostumon kaj vagis kiel privatinstruisto tra la italaj urboj. En Genovo la forkurinto unuafoje haltis. Ĉi tie li havis okazon observi la tutan degeneron de l' religio, kiu akuzis kaj persekutis lin kiel herezulon. Guste estis solenata grava eklezia festo kaj la monaĥoj de Kastelo (Castello) elmontris sian plej sanktan relikvaĵon, nome la laŭdiran voston de l' azenino, kiu portis la Sinjoron dum lia lasta paska vojaĝo. La kredema popolo alpremiĝis al la silkokovrita sanktaĵo, kaj la monaĥoj kriis kiel la foir-marĉandistoj: "Ne tuŝi! Kisu ĝin! Estas la relikvaĵo de tiu sankta azenino, kiu estis konsiderata digna porti nian Disinjoron de la Olemonto al Jerusalemo. Flaru ĝin! Kisu ĝin! Prezentu almozojn! Vi ricevos centoble kaj akiros la eternan vivon!" Naŭzita de tio, Bruno skribis tiam sonecton kontraŭ la malklero kaj nepensemo, por scienco kaj racio, en sian taglibron.

Sed nenie la rifuĝanto estis ŝirmita. Ĉie embuskis la spionoj de l' inkvizicio. Tiel li, la filo de l' sudo, estis pelata trans la alpojn en la malserenajn nordajn landojn. En Genevo, la fortikaĵo de l' Kalvinismo kaj la rifuĝejo de multnombraj italaj protestantoj, li trovis okupon en la presejoj. Sed la espero de Bruno, esti atinginta sidejon de religia libero, estis maldolĉe trompata. Ĉar li rifuzis ĉiujn konvert-altrudojn kaj eĉ havis la kuraĝon ataki la opiniojn de iu Geneva filozofi-profesoro per malgranda pamfleto, la eklezi-estraro malliberigis lin kaj la presinton de lia skribaĵo. Tri monatojn poste li skuis de siaj piedoj la Genevan polvon.

Senripoze li migris, serĉante panakiron, tra Svisujo kaj Francujo ĝis Anglujo. En la domo de l' franca ambasadoro Mikaelo de Kastelno (M. de Castelnau) li travivis la plej feliĉan tempon de sia vivo kaj du jaroj da ripozado kaj paco produktis senmortajn verkojn. Per verko pri la memor-arto li akiris al si la instru-rajton ĉe la universitato de Oksford. Dum granda universitata soleno li profitis la okazon, por varbi en ampleksa disertacio por la kopernika mondsistemo. Sed li havis kontraŭ si la tutan Oksfordan profesoraron. Mezepoko kaj moderno interduelis. Kiam la Oksfordaj profesoroj ne sukcesis refuti la opiniojn de l' malagrabla novigulo, ili prenis la lastan rimedon kaj malpermesis al li la instruadon. En lia publikigo "Cindromerkreda manĝo" Bruno tiam atakis plej akre la anglajn vivkondiĉojn kaj defendis per entuziasmaj vortoj la kopernikan mondsistemon.

Pensante pri Koperniko Bruno sentis sin kvazaŭ liberigita de katenoj. Kristalaj sferoj ĝis nun estis ĉirkaŭbarintaj la universon kiel malliberejaj muroj. Nun ili disrompiĝis kaj la kosmo fariĝis granda kaj vasta. Nur en la lasta sun-stela sfero la kopernika sistemo trovas limon. Sed la universampleksanta spirito de Bruno disbatis ankaŭ tiun kaj metis kun admirinda antaŭsentemo la malproksimajn sun-stelojn kiel sunojn similajn al nia Suno en la senfinan universan spacon.

La senfine multaj mondoj sur la ĉielo, tiel instruis Bruno, estas ĉiuj similaj inter si. La miloj da sun-steloj, kiujn ni vidas brileti ĉe la nokta firmamento, estas sunoj, ĉirkaŭ kiuj planedoj rondiras, kiel ĉirkaŭ nia Suno. La substancoj, el kiuj kunmetiĝas la astroj, estas ĉie la samaj. Sed ankaŭ la ekzistokondiĉoj sekve ĉie estas la samaj, kaj ĉiuj malproksimaj kaj proksimaj planedoj devas esti loĝataj kiel nia Tero. Kion la scienco, la spektra analizo, esploris kaj instruis preskaŭ tri jarcentojn pli malfrue, tion la filozofo estis antaŭvidinta.

La multnombro da loĝataj mondoj estas kontraŭdira al la instruoj de l' eklezio kaj biblio kaj Bruno sciis, ke la eklezio lin tial persekutas kun nepacigebla malamo. Tiel li restis ekzilito en malserena nordo. Sed la sopiro al lia hejmo, al la blua ĉielo kaj la varmiga suno, ne forlasis lin kaj iĝis tiel forta, ke ĝi malfortigis la voĉon de l' racio. Nobelo, Giovanni Mocenigo estas la nomo de l' malnoblulo, skribis al Bruno kaj logis lin al Venezio, pretekste por ĝui lian instruon. Ĉar Bruno estis en financa malbonstato, li sekvis la inviton.

En la nokto al 22. majo 1592 la nobelo kun ses viroj penetris en la dormoĉambron de lia instruisto kaj malliberigis lin. Komenciĝis peniga proceso. Bruno defendis sin kun suda temperamento. Sed la inkvizicio estas surda, se ĝi ne volas aŭdi. Oni celis lin rezignigi kaj minacis lin per la torturo. Oni transportis lin de Venezio al Romo, kie li ok jarojn estis tenata en karcero. Pri la juĝtraktadoj nenio estas konata. Sed dum la longjara karcera restado kreskis la forto de spirito kaj karaktero de Bruno. Kio estas sorto de unu homo, se miloj da vivon donantaj sunoj moviĝas en la universo? Kion signifas malgranda homvivo, se temas batali por granda, mondliberiga ideo? Tiel li akiris la forton necedeme konfesi por sia instruo. Kaj lastfoje starante antaŭ siaj juĝistoj, li parolas aŭskultante la verdikton kun trankvila seriozo: "Kun pli granda timo vi konigas la verdikton, ol mi akceptas ĝin!"

En la 17. februaro 1600 Bruno suriris la en Romo starigitan ŝtiparon. La papo festis sian jubileon. Multnombraj el ĉiuj landoj ĉeestis en la Eterna Urbo. La plej altrangaj eminentuloj de la katolikaro amasiĝis, arigitaj ĉirkaŭ sia ĉefo, la anstataŭanto de Kristo, ĉi tie pri la agonio de l' filozofo. Sed nenia krio eliĝis el li, kaj kiam iu el la ekzekutistoj tenis antaŭ liaj okuloj krucon, li deturnis sian kapon kun muta malestimo.

Tiel mortis la "princo de l' herezuloj", unu el la plej bonaj homoj kaj plej grandaj filozofoj. Sed liaj pensoj vivas ankoraŭ...

Kompiltradukita laŭ artikolo de E. Krug en germanlingva revuo "Der Freidenker" (La Liberpensulo)



Aforismoj, Sentencoj, Paradoksoj.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Aforismo, kiel abelo, estas ŝarĝita per akiro kaj per pikilo. **Karmen-Silva.**

Nur unu vorteto donas indon al la ekzistado: la vorto "por". Viro diras: "por kio?",—virino diras: "por kiu?",—kaj infano respondas: "por mi!" **Karmen-Silva.**

Vivo neniam povas tedi, nur ni mem tedas al ni. **Karmen-Silva.**

Vi povas instruadi homojn nur tiam, kiam vi parolas en ilia lingvo. **Karmen-Silva.**

La unua filo de la unua patrino estis ribelisto kaj mortiginto. **Karmen-Silva.**

Homo diferenciĝas de besto per dubo. **Karmen-Silva.**

Se vi donas rifuĝejon al la hundo, mortanta pro malsato, kaj zorgas pri ĝi, ĝi neniam vin mordos. En tio ĉi konsistas la ĉefa diferenco inter hundo kaj homo. **Mark Twain.**

Ĉiuj diras: "Kiel malgaje, ke oni devas morti!" Stranga plendo en buŝo de homoj, kiuj deviĝis vivi. **Mark Twain.**

Ni konas perfekte la kutimojn de formiko; ni konas perfekte la kutimojn de abelo, sed ni nenion scias pri la kutimoj de ostro. Ŝajne ni ĉiam elektas neoportunan tempon por ellernadi ĝiajn kutimojn. **Mark Twain.**

Nenio tiel bezonas plibonigon, kiel la kutimoj de aliaj homoj. **Mark Twain.**

Por kio la homo havas liberan volon? Por ke li volu kaj ne povu. **Jozef Wasniewski.**

Per kia maniero oni povas fari bonon al la homoj? Neniam al neniu fari nenion. **Jozef Wasniewski.**



IOM PRI TABAKO.

El "La ora epoko"
EL "SENNACIULO"

En Ameriko estis eldonata libro kun supra titolo konsistanta el 183 paĝoj, de distingita kompetentulo Bernarr Macfadden, kiu enhavas tiom da verecoj pri la tabakĝuo, ke ĉiu devus nepre koni ĝin. La homoj ne havas komprenon pri ĉiuj tiuj faktoj, ĉar la kuracistoj fumas mem, mem trompas sin pro tio kaj prisilentas, kaj ĉar ekzistas viroj, kiuj havas tiel fortan sanstaton, ke ili povas fari per sia korpo ĉiun misuzon preskaŭ nepunate. Granda diferenco ekzistas kompreneble ankaŭ inter la malgrava malutileco, kiun havas la fumo, se ĝi pasas nur la buŝon kaj nazkavon kaj la grava malutilego, kiun la fumo kaŭzas, se ĝi estas enspirata en la pulmojn.

En angla verko, kiu temas pri la "efikado de venenoj", estas dirite:

Multegaj gravaj kazoj de malsano devenas de la enspiro de tabakfumo kaj ĝia efiko je pulmoj kaj mukhaŭtoj. Multe da okazoj rezultas el intenca aŭ hazarda enspiro de la tabakfumo. Nikotino estas la plej rapida kaj plej forte efikanta veneno, plej proksima al ciana acido.

La komparo de la nikotino kun la ciana acido estas ĝusta. Unu guto da ciana acido sur la lango de homo mortigas lin kiel fulmbato. Unu guto da nikotino sur la haŭto de kuniklo kaŭzas ties morton. Se la nikotino, kiun entenas unu sola cigaredo, estas ŝprucigata inter la haŭto, tio sufiĉas por mortigi homon, kiu ne estas kutiminta la tabakĝuon.

Sed la nikotinveneno ne estas la sola, kiu igas malutilega la tabakon. Se la tabako brulas, 70 procentoj de la nikotino aliformiĝas en piridinon kaj kolidinon; la aliaj 30 procentoj de la nikotino enspiriĝas.

Eltiraĵo de artikolo el la revuo "La ora epoko".

Tradukis H. Horn.



Ĉe Aĥmed' Paŝa, la granda pentristo.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Estis en Konstantinopolo, kaj la tago estis bela julia tago en la somero pasinta. Mia amiko Nehad Bej kaj mi, ni migris laŭlonge la strato, kiu iras de la ponto de la Galato ĝis Aja-Sofia. La suno bruligis, la hejtanta suno de tagmezo en la sudo—eĉ la plenforta altekreska bulgaro kun nudaj piedoj, brakoj kaj brusto, kun la flavkupra trumpeto en mano, kiu kuris antaŭ la omnibus', tiam kaj iam donante piedpuŝon al ia malrapida hundido, kiu ekdormis inter la koto sur la strato—eĉ ankaŭ li sopiregis pro la varmeco kaj streĉa laboro, dum li senĉese kun la libera mano penis fari elfluon por la riveroj da ŝvito, kiuj sennombraj kiel la fontoj de Nilo, sin elverŝis super lia kuprokolora vizaĝo.

Sed ni du, Nehad Bej kaj mi, ne longtempe deviĝis sopiri pro la varmeco kaj la polvo sur la stratoj de Stambul. Ne multe da tempo pasis, ĝis ni atingis nian celon—la aristokrata domo de Aĥmed Paŝa en unu el la mallaŭtaj, distingaj kvartaloj sur la supraĵo de unu el la sep montetoj de Stambul.—Tie ĉi supre estis silente, tiel malbrue kaj "nobele". Neniaj vokantaj "verdaĵistoj" (vendantoj de verdaĵo por manĝo) tie ĉi kriis sian eternan **Tomati y-a, toma-ti-y-a**, neniaj malgrandaj hebreknaboj tie ĉi kurante ĉirkaŭ niaj piedoj postulis monerojn, neniaj levantanoj (homoj el Levanto, la bordo de l' Egea maro) trumpetis en niajn orelojn siajn senmezure eminentajn ecojn kiel gvidantoj kaj—la plej bona el ĉio—neniaj skabiaj hundoj kuŝis fermante por ni la vojon sur la strato.

Ĉe la frapado de Nehad Bej respondis apud la pordo de Aĥmed ia platnaza, fulgenigra individuo, kiu, ŝajne, venis rekte el la Geheno, sed en vero kredeble nur estis el la plej suda Sudana provinco de l' Egipta hedivo.

Grimacante saluton de bonvenado, tiel ke la buŝanguloj malaperis en necerta malproksimo apud la regionoj de l' oreloj, li faris ĝentilegan orientan kliniĝon antaŭ mia altekreska turka amiko kaj, post mallonga rigardado de mia malsignifa persono kaj mia blanka sveda ĉapelo de studento, li rapideme forkuris por anonci al sia

sinjoro, la potenca Ahmed Paŝa, la fidelulo de l' sultano kaj eminenta ano de l' Grand-Sinjora kortego.

Dume alia servantulo min kondukis en la domon tra kelkaj koridoroj kaj super unu larĝa tapiŝa ŝtuparo, ĝis ni fine alvenis en la ĉambron de vizito.

Por mi, kiu pensis trovi ĉambron de turka modelo, kun longaj, malaltaj kaj molaj kanapoj laŭlonge la muroj, kun floraj ŝtofoj kaj multkoloraj teksaĵoj ĉie pendigitaj—kie konvenas kaj kie ne konvenas—, kun argilaj potoj kaj stanaj vazoj de stranga formo en vicoj sur la bretoj de muro, kaj plu en la sama stilo—por mi la vizita ĉambro de Ahmed ŝajnis tute surprizanta. Kelkaj invitantaj malgrandaj kanapoj, tie kaj ie tabureto, granda tablo plena da modernaj ilustritaj verkoj, kelkaj stafioj kun pretaj aŭ ankoraŭ ne pretigitaj pentraĵoj, kaj la muroj kovritaj—ne per multkoloraj ŝtofoj el Persujo kaj Kaŝmir', sed per tute eŭropaj desegnaĵoj, gravuroj kaj fotografaĵoj kune kun ia pentraĵo. Inter la multaj portretoj de anoj de eŭropaj princdomoj aparte unu okupis mian atenton; estis de Oskar 1:a, nia reĝo, en uniformo de admiralo kaj ornamita kun la nomo, skribita, ŝajne, per la mano de l' reĝo mem.

Mia amiko Nehad—sed mi do forgesis prezenti lin al miaj legantoj! Li estas leŭtenanto ĉe la draguna regimento ĉevala de Lia moŝto Grand-Sinjora kaj cetere neordinare impozanta kaj bela viro. Lia kresko alta kaj gracia portas bele formitan kapon kun trajtoj, kiam li silentas, ŝajne fanditaj el bronzo, sed kiam li parolas—en franca kaj en tute bonega eminenta franca lingvo—ili viviĝas per la ŝanĝantaj dispozicioj de sentoj, kiuj, kontraŭ la turka kutimo, ŝajne regas mian amikon. Cetere estas la fundamento inter ili ia nesuperiĝebla kaj preskaŭ ne tro alte taksebla amindeco kaj amikeco, kiun malŝpare elverŝas ĝia posedanto sur la nemeritanta fremdulo el malproksima Nordo.

Sed dum mi staras okupite rigardante la akceptan salonon de Ahmed Paŝa kaj la militistan kreskon kaj vire belan vizaĝon de mia akompananto, tiam subite malfermiĝas la pordo kaj eniras la mastro mem, Ahmed Paŝa, la granda kortegulo kaj artisto. Malalta kaj ronda li estas kaj ŝajnas pli bumora ol precipe impozanta kun tiu malgranda "stomakego", la nigraj, ludantaj okuletoj, kiuj tre similas al sekvinberetoj en tritikbulko, kaj la buŝo, sur kiu ludas humoristika rideto.

Al Nehad Bej, kiu en sia elkora ĝentileco kaj en la sento de l' alta rango de sia estro, ne tute bone scias, kiel profunde li kliniĝos aŭ ĉu sur la piedoj li riskos stari,—al li Ahmed salutas ĝuste *à la turque*, t. e. kun la du manoj levigitaj ĝis la tempioj kaj la manplatoj etenditaj unu kontraŭ la alia. Mi do kontraŭe ricevas post la prezentado koran tute "okcidentmondan" manpremadon kaj post mallonge mi kun la mastro estas en viva interparolado pri mia patrolando, kiun li tute ne konas, kaj ĝia reĝo, kiun li kontraŭe vidis kaj trovis "ĉarmanta".

Sed baldaŭ Ahmed Paŝa transiras al aliaj aferoj, ĉar li nur duone estas diplomato kaj monda homo, kaj plej proksime al lia koro sendube kuŝas lia arto. Kaj simile al ĉiuj "diletantoj" li tre volonte montras siajn laboraĵojn kaj aŭskultas la opiniojn pri ili. Ankaŭ mi nun devis diri mian opinion pri liaj pentraĵoj, kvankam li ne povis scii, ĉu mi komprenis liajn pejzaĝojn kaj "stilleben'ojn" pli bone ol ia bovino. Unu post l' alia estis eltirita el la granda amaso da pentraĵoj, kiuj kovris la stafiojn kaj starigilojn kaj staris en amasoj apud la muroj; jen pejzaĝoj el Malgranda Azio, kun freŝa kaj superfluanta kreskaĵaro, jen el la senarbaj montetoj apud Bosporo, jen estis plenviva strata sceno el Stambul, jen ree ia frukto-, besto aŭ floropentraĵo.

Li estis tre multflanka en sia pentrado, la bona paŝa', sed parolis tre humile pri sia talento, kio tamen ne malhelpis, ke liaj okuletoj lumiĝis per kontenteco, kiam mi elparolis mian ravon je liaj vere tre prosperintaj floropentraĵoj. Li ne laciĝis, priskribante, kie, kaj ĉe kiuj kondiĉoj ĉiu aparta pentraĵo estis farita, kaj rakontis laste, ke la laborajo, kiu nun lin okupis, estos donaco al lia Ottomana majesto.

Kaj nun la kafo estis enportita, la kafo, kiun oni senkondiĉe trinkas en ĉia vizito ĉe unu osmanli. Estis la ordinara turka malbonaĵo, kuirita tute dika kaj kun sukero, ke ĝi similis al ia bruna melaso. Sed krudigita per tio, kion mi antaŭe suferis en tiu speco, mi sengrimace malplenigis mian malgrandan taseton, en grandeco simila al ia ovingeto. Nehad Bej videble kontentege gustumis la dikan dolĉegan trinkaĵon kaj englutis grandegajn kvantojn de la sengusta, fadena kaj pastema turka konfitaĵo, kiu samtempe estis ĉirkaŭportita.

L' aŭdienco estis finita kaj ni leviĝis por adiaŭdiri. Sed tiam sekreteme Ahmed rakontis, ke li posedis ion, kion li devis montri al ni antaŭ ol mi iros. Kaj nun ni sekvis lin malsupren la ŝtuparon kaj poste per kelkaj tute turke aranĝitaj ĉambroj kun tapiŝoj kaj "divanoj" (kanapoj) kaj lignaj kradoj antaŭ la fenestroj, ĝis li fine haltis apud la eniro en sufiĉe malgranda, longeta ĉambro, malalta kaj ne tro bone lumigita. En la fono aperis tuta floraro kun grupoj kaj florbedoj kaj tie-alie iaj belegaj granat- kaj oranĝarboj kun iliaj brilaj fruktoj.

"Mais dites donc, mon général, qu'est ce que vous avez là?"... Kaj mi ekkomencis esprimi mian miron vidi tutan ĝardenon enmigrintan en tiu ĉambro, kiu devus esti tre malbona oranĝerio.— Mi malofte aŭdis pli koran ridon ol tiu, kiu sekvis miajn vortojn. Ahmed Paŝa ridis tiel, ke lia stomaketo saltadis kaj la sekaj vinberetoj tute malaperis en la tritika bulko, kaj Nehad Bej, kiu estis enigita en la sekreto, ridis kvazaŭ laŭ ofico kaj batis siajn genuojn en gajo, dum la malgranda paŝa' deviĝis sidiĝi, por ke li ne perdu la egalpezon.

La gajeco de l' du turkoj sendube estis infektanta, sed ne scianta, je kio ili en vero ridis, mi komence iom ĝenis kaj min tenis serioze, ĝis la malgranda paŝa', kun la larmoj, ruliĝantaj super liaj grasaj vangoj, fine ekkriis: "Sed ĉu vi do ne vidas, ke ĝi nur estas pentraĵo? Estas, ke mi min amuzis dekoraciante la muron tie kun floroj kaj arbetoj kaj arboj—kaj ĉiuj enirantaj tien-ĉi pensas, ke estas malgranda ĉambroĝardeno. Ho ho ho, hi hi hi,"... kaj li denove enfalis en vida paroksismo, en kiu mi nun volonte partoprenis.

Kaj tiam li rakontis al mi—tute ne por fanfaronado sed "nur kvankam"—ke unu fojo li prosperis pentri sur blanka muro en la ĝardeno de l' sultano unu floran bedon tiel naturan—**parole d'honneur, monsieur**, nenia fanfaronado, nur la vero—ke Lia Moŝto Grand-Sinjora favore lasis sin trompigi kaj aliris por preni unu floron! Kaj la ĝardenisto poste venis kun sia akvujo kaj superverŝis la pentritan de Ahmed florbedon egale malŝpare kiel la florojn kiujn li mem antaŭe plantadis—faro, kiu kuntiris super la kapon de l' ĝardenisto la Grand-Sinjoran malfavoron, kiu tamen estis reprenita, kiam Ahmed Paŝa remetis la florojn en ilia unua brila ordo.

"Sed Vi do estas alia Apelles, mia generalo, kaj kompare vin, estis Zeuxis kaj Panhasios nenio alia ol simplaj nudaj maltaŭguloj!"—Mia komplimento estis akceptita kun favora rideto,—ankoraŭ unu manpremo kaj post kelkaj minutoj estis mia vizito ĉe Ahmed Paŝa, la granda kortegulo kaj artisto—nur unu rememoro.

Valdemar Langlet.



KIU SCIAS.

ANATOLE FRANCE.

EL "SENNACIULO"

La homa speco ne kapablas senfinan progreson. Estis necese, por ke ĝi kresku, ke la terglobo estu en iaj fizik- kaj kemiaj kondiĉoj, kiuj ne estas konstantaj. Estis tempo, kiam nia planedo ne taŭgis por la homo: ĝi estis tro varma kaj tro malseka. Venos tempo kiam ĝi ne plu taŭgos por la homo: ĝi estos tro malvarma kaj tro seka. Kiam la suno estingiĝos, kio ne povas ne okazi, la homoj estos jam de longe malaperintaj. La lastaj estos tiom senigitaj kaj stultaj kiom estis la unuaj. Ili estos forgesintaj ĉiujn artojn kaj ĉiujn sciencojn. Ili sterniĝos mizere en kavernoj, ĉe la bordo de glaĉimontoj, kiuj rulos tiam siajn travideblajn blokojn sur la foriĝintaj ruinaĵoj de la urboj, kie nun oni pensas, oni amas, oni suferas, oni esperas. Ĉiuj ulmoj, ĉiuj tilioj estos mortigitaj pro malvarmo; kaj nur la abioj regos sur glacia tero. Tiuj lastaj homoj, senesperaj, eĉ tion ne sciante, konos nenion pri ni, nenion pri nia genio, nenion pri nia amo, kaj tamen ili estos niaj nove naskitaj infanoj kaj la sango el nia sango. Restaĵo el reĝa inteligenteco, hezitanta en ilia malsubtiliĝinta cerbo, konservos ankoraŭ al ili dum kelke da tempo, la imperion sur la ursoj multiĝintaj ĉirkaŭ iliaj kavernoj. Popoloj kaj triboj estos malaperintaj sub la neĝoj kaj glaciaĵoj, kun la urboj, la vojoj, la ĝardenoj de la malnova mondo. Apenaŭ kelkaj familioj daŭrigos la ekzistadon. Virinoj, infanoj, maljunuloj intermiksite malvigliĝintaj vidos tra la fendoj de siaj kavernoj malgaje supreniri super siaj kapoj malhelan sunon sur kiu, kvazaŭ sur estingiĝanta brulaĵo, kuros flavbrunaj lumetoj, dum duonblindiganta neĝo el steloj daŭrigos brili la tutan tagon en la malluma ĉielo, tra la frostega aero. Jen tio, kion ili vidos; sed pro ilia stulteco, ili eĉ ne scios, ke ili vidas ion. Iam, la lasta el ili elspiros sen malamo kaj sen amo en la malamika ĉielo la lastan elspiron homan. Kaj la terglobo daŭrigos ruliĝi, kunportanta tra senbruaj spacegoj la cindrojn de la homaro, la poemojn de Homero kaj la plej noblajn rompitaĵojn el la grekaj marmorskulptaĵoj, alligitajn ĉe siaj glaciaj flankoj. Kaj nenia penso ne plu ekĵetos al la senlimo, el la sino de tiu globo kie la animo tiel ŝenlime kuraĝis, almenaŭ neniu penso de homo. Ĉar kiu povas diri, ĉu tiam alia penso ne konsciiĝos pri si mem kaj ĉu tiu tombo, kie ĉiuj ni dormos ne estos la naskiĝloko de nova animo? De kia animo, mi ne scias. De la animo de la insekto, eble.

Apud la homo, malgraŭ la homo, la insektoj, la abeloj, ekzemple, kaj la formikoj jam faris mirindaĵojn. Estas vere, ke la abeloj bezonas, kiel ni, lumon kaj varmon. Sed estas senvertebruloj malpli frostotimemaj. Kiu konas la estonton rezervita al ilia laboro kaj al ilia pacienco?

Kiu scias, ĉu la terglobo ne iĝos taŭga por ili, kiam ĝi ne plu estos tia por ni? Kiu scias ĉu iam ili ne konsciiĝos pri si mem kaj pri la mondo? Kiu scias, ĉu iliavice ili ne laŭdos Dion?

El "La ĝardeno de Epikuro," trad. E. L.



Nova hipotezo pri deveno de Aŭstralio.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Aŭstralia kontinento tiel distingiĝas inter ĉiuj ceteraj kontinentoj de l' tera globo kaj prezentas tiajn rimarkindajn anomaliojn, ke ĝia deveno ŝajnis ĉiam enigma. Antaŭ ĉio turnas atenton en Aŭstralio plena foresto de efikantaj aŭ estingiĝintaj vulkanoj kaj eĉ de ĉiuj postsignoj aŭ aludoj pri vulkana efikado, malgraŭ tio, ke Aŭstralio troviĝas en la centro mem de seninterrompa vulkana duonringo, kiu ĉirkaŭas ĝin en tre proksima spaco kaj kiu finiĝas en Nova Zelandio. Tiu ĉi fakto estas tiom pli neklarigebla, ke subtero de Aŭstralio konsistas nome el tiaj ŝtonaj specoj, en kiuj ĉiam oni observas postsignojn de vulkanaj influoj. Sur la tuta tera globo nenie estas tia granda placo, konsistanta el primitivaj specoj aŭ formacioj, en kiuj oni observas ion similan al tio, kion oni observas en Aŭstralio, t. e. plena foresto de ĉiaj postsignoj de vulkanaj aperoj, kiel en nuna, tiel ankaŭ en estinta tempo. Krom tiuj ĉi anomalioj en Aŭstralio ekzistas ankoraŭ multaj strangaj apartecoj, distingantaj ĝin de ceteraj kontinentoj de l' tera globo. Tiajn samajn apartecojn prezentas ankaŭ aŭstraliaj montoj. Kontraŭe al aliaj kontinentoj en Aŭstralio ekzistas nur escepte apartaj altaĵoj, tute izolitaj kaj ne kunligitaj inter si. Solan escepton prezentas la monta ĉeno, kiu sin tiras laŭlonge de orienta kaj parte de sud-orienta bordo. Sed formiĝo de tiu ĉi ĉeno povas esti klarigita per tio, ke interspacoj inter apartaj altaĵoj estis ekplenigitaj per produktoj de rapida disfalo de ŝtonaj masoj, danke al la proksimeco de l' oceano, akcelanta pli rapidan detruadon de l' ŝtonaj specoj. Tian anomalion prezentas en Aŭstralio ankaŭ la foresto de grandaj riveraj sistemoj; tie estas nur malgrandaj riveretoj, ofte sekiĝantaj kaj fluantaj laŭ iaj fosaĵoj. Dum sur ĉiuj aliaj kontinentoj ekzistas vastaj valoj kaj ebenaĵoj kaj

grandaj riveraj sistemoj, liverantaj al la tera suprajo pli aŭ malpli senĉesan irigacion. En Aŭstralio videble tute ne ekzistas subteraj fontoj en internaj partoj de kontinento, kaj irigacio de tero estas tre neregula. Nur en certa tempo de jaro, post la periodo de pluvoj disvolviĝas kreskaĵaro, dank' al granda malsekaĵo; en alia tempo la internaj partoj de kontinento prezentas sekan, ŝtonan kaj senfruktan dezerton. Rimarkinda ankaŭ estas tio, ke la suprajo de aŭstralia kontinento estas elsulkigita en ĉiuj direktoj per multenombraj fendoj, kies deveno estas nekomprenebla, ĉar oni ne povas alskribi ilin al la efiko de vulkanaj fortoj. Ĉiuj tiuj ĉi anomalioj, renkontiĝantaj sur la aŭstralia kontinento, tre enigmaj kaj nekompreneblaj, fariĝas facile klarigeblaj, se nur akcepti hipotezon pri meteora deveno de Aŭstralio. Tiu ĉi hipotezo en unua fojo estis eldirita de franca instruitulo Djufren kaj alplenigita de Frohmann en lia nova laboro "les merveilles de la flore primitive", antaŭ nelonge elirinta en la mondon. Kvankam tiu ĉi hipotezo pri "netera" deveno ŝajnas mirinda kaj kuraĝa, tamen oni devas konfesi, ke ĝi havas nenion nekredeblan aŭ neeblan, aparte ĉe tiuj faktaj pruvoj, kiujn alkondukas la instruituloj por pravigi sian teorion. Antaŭ ĉio ili montras tion, ke laŭ la teorio de formiĝo de l' planeda sistemo la tera akso devus esti vertikala al la ebenaĵo de ekliptiko, dume ĝi staras ne rekte sed klinite al la ebenaĵo de l' tero ĉirkaŭ la suno, kontraŭ al ĉiuj teoriaj meditadoj kaj leĝoj de mehaniko. La historio de tiu kreskaĵaro sur la tera globo, dank' al kiu formiĝis la kuŝantaj en la interno de l' tero ŝtonkarbaj tavoloj, donas kelkajn montrojn, konstatantajn hipotezon pri antaŭa vertikaleco de l' tera akso. Tiuj ĉi ŝtonkarbaj tavoloj estas dismetitaj laŭ la tero tre neegalmezure: en ekvatora kaj en tropikaj regionoj tiuj ĉi tavoloj renkontiĝas malofte kaj estas tre maldikaj, dum en mezaj kaj polaraj landoj ili troviĝas en superfluo kaj distingiĝas per dikeco kaj vastigiteco. Krom tio ne estas dubebla la fakto, ke la ŝtonkarbaj tavoloj en nordaj kaj polusaj termezuroj devenis multe pli frue, ol en plej proksimaj al la ekvatoro termezuroj, kaj tio ĉi klare montras, ke la kreskaĵa vivo sur la tero disvolviĝas komence ĉe la polusoj, kaj post tio jam de tie disvastiĝas al la ekvatoro. Riĉeco de ŝtonkarbaj tavoloj en nordo atestas pri neĉirkaŭpreneblaj kvantoj da surtavoliĝintaj tie kreskaĵaj restoj kaj pruvas, ke polara floro en la ŝtonkarba periodo per sia riĉeco malproksime superis eĉ la nuntempan tropikan floron. Kompreneble, por tio, ke povu disvolviĝi tia kreskaĵaro, estis necesaj lumo kaj varmo, kaj tial oni devas volene-vole supozi, ke en la polusaj landoj en tiu ĉi periodo ekzistis favoraj kondiĉoj por disvolviĝo kaj kresko de kreskaĵoj; tiuj ĉi samaj kondiĉoj estas neeblaj ĉe ekzistanta nun kliniĝo de l' tera akso kaj oni devas supozi, ke tiam tiu ĉi kliniĝo ne ekzistis, la akso de l' tera turniĝo staris rekte, kaj sur la tuta tero de l' polusoj ĝis la ekvatoro estis nur unu seninterrompa kaj neŝanĝebla tempo de jaro, kaj la tagoj estis egalaj al la noktoj. Kial devenis tiu ĉi kliniĝo, elvokinta subitajn ŝanĝojn de klimato sur la tero? Suprenomitaj instruituloj proponas la sekvantan hipotezon por klarigi tiun ĉi aperon: la kliniĝo de l' tera akso devenis sub influo de ekstera forto, kiu subite elbatis la teran globon el ĝia komenca situacio. Tia "ekstera" forto povis esti grandega meteora maso, falinta sur la teron el la profundaĵoj de l' ĉiela spaco, kiu per sia falo neniigis la antaŭan egalpezon de nia planedo. Falado de kosmaj korpoj prezentas sufiĉe oftan kaj ordinaran aperon sur la tera globo. Laŭ la alproksimitaj elkalkuloj sur la teron falas en dudek kvar horoj kelkaj centoj da miloj da meteoroj. Plej ofte tiuj ĉi meteoroj estas malgrandaj laŭ sia amplekso, tamen iafoje renkontiĝas inter ili grandegaj. Nenio estas nekredebla en tiu supozo, ke en la sferon de l' tera altiro povis veni tre granda kosma korpo, kies falo estis la kaŭzo de ŝanĝoj sur la tera globo. Tiu ĉi grandega laŭ sia grandeco kaj pezo meteoro estas Aŭstralio.

Djufren supozas, ke sur tiu loko, kie troviĝas Aŭstralio, devis ekzisti antaŭe ia granda vulkana centro, kiu estis poste kovrita kaj neniigita per la falinta tien ĉi asteroido. Frohmann montras krom tio ankaŭ tion, ke la tera akso estas deklinita je 23° 28', kaj la centro de l' Aŭstralio kontinento ĝuste ankaŭ troviĝas sub 23:a grado de l' suda termezuro. Konsisto el ŝtonaj specoj, kiuj formas fundon de Aŭstralio, nenion diras kontraŭ la hipotezo pri ĝia meteora deveno. Se oni akceptas tiun ĉi hipotezon, ĉiuj anomalioj, kiujn prezentas la Aŭstralia kontinento, fariĝas klarigeblaj kaj perdas sian enigmecon. Kompreneble, nenia imago povas prezenti al si la pentraĵon de tiu terura tremado, kiun devis elprovi la tero en la momento de falo de tia asteroido. La katastrofo devis esti laŭvere terura, en plena senco de tiu ĉi vorto, ĉar terura ĉion ekstermanta uragano devis traflugi laŭ la tuta suprajo de l' tero, kaj oceanaj ondoj de gigantaj mezuroj devis leviĝi kaj superakvigi la teron de l' suda duonglobo. Ĉe tio ĉi, kompreneble, devis formiĝi grandega maso da akvaj vaporoj, ĉar la falado fariĝis en oceanon, kaj tiuj ĉi vaporoj falis post tio sur teron en formo de pluvaj fluoj. Kiel postsigno de tiu ĉi katastrofo aperis kliniĝo de l' tera akso kaj la elvokitaj per tio ĉi ŝanĝoj de klimato sur la tera globo; ĉe l' polusoj aperis eternaj glacioj. Per tia maniero la nova hipotezo pri la deveno de Aŭstralio ne sole ne kontraŭparolas al faktoj, konfirmitaj per la scienco, sed eĉ klarigas multajn aperojn de l' pasinta kaj nuna vivo de l' tero, kiuj sen tiu ĉi hipotezo ŝajnas al ni enigmaj kaj ne kompreneblaj.

Tradukis **Al. Semenov.**



LA HIGIENAJ ORDONOJ KONSISTIGAS PER SI MEM TUTAN MORALON

EL "SENNACIULO"

Oni ne povas kontraŭdiri, ke la moralo, en tiu ĉi momento, trapasas krizon. Se la religiaj moraloj sufiĉas al la homoj, kiujn instigas sincera kredo, la liberpensuloj, kies nombro estas kreskanta, deziras, ke la moralo havu pozitivan bazon, racian, kiu ŝirmus ĝiajn ordonojn kontraŭ la dubo kaj la diskuto.

Aliparte, ĉar la religiaj moraloj ne plu estas instruataj en la lernejoj, la bezono urĝe prezentiĝas, en la demokratioj, kiuj aspiras la laikecon, anstataŭigi tiun ĉi instruadon per tiu de civila moralo.

Nenia socio povos vivi sen moralo.

Sed kio povus vere esti civila moralo, en niaj socioj, kiujn superregas kaj orientas la scienco, krom scienca moralo, kiu bazigas ne sur principoj per aŭtoritato truditaj, sed sur veroj elmontritaj per la observado kaj per la sperto?

Nu, aperas, ke la natursciencoj, la medicinaj sciencoj, la fiziologio inter ĉiuj, formas kun ĉiu paŝo, kiel praktikajn konkludojn, leĝojn, kiujn ili malkovras, principojn, kiuj estas precize kondutreguloj prezentindaj al la civilizita homo, en liaj rilatoj kun siaspeculoj.

Oni trovas tiel en la sciencoj tiujn ĉi solidajn bazojn, kiujn la malnovaj moraloj kredis trovi en la dogmoj.

Aliparte estas vero apenaŭ kontraŭdirebla, kaj treege rekuraĝiga de la egaleca vidpunkto, ke la sano estas la plej granda el la bonoj. Nek la potenco, nek la riĉoj, povus havigi saman senton de bonstato, ni diru saman feliĉon, kian havigas la sano.

Ĉu la sano ne kunliveras ankaŭ, kun tiu ĉi sentaĵo de l' feliĉo vivi, la plej grandan laborkapablon kaj produktkapablon? Kaj ĉu la fizika sano ne estas krome la kondiĉo por tiu ĉi morala sano, kiu malkonas ĉiujn degenerojn, ĉiujn psikajn difektojn, tieldire ĉiujn malvirtojn, ĉiujn malsanecajn impulsojn, komence de la simpla malkontento pri sia sorto ĝis la krimo?

Ĉar, ĉe la homo, la fiziko kaj la psiko estas intime ligitaj. Ili funkcias en malvasta dependeco unu de l' alia.

Neniaokaze, do, ĉe l' normala estaĵo, la korpo kaj la spirito povos, malgraŭ kelkaj ŝajnaj aspektoj, esti en reala opozicio.

La dieto, kiu konvenas al unu, devas konveni ankaŭ al la alia. La higieno de l' korpo devas esti ankaŭ la higieno de l' spirito.

Kaj en tiu ĉi senco moralo bazita sur la higieno devas esti rigardata, kiel moralo kompleta kaj perfekta, entenanta ĉiujn devojn de l' homo kontraŭ si mem kaj kontraŭ siaj samspeculoj.

Efektive ĝuste en la demandoj pri l' publika higieno precipe sentiĝas kun akuto la morala respondeco. Oni prenu, por konvinkiĝi, la banalan kazon de forkaŝo de infektmalsano, de kie povos rezulti epidemio, kiu postulos eble milojn da viktimoj.

Ĉu ekzistas pli bona ekzemplo prezentebla, por komprenigi, ke la plej bona rimedo labori por sia bonfarto estas krome labori por la bonfarto de l' aliaj? Ĉar tiel, anstataŭ esti sola por labori por si, okazas, ke ĉiuj laboras por ĉiu. Tiel la higieno ne devas esti konsiderata sole kiel la moralo de l' korpo.

Ampleksante ĉiujn kondutregulojn, kiuj povas modifi la vivpovon, tio volas diri, la valoron de l' najbaro, la higieno fakte estas la tuta moralo.

La fiziologio instruas al ni, ke la korpo estas maŝino, kiu povas esti tenata en bona stato, kiel okazas pri ĉiuj maŝinoj, nur per la laboro. Kaj la higieno, per siaj reguloj rilataj al la vivo de l' individuo kaj la vivo de l' kolektivoj, instruas al ni, kiele ni povos certigi al la homa maŝino sian plej bonan produktoforton kaj sian plej longan daŭron. Ĝi diras al ni plie, kiel ankaŭ estas eble al gepatroj naskigi infanojn, kiuj estos siavice rezistemaj kaj produktemaj maŝinoj.

Siaflanke, montrante al ni, kiel la individuo estas la produkto de sia medio, la scienco indikas la punktojn, kien devos trafi la klopodoj de l' leĝdonantoj, se ili volas realigi la kondiĉojn de l' bona intelekta kulturo, kiu dependas tiom, se ne pli, de la naturo de l' tereno, kiom de la kvalito de l' semo.

Entute, la higieno ordonas al la homo zorgi pri sia sano kaj pri tiu de la siaspeculoj. Ĝi ordonas al li labori, kaj indikas la plej bonajn laborkondiĉojn. Ĝi montras al li la vantecon kaj la danĝeron de l' plezuroj, en kiuj la homoj serĉas senutile la feliĉon, en trompe loga celado, kiu foruzas ilin. Ĝi prezentas al li la sanon kiel la solan realan feliĉon.

Kaj precipe ĝi pruvas al li, ke en tiu ĉi lukto pro la sano, ĉiu suferas pro la eraroj de ĉiu, kaj ke tiel intima solidareco unuigas kaj kunigas ĉiujn membrojn de kolektivo.

De tie sekvas serio da devoj de l' individuo kontraŭ si mem kaj kontraŭ la aliaj, tuta serio da ordonoj signitaj per karaktero de nepreco, tute same rigoraj en sia formo kiel tiuj de l' religiaj moraloj. Ilia sankcio estas proksima, rekta, tuŝebla, neevitebla kaj ne elaĉetebla per ia ajn kompromiso.

En higieno ĉiu eraro pagiĝas, kaj ĉiu krimo spertas sian puniĝon, same fatale kiel aplikiĝas la pezoforto. Kaj tia estas vere la karaktero de naturdoktrino ĝuste morala, kiu devas eviti ĉian marĉandon, ĉian senfortiĝon de l' konscienco! Kaj ĝuste per tiu ĉi karaktero ĉi tiu moralo de l' estonto montriĝos supera al la religiaj moraloj.

Doktoro Henkur (Hericourt) Trad. el la franca N B.



PRI KAŬZECO.

EL "SENNACIULO"

Jam de antikva tempo la Budhismo konceptis, ke en la universo regas la leĝo de kaŭzeco, t. e. la principo de karma. Nune ankaŭ ni sciencistoj kredas, ke ĉio sin trovas inter la ĉeneroj de kaŭzo kaj rezulto.

La "karma" ne science solvas la rilaton. Ĝisnuna scienco ankaŭ ne sufiĉe klarigas ĝin. Antaŭ kelkaj jaroj PAVLOV el Leningrad instruis al ni la fenomenon de kondiĉita reflekso. Mi volas pligrandigi tiun ĉi ideon kaj klarigi ĉiun rilaton, kiun fiziko kaj ĥemio ne povas solvi.

Laŭ mia opinio, oni povas dividi kaŭzecon en du specojn: la leĝon de kaŭzeco konstanta kaj tiun de hazarda. La leĝo de kaŭzeco konstanta estas absoluta, ne ŝanĝebla, la sama kaŭzo venigas ĉiam la saman rezulton. Ekz. sub la aerpremo de 760 mm, la akvo boliĝas ce 100° C. kaj glaciiĝas ce 0° C. La fluidiĝa punkto de ĉiuj elementoj kaj ĥemiaj produktoj estas ankaŭ ĉiam speciala. La movado de planedoj, la interreakcio de ĥemiaĵoj, la kaŭza rilato de meteorologiaj fenomenoj ktp. ktp. estas konstantaj, matematike mezureblaj. Kontraŭe la leĝo de kaŭzeco hazarda estas ŝanĝebla laŭvole, ne matematike mezurebla. La sama kaŭzo venigas ne ĉiam la saman rezulton kaj la sama rezulto ne devenas de la sama kaŭzo. Ekz. vidante la saman floron, la unua ĝojus, la dua malĝojus kaj

la tria koleriĝus. Unu timas serpenton, sed ne araneon, la dua araneon, sed ne serpenton, kaj la tria nek serpenton nek araneon, sed ranon. Tia kaŭzeco estas tute alia ol la konstanta. Ĝi estis iam kondiĉita kaj fiksita. Ni ĉiuj havas emocion, sed la kondiĉo de ĝia apero tute malsimilas laŭ persono.

La vorto estas ankaŭ la produkto de la hazarda kaŭzeco. Ekz. kiam ni vidas la paperon, ni ĉiam aŭdas la sonon de papero. La vidimpreso estas tute sama al ĉiuj landanoj, sed la aŭdimpresoj de la aĵo estas ne samaj laŭ rasoj, regnoj aŭ landoj. La interrilato inter vid- kaj aŭdimpresoj estas nur hazarda, sed delonge fiksita.

La penso estas aro da vortoj, kaj la aranĝmaniero de vortoj, t. e. la pensmaniero estas ankaŭ hazarde kondiĉita kaj fiksita. Unuvorte la intelekto estas rezulto de la hazarde kondiĉita kaŭzrilato ĉe la impresoj de niaj sentorganoj. Tial ni nur miras aŭ opinias stranga la okazintaĵon ne denaske alkutimigitan, dum ni opinias tute prava la fenomenon science ne klarigeblan, sed denaske alkutimigitan.

Do, oni devas esti sincera por krei novajn vortojn, kiuj ofte kondukas popolon al erarideo.

Nia personeco kaj karaktero estas plene fiksitaj de la funkcio de nelaŭvola nervsistemo, kiu emas reagi ĉiam kun tia sama tipo al iu speciala impreso aŭ koncepto, kia ĝi estis iam kondiĉita.

La vivaĵoj evoluadas tiel heredinte iom post iom la emon akiritan, kiun ĉiu raso konstatis taŭga por sia cirkonstanco dum la ĉeno de generacioj. La diverseco de maniero dependas de la instigo de cirkonstanco, klimato, kunvivaĵo ktp., precipe de la kaŭzeco, konstanta. Sed la malsimileco de la instinkto laŭrasa dependas de la hazarda kaŭzeco. Iuj praavoj de hirundoj estis devigitaj transflugi oceanon, kaj la emo fariĝis instinkto. Ŝafoj, kiuj estis devigataj vivi en la herbejo, akiris apetiton je herboj. Kameloj, kiuj estis devigataj vivi en la dezerto seka, povas konservi akvon en siaj stomakoj. Tiele la instinkto apetito estis tute hazarde kondiĉita.

La seksa instinkto estas ankaŭ pli malpli hazarde kondiĉita. Iuj incitiĝas pro speciala odoro, aliaj pro la vido kaj la triaj pro aŭdo. Ni homoj povas kontroli la seksan instinkton per la intelekto aŭ rezono, al ni la instinkto ne estas la absoluta ordono; ĝi dependas de la kaŭzeco hazarda kaj fiksita.

Ni povas laŭvole ŝanĝi la rilaton, por ke ĝi plej bone adaptiĝu al la socia stato. Ĉio estas sub la regado de la leĝo de kaŭzecoj konstanta kaj hazarda. Ni devas juĝi, ĉu la aĵo antaŭ ni aperanta koncernas — al kiu el la du leĝoj, kaj sintenadi tiel, kiel la leĝo ordonas nin.

Edukado de infanoj, socia idefluo kaj moralo rilatas al hazarda kondiĉo aŭ cirkonstanco. Plibonigu la kondiĉon kiel eble plej, do la socio homara pli altiĝus.

Hazime Asada, El "Revuo Kultura".



Eltiro el privata letero de D-ro Zamenhof al S-ro B.,

presita kun permeso de ambaŭ korespondantoj

Tradukis el lingvo rusa V. G.

EL "LINGVO INTERNACIA"

. . . Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta **publika** historio de la lingvo, t. e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al Vi pli-malpli konata; cetere tiun ĉi periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al Vi tial en komunaj trajtoj sole la historion de la **naskiĝo** de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al Vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis: la ideo, al kies efektivigo mi dediĉis tutan mian vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis; mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al Vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj k. t. p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi "doloro pro la mondo" ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la "grandaĝaj" posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklinados la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas

neebla, kaj mi komencis malklare revi pri nova, arta lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k. t. p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: "for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj",—kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi la lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank' al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonajn formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo "Ŝvejcarskaja", kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo "Konditorskaja". Tiu ĉi "skaja" ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

"La problemo estas solvita!"—diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikis nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure **radikaj** (ekz. "patrino", "mallarĝa", "tranĉilo" k. t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn **formitajn** kaj malaperi el la vortaro. La meĥaniko de la lingvo estas antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Tie ĉi mi diros ĝustatempe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj elĵetadis ĉion senbezonan el la gramatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj kaj, konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur konsentos, ke ĝi esprimas la donitan ideon, mi simple elpensadis vortojn, penante, ke ili estu kiel eble plí mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 11-litera "interparoli" ni tute bone povas esprimi la saman ideon per ia ekz. 2-litera "pa". Tial mi simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj, sed facile elparoleblaj kunigoj de literoj kaj al ĉiu el ili mi donis la signifon de difinita vorto (ekz. **a, ab, ac, ad,... ba, ca, da,... e, eb, ec,... be, ce, ... aba, aca,...** k. t. p.) Sed tiun ĉi penson mi tuj forĵetis, ĉar la provoj kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj jam vortoj internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia,—kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama "lingwe uniwersala" kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la sanktigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

"Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá."

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: "Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas.")

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri "nova lingvo" kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5½ jaroj de mia estado en universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo—la jaroj de studento—pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo, sopiris kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj ("Mia penso") mi metis poste en la unuan eldonitan de mi broŝuron; sed al la legantoj, kiuj ne sciis,

ĉe kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis, kompreneble, stranga kaj nekomprenebla.

Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon,—kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio "je", la elasta verbo "meti", la neŭtrala, sed difinita finiĝo "aŭ" k. t. p. kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forĵeti kelkajn nebezonajn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas al la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; la praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan "ion", la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan **"spiriton"**. (La nesciado de la spirito de la lingvo estas la kaŭzo, kial kelkaj esperantistoj, tre malmulte legintaj en la lingvo Esperanto, skribas senerare, sed en multepeza, malagrabla stilo,—dume la esperantistoj pli spertaj skribas en la stilo bona kaj tute **egala**, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo multe, kvankam iom post iom kaj nerimarkite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne renkontus en la lingvo tute difinitan **fundamentan** spiriton, ĉiu komencus tiri en sian flankon kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre longa tempo, malgracia kaj senviva kolekto da vortoj.)—Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte pensi en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: "Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam **la tuta mondo** ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo". Sed ĉar la "mondo" ne estas ebla sen antaŭaj apartaj "unuoj", la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam prosperos fari ĝian utilon por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu, kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon,—alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia "ŝlosilo", kiu, enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabete ordigitaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro ("D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro") kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine—rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je "flankaj aferoj"; mi sentis, ke mi metas sur la karton la tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj... mi transiris Rubikonon.

Lazaro Ludoviko Zamenhof.



REGULECO KAJ UNUFORMECO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

En la Marta numero, finante la artikolon "El Francujo", mi diris: "Ni ne devas forgesi, ke lingvo internacia ne estas precipe farita por la instruituloj aŭ scienculoj, kiuj ĝin apenaŭ bezonas; ĝi estas unue kaj speciale farita por la meze instruitaj homoj. Sed tiuj ĉi ne povas diveni multe da vortoj, tre facile komprenataj de klerulo. La vortaro estas do por ili sola rimedo de kompreno. Sed, se ni uzos formojn aŭ vortojn eksterajn, kiujn oni ne trovas en niaj libroj, per kia maniero ni volas, ke ili komprenu?"

Amikoj, havu la bonecon pardoni al mi tiun ĉi ripeton, sed ĝi estas necesa enkonduko al tio, kion mi tuj diros.

Por tute klarigi la pensojn esprimitajn supre, ni prenu praktikajn ekzemplojn. Samtempe ni vidos, ĉu oni estas prava kredante pli bonan la formon aŭ vorton personan, per kiu oni dekliniĝas de Esperanta stilo absolute regula.

"Ed" estas pli internacia ol "kaj", pretendos iu. Mi ne trovas. Efektive, "kaj" estas uzata en **unu** lingvo regule; "ed" estas uzata en unu alia escepte. Sed vi diros, ke "ed" rememorigas la latinan kaj francan "et"; mi konsentas por homo scianta unu el tiuj du lingvoj. Sed ĉu Esperanto estos ellernata nur de personoj konantaj la latinan aŭ la

francan lingvon? Kiel do faros la aliaj? Ili serĉos vian "ed" en la vortaro, kaj ne trovante ĝin ili ne komprenos.

Tiel same kiel vi juĝas "ed" pli internacian ol "kaj", mi povas trovi "il", "nos", "vos", "kvande", pli intenciaj ol "li", "ni", "vi", "kiam", kaj mi havas la rajton kredi, ke oni min komprenos, se, unuigante vian "ed" kun miaj pronomoj, mi faros la simplan frazon sekvantan: "Kvande nos koleris vos ĝojis ed kantis kun il". Sed donu ĝin al Anglo, al Germano, al Ruso, sciantaj nur ilian patran lingvon, kaj vi vidos ĉu ili komprenos. Tamen mi uzis elementojn internaciajn. Mi ne finis. En mia frazo iu povus tre bone ŝanĝi "koleris, ĝojis, kantis", per "iraskis, gaŭdis, ĉantis" trovante, ke tiuj vortoj estas preferindaj pro tiu aŭ alia motivo. Sed tiam homo neklera nenion pli komprenos en ĝi, niaj lernolibroj enhavante nenian el ĝiaj vortoj.

Nu, amikoj, kion mi faris en unu frazo, tion ni povos fari nesenteble en la tuta lingvo per almikso kaj anstataŭigo de formoj aŭ vortoj personaj. Ĉu ni deziras atingi rapide la antikvan Babelan konfuzon? Ĉu ni volas, ke nia lingvo disbranĉiĝu en multego da dialektoj aŭ pli ĝuste da ĵargonoj nur kompreneblaj al iliaj aŭtoroj?

Ne, certe ne. Ni do evitu severe ĉiun volan neregulaĵon en nia stilo. Ni oferu por la bono de nia afero ĉiun nacian, lingvistan aŭ personan preferon kaj ni uzu Esperanton tian kiel ĝi estas, eĉ en niaj privataj leteroj. Sed ni ekzamenu iom ankoraŭ la demandon.

Estas pli simple, diros iu, tute forĵeti la akuzativon. Ha!—ni vidu. Kiel vi markos la diferencon inter "li saltas sur la tablo" kaj "li saltas sur la tablon"; inter "ŝi amas min pli ol li" kaj "ŝi amas min pli ol lin?" Vi diros simple "ŝi amas mi pli ol li" en ĉiu okazo, sen ia akuzativo. Sed ĉu vi kredas ke oni tre klare divenos kion vi volis diri? Kaj ankaŭ kiel vi esprimos nekonfuzeble la diferencon inter "Kiun mi vidas?" kaj "Kiu min vidas?"

Por forĵeti la akuzativon kaj resti logika kaj klara, oni devus meti du formojn por kelkaj pronomoj kaj kelkaj prepozicioj. Ni devus do elekti inter du formoj kiel ni elektas inter du kazoj. La plisimpligo ne ŝajnas al mi videbla.

Krom tio, per tia elĵeto ni forprenus el la lingvo mirindan fleksebleecon por la esprimado de l' penso kaj la fidela traduko de multaj tekstoj. Fine vi devus difini regulojn por certaj aranĝoj de vortoj, kaj tiam ni komplikus kaj ne simpligus nian lingvon.

Skribante tion, mi intencas nur turni la atenton de ĉiuj sur la necesecon esti regulaj kaj unuformaj en nia stilo kaj mi ne povas fini pli bone ol per la vortoj mem de nia kara doktoro: "Lingvo estas pure kondiĉa signado de ideoj, kiu povas plenumi sian difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin severe egale,—alie ĝi perdas ĉian sian sencon kaj celon kaj servas ne al reciproka kompreniĝado, sed nur al malkompreniĝado."

L. de Beaufront.

SKIZO DE KLASIGO DE TIUJ, KIUJ SIN DEDIĈAS AL ESPERANTO

Citi ĉi tie detale ĉiujn kaŭzojn, motivojn, kialojn pro kiuj oni sin dediĉas ordinare al Esperanto estas komprenebIe nefacila afero. Pli malfacile ankoraŭ estus enklasigi la Esperantistojn en apartajn kategoriojn laŭ ilia persona merito kaj fervoro. Ni do limigos nin denombri de ili nur la plej oftajn, la plej konatajn tipojn.

Ĉiu persono kiu sin okupas pri Esperanto, havas pri tio sian propran historion. Pro tio oni ofte legas en Esperantistaj ĵurnaloj artikolojn sub la rubriko: „Kial (aŭ kiel) mi fariĝis Esperantisto?" Estus do laŭ ni dezirinde, ke tiaj artikoloj, tiel interesaj kiel instruigaj, pli kaj pli plimultiĝu en la tutmonda Esperantista gazetaro.

1. Unuj sin okupas pri Esperanto nur por nuntempiĝi, ekzakte kiel oni farus por la lasta modo aŭ nova danco. Ili hazarde legis en enlanda ĵurnalo artikolon pri la mondlingvo kaj pensas en si mem, ke estus honte, ke ili nenion sciu pri tia afero se okaze ĝi estus pritraktota en iu de ili vizitata medio. Tiaj personoj formas ordinare nebonan materialon por nia hodiaŭa armeo; ili estas frivolaj por ĉio kiel ankaŭ por Esperanto, sekve estas superflue pli longe paroli pri ili.

2. Aliaj sin okupas pri la mondlingvo pro simpla scivolo. „Kio do povas esti Esperanto?" ili sin diras, „Ni vidu! ĉionkonsiderante ni nenion riskas! se ĝi plaĉas al ni, bone, ni daŭrigas, se ne, ni retiriĝas."

Por tiaj dubantoj, kaj estas multaj, dependas ofte de la lerteco de la iniciatinto, ke ili estu gajnitaj al nia afero. Foje ili estas logataj kiel fiŝoj en naso, el kiu estas malfacile eliri kvankam ĝia elirejo, kiu servis por la eniro restas je la supera parto senĉese malfermegita.

3. Alian kategorion starigas tiuj, kiuj sin dediĉante al la „Dua lingvo per ĉiuj" celas eltiri nur materialan profiton kaj nenion plu, konforme al la konata maksimo: „La celo sanktigas la rimedojn."

Tiaj individuoj plenaj je egoismo evitas ordinare: aliĝi al enlanda Esperanto-Grupo, aboni al Esperantista ĵurnalo kaj ia ajn maniere helpi la disvastigon de nia movado. Ĉiuokaze ili formas sufiĉe grandan kontingenton en nia anaro kvankam ili estas por ni de malgranda valoro.

4. Aliaj sin okupas pri la Lingvo Internacia, ĉar ili ne havis la okazon lerni fremdan lingvon kaj trovas, ke nuntempe oni ne povas vivi nur kun sia gepatra lingvo precipe se tiu ĉi apartenas al malgranda nacio. „Unu aŭ alimaniere", ili pensas, "tia Dua lingvo povus eble utili al ni". Ili do sin dediĉas al ĝi, ne kalkulante tamen la specialan econ, kiun posedas Esperanto alproprigi ofte al si indiferentulojn. Tiel iom post iom la asimilo okazas kaj la novuloj estas firme kaptataj kiel birdoj sur glukaptilo. Tie ili sin sentas bonfarte kaj tute ne volas plu malgluiĝi; ili restas tie por ĉiam! En ĉi tiu kontingento oni ofte trovas bonajn Esperantistojn.

5. Al kvina kategorio oni povus grupigi tiujn, kiuj sin dediĉinte al la ellerno de fremdaj lingvoj, sed malsukcese pro ilia malfacileco, klopodas anstataŭigi ilin almenaŭ per Esperanto, kiu, laŭdire, estas multe pli facila ol la naciaj lingvoj. Do pri lernado de lingvoj, kiel oni scias, post plena ellerno de fremda lingvo, gusto por tria lingvo akcentiĝas. Inter tiuj Esperantistoj oni renkontas kelkfoje bonajn samideanojn.

6. Al sesa kategorio apartenas ĉiuj lernemuloj. Ili jam scipovas fremdajn lingvojn kaj deziras aldoni unu ankoraŭ al iliaj lingvaj konoj, kaj ĉar la plej granda parto de la radikoj estas jam al ili konataj, ili ne renkontas malfacilecon por ellerni ankaŭ Esperanton. Tiuj ĉi fariĝas ordinare tre bonaj Esperantistoj, ĉar pro la antaŭa ellerno de alinaciaj lingvoj jam sin pretigis, tiel diri, por la internacia spirito kaj kiam poste ili sciiĝas la veran celon de Esperanto, la grundo prezentiĝas favora por la kulturado de la Interna ideo de nia afero.

7. Al sepa grupo apartenas la monaviduloj, kaj ofte oni aŭdas de ili jenan rekantaĉon: „Ĉu Esperanto gajnigas monon? Pardonu", ili daŭrigas, kredante sin senkulpigi, "sed niaj vivrimedoj ne estas prosperaj, kaj kiel vi povas juĝi: „primum vivere deinde philosophare" (vivi antaŭ ĉio kaj poste filozofi). Por tiaj personoj oni estus tentinta sin montri indulgaj, sed malprave! La neagemo mortigas la homon; batali kaj ĉiam batali por la vivo, jen la beleco, la valoro, la celo de la vivo. Por ĉio oni trovas la tempon, sufiĉas voli, kaj plej ofte: voli estas povi. Oni devas kutimiĝi al la malfavoraj cirkonstancoj per daŭra kaj peniga laboro, la peno ne devas esti mezurata por tiu, kiu volas sukcesi. Ĉu ili pretekstas mankon de sufiĉaj vivrimedoj? Despli prave! Oni devas sin pretigi por la vivbatalo per ĉiu akirebla rimedo; foje oni ne scias kiu el ili kondukos vin al pli bona stato. Jen rilata ekzemplo por konfirmo de nia aserto: Antaŭ nelonge estis organizita konkurso por la akiro de ofico en granda Banko. Multaj kandidatoj sin prezentis, kiuj krom aliaj demandoj devis ankaŭ traduki tekston el la nacia lingvo al ĉiuj de la kandidatoj konataj lingvoj. Inter ili troviĝis hazarde Esperantisto. Do krom la fremdaj lingvoj kiujn la aliaj konkurantoj ankaŭ scipovis kiel li, nia samideano uzis plie Esperanton. Vi divenas certe, kio okazis. Nia samcelano sukcesis finakiri la deziratan postenon. En tiu ĉi okazo oni rajtus renversi la ordon de la latina maksimo, jene: „Primum philosophare deinde vivere" se tamen: sin dediĉi al Esperanto estas filozofi!

8. En alian kategorion oni povus grupigi la studemajn kaj spritajn intelektulojn, kiuj tre ĝuste, konsideras, ke la interŝanĝo de la intelekta laboro estas nepre necesa rimedo por la konservado de la spiritsaneco. Efektive la filozofo kaj la matematikisto, la intelektulo kaj la financisto devas momente kvietiĝi alpaŝante de unu temlaboro al alia, ekzakte kiel faras la ŝarĝoportisto, kiu transportante pezan ŝarĝon ŝanĝas de tempo al tempo manon aŭ ŝultron de la pezo; aŭ la presisto, kiu preferas nedaŭre labori per la samaj presliteroj. La varieco en la intelekta laboro estas la ĉefa faktoro, kiu se ĝi ne kondukas ĉiam al plena ripozo, almenaŭ ĝi malpliigas kaj malfruigas la trolaciĝon. Krom tio „Kiel provizon de via maljuneco" diris la fama Helena filozofo kaj poeto Pitakos, „rezervu la instruitecon, ĉar ĝi estas la plej bona konsolo kiu vin helpos por facile elteni pli malfrue la malfacilaĵojn de la maljuneco". Tiuj Esperantistoj, kvankam malmultaj, tamen ili estas bonaj samideanoj kaj faras grandan servon al nia movado. Ili sin altrudas al la skeptika publiko se ne ĉiam pro ilia agemeco almenaŭ pro ilia persona valoro, pro ilia famo.

9. Fine al naŭa kaj lasta kategorio oni povas grupigi la verajn idealistojn, kiuj por atingi la celon de sia idealismo povus sin dediĉi ne nur al la ellerno de lingvo, kiel nia kara Esperanto, sed ankoraŭ al la plej malfacilaj taskoj, ĉar eksentante la sanktan devon, kiun ili intencas plenumi, ili plifortigas sian volon kaj pligrandigas sian klopodon. Tiuj ĉi estas la pioniroj de nia ideo, la kondukantoj de nia Esperantista pacama armeo! Ili laboras senprofite. Ili elspezas monon laŭpove kaj senkalkule. Ili ĉie kaj ĉiam ne hontas surporti la simbolon de Esperantismo. La eco de pioniro, la trezoro de idealisto konistas el lia koro, el kiu konstante elŝprucas lia neelĉerpebla, lia senĉesa, lia senfina agemeco kaj kuraĝo.

Ni sincere salutu ĉiujn samideanojn de la Esperantista mikrokosmo (Mondeto), al kiu ajn kategorio ili apartenas, sed por tiuj, kiuj troviĝas en la lasta grupo, kaj kiu certe estas la plej inda, por tiuj herooj de la sindonemo, por tiuj sentimaj generaloj de nia ideo, ni senĉapeligu nin esprimante al ili nian veran admiron, nian sinceran dankon, nian profundkoran amon!

Dro. Anakreon Stamatiadis.

EL LA GREKA "LINGVO INTERNACIA"



MALPLI KAJ MULTPLI.

EL "LINGVO INTERNACIA"

La blank-maneto
De Henrieto
Estas malgranda, ho mia Di'!
Sed ŝia koro —
Kia doloro! —
Estas malpli.

Ŝiaj ligharoj
Neordinaraj
Estas longegaj, ho mia Di'!
Sed ŝia lango —
Fakto tre stranga! —
Estas multpli.

Ŝia talio,
Die gracia,
Estas mallarĝa, ho mia Di'!
Sed la prudento —
Kia turmento!
Estas malpli.

Ŝiaj okuloj
La fajrobrulaj
Estas plennigraj, ho mia Di'!
Sed la animo —
Ha, kia rimo! —
Estas multpli.

Amiko.



LA VOJO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoj de l' homoj.
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco,—
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —
Ni semas kaj semas konstante.
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, —
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos."

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco, —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

L. Zamenhof.



LA AMO.

DE ANGEL RUIZ PABLO.

EL LA "KATALUNA ANTOLOGIO"

Amo, dolĉa turmento, vundon faras
kaj samtempe kuracas per magio;
ĝi nutras sin per revoj, nostalgio;
kie ĝi vivon vidis, morto staras.
Amo havas eternan floradforton,
mortas de l' frukto, vivas de l'espero;
amo vivas en glora vivlibero
kaj nur en l' ideal' ne trovas morton.
Ne tentu vin am' viva en real',
nek am' vivanta nur en nuna hor',
ĉar amo estas ja nur iluzi'.
Des pli, amo ĝi estos — ju pli for;
ĉar amo, majstr' en ĉia ideal',
vivas nur en fiktiva fantazi'.



BIRDOJ MIGRANTAJ.

EL E. TEGNÉR, glora sveda poeto.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Varmege ĉe Nilo bruladas la sun',
La ombro palmara foriĝas jam nun',
La koron ekkaptas enu' je l' patrujo.
Birdar' kolektiĝas. Al Nord'! Al Svedujo!

Profunde sub ni, kvazaŭ en la tombar',
Sur tero verdanta, bluanta sur mar'
Noviĝas malĝojo, ventegas severe,
Sed ni kun la nuboj vojaĝas libere.

Jen alte en montoj, sur verda placet'
Ripozas birdaro, pretiĝas nestet'.
Ni en Akvilono la ovojn metadas,
Sub suno meznokta birdidojn kovadas.

Pafisto forestas en paca la val',
Nimfet' orflugila rapidas al bal'.
Arbara fraŭlino vespere iradas,
Hometoj en montoj la oron forĝadas.

Sed neĝa vintrido revenis al ni
Sur montojn, skuante flugilojn kun kri'.
Leporo blankiĝas, sorpbero ruĝiĝas.
Al Sudo! Al Sudo! Birdar' kolektiĝas.

Al ondoj varmetaj, al verda herbar'
Enu' nin retiras, al ombra palmar'.
Ni tie ripozas post vojo aera,
Ni tie enuas je norda la tero.

Otto Zeidlitz.



EPIGRAMOJ.

EL GOCKINGK.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Ke lia dramo estis prosperita,
Ĉi tion Petro sen dubeto kredas.
Li diras: „ĝi ne estis ja fajfita".
Sed kiu fajfas, kiam li oscedas?

A. Kofman.



MONUMENTO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Li, la poeto eminenta,
Patrujon sian gloriginta,
Li vivas nun en monumento,
Estinte pro malsat' mortinta.

A. Kofman.



AUTUNO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

L' aŭtuno. Venas nun la pluva plor',
La birdoj sian vintran flugon faras,
Ŝi ankaŭ foren flugis, l' am'-trezor',
Kaj mi malĝoje en la mondo staras.
La birdoj ree venos tien ĉi
Kaj ĝojos gaje sub printempa suno . . .
Nur ŝi, nur ŝi ne venos pli al mi,
Kaj nur por mi ne ĉesos la aŭtuno!

Amiko.

ĈE LA NOVA JARO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Finiĝis jam por ni malnova jaro
Eterne pasis ĝiaj tagoj for.
Tre bona estis ĝi por la homaro,
Kaj ni ĝin danku el la tuta kor'!

Sonoras adiaŭaj sonoriloj
Solene super land' kaj super mar',
Kaj ekesperas de l' homar' la filoj,
Ĉar venos baldaŭ la estonta jar'.

Malfermas ni pordon. Jen infano
Aperas bela en la ĉambr' al ni,
Portante libron en malgranda mano,
La bona nova jaro estas ĝi.

Sed kio estas de la libr' enhavo?
Feliĉo aŭ malbono? Diru ĝin!
Benita paco aŭ kruela glavo?
Ĉu venos ĝojo aŭ malĝojo nin?

Ne scias ni kaŝitan estontecon,
Ĉar restas ĉio en la man' de Di'.
Sed kion ajn sendados Li, bonecon
Li donos, kaj kontentaj estu ni.

Otto Zeidlitz.



KANTO.

En mia brust' varmega kaj bolanta
Konservas sin tre multaj sonoj ĉarmaj,
Kaj kiel mi en bela fajra kanto
Elverŝi ilin volus per la larmoj!
En kanto tiu ĉi eldiri miajn sentojn,
Rakonti kiel am' flamigas mian koron;
En kanto tiu ĉi suferojn kaj turmentojn
Kunigi nur en unu ploron.
Por ke kant' tiu ĉi ektuŝu aŭdon ŝian,
La koro ŝia ankaŭ ekdoloru;
Por ke aŭdante min, — sopiran ploron mian,
Ŝi ankaŭ tiel same ploru!

EL "LINGVO INTERNACIA" Dm. Jegorov.

ESTAS JAM KAVO EN TER' ELFOSITA

(El la rusa poeto Nikitin)
EL "LINGVO INTERNACIA"

Estas jam kavo en ter' elfosita.
Vivo malgaja kaj vivo ermita!
Ĝi rifuĝejon ne havis turmenta,
Ĝi kiel nokto aŭtuna silenta
Iris laŭ vojo kun granda mizer',
Mortis ĝi kiel en stepo fajrer'.

Mia kruela ekdormu do sorto!
Ĉerka tegmento min kovros kun forto,
Estos ĝi forte de ter' alpremita,
Estos ja nur unu homo prenita...
Kaj al neniu aperos dolor',
Restos li ja en nenies memor'.

Jen ĝi aŭdiĝas, senzorga la kanto!
Gasto tombeja, fluganta kantanto
Supre sin banas en blua aero,
Sonas arĝente la kant' en libero.
Finu!... Pri l' vivo finiĝis la tem',
Estas bezona nek kanto, nek ĝem'.

Seleznet.

KUZINO, NE FARU KAPRICAN VIZAĜON...

Kuzino, ne faru kaprican vizaĝon;
Mi kantus vin, sed mi ne havas kuraĝon.
Mi volis ekkanti la buŝon ravantan,
Sed viaj okuloj tuj mendis la kanton.
Mi volis ekkanti la nigrajn okulojn,
Sed tuj la mentono elmetis postulojn.
Mi volis ekkanti mentonon malgrandan,
Sed la piedetoj nun faras demandon.
Mi volis... por doni al ĉiuj kontenton
Mi havas nek tempon, nek indan talenton,
Kaj vi mem, kuzino, min punus severe,
Se ĉion kantindan mi kantus libere.

EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.



ŜIPETO.

Sur ondoj malvarmaj, sur maro bruanta
Vidiĝas ŝipeto naĝanta;
Ĝi forte kun maro bolanta batalas:
Konstante leviĝas kaj falas,
Sed tute ne vane ŝiriĝas la velo:
Ŝipeto rapidas al celo,
Ĝin paca ripozo atendas post veno
En bona, trankvila haveno.

EL "LINGVO INTERNACIA" Seleznet.



TRIOLETO.

Via buŝo, rozvanga fraŭlino,
Kiu brilas ĉarmegon ravantan,
Logas min al kisado senfina, —
Via buŝo, rozvanga fraŭlino.
Sed enhavas dentvicon tranĉantan
Kaj minacas al volo obstina
Via buŝo, rozvanga fraŭlino,
Kiu brilas ĉarmegon ravantan.


EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.



DEFALINTA FOLIO.

De trunketo disigita,
Vi malgaja, sekigita
Kien iras, folieto?
"Vento kverkon ruinadis,
Kiu min sur si tenadis;
Tiam, tute fordonanta
Min al vento forfluganta
Mi trakuras en momento
Valon, monton, kun la vento;
Kaj en tiu ĉi movado
Mi vojaĝos sen timado
Kun folio de la rozo,
Kaj folio de la laŭro
En la tuta vivodaŭro!"

EL "LINGVO INTERNACIA" Trad. Costa e Almeida.



GRANDA SPACO.

(El W. Wackernagel)

Spacon havas mi sen limo
Por konstruoj en aer',
Por amego en animo
Kaj por tombo en la ter'.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.

EL HEINE.

Ho suno, kolombo, violo, lili',
Mi amis vin multe, per granda pasi'.
Sed nun mi adoras nur unu juvelon,
La belan fajrhelan ĉielan anĝelon.
Ŝi estas al mi nun pli kara ol vi,
Ol suno, kolombo, violo, lili'.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.



EL HEINE.

Sur tiu ĉi monto kunloĝas
Tri ĉarmoj en bela kastel',
Min feliĉigintaj per amo,
Pli dolĉa ol pura miel'.

Sabate min kisis Mario,
Dimanĉe — la bela Juli',
Kaj lunde min preskaŭ sufokis
Luizo en sia pasi'.

Sed marde ĉe ili estiĝis
Festtago, kaj venis de l' val'
Gastinoj en belaj kaleŝoj
Kaj gastoj sur aro-ĉeval'.

Nur min vi ne vokis al festo.
Ho, kia malsaĝo, pro Di'!
L' onklinoj kaj babilulinoj
Komprenis kaj mokis pri vi.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.



KANTETO DE FRAŬLINO.

(Popole)

Printempo ree floras
Kaj mi denove ploras:
Edziĝas fraŭloj kun fraŭlinoj
Kaj min nur malmemoras.

Printempo ree venas,
Mi plu min ne ĉagrenas:
Edziĝas fraŭloj kun fraŭlinoj,
Min ankaŭ fraŭlo prenas.

EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.



EPIGRAMOJ.

1. El **Lessing.**

Ĉi-tie kuŝas Petro Brun,
Gajninta per mortiĝo sia,
Ĉar li ja post la morto nun
Fariĝis polvo el nenio.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.



2. El **Haŭg.**

Ĉie volas brili nia Marcelino
Kiel poetino, kiel belulino.
Sed nur la vizaĝo al ŝi apartenas,
Ĉar la pensojn ŝi el fremdaj libroj prenas.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.



3. El **Lucilius.**

Oni babilas, ke vi viajn harojn nigrigas. **Malvero!**
Ili jam estis plennigraj, kiam vi ilin aĉetis.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.

EL HEINE.

I.

Ĉirkaŭe la rozo flirtadas senĉese
Kun amo la bel-papilio,
Kaj la papilion per flamo amema
Briligas la suna radio.
Sed kiun, eldiru, la rozo ekamis?
Eldiru al mi vi la veron,
Ĉu la najtingalon, la dolĉan kantiston,
Ĉu eble la stelon vesperan?
Mi tion ne scias, sed mi, mi adoras
Vin ĉiujn, vin, suna radio,
Vin, stelo vespera, vin, bel-najtingalo,
Vin, rozo, kaj vin, papilio.

II.

Ne, amata, vi ne timu,
Restu tie ĉi trankvila.
Por ne esti forŝtelitaj
Ni ŝlosiĝos per riglilo.
Kiel ajn la vento blovas,
Ĝi la ĉambron ne atingos,
Ke ĝi l' domon ne bruligu,
Ni la lampon nun estingos.
Vi permesu vian kolon
Ĉirkaŭvolvi per la mano,
Por ke vi ne malvarmumu
Sen la varma ŝalo lana.

III.

Kiam mi mian doloron sopiris,
Vi nur oscedis, nenion eldiris.
Nun, ĉar ĝi estas vestita per rimo,
Vi min laŭdegas kun granda estimo.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.



EL M. LERMONTOV.

Veleto blankas en etera
Vasteco de la blua mar'.
Pro kio kuras ĝi de l' tero
Kaj kion serĉas sur l' ondar'?

La vento fajfas sur la vojo,
La masto krakas kun stertor',
Ho ve! ĝi kuras ne al ĝojo
Kaj ne de ĝojo kuras for.

Sub ĝi kaj supre — luma brilo,
Sed ĝi celadas nur al vent',
Kiele se en maltrankvilo
Troviĝus paco kaj kontent'.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.



JUNECO.

El Jakob Tamm.

Gajemaj infanoj ludadis
Sur mola herbaĵo de l' korto,
Mi ilin vidante ekĝemis
Pro rememoraĵoj pri sorto.
Serĉata feliĉo briletis
Al mi jam en malproksimeco;
Ĉu tio ĉi estis la tempo
De mia belega juneco?

EL "LINGVO INTERNACIA" Wilhelm Waher.



AMA SENTO.

(Rusa kanteto.)

La sorto nin eble disigos,
Se estas la volo de Di';
Vin eble ĉi tio ridigos,
Ke kara mi estis al vi;

Sed eĉ kiam ami vi ĉesos,
Alia fortiros vin sent',
Neniam mi vin ekforgesos
Por unu feliĉa moment'.

Foriĝos de mi mia forto
Kaj iĝos enuo je vi
Suferi la batojn de l' sorto
Estingos spiriton en mi.

Sed eĉ kiam vivi mi ĉesos,
Ĉirkaŭos min tomba silent',
Neniam mi vin ekforgesos
Por unu feliĉa moment'.

Kaj tiam vi min rememoros,
Vizitos la tombon de mi,
Kaj jam tro malfrue vi ploros
Kaj velkos, kaj iros post mi.

Sed se Di' ĉielon permesos
Aŭ punos infera turment',
Neniam mi vin ekforgesos,
Por unu feliĉa moment'.

EL "LINGVO INTERNACIA" Trad. A. Grabowski.



SAVIĜO DE SINMORTIGO.

(Nikarfius)

La avarulo Dinarho volis hieraŭ pendiĝi,
Kaj de la morto proksima savis lin unu obolo,
Ĉar tiom kostis la ŝnuro; ĝin pli malkare ŝnuristo
Vendi ne volis.–Li pensas pri morto ne tiel karega.

EL "LINOVO INTERNACIA" A. Kofman.



EL HEINE.

I.

Ho, min ne timigis, je Di',
Ĉi tiu letero, la lasta.
Vi amon rifuzas al mi —
Kaj via leter' estas vasta!
Longega letero! dekkvin
Paĝegoj al pli ne amata!
Sed ĉu oni skribas, fraŭlin',
Tiome al hom' eksigata?

II.

Vi ne timu, mian amon
Ne divenos homa fam',
Se eĉ laŭte, bel-fraŭlino,
Kantos mi pri mia am'.
Inter floroj de arbaro
Tre kaŝita, en silent'
Kuŝas la sekreta flamo,
Mia bongardata sent'.
Se el ĝi eĉ elmetiĝos
Fajrereto, tion ĉi
Ja ne kredos homoj: ili
Prenos ĝin por poezi'.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.

KANTO AL LA FLAGO DE PACO.

Flirtu, flirtu, flago de l' paceco,
Multaj venas nun al vi!
Al ni ne sin montras l' estonteco,
Sed je l' lum' konfidas ni.
Tial estu alte vi portata,
El la kor', amata, honorata,
Sonu nur pri vi la kant'
Varme el brust' de l' amant'.

Ho per sango vi ne makuliĝos!
Frata amo de l' homar'
Portas vin. Malamo estingiĝis
Kun la pensoj de barbar'.
Ne disigas vi kontraŭe,
Ligas fratojn vi ĉirkaŭe,
Firmas kredon je la ver',
Sanktan fidon en esper',

Ĉirkaŭantaj vin ni ĉiam diros
Koran vorton al la hom',
Kaj al amo reciproka tiros
En de l' paco sankta nom'.
Akraj malamec'-memoroj
Estu for el niaj koroj,
For batal' kaj batalil',
Flugu nigra sur flugil'.

Supren, supren bela blanka flago,
Sankta sign', ni amas vin.
Supren, lumu kiel hela tago,
Gvidu en milito nin.
Batalantoj ne mankiĝos,
Ĉiam novaj elvekiĝos,
Ili kun espera kor'
Sekvos vin al venka glor'.

EL "LINGVO INTERNACIA" V. Langlet.



EL HEINE..

I.

Per viaj violaj okuloj
Karese rigardas vi min,
Kaj sento revena min prenas,
Kaj mi silentiĝas, fraŭlin'.
Mi pensas pri viaj okuloj
De blua-viola kolor',
Kaj maro da pensoj bluegaj.
Ondiĝas en mi en la kor'.

II.

"Diru, kie estas via
Amo de vi dolĉ-kantita,
Kiam vi de flamo estis
Tra l' animo trapikita?"—
"Ha! la flamoj estingiĝis,
Estas for l' anim-ornamo,
Kaj la kantoj estas urno
Kun cindraĵo de la amo."

III.

Mi volas promeni en verda arbar',
Odoras floretoj kaj kantas birdar',
Ĉar mia okulo kaj mia orelo
Post morto troviĝos en tombo malhela
La floroj ne metos odoron al mi
Kaj pli ne bonsonos la bird-melodi'.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.

PORTUGALAJ POPOLAJ KANTETOJ.

I.

Pro amo mi perdis Dion,
Pro amo min perdis mi!
Nun mi estas forlasita
Sen Di', sen amo, sen vi!

II.

Mi ĵuradis plu ne ami,
Ĉar perfidis min amanta,
Sed okuloj viaj belaj
Faris min malverĵuranta!

III.

Lunbrilo de l' mezanokto,
Vi kaŭzas malĝojon al mi!
La pordon de l' amatino
Mi ne transiras pro vi!

IV.

Kiam mi droniĝos foje
En ondoj de via har',
Tiam vi povos sciiĝi
Esti ondoj ekster mar'!

V.

Jam mi volis, vi ne volis,
Pensis indi pli ol mi;
Nun vi volas, mi ne volas,
Estas kaprica pro vi.

VI.

Amo per amo sin pagas
Kaj vi amon ne redonas:
Sed kiu malbone pagas,
Tiun Dio ne pardonas.

VII.

Ĉe l' infanoj malgrandetaj
Estas necese kantadi:
Tial la patrino kantas,
Se eĉ ŝi volus ploradi!

VIII.

Ke la ĉagrenoj mortigas,
Erare ja pensas vi;
Se ili mortigus vere,
Jam estus mortinta mi.

Tradukis Albano de Magalhaes.

EL "LINGVO INTERNACIA"

TURMENTIĜADO.

Mi estas ĉiam fraŭlo, kaj kiam mi promenas
Kaj vidas geamantojn, mi forte min ĉagrenas:
Sendube mi ofendis per io la ĉielon,
Ke ĝi al mi ne donis ĝis nun fraŭlinon belan.

L' eterna fianĉeco min fine kolerigas,
La vido de geedzoj min malpaciencigas:
Sendube mi ofendis la Patron bonakoran,
Ke Li ĝis nun formetis de mi l' edziĝohoron.

Mi estas ĉiam edzo, malbenas mi la sorton,
L' eksedziĝintoj vekas en mi envion fortan:
Kolere mi malbenas la tagon de naskiĝo;
Pro kio tiel longe ne venas l' eksedziĝo?

EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.

EL HEINE.

I.

Dolĉe pikas min tra kor'
Sonoj de aero.
Sonu vi, printempa hor'
Sonu sur la tero;
Sonu, mi al tiuj ĉi
Floroj vin deputas;
Se vi vidos rozon, vi
Diru, mi salutas.

II.

Se ni edziĝos, mia kor',
Mi vin per unu fojo
Ĉirkaŭos per plezuramas',
Per gajo kaj per ĝojo.
Kaj se vi estos en koler',
Mi vin ne kontraŭiĝos,
Ne moku miajn versojn nur:
Mi tiam eksedziĝos.

III.

Amikeco, amo, oro,
Oni laŭdas vin en horo,
Mi vin laŭdis, serĉis ĉie,
Kaj mi trovis vin nenie.

IV.

Ke mi vin amas, mopso,
Vi scias, diablan':
Pro mia sukerdono
Vi lekas min sur man'.
Vi volas esti hundo
Kaj ne deziras pli,
Nur miaj homamikoj
Sajniĝas pli ol vi.

A. Kofman.

EL "LINGVO INTERNACIA"



MILITO.

L' enua paco, trankvileco rusta
Rompiĝis nun kaj estas fine for;
Flamiĝis fajro en la homa brusto
Kaj venas tago de brilanta glor'.
Kaj ĉu ni buĉas turkon la sovaĝan,
Ĉu la turbana turko pelas nin, —
Egale: iu montras la kuraĝon,
Estantan homa virto al la fin'.
La mortigitoj naskas la kompaton
Maloftan, tre maloftan inter ni,
Kaj kiu nomos tiun senton fratan
Ne bono de ĉielo kaj de Di'?
Vunditoj ĝemas, mortas kaj infektas,
Sed tio ĉi ne estas malbonaĵ':
Des pli la medicino sin perfektas,
Kaj tio ĉi ne estas malgravaĵ',
Por pli spioni en la fremda lando,
Por havi ĉiam specon de sciiĝ'
Ni lernas lingvojn, tio estos granda
Progreso en la internaciiĝ'.
Dank' al sieĝoj, danke al kaptitoj,
Eĉ dank' al propra enkaptiĝo, ni
Pri la nacioj estas instruitaj,
Ĉu ne scienco estas tio ĉi?
Al la venkitoj venas novaj teroj,
Riĉecoj, ĉia sekvo de sukces';
Ĉu estas multpli efektivaj peroj
Por iri rapidege al progres'?

Venkitaj plibonigas la armeon
Por malamikojn paĝi kun procent';
Ĉu al rabistoj porti la pereon
Ne estas singardemo kaj prudent'?
Ne unu urbo tre malodoranta
Pereas kaj — kovriĝas per la glor':
La malodoro pli ne ekzistanta
Certege pli ne estas malodor'.
Skulptarto, pentroarto, poezio
Ekfloras: ilin vokas la misi'
La kuraĝulojn glori kun pasio,
Kaj ĉu la artoj venas ne de Di'?
Kaj sekve gloro al militoj!
Fruktoportema estas sanga mar',
Je ĉiam feliĉiĝos la pafistoj,
Glorataj de la vivrestinta ar'.
Salutu do kaj gloru la armeon!
Se ĝin en teron tiros ĝia glor',
Ni trinkos vinon, kantos la pereon
Kaj ĝin honoros per malsobra plor'.

EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.



"BIRDOJ MIGRANTAJ".

El E. J. Stagnelius, glora sveda poeto.

Al fremda la bordo
Ĝemanta birdar'
Vojaĝas de l' nordo
For super la mar'.
Kun vento disiras
Malgaje la kri':
"Ho kien nin tiras
L' ordono de Vi?"
Flugila l' ar' tiel vokadas al Di'.

"De landoj malriĉaj
Ni flugas kun tim',
Ĉar tie feliĉaj
Ni estis sen lim'.
Ni neston konstruis
En verda arbkron',
Ĝin bele trabruis
Venteta la son'.
Ni flugas nun al malkonat'-region'.

La nokto somera
Kun rozoj en har'
Sidadis espera
En verda l' arbar'.
Ni ne endormiĝis
Dum nokta la hor',
Ni nur sensentiĝis
En flora l' odor'
Ĝis vekis nin sun' per radioj de or'.

Arkaĵon portadis
L' arbar' super ni.
Rosperloj bruladis
Sur flora foli'.
Sed nun ekflaviĝas
La bela arbar'.
La vent' plifortiĝas
Denove sur mar'.
Kovrita de prujn' estas kampa florar'.

Pro kio ni restas
En nordo plu nun?
Malhelaj jam estas
Radioj de l' sun'.
For estas somero,
El tomb' flugas ni
Sen plend' tra l' aero
Preĝantaj al Di'.
Vin, marojn bruantajn, salutas nun ni!"

Ĝin kantas birdaro
Ĉe l' bruo de ond'
Kaj venas trans maro
Al pli bela mond'.
Kaj tie sonoras
La bru' de l' river'
Eterne, kaj floras
Eterne la ter'.
La boskoj kantadas pri ĝu' kaj esper'.

Ho kiam eniĝas
En vivon dolor',
Kaj jam aŭtuniĝas,
Ne ploru, ho kor'.
Ne plendu la sorton,
Ĝi venas de Di!
Ne timu la morton,
Land' kuŝas trans ĝi.
Lumita eterne de suna radi'!

EL "LINGVO INTERNACIA" Sig. Ag...



MONDA HARMONIO.

Amiko, estu filozofo
Kaj moku vi je turmentiĝ',
Ĉar vivas energi' kaj ŝtofo
En harmonia balanciĝ'.
Se al vi mankas taga pano,
Vi ĝin ne manĝas, sed, je Di',
Por vi ĝin manĝas kunlandano,
Ĉar, kredu, perdas sin neni'.
Neniam dubu pri ekzisto
De harmonio kaj konstant':
Se maldikiĝas laboristo,
Dikiĝas ofte fabrikant'.
Se al vi mankas fianĉino,
Ne plendu, ŝi ekzistas kaj
Ŝi estas ies kromvirino,
Ŝi estas ies kora kaj'.
Ĉar, laŭ la monda harmonio,
Se al vi mankas por edzin'
Sufiĉa mono, jen alia
Por du virinoj havas ĝin.
Kaj se malklere vin influas
Trolaborado pro nutriĝ',
Por vi alia sin instruas,
Kaj konserviĝas balanciĝ'.
Ĉar ankaŭ estas la postulo
(Vi vin konsolu en la kor'),
Se vi montriĝas malklerulo,
Alia estas profesor'.

EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.



Filino de Iftah.

Fajfegas ĵetiloj kaj sonas grand-glavoj
Kaj brilas kaj frapas ponardoj.
Sed vane laciĝas herooj la bravaj.
Pereas Jehovaj standardoj,
Kaj la Amonanoj la sangoavidaj
Triumfe rapidas al l' Izraelidoj.

Ben-Jair mortiĝas kun ŝtono en brusto,
Kaj Gilad droniĝas en sango,
La kapo de Mahir, nomita "la justa",
Surstaras sur pinto de stango,
Kaj miloj da filoj de l' Supra Jehovo
Ekkuŝis sur kampo sen vivo, sen movo.

Ho ve, ho malĝojo! La ondoj Jordanaj
Elmetos ĝemegojn sovaĝajn,
Ploregos patrinoj pri siaj infanoj,
Disgratos al si la vizaĝojn,
Elŝiros la harojn, per cindro la griza
Ekŝutos la kapojn ĉe l' nigra avizo.

Kaj Iftah frenezas. Vidante la timon
De la elektita popolo,
Li vane penegas bravigi l' animon
De viroj per laŭta parolo,
Kaj jen li ekpreĝas kun malpacienco
Al Dio Jehovo, la Suprepotenca.

"Ekaŭdu, Jehovo, ekaŭdu la sklavon,
Preĝantan al Vi kun doloroj!
Mi hejme en Micpo posedas riĉhavon,
Aregon da grandaj trezoroj.
Mi havas amikojn, mi havas sklavaron
Kaj multon alian, al koro tre karan.

"Ho savu nin Vi, jam savinta la avojn
El la Egiptujo-fremdlando,
Se Vi liberigos nun ree la sklavojn
De l' nuna mizero multgranda,
Mi, Micpon venonte, al Vi, mia Dio,
L' unuavidoton oferos kun pio.

"Kaj kio ajn estos l' unuavidoto,
Objekto aŭ homo amata,
Ĝi estos al Dio brulig-oferota
Al Vi, ho Jehovo kompata!"
Kaj jen, elmetante kriegojn sovaĝajn,
Li ree ekscitas la virojn kuraĝajn.

Fajfegas ĵetiloj kaj frapas ponardoj,
Resonas ekĝemo kaj krio,
Kaj la Amonanoj kun timaj rigardoj
Forkuras de l' idoj de Dio,
Sed la forkurantajn postflugas rapide
La Izraelidoj kaj hakas avide.

Kaj de Aroero ĝis urbo Minito
Kaj poste ĝis Avel-Kerumo
Triumfas Izrael en sanga milito
Per glavo, per fajro kaj fumo,
Venkataj pereas sub domoruinoj,
Sklaviĝas bestaroj, infanoj, virinoj.

Kaj plene ŝarĝitaj per riĉaj akiroj
Reiras herooj kantantaj,
Al kantoj iliaj aliĝas sopiroj
De la ekkaptitoj plorantaj,
Kaj ĝemas virinoj lacegaj kaj palaj,
Kaj dume sonadas la gajaj cimbaloj.

Sed jen apudiĝas jam Micpo la kara,
Kaj Iftah rigardas sen ĉeso:
Li devas ekvidi por dia altaro
Oferon laŭ sia promeso.
Kaj li rigardadas sen laco-enuo:
"Nu, kio do venos al mi la unua?"

Jen el malproksimo eksonas tintiloj,
Cimbaloj, fajfiloj kaj kordoj.
Junuloj, fraŭlinoj per paŝoj facilaj
Ĝojdancas en vicoj senordaj
Kaj ridas kaj kantas, sin gaje balancas,
Kaj al la venkintoj gracie aldancas.

De pleja proksimo al la triumfanoj
Sin movas fraŭlino junaĝa.
Ŝi batas tintilon per siaj blank-manoj,
Kun flamo en bela vizaĝo;
La harojn serpentajn la vento disblovas,
Ŝin forto interna antaŭen almovas.

Ŝi dancas, ŝi tintas, ŝi kantas kun ĝojo;
"Alvenas la gloraj venkintoj,
Ke estu facila por ili la vojo,
Sonegu la gloron per tintoj!"
Si dancas, movata de l' kora kontento,
Nenion anoncas al ŝi l' antaŭsento.

Kaj Iftah rigardas al sia ofero,
Al sia unuavidato....
Subite... ho, tio ĉi estas ne vero....
Ŝi estas — filino l' amata!
La sola filino! Jehovo ĉiela!
Ho, kia malico de l' sorto kruela!

Kaj Iftah ĝemegas, disŝiras la veston
Kaj cindron sur kapon surŝurtas,
Kaj inter la viroj, volantaj ĝojfeston,
Li vortojn terurajn balbutas...
Kaj ĉio mutiĝas. En kelke da horoj
La Izraelujon ekprenas doloroj.

"Ne ploru, ho patro, ĉesigu la ĝemon
Kaj estu do viro ĝis fino.
Vi faris promeson ne malsingardeman.
Ĉar kion signifas fraŭlino
Kompare je miloj da viroj, savitaj
Per la heroaĵoj, de Dio donitaj?

"Vi faris promeson glorindan, ĉar savo
De miloj per unu ofero
Eterne estados faraĵo multbrava,
Belega, mirinda afero,
Kaj timos nacioj la Izraelanojn,
Ĉar ili ne ŝparas eĉ proprajn infanojn.

"Vi donu ekzemplon, plenumu la vorton,
Sciigu l' amatan popolon,
Ke ĝoje mi prenas nun tiun ĉi sorton,
Ke mi ne bezonas konsolon.
Multegaj fraŭlinoj ekzistas, mi scias,
Ĉe ni, kiuj mian mortiĝon envias.

"Nur unu malĝojo min pikas en koro—

Ke vi nun izola ekrestos,
Ke en maljuneca kruela doloro
Ĉe vi parenculo malestos,
Al vi li ne diros parolojn kunsentajn,
Al vi li ne kombos la harojn arĝentajn.

"Ho, ve al mi! Kvankam brilados la nomo
De Iftah en ĉiu nacio,
Sed Iftah ekmortos, kun li — lia domo:
Mi iras senfrukta al Dio.
Ho ve al mi, patro! Vi nepon ne konos,
Konsoloj el buŝo parenca ne sonos.

"Nun, patro amata, kun la amikinoj
Mi iros sur montojn najbarajn,
Ni tie sur suproj, ĉe ŝtonaj ruinoj
Sonigos malĝojajn gitarojn
Kaj kun la plorantaj eksonoj sonoraj
Ni kantos pri miaj animaj doloroj:

"Ke mi ne ekĝuis la edzajn karesojn,
Ne portis infanon sub koro,
Ne povis pliigi patrujajn sukcesojn
Per filoj, kovritaj de gloro,
Ke mortas nun mia virgeco floranta
Kun ĝojo multnombra, en ĝi troviĝanta."

Ne trono altega sin levas sur placo, —
Sin levas altega lignaro;
Ne krioj de ĝojo bruadas en spaco, —
Bruadas kaj ĝemas viraro,
Kaj tie, en blanka vestajo el lino,
Silente sursidas palega fraŭlino.

La viroj ĝemegas, la viroj sopiras,
Virinoj en larmoj plendronas,
Sed Iftah kun torĉo brulanta aliras
Kaj fajron al lignoj aldonas.
La lignoj ne volas kaj kontraŭ sin metas,
Sed Iftah obstinas kaj pajlon enĵetas.

Kaj jen ekkriegis l' amaso popola,
Kaj eho eksonis en valo:
Bruliĝis subite la aro tremola
Leviĝis fumega vualo,
Ekblovis, ekfajfis ventego kruela,
L' oferon alprenis al si la ĉielo.—

Kaj jen ĉiujare la izraelinoj
Kunvenas por plori sur montoj,
Kaj tie ĉi brilas la fajr-iluminoj,
Sonadas malgajaj rakontoj,
Kaj laŭte aŭdiĝas sonado de ĥoroj,
L' aero pleniĝas de ĝemoj kaj ploroj.

La izraelinoj parolas pri l' bela
Fraŭlino brulig-oferita
Kaj dankas fervore al sankta ĉielo
Pro venko, de ĝi donacita,
Kaj sendas al Dio petegojn humilajn
Forigi de l' lando terurojn similajn.

EL "LINGVO INTERNACIA" **Amiko.**



LEVIĜANTA SUNO KAJ VERDA STELO.

(Originala poemeto.)

Antaŭ la suno leviĝanta
Paliĝas ĉiam la stelar'
Kaj ĝia lumo triumfanta
Potence kreskas trans la mar'.
Nur la humila verda stelo
Jen staras ĉiam brila pli
Kaj meze de la suna helo
Des pli belege lumas ĝi...
Sur multkoloraj ventumiloj,
Tra lotuso kaj krizantem'
Trans Japanujo, kies filoj
Malgrandaj estas progresem'.
Ĉu eble tiu ĉi simbolo,
La viva signo de l'esper'
Sin trovas hejme ĉe popolo,
Plej progresema de la ter'?
Ĝi, iam preskaŭ nekonata
En mondangulo malproksim',
Nun tra la tuta mond' famata
Pro energio super lim'.
Ho esperplena Japanlando,
Juvelo de la insular'
Sin serpentanta sur la rando
De l' blua, de l' senfina mar'!
Ĉirkaŭ la sankta Fusijamo
Vin ja ornamis la natur'
De smeraldverda panoramo
En oceano de lazur'
Kaj via suno leviĝanta,
La bena lumo de l' orient'
Estos estonte varmiganta
La tutan grandan kontinent'.
Ĝi vekos ĝin por nova vivo,
Renaskigant' la flavan gent'
Je forta meminiciativo,
Per freŝa energia sent'.
Ho, ke tiam la verda stelo,
Por ĉiam regu sur la mond'
Nin gvidu fort' je alta celo
Por formi familian rond'.
Por ke orient' kaj okcidento
Ne sin rigardu malamik'
Sed ĉiu lando, ĉiu gento
Formadu ligon tre fortik'.
Ke l' ĉiumonda registaro
Ne tion prenu por minac'
Sed kiel ano de l' homaro
Laboru por komuna pac'.
La ekvilibro sin formados
Ne inter la nacioj nur,
Sed inter kap' kaj kor' restados
Ne plu la dividanta mur'.
Ho glora suno leviĝanta
Kun via verda radiar'!
Vi, por animo esperanta
La luma punkto de l' homar'!

Dreves Uitterdijk.



MALGRANDRUSA KANTO.

Mi, mizera, malfeliĉa,
Neston ne posedas—
Kaj ne povis mi en mondo
Kanti ĝoje, gaje!...
Flugu, kantu vi al tiuj,
Kiuj ĉiam gajas:
Ili de kantado via
Certe amuziĝos.

Ne pepadu, najtingalo,
En mateno frue,
Ne pepadu, malgrandeto,
Sub fenestr' proksime...
Via kanto estas bela,
Tone vi kantadas,
Vi feliĉa, jepariĝis
Kaj nesteton havas.

Sed al mi kantado via
Bruston nur disŝiras,
Koron pikas kaj animon
Al turmento donas...
Strigo—birdo por mi restu:
Ploras ĝi, ne kantas...
Ploru, strigo, ploru, ĝemu,
Morton al mi voku!...

EL "LINGVO INTERNACIA" V. Devjatnin.



VIZIO.


Mi vidis vin, kaj tiel bela estis
Vi en lazura vest' el flor' de lino,
Ke mi ja kredis min antaŭ diino,
Kaj en subita ravo longe restis...

La tago — nur pro vi! — sin vante vestis
Per plej riĉaj nuancoj de karmino.
Kaj de tiu krepusk' en la sangvino
Amo venis al mi, frapis, eknestis!

Poste, koroj kunbatis... La plej ĉarma
Feliĉeco plenigis nin en varma
Tiu hela krepusko de somero...

Sed de l' tago finiĝis l' agonio...
Tiel ankaŭ momenta nur vizio
Estis por mi la amo sur la tero...

"BRAZILA ESPERANTISTO" Porto Carreiro Neto



AL MORTO.

Ho, venu mort'! Sen plendo, sen doloro
En viajn brakojn mi enĵetos min...
La revoj trompis min, laciĝis koro
Kaj paco nur en tomb' atendas min,
Foriĝis miaj belaj idealoj,
Forflugis la esperoj sen reven',
Mi estas nun tro-sata je bataloj;
Ho, venu, mort', mi prenos vin kun ben'!...

EL "LINGVO INTERNACIA" D. Jegorov.



LA BETULO.

El A. Kursinski

Al lago malgaje betulo sin klinas,
Sin donas al blua profundo,
Kaj tie ĝi vidas la revon benitan
Kaj lunon sur akvo senfunda.
Ĝi staras, kaj revas, ne scias deziron,
Ne tuŝas la vent' foliaron...
Nek pelas per dubo tempetoj preteraj
Dormecon kaj ĝian donaron.

El lingvo rusa trad. Nikolo Setov.

EL "LINGVO INTERNACIA"

EL HEINE.

I.

Vi, bela fiŝista filino,
Direktu la ŝipon al ter',
Sidiĝu al mi, kaj ni ambaŭ
Babilos en mara aer'.
La kapon vi al mia koro
Alpremu sen tima esprim':
Vi ja ĉiutage konfidas
La maron sovaĝan sen tim'.
La koro en mi tute estas
Simila al tiu ĉi mar'
Per siaj alfluoj, defluoj,
Per ventoj kaj briliantar'.

II.

La pala Henrik preteriris,
Kaj Greto, el la domo
Vidinte lin, al si eldiris:
"Ĉu estas li fantomo?"
Jen li l' okulojn al ŝi levis,
La pala-pala homo,
Ŝi ankaŭ palon tuj ricevis
Simile al fantomo.
Ŝin tage ĉe l' fenestro tenis
Deziroj superhomaj,
Meznokte ŝi lin ĉirkaŭprenis
En horo de fantomoj.

III.

La mort' — ĝi estas freŝa nokt',
La viv' — sufoka tago.
Noktiĝas. Min lacigis
La longa taga ago.
Pri amo kantas najtingal'
Apude mia lito;
Mi dormas kaj aŭskultas,
De l' kanto sorĉigita.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman



LASTA AMO.

El K. E. Soot.

De kiam mi estis lasita
De ĉiuj kaj sola mi staris,
De kiam mi trovis nenion
Por ami, ĉar ĉio min baris,
De tiam mi amas doloron
Restitan en brusto de amo...
Kaj ĉion al mi rememoro
Prezentas en drama junflamo.

Wilhelm Waher

EL "LINGVO INTERNACIA"



REFORTIGO.

Mi forte ekflugos en malproksimecon,
Sufiĉe jam kanti nun nur malgajecon,
Pli baldaŭ revenu juneco kaj forto,
Forflugu premanta malĝojo de l' sorto,
Kaj sen rerigardo antaŭen, sen timo
Ekflugos rapide mi al malproksimo.

EL "LINGVO INTERNACIA" Seleznet.



EL HEINE.

I.

Diru, mia bel-anĝelo,
Diru, ĉu ne estas vi
Dolĉa revo, sonĝo bela
De poeta fantazi'?

Ne, ho ne, ĉar en vi ĉio,
La okuloj kaj buŝet'
Estas super fantazio,
Super kreo de poet'.

Basilisko kaj vipero,
Ĉia fabla monstra fam',—
Tion kreas kun prospero
La poeta krea flam'.

Sole vi kun viaj ruzoj,
Kun la rava vizaĝet',
Kun l' okuloj ŝajn-konfuzaj
Ne elpensos la poet'.

II. Monta voĉo.

Malĝoje rajdas kavalir',
Lin pikas malesper'.
"Ĉu min atendas l' amatin',
Aŭ la tombeja ter'?"
Kaj sonas el la mont-aer':
"Tombeja ter'!"

Li rajdas kun ĝemanta kor',
La malfeliĉa hom'.
"Sed eble estas trankvilec'
En ĝi, en tomba dom'?"
Kaj sonas re la voĉ-fantom':
"En tomba dom'!"

Li rajdas kun ĝemanta kor',
Sur valo kaj herbej'.
"Se estas tiel, kuŝu mi
En ĝi nun, en tombej'!"
Kaj sonas voĉo de l' ŝtonej':
"Nun en tombej'!"

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.



LA KANARIO.

DE MORRIS ROZENFELD.

Trilas, trilas kanario
En arbara voj —
Kiu povas tiel trili
Kun la sama ĝoj?

Trilas, trilas kanario
En palaco jen. —
Kiu povas tiel trili
Same kun ĉagren'?

Tradukis A. Koliner.



LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi al homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. Zamenhof.



SCIURO KAJ PAPAGO

EL FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Sciuro malgranda kuradis en rado
Kaj homojn amuzis per sia kurado.
Kaj jen al papago ?i diris fiere:
"Mi, vin mizerulo, bedaŭras sincere·

Kun kora doloro eterne mi vidas,
Ke tute senmove sur ringo vi sidas!...
Rigardu: jen ĉiam mi kuras pli alte
Kaj tial je vivo kontentas senhalte.. "

Papago rigardis sciuron kun moko
Kaj diris: "kurado rapida kaj lerta,
Sed bone kurante, sur unu nur loko
Vi restas, mizera besteto nesperta."

V Devjatnin.



TRIA PARTO
Universala Vortaro

ŜLOSILO DE LA LINGVOJ.

Por trovi la difinon de Esperanta vorto en via nacia lingvo, certiĝu antaŭ ol pri la numero de tiu lingvo. Vi ĉiam trovos la difinon sub tiu numero.

1	Angla	21	Slovaka
2	Franca	22	Slovena
3	Hispana	23	Kroata
4	Itala	24	Hungara
5	Portugala	25	Albana
6	Romanĉa	26	Estona
7	Kataluna	27	Fina
8	Rumana	28	Latva
9	Germana	29	Litova
10	Holanda	30	Flandra
11	Dana	31	Islanda
12	Norvega	32	Armena
13	Sveda	33	Turka
14	Juda	34	Greka
15	Pola	35	Kimra
16	Rusa	36	Araba
17	Bulgara	37	Persa
18	Serba	38	Hebrea
19	Ukraina	39	Ĥina
20	Ĉeĥa	40	Japana




BENSONA UNIVERSALA VORTARO

ŜLOSILO

VIA NACIA LINGVO ĈIAM TROVIĜAS SUB LA SAMA NUMERO. POR TROVI LA DIFINON DE ESPERANTA VORTO, SERĈU SUB TIU NUMERO. EKZ. RUSOJ TROVOS LA DIFINON SUB NO. 16, TURKOJ-33, JAPANOJ 40 KC.

1	ANGLA	21	SLOVAKA
2	FRANCA	22	SLOVENA
3	HISPANA	23	KROATA
4	ITALA	24	HUNGARA
5	PORTUGALA	25	ALBANA
6	ROMANĈA	26	ESTONA
7	KATALUNA	27	FINA
8	RUMANA	28	LATVA
9	GERMANA	29	LITOVA
10	HOLANDA	30	FLANDRA
11	DANA	31	ISLANDA
12	NORVEGA	32	ARMENA
13	SVEDA	33	TURKA
14	JUDA	34	GREKA
15	POLA	35	KIMRA
16	RUSA	36	ARABA
17	BULGARA	37	PERSA
18	SERBA	38	HEBREA
19	UKRAINA	39	ĤINA
20	BOHEMA	40	JAPANA



-a.
Finiĝo de adjektivoj.

SURDA HOMO. LAMA HOMO.
ĜIBA HOMO. EBRIA HOMO.
RIGIDA HOMO. KRIPLA HOMO.
KOMIKA HOMO. SOVAĜA HOMO.


GRIZA HOMO.

KURAĜA HOMO.

AVARA HOMO.

LIBERA HOMO.

SANKTA HOMO.

NUDA HOMO.

FURIOZA HOMO.

KRUELA HOMO.


FORTA HOMO.

DIKA HOMO.


SAĜA HOMO.

LERTA HOMO.

Abak-o.
Speco de kalkulilo.



Abak-o.
Supera parto de kolono.



Abat-o.
Estro de monahejo.


Abato.


Abatejo.



Abatino.

Abdik-i. (TR.)
Forlasi la tronon.



Abel-o. (APIS MELLIFICA)
La insekto, kiu produktas mielon kaj vakson.


ABELO.


ABELUJO.

Abi-o.
Speco de konifera pinglarbo. (Abies-Pectinata).



Abism-o.
Tre profunda kaj abrupta loko.



Ablativ-o. KAZO DE DEKLINACIO.
En esperanto per la prepozicioj "per" kaj "de".

Abnegaci-o.
Forgeso pri si mem por la bono de alia.



Aboco.
Vidu alfabeto.

Abomen-a.
Malagrabla sento.






Abomena vidaĵo.

1	ABOMINATION	21	OŠKLIVOSŤ
2	ABOMINATION	22	MRŽNJA
3	ABOMINAR	23	ODVRATNOST
4	ABBOMINARE	24	ISZONY, HAS
5	ABOMINAR	25	ME PASNË MËNI
6	ABOMINAZIUN	26	JÄLK, KOLE
7	ABOMINAR	27	INHO
8	SCÂRBĂ	28	RIEBUMS
9	ABSCHEU	29	PANIEKINIMAS
10	AFSCHUW	30	AFSCHUW
11	AFSKYELIG	31	VIÐBJÓÐUR
12	AFSKYELIG	32	[illegible]
13	AFSKY	33	MENFUR
14	[illegible]	34	ΒΔΕΛΥΡΟΣ
15	ODRAZA	35	ATGAS
16	ОТВРАЩЕНИЕ	36	[illegible]
17	ОТВРАЩЕНИЕ	37	[illegible]
18	ОДВРАТНОСТ	38	[illegible]
19	ВИДРАЗА	39	憎惡
20	OŠKLIVOST	40	嫌惡

Abon-i. (TR.) MENDI POR DEFINITA TEMPO.


La viro abonas gazeton.

1	SUBSCRIBE	21	PREDPLATIT'
2	ABONNER	22	NAROČITI
3	ABONARSE A	23	PREDPLATITISE
4	ABBONARSI	24	ELŐFIZETNI
5	ASSINAR	25	ME U ABONU
6	ABUNER	26	TELLIMA
7	ABONAR-SE	27	TILATA
8	A SE ABONA	28	ABONET
9	ABONNIEREN	29	UŽSIPRENUMERUOTI
10	INTEEKENEN	30	INTEEKENING
11	ABONNERE	31	VERA ÁSKRIFANDI
12	ABONNERE	32	[illegible]
13	PRENUMERERA	33	ABONE, YAZILMAK
14	[illegible]	34	ΕΓΓΡΑΦΟΜΑΙ
15	PRENUMEROWAĆ	35	RHAGDALU
16	АБОНИРОВАТЬСЯ	36	[illegible]
17	АБОНИРАМ СЕ	37	[illegible]
18	ПРЕДПЛАТИТИ СЕ	38	[illegible]
19	ПЕРЕДПЛАЧУВАТИ	39	訂雜誌
20	PŘEDPLATITI	40	予約する

Abort-i.
Naski nematuran, malvivan idon.

Abrikot-o.



Frukto.
(Prunus Armeniaca).

Abrupt-a.
Tre kruta, subita.



Abrupta bordo.

Absces-o. SPECO DE FURUNKO.
Puso en la histoj.



Trapikas la absceson.

Absint-o.
Aroma vegetaĵo, el kiu oni preparas specon de brando.
(ArtemisiaAbsinthium)




Absolut-a.
Sendependa, senlima, Senmiksa, ne relativa.



Nero, imperiestro de Romo estis absoluta monarĥo.

Absolv-i. (TR)
Pardoni la pekojn.



La pastro absolvas la malsanan pekulon.

Absorb-i. (TR.)
Tute okupi la atenton.



Abstinenc-o.
Principe ne uzi alkoholajn trinkaĵojn aŭ tabakon.



Abstinenculo.

Abstrakt-a. NE PERCEPTEBLA DE LA SENTOJ.
La malo de konkreta.
(Vidu konkreta).

Absurd-a.
Tute sensenca.



Abund-a.
Pli ol sufiĉa kvanto.



Acer-o.
Speco de arbo. (Acer).



Acet-o. Vinagro.
(Vidu vinagro)

Acid-a.
Havanta vinagran guston.



1	SOUR	21	KYSELÝ
2	AIGRE	22	KISEL
3	ÁCIDO, AGRIO	23	KISEO
4	ACIDO, ASPRO	24	SAVANYÚ
5	ÁCIDO	25	I E THATË
6	ASPER, ESCH	26	HAPU
7	ACID-A, AGRE	27	HAPPO HAPAN
8	ACRU	28	SKĀBS
9	SAUER	29	RŪKŠTUS
10	ZUUR	30	ZUUR
11	SUR	31	SÚR
12	SUR	32	[illegible]
13	SUR, SYRA	33	EKŞI
14	[illegible]	34	ΞΥΝΟΣ
15	KWAŚNY	35	SUR
16	КИСЛЫЙ	36	حامض
17	КИСЕЛЪ	37	ترش
18	КИСЕО	38	[illegible]
19	КВАСНИЙ	39	酸
20	KYSELÝ	40	酸

-aĉ.
Sufikso esprimanta malsatan komprenon de ideo.



DOMO.



DOMAĈO.



ĈEVALO.



ĈEVALAĈO.



VIRO.



VIRAĈO.



SKRIBAĴO.



SKRIBAĈAĴO.



VIOLONISTO



VIOLONISTAĈO



MANĜAS.



MANĜAĈAS.

Aĉet-i. (TR.)
Akiri ion per mono.



Aĉetas cigaron.

1	BUY	21	KUPOVAT'
2	ACHETER	22	KUPITI
3	COMPRAR	23	KUPITI
4	COMPRARE	24	VÁSÁROLNI
5	COMPRAR	25	ME BLE
6	CUMPRER	26	OSTMA
7	COMPRAR	27	OSTAA
8	A CUMPĂRA	28	PIRKT
9	KAUFEN	29	PIRKTI
10	KOOPEN	30	KOOPEN
11	KØBE	31	kaupa
12	KJØPE	32	[illegible]
13	KÖPA	33	SATUN ALMAK
14	[illegible]	34	ΑΓΟΡΑΖΩ
15	KUPOWAĆ	35	PRYNNU
16	ПОКУПАТЬ	36	اشترى
17	КУПУВАМЪ	37	خریدن
18	КУПОВАТИ	38	[illegible]
19	КУПУВАТИ	39	買
20	KOUPITI	40	買う

-ad. (VIDU LA EKZEMPLOJN.)
Sufikso esprimanta longedaŭran aŭ ripetitan agon.



KRONO.



KRONADO.



SALTAS.



SALTADAS.



MOVAS.



MOVIĜADAS.



Li ĉiam **diradis** al mi la veron. La **pafado** daŭris tre longe. Mi **saltadis** la tutan tagon de loko al loko. Lia hieraŭa parolo estis tre bela, sed la tro multa **parolado** laciĝas lin. La **kantado** estas agrabla okupo. Bastoneto, sur kiu oni tenas plumon por **skribado**, estas plumingo. La maljuna avino devis **rakontadi** ĉion, kion ŝi sciis pri ŝipoj kaj urboj. Ŝi vidis, kiel la fajraj fulmoj zigzage sin **ĵetadis** en la ŝaŭman maron. Ofte la kvin fratinoj **ĉirkaŭprenadis** unu la alian kaj **suprennaĝadis** super la akvon. Vortoj kunmetitaj estas kreataj per **kunligado** de vortoj. Mi volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis loko de la **flugado**, sed nur la celo de la **flugado**. Li tiel amis belajn novajn vestojn, ke li **elspezadis** sian tutan monon, por nur esti ĉiam bele ornamita. Por ne piki la fingron ĉe la **kudrado**, oni portas fingringon. La **uzado de** l'artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, **kiuj ne komprenas** la **uzadon de** la artikolo, povas **en la** unua tempo tute ne uzi la artikolon.

Adapt-i. (TR.)
Alĝustigi, aŭ konformigi ion al io.



Adaptema knabo.

Adept-o.
Partiano, sektano, lertulo en iu fako.

Adiaŭ.
Salutvorto antaŭ foriro.



Adici-o.
Aritmetika operacio.



Unu kaj unu estas du.

Adjektiv-o.
Vorto esprimanta kvaliton. Adjektivoj finiĝas per la litero "A". (Vidu A)





Adjutant-o.
Konstanta akompananto de superulo.

Administr-i. (TR.)
Konduki privatajn aŭ publikajn aferojn.



Administras la konstruon de fervojo.

Admir-i.(TR.) ALTE ŜATI.




La virinoj admiras la pentraĵon.



ADMIRINDA KONSTRUAĴO.

1 ADMIRE	21 OBDIVOVAT'
2 ADMIRER	22 OBČUDOVATI
3 ADMIRAR	23 ČUDITI SE
4 AMMIRARE	24 BÁMULNI
5 ADMIRAR	25 ME ADMIRU
6 ADMIRER	26 IMETLEMA
7 ADMIRAR	27 IHAILLA
8 ŞI N. A ADMIRÀ	28 APBRĪNOT
9 BEWUNDERN	29 STEBĖTIS
10 BEWONDEREN	30 BEWONDEREN
11 BEUNDRE	31 undrast
12 BEUNDRE	32 [illegible]
13 BEUNDRA	33 PESEND ETMEK
14 [illegible]	34 ΘΑΥΜΑΖΩ
15 PODZIWIAĆ	35 EDMYGU
16 ДИВИТЬСЯ	36 [illegible]
17 УДИВЛЯВАМ СЕ	37 [illegible]
18 ДИВИТИ СЕ	38 [illegible]
19 ЧУДИТИ СЕ	39 [illegible]
20 OBDIVOVATI	40 嘆賞する

Admiral-o.
Ĉefo de milita ŝiparo.







La admiralo revuas la ŝipanaron.

Admon-i.(TR.) INSTIGI. AVERTI.



La instruistino admonas Karlon al la diligenteco.

1 ADMONISH	21 NAPOMINAT'
2 ADMONESTER	22 OPOMINJATI
3 AMONESTAR	23 OPOMINJATI
4 AMMONIRE	24 SERKENTENI
5 ADMOESTAR	25 ME BRIGÚE
6 ADMONIR	26 MANITSEMA
7 AMENESTAR	27 KEHOTTAA
8 A DOJENI	28 PAMĀCĪT
9 ERMAHNEN	29 PERSPETI
10 VERMANEN	30 VERMANEN
11 OPFORDRE TIL	31 åminna
12 OPFORDRE TIL	32 [illegible]
13 FORMANE	33 TAZIR ETMEK
14 [illegible]	34 ΝΟΥΘΕΤΩ
15 UPOMINAĆ	35 CERYDDU
16 УВЕЩЕВАТЬ	36 [illegible]
17 УВЕЩЕВАМЪ	37 [illegible]
18 СВЕТОВАТИ	38 [illegible]
19 УПОМИНАТИ	39 戒指
20 NAPOMINATI	40 忠告する

Adopt-i. (TR.)
Alpreni ies infanon kiel sian propran.



Mi adoptos la infanon.

Ador-i.(TR.) **Respektegi.**



Adoro.




Mi vin amas, adoras.

1 ADORE — 21 OBOŽŇOVAT'
2 ADORER — 22 ČASTITI
3 ADORAR — 23 OBOŽAVATI
4 ADORARE — 24 IMÁDNI
5 ADORAR — 25 ME ADHURU
6 ADURER — 26 JUMALDAMA
7 ADORAR — 27 JUMALOIDA
8 A ADORÁ — 28 DIEVINĀT
9 ANBETEN — 29 GARBINTI
10 AANBIDDEN — 30 AANBIDDEN
11 TILBEDE — 31 tilbiðja
12 TILBEDE — 32 [illegible]
13 TILLBEDJA — 33 IBADET ETMEK
14 [illegible] — 34 ΛΑΤΡΕΥΩ
15 UWIELBIAĆ — 35 MAWRHAU
16 ОБОЖАТЬ — 36 [illegible]
17 ОБОЖАВАМЪ — 37 [illegible]
18 ОБОЖАВАТИ — 38 [illegible]
19 РОВАЖАТИ — 39 崇拜
20 VELEBITI — 40 崇拝する

16 ПРЕЛЮБОДЕЙСТВОВАТЬ — 36 [illegible]
17 ПРЕЛЮБОДЕЙСТВУВАМЪ — 37 [illegible]
18 БРАКОЛОМСТВО — 38 [illegible]
19 ЧУЖОЛОЖИТИ — 39 [illegible]
20 CIZOLOŽITI — 40 [illegible]

Adres-o.

La loĝloko de persono.



Adult-i. (NTR)

Rompi la geedzan fidelecon.



Adultulino.

1 TO COMMIT ADULTERY — 21 CUDZOLOŽSTVO
2 ADULTÉRER — 22 PREŠUSTVOVATI
3 COMETER UN ADULTERIO — 23 PRELJUBČINITI
4 COMMETTERE ADULTERIO — 24 HÁZASSÁGOT TÖR-
5 COMETER ADULTÉRIO — 25 ME THY KURORËN
6 COMMETTER ADULTERI — 26 ABIELU RIKKUMA
7 COMETRE ADULTERI — 27 TEHDÄ AVIORIKOS
8 A SĂVÂRŞI ADULTER — 28 PĀRKĀPT LAULĪBU
9 EHEBRECHEN — 29 SVETIMOTERIAUTI
10 ECHTBREKEN — 30 VERVALSCHEN
11 BEGAA AEGTESKABSBRUD — 31 falsa, svikja
12 BEGÅ EKTESKAPSBRUDD — 32 [illegible]
13 ÄKTENSKAPSBROTT — 33 ZINA ETMEK
14 [illegible] — 34 ΜΟΙΧΕΥΩ
15 CUDZOŁOŻIĆ — 35 GODINEB

Advent-o.

La kvarsemajna fasto antaŭ Kristnasko.


Adverb-o.


Vorto esprimanta manieron, lokon aŭ tempon. Ekz. Hodiaŭ, neniam, baldaŭ, intence, bone, vole, sekve, tie, precipe, prefere, poste, tute, k.c.

































Advokat-o.


Juristo, persono, kiu defendas akuzatojn.



La advokato defendas la akuzatan virinon.

Aer-o. LA GASO, KIUN NI SPIRAS.





1 AIR — 21 VZDUCH
2 AIR — 22 ZRAK
3 AIRE — 23 UZDUH
4 ARIA — 24 LEVEGŐ
5 AR — 25 AJRI
6 AJER — 26 ÕHK
7 AIRE — 27 ILMA
8 AER — 28 GAISS
9 LUFT — 29 ORAS
10 LUCHT — 30 LUCHT
11 LUFT — 31 loft
12 LUFT — 32 [illegible]
13 LUFT — 33 HAVA
14 [illegible] — 34 ΑΗΡ
15 POWIETRZE — 35 AER, AWYR
16 ВОЗДУХ — 36 [illegible]
17 ВЪЗДУХЪ — 37 [illegible]
18 ВАЗДУХ — 38 [illegible]
19 ВОЗДУХ — 39 空气
20 VZDUCH — 40 空氣

Aerolit-o.

Ŝtono falinta de la kosma spaco.

Aerometr-o.


Instrumento por mezuri la densecon de gasoj.

Aeronaŭt-o.


Aerostatveturanto. (Vidu aerostato)




Aeroplan-o.



Aerostat-o.



Aerŝip-o.



Afabl-a.

Ĝentila, kompleza.



Afabla virino.



Malafabla virino.

1 KIND - AFFABLE — 21 LÁSKAVÝ
2 AFFABLE DOUX — 22 PRIJAZEN
3 AFABLE — 23 PRIJAZAN
4 AMABILE — 24 NYÁJAS
5 AFFAVEL — 25 I NJERËZISHËM
6 AFFABEL — 26 LAHKE
7 AFABLE — 27 YSTÄVÄLLINEN
8 AMABIL — 28 LAIPNS
9 LIEBENSWÜRDIG — 29 MALONUS
10 FRIENDELIJK — 30 GESPRAAKZAAM
11 VENLIG — 31 viðfeldinn
12 VENNLIG — 32 [illegible]
13 VÄNLIG — 33 LATIF
14 [illegible] — 34 ΚΑΛΟΚΑΓΑΘΟΣ
15 UPRZEJMY — 35 MWYN
16 ПРИВЕТЛИВЫЙ — 36 [illegible]
17 ЛЮБЕЗЕНЪ — 37 [illegible]
18 ПРИЈАТАН — 38 [illegible]
19 ВВІЧЛИВИЙ — 39 和睦
20 LASKAVÝ — 40 愛想のよい

Afekt-i. (TR.)
Ŝajnigi ion per nenaturaj manieroj.



Afektema dando.

Afer-o. ĈIO AJN EN LA MONDO, REALA AŬ ABSTRAKTA



Priparolas aferon.




Amafero.



komercafero.

1 AFFAIR, BUSINESS	21 ZÁLEŽITOSŤ
2 AFFAIRE	22 ZADEVA
3 ASUNTO	23 ZGODA, STVAR
4 FACCENDA, COSA	24 ÜGY, DOLOG
5 ASSUNTO, COISA	25 PUNË
6 AFFER	26 ASI, LUGU
7 ASSUMPTE, COSA	27 ASIA
8 AFACERE	28 LIETA
9 SACHE	29 DALYKAS
10 ZAAK	30 ZAAK
11 AFFAERE	31 hlutur
12 AFFAERE	32 [illegible]
13 SAK	33 UMUR
14 [illegible]	34 ΥΠΟΘΕΣΙΣ, ΔΟΥΛΕΙΑ
15 SPRAWA	35 PETH, MATER
16 ДЕЛО	36 [illegible]
17 ДѢЛО	37 [illegible]
18 ПОСАО	38 [illegible]
19 СПРАВА	39 事件
20 ZÁLEŽITOST	40 事件

Afiks-o.
Vorteto metata antaŭ aŭ post radiko. (Vidu Sufikso, Prefikso)







Afiŝ-o. Muranonco.



Ili legas la afiŝon.

Aflikt-i. (TR.)
Turmentoj de la animo, morale suferigi.


Aforism-o.
Koncize esprimita penso aŭ diro ĉerpita el fama verko.

Afrank-i. (TR.)
Antaŭpagi la sendkostojn de letero aŭ pakaĵo.




Afrankas leteron.

Afust-o.
Kanona veturilo.




Ag-i. (NTR.)
Uzi siajn fizikajn aŭ spiritajn fortojn.



Malnobla ago.

Afabla ago.

1 TO ACT	21 JEDNAT'
2 AGIR	22 DELATI
3 OBRAR	23 RADITI
4 AGIRE	24 CSELEKEDNI
5 OBRAR	25 ME VEPÈRU
6 AGIR	26 TEGUTSEMA
7 OBRAR	27 TOIMIA
8 A FACE	28 DARBOTIES
9 HANDELN	29 VEIKIMAS
10 HANDELEN	30 HANDELEN
11 VIRKE, HANDLE	31 BREYTA
12 VIRKE, HANDLE	32 [illegible]
13 FÖRFARA	33 ICRA ETMEK
14 [illegible]	34 ΠΡΑΤΤΩ, ΕΝΕΡΓΩ
15 DZIAŁAĆ	35 ACT
16 ПОСТУПАТЬ	36 [illegible]
17 ДЕЙСТВУВАМЪ	37 [illegible]
18 ПОСТУПАТИ	38 [illegible]
19 ПОСТУПАТИ	39 [illegible]
20 JEDNATI	40 [illegible]



Nobla ago.

Agac-o.
Malagrabla sento en la dentoj.



Acidaj fruktoj ĉiam agacas miajn denton.

Agarik-o. (Agaricus)




Agat-o.
Speco de kvarco.



Agav-o. (Agave)

Agend-o.
Ĉiutaga notlibro.




Agent-o.
Peranto komisiita de firmo por fari negocojn.



Juvelagento.

Agit-i. (TR.) Skui, Inciti.



Agitas la medikamenton



Politika agitanto.

Agl-o. RABO-BIRDO (Aquila)



Agoni-o
La lastaj suferoj de mortanto.



La lasta agonia batalo.


Agord-i. **Konformigi.** (TR.)



Agordas instrumentojn.




Agorda bobeno.




Agordas radiaparaton.

Agrabl-a. **Plaĉa.**




Agrabla odoro.



Malagrabla odoro.

1	AGREEABLE	21	PRIJEMNÝ
2	AGRÉABLE	22	PRIJETEN
3	AGRADABLE	23	PRIJATAN
4	PIACEVOLE	24	KELLEMES
5	AGRADAVEL	25	I E PËLQYSHËM
6	AGREABEL	26	MÕNUS, MEELDIV
7	AGRADABLE	27	MIELLYTTÄVÄ
8	PLĂCUT	28	PATIKAMS
9	ANGENEHM	29	MALONUS
10	AANGENAAM	30	AANGENAAM
11	BEHAGELIG	31	þægilegur
12	BEHAGELIG	32	[illegible]
13	ANGENÄM	33	MUVAFIK
14	[illegible]	34	ΕΥΧΑΡΙΣΤΟΣ
15	PRZYJEMNY	35	BODDUS
16	ПРИЯТНЫЙ	36	[illegible]
17	ПРИЯАТЕНЪ	37	دلپسند
18	ПРИЈАТАН	38	נעים
19	ПРИЄМНИЙ	39	合意
20	PŘÍJEMNÝ	40	氣持のよい

Agraf-o. SPECO DE METALHOKETO.



Agrikultur-o.
'Kulturado de la tero.




Aĝ-o. TEMPO DEPOST NASKIĜO



1	AGE	21	VEK
2	ÅGE	22	STAROST
3	EDAD	23	DOBA, STAROST
4	ETÀ	24	KOR, ÉLETKOR
5	EDADE	25	VËRSË
6	ETED (ETÀ)	26	VANUS, IGA
7	EDAT	27	IKÄ
8	VÂRSTĂ	28	VECUMS
9	ALTER	29	AMŽIUS
10	OUDERDOM	30	OUDERDOM
11	ALDER	31	aldur
12	ALDER	32	[illegible]
13	ÅLDER	33	SINN
14	[illegible]	34	HAIKIA
15	WIEK	35	OED
16	ВОЗРАСТ	36	[illegible]
17	ВЪЗРАСТЬ	37	سن
18	УЗРАСТ	38	[illegible]
19	BIK	39	年齢
20	VĚK, STÁŘÍ	40	年齡

Ajl-o.(Allium Sativum)



VEGETAĴO UZATA KIEL SPICAĴO. EKZ. POR KOLBASOJ.

Ajn. SENDIFINA VORTO (VIDU LA EKZEMPLOJN)



Kiam ajn mi preteriras, li sidas ĉe la fenestro.



Kiam ajn Johano iras en la strato, li kunprenas la hundon.





Donu al mi ion ajn!
Jen estas peco da pano.


Kiam ajn vi venos, mi atendos vin. Kiu ajn vi estas, mi vin ne konas. Mi akceptos, kiom ajn vi donos al mi. Venu kiam ajn vi volas. Kien ajn vi iros, mi iros kun vi. Iu ajn el ĉi tiuj knaboj povas tion fari. Ĉu vi ne bonvolu doni al mi ion ajn por trinki. Ĉi tiu metodo ebligas iun ajn personon, el iu ajn lando, lerni la Esperantan lingvon sen instruanto. Kiel ajn li provis li tamen ne povis levi la ŝtonon.

-aĵ. (VIDU LA EKZEMPLOJN.)
Sufikso esprimanta ion konkretan aŭ ion faritan el tio, kion esprimas la radiko.





































La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian **fotografaĵon** al mia patro. Vi parolas **sensencaĵon**, mia amiko. Mi trinkis teon kun **konfitaĵo**. Akvo estas **fluidaĵo**. Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan **malklaraĵon**. Sur la tablo staris diversaj **sukeraĵoj**. Via vino estas nur ia abomena **acidaĵo**. Mi manĝis bongustan **ovaĵon**. Tiu ĉi granda **altaĵo** ne estas natura monto. Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da **pakaĵo**. Ĉemizojn, kolumojn, kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas **tolaĵo**. **Glaciaĵo** estas dolĉa glaciigita **frandaĵo**. La tuta **supraĵo** de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj **kreskaĵoj**. Starante sur la supro de la monteto, kiu estas apud nia domo, li vidis la tutan **ĉirkaŭaĵon**. Mi jam vidis ĉiujn **vidindaĵojn** de via urbo. Li estas senespere malsana, kaj savi lin povas nur ia **miregindaĵo**. Li sendis al mi tre belan **pentraĵon**. Tiu ĉi **skribaĵo** estas apenaŭ legebla.

Akaci-o. (Acacia)



Akademi-o.

Supera lernejo, societo de scienculoj, artistoj.

Akar-o.



Akcel-i. (TR.) **Plirapidigi.**



Por akceli la kompletigon de la fervojo, la laboristoj laboras tage kaj nokte.

1	TO HASTEN	21	URÝCHLIT'
2	ACCÉLÉRER	22	POSPEŠEVATI
3	ACELERAR	23	POSPJEŠITI
4	ACCELERARE	24	ELŐMOZDITANI
5	ACELERAR	25	ME NXITU
6	ACCELERER	26	EDENDAMA
7	ACCELERAR	27	KIIRUHTAA
8	A GRĂBI	28	VEICINĀT
9	FÖRDERN	29	PAGREITINTI
10	VERHAASTEN	30	VERHAASTEN
11	FREMSKYNDE	31	flýta sjer
12	FREMSKYNDE	32	[illegible]
13	PÅSKYNDA	33	ACELE ETMEK
14	[illegible]	34	BIAZOMAI
15	PRZYSPIESZAĆ	35	EBRWYDDO
16	СПОСПЕШЕСТВОВАТЬ	36	استعجل
17	УСКОРЯВАМЪ	37	تسريع
18	ПРИСПЕВАТИ	38	[illegible]
19	ПРИСПІШАТИ	39	快行
20	URYCHLITI	40	急ぐ

Akcent-i. (TR.)
Pliaitigi la voĉon sur unu silabo de vorto.

ESPÉRO.
ESPERÁNTO.
ESPERANTÍSTO.
ESPERANTISTÍGILO.

Akcept-i. (TR.)



Akceptas gaston.



Akceptas la inviton.




Akceptas la donacon

1	ACCEPT	21	PRIJAT'
2	ACCEPTER	22	SPREJETI
3	ACEPTAR	23	PRIHVATITI
4	ACCETTARE	24	ELFOGADNI
5	ACEITAR	25	ME PRANU
6	ACCEPTER	26	VASTU VÕTMA
7	ACCEPTAR	27	OTTAA VASTAAN
8	A PRIMI	28	PIENEMT
9	ANNEHMEN	29	PRIIMTI
10	AANNEMEN	30	AANNEMEN
11	MODTAGE	31	tàka við
12	TAIMOT	32	[illegible]
13	MOTTAGA	33	KABUL ETMEK
14	[illegible]	34	ΔΕΧΟΜΑΙ
15	PRZYJMOWAĆ	35	DERBYN
16	ПРИНИМАТЬ	36	قبل
17	ПРИЕМАМЪ	37	قبول
18	ПРИМАТИ	38	[illegible]
19	ПРИНИМАТИ	39	收存
20	PŘIJMOUTI	40	受入れる

Akcesor-a.
Flanka, ne ĉefa.

Akci-o.
Atesto pri partopreno en komerca entrepreno.




Akcident-o.



Malfeliĉa okazo.

Akcipitr-o. (Astur)



Akciz-o.
Imposto pagata por trinkaĵoj, Mangaĵoj, k.c.

Akir-i. (TR.) HAVIGI AL SI.



Per ekzercado, ni akiras lertecon.

1	ACQUIRE	21	ZÍSKAT'
2	ACQUÉRIR	22	PRIDOBITI
3	ADQUIRIR	23	PRIVRIJEDITI
4	ACQUISTARE	24	MEGSZEREZNI
5	ADQUIRIR	25	ME BLE, MEFITU
6	ACQUISTER	26	SAAVUTAMA
7	ADQUIRIR	27	HANKKIA
8	A DOBÀNDI	28	IEGŪT
9	ERWERBEN	29	ĮGITI
10	VERKRIJGEN	30	KOOPEN
11	ERHVERVE	31	ná, tá, afla
12	ERHVERVE	32	[illegible]
13	FÖRVÄRFVA	33	ISTIHSAL ETMEK
14	[illegible]	34	ΑΠΟΚΤΩ
15	ZDOBYĆ	35	CAFFAEL
16	ПРИОБРЕТАТЬ	36	حصل
17	ПРИДОБИВАМЪ	37	كسب
18	ЗАДОБИТИ	38	[illegible]
19	NАБУВАТИ	39	得到
20	ZÍSKATI	40	獲得する

Aklam-i. (TR.)
Akcepti per favoraj krioj.



Aklamas la heroon.

Akn-o.
Makuleto kaj tubereto sur la haŭto.



1	ACNE, PIMPLE	21	PUPENEC
2	BOUTON	22	OGREC
3	GRANO	23	PRIŠT
4	PUSTOLA	24	BŐRPÜRSENÉS
5	BORBULHA	25	PUÇËRRË
6	CLOUDER	26	VISTRIK
7	GRA	27	NÄPPYLÄ
8	BUBĂ	28	PUTĪTE
9	PIMPEL	29	ŠAŠAS
10	PUIST	30	PUIST
11	BLEGN	31	nabbi, bóla
12	FILIPENS	32	[illegible]
13	FINNE	33	ÇIBAN
14	[illegible]	34	ΕΠΥΡΙ
15	WAGIER	35	PYLORYN
16	УГОРЬ	36	حب الصبا
17	ПЪПКА	37	جوش
18	УГОР	38	[illegible]
19	УГОР	39	丘疹
20	UHRY	40	ニキビ

Akomod-i. (TR.)
Alĝustigi, Alkonformigi. ADAPTI IOn, POR KE ĜI FUNKCIU.

Akompan-i. (TR.) AGI KUNIU.



Akompanas la kantistinon per la piano.



La grumo akompanas la fraŭlinon.
La hundo akompanas la ĉasiston.

1	ACCOMPANY	21	SPREVÁDZAŤ
2	ACCOMPAGNER	22	SPREMLJATI
3	ACOMPAÑAR	23	PRATITI
4	ACCOMPAGNARE	24	KISÉRNI
5	ACOMPANHAR	25	ME SHOQËRU
6	ACCUMPAGNER	26	SAATMA
7	ACOMPANYAR	27	SEURATA
8	A ÎNSOŢI	28	PAVADĪT
9	BEGLEITEN	29	PALYDĖTI
10	VERGEZELLEN	30	VERGEZELLE
11	LEDSAGE	31	fylgja
12	LEDSAGE	32	[illegible]
13	ÅTFÖLJA	33	REFAKAT ETMEK
14	[illegible]	34	ΣΥΝΟΔΕΥΩ
15	TOWARZYSZYĆ	35	CYDGANLYN
16	АКОМПАНИРОВАТЬ	36	[illegible]
17	АКОМПАНИРАМЬ	37	[illegible]
18	СПРОВОДИТИ	38	הלוה
19	СУПРОВОДЖАТИ	39	[illegible]
20	DOPROVODITI	40	伴い, 伴奏する

Akonit-o.
Venena vegetaĵo uzata en medicino. (Aconitum napellus)



Akord-i. (NTR.)
Reciproka harmonio.




Akordeco.



Akordo.

Akordion-o.



Akordionet-o.



Akr-a. TRANĈA AŬ PIKA.



Ho, kia akra tranĉilo!

1	ŠHARP	21	OSTRÝ
2	AIGU	22	OSTER
3	AGUDO	23	OŠTAR
4	AGUZZO	24	ĖLES
5	AGUDO	25	ME MAJË
6	TAGLIAINT	26	TERAV
7	ESMOLAT	27	TERÄVÄ
8	ASCUŢIT	28	ASS (ĪPAŠIBA)
9	SCHARF	29	AŠTRUS
10	SCHERP	30	SCHERP
11	SKARP	31	beittur
12	SKARP	32	[illegible]
13	SKARP	33	KESKIN
14	[illegible]	34	KOΠTEPOΣ
15	OSTRY	35	MINIOG
16	ОСТРЫЙ	36	حاد
17	ОСТЪРЪ	37	تیز
18	ОШТАР	38	[illegible]
19	ОШТАР	39	[illegible]
20	OSTRÝ	40	鋭い

Akrid-o. (Locusta)




Lokusto.


Akrobat-o.
Gimnastikisto.



Aks-o. Linio ĉirkaŭ kiu turniĝas korpo.



Aksel-o.
Subbrako.





Pudras la akselon.

Aksiom-o. Vero evidenta per si mem.

Akt-o. Dramparto.



La unua akto de la opero Karmen. (2 OFICIALA DOKUMENTO.)

Aktini-o.
Ĥemia elemento, Metalo, Simbolo- Ac, Atompezo 226.0, eltrovita en 1899.

Aktiv-a.
Aganta, Laboranta. (Vidu -Ant.)




Aktor-o.
Artisto ludanta rolon en dramo, tragedio aŭ komedio.






Kelkaj famaj filmaktoroj.

Aktual-a. Efektiva.



Kiom da kuboj aktuale troviĝas en ĉi tiu bildo? Jen ses, jen sep. Kiom?

Akumulator-o.
Elektroamasigilo.



Akurat-a
Je la ĝusta tempo.
Je la ĝusta maniero.



Akurata tajloro.




Akurata tempo.

Akustik-o.
Scienco pri sonoj.







Akuŝ-i. (TR.) Eligi maturan homan idon.



La akuŝintino, la ĵus naskita infano kaj la akuŝistino.

Akut-a. AKRA, PINTA, NELONGEDAURA.




Akuta angulo.



Akuta kataro.

Akuz-i. (TR) Aserti ies kulpon.




Akuzas Karlon, ke li rompis la spegulon.

Akuzativ-o. (VIDU LA EKZEMPLOJN.) Kazo esprimanta la rektan komplementon de verbo, celon de movo.



Jen estas la pomo, kiun mi trovis. Al leono ne donu la manon. Mi vidas leonon, Mi amas la patron. Mi konas Johanon, Ludoviko, donu al mi la pomon. Donu al la birdoj akvon, La knabo forpelis la birdojn. Mi batas Aleksandron. Mi legas libron. La patro ne legas libron, sed li skribas leteron. Rakontu al mia juna amiko belan historion. Mi deziras al vi bonan tagon. Mi ne amas obstinajn homojn. En la tago ni vidas la belan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn. Mi havas pli freŝan panon, ol vi. Unu vidvino havis du filinojn. Mi havas nur unu buŝon, sed mi havas du orelojn. Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj. Kiun daton ni havas hodiaŭ? Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro. Mil jaroj faras jarmilon. Unue mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; due mi dankas vin por la prunto; trie mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon. Por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon. Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn. Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn. Ĉiu ti libro havas sesdek paĝojn. Mi finos la tutan libron en kvar tagoj. Li amas min, sed mi lin ne amas. Mi volis lin bati, sed li forkuris de mi. Diru al mi vian nomon. Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn. Mi rakontos al vi historion. Ĉu vi diros al mi la veron? Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas iliajn. Montru al ili vian novan veston. Mi amas min mem, vi amas vin mem, li amas sin mem, kaj ĉiu homo amas sin mem. Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem. Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian. Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia cambro. Oni ne forgesas facile sian unuan amon. Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min. Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron. Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? Mi Ĝin ankoraŭ ne serĉis. Kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon. Kien vi iras? Mi iras en la ĝardenon. La birdo flugas en la ĉambron. Mi vojaĝas en Hispanujon. Mi metis la manon sur la tablon. El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ŝi kuras sub la lito. Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero. La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj. Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro. Morgaŭ mi veturos Parizon. Jam estas tempo iri domen. Ni disiĝis kaj iris diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. Mi konas neniun en tiu ĉi urbo. Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas. Mi renkontis nek lin nek lian fraton. Mi ridas lian naivecon. Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. Mi sopiras mian perditan feliĉon. Li fermis kolere la pordon. Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon. Ŝteliston neniu lasas en sian domon. Timulo timas eĉ sian propran ombron. Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari. Transportu la seĝon de tie ĉi sur alian lokon. Estante en la cigarejo, mi aĉetis dek cigarojn; naŭ el ili mi metis en mian cigarujon kaj unu mi metis en mian cigaringon kaj ekfumis. La venontan dimanĉon mi veturos Hamburgon.

Akv-o. H_2O. LA FLUIDO DE RIVERO, MARO.



1	WATER	21	VODA
2	EAU	22	VODA
3	AGUA	23	VODA
4	ACQUA	24	VIZ
5	AGUA	25	UJE
6	OVA (AUA)	26	VESI
7	AIGUA	27	VESI
8	APĂ	28	ŪDENS
9	WASSER	29	VANDUO
10	WATER	30	WATER
11	VAND	31	votur, vatn
12	VANN	32	ջուր
13	VATTEN	33	SU
14	ئولكا	34	ΥΔΩΡ
15	WODA	35	DWFR
16	ВОДА	36	ماء
17	ВОДА	37	آب
18	ВОДА	38	מים
19	ВОДА	39	水
20	VODA	40	水

Akvafort-o. Gravuraĵo ĥemie farita sur kupro.



Akvarelo. Pentraĵo farita per akvesolvitaj farboj.


Akvari-o. AKVUJO POR FIŜOJ.



Akvedukt-o. AKVOKONDUKILO.



Akvofal-o.



Akvomelon-o. (CUCUMIS CITRULLUS) SPECO DE MELONO.



Al. (PREPOZICIO.) VIDU LA EKZEMPLOJN



1	TO	21	K
2	Å. VERS	22	K
3	Á. HACIA	23	K
4	A. VERSO	24	-HOZ, -HEZ, -NAK, -NEK
5	A. PARA	25	NĖ, KAH
6	A. VERS	26	JUURE, -LE

7	A, VERS	27	LUOKSE, -LLE
8	LA, CĂTRE	28	PIE
9	ZU	29	PAS, Į, PRIE
10	AAN, NAAR	30	NAAR
11	TIL	31	til, við, að
12	TIL	32	[illegible]
13	ÅT, FOR, TILL	33	.....E, ...A
14	ИЗ	34	ΕΙΣ, ΠΡΟΣ,
15	DO	35	AT, TUAGAT, I
16	K	36	إلى
17	КЪМ, ВЪЗ	37	به
18	K	38	[illegible]
19	ДО	39	[illegible]
20	K	40	へ に

La rozo apartenas **al** Teodoro. **Al** leono ne donu la manon. Diru **al** la patro, ke mi estas diligenta. Donu **al** la birdoj akvon. Mi iras nun **al** la onklo. La patro donis **al** mi dolĉan pomon. Rakontu **al** mia juna amiko belan historion. Mi deziras **al** vi bonan tagon. Unue mi redonas **al** vi la monon, kiun vi pruntis **al** mi. Trie mi petas vin ankaŭ poste prunti **al** mi, kiam mi bezonos monon. Diru **al** mi vian nomon. Venu **al** mi hodiaŭ vespere. Ĉu vi diras **al** mi la veron? Kiam mi venis **al** li, li dormis. Li venu, kaj mi pardonos **al** li. Ordonu **al** li, ke li ne babilu. Petu ŝin, ke ŝi sendu **al** mi kandelon. Nun li diras **al** mi la veron. Hieraŭ li diris **al** mi **la** veron. Li ĉiam diradis **al** mi la veron. La birdo ne forflugis; ĝi nur deflugis de la arbo, **alflugis al** la domo, kaj surflugis sur la tegmenton. Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto **aldonas** senpage funton da sukero. **Alportu al** mi metron da nigra drapo. Li venigis **al** si el Berlino multajn librojn.

Alabastr-o.
Speco de gipso similanta marmoron, el kiu oni faras diversajn objektojn, statuetojn k.c.



Alabastra statueto.

Alarm-o. **Signalo por anonci danĝeron.**



Sonorigas alarmon.

Alaŭd-o.
Speco de kantobirdo.



(Alauda arvensis)

Alaŭdfalk-o. (FALCO ALAUDARIUS)



Albatros-o. (DIOMEDEA)



Album-o.
Bindaĵo por konservi fotografaĵojn.




Alcion-o. (ALCEDO)



Ald-o. **Plej malalta virina voĉo.**



speco de



trumpeto. violono.

Ale-o.
Vojo ombrita per arboj.




Alegori-o.
Materiigo de abstraktaj ideoj.



justeco

Alen-o. SPECO DE PINTA ILO.



Alfabet-o. LITERLISTO.

A B C Ĉ D E F
G Ĝ H Ĥ I J Ĵ
K L M N O P R
S Ŝ T U Ŭ V Z.


Alfenid-o.
Metala komponaĵo el kupro, zinko kaj nikelo.



Alfenida fruktujo

Alg-o. **Speco de marherbo.**

Algebr-o.
Kalkulsistemo, en kiu oni uzas literojn anstataŭ ciferoj.



Alĥemi-o.
Kvazaŭ-hemio de la mezaj centjaroj, per kiu oni penis aliigi krudajn metalojn en oron.

Ali-a. **Dua, malsama.**
(VIDU LA EKZEMPLOJN.)


UNU FLANKO ESTAS AKRA, LA ALIA MALAKRA. — UNU FINO HAVAS PINTON, LA ALIA GLOBON.

1	OTHER	21	INÝ
2	AUTRE	22	DRUG
3	OTRO	23	INI, DRUGI
4	ALTRO	24	MÁS, MÁSIK
5	OUTRO-A	25	TJETËR
6	OTER	26	TEINE, MUU
7	ALTRE	27	TOINEN, MUU
8	ALTUL, ALTA	28	CITS, OTRS
9	ANDERER	29	KITAS
10	ANDER	30	ANDER
11	ANDEN	31	annar
12	ANNEN	32	[illegible]
13	ANNAN	33	BAŞKA
14	[illegible]	34	ΑΛΛΟΣ
15	INNY	35	ARALL, LLALL
16	ИНОЙ	36	آخر
17	ДРУГ	37	دیگر
18	ДРУГИ	38	[illegible]
19	ІНШИЙ	39	[illegible]
20	JINÝ	40	他の

Mi lin ne vidis, **alie** mi dirus al li la veron. Kelkaj personoj diras, ke li estas bela, dum **aliaj** diras, ke li estas malbela. prenu, kion mi donas al vi, **alie** vi ricevos nenion. Unuj el la lernantoj skribas kaj la **aliaj** legas. Lia hodiaŭa konduto estas tute **alia**. Manĝu la panon, **alie** vi estos malsata. Vi trovos tie multajn **aliajn** personojn. Unu aŭ **alia** estas egale por mi.

Alibi-o. **La pruvo donita, ke la akuzito estis aliloke dum la krimo estis plenumita.**

Aligator-o. SPECO DE AMERIKA KROKODILO.




Aline-o. ↦ **La malplena spaco je la komenco de paragrafo.**

Alk-o. (CERVUS ALCES)
Speco de cervo.




Alkohol-o.
La esenca parto de brando kaj aliaj ebriigaj trinkaĵoj.





alkoholulo.

Alkov-o
Senfenestra ĉambreto.



Almanak-o. Jarlibro enhavanta la kalendaron de la jaro kaj aliajn diversajn informojn.

Almenaŭ. (NE MALPLI. (V. EKZEMPLOJN.))



Donu almenaŭ pecon da pano, bona sinjoro.

1	AT LEAST	21	ASPOŇ
2	AU MOINS	22	VSAJ
3	AL MENOS	23	BAREM
4	ALMENO	24	LEGALÁBB
5	PELO MENOS	25	TË PAKTËN
6	ALMAIN	26	VÄHEMALT
7	ALMENYS	27	AINAKIN
8	CEL PUTIN	28	VISMAZ
9	WENIGSTENS	29	BENT
10	TEN MINSTE	30	DEN MINSTE
11	I DET MINDSTE	31	að minnsta
12	I DET MINSTE	32	[illegible]
13	ÅTMINSTONE	33	AKALLI
14	[illegible]	34	ΤΟΥΛΑΧΙΣΤΟΝ
15	PRZYNAJMNIEJ	35	O LEIAF
16	ПО КРАЙНЕЙ МЕРЕ	36	على الاقل
17	ПОНЕ	37	اقلا
18	БАРЕМ	38	לפחות
19	АРИКАЙМНІ	39	最少
20	ALESPOŇ	40	少くとも

Mi almenaŭ provos, eble mi sukcesos. Mi estos okupata almenaŭ tri horojn. Donacu al mi almenaŭ unu pomon. Se li almenaŭ skribus leteron, por ke mi sciu, kie li estas. Se vi ne helpas min, almenaŭ ne malhelpu. Por fari ĉi tion mi bezonas almenaŭ cent dolarojn. La parolo daŭros almenaŭ du horojn.

Almoz-o. mondonaco.



1	ALMS	21	ALMUŽNA
2	AUMÔNE	22	MILOŠČINA
3	AUMÔNE	23	MILOSTINJA
4	ELEMOSINA	24	ALAMIZSNA
5	ESMOLA	25	LIMOSHË
6	ALMOUSNA	26	ARMUAND
7	ALMOINA	27	ALMU
8	POMANĂ	28	UBAGU DĀVANA
9	ALMOSEN	29	IŠMALDA
10	AALMOES	30	AALMOES
11	ALMISSE	31	ölmusa
12	ALMISSE	32	[illegible]
13	ALLMOSA	33	SADAKA
14	[illegible]	34	ΕΛΕΗΜΟΣΥΝΗ
15	JAŁMUŽNA	35	ELUSEN
16	МИЛОСТЫНЯ	36	صدقة
17	МИЛОСТИНЯ	37	صدقة
18	МИЛОСТИНЯ	38	צדקה
19	МИЛОСТИНЯ	39	施舍
20	ALMUŽNA	40	施物

Aln-o. (alnus)



Alo-o. (aloe)
Kreskaĵo liveranta laksigan rezinon.



Alopati-o. Kuracado per kontraŭaĵoj.

Alopeci-o.
Tuta aŭ parta senhareco de la kapo.



Alos-o. Speco de fiŝo (Glupea alosa)



Alpak-o.
Speco de ŝafo, el kies lano oni fabrikas la alpakan ŝtofon.




Alt-a. GRANDA EN VERTIKALA DIREKTO.





1	HIGH, TALL	21	VYSOKÝ
2	HAUT	22	VISOK
3	ALTO	23	VISOK
4	ALTO	24	MAGAS
5	ALTO	25	I E LARTË
6	OT, OTA	26	KÕRGE
7	ALT	27	KORKEA
8	ÎNALT	28	AUGSTS
9	HOCH	29	AUKŠTAS
10	HOOG	30	HOOG
11	HØJ	31	hár, stór
12	HØJ	32	[illegible]
13	HÖG	33	YÜKSEK
14	הויך	34	ΥΨΗΛΟΣ
15	WYSOKI	35	UCHEL
16	ВЫСОКИЙ	36	عال
17	ВИСОКЪ	37	بلند
18	ВИСОК	38	גבוה
19	ВИСОКИЙ	39	高
20	VYSOKÝ	40	高い

Altar-o.
Tablo por Diservo.



Alte-o. (althaea)



Altern-i. (NTR.) Sekvi laŭvice.



La suno kaj la luno eterne alternas.



La mano de unu knabo alternas la manon de la dua ĝis la fino de la bastono.

Alternativ-o.
La elekto de unu el du kontraŭaj aferoj.

Altrelief-o.
Surmura skulptaĵo. (V. Reliefo.)



Alud-i. (TR.) NEREKTE PAROLI PRI IU.



Ĉu li aludas min?

1	ALLUDE	21	DOTÝKAT'SA
2	FAIRE ALLUSION	22	NAMIGOVATI
3	ALUDIR	23	CILJATI
4	ALLUDERE	24	PÉLDÁLÓDZNI
5	ALUDIR	25	ME THËNE PER
6	FER ALLUSIUN	26	PEALE TAHENDADA
7	ALUDIR	27	VIITATA JOHONKIN
8	A FACE ALUZIE	28	APLINKUS AIZRĀDIT
9	ANSPIELEN	29	DUOTI SUPRASTI
10	ZINSPELEN	30	ZINSPELEN
11	HENTYDE TIL	31	SVEIGJA AÐ
12	HENTYDE TIL	32	[illegible]
13	BÄNSYFTA PÅ	33	IMA ETMEK
14	[illegible]	34	ΥΠΑΙΝΙΣΣΟΜΑΙ
15	NAPOMKNAĆ	35	CRYBWYLL AM
16	НАМЕКАТЬ	36	اشار
17	НАМЕКВАМЪ	37	كنايه كردن
18	НАМІГІВАТИ	38	רמז
19	НАТЯКАТИ	39	暗指
20	NARÁŽETI	40	ほのめかす

Alumet-o. LIGNA EKBRULIGILO.


alumeto. alumetujo.



Ekbruligas alumeton.

1 MATCH	21 ZÁPALKA
2 ALLUMETTE	22 VŽIGALICA
3 CERILLA	23 ŠIBICA
4 FIAMMIFERO	24 GJUFA
5 PHOSPHORO	25 SHPIRTSE
6 ZURPLIN	26 TULETIKK
7 MISTE	27 TULITIKKU
8 CHIBRIT	28 SĖRKOCIŊ3
9 STREICH-HOLZ	29 DEKTUKAI
10 LUCIFER	30 SOLFERSTEK
11 TAENDSTIK	31 eldspýta
12 FYRSTIKK	32 [illegible]
13 TÄNDSTICKA	33 KIBRIT
14 [illegible]	34 ΠΥΡΕΙΟΝ
15 ZAPAŁKA	35 MATSEN
16 СПИЧКА	36 طابقة
17 КЛЕЧКА	37 كبريت
18 РАЛИДРВЦЕ	38 [illegible]
19 СІРНИК	39 火材
20 ZÁPALKA	40 マッチ

Alumini-o. Ĥemia elemento, metalo, simbolo Al, atompezo 26.97, eltrovita en 1827.



aluminiaj potoj.

Am-i. (TR.) KARE ŜATI UN AŬ ION.

Amoro, la dio de amo.











AMINDA INFANO.



amindumas. MALAMO.



Afrodito kaj Areso. Afrodito estis la Greka diino de amo.

1 LOVE, LIKE	21 MILOVAT'
2 AIMER	22 LJUBITI
3 AMAR	23 LJUBITI
4 AMARE	24 SZERETNI
5 AMAR	25 ME DASH
6 AMER	26 ARMASTAMA
7 AIMAR	27 RAKASTAA
8 IUBI	28 MĪLĒT
9 LIEBEN	29 MYLĖTI
10 LIEFHEBBEN	30 MINNEN
11 ELSKE	31 lika, elska
12 ELSKE	32 [illegible]
13 ÄLSKA	33 SEVMEK
14 [illegible]	34 ΑΓΑΠΩ, ΑΡΕΣΩ
15 LUBIĆ	35 SERCH, CARIAD
16 ЛЮБИТЬ	36 حب
17 ЛЮБЯ	37 دوست داشتن
18 ЉУБИТИ	38 [illegible]
19 ЛЮБИТИ	39 愛
20 MILOVATI	40 愛す

Amalgam-o.

Miksaĵo de hidrargo kaj alia metalo.

Amar-a.

Tre maldolĉa.
Amara kiel galo.

Amarant-o. (AMARANTUS)



Amarilis-o. (AMARYLLIS)



Amas-o.

Granda nombro da ...
Granda kvanto da ...
Multo de io.



AMASO DA HOMOJ.



AMASO DA KOKINOJ.

1 CROWD, MASS	21 MNOŽSTVO
2 AMAS, FOULE	22 MNOŽICA
3 MULTITUD	23 MNOŠTVO
4 FOLLA	24 TÖMEG
5 MULTIDÃO	25 GRUMBULL
6 MASSA	26 HULK
7 MULTITUD	27 JOUKKO
8 GRĂMADĂ	28 PŪLIS, ČUPA
9 MENGE	29 KRŪVA
10 MENIGTE	30 MENIGTE
11 BUNKE, HOB	31 hrúga, hópur
12 BUNKE, HOP	32 [illegible]
13 HOP, SKARA	33 KALABALIK, KUME
14 [illegible]	34 ΠΛΗΘΟΣ
15 KUPA, MASA	35 TORF, CASGLU
16 ТОЛПА	36 [illegible]
17 ТЪЛПА	37 [illegible]
18 ГОМИЛА	38 [illegible]
19 НАТОВП	39 擁擠
20 DAV, MNOŽSTVÍ	40 集團

Amator-o. Persono havanta inklinon al io. Ne profesionala.



radio-amatoro.

Ambasador-o. SENDITO DE UNU ŜTATO AL ALIA. REPREZENTANTO DE UNU REGNO ĈE ALIA.



DEBUCHI.



M.T. HERRICK.



FILIPOWICZ.



CHAS. G. DAWES.



BORDANARO.

Kelkaj ambasadoroj dum 1929 - 1930.

Ambaŭ. DU KUNE.



UNU VIRO SIDAS KAJ UNU VIRO STARAS.



AMBAŬ VIROJ STARAS.



UNU VIRO SIDAS KAJ UNU VIRO KUŜAS.



AMBAŬ VIROJ SIDAS.

1 BOTH	21 OBA
2 TOUS LES DEUX	22 OBA
3 AMBOS	23 OBA
4 AMBEDUE	24 MINDKETTŐ
5 AMBOS	25 QE TE DY (A)
6 AMENDUOS	26 MÕLEMAD
7 AMBOŌS	27 MOLEMMAT
8 AMÂNDOUĂ	28 ABI
9 BEIDE-ES	29 ABU
10 BEIDE	30 DE TWEE
11 BEGGE	31 báðir
12 BEGGE	32 [illegible]

13	BÁGGE	33	HER IKISI
14	[illegible]	34	AMΦOTEPOI
15	OBAJ	35	Y DDAU OMOK
16	ОБА	36	كلا
17	ИДВАМАТА	37	هردو
18	ОБАДВА	38	[illegible]
19	ОБИДВА	39	二者並之
20	OBA	40	両方とも

Ambici-o. Gloramo, Forta deziro de famo.




Ambos-o. FORĜISTA FERABLOKO.



Ambr-o.
Speco de rezina aroma substanco uzata, kiel incenso.

Ambrozi-o. Tre bongusta manĝaĵo. Manĝaĵo de la Grekaj Dioj.

Ambulanc-o. MOVEBLA HOSPITALO.



Ameb-o. Mikroskopa plej simpla formo de viva ekzistaĵo.



Amel-o.
Substanco uzata por rigidigi tolaĵon.



ameligita kolumo



neameligita kolumo

Amen.
La vorto uzata je la fino de preĝo.



Ametist-o.
Speco de juvelŝtono de viola koloro.




Amfibi-o. Vertebrulo kapabla vivi sur la tero aŭ en akvo.



RANO SALAMANDRO KROKODILO

Amfiteatr-o. ANTIKVA RONDA KONSTRUO POR SPEKTAKLOJ. 2. ĈAMBREGO POR AŬSKULTANTOJ.



Amfor-o.
SPECO DE ANTIKVA VAZO.



Amik-o. PERSONO, KORLIGITA KUN ALIA.



amikeco



malamikeco

1	FRIEND	21	PRIJATEL'
2	AMI	22	PRIJATELJ
3	AMIGO	23	PRIJATELJ
4	AMICO	24	BARÁT
5	AMIGO	25	MIK
6	AMIH (AMI)	26	SÕBER
7	AMIC	27	YSTÄVÄ
8	PRIETEN	28	DRAUGS
9	FREUND	29	DRAUGAS
10	VRIEND	30	VRIÈND
11	VEN	31	VINUY
12	VENN	32	[illegible]
13	VÄN	33	DOST
14	[illegible]	34	ΦΙΛΟΣ
15	PRZYJACIEL	35	CYFAILL
16	ДРУГ	36	صديق
17	ПРИЯТЕЛЬ	37	دوست
18	ПРИЈАТЕЉ	38	[illegible]
19	ПРИЯТЕЛЬ	39	朋友
20	PŘÍTEL	40	友人


Amnesti-o. Pardono al krimulo proklamita de regnestro.

Amnezi-o.
Perdo de la memoro.

Amoniak-o. Akva solvaĵo de azoto kaj hidrogeno havanta tre akran odoron.



Amonit-o.
Speco de fosilia konko.



Amor-o.




La dio de amo.

Amorf-a.
Senforma. Io, kies formo ne estas regula.


Amortiz-i. (TR.)
Nuligi ŝuldon per regulaj partopagoj.

Amper-o. MEZURUNUO DE ELEKTRA INTENSECO.

Ampermetr-o. Instrumento por mezuri la intensecon de kurento.




Ampleks-o.
Grado de grandeco, dimensio.



Grandampleksa verko.


Amput-i. (TR.)
Fortranĉi membron.



amputitaj manoj.

amputitaj kruroj

Amulet-o.
Objekto havanta la econ ŝirmi de malsano, danĝero aŭ sorĉo la personon, kiu ĝin portas.



Amuz-i. Distri. (TR.)



La infanoj sin amuzas.

Malnobla amuzaĵo.

1	AMUSE	21	ZABAVAT'
2	AMUSER	22	ZABAVATI
3	DIVERTIR	23	ZABAVLJATI
4	DIVERTIRE	24	MULATTATNI
5	DIVERTIR	25	ME LUJT
6	DIVERTIR	26	LÕBUSTAMA
7	DIVERTIR	27	HUVITTAA
8	A AMUZA	28	PAKAVĖT LAIKU
9	AMÜSIEREN	29	LINKSMINTIS
10	VERMAKEN	30	VERMAKEN
11	MORE	31	skemta
12	MORE	32	[illegible]
13	ROA	33	EĞLENDIRMEK
14	[illegible]	34	ΔΙΑΣΚΕΔΑΖΩ
15	BAWIĆ	35	DIFYRRU
16	ЗАБАВЛЯТЬ	36	[illegible]
17	ЗАБАВЛЯВАМЪ	37	[illegible]
18	ЗАБАВИТИ	38	[illegible]
19	БАВИТИ	39	使悦
20	BAVITI	40	娯します

-an. (VIDU LA EKZEMPLOJN.)

Sufikso esprimanta membron, loĝanton, adepton de...



urbano kaj vilaĝano.



pariziano. Mahometano.

La **ŝipanoj** devas obei la ŝipestron. Ĉiuj loĝantoj de regno estas **regnanoj**. **Urbanoj** estas ordinare pli ruzaj ol **vilaĝanoj**. La **Parizanoj** estas gajaj homoj. Nia urbo havas bonajn **policanojn**, sed nesufiĉe energian policestron. **Luteranoj** kaj **kalvinanoj** estas **kristanoj**. Germanoj kaj Francoj, kiuj loĝas en Rusujo estas **rusujanoj**. Li estas nelerta kaj naiva **provincano**. La loĝantoj de unu regno estas **samregnanoj**. La loĝantoj de unu urbo estas **samurbanoj**. La konfesantoj de unu religio estas **samreligianoj**.

Analiz-i. (TR.)
Disigi en elementojn.

Analog-a. **Simila en kelkaj rilatoj.**

Anagal-o. (ANAGALLIS ARVENSIS.)




Ananas-o. (ANANASSA SATIVA.)

SPECO DE AMERIKA FRUKTO




AŬ (BROMELIA ANANAS.)

Anas-o. (anas.)



Anatem-o.
Solena malbeno.


Anàtomi-ó.
Scienco pri la strukturo de organismoj.





HALLER. HUNTER
anatomiistoj.

Anĉ-o. LA LIGNA LANGETO DE KLARNETO.



Anĉov-o. (engraulis.)
Malgranda fiŝeto manĝata kiel apetitigilo.



Anekdot-o.
Spritaĵo, humoraĵo.



Aneks-i. (TR.) **Aligi al regno fremdan provincon, teritorion.**

Anemon-o. (anemono.)



Angelik-o. (angelica.) **Speco de tre aroma vegetaĵo.**



Angi-o. TUBETO, TRA KIU FLUAS LA SANGO AŬ NUTRAJ FLUIDAĴOJ DE BESTOJ.

Angil-o. (anguilla.)
Speco de fiŝo.



Angin-o.
Inflamo de la gorĝo.

Angor-o.
Sento de korpremo kaj sufoko.

Angul-o. —> L

△ ⬡

triangulo sesangulo

Angvis-o. (anguis.)
Nedanĝera serpentsimila rampulo.



Anĝel-o. ĈIELA ESTAĴO.



Anhidr-a. **Senakvigita ĥemia substanco.**

Anim-o.
Spirita principo de homo.



Aniz-o. (PIMPINELLA ANISUM.)



Ankaŭ. KAJ PLIE. (V. LA EKZEMPLOJN.)



1	ALSO	21	TIEŽ
2	AUSSI	22	TUDI
3	TAMBIÉN	23	TAKOGJER
4	ANCHE	24	IS, UZINTÉN
5	TAMBEM	25	EDHE
6	EIR	26	KA
7	TAMBÉ	27	MYÖSKIN
8	DEASEMENEA	28	ARĪ
9	AUCH	29	TAIP, PAT
10	OOK	30	OOK
11	OGSAA	31	einnig
12	OGSÅ	32	[illegible]
13	OCKSÅ	33	DAĤI
14	[illegible]	34	ΕΠΙΣΗΣ
15	TEŽ, TAKŽE	35	HEFYD
16	ТАКЖЕ	36	[illegible]
17	ТОЖЕ	37	[illegible]
18	ТАКО	38	[illegible]
19	ТАКОЖ	39	亦、又
20	TAKÉ	40	も亦

Ankaŭ mi venos. Li **ankaŭ** ĝin faris. **Ankaŭ** mi povas tion fari. La patrino dormas, kaj la infano **ankaŭ** dormas. Li skribas, kaj mi **ankaŭ** skribas. Ho jes, diris la maljunulino, ili **ankaŭ** devas morti. Sed vi devas **ankaŭ** pagi al mi, diris la sorĉistino. Li kaj **ankaŭ** ĉiuj aliaj admiris ŝian gracian figuron.

Ankiloz-o.
Senmoveco de artiko.

Ankoraŭ. GIS LA NUNA MOMENTO. (VIDU LA EKZEMPLOJN.)




Ankoraŭ ne pluvas, sed tuj ekpluvos.

1	YET, STILL	21	EŠTE
2	ENCORE	22	ŠE
3	TODAVIA	23	JOŠ
4	ANCÓRA	24	MÉG
5	AINDA	25	ÉDHE (AKOMA, HALA)
6	AUNCHA	26	VEEL
7	ENCARA	27	VIELÄ
8	ÎNCĂ	28	VĒL
9	NOCH	29	DAR
10	NOG	30	NOG
11	ENDNU	31	ennpå
12	ENNU	32	[illegible]
13	ÄNNU	33	HALA, YINEDE
14	עוד	34	AKOMH
15	JESZCZE	35	ETO
16	ЕЩЕ	36	بعد
17	ОЩЕ	37	باز
18	JOШ	38	[illegible]
19	ЄЩЕ, ЩЕ	39	[illegible]
20	JEŠTĚ	40	未だ, 更に

Mi **ankoraŭ** ne trovis mian ĉapelon. Ili bezonas **ankoraŭ** dek funtojn da pano. Ili revis kaj nun **ankoraŭ** revas pri tiu utopio. **Ankoraŭ** multe vi kuros, ĝis vi alkuros. **Ankoraŭ** unu fojon. Li **ankoraŭ** laboras. La tempo pasinta jam neniam venos; la tempon venontan neniu **ankoraŭ** konas. La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas **ankoraŭ** pli granda. Ĉu vi **ankoraŭ** ne manĝis? La lampo **ankoraŭ** brulas. La patro **ankoraŭ** ne venis. Li diris **ankoraŭ** kelkajn vortojn. La laboro ne estas **ankoraŭ** finita.

Ankr-o. FERA ILO POR FIKSI ŜIPON.



Anobi-o.
SPECO DE LIGNO-MANĜANTA INSEKTO. (ANOBIUM.)



Anod-o.




La pozitiva elektrodo de pilo.

Anomali-o.
Io ne normala.

Anonc-i. (TR.)
Antaŭsciigi publike.




Legas gazetanoncojn.





Anoncas la nomon de la vizitanto.

Anonim-a.
sennoma.


anonima letero.

Ans-o.

Anser-o. (anser.)



Anstataŭ. EN LA LOKO DE. (VIDU EKZEMPLOJN.)



Anstataŭ sukero, li metas salon en la teon.

1	INSTEAD	21	MIESTO (ĈOMO
2	AU LIEU DE	22	NAMESTO (U
3	EN VEZ DE	23	MJESTO (ČEGA
4	INVECE DI	24	HELYETT
5	EM VEZ DE	25	NË VEND TË
6	IMPÈ DA	26	ASEMEL
7	EN LLOC DE	27	SIJASTA
8	IN LOC DE	28	VIETĀ
9	ANSTATT	29	UZUOT,
10	IN PLAATS VAN	30	IN WEERWIL
11	I STEDET FOR	31	istaðinn
12	ISTEDEN FOR	32	փոխանակ
13	I STÄLLET FÖR	33	YERDE
14	[illegible]	34	ANTI
15	ZAMIAST	35	YN LLE
16	ВМЕСТО	36	عوضا عن
17	ВМѢСТО	37	بعرض
18	У МЕСТО	38	[illegible]
19	ЗАМІСТЬ	39	[illegible]
20	MÍSTO	40	の代りに

